**Armando Zecchin**




# LA HOMO KIU NE SUKCESIS TROMPI SIN MEM

*(materialoj por romano)*

UECI

Logobildo el publikaĵoj de la “Istituto di Indagini Psicologiche” de Milano ĉe kiu la aŭtoro magistriĝis pri Psikologio de la Skribo. Ĉar la bildo efike esprimas la simplecon kaj multifarecon de Esperanto, al la rakontinto estis permesite ĝin reprodukti ĉi tie.

# ANTAŬLEGE

La prefacanto, ĉi-kaze, antaŭe legas la tekston, poste konversacias kun la verkisto; plibone kun la verkistoj. Kaj esprimas opiniojn celantajn alproksimigi la leganton al la senco de la verko.

Kiu verkas estas ofte bridata pro la timo fali en ŝablonan senoriginalecan ripetadon de la jam dirita kaj aŭdita. Por gajni plialtan verŝajnecon forveni el tiu timo damaĝanta verkanton kaj leganton, oportunas, kiel okazis ĉi-kaze, sekvi la konsilon de tiu granda verkisto, kiu diris: "mi verkas nur pri tio kion mi sentas aŭ ekspertas, per la unuaj vortoj kiuj el menso svarmas al la plumo. Post tio, la romano ne bezonas alian elementon krom ke la leganto ekzistu, ke li ekzistu ja, ĉar neniun la legota teksto povas allogi krom legamanto. La tensio al la enhavo forgesigu eĉ la aspekton de la vortoj sur la papero… Se originaleco efektiviĝas, temu pri originaleco origina, ne serĉata".

Ĉu signifas ion la diversaj proponoj pli respektantaj la romanan enhavon? *Ĉu stumbliganto aŭ ĝojiganto?* kaj *materialoj por la romano: Ĉu stumbliganto aŭ ĝojiganto*? (tia estis la unua propono); ĉu *Romano eseanta* (estas la nelasta). Ja kiu la precipa karakterizo de tiu ĉi verko? Sendube, krome, la leganto trovos, ke pli taŭgas, eble pli alproksimiĝas al la vero, la distingo inter *materialoj* por romano kaj *materialoj* por eseo pri la viv- kaj mond-konceptado subkuŝanta kaj ĉirkaŭanta la verkisto-diktanton. Ĉu materialoj por romano aŭ por taglibro aŭ materialoj por eta esea sumo? Ĉiukaze eĉ en eroj aspekte eseecaj kaj deklaraj senteblas vereco kaj versimileco de ĉiu rakontero. Fine estis preferita *la homo kiu ne sukcesis trompi sin mem*

Preskaŭ en la tuta rakontaĵo oni devige uzas la impertinentecan formon de sennoma "mi", sed la nefortenebla eventuala narcisismo estas kovrita de la gvida taglibreco kaj de fona membiografieco. La romanformo naskiĝis preskaŭ hazarde: el amikecaj babiladoj dum kiuj la gasto rakontanta senvole ekscitis la intereson kaj plumon de kelkaj, kiuj fine sukcesis lin konvinki reordigi kaj dikti. La rakontanto, se anticipi, supreniradis la supran loĝejon de la sama domego je la deka ĝis la dekvara ĉiumatene por itallingve dikti al la amiko klavumanta sur komputilo, dum posttagmeze la registranto reordigadis kaj netigadis la provizore esperantigitajn tekstojn. Reaŭskultante, la postan matenon, la esperantigon de la diktita materialo, la rakontanto ekkonis kaj ekkomprenis kaj simpatiis esperanton ĝis poste ĝin ellerni kaj uzeti, pli ol dilentantece, kiel sian lingvon por la fina relegado de ĉi rakonto. La plaĉa ludo daŭris pli ol du jarojn, antaŭe kiel

malstreĉa konversacio, poste kiel asidua tasko, fine kun preciza celo: atingigi al la rakontaĵo la romanan formon en esperanto, kun bedaŭro tamen ke en ĝi, pro la ĉiam malfruanta aŭtora lingva kompetentiĝo, ne arte moderniĝas la lingvo. Tia alveno al la lingvo komprenigas stilajn "preferojn", preskaŭ ĉiam la plej ortodoksajn, kaj eble iam igos pli indulgaj legantojn kaj preskaŭ malpli oficialajn lingvo-gardistojn, kiuj tamen nun membriĝas en medio jam konscia kaj matura por rigardi ankaŭ trans lingvaj ŝatoj kaj simpatie respekti ankaŭ *eltrovan* esperanton… kiu vere nur ŝajne aspektas eltrova.

Ĉu protagonistoj el pura fantazio aŭ el vera vivo? Eblas, ke la rakontanto ilin profilis ĉerpante ne nur el siaj membiografiaj eroj, por pli klare interpreti sin mem; sed la personoj substance estas ellaboritaj varte de elvivaj protagonistoj, neniam, do, arte ŝovitaj aŭ tempe transigitaj; ili karakteriziĝas precipe funkciante kiel okazo kaj stimulo por sinforlaso al obstina introspektado ene de si mem ĉe la aŭtoro, en kiu luktas unuflanke la morala konscienco kaj aliflanke la fina persona volo, kun kontraŭdiraj rezultoj. La tuta romano, fakte, estas senpieca memanalizado de konsciencstato de la protagonisto, foje senindulga kaj nur ŝajne senutile ripeta, dum kiu psikaj konsciencaj tavoloj estas tradraŝataj ĝis aperigo de kontraŭdiroj, okulvide nekredeblaj: kredeblaj, male, nur ĉar reale travivitaj! Kaj rezultis "Homo plenplena je kontraŭdiroj kiuj, kunmuelitaj, dissolviĝas en homo komuna.

Oni imagu, nu, ke la tradukanto-verkanto, sidanta ĉe komputilo, aŭskultas la rakontanton pri propra vivo kaj dum la paŭzoj de la emocioj perfektigas la improvizitan esperantigon. Ŝajna, nur ŝajna, malordo kun nenecesaj ripetaĵoj alŝuldiĝu al tiu ĉi procezo: la sentoj kaj la esprimoj elfluas mem ŝajneble malorde, foje pro la intima apudiĝo kaj miksiĝo de faroj kun kunnatura eseado pri kristanaĵoj, foje pro nekaŝebla sensacio de manko de oportuna distanco inter la du tendencoj; ĉe la fino, tamen, la ŝajne diserigitaj eroj de la procedo unueciĝas, unuavide iel arbitre, ververe ne sen planita projekto. Kaj el tio elvenas multfaceta romano rekte en esperanto, fluanta el miksaĵoj de malmulta fantazia kaj multa propra, kiuj kune, laŭ la implicaj konvinkoj de la prefacanto, priskribas homajn ombrojn de malvirtoj miksitaj al mirindaj virtoj.

Jen la rakontanto - forpasinta jam meze de la lastaj rakontaroj - jen la kunordiganto hastas dumromane flustri ĉeorele de la legemulo, ke mem perceptis certapunkte, ke estas, kvankam neplanite, realiĝantaj pli engaĝiĝo ol arto, pli tujeco ol vorta lukso, pli la sperta versimileco ol la formalo. La leganto indulgu eĉ tiun sindifinon, kiu kaŝas nur hezitigan humilecon.

2011 – Settimo Torinese Silvia Garnero

*Presprovaĵojn relegis prof. Giuseppe Quaranta*

## Ĉapitro unua
# La kolegia vivo

Kiam oni enmanigis al mi la kvinklasan lernaddevigan liberigan atestilon, malfeliĉaj cirkonstancoj devigis opinii, ke mi estis foriranta por ĉiam de la lernejo. Mia patro dungiĝis tie kaj tie ĉi, kiel kampara taglaboristo; sed kiam eĉ tiu malkontinua salajrofonto forbloviĝis pro superabundo da senlaboruloj, li por provizi la kvar gefilojn, el kiuj mi estis la plejaĝa, je almenaŭ unu peco da pano aŭ polento (maizkaĉo, baza nutraĵo de la komuna ne nur malalta iama popolo de la Pada Ebenaĵo), frumatene elhejmiĝadis por esti indulgita je almenaŭ kelkhora laboro ĉe foraj domegoj, farmbienoj kaj entreprenoj. Malfruvespere reveninte tre ofte sen tia indulgo, li tamen kunportadis, miksitajn en senforme moliĝanta saketo, malmolajn panpecojn aŭ polentaĵojn, almozpetitajn ĉe ĉirkaŭaj loĝantoj, bienaj aŭ vilaĝaj kaj parencaj ankoraŭ ne tediĝintaj pro liaj senhonte insistaj, humiliĝaj sed kompatekscitaj petolaĵoj.

Ni kvar, paciencigitaj de la patrino, atendadis lian revenon, pretaj festi plipretaj maĉi ion revitan dum la tuta tago. Al la ordinara malsato de tiu kiu ne manĝas, mi aldonis la lacecon de tiu kiu en ludaj distroj kuris la tutan tagon, eĉ en la horoj dum kiuj la ludamikoj de la dekfamilia ĉirkaŭanta grandegan korton, rehejmiĝinte por sidiĝi ĉe la familia manĝotablo, malstreĉis ankaŭ la krurojn. Mi, male, devis estingi, krom la mordetoj de malsato, la memoron pri manĝaĵoj de amikoj per ekstraj ludoj, tial per novaj energielspezoj.

Iun vesperon, malfrue, mia patro, kutime gajmiena kaj fidinklina je la vivo, revenis ĝoje ridetante pli insiste ol normalkaze, elverŝis la entenon de la saketo sur la tablon, kaj, dum ni, ignore pri higieno kaj dentbrue forlasiĝintaj al satiga plezuro, voradis liajn almozpete deŝiritaĵojn, senpreamble ĵetis: *mi dungiĝos memvole en Germanujo, kie oni ŝatas italojn estiel laboristojn kiuj tial perlaboras sufiĉe bone*.

Li parolis humile kaj decide samtempe kvankam oni scias ke dek, cent, mil homoj provis elmigri al Germanujo, sensukcesante tamen eniri en la kontingenton estabilitan. Kaj la postan tagon, sekrete ĉe ni sed aplaŭde ĉe aliaj, li pasumis tra ĝustaj oficejoj de la apuda urbeto de la venetia ebenaĵo, nome Este, jam fama pro ĝia iela onidira ligo kun la plej glorriĉa renesanca Familio Este, por havigi al si la ĝustajn dokumentojn necesajn por la dungiĝo en Germanujo, jam promesita al li de iu nekonata provinca eminentulo, preta elspezi sian

influon por favori, inter la miloj da laborpostulantoj, meritan homon. Li informis, sen aspekta emocio, la familion, ke li vagonare forveturos ene de kvar tagoj. Lia sereneco, kutima eĉ en tristaj momentoj, transdonis al la tuta afero la etoson de ordinaraj okazaĵoj. La restonta familio lin akompanis al la stacidomo, kie li elspezis la tutan monon poseditan, por akiri ion manĝotan laŭvoje al Erfurt, nomo ŝarĝita de resonancaj bonŝancoj kaj iom mistere ĝojiga, ĉar la strangeco de sono koncernas certe la grandiozon de Germanujo. Antaŭ ol envagoniĝi li fumis plenpulme unu el la du tagaj cigaredoj kiujn, pro absoluta monmanko, al li koncedis delongatempe mia patrino. Tiurilate mi, kvazaŭ por malpliigi mian ŝuldon de admiro, memoras kiel mia patrino iam riproĉis lin, kaŝe sin fordonintan al la aĉetado kaj konsumado de du kromaj kelkapuntaj cigaredoj, tiam akireblaj ankaŭ eksterpaketaj kies nespirebla fumo min tenis malproksima de li, seke kriante: "*hejme la gefiloj mankas eĉ je tranĉeto da polento"!* Kaj mia patro silentis penseme, kaj mi ekvidis en lia vizaĝo la mizeron farigantan senpova humilo.

El la trajnfenestroj li gestis salutojn kun la okuloj, laŭ mi, turnitaj aliloken, eble por malhelpi larmojn kaj eble bedaŭrante, ke la trajno rampis preskaŭ senmoviĝe.

Li forveturis kiam la aŭtuno avancis *bela kaj senkompata*, estis la vortoj de la patrino, *kun la vintro ĉeporda*. Estis vendreda posttagamezo, kiam li nin lasis al niaj pensoj jam projektitaj al la malmulte konsola vespermanĝo, por kiu certe mi kun mia patrino devas elpensi ion novan por trovi almenaŭ kelkaĵon nutraĵan por la gefratoj, jam montrantaj pli malsilentaj la stimulojn de la endemia malsato. Al mi ekvenis ideo: serĉi pometojn, mi kaj mia frato, inter la herbaĉoj de longa kaj strikta krutaĵo, kovrita per sekaj folioj, inter fervojo kaj alta/densa heĝbaraĵo el kies supro elkliniĝis pomarbaj branĉoj de enviita bieneto, jam liberigitaj de fruktoj kaj folioj. Kiu scias ĉu el tiuj foliaroj falis kaj sin kaŝas inter la fosaj folioj ankoraŭ kelkaj fruktoj? Ni serĉis en la duonombro de ekfalanta suno kaj jen ekaperis antaŭ miaj piedoj pometo, ruĝa kiel la vangoj de sana infaneto, mi portis tuj buŝen kaj per du mordoj mi ĝin englutis. La gusta plezuro etendiĝis plenigante je ĝuo ĉiujn miajn membrojn; sed tuj mi eksentis ankaŭ ion riproĉan en mi: *kial mi ne ĝin dispecigis por ke ankaŭ mia frato pormomente ĝoju?* Dume mia frato min rigardadis aprobe kaj elreviĝe samtempe. Mi hastis, por kovri la honton, tute sincerece promesi, ke la ĵusa venonta malkovraĵo estos tute por li. Sed la venonta ne sin lasis malkovri, kvankam la duonombro foje iluzie aperigis pomverŝajnaĵojn.

El mi akuŝiĝis alia, malbonŝanca ideo. Kial ne transsalti la heĝon kaj atingi

la duan pomarban linion kiu ankoraŭ brilmontras siajn fruktojn?

*Ĉu transsalti la heĝon kaj skui la pomŝarĝitajn arbojn?* Mi malicete ŝajnigis demandi al mi mem por ke la naŭjara frateto konvinkiĝu, ke la ekproponiĝanta solvo plensukcesos, kiel genia frukto de neerareblaj rezonadoj.

*"Ne, tro altas la heĝo!"*, fulme reeĥas iom terure el lia lipoj.

*"Ĉu tratrui ĝin? Kial ne enrampi tra ĝi ni ambaŭ?... Ĉu ne sufiĉas unu? La pli magra kaj pli svelta?",* mi flate kaj krude klakis kvazaŭ akuŝante eltrovaĵon el profunda inteligento.

Mia frato, kompreninte, ke mi aludis lin, klare grimace malŝatis tiujn miajn vortojn kaj kompatpete komencis perspektivigi la riskojn, la batojn fare de la mastro, fama pro ne manko de severeco, la teruron pro eventuale deĉenigita gardhundo. Mi trudige malnobliĝis por lin konvinki per la gaskona promeso, ke mi restos defendocele gardanta kaj perĉeeste protektanta, eventuale umanta kontraŭ la persekutanta mastro per ĵeto de ŝtonetoj cis kaj trans la heĝo, kiujn mi lancas neniam malcelante, por deturni la atenton kaj de la mastro kaj de la hundo. La gaskonado estis tiom alloge ripetata, ke eble allogis eĉ min mem kaj ne restis senefike ĉe li.

Mia frato malfervore cedis, svelte lasis min cise, trapuŝis la *bovokulon* de mi intertempe, per man-pied-borantaj puŝoj, trahakitan en la vepreca heĝo, plenigis siajn poŝojn per pomoj, kaj ankaŭ metis ion inter la ĉemizo kaj la brusto. Jam mi ekgustumis, mi jam antaŭvidis la ĝojon kaj ĝuon sur la okuloj de miaj fratinoj, jam mia frato estas ekeliranta el la ĉirkaŭbarita agro, kiam jen eliras el neniejo la mastro. Kun la svelteco de hundo persekutanta leporon li sin ĵetas sur mian fraton jam kurbiĝanta tra la porfuĝa truo kaj kaptas liajn krurojn lin retroigante kaj furioze ekpalpas ŝvelintan bruston, sed la kaptito pormomente elglitas el liaj manoj kaj ekforkuras ekliberiĝante je la peza ŝtelaĵo. Ĉar ne eblas haste rampi en heĝtruon por foriri el ĉirkaŭbaritejo, oni daŭrigas inter arboj kaj stoplamasoj kaj lignostakoj kuri ĝis mia frato, pro duonkonfuziga kolfrapo kontraŭ inside maldika metalfadeno etendita inter plantoj, falas teren, sur lin sin ĵetas la mastro, lin piede kaj mane frapas, al li deprenas la restantajn pomojn, puŝas la senreagan personon tra la heĝan baron liverante la lastan finrezervitan piedfrapon sur lian postaĵon.

Kaj mi? Mi restis silenta, inerte kaŝita inter la eksteraj heĝaj kreskaĵoj kun la ŝtonetoj tramane. Mia frato venis renkonte al mi senartike ŝanceliĝanta, kun la kapo terenklinita, ploranta silente kun larmoj ruliĝantaj ĝis la mentono. Kune ni paŝis, en la direkton de la hejmo, malrapide por ke intertempe revenu al mia frato la bonteniĝo kaj la ĉiama vigleco. Kiam, almenaŭ aspekte, ĉio iĝis

kutima, ni alŝteliĝis iom honte hejmen, kie ni estis atendataj ĉe la manĝotablo, ĉar tiun vesperon la miraklo alvenis alivoje neatendita: la patrino estis kaŝinta ion manĝaĵan por ke pri la tago de la porgajna forveturo de nia patro restu spuro eĉ per satiga viscera ĝuado, preskaŭ anticipo de niaj esperoj. Per tia anticipo kaj per distraj vortoj la patrino sufokis la elreviĝon de ĉiuj pro la malsukceso de la trafolia serĉado dum mi provis teni sekreta la ekspedicion al la bienaj pomoj. Sed la sekreteco rezistis ĝis mia frato komencis lamenti kaj plori, sen tamen paroli pri la batoj. *"La patro revenos baldaŭ kun korboj da pomoj",* konsole eksplicis la patrino, kaj la larmoplonĝo, post momenta pliiĝo, ŝanĝiĝis al rideto antaŭ la neesperita preparita tablo.

Ni manĝis dum en mia koro la konvinko, ke tiu mastra reago kontraŭ mia frato tro punis, eĉ, ke tiuj pomoj estis niaj pro tio ke ni havis malsaton, denaskan malsaton. Estis ideo konfuza kaj miksita kun sentoj de ofendiĝo-venĝo. Malsato rajtigas, en mi ensentiĝis abrupte, manĝi senrespekte de aliula propraĵo! Se Dio nin kreis, li kreis por ni ankaŭ nutraĵojn, rajte preneblajn. Tiu nova tuja akiro povigis mian koleron je venĝosento kaj igis min energie promesanta, per obskuraj ĵuroj, ke mi venigu la okazon por reordigi la aferojn de la mondo. La patrino atribuis tiujn vortajn ekscesojn de la protesto pro la tre fora dungiĝo de la patro kaj al la emocia blageco de ekkonsciiĝanto pri vivmalfacilaĵoj dum mia frateto klopodis kaŝi la kromajn signojn de la batoj kiuj doloros lin dum pluraj tagoj.

Jarojn poste sciiĝis, ke ankaŭ tiu terkultivisto, tiel riĉa ĉe miaj okuloj, ne superis la sojlon de mizero pro ne sufiĉaj bienetaj fruktoj por multnombra familio. Povrulo, do, ĉirkaŭata de malsatantoj!

Kaj jen alia miraklo kiu al ni venkigis la malsaton por ĉiam. La postan tagon la voĉo pri la bonŝanco de mia patro dungiĝinta en Germanujo fulme trakuris la tutan kamparan vilaĝon loĝatan de pli ol dumil familioj: voĉo akompanata de komentoj miksantaj envion kun bondeziroj, esperon kun miro ĉar multaj sensukcese provis akceptiĝi ĉe entreprenoj en Germanujo. Estis sabato, la tago dum kiu ĉiusemajne la faŝista vilaĝestro disdonigis papersaketon da maiza faruno al la senlaborulaj familioj: estinte mia familio juĝata multnombra, anstataŭ unu kilon al ĝi oni asignis, ĉiusabate, unu kilon kaj duonon. La disdonado, tiun sabaton, jam estis finiĝanta sed neniel oni aludis mian familinomon: pelite de mia patrino, mi, kvankam fuŝparolante pro io timeca, hazardajn ĉeestantojn demandis kial ni estis preterlasataj kvazaŭ ni ne ekzistus. Venis preskaŭ kolektiva respondo kiu apertigis al mi kaj al miaj gefratoj la eblon manĝi tuj plensate. La vilaĝestro aŭtoritate konfirmis laŭtvoĉe, kun amika

mieno, ke ni jam havas, laŭ la ŝtata dungoficejo, la patron gajnantan: do tiu *porsenlaborula* subvencio estu destinita por alia plibezona familio. Ni estis remetantaj, ke ni ne jam ricevis monon el Germanujo, kiam alproksimiĝas al ni manĝaĵvendisto, kiu konvinkige kaj milde invitas nin al sia nutraĵvendejo por, kredite, nin plenplenigi je pagotaj nutraĵoj. Li nin invitas per tiu komplezo kiu lasas nin ĝojgapantaj. Ni notas ankaŭ alian nutraĵvendiston apude, supozinde kun la samaj vortoj, nun apenaŭ retenataj en la buŝo. Ambaŭ, iam de miaj gepatroj petitaj, delikate sed decide rifuzis ŝulde vendi al tiaj ŝuldiĝantoj pro tio ke mia patro ne povis garantii senriskan ŝuldpagon. Ne mi nek mia patrino ĉikanas multe pri tiu naŭza memoraĵo, ni fine sentime hastas eniri tiun debitejon kie ni furore, en donacitan vimenkorbon, akumulis senrimorse kaj senŝpare diverspecajn nutraĵojn kvazaŭ revenintoj el la fama riĉiga Ameriko. Revenvoje ni, gaje pezigitaj de grandaj aĉetsakoj, estis gapataj kaj gratuligataj de konatoj kaj najbaroj, inter kiuj nia patrina avino kiu jam multfoje transsaltis la manĝon pro nia infana malsata voremo. *"Venu ĉe nin, venu ĉe nin!",* plenĝoje ni kriadis al ŝi. Al ŝi, ja, sed ankaŭ, inter miaj sentoj ankoraŭ nesufiĉe humanecigitaj de la antaŭaj spertoj, por ke envie vidu la najbaruloj!

Kiom ni manĝis tiun vesperon kaj kiom ridis miaj gefratoj! En tiuj tagoj nutraĵoj ŝuŝis el tabloj, el kredencoj, el sidiloj kaj la memoro pri la antaŭa malsato fariĝis stimulo de plia manĝado. Tagmanĝajn restaĵojn ni lanĉis forĉirkaŭen kaj en la liliputajn kokinejojn de najbaroj, ĉar niaj kokinoj jam longe ripozis aliloke venditaj antaŭ ol morti pro malsato. Kaj mia frato feliĉe, kaj iom senmezure, ekdonacis al siaj ludkunuloj

Kial mia patro tiel facile povis ellandiĝi al Germanujo? Li jam elombrigis etan eventon de li protagoniste vivitan jarojn antaŭe, ĉe Littorio apudmara sude de Romo, hodiaŭ: Latina), kie la faŝista registaro estis senakviganta marĉon kun granda okupiĝo de laboristoj. Ankaŭ mia patro alkuris esperante trovi entreprenon bezonantan je laboristo, sed lia serĉado restis senefika. Li estis jam sur rehejmeniĝonta piedo kiam, ensteliĝante en laboristan delegitaron, aventuriĝis en la lokan "Domon de l' fasko", nome loka sidejo de la faŝista partio, kien subite eniris la kondukanto (itale Duĉe, oficiala ekzaltiga kromnomo de Benito Mussolini fondinto de faŝismo kaj registarĉefo). Mia patro aŭdacis, en la eta salono, levi voĉon por peti ion. La Duĉo, ignorante la ordocelan servon, alproksimiĝis al mia patro informiĝante pri lia familio, kiomaj gefiloj, kia regiono... fine kun unu mano tuŝis lian ŝultron kaj kun la alia enmanigis en tiun de mia patro unu *colombina/n* (kolombina = popoleca esprimo por indiki la kvinliran moneron, proksimume la laboristan tagpagon). Kaj la postan tagon

venis ankaŭ dumtempa salajrata okupiĝo. Tiel mia patro *unutrafe trovis gratifikon kaj laboron*, kiel li diros kiam el hezita elombriĝo la eventeto fariĝis popola onidiraĵo. Tiel li, post la reveno, tion tiom ripetadis, ke la afereto bosiĝis al novelo en la eta najbara urbeto, kies faŝistaj aŭtoritatuloj plezuriĝe aŭskultadis kaj propagande konigadis, kaj kiun fine landa ĵurnalo reportis kiel ĉarmaĵeton je konturoj montrantaj la humanecon de la diktatoro.

Mia patro revenis el Littorio kun novaĵo kontraŭa al la komunaj sentoj: estis vere la Ameriko kiu mizerigis multajn en la mondo. Eble li pensis al la usona borsa kraŝo de 1929, kies malagrablaj, enlandaj kaj eksterlandaj, sekvoj kunludis por ke Mussolini trovigu eksterpatruje la originan kaŭzon de la samtempa itala ekonomia malprospero.

Tial, kiam mia patro montris deziron laboriste elmigri al Germanujo, tuj li obtenis konsenton kaj apogon ĉe la faŝistaj eminentuloj, certaj pri lia se ne ideologia almenaŭ fakteca fideleco.

Okazis tiutempe, dum la longigita kaj seninforma forrestado de la patro, ke mia patrino, ekkaptite de senespero, plenumis gravan *delikton* kiun la mizera familio neniel akceptos rebaki sen simpatia orgojlo.

Ĉar en la familio neniu sciis pri la dungiĝo kaj la mandato ĉe Latina, cetere tro malfruaj, nome ne tuje taŭgaj malhelpi la malsatecan staton, mia patrino havis gravan tenton kaj falis en ĝin: ŝteli kokinon por, almenaŭ unufoje, satigi per delica nutraĵo siajn kvar gefilojn, kiuj eble ne memoris la guston de kokinaĵo ensaŭca, tiam taksata nutraĵo bongustega kaj simbolo de riĉulaj manĝotabloj

Sed de kiu forŝteli? La dek ĉekortaj familioj estis malriĉaj preskaŭ kiom ni, krom unu kies patra membro ĝuis ŝtatan postenon sekurigantan la panon kun loĝejo kaj neĉifitaj vestaĵoj por la kvin gefiloj, kaj ankaŭ kun la senmalica envio de la najbaruloj.

Mia patrino kaptis ĝuste unu el kokinoj de tiu familio, haste kaj iom senpiece, por malhelpi ĉiele kriĉaĉajn bruojn, ĝin unubate sufokis kaj brogis en pelveto por ĝin senplumigi pli rapide kaj pli facile, akurate envolvis la plumaĵojn kaj internaĵojn en papersaketo kaj sendis min ĉion disperdi en malfora fluanta kanala akvo. Tio konkretiĝis en la frua posttagmezo.

Vespere, iom malfrue, ni ĉiuj estis manĝantaj kokinan ensaŭcitan viandon, la faman porriĉulan nutraĵon, pri kies fabela odoro ni infanoj apenaŭ la memoron havis, la patrino nin eksatigis, ĉiun per plua lardita kokinaĵo en plado kun maizkaĉo, kiam neatenditaĵo invadis nin ĉetable sidantajn, preskaŭ silentajn je tiu silento kiu eksuferas pro la interna lukto malebliganta, ke oni provu kvieti-

gi riproĉan konsciencon, almenaŭ en mi dekunujarulo kaj sendube en mia patrino. Jen la neatenditaĵo kiu en mi kaj en la patrino blokis la apetiton kaj deziregis, ke pladoj kaj teleroj kun kokinaĵoj pereiĝu en nenion. Subite iu frapis ĉe la pordo laŭtvoĉe pardonpetante: estis nia najbarino kiu venis rakonti pri la malapero de unu el siaj ok kokinoj. *"Se ĝi noktos subĉiele ,ĝi estos kaptaĵo de noktaj animaloj!".*

Mia patrino tuj alpaŝis la sojlon eksteren de la porto, firme decidita retreti la pozicion por ne permesi al la fremdaj okuloj esplori la tablon kun senkaŝaj kokinaĵoj.

El la duonmalfermita pordo, miaj oreloj aŭdis el la klara voĉo de la najbarino la rakontadon, la bedaŭrindaĵon kaj la malbonfaraĵon de la ŝtelisto, kiu certe "ne malproksimas", dum trarampis en mi sento de malvenko kaj spirita frakasiĝo; mia patrino aŭskultadis elmetante, tempaltempe, kondamnajn frazojn miksitajn kun la aŭguro aŭ espero, ke la kokino morgaŭ eliru el heĝoj kaj kreskaĵoj kaj dume evitu hundojn kaj bestaĉojn avidajn vori eĉ plumojn. Ŝi pretus eliri por la serĉado laŭ heĝoj kaj kreskaĵoj, se *"malbonŝance ĉi-vespere la luno komplice ne malĉeestus",* ŝi hastis liberiĝe aldoni.

Miaj gefratoj dume plu manĝis silente, je tiu plenĝoja silento, mi opinias, devenanta el la nova deziro perdi nenion el tiuj bongustaĵoj; mi, male, ĉion englutis rapide, kvazaŭ celante malaperigi manĝilaron kaj kokinaĵon el tablo, kie ĉio estis fariĝonta krimspuro, kaj tute premiĝis de la senefika klopodo elprovi senkaptigi mian patrinon el tiu senprecedenca situacio.

Estis neeble, ke la karakteriza saŭca bonodoro ne elblovu el la manĝotablo ĝis la nazo de nia najbarino kroĉiĝanta ĉe pordo.

La babila inferrostiĝo daŭris dek minutojn ĉirkaŭ. Kian liberigan suspiron elmetis mia patrino, kiam nia najbarino regresis el la pozicio kaj la pordo fine fermiĝis! Ŝi rekomencis manĝi silente, humiligita interne kaj ekstere, kvankam ne montrante vorte siajn sentojn, dum miaj gefratoj, jam altiritaj de la amiketaj voĉoj el la korto, estis, gaje, elhejmiĝantaj ne tro atentante, feliĉa naivo!, la rekomendojn ne aludi la kokinajn delicojn de la vespermanĝo.

Ni finis la jam kontraŭvolan manĝadon. Ni zorgis elimini ĉion restaĵan, rikoltis ostojn kaj kion ajn odorantan kokine. Kaj mi reiris al la kanalo.

La fakto lasis en mi dumvivan stampon; precipe ĝi signis en mi sensan imagon pri iuj fundamentaj sentoj. Specimene:

Se mi volas, eĉ hodiaŭ, elsperte nocii pri tio kio estas humiliĝo, mi vidas mian patrinon ĉesojle aŭskultanta nian najbarinon.

Se iu min demandas kio estas rimorso, mi realvokas la nekontroleblan spli-

tiĝon de pensoj kaj timoj kaj kulpo kaj honto de tiu vespermanĝo.

Se mi volas konkrete senti kio estas kristana amo, mi revidas tiun najbarinon, kiu ĉion komprenis kaj nenion riproĉis kaj ĉiam konservis al ni la saman amikecon.

Se mi volas priskribi la trajtojn de la transrimorsa pento, mi reaŭskultas la lastan preĝdediĉon de la vesperpreĝo de nia patrino*: "Ni preĝu por la personoj, kiujn ni skandalis aŭ damaĝis".*

Mia patro, do, forveturis al Germanujo kvazaŭ al festo longe dezirita kaj sekrete preparita.

Po dekkvintage li sendis la pergajnitan monon al familio rekomendante tiel insiste ŝpari ĝis nin konvinki, ke ni ĉesu el superfluaj duonfrandecaj elspezoj, kaj ĝis kreskigi en mi la deziron pergajni monon praktikante ajnan lernotan metion. Kia metioarto povis pli arde instigi la fantazion de adoleskulo?

*La meĥaniko, ja, esti helpoknabo prilaboranta mane super motoroj kaj maŝinaj komplikaĵoj*, formis mian aspiron, kvankam la meĥanikaj laborejoj konsultitaj de mia patrino jam respondis, ke eĉ pagantan metiknabon ili ne akceptus. Kiam, kompattuŝita per la vortoj de mia patrino, eta bicikloriparejo, kie foje malnovaj malvigliĝintaj preskaŭ neripareblaj motorcikloj provis prokrasti sian agonion, min akceptis, la ĝojo malsupreniris nur el eblo malpurigi mian vestaĵon kiun mi orgojle montradis ĉar, laŭ mi, tio levus la prestiĝon de juna metilaboristo; ĝi fakte ne povis deveni el la semajna pago, sufiĉa nur por viziti dimanĉe la urban kinejon. Kaj krome la pagkonsisto malplivaloriĝis je miaj okuloj kiam mi plikonsciiĝis pri mia distanco disde la sorto kaj socia nivelo de samaĝaj junuletoj kiuj, kun mirindaj rimene pakitaj libroj subbrake, venadis riparigi sian biciklon: ili interbabiladis pri aferoj misteraj kaj eligis el ĉiuj siaj gestoj memcertecon kaj superecon, kies posedon foje mi ŝajnigis malŝati per vortoj de malrafinita lingvo kaj plumpe maldelikataj esprimoj: ŝvebigante, tamen, malestimon kun sekreta estimo al tiuj *nenifarantoj,* mi ekkonstruis la vojon de mia estonteco. Ne sukcesante fakte resti enkaĉigita en malŝato pri tio kion mi vere deziris, preskaŭ abrupte, per renversiga decido, la afekta malŝato forsvenis kaj ankaŭ ekstere ekrevigliĝis admiro por la vivstilo de tiuj homoj bicikle flugantaj en alian misteran mondon. De malproksime, kvazaŭ mi devus kapti sekretaĵon por la vera vivo, mi ilin spionadis.

Mi ne jam tute konscie manifestis al mi mem tiun ĉi allogiĝon kun scideziroj, nome studi kaj kleriĝi pri la misteraj aferoj kaŝiĝantaj en la lernejo kaj libroj de tiuj forigindaj sed atentokaptaj lernantoj, tamen ĝi kuŝis ne ĉiam miakaŝe ĉar fojfoje ĝi surfaciĝis el nekonscio kiel envio al la plej avantaĝantoj

en tiu kampo. Fojon mi volis spioni kien ili iradis por al si alproprigi la prestiĝajn sciojn, eĉ posttagmeze kiam male la lernantoj kutimas studi hejme. Sekrete mi, bicikle, unufojon sekvis el tiuj trion: post kelkaj kilometroj ili eniris domon, el kies fenestroj al mi plenpercepte venis la voĉo de la trikapa lerngrupo kaj tiu de la profesoro. Nenion mi komprenis, sed tio al mi donis iom da fiereco kvazaŭ mi estus aktoro en tioma escepteco. Hodiaŭ mi scias, ke ili kunripetadis la latinan gramatikon ĉe la paroĥestro: tiam al mi ili ŝajnis eniri gloriĝon, kiu, tamen, eĉ senpiece foje malpufiĝante pro konstato de mia malbonsorto, ne ĉesis treni fieron kaj sciavidon kune kun sentoj de malŝato kaj envio. Malŝati kaj samtempe envii estiĝos por mi arto profita ĉar se la envio min puŝos deziri, ke la enviatoj perdu sian feliĉon ĝi ankaŭ min virtuale levis kaj trenis al realigo de tio enviata. Fojon mi sukcesis manteni, preskaŭ tremante, kaj foliumi libron el teko malŝarĝita el valizrako de riparota biciklo: foliumi kaj alloge sense similiĝi al tiuj studentoj estis la samo. "Soifa kulturserĉanto, ŝajniganta malŝati kulturon", min tiutempan mi spegulos jarojn poste.

Tiu admiro miksita kun la fiera plumpo esti meĥanikisto en kombinea vesto, ankaŭ se preskaŭ nur de bicikloj kaj maloftaj lamiĝantaj motorcikloj, kreskigis en mi la deziron kaj la senton de emancipiĝo.

Mi akiris emancipiĝon en ĉio, antaŭe en babiladoj, kie mi iluziiĝe aspektigis, ke la scienco rifuĝis tuta ĉe mia kapo, poste en mokado pri religio imitante en tio kiujn mi estimis imitendaj gravuloj, eĉ tiu imitado estis mia iniciĝo al nova mondo; en ĉio, do, emancipiĝo krom en la dispono de mono kaj en la kompreno pri la subtekstaĵo de la ilustritaj paperfolioj klarigantaj la funkciadon kaj aplikadon de la varoj proponataj al klientoj aŭ utiligataj rekte de mi. La mastro eksplikis pacience, sed ekzakte estis la prospektaj kaj instrukciaj ilustraĵoj kiujn mi ne scipovis legi. Emancipiĝo do en ĉio krom el la sento de malsupereco, kvankam kovrita per fanfarona parolado, akute spertita antaŭ al tiu studentaro.

Iun tagon junaj metiistoj incitis, ke mi, eble por reliefi mian krudecon, priskizu, pli incitigintajn per trivialaj subskriboj, inajn seksorganojn (estis unu el la gestoj de emancipiĝo) sur la ekstero de la oficeja balkono: mi rifuzis, ŝajne motivite de tio ke ĝi estas aĉaĵo, vere male pro tio ke mi kapablis skribi apenaŭ unuopulajn literojn. Nekapablo min kovris per utila honesteco. Alia helpoknabo, poste mi konstatis, farbe desegnis sur la ekstera fasado de vidaltira ŝutro kaj skribis tiujn tekstaĉojn kiuj sekve kostis al li du vangofrapojn kaj la postenon. Unuatempe mi min juĝis pli lerta ol li, sed jarojn poste pli kulpa ol li ĉar mi tiam ne senkaĵole malkonsilis la aĉaĵon. Foje, preskaŭ fizike, el vor-

toj kaj mieno, tralikiĝis tiuj miaj envio kaj sento de malsupereco kiam mi trakuris kun studentoj la saman vojon por iri, por mi, al preskaŭ senpaga laboro, por ili al la alloga fonto de sciindaĵoj kaj de la splenda vivstilo kun prestiĝa de mi imagita estonteco.

Kaj jen antaŭenŝoviĝas la vojturno. Abrupte la admirata miraĝo realiĝis, kiel en sonĝo feliĉiĝanta en la realo, al mi malfermis la horizontojn de instruiteco, nome mi fariĝis studento. Iun lundon de la septembro 1939a, rehejmeniĝinte por la meztagmanĝo, mi trovis nenion pretigitan kaj neniun de la familianoj. Kiam post nelonge la patrino aperis, feste vestita, kaj sekvata de miaj du fratinetoj, ŝi sin ekskuzis pardonpete, kvazaŭ kulpa pri io kontraŭ mi. Ili ĉiuj kune ripetis ekskuzojn denove, eble por pli tikli mian scivolemon.

Mia reagemo en tiu momento jen vakiĝis jen akriĝis samtempe: dekomence miaj okuloj gapis mirkaptaj, poste mi ekgrumblis kaj fine ekkriis: ke *mi estas ignorata kaj malprizorgata kaj ekskludata de la familiaj aferoj, ke ili fortranĉis min el siaj sekretoj, aĉaj sekretoj, fiodoraj kombiniĝoj*. La frazoj elvenis ankaŭ el subgrundo de miaj pretendaj responsaj naturaj gravecoj kaj devoj en familio en kiu daŭre forestas la patro kaj do devas kaj rajtas ĉeffamilie roli la plejaĝulo, kiu male estas forretenata ankaŭ en la nova okazintaĵo. "*Mi informos pri tio la patron!",* mi pistis.

Estis vere sekreto kiun ili nun volas riveli ankaŭ se por tion fari miaj familianoj devos peni. Kiam la penadsento estis superita, ili komunikis: *via frato iris kolegion por studi kaj religiule enfratuliĝi*.

Tiumomente mi sensis tion kio estas klara: efektive la tabloloko de mia frato mankis je seĝo kaj manĝilaro. Jes, ja, ĉar li nun loĝas ĉe la franciskanoj de Lonigo (urbeto de provinco Vicenza, nordeasta parto de Italujo) kaj jam aniĝas en lernejo kiel gimnaziano.

*"Ni lin lasis sidantan ĉe benko en granda klasĉambro kun granda libroŝranko kaj studaparataĵo antaŭ li. Li nin senlarme ĝisis nepacienca enmiksiĝi en la ludojn kun la novaj kunuloj".*

*"Al vi ni nenion diris ĉar vi certe ne estus kredinta pri lia seriozo kaj lin mokinta aŭ, eble, eĉ lin forturninta el lia laŭ ni sincera decido".*

Mi dubis ĉu mi devas ridi aŭ laŭtkrie ridegi ĉar, ke mia frato, kvankam dekkvar monatojn pli juna ol mi, tamen paŭsis ĉiujn miajn sintenojn rilate religion kaj praktikadon pri ĝi, eble ni eĉ nekonatas ĉe la paroĥo: la unua emancipiĝa signo estis tia. Kaj jam la kontaĝito superis la kontaĝanton rilate pozojn aŭ defiojn kontraŭ Dio kaj religio. Ankaŭ li en la rondo de amikoj knedis babilaĵojn per maldecaĵoj kaj hurlis superhomecajn stultaĵojn, ne timante ilin eĥigis inter

domoj kaj paŝantoj...

“Kio misirigis, kun via kunlaborado, la paroĥestron eble kutime malfideman? Por eniri seminarion oni bezonas referencajn paroĥestrajn raportojn, laŭ mi, ĉu ne?”.

Pormomente mi pensis pri subaĉeto ĉe la paroĥestro kontraŭ la mono elŝvitita de mia patro en Germanujo.

*“Jes, sed la paroĥestro estis konvinkita, ke via frato ne frekventis la paroĥejajn renkontiĝojn aŭ la preĝejon nur pro tio ke ni loĝas kvar kilometrojn for de la vilaĝa centro, ke li tamen konservis bonajn familiajn tradiciojn de pieco kaj bonanimeco. Certe ni, patrino kaj fratinoj, ne disdegnis engaĝiĝi por pledi kaj konfirmi ĉion utilan por la celo”.*

“Ĉu li ne ploris, ĉu li ne pliploros la perditan liberon, ne suferos pro la longaj lacigaj preĝoj? Ĉu li sukcesos kaŝi sian kontraŭan inklinon?”.

*“Ne, li estis gaja kaj fiera!”.*

“Sed li ankoraŭ ne finis la bazelementan lernadon. Kiel li eltenos la gimnazion kun latinaĵoj?”.

Al tiu demando ili flustris, ke, eble, profesoroj lin preparos al la allasa ŝtata ekzameno.

“Por kolegianiĝi (manĝi, studi ktp) ĉu ne bezonatas mono, kiun ni ne ŝajnigas ne havi? Ĉu vi disipas la rimedojn ŝvite pergajnitajn de nia patro spite lian volon?”.

*“Ne vin ĝenu tiaĵoj, la religiuloj de tiu ĉi ordeno kvestas trakampare kaj travilaĝe por vivteni la studentojn kiujn ili konsideras sia posteularo por la misia diplaĉa vivo”.*

Dum mi pasas de miro al miro, al mi pli kreskas scivolemo, malpreciza sed eferveska scivolemo pri la plej nova ekscio. Prie mi rebatis demandon:

“Ĉu vere la kolegianoj nenion pagas kaj, krom tio, ili pludaŭras en la studoj? Ĉu vi vidis la lokon? Kiom kaj kiel ili sin nutras? Kiam ni iros viziti nian fraton?”.

La scivolemo nun ekburĝonas el alia fonto.

Mi reprenis, post la ĉefmanĝo, mian biciklon penante ĝin pedale puŝi en la direkton de la laborejo. Senaverte malplimultiĝis miaj pedalturnoj tial ke la devancantoj surprizite rigardis la kutiman furiozan devancinton nun devancata; kaj eĉ alvostiĝinte post ili, mi fine senreage kaj senĝene ĉiam pli postiĝis: penso ekklakis mem en mia kapo ĝis ŝmace okupi ĉiujn miajn sensojn kaj gestojn: *Ĉu veras, ke iu povas studi senpage?* Mi sentis impulson tuj ekreveni ĉe la miajn por rehavigi al mi pluajn certecojn pri la afero kaj elsuĉi pli sendubi-

gajn sekretajn allogaĵojn. Tamen mi pluiris, alvenante, pro tia malakcelo, malfrue al la meĥanikistejo: neniu min riproĉis sed nur pli malfrue kelkaj rimarkis en mi nekutiman apartan mankon de prizorga atento. Mi tamen tenis efike sekreta mian internan kirladon, jam tradukeblan per konkretaj frazoj krom per fantaziaĵoj. De tempo al tempo mi haltadis por reprikonsideri kaj reimagi kaj ne forvanigi la miriĝon pri la sciigo kaj por remeti antaŭ mi demandon kun jama respondo: *"Kion mi faru? Mi jam scias kion fari!".* Reprenante laboron mi de tempo al tempo ripetadis: *"mi scias kion mi faru!".*

Estis lundo tiu tago. Mardon matenon, tre frue, mi jam pedalas sur senpasaĝeraj stratoj, akompanata de mia ankoraŭ ne okjara fratino, en la direkton de la kolegio "Probandato Antoniano" de Lonigo; dekkvin kilometrojn el mia hejmo.

*"Kion mi estos dirinta al la pastro rektoro?".* Pli atentige: "*Kion mi ŝajnigos antaŭ li? Ke mi volas vivi laŭ Sankta Antono? Kial ne? Ĉu, eble, mi ne kapablus? Kaj se li invitus min reciti, je pruvo pri tio, iun ajnan preĝon? la Patronian aŭ Avemarian, kiujn mi duonforgesis? Kaj kial ne refreŝigi la memoron pri ili, profitante de la pli bona religia inklino kaj instruiteco de mia akompananta fratino?".* Mi ekprovis reciti flanke de mia bicikletanta fratino kiu devis suflori preskaŭ ĉe alterna frazo.

Ni haltis laŭborde de la strato en eta plataĵo. Necesis certe halti ĉar mia fratineto, marŝante flanke de mi kaj pedalante sur porina biciklo kaj nepovante sin apogi sur la tro alta sidileto, jam elĉerpis ĉiujn siajn eblajn fortojn kaj estis jam forlasanta la stirilon al si mem. Mi, nur celante al mia elektodestino, tion perceptis ekzakte kiam mi estis decidanta ripetigi de ŝi refreŝiĝojn de preĝoj kaj sugestojn por ne misaspekti antaŭ la pastro-rektoro, kiu certe pri tiaĵoj ekzamenos min. Dume de fore oni jam povis klare vidi la ĉiam pli konturiĝantan gigantan konstruaĵon, kie jam mia frato studas kaj kien mi volas eniri. La decido ne lasas spacon al malhelpoj el kiu ajn fonto.

Ĵus batintis la deka en la kampanila horloĝo kiam mi sonorigis, time kvankam decide, ĉe la kolegia pordo. Enkondukite ĉe la kolegi-reganton, mi, en plursofa akcepta salono lin eble ridinde riverencante, ekparolis sed nun ne memoras la unuajn vortojn elirintajn el mia buŝo, komike baraktanta akomodi hazardajn esprimojn al reverenda riverencostilo; ankaŭ mia fratino ne havas pri tio klaran memoron: ne forgesitis, male, normalaj rektoraj demandoj kiaj:

*"Kiamaniere vi perceptis, ke vi havas la vokiĝon al la sanktaj aferoj de Dio? Kion diras via paroĥestro? Ĉu vi, dekkvinjariĝanta, tiom timas la vivmalfacilaĵojn ĝis forfuĝi de ili rifuĝante sub konventa protekto?*

*"Ĉu kredinde, ke vi sentis tiun impulson abrupte?!".*

Kiam la pastro elspuris el miaj vortoj, kaj el miaj manoj, ke mi jam garzonas meĥanikiste kiel motorbicikloriparisto kaj, ke mia patro jam fikse dungiĝas en Germanujo, aspektis vaporiĝi la suspekto pri mia neeskludebla trompiga religia envokiĝiĝo por eskapi el vivmalfacilaĵoj. Fine, mi neembarasite murmuris, ke mi venos dimanĉon, la proksiman dimanĉon kun la postulitaj dokumentoj havigeblaj ĉe la paroĥestro. La pastro, eble prijuĝinte infaneca kaj fanfaroneca mian esprimon, ne priatentis ĝin kaj elbuŝigis ion ne tute plaĉan al mi, nome ke mi ankoraŭ pripensu, almenaŭ unu monaton aŭ du kaj intertempe mi petu konsilon de la paroĥestro *"kiu certe disponas pri la necesaj elementoj por vin juĝi kaj konsili. Dume vi preĝu!".* Tiu *preĝu* ektremige kredigis, ke estas plonĝanta sur min la timata invito reciti preĝajn formulojn jam delonge forgesitajn kaj nelge supraĵe laŭvoje refreŝigitajn. La invito bonŝance ne venis kaj mi, eble salutante eble dankante, forlasis la salonan ringon konvinkita ke mi venkis almenaŭ je poentoj . Laŭ la longa marmore kahelita klostro, kiun miaj piedoj tretis kun certeco je si mem kvazaŭ en propra loĝejo, fratuletoj salutis per "Paco kaj Bono", al kio mi ne sciis, kiel respondi; eĉ tiu senresponda saluto ektimigis min, ke la pastro-rektoro, miaŝultre sekvanta, impulsiĝus pensi, ke mi vere fremdas rilate religion.

Mi kun mia fratino eliris el tiu silenta kaj sanktece elvokiva loko kontentaj kaj malsataj kaj soifantaj pro la antaŭa laciĝo senmanĝa. La malsaton ni kvietigis per peceto da pano franciskane donacita ĉe la konventa pordo, kaj la soifon per la akvo de la fonto en la apuda placeto dum mi promesas al mia fratino multajn donacojn de la estonta alten levita kaj enviata doktoro kian mi min jam antaŭvidas; mia la laciĝo, tamen, vaporiĝis antaŭ la nefacila tasko tuj pretigi la dokumentojn.

Super mia kapo levita, kvazaŭ por rediri al ĉiuj mian unuan sukceson, la ĉielo aspektis al mi, en tiu septembra tagmezo, tiel blua, ke mi devis deturni la okulojn el la ĉielo. Ja, la vetero kaj la ĉirkaŭa naturo, malkiel kutime, en tiu momento konverĝigis mian atenton: mi perceptis, ke alte sunas kaj ke malalte blovas venteto, ĉio forbalaanta ĉiun spuron de l' akumulita tensio. Sed el tiu ĉi kontentiĝo, same kiel el aliaj, mi devis devojigi la atenton por malhelpi, ke mi kantu aŭ eksplodigu mian ĝojon al aliaj, al mia fratino, ununura interparolanto, kies vizaĝo jam esprimas tiel markite signojn de laceco, ke ŝi eble ne rezistos al la peno de la pedalado ĝishejmen. Male, ŝi gaje eltenis antaŭe miajn duonekvilibre ekzaltiĝajn esprimojn, poste la senkompatan lacegon de la perbicikla reveno: tiu ĉi fakte fariĝis por ŝi elĉerpiteco dum tri tagoj kun teruraj kapdolo-

roj. Jarojn poste, ne tro senkiala rimorso superrandiĝos ĝis min akuzi, ke ŝi unua kaptiĝis el mia viktimiga faretro.

Dume mi bezonis superi alian klifon, eble la plej riskoplenan en la tuta afero: prezentiĝi kaj kredindiĝi ĉe la paroĥestro, ke mi sinceras se mi petas de li paperan helpilon por ke estu konfirmitaj miaj volo kaj inklino al la religiula vokiĝo. Mia antaŭvido pri tio muaris de sendubeco pri sukceso al malespero. Mia patrino, konscienciĝinte kaj konfuzite diradis, ke ŝi ne plu eltenas duonfiecan senhonton mensogi post la ne tute purkora sceno antaŭ la paroĥestro pro mia ĵusa *envokiĝinta* frato, kaj firme dekretis, ke trabatiĝu mi mem antaŭ la paroĥestro, ke min oni resendos al la sendanto, nome al la hejmo, post nur kelkaj semajnoj ĉar la diablo lasos sinki la voston desube de la pantalono. *"la pantalono de via ruza ŝajnigo!".*

Estis merkredo de la sama semajno kiam mi envenis la paroĥestran domon: la pli ol sepdekjaraĝa pastro min ricevis, min fulme strabe rigardis de subo al supro, piedstarante aŭskultis buŝaperte mian postulon kaj mallevis la okulojn al mia ĝisgenua pantalono trenante ankaŭ la miajn: mi perceptis en tiu momento, ke mia kurta pantalono sin montras ankoraŭ mezfemure kuspe suprenfaldita ĝisingvene laŭ mia kutimo por pli senbremse pedali. *"Estus plibone, ke vi iru fiŝkapti",* li degne elĵetis dum mi honte ruĝiĝis eble ĝis la faldaĵo de la pantalono, kies randoj kuspe volvitaj, laŭkutime de fiŝkaptantoj en la multkanale drenata venetia ebeno, ŝajnis min meti nuda antaŭ liaj okuloj. Tuj post, tamen, ne malplaĉis la paroĥestra ŝercaĵo ĉar per ĝi jam ekrompiĝas la dura glacia surfaco de homo je kurta kaj mordanta, laŭ komuna difino, parolado, kaj jam fariĝas liberige senutila mia timtremanta plurfoje mense rearanĝita prezenta parolado. Gapante al miaj okuloj laŭ longaj sekundoj, li mildatone kaj patrece:

*"Mi vin ne konas. Ĉu vi estas la filo de la laboristo jam de longe dungiĝinta en Germanujo, iam helpata de la Duĉo per "kolombino"? Ĉu li jam revenis por eviti la militecajn riskojn en Germanujo? Ja, bonŝance Italujo, malkiel aliaj ŝtatoj, ankoraŭ ne mobilizas post dek tagoj de milito en Pollando kaj kontraŭ Francio kaj Anglio. Vi nun havas kion manĝi, ne necesas iri sin satigi ĉe la fratularo... Montru! Vi havas la manojn malpurigitaj kiel la piedoj, ĉu vi metilaboras?... Vi iomete gajnas, do. Vi ne bezonas, do, sekurigi vian panon ĉe la fratularo... ".*

Ankoraŭ demandoj kaj demandoj, kaj kiam kredeblis senfrukte kaj senespere elspezitaj miaj forludotaj kartoj, el nova voĉtono kaj ekaliro al katedro kaj enmanigo de plumo, mi distilis, ke li klasis miajn respondojn inter la validaj kaj pruvantaj sincerecon kaj motivan honestecon de mia peto. Mia konscienco

silentis, superfortita de la memkotentiĝo pri la sukceso. Li flegme forŝovis dosieraĵojn kaj eltekigis papereton, skribis mane kaj ĝin enkovertigis kaj enmanigis al mi, dirante aspekte senzorge, ke se la frataro min remetos sur la hejmenvojon mi povos reiri al la fiŝkaptado, kaj spitgeste indikis mian fine malfalditan pantalonon ĉe ambaŭ kruroj. Kion li skribis en tiu papero? Mi scios kelkjarojn poste, kiam estos permesite viziti koncernajn dosierujojn. Jen la preciza tono: "*Mi scias preskaŭ nenion pri tiu junuleto, krom ke liaj maloftaj vizitoj tra paroĥejaj lokoj okazadis pro la kvinkilometra foreco, tamen li ŝajnas al mi sincera kaj bonintenca. La eduko kaj klarvido de spiritoj sidas inter viaj taskoj ĉar mia juĝo ne superas la surfacon* ".

Min salutante ĉeporde, li dum momentoj ne vortumis ion ajn sed transsojle, faligante sian voĉon sur miajn embarasitajn salutojn, silabe ellipigis kun subliphara rideto: *"preĝu por mi ĉar eĉ la preĝoj de friponetoj validas!"*.

Haste, kaj iom embarasita pro tia trezoro en mia posedo, mi enpoŝigis ĉe la brusta bluzo la bonan atestilon pri konduto.

La ĵaŭdon kaj la vendredon kaj la sabaton mi pasigis bedaŭrante, ke mi senprudente eldiris al la kolegia rektoro, ke mi prezentiĝos lia gasto la sekvan dimanĉon: sen tiu malprudente hastema kaj limiga anonco, mi povus veturi al kolegio tuj senprokraste. Tial mi daŭrigis diligente lernoservi en la metiejo, kie mi prizorgis fidele laborendaĵojn, tenante nur por mi mian sekreton evitante senfinajn mokaĵojn kaj timatajn ĉiodisfaligantajn kontraŭinformojn ĉe la paroĥestro, kiu senbreĉe juĝus sin trompita de mi kaj tiel elrompiĝus la sorĉo.

Fakte, post mia foriro kelkaj distambure igis la paroĥestron suspektema pri mi sen tamen ajnon trafiltrigi ĝis la kolegio. Eĉ, por malpotencigi aŭ malfruigi malfavorajn informojn kaj reagojn, mi malzorgita lasis en laborejo la laboran supertuton, mian fetiĉigitan supertuton kies malnetiĝo statsimbolis kapablon trakti kaj refari kaj sensacie sintonii kun muĝantaj motoroj: miaj familianoj, por eviti demandojn, ĝin forlasis; nur postlongatempe ili prezentiĝis por rekuperi *"ion eble ankoraŭ utilan",* kaj rekuperis ankaŭ la semajnan salajreton kiun mia prudento rezignis enkasigi.

Kaj la dimanĉon, freŝmatene, akompanate de la sama fratino, ĉar mia patrino plu skeptikis pri la honesteco de mia improvizita *vokado* de Dio plurfoje proklamante *"ne scipovas riski mian reputacion du fojojn sinsekve",* mi forhejmeniĝis. Ĉe la hejma pordo renkontis la patrinan avinon, la ununuran informitan pri la novaĵo, sukcesintan ĝis tiam teni sekreta noticon kiu, male, laŭ ŝi, *indus disvastiĝi tramonde*. Ŝi piedstaris singulte plorante: konvinkiĝinte, ke mi elektis la plejbonan partion inter la elektindaĵoj de l' vivo, kaj plej-

meritan antaŭ Dio, ŝi akceptis la suferon de la disiĝo disde la unua naskita nepo, kvankam rigarde disiĝojn kaj disecojn ŝi estis spertanta plurajn: filo laboristo en Germanujo, alia filo laboristo en Orienta Afriko, tria filo freŝe rekrutita al militservo. Ŝi min brakumis kaj alpreniĝis al mi ŝmacete kisante kaj daŭre min salutis duonvoĉe ĝis mi forsinkis malantaŭ la kubuta stratkurbiĝo. La eta agitiĝo en la korto bonŝance ne vekis la najbaran scivolemon, kaj mi povis foriri, krom sekrete, ankaŭ kaŝe.

Mia fratino akompanis min, tra la reiritaj vojoj, nur por revenigi la biciklon hejmen: sur la ununura biciklo, kelkatempe ŝi vojaĝis side sur la stirilo dum mi pedaladis, kelkatempe ni marŝadis piede, kelkatempe mi piede kaj ŝi bicikle: la laciĝo ne ekzistis, ekzistis nur la celo kiu fine konkretiĝis ĉirkaŭ la dekunua horo. La rektoro, min vidinte, vage revekis en sia memoro la antaŭaĵojn de la afero kaj, iomete ŝokita, invitis, ke estu enirigita mia patrino aŭ alia responsa familiano. Sciiĝinte, ke la unusola familiano estis okjara fratino nun jam rehejmiĝanta kun la unusola biciklo, enpensiĝis ankoraŭ pli konsternite, vokigis mian fraton, je kies respondoj eble alkroĉis mian sorton. Venis do mia frato, sed ŝokite de neatendita kolegianiĝanta frato, li konfuzite respondis nur unu balbutatan jeson al tro embarasiga demando, tia: *Ĉu vi konas tiun ĉi homon*? *Ĉu ankaŭ li manifestadis inklinon fariĝi fratuleto de Sankta Antono?* Je la jesa respondo, la rektoro silentis per longa paŭzo, spirmankiga en mi; forvenante de ĝi li forpermesis ambaŭ, min asignante al la fratulo kolegia asistanto. Ĝuste en tiu momento bronza sonorila alvoko invitis al la salonmanĝo. Unu minuton pluan, kaj post mistera kantata preĝeto, mi ekgustumis la unuan tagmanĝon de mia kolegia vivo. Kun mia frato, senhezite ateste ŝajniginta esti jam konstatinta en mi eksterajn signojn de mia inklino al sankta vokiĝo, neniam mi parolis por ne tro lin konsciigi pri mensogo, eble pli trudita ol perceptita.

La rektoro invitis la kolegianojn manklaki al la nova kolegiano kaj mi imitis ĉiujn kaj ankoraŭ pli forte aplaŭdis ĉar mi ne komprenis, ke la pli ol cent kolegianoj estas salutantaj min. Ĉiuj ridis, kelkaj laŭdis mian humurinklinon, alskribante mian manklakadon al ŝerce partoprena inteligento, ne al senorientiĝa fremdiĝo. La unuan pladon mi kredis la solan same kiel ĉe mia hejmtablo, male oni entabligis aliajn du sinsekvajn kun viando kaj fruktoj: tial mi povis min senskrupule satigi. Tio min ne nur allogis, sed ankaŭ kreskigis la konvinkon, ke fine plensate kroniĝis miaj aspiroj.

### Ĉapitro dua

# Krudaj adaptiĝoj kaj pli krudaj aspiroj al milito

La plej konata inter la seminariaj aktivadoj, laŭ onia opinio kaj mia amara konstato, antaŭvidita tamen, koncernas meditadon kaj preĝadon. La tempo, fakte, dediĉata al preĝado estas konsiderinda, eĉ oni celas instrui por ke etpaŝe sed perceptigeble oni spertu aliigi la tutan tempon kaj la tutan tagagadon al preĝo: iu speca de ĝoja penso direktiĝanta el koro al Dio, vole kaj kore sentita kaj sentigita kiel amiko. Sed Dio, tiutempe, de mi ne estis taksata, des malpli perceptata, amiko, li najbaris al nenio, aŭ restis io je kio mi nur profitcele ŝajnigis kredi kaj ami. Kiom da tempo mi devos pasigi en tiu preĝa tasko, dum kiu mi devos simuli partoprenon kaj inklinon al Jesuo kaj Maria? Kiel elaĉeti tiujn foruzatan tempon kaj neĝuitan aktivon? Kiel sendamaĝe daŭrigi miajn sintenajn, mienajn kaj tutkorpajn aspektojn kaj superi tian dialogadon kun estaĵo kies ekzisto tute al mi ne interesas kaj kiu, se ekzistas, loĝas tre fore?

Jen antaŭeniĝas la solvo: iom post iom, preskaŭ spontane, elcerbiĝis kaj preciziĝis la elirvojo, per kiu malgraviĝu aŭ transformiĝu en agrablon la pena neevitebla tasko: mi hastis parkerigi la preĝojn por ilin reciti unisone kun la aliaj sen elspezi atentiĝon kaj por min fordoni dum meĥanika preĝado al libera permensa aŭ fantazia vagado. Mi eĉ, foje, por pli certe ne esti surŝutata per devotaj formuloj, elektis antaŭe la temon de tiu dumpreĝa rezonada kaj fantazia kreado. Kaj tiel mi sukcesis elprofiti eĉ de la nepreco, tiel de mi interpretita, ne ŝanĝi korppozicion sur la sidloko dum meditado por eviti pale eksterigi enuon aŭ malestimsignan lacecon, kiun jam mi brile superis.

Jarojn poste, kiam mi komencos legi “science“, nome senstompe, ene de mi mem, mi pritaksos tiun unuan disduiĝon meminicado al la arto ŝajnigi kaj konservi sensufere du kontraŭajn sintenojn kaj kondutojn en la samaj aferoj.

Tamen, foje el miaj lipoj elglitis, kelkaj voĉtrenaĵoj dum la silentaj cezuroj, aŭ devojiĝoj dum voĉaj preĝaj formuloj, el kiuj mi ellernis foriri per eta raŭkectuso kaj novaj palaj signoj de fervoro esperante ne impresi tro aĉe la kunpreĝantojn. Etaj humiliĝoj por grandaj profitdonaj distroj! Sed mi haste perfektigis la arton preĝi senpreĝe: jen kiel.

Tuj post la matenleviĝo, la seminarianoj kolektiĝis en la kapelo por la unuaj tagdevotaĵoj. Mi rapidis dum la tualetaĵoj, gajnante kvaronhoron kiun mi elspezadis en la kapelo en kies benko sidanta silente mi legadis kaj relegadis la

porpreĝan manlibron. Eble, eĉ miaj edukantoj, taksis tiun mian rapidiĝon al la kapelo deziro preĝi per aldonaj devotaĵoj: mi male provis plilertiĝi en la legado ĉar, kiam oni testis mian leglertecon, oni interkompreniĝis per senespera rigardo, laŭ mi dubante eble ĉu tiu dekkvinjarulo reziste duonanalfabeta povus rekuperi kaj, kvankam ne tute malkovre, oni konceptigis al mi la eblon fratuliĝi restante laika, nome sen pasi tra studoj *foje enuaj kaj senutilaj,* oni aldonis konsolige. Mi do legadis tiujn piecekscitajn paĝojn, imagante la sonojn jam aŭditajn dum komuna preĝado kaj paŭzojn kaj voĉajn altiĝon kaj malaltiĝon: la klopodo elfluigi ilin nivele de senso sed ne de voĉo, kaj la penstreĉo limigi ilin al la imago, donis al mi senvolan eksteraĵon de aktoranto aŭ de duonmaniulo nekapabla domini aŭ flegi siajn fervorajn bigotiĝojn. Tiel mi certe aspektis al la rektoro tiun matenon kiam, li alproksimiĝis, el malantaŭo de miaj ŝultroj, al mia kapo, por plurminuta observado, dirante ne sen memkontento pro tiom da fervoro en seminariano: *"kion vi susuras kaj kiajn devotaĵojn vi aldonas? restu distriĝi kun la aliaj, kaj venu preĝi kun la aliaj. Ĉu vi volas akiri sanktecon unutrafe?".*

La ruzoarton elpensitan mi aplikis ankaŭ por min liberigi el peno de preĝado: kial ne legi kaj instruiĝi pri lingvo dum kaj per preĝado kaj meditado? Laŭ monatoj min savis tiu eskapilo.

Sed la problemo koncerne la preĝadon etendiĝis sufiĉe transe de tiu bagatelaĵo. Entute la seminarianoj pasigis tage, matene kaj vespere, pli ol du horojn kaj duonon antaŭ altaro preĝante aŭ en gvidata meditado: ĝis mia atento travivis absorbita de la novaĵo kaj distrita de la klopodo alproprigi la formulojn kaj ilin kompreni, la penado restis dampita kaj leĝere sentita. Pojome mi perfekte ellernis arton movi lipojn sen ĉesi samtempe sekvi kaj orienti la viciĝon de mia pensaro. Venis, tamen, la tempo, ke la distro pro la novaĵoj vanuis lasante enuon kaj senton de frustracio, precipe kiam oni devis resti silenta kaj muta remaĉante la sintezajn vortojn de la prediko por devenigi el ili praktikajn kondutajn fruktojn, indajn komunikiĝi en la grupo. Al mi venis ne apartaj rezonadoj nek proponoj nek promesoj: la silenta vakuo ŝtormiĝis ene kaj ĉirkaŭe de mi fariĝante torturo kaj nekontrolitaj korpaj movoj kvazaŭ por min liberigi el ŝtoniĝo!

Sed denove sparkis en mia menso la solvolumo: *dum tiu preĝa tempo mi ripetu al mi mem la lernitaĵojn kaj recitotaĵojn hodiaŭ aŭ hieraŭ pritraktitajn aŭ jam studitajn kaj mense skandu poemojn por faciligi parkeron*. La praktiko de tiu insista ripetado, dum preĝaj aŭ meditaj horoj, donis al mi tiom da lerteco, ke en la sinsekvaj semajnaj tasko-ekzamenoj la instruistaro taksis min

jam bakita por eltreniĝi el la preparklaso unua B. B ĉar mi en la unua ekzameniĝo montrintis nekapablon paŝoteni kun la malpli nepreparitaj lernantoj de la klaso unua A, kaj do oni enfaligis min malsupraĵen! Oni nun rapidis entrotigi min en tiun de la *malpli etdotitoj*, kie la estontaj kunlernantoj rigardis kun respekto la novan maljunetan geniulon - kun preskaŭ tri jaroj de aĝmalfrueco - nesciante kiamaniere tiuj sukcesoj naskiĝis. Se je unua vido oni juĝus tian artifikon al lernado io postiĉa precipe pro manko de allogiĝo al la dia varo, tia opinio regus nur ĝis oni vidos el diversaj venontaj faktoj konstantan kaj senpaŭzan pasion al studado.

Kvankam dumpreĝe miaj pensoj svarmis aliloke kaj alisente, la meditoj sukcesis modifi kaj purigi la krudecon de mia ĉiutaga lingvaĵo, foje afekte pompa kaj malŝateca, jam ellaboriĝinta en laborejaj kaj junularaj medioj kies provo emancipiĝi el mallarĝecoj de la ordinara vivo koncentriĝis en maldecaj kaj blasfemecaj esprimoj, ĝin kontrolante per kvata observado pri alies paroladoj kaj eventuale, okaze de senvola ŝvebado ĉirkaŭ trivialaĵoj pro manko de posedo de la purigitaj esprimoj, ĝin ŝprucigante per piecaj aldonaĵoj, antaŭe per atenta ekzerco poste per preskaŭ mensa kutimo. Mi tiom ĝin rafinis, ke post kelke da tempo sur miaj lipoj blokiĝis aŭtomate ĉiu frazo vulgara aŭ triviala, kio male okazadis al miaj pli spontanaj kaj simplaj kunkolegianoj. Perfektiginte la arton refreŝigi dumpreĝe lecionajn objektojn kaj taskojn, mi tamen ne povis kaj ne volis reteni mian atenton kiam la predikoj akiris la formon de neinstiga kaj nemoraleca instruo aŭ de komento pri bibliaĵoj, kiujn mi hodiaŭ dirus historie aŭ apologie pritraktitaj: tiuj konkeris en mi subitan kaj aprioran atenton pro la kialo, eble, ke malgraŭ mia nescio pri tiu mondo, ili sencele respondis al miaj kaŝitaj duboj aŭ postuloj kaj tial ekĉesis miaj sekretaj fajfaĵoj pri Dio. Mi foje bedaŭris, grumblavoĉe, ke la referaĵoj kaj eksplikoj kun vortaj kaj gestaj bildigoj de la historiaj moroj, fono kaj etoso de la bibliaj eventoj, finiĝis senresponde al miaj pli scipostulaj deziroj. Scivolemo apudis pasion kaj ĝojon. Foje-foje forfuĝe pasis tra miaj pensaj refaldaĵoj ankaŭ, ke estus sendanĝere se Dio ekzistus!

La predika lingvaĵo ofte por mi estis mistera objekto kaj foje estigis miskomprenojn kun kelkaj ĝeniĝo kaj amuziĝo de kunuloj kaj asistantoj. La rektoro uzis ofte la esprimon *"la pekoj de la karno"*. En la itala la vorto *karno* aludas same homan korpon kun siaj psikaj inklinoj kaj viandon manĝeblan. Por mi ekzistis nur tiu lasta signifo. Tial mi konkludis: se la pastro arde spinas, ke ni devige ne sekvu la plezurojn de la "karno", signifas, ke mi devige ne manĝu "karnon-viandon". Kial tiam oni entabligas *karnon-viandon*? Kaj kaŝri-

gardante agaderojn de kunmanĝantoj, mi kredis malkovri kontraston, eĉ kontraŭdiron inter la diroj kaj la faroj, kiu tamen, certe, neniel ĝenis mian nekredemon. Nur post monatoj mi sukcesis distili, ke la esprimo "kontentigi la karnon", laŭ la sisteme cititaj Sanktaj Paŭlaj lingvaĵo kaj leĝinterpretado, rilatas la tuton de la mavtendencoj iom brutece imagigitaj, korpaj kaj spiritaj, en homo: *karno* estas la tuta homo, en la konscia kaj libera aspekto, oponanta al Dio. Kiu scias ĉu tiu pastro iam komprenis, ke tia lingvaĵo falas knabajn kapetojn tro teknikeca kaj abstrakteca? Sed tio ne eĉ flugtuŝis, tiam, mian zorgemon.

Mia ruzeco foje devis repuŝi sugestojn de kelkaj predikoj. Iu pastro, parolanta malpli moralige aŭ malpli singarde dum kristnaskaj festoj, instigis la cent seminarianojn preĝi al la Sinjoro por ke tiu ĉi konvinku la italan registaron konservi neŭtralecon antaŭ la trista kaj komplika eventaro de la Germana/Angla-Franca milito, monatojn antaŭe eksplodinta (septembro 1939). Li vortatakis Germanujon invadintan kaj konkerintan kun Sovetunio Pollandon. Miaj sentoj freneze iris al la diametre mala direkto en muta skoldo al la itala registaro pro tio ke ĝi ne antaŭis Germanujon en tiu konkero: almiliti estus kunnaska rajto de Italujo por fostigi nian potencon kaj gloron kaj nun, male kaj vee, okazas, ke aliaj obskurigas la italan aspiron. Kial min ensturmis tiuj konvinkoj?

Kelkan jaron pli malfrue mi ŝuldos tiun absurdan frenezaĵon al postlasoj, aĉege absorbitaj, de la bazelementa lernejo impregnita de ideologiaj spuroj de la faŝisma reĝimo, kiujn mia krudeco pezigis ĝis nekredebleco ĉar al mi ŝajnis, ke Italujo en ĉio valoras tiom kiom valoras en la futbalo en kiu ĝi estas la nesuperebla monda ĉampiono. Italoj ĉampionoj, ĉiuj aliaj ĝiaj helpantoj kaj admirantoj.

Ankaŭ pro tio mi ne preĝis, kvankam mia preĝo estus preĝo de sendanĝera nekredanto. En la dubo, ke iu vere aŭskultu, mi preferis teni fermaj la lipojn aŭ apenaŭ supraĵe moviĝantaj por laŭcele *mute* reciti alion.

La invito preĝi por ke Italujo evitu la militon estis insista, ada, obseda. *La militdeklaro estus maljusteco, estus mortigo, tio provokus grandan doloron en la Papo kaj Episkopo. Jam rekrutiĝas la militaj kapelanoj, viroj jam surhavas la italan grizverdan uniformon por ignoritaj (!) celoj, la patrujon oni povas servi en pli noblaj manieroj. Se ankaŭ Italujo ekmilitos, la tuta mondo eksplodos...* Mi obstine, antaŭ la Sankta Sakramento, tenis fermitaj miajn lipojn, bonŝance pro la motivo, ke en tiu kazo la preĝo devis esti silenta kaj persona. Tratempe, ĝuste dum tiuj preĝadoj, mi eksentis la bezonon plikaŝi miajn sentojn ne nur pro ilia kontraŭpacemo, sed ankaŭ pro eksuspekto ke en mi, flanke de

mia sentima nobleco, ekokulumas io malklara, kio pliposte taksiĝos "kvalifikita ciniko". Preĝon mi diligente evitis ankaŭ por ke, kvankam konvinkita pri ĝia nenia efiko, io mistera povus prajmi vere la pacon. Elstaris la deziro, ke milito rampus, por ke ni konkeru teritoriojn kaj defilu spaliritaj de la glorantaj subigitaj popoloj, kion mi dum ŝajniga preĝo antaŭĝuis imagante triumfajn marŝadojn ene de la kelklandaj popoloj kies ekziston mi apenaŭ eksciis per la unuaj tre krudaj prigeografiaj rudimentoj. Kun la edukantoj kaj kunuloj, eĉ kun konfesprenanto kiam kun tiu ĉi ekos sincera pekmanifestiĝo, mi tiajn kontraŭaspirojn kovris eĉ per pacemaj deklaroj dum silente spionadis ĉu Italujo fine komencas konkeri. Mia patro, en Germanujo por forfuĝi el maldungiĝo en Italujo, poiomete fariĝis en miaj pensoj, kaj foje ankaŭ en miaj konversacioj, heroeca helpanto en milita kampo; eĉ mi estis ankaŭ preta lin aprobi kaj inciti per letero, kiun poste ne sendis suspektante, ke la rektoro komprenus mian malinklinon al la paco kaj celoj de la preĝado.

Se necesus pli klarigi kiajn luktojn por teni sekretaj la aspirojn de mia animo, helpu jeno. Iun kristnaskan antaŭtagon oni amasiĝis en la granda preĝejo, kun sekularaj personoj, por aŭskulti la anoncitan Papan radiomesaĝon elsenditan al "Urbi et Orbi" (Al la urbo Romo kaj al la tuta katolikaro). La parolado, kvankam soleneca kaj iom malklara por mi, konkludiĝis per priskribo pri agadoj de Vatikano (de la papo mem kaj ties diplomatio) por subteni "forfuĝigitojn, elmigrigitojn, prizonulojn… *kaj ankaŭ tiujn de semita gento". Semita gento, neariana sango* eble mi aŭdis elfluanta pliposte el la komentoj de la frataro. Pri kio temas? Certe, io interligita kun la paco, io komprenita nur de la pacemuloj, io do pri kio mi silentu por ne manifesti mian sekretan deziraron.

Plua miskompreno ŝosis pro tiu "lando-gento de nearjanoj". Iun vesperon, eble finoktobran 1941 kiam Germanujo kun Rusio jam konkeris Polion, la meditado estis diktita de okaza gasto milita kapelano. El lia parolado mi komprenis, ke la Papo preĝas kaj helpas la *nearjanojn,* kiujn male Germanujo batalas. Pro tio la germana ambasadoro en Romo vizitis la papon por lin riproĉi. "*Ĝuste!"* mi memronronis, *"Kial la papo helpas, eĉ se per solaj nutraĵoj kaj vestaĵoj kaj medicinaĵoj, adversulojn al Germanujo amika de Italujo?"*

Bedaŭrinde, la neceso ne malkaŝi mian deziron, ke Italujo militu lige al Germanujo, malkonsilis, ke mi petu eksplikojn pri la popolo aŭ lando de la "nearjanoj[1]".

[1] Nun penseblas ke tiu kapelano referencis al la encikliko de papo Eŭgeno Pacelli de la oktobro 1939 en kiu oni legas, citite el Sankta Paŭlo, *"ne plu estas hebreo aŭ greko aŭ aligentano... ili nun estas unu sola realo",* plurfoje elsendita tiutempe, eble propagandcele, fare de la BBC de Londono. Vortoj tiom klaraj, kaj ripetitaj de malamikoj de Germanujo, kolerigis nazian re-

Neniu akceptos vera tiun aberacion kiam, post kelkaj jaroj, mi rakontos tiun mian sintenon. Mi estis, senscie, ene bakita de neevidenta reĝima propagando, kiu min troekscitante per falsaj grandaĵoj kaj noblaĵoj stultuligis, kaj eble ankaŭ mastrata de la bezono min provizi je palpebla idealo, ĉar tiu de la simpla kaj nura instruitiĝo saturis jes la menson sed ne la spiriton. El tiuj stultumaĵoj mi plenumis plurajn: tiu ĵus fadenita estis nur la plej aspekte nekredebla. Oni ridu pri la sekvaj.

Estis alia rifo kontraŭ kiu oni povas kraŝe bati. Bona regulo, kies plenumon nur foje pro neantaŭviditaj okazaĵoj oni preterlasas, estis, ke ĉiu kolegiano praktiku la ĉiusemajnan orelkonfeson pri siaj pekoj ĉe konfesprenanto. Kvankam tiuj pluras, tamen oni insiste konsilas frekventi ĉiam la saman. Por ne elvoki suspektojn, mi decidis elekti simplanimulon iom maljunan kaj forloĝantan, kaj aliri ĉe lin kaj min akuzi je io vera de miaj kulpetoj, escepte de la precipa kulpo, tiu de mia ne rektanima intenco kaj malhonesta konduto fronte al la celoj de la kolegio. Tiu individua rito kaŭzis al mi la plej gravan el suferoj ne nur pro la neceso montri sentojn ne verajn sed ankaŭ pro la neevitebla okazo elmontri al mi mem kiom mi disiĝas de honestaj pensado kaj konduto. De tempo al tempo mi konsciiĝis, ke mi devus paroli klare kun tiu trompita viro kiu, ĉiukaze, konservus ĉiam la sekreton kiel superan eklezian ordonon. Sed, kiam eblis, mi ruze forglitis el tiu konscienca sugesto, ne konfuze perceptita, min ekskuzante, ke ne nur pri duboj pri sia vokiĝo temis, sed precipe pri seminariano nekredanta. Fojon mi eĉ pretiĝis por manifesti mian aferon, sed hontosento transforĝis miajn pretigitajn eldirojn en sensencajn balbutaĵojn tuj fuŝiĝantajn tra la kutimigita pekakuzo. Surprize, la simplulo riveliĝis ne malsimplema.

Fine mi ne rezignas ridigi mian plumon per la ridekscita sinteno de mi praktikita dum kelkaj monatoj pro misa persona apliko de diro evangelia. Edukanto, krom ekzalti la evangeliojn, ties dirojn foje komentis dum paŭzaj babiladoj... Ĝuste tiuj ŝajne sencelaj komentoj kreskigi ilian influon sur min: evangelio ne trompas kaj ne eraras! Ĝuste tiu ĉi registras ke Jesuo diris, ke "okulo estas la spegulo de la animo", nome tra ĝi aperas ankaŭ la malboneco

gistaron kiu protestis ĉe la papo. Ĉion tion oni hodiaŭ povas legi en libro (Romo kaj Hebreoj) de hebrea aŭtoro, jam konsulo de Israelo en Milano, Pinchas E. Lapide, kiu raportas pri sekvoj de la radiomesaĝo (kristnsakon 1940) en kiu la papo komunikas kion farendan, de ĉiu katoliko, per la frazo: "... Ni (la papo. *Red*.) feliĉas povinti helpi grandnombron da rifuĝintoj, *aparte nearjanoj*". Se plu aldoni ĉi-rilate, memorindas, ke en alia radiomesaĝo, 1942, estas eksplicite kondamnitaj "persekutoj pro naciaj kialoj aŭ pro *rasiaj pretekstoj*": klara aludo al enprizonigado de hebreoj.

de la intencoj kaj pensoj! Kion mi faru? La malplej malefika defendo konsistas en ŝirmado de sia rigardo: ke neniu vidu rekte mian rigardon, ke neniu legu en mia okulo mian malsincerecon! Do mi komencis malhelpi, ke mia rigardo interkruciĝu kun tiu de edukantoj. Kia peno kaj kiaj malsukcesoj!… Bonŝance iompostiom la forto de la evangelia proverbo estingiĝis kaj lasis liberaj miajn okulojn ĉar fariĝis tute certa la konsciiĝo ke mia koro kapablas ŝajnigi sincerecon eĉ pere de la okuloj!

Alia, eble iluzia eble objektiveca, sed vere demanda problemo. Iom post iom ekpululis dubo pri la kapablo de miaj edukantoj eviti evidentajn kontraŭdirojn. Ili ne hezitis insiste instigi la kolegianojn agadi honeste kaj sincere ĉar honesteco kaj bonagado ĉiam sukcesos kaj ĉiam atingas bonan solvon kaj publikan rekonon, dum la kontraŭo ne povas eviti riproĉon kaj punon. Sed samtempe ili diradis, ke Jesuo honeste kaj altruisme agadis, kiu tamen ricevis krucumon. Se veras la unua falsas la dua!, kredis mia logiko. Kiam la problemo eliris eksteren elsaltis, ke ĝi estas nur mia ĉar la aliaj jam interpretis la unuan kiel veran plurfojan kaj taŭgan nur por propulsi al la bonfarado kaj sincereco. Inter la multegaj pli/malpli konvinkaj eksplikoj, okazis ankaŭ ŝercaj respondoj fare de pli aĝuloj kunaspirantoj: je konfirmo de la interrilato inter bonagado/publika rekono kaj malbonagado/publika mallaŭdo oni ekzemplis Jesuon se traktitan laŭ tia kriterio: fakte, se li malobeis siajn gepatrojn kiam ili estis devigataj angore lin serĉi dum diversaj tagoj en Jerusalemo, tio havis sian logikan sekvon. “Jes, vere Li malobeis. Sed oni vidu kien li ruliĝis!”, ŝerce kriis ĉiam gaja kolegiano indikante krucifikson.

Pli frue la momenta problemeto fariĝis la granda problemo: Ĉu triumfas la bono aŭ la malbono? Kie? Kiam? Aŭ ili kunmarŝos ĉiam? Kion pri tio vere diras religio? Ĉu kompetentas predikantoj? - Mi decidis ke iam pristudos mi, kaj trovos mi la solvon!

Ĉu favori ankoraŭ la emon rideti pri si? Se jes, jen nova okazo. Dum alproksimiĝo de la kristnaska festo, oni kantadis (kaj la pastro emfazadis) la liturgian esprimaĵon, origine biblian, “*malfermiĝu la ĉeloj kaj el la tero burĝonu la Savonto”.* Sed mi sciis, ke la ĉielo estas trakurebla alsupre senfine, ĝis la steloj kaj ankaŭ pli alsupre ĉar nenio povas tion malhelpi. Kio do povas malfermiĝi? La ĉieloj ne ekzistas! Kaj mi ektaksis kompatinduloj miajn kunulojn allasiĝantajn al tia trompiĝo. Mi ne memoras kiel tia “konfirmo de la ruzeco de la pastroj” dissolviĝis en sian kontraŭon, memoras nur mian sekretan pliestimiĝon pri mi.

Dume ĉe la lernejaj aŭtoritatoj mi daŭrigis esti originala kazo. La instruis-

taro ne sciis kiun sanktulon alvoki por min komprenigi, ke ĉiu latina vorto havas sian propran akcenton, dum mi laŭtvoĉe legante, por ne forgesi la kazan aldonaĵon aŭ la verbajn finaĵojn, peze kaj nure akcentadis tiujn ĉi provokante ridon ĉe la kunlernantoj kaj senutilan penon de la frustraciita instruisto ĉar ties skandantaj klopodoj min enmeti en la korektan prononcon restis seneĥaj ĉe miaj oreloj. Ekzemple, *amàbam* sonis ĉiam *amabàm* kaj *pòpolus* ellipiĝis aplombe *popolùs*, kvazaŭ por pli amuzigi la spektantaron, kun mentora tono. Sed jen, de hodiaŭ al morgaŭ, post kelkaj monatoj, sparkis la miraklo, la akcento ekfalis sur sian ĝustan silabon kaj donis al la vortoj komunan sonon: mi ne memoras la kaŭzon de tiu ĝustiĝo, sed memoras, ke pri ĝi konstituiĝis tiutempe la miro kaj temo de multaj konversacioj kaj gratuloj. Ĉesante esti la amuziga kaj distriga fuŝemulo ĉe ĉiuj, mi samtempe komencis montri ne suspektitajn kapablojn kiel lernanto. Samafero okazis rilate la malsubjekton: se iu vorto hazarde funkciis la unuafojon malsubjekte, ĝi tia devu esti porĉiam.

Mia duparta naturo, de studento kaj simulanto, estis vivita entute sen eĉaj skuetoj krom momentoj de envio pro la gajeco kaj simpleco de miaj kompanuloj, aspekte malpli lertaj aŭ profitantaj de sia inteligento ol mi de la mia, sed riĉaj de humaneco kaj grandanimeco, kaj kelka momenta deziro trovi motivojn por ke miaj subkuŝantaj duboj pri religio estu finfine aperte diskutataj kaj eventuale dispeliĝu. Mia prireligia skeptikismo kistiĝis precipe pro duboj pri la sincereco de la pastroj. Je kulpo iu ajn mi ne akuzis ilian konduton, sed, senmove kirasita, mi frontis bazan demandon kun respondo implicita: *Ĉu vere ili kredas je tiuj blagaĵoj aŭ fantaziaĵoj? Ĉu eblas, ke instruitaj homoj mem kredu je tio kio aspektas ruzaĉece sed plumpece proklamata?*

Se origine mi tion limiĝis esprimi, en konkuro kun ĉiuj por pli amuzige ekstravaganci, inter metikunuloj pribabilante religion kaj pastrojn, poste ĝi fariĝis intima konvinko ĝis forĝi, kiam mi eniris kolegion, mian praktikan juĝon laŭ la jena silenta moto: *religio statas ruza trompo kaj mi trompas ĝiajn trompantojn*.

Tiuj skeptikeco kaj kontraŭreligieco havis fonton, antikvan kaj originalan por mi, kiu ne meritus esti rakontata se fore de ĝi eble mia tuta vivo alimaniere orientiĝus. Ĉu nur ridi?

Je la sepjariĝo oni min frekventigis la katekisman paroĥejan lernejon por min prepari al la unua komunio: la katekistino, virino kvindekjara, je mia okuloj seneraripova, tiom severe reliefis Dion pekpunanta, ke mi deziris tiun ĉi en neniu ajn tempo renkonti. Eĉ ŝi diradis, sendube por ke ŝiaj lernantoj pli efike fuĝu el la malbonfarado, ke iuj pekoj neniam kaj neniel estos pardonitaj ĉe

Dio: inter tiuj ĉi superŝvebas speciala sakrilegio, nome tuŝi per la dentoj la sanktan hostion *(”Ne tuŝu per la dentoj”*, male, estis konsilo signifanta precize: tiu pano estu manĝata jes, sed ne nutraĵcele). Peko nepardoninda, do absolute ne plenumenda, do sendube evitata, laŭ ŝia naiva ekvivalentiga rezonado. Male mi ĝuste tiun ĉi kontraŭvole plenumis: la hostio al mi enbuŝigita de la sacerdoto fatalece falis kontraŭ miaj dentoj senutiligante miajn streĉojn kaj klopodojn mildigi kontaktojn: ĝi algluiĝis al la dentoj tiom nemoveble, ke ŝajnis, ke peko estus trairanta kaj okupanta ĉiujn miajn membrojn. Terurite, mi silente tremis penante ne eksterigi senesperajn reagojn kaj sentojn, kaj malbenante ĉion kaj min kompatante.

Laŭ la rehejmeniĝa vojo, post la senĝojaj, en mi, festado kaj komuna matenmanĝo en la paroĥestra domo, solece kuntreniĝinte en mia sekreto, mi draste kaj devige eltiris la konkludojn kiuj estis samtempe tristigaj kaj liberigaj; sed pormomente mi sukcesis izoligi, aŭ ne travidi, tristecon ĉar ties faktoron kaj fonton mi kredis tiel malproksimaj, ke ili neniam konkretiĝos. Jen la ekzakta dialogo, inter mi kaj mia renversita memo aŭ elŝteliĝinta interna observanto, encerbigcele rondele ripetata:

*“Nun super mi jam volbiĝas damniĝo kun abomeniga rigardo de Dio; ĉu ne jam senutilas viziti la preĝejon aŭ preĝi?”*

“Jes, senutilas ĉar vi jam definitive destiniĝis al la perdiĝo”.

*“Mi bonŝance estos liberigita je ĉiu religia tasko kaj povos kaj rajtos senpreme vivi, ĉu ne?”*

“Jes, vi estas liberigita”.

*“Sed kiel kaŝi antaŭ ĉiuj tiun mian spiritan staton kaj samtempe eviti partopreni devotecajn ceremoniojn jam senfruktajn se ne malutilajn por mi?”*

“Per la sekreto kaj kredigante, ke vi vizitas la preĝejon dum vi male iras distri laŭstrate kun admirataj kunuloj, kion vi jam faris, kelkfoje laŭ viaj ne ĉiam kaŝitaj deziroj”.

*“Kaj pri la preĝoj matenvesperaj... komunumaj, laŭtvoĉaj?*

“Vi ŝajnigu kaj finfine tion oni evitas, kiel pliaĝaj kunuloj kaj parencaro”.

*“Kaj la perspektivo de estonta damniĝo al la infero?”*

“Tio forestas se vi vivas ĝis la sepdekaj kiel via nuna patra avo!”

*“Kiel eskapi el la Dia venĝo?”*

Al tiu lasta demando mi ne donis respondon. Esti en terura kaptilo kaj devi ne paroli kun iu ajn, jen la fonto de psika kaj konduta tragedio, kies atestanto estas nur mi. Neniu komprenis la originon de mia obstina rifuzo eniri la preĝejon kaj genuiĝi kaj partopreni en kolektivaj ritaj kaj familiaj preĝoj.

Tamen tiu kondamno de senvola kulpulo (ĉar mi ne volis denttuŝi la hostieton hazarde algluitan al mia palato-dentaro), kelkfoje, ekbriletis kiel absurdaĵo kaj ekendubigis eĉ komunan saĝecon kaj la realan dian konsiston: aŭ Dio ne estas aŭ oni eraras pri liaj ordonoj!

*"Kaj venos la morto!"*

Jes, sed ĝi estas fora fora. Ankaŭ la patrina avino ĵus mortinta ŝajnis tiom maljuna ke eble la tempofino por mi ne venos.

Ĝuste al tiu mia patrina avino ligiĝas la unua neplaĉa, plaĉe tamen rakontinda, sekvo de mia pekkonscienco. Ŝi mortis antaŭvesperon de tuj pasonta novjaro post ebla abunda manĝaĵo. Kiam miaj gepatroj min kondukis al la funebroj, mi obstine rifuzis ŝin vidi, kaj eventuale kisi antaŭ la fermo de la ĉerko, kaj marŝadi kune kun aliaj post la ĉerkotransportilo. Bonŝance, oni min taskigis manpuŝi biciklon de iu onklo partoprenata en la funebra procesio. Kial tia obstino? Jen: mi sciis (!) ke mortintoj ĉion vidas el la transmondo, do mia avino estas malkovranta mian pekstaton, stato de poreterne damnito, kies preĝoj nenion valoras kaj eĉ damaĝas la aliajn. Resti for de ŝi estis protektiĝo kaj liberiĝo el angoro.

Mi renkontis, dudek kvin jarojn poste, tiun katekiste evangelizistinon, publike fieran pri mia religiula enmetiĝo, tiom senafektan kaj riĉan en humaneco, ke mi ne povis min reteni de la dankema impulso ŝin kisi. Eble, ŝi ankoraŭ ne gustis, ke ne ekzistas peko aŭ sakrilegio nepardoninda aŭ ŝi ankoraŭ kredis, ne antaŭvidante la psikajn kaj moralajn kaj religiajn konsekvencojn, ke por malproksimigi personojn el la tento de la malbono utilas ilin teruri. Kiel ŝi povis fiksiĝi en tia antaŭjuĝo malgraŭ siaj emociekscitaj priskriboj pri la dolĉeco kaj pardonpreteco de laŭevangelia Jesuo?

Kial mi rakontas tiun historion ŝajne certe bagatelan kaj seninfluan? Pro tio ke, foje, el subgrundo de mia animo mi provas serĉi senkulpigojn kaj mildigojn de mia respondeco en la estontaj liberaj elektoj kaj agadoj: ja, kiom tiu misinformo desformis mian karakteron kaj vivkonceptadon kaj difektis la kapablon libere elekti? Des pli, ke mi neniam aŭdis pri personoj spertintaj samsorton!

Jen la unua origino de miaj skeptikeco kaj kontraŭreligia ribelemo naskiĝantaj el la deziro, ke la minacanta Dio ne ekzistu kaj jen la kialo pro kiu la adoleskantaj grupoj estiĝos por mi kruda kaj vulgara ekzerciĝado en mokado al religiaj sanktaĵoj. Iu ono de tia sinteniĝo revekiĝos en mi, en venontaj ribelaj momentoj, almenaŭ nivele de vortelekto.

Ne nur skeptikemo, sed ankaŭ timo, timo pri io mistere malamikeca en-

rampis tiutempe en mian animon, kiu antaŭe kredis vivi en mondo de amikoj simpatiantaj al li, sed abrupte malkovris la mondon al li malamika. La novan spiritan situacion portretu jena epizodo, nur aspekte noveleca ĉar ĝi vere profunde kaj eble por ĉiam gravuris miajn psikon kaj pensmanieron.

Oni konvinkis min, ke gardanĝelo apudas min seninterrompe, min defendante kaj ame prizorgante. Mi estis sepjaraĝa kaj krome vivadis sub la influo de la tia instruo: nokta mallumo ne timigis min pli ol taga lumo, mi brave paŝadis kaj kun amikoj kurludadis apude de tombejo eĉ se mi certis, ke la mortintoj de tempo al tempo eliras el la ĉerko kiam ili vidas preterpasanton, por almozi pri propeta preĝo, kiun mi senlace pretis anticipe koncedi. Oni parolis pri sorĉistinoj, sed mi ankaŭ kontraŭ ties sombraĵoj estis protektita. Sed iutage tiu konvinko pri protektanta anĝelo preskaŭ abrupte ĉesis igi min nevundebla kaj neterurebla.

Ekneĝetis je la oka de tiu decembra mateno, dum mia patro kun najbaraj vilaĝanoj elporkejigis nigran centsepdekkilograman porketon nazligitan por ĝin mortigi kaj igi salamoj. Ĝiaj gruntaĉoj diskonigas la novaĵon kaj kurigas la najbarojn, dum multobligas la irorevenojn de virinoj portantaj potojn plenajn je varmega akvo kun aromaĵoj, dum infanoj trakorte diskuras en freneza ekscitiĝo. La ĵus martirigita porketo peze kuŝas sur granda subĉiela tablo dum festaj voĉoj nuligas en la memoro ĝiajn kriegojn, senesperajn kaj korŝirajn. Virinoj kuiras sangbuletojn ilin donacantaj al ĉiuj infanoj: je ili mi multe voras rajtigita de mia sento de proprietulo de la nun silentigita porko. Meze de festobruo, laŭtvoĉo de viro, de la viro kiun mi ĉiam pritaksis serioza kaj influhava ĉar saĝa, la plej saĝa el la najbaroj, pli saĝa ol mia nesuperebla patro, grimacas: “Jen mi ĵus vidis la porkan animon foriranta. Certe ĝi nun loĝos ĉi najbare serĉante venĝon, abruptan kaj sangan venĝon! Ĝi lasos la lokon nur post la venĝo! Infanetoj, defendu vin nun kaj post la faŭka vorado!... Hum!”; kaj ekmanĝis montrante per ŝirmaj gestoj ke mem jam estas atakata de nevidebla sturmanto, kiun mi tamen kredis travideti !

Tiuj vortoj gravuriĝis en mia animo. Mi tuj apudiĝis al la plej proksima ulo, kvazaŭ por min protekti kontraŭ tiu venĝoaspira animo. Kiam oni denove entabligis porketajn sangokaĉajn buletojn kun rostitaj viandpecetoj, kiujn mi antaŭe tre senpacience atendis pro ilia fabelgranda franditeco kaj jam ekgustumis ĉerpante el la manoj de la kuiristino, mi ŝajnigis ilin akcepti sed kaŝe metis ilin sur la tablon inter la pladoj kaj panoj aŭ ilin enpoŝigis por poste forĵeti: estis certe nekonscia provo montri al tiu porka animo miajn senkulpecon kaj pardonpeton. Miaj timoj tamen fariĝis intensaj kaj pli kaŝitaj en mia men-

sa fundo; kaj ĉiam pli malofte okazis io forturniganta el obsedo de malĝojaj imagoj.

Kaj mia gardanĝelo, kiun mi kelkafoje plorigis pro miaj malobeoj al la patrino kaj kun kiu mi ĉiam reamikiĝis kun granda ĝojo, kie li estis? Li malaperis, foriris el mia horizonto, ne plu ekzistis.

Mi ne priskribas la elturniĝojn per kiuj mi eskapis tian fiaĵon, t. e. manĝi porkaĵojn; mi insistas, tamen, pri kiom etendiĝis miaj teruroj, tagaj kaj koŝmare noktaj. Per larĝaj rondiroj trakamparaj mi klopodis eviti al mi flankpaŝadon ĉe la tombejo, kies nura fora aspekto senspirigis min; eĉ la simpla penso pri mallumoj, aparte ĉambraj kaj noktaj, angorigis mian koron; dum restado en la klasĉambro ofte mia kubuto protektiĝe devis tuŝi tiun de la sambenkulo; en sonĝoj de temp' al tempo mi vidalvide kontaktis la porkan animon, kiu tamen ne perceptis miajn senefikajn klopodojn sciigi, ke mi ne ofendis ĝin, ke mi apenaŭ liptuŝis buletojn de ĝia kuirita sango, ke mi denun ne manĝos erojn de ĝia korpo salamigita, ke mi eĉ sekrete engaĝiĝos malebligi, ke aliaj manĝu je ĝi. Tion mi ripetadis sur elpajla mato ĉiukuŝiĝe kaj ĉiuvekiĝe.

Ĉe vekiĝo krome, kiel en filmo, postkurantaj misforme sombraj estaĵoj terurige obsedadis mian imagpovon min devigante angore alvoki, aspekte senmotive, la ĉeeston kaj amikan voĉon de miaj familianoj, kiuj tamen ne povis malhelpi, ke mi ŝvebigu, ene de mi mem, ion malhelan eĉ super nia domo.

Mi paŝadis, en tiuj tristaj monatoj, sur la centra dorso de la stratoj por ne esti kaptita de malamikaj kaj hidaj krudaĉuloj elrampantaj el fosoj kaj heĝoj. Mia frato iam hazardis, eble ŝerce, eskapigi el lipoj, ke la diabloj transiras rapide stratojn lasante piedporkajn postsignojn sur la polvo. Tial mi diligente ekzorgis paŝi kun la okuloj fiksaj al la strata polvo por ke, eventuale, miaj piedoj ne fariĝu porkaj aŭ diablaj senaverte tretante signojn de ĵusa hida spurado, kaj kelkfoje mi vidis, plibone eble imagaĵoj fariĝis vizioj, animalojn min aĉe gvatantaj kaj enpuŝantaj artifikojn por min tiri; eĉ ombroj antaŭantaj la sunsubiron provizadis siajn longiĝantajn formojn al malamikaj supernaturaj estaĵoj. Mi ruze kaj manie zorgadis resti ĉiam en kompanio kun familiaj uloj por ke ĝeniĝu la nevideblaj sombraj miaj akompanantoj kaj kiam mi devis resti sola mi mallarĝigis miajn membrojn enen de mi mem; la horoj antaŭ la momentoj de mia soleco pasadis kun insista tristigemo, la horoj post la soleca restado min penigis preskaŭ kiel la teruraj lokoj. Eĉ en mia kuraĝa patro, la aŭdaca noktumanto pro kampargardista laboro, mi kredis vidi signojn de necesa lukto kun nevidebla persekutado.

Mia terurstato daŭris almenaŭ kvin monatojn kaj mi kredas, ke neniu kom-

prenis la veran kaŭzon de mia bizarega kaj groteska konduto, de mia senmotiva ofta ploro kun abrupta kaj senescepta rifuzo enbuŝigi porkaĵon, de mia aspekta ellaso de atento, de neeksplikeblaj obstinaĵoj. Foje ŝtele mi observadis la manĝantojn de porkaĵoj por malkovri spurojn de ilia teruro kiu certe ne povus manki, foje mi miris pri ilia lerteco kaj sentimeco, kvankam opiniante, ke ilia kuraĝo certe devis esti pli ŝajna kaj afekta ol vera. Dumnokte mi travagis sonĝojn kun uloj timigitaj kiel mi.

Preskaŭ abrupte mia spirito kvietiĝis, mia anĝelo el vana kaj senforta kunesto rericevis protektigan formon, mi refariĝis pro lia akompano ĝuanta kaj, do, je teruro libera. Estis marto, la unua de marto, malpli ol kvin monatojn disde tiu porkmurdo, kaj jen alia porkbuĉo. Ĉi foje ĝuste en la biena korto de tiu sinjoro, estimata serioza kaj impone saĝa, kiu laŭte kvakis, ke la animo de la elvivigita porko venĝoaspire vagas. Kiam ĉesis la porkaj krioj, tiu ĉi viro levis la sangokovritan tranĉilon proklamante: “tiun ĉi fojon mi amikiĝis kun la animo de la porko ĵus buĉita. Jen ĝi!”. Tion dirante li apertigis sian manon kaj blovis forte sur la nudan palmon aldonante iom oĉje: ”Jen ĝi, ĝi flugas kiel papilio, kontenta kun aliaj porkaj animoj inter la kontentaj homoj. Ĝi flugas kune kun ĉiuj porkaj animoj, ke ni manĝu kaj ĝojpleniĝu”. Bonŝance lian fanfaronetan bravdiron mi ankoraŭ taksis kun simpatio, kvankam ĝi duonaspektis iom kontraŭdira. Antaŭ miaj okuloj abrupte lia antaŭa severeco mildiĝas, lia terura saĝeco fariĝas karesa tuŝo kaj pormomente mi kredas konkrete vidi tiun feliĉan kaj feliĉigantan animon, kies brutaleco jam dissolviĝas en ridetan mienon.

Tiuj vortoj agrable investis min kiel freŝa aero foriganta tiun sufokan. Mi ne plu travidis la flirtantan papilion, sed tuj mi ekpensis pri venĝo: ĉu tial ne ekzistis venĝo? ĉu venĝo elburĝonis en mia fantazio? Ĉu senmotiva enkoŝmariĝo? Abrupte, ne pograde, same kiel ili venis, miaj teruriĝoj maliĝis, reestabliĝis simpatio al ĉio kaj amuziĝemo. Eble mi ne sukcesas esprimi la kvaliton kaj la kvanton de ĝojo, kiu min invadis. Ankoraŭ hodiaŭ, se mi volas kompreni aŭ interpreti grandan ĝojon, eĉ komunan ĝojon, mi reelvokas tiun momenton, kiun mi analize dividas en miloj sinsekvaj fazoj pliigantaj, ĉiu unuope, la finan ĝojan liberigon.

Vere mi ne tuj tiel konkludis. Mi antaŭe atente observis la viron, kiu intertempe ekdonacadis el poto sangbuletojn kuiritajn super tujapuda klakanta fajro al ĉiu infano, akompanatajn de vangotuŝetoj kun fluga duboforiga rideto: mi ricevis kaj manĝis per unu gluto. Ekscitante miron kaj ĝojon, mi alproksimiĝis al mia patrino ŝin petante pri pluaj porkaĵaj sangbuletoj, kaj avide manĝis mi-

rigante familianojn konantajn pri mia antaŭa sinteno, kaj jam timantajn pri mia kaŝita malsano; ili eble interpretis la novaĵon strangecaĵo de mia karaktero. Ili ne sciis, kaj eble ankoraŭ ne spertis, kiom belas trapasi el terurstato al la gustumado de belaĵoj!

Kaj sur miaj lipoj floris granda spontana liberiga rideto kvazaŭ revenus mia malnova anĝelo, kun kiu mi vere rekomencis konfidence trakti kaj, kvazaŭ ŝultrolevita de amikaj neviditoj, rande pasadi tombejon.

Revenis fakte tiu ĉi kaj eĉ hodiaŭ mi, plenaĝa, kun li promenas, kun li rezonas kaj forsvenigas la senutilajn terurojn, al li adresante ĝojajn pardonpetojn pro la elreviĝoj kiujn mi al li certe kaŭzis per tiu mia malfido al li. Ĉu li distingiĝas de Dio aŭ li estas kroma maniero por igi sentiva la dian ĉeeston?

De tiam mi manĝas porkaĵojn sen la servuteco de la pardonpetado al la animala animo; eĉ preskaŭ malstampiĝis el mia memoro la sekvoj de tia trista premateco. Sed baldaŭ falos sur min la alia sufero: tiu de iu Dio longatempe opiniata neamika kaj atendanta maljuste sur mi venĝi pri kontraŭ mia senvola peko: ĉio tio pro la sakrilegio opiniigita nepardonebla, do nepardoninda, peko.

Dume la kolegia travivo daŭrigas. Kaj daŭrigas ankaŭ ĝia aspektiĝo romaneca kvankam tute aŭtobiografia.

**Ĉapitro tria**

# Necertecoj inter certecoj

Dume milito senspire ĉiam pli alproksimiĝis kvankam la rekrutado, libervola aŭ konskripcia, en militservo apenaŭ ekzistis ĉar en Italujo (junio '40), kiu nelonge poste ekmilitos kontraŭ Anglujo kaj Francujo flanke de Germanujo. Se milito nin vizitos, ĉiuj estis konvinkigitaj de mem konvinkiĝintaj aŭtoritatuloj, ke temus pri milito tre kurtatempa. En kolegio oni certis, ke mi, tial, kvankam jam dekkvinjara, estus evitinta la kuglan riskon. Ne pro tio mi, male, senpacience atendadis la radian paroladon de la Duĉo anoncanta, ke la fulma milito estas eksplodinta kaj ke ĝi jam briligas la bravecon de la italaj soldatoj.

Pri tiu militdeklaro, kiam la anonco fine sparkis, mi spertis grandan kaŝitan ĝojon kaj iun nereteneble sendreseblan ekzaltiĝon. Ŝprucojn el ĝi perceptis patro (= *pastro* laŭ religiula lingvaĵo) Francisko, instruisto de itala lingvo, kiu pritaksiĝis, en medio kiu jam iom malkapabliĝinta se ne disigi almenaŭ distingi patrujajn valorojn el faŝismaj idealoj, kontraŭfaŝistema ene kaj ekstere, tial, laŭ tiama mia juĝo, kontraŭŝtatema pro defetismo kaj kontraŭ la grandiozaj destinoj de la italaj gentoj: ĝuste pro tio, laŭ postaj sciigoj, nehazarde admonita de ŝtataj/faŝistaj aŭtoritatuloj. Li senhaste kaj senproklame, tiom delikate kiom malaprobe, tuŝetante mian dekstran ŝultron, min enpikis per:

*"Bedaŭrinde la milito estos plurjara kaj senhonore perdita ĉar nia preparo per rearmiĝo ludas nur buŝe kaj surpapere kaj la militdeklaro sufiĉe senmotiva kaj senrajta. Bedaŭrinde Italujo eniros en la sferon de la anglosaksa imperio… Tial ni devas nin gardi kontraŭ la nuna sensenca pompeca deliro!"*.

La diskutado kun tiu ĝena sagaculo, pli trafe kun lia argumentado, liaflanke apogiĝis sur prihistoriaj kaj priteknikaj kaj pripolitikaj objektivaj fundamentoj, superaj al miaj informaj kaj politiksciencaj akiroj. Nur kelkajn jarojn poste mi komprenos, ke la arogantulo estis mi. La interparolo abrupte interrompiĝis el ĝardenvojeto sin vidigis la severa vizaĝo de la kolegiestro. Kelkajn monatojn poste mi sciis, ke tiu kolegiestro jam malpermesis, ke instruistoj pritraktu tiajn temojn kun aŭ antaŭ kolegianoj, aludante pleje al patro Francisko, jam signita en la nigra libro de la kontrolitoj de la reĝimo kies simpatio plie alte bezonatis, al la konventularo, por satigi pli ol centon da kolegianoj al kiuj ne povis sufiĉi la ĉiutagaj po du anone porciumitaj hektogramoj de nigra/blanka pano.

La unua semajno, fakte, de la manĝaĵ-porciumada reĝimo okazigis por ni ĉiuj, pro la severaj nutraĵrestriktigoj, "provojn de malsato" kaj de nemutaj protestoj kaj de invitoj, instigitaj de superuloj, al la respektivaj familioj, preskaŭ ĉiuj kamparanaj, de la kolegianoj por ke oni provu prizorgi *laŭleĝe sed ankaŭ laŭbezone*. Al la superularo ne tuj prosperis, tra tiu reĝima simpatio, obteni nutraĵajn suplementojn kaj malpli subpreman kontrolon malhelpantan la proviziĝon ĉe la kaŝmerkato, nia venonta sekreta okaza, kvankam ĉiam pli nigriĝanta pro ekscesaj prezoj, proviantisto kun granda kontento por nia stomako kaj samforta veado de la konventa ekonomo. Fine venis nemalabundaj suplementoj, eltiritaj de tiuj simpatibezonaj urbaj regaĉantoj, kiujn ni festis per grandaj aplaŭdoj kiam aperis en la refektorio la *eksteraĵoj, donacitaj de bonfarantoj el l' domo de l' faŝjo*

Sed kien kaj kiel finiĝis miaj ŝajnreligiemo kaj sinteno pri Dio? Ĉekomence de la dua gimnazijaro, al kiu mi aliris ĉe la fino de la deksesjariĝo, mi trovis surprizon: inter la lernobjektoj distingiĝis religio. Tio min mirigis nemalmulte ĉar al mi ŝajnis, ke, en tiu loko, tute preĝoj kaj devotaĵoj, religio kun religiemo estiĝus afero sendiskuta ĉe ĉiu komunumano kaj jam certigita ĝis medole, kaj do senbezona je kromaj studoj. Profesoris iu pastro, malzorgema en la vestaĵo kaj en la superŝutaj haroj, falantaj el ĉiuj kapaj flankoj, kiu en la postaj jaroj riveliĝis simpatia kaj sociema ulo, preta kontentigi ĉiuspecajn demandojn sen montri miron aŭ superruzon antaŭ naivecoj aŭ strangaĵoj. Startigante la unuan lecionon, sen iu ajn preambola sinprezento, li antaŭmetigis blankajn foliojn subokulen de ĉiu lernanta benkparo: ĉiu estas invitata, pliekzakte urĝata, registri la diktotajn demandojn kaj anonime skribi siajn dubojn kaj neklaraĵojn pri religio. Por mi muntiĝis eta dramo: mi okulumadis miajn kunlernantojn skribantajn, multe kaj serioze skribantajn, dum mi, kiu kredis, ke al si apartenas nur negativaj certecoj pri religio, kaj do ŝarĝita je potencialaj kritikaj demandoj, inertigita pro la timo min kontraŭvole senmaski, ne sukcesis prispuri eĉ la plej etan kaj sensignifan dubon kaj klarigpeton indan je pliklariga respondo. La instruisto, en katedro skribile notiganta en siaj libretoj, certe nenion pri tiu drameto kaj ankaŭ neniam ekscios al kiu apartenis tiu preskaŭ blanka folio kaj, proe, sendubhava kaj senbezona je eksplikoj. Por eviti, ke iu envidu en miajn sekretojn, antaŭ la kunuloj mi de tempo al tempo ŝajnigis skribi kaj forviŝi krajonskribaĵojn. Eble la unuan fojon mi skribis la vorton "Dio" bedaŭrante mian kompletan lingvaĵan perdon pri Li. Jes, mi unuafoje skribis tiun nomon kun respekto perceptante ĝian "diversecon" konfronte al literaturaj dioj. Jovo, teorie kaj fakte, kaj mitaj dioj de la greklatinaj

Odiseadaj legaĵoj tute akordiĝis kun mia nekredemo. Unuafojon tia mia silento pri li ŝajnis al mi senmotiva maldelikateco.

La dua leciono ekis kun la ekspozicio de la enketa rikolto: duboj kaj demandoj plurfoje banalaj, sed iuj postuloj de plia klarigo pri specifaj punktoj de la katolika religio. Por mi tiuj postuloj faladis tute novaj ĉar neniam mi estus imaginta, ke en tiuj diligentaj kaj devotaj junuletaj, preskaŭ ĉiuj pli junaj ol mi je du aŭ tri jaroj, kapoj viglis tiaj pensoj. Kial en komunaj babiladoj pri tio nenion ili manifestis? Ĉu eblas, ke inter ili kuŝu iu simila al mi aŭ trakiĝanta tra la sama situacio?

La temo, apenaŭ postulita sed la plej interesa por mi, estis tiu de la historia vivo de Jesuo. *Ĉu vere li vivis en tiu fora lando? Dirintoj kaj verkintoj pri tio vere kredis je tio? Kaj kio se historion ruze kombinis pastroj? Kial Dio nemalhelpas militon faciligante la venkon de Italujo? El kio konsistas, ene kaj ekstere de mi, la origina peko?*

Tiupunkte mi bedaŭris, ke mi ne eltordis, sur la blanka papero, la inviton, nekontenteblan laŭ mi, ke oni pravigu la dian konduton rilate la kondamnon kontraŭ homoj senvole pekantaj, same kiel konkretiĝis en mia neniam forgesita sakrilegio de la hostio ekmordita. Sed ĝuste en tiu momento ĝuste tiu ĉi afero riveliĝis al mi sensenca kaj tro senkriteria kaj aprobis mian silenton.

Ĉiukaze, mi klare plikonsciiĝis, ke tiaj estas ankaŭ miaj problemoj, pli klare, la eblaj kaŭzoj de miaj malhavitaj, kaj malhaviĝintaj, certecoj pri religio.

La instruisto ĝuste tiun temon vizitis preskaŭ dum la tuta jaro: bele plezurigis pasi de unu evangelio al la alia, de unu ĉapitro al la plua por ke estu evidentigitaj la honesteco kaj la skrupuleco de la apostoloj, ties sinsekva martiriĝo kiu ekskludas ilian volan trompigon, kaj ilia rezisto al la instruadoj de Jesuo kaj ilia implicita pretendo de konstato aŭ pruvo ktp: ĉio por ekskludi ilian trompiĝon. Ekis, kvankam suflore por ne tro min malkaŝi, elmeti demandojn ankaŭ mi por eventuale elpuŝi kelkajn partetojn el la plej supraĵaj duboj. Okazis, ke, ĉiun semajnan duhoron, mia atento estis absorbita ĉar la profesoraj eksplikoj tuŝis ekzakte miajn dubojn hokante, kaj forigante, unu aŭ alian el miaj kontraŭreligiaj certecoj. Imageblus kiaj povis esti la kritikoj, se tiel esprimebli, de krude kampara metilernanto, vivanta izole kaj impertinente kaj vortolakse parolanta, por kompreni, ke funde la miaj estis kritikoj senpene forigeblaj, kvankam enradikiĝintaj sen tamen nenio ema al konsciaj antaŭjuĝoj, kaj senbezonaj venki disputan batalon: ekekzamenante mian enon, krom konstati, ke la problemoj maloftiĝas, mi ekvidis, ke mi plezure kaj memkontentiĝe fariĝas konscia, ke en mi ne hejmas orgojla sinteno aŭ mem-subteno, kaj mi nur

deziras, ke la vero alestiĝu, kaj ke, mi pretas sendevojiĝe aliri ĝisfunden.

Tial mi ne plu insistis, kvazaŭ en ruza obseda ekzerco, en la klopodoj por senvualigi la supozitajn trukojn de la pastroj por igi nin kredantaj, kaj ekforlasis la priserĉadon pri la motivoj de ĉeesto kaj insisto rilate religiajn normojn. Iom post iom mi devis konstati, ne sen plezuro unuamomente duonrifuzita sed poste aperte konsentita, ke miaj krudaj certecoj, eĉ se nur pormomente, malfrostiĝas kaj ekŝrumpas, ekscitante tamen novan malkvietiĝon en mia kapo: kiel kaj kial daŭrigi resti tiom diferenca kaj dista el miaj kunuloj? Kiamaniere akiri tiom da sendubeco?

Kaj tiu instruisto - plibone, la tuta klasa etoso - ŝajnis apogi mian emon de konstatanta vidalvidulo el kiuj reflektiĝu la mezuro de miaj seriozeco kaj honesteco.

*Kaj se estus ĉio vera, kion mi faru? Ĉu daŭrigi montri aspiron al la religiula vivo aŭ rezigni pri mia sonĝo instruiĝi kaj doktoriĝi?* Por forfuĝi el tiu dilemo, mi foje min perceptis pensanta, ke estus pli kontentige se ĉio religia estus iluzia same kiel mi pensis antaŭe. Jesuo daŭrigu resti formetita en la sonĝa mondo kaj ĉesu agiti aŭ enamigi homojn pri si! Des pli, oni spertas ke feliĉo eblas eĉ fore de religio. Sed kia feliĉo kaj gajnebla per kiuj rimedoj?

Sed la profesoraj eksplikoj, pri historia situo kaj vivo de Jesuo kaj de apostoloj, procedis neavertite pri mia sufero kaj allogante mian pasiplenan atenton, malgraŭ mia zorgo distanciĝi eĉ fizike de Jesuo. La aludoj, tamen, spegulantaj lin amiko, unika amiko, ne lasis min tute nesapeita. Kaj foje ektravidetiĝis la eblo, ke mi kredu, malgraŭ, ke por sekurigi miajn argumentadojn mi iom kaj iel travidus mankon de io. Plie la instruisto ade insistis pri la principo, tute nova por mi, laŭ kiu neniu rajtas kredi je io ajn, precipe en religiaj aferoj, senpruve. Kelkatempe tiu eldiro ensorĉiĝis en mia fiereco kvazaŭ ĝi rajtigus miajn hezitojn, sed samtempe min allogis la fiereco de la eldiranto, kiu sin rajtigas daŭre kredi malgraŭ tiu principo: do la pruvoj vere ne mankas! Kaj tial duboj povas esti honestaj kaj tial tute malŝarĝas ties portantojn je ĉia respondeco. Kaj jen mi provis ĝojon malkovrante, ke la mia, pri ĉio religia, pli ol obstina nekredemo estas honesta nekredemo, eble nur dubeco kvankam tute firma: duboj, eble, serĉemaj, finfine iluminiĝantaj.

Mi aŭdis el predika konversacio, ke por transponti aŭ dispeli aŭ nuligi la rezervajn kaj detenemajn dubojn pri la kredo oni bezonas preĝi al Dio, preĝi intense. Al mi tiam ne plaĉis tiu sugesto ĉar ĝi rezultigus ion nelogikan kaj kontraŭdiran. Ja, mi suspektis, se iu preĝas, tiu estas jam konvinkita pri tio je kio li ankoraŭ kredas ne kredi. Tamen, sugestis subkuŝa penso, kial ne provi? Se venos

la konvinkiĝo pri Dio, povas esti pruvo, ke la predikanto pravas; se ne venos, povas esti, ke Dio ne… interesiĝas pri tiaĵoj. Mi ne volis, aŭ ĉu ne povis?, pensi… ke li ne ekzistas!

Mi solis en tiu psika kaj intelekta turmento. La neceso ne malkaŝiĝi obstaklis konfidencan malfermiĝon al personoj kiuj eble jam trairis tiun suferstaton, kvankam fantazie foje mi imagis rakonti mian aferon al tiu aŭ tiu ĉi. Kaj certe, ŝpariĝus al mi naivaj konkludoj kiel la antaŭa kaj la postaj. Kiel ajn, en mi embriis deziro preĝi. Iam, mi jam priskribis tion, blokis mian koran piecon fulma katekisma instruaĵo laŭ kiu ekestas specialaj pekoj, nomataj sakrilegioj, nepardoneblaj ĉar definitive mortmeritaj: do Dio estus por ĉiam minace perdita. Nun, en kolegio, oni rakontadis pasie kaj certige la evangelian parabolon de la filo perdiĝinta, el kiu mi deduktis kun logika neinerta konkludo, ke mi tiam eraris aŭ eraris la katekistino. Kaj provis ĝojon tion konkludante, pli pro la eblo sin repacigi kun Dio ol pro la logikeco de la konkludo, kiun mi foje jam eksupozis klopodante, tamen, ĝin flanken ŝovi.

Repreninte mian jam forlasitan kutimon antaŭtempe frumatene viziti la kapelon por havi okazon ekzerciĝe legi la devotaĵojn de la preĝlibreto titolita "*preĝu kun Sankta Antono*", kaj rezignante enlitajn paŭzetojn post la senpiece vekigaj sonorilaj triladoj kaj simpligante la tualetaĵojn, mi ĉiam unuis antaŭ la altaro. Ĉi foje la devoteca formularo fariĝis vera preĝo: mi sinsekve legis ĉiujn preĝojn, eĉ tiujn pretigitajn por junaj geedzoj aŭ tiun de la preparo al kristana morto sen neniam aŭdaci prilumi al mi mem la motivon kaj la intencon de tiu dronado en preĝoj. Mia mieno aspektiĝis tiu de ekstaziulo se la pastro asistanta, irrevene brevieranta sub pala kapela lumo, iun matenon haltis malantaŭ miaj ŝultroj observante la fiksecon de mia kapo en la direkto de la altaro. *"Ne streĉu vin tiel, la Sinjoro vidas kaj komprenas el via koro",* li grimacetis ridete mienante.

Kial tiuj ĉi preĝoj kun kaj al Sankta Antono? Simplige: mi legis kaj aŭdis sennombrajn fojojn, ke Sankta Antono kromnomiĝas *la sanktulo de perditaĵoj*. Multaj honoras lin per tiu epiteto post aŭ antaŭ la ĉiela favoro de la trovo de perditaĵo. Se tiel estas, Sankta Antono perfekte kongruas al mia kazo: ankaŭ mi perdis ion, ion de same miraĝa kaj kerna graveco, nome la familiareco kun Dio: do preĝante al li, ĝuste tion mi retrovos, *mi sekure inferencis*, kvankam timante tion deklari al mi mem. Kaj serioze kaj skrupule, falditaj la manojn, recitis la formulojn, kaj se en miaj sentoj rilate la kredaferon ne kataliziĝis ekŝanĝiĝo, mi pretis kulpigi la malatenton aŭ la neperfektecon de mia silenta recitado. Neniam al mi venis la dubo, ke en tiu kazo la "res pérdita" (= perdita aĵo)

koncernata de la preĝanto, se vere dezirata, estas jam trovata. Tiu transsalto de materiaj aĵoj al la spiritaj kaj abstraktaj spontane ĝermis nur el mia menso[1].

Kaj mi faris ankaŭ alian ekscentraĵon, ne taksendan ŝablonaĵo nur pro ĝia lakmusa eco pri io nepensebla. Ni kolegianoj, fratuletoj de Sankta Antono laŭ la popola eldiro, pasadis du horojn ĉiun mardon, enkovertigante liliajn sekajn petalojn donacotajn al bonfarantoj de la kolegio: eble multaj el tiuj aranĝaĵoj uzitis por bolantakvaj infuzaĵoj trinkotaj honore de Sankta Antono danke aŭ pete de ĉiela favoro. Mi, eble pli nepreparita pri higieno ol la trinkontoj avertitaj de interna folio, senhezite manĝis senboligitajn petalojn konvinkiĝinte honori la Sanktulon kaj obteni de lia perado la favoron de la konvertiĝo, nome mia spirita renkontiĝo kun Dio. Mia infaneca, sed ne tute mallogikeca, penso: *se la konvertiĝo venos, tio signifas, ke religio veras, se ĝi ne venos signifas, ke religio nenion valoras!* Juna pastro, majstro kaj ĉiutempa trejnanto de disciplino ĉe la klasoj, ne suspektinte pri mia kaŝita celo kaj taksinte la enbuŝadon trompeca ruzaĵo por stuci la enkovertigendan kvanton por pli baldaŭ reveni korten al la kunulara distriĝo, tiel reagis: *"Mi, male, pretas kelkobligi la porcion por vi dum rekompence la malpurigitaj lilfolioj vin suferigos je ventraj doloroj!".* Sed mi kaŝe daŭrigis laŭ mia ideo. Monatojn poste mi sciis ke tiu pastro kritikis kiel paganecaĵon tiun lilinfuzaĵon kaj obtenis, ke oni ĉesigu la lilenkovertadon.

Konvertiĝo ekflustris en mia menso, nome ektraktis Dion kiel ĉeeste ekzistantan. Efektive se mi estas tie ĉi kaj la Sinjoro estas ene kaj malene de mi, kial mi ne parolu rekte kun Li? Kaj, spontane kaj sensurprize ĉe mi mem, mi ekis inventi la preĝojn, kurtajn kaj rapidajn, dum studado kaj dum distriĝo aŭ dum manĝado. Konvertiĝo, sed kion fari? Tiukaze, mi bezonus en mia memo ĉion korekti se ne renversi. Ĉu riveli mian jam pasintan nekredemon kiel kulpon aŭ nur por serĉi konsilon? Kaj se oni devigus min forlasi kolegion kaj studojn?

Tiaj la konturboj kaj ŝanceliĝoj, la psiktordiĝaj momentoj inter ĝojo kaj timo, antaŭ ol sparkis la decido aliri konfesejon. Mi nur diras, ke kiam mi

---

[1] Eĥon de tiu transsalto mi ĵus trovis en pola esperanta poeto LESZEK LEGOWSKI kiu en poemeto diras:
*Ho, Sankta Patrono pri aĵoj perditaj,*
*kiu*
*havas al mizerul'*
*rideton bonan,*
*permesu al mi nun*
*retrovi*
*perditan amon al homo!*

rakontos mian historion kaj mian lastan afliktiĝon kaj tro originalan aferon de la manĝado de lilipetaloj por obteni de Sankta Antono mian konvertiĝon, la konfesprenanto ne juĝos tion malsankta kvazaŭ mi atribuus ion potencan al la lilipetaloj, sed ne bone sukcesos mallaŭtigi rideksplodojn tiom plengorĝajn, ke mi timis, ke la afero estus aŭdata ankaŭ de la eksterkonfeseja ĉeestantaro. Li iom dampante elbuŝajn kraketojn fine aldonos dispecigante la vortojn pro neretenebla rido: *"Pri tia devoteca genro por eltiri miraklon de Sankta Antono mi ankoraŭ ne aŭdis!",* kaj daŭrigos maldampi la ridbruegon de mi perceptatan kompreno kaj estimo.

Li diktis pri mi precizajn kaj humanajn normojn: pluiri en la studoj kaj kolegia vivo atendante, ke la ideoj pliklariĝu; dume en *viditaĵoj kaj neviditaĵoj,* tio estas en internaj kaj eksteraj agoj, esti impregnita je la rektanima kaj saĝplena intenca konduto: *"mi loĝas tie ĉi precipe por studi min mem kaj min kompreni, poste mi decidos ĉu la studoj celu ankaŭ al pastreco. La kolegio nesenmotive nomiĝas* Probandato Antoniano, nome Provejo Antona. *Provejo aŭ provantejo* el provo, *Antona* ĉar pri ĉio provizas Sankta Antono. *Disinjoro malkovrigas sian volon koncerne nian futuron per eksteraj aspekte sensignifaj ordinaraĵoj kiujn vi rajtas kribri helpe de viaj gvidantoj!".*

La sugesto eliĝis, unuavide, ne malbona kaj tial mi komencis ĝoje pluresti en la kapelo, post la kolektivaj preĝoj nun atente partoprenataj. Tiel miaj pensmanieroj ekforĝiĝis ankaŭ per la preĝoj, antaŭe tiom malŝatataj poste trompige ekspluatataj, pliposte profiteme uzataj, kaj nun sincere ekalstrebantaj akordigi ĉiujn bonajn celojn.

Nur unu fojon pri tiu mia religia sperto mi parolos al amikoj kaj konatoj grupe rendevuintaj pro ne pure religiaj motivoj. Parolante pri tio, multajn jarojn pliposte, mi notos en mi iun pudoran bremson de memcenzurado: mi timos aŭdi tiun de mi malŝatatan vorton "mistika krizo", per kiu foje oni likvidas la ŝanĝiĝon el nekredemo al kredemo, kvazaŭ ĝi estus ne nur neeksplikebla afero sed ankaŭ se ne sole neracia cedo. Sed male, oni bone observu, mi procedis laŭ la rezonadoj de apenaŭa plenkreskulo, tre krudaj sendube, sed racieme argumentitaj, en si mem certe ne sufiĉe elvolvitaj, kiuj tamen pretis baldaŭ ricevi verajn fundamentojn kiam instruiĝo kaj maturiĝo faros kompetentulon.

Vidata de fore, kun la aktuala mia juĝsistemo, en tiu epoko mi min lasis junule, pli kaj pli, profunde raviĝi en la penso pri Dio kaj inundi de la deziro komuniki tiun ravitecon al aliaj, eĉ nur aŭskultante iliajn paroladojn pri tia koncerno. Fakte tiam mia emo al parola kaj opiniesprima protagonistemo, pro kiu iu helpedukanto min duonŝerce kvalifikis "megalomaniulo", en rondaj aŭ inte-

runuopaj renkontiĝoj, tuj kvietiĝis kiam la konversacio ekturniĝis tra religiaj temoj aŭ sakralaĵoj: mi tiam aŭskultadis kaj samtempe plipetadis pluajn klarigojn, eĉ trenante miajn kunlernejanojn krei specifigajn demandojn al la asistantaj pastroj.

La nova bildo pri Dio, disflorita pograde kun momentoj de fulma mensa kontakto kun li, aspektis tiu de kora amiko, kun kiu tamen mi ankoraŭ ne elsentis bezonon konfronti totalece mian animon: en tiu ĉi kuŝis zonoj kiujn mi rezerve ŝatis tute miaj, ne influeblaj, kvankam nenion riskantaj, de tiu pia simpatio aŭ de tiu plezuriĝa malkovro.

Mi daŭrigis, sen percepti klaran kaj riproĉan kontraŭdiron ĉiuspecan, deziri, ke Italujo militu (nun la frontoj multobliĝis, en Grekujo, en Ruslando, en Jugoslavio, Norda Afriko, Orienta Afriko) kaj venku kaj konkeru malgraŭ se nespite la suferojn de popoloj; mi daŭrigis ĝoji kiam miaj kunuloj ŝrumpadis pri kelkaj gravaj aferoj, kiel la malsukceso en la studoj aŭ en la malfirmiĝo de vokiĝo aŭ aliaj malfacilaĵoj; mi daŭrigis pli ŝati abiturientiĝon cele al fruktodona profesio en la sekulara kaj laika mondo ol eventualan alvenontan vokadon fare de Dio; mi daŭrigis iom hipokriti en babilaĵoj rilate privokiĝajn juĝojn kaj aspirojn okaze ekscititajn de la diversaj edukantoj. Per tiaj konversaciaĵoj, ŝajne sencelaj kaj sendirektaj inter spontanaj kaj malpli kritike kontrolitaj respondoj, eble edukantoj provis penetri, eventuale, la subpremitajn suspirojn aŭ sopirojn, ne ĉiam konatajn de la protagonistoj mem, nome de la aspirantoj.

Iun tagon sin materiiĝis antaŭ mi mia patro: li venis vidi mian envokiĝon kaj laŭdi mian fidelecon, ne forgesante enŝovi: *"kiu divenas la estontecon? ankaŭ la montoj ŝanĝas konturojn!"* kaj aldonante, ke eventuale li pretas min reenkonduki hejmen: tie, en la bieneto de li ĵus luita kaj ekfruktoporta per duono per la mono pergajnita en Germanujo kaj per amikara kunlaboro, bezonatas fortikaj brakoj "ĉar ni jam estas bienula familio", laŭ liaj emfazaj esprimoj. Nur poste, kiam li jam foriris, malkvietiĝo invadis min: mia patro, do, opinias, ke nur intenco religiuliĝi rajtigus plugastiĝi en kolegio kaj, alikaze, li senpene pretas min vidi rekrutita por la milita fronto! Ĉu mi iam kuraĝos lin informi kaj seniluziigi? Krome: ĉu por mi la bieno aŭ por mi la eksterlandaj militaj kampanjoj, el kiuj pli ol unu jam ekŝrumpas?

Pri la bieno li paroladis preskaŭ ravite kvankam ĝi disponigas al bienistoj nur kampojn kaj stalon ĉar la hejmo, jam tro kadukiĝinta, devas atendi la postmilitajn riparmaterialojn. Bonŝance, li haste aldonis por malfajrigi mian ekmiron, la malnova hejmo najbaras preskaŭ kuntuŝiĝe kun tiu biena.

Kial li antaŭtempe revenis el Germanujo? Ĉar la aliancaj bombadoj oftiĝis

pli kaj pli kaŭzante detruojn kaj mortigojn, ankaŭ la uzino de lia dunga okupiĝo restis pulvorigita: anticipante la finon de la sesjara okupkontrakto, li, ne sen riproĉaj eksentoj de maldankemo, entrajniĝis al Italujo, post trinkmona omaĝo al iuj decidpovaj uzinaj pintuloj.

Mia patro tamen kombinis kontenton kun elreviĝo ĉe mi: li flirtigis, ke milito jam alŝoviĝas perdita kaj ke Italujo sindamaĝe agis ekmilitante kontraŭ Ameriko. Ke milito ekkliniĝis favore al la aliancanoj ankaŭ mi jam suspektis, sed ke Italujo malmorale kaj senprudente kaj kontraŭrajte agis, ja tio ĉi ekdekonstruis miajn juĝsistemon kaj aspirojn kaj fantaziaĵojn, sume mian pasinton konstituantan mian personon...

Plua motivo puŝis lin al la reveno al familio. Mia frato, kiu senvole kreis okazon de mia enkolegiiĝo, iun tagon eklipsiĝis el la strukturo. Li malaperis kaj rehejmiĝis, abrupte por la familio kaj abrupte por la kolegiestraro. Okazis, ke li ne eltenis riproĉon pro ŝteluzo de alies porfutbalaj ŝuoj: anstataŭ sin ekskuzi kaj akcepti la etan punon, li forfuĝis. Post longa kaj angora serĉado, antaŭe komike kribrante miajn vizaĝajn formojn ĉar ni, kvankam aĝe distancigitaj je dek kvar monatoj, diferencis unu de la alia malpli ol ŝuo sampara, poste tra ĉambroj kaj kaŝejoj de la ĉirkaŭa kamparo, mi eksciis, ke li fine jam atingis la patran hejmon.

Sed tiom da estimo kaj konsidero min ĉirkaŭis, ke la afero ne eĉ flugtuŝis mian pozicion, malgraŭ ke mia frato tuj sin rajtigis priklaĉi kaj malŝatigi la kolegion pro ties sufoka disciplino kaj mistraktado kontraŭ infanoj/adoleskantoj per deviga studo kaj altrudita preĝado.

Komenciĝis samtempe alia sufero, pli bone tordaĵo de mia spirito paralele kun kresko de la religia sentemo. El diversaj militaj frontoj la novaĵoj turnigas al elrevigoj: italajn armeojn oni retropuŝadis ĉiuflanke. Tion malkaŝigis instruistoj, foje sensufere kvazaŭ tio estus afero rutina. La sufero pasis tuta al mi tiugrade ke eĉ miaj kutimaj pensoj krozis en tiu temo obsede kaj sieĝe regantaj agojn kaj fantaziaĵojn de mia imago. La jena cirkonstanco klarigu la animan absorbiĝon kaj disiriĝon el normalaj taskoj.

Ĉar miaj atingoj en la lernado gajnis ne malaltajn poziciojn, la profesora kolektivo decidis, ke mi povu elspezi iom da tempo ĉe muzikilo kun amatora muzikmajstro: post kelka jaro, malgraŭ miaj nur modestaj kapabloj pri muzikludoj, oni koncedis, ke mi ricevu, ĉe profesia instruisto, lecionojn pri fortepiano kaj ke mi praktikiĝu ĉiutage unu horon. Sed intermetiĝis katastrofaj militaj renversiĝoj: tiuj ĉi tiom malĝoje absorbis miajn atentokapablojn ke mi perdis inklinon sufiĉe koncentriĝi sur la primuzikajn ekzercojn, kaj mi devis reti-

riĝi dum iuj monatoj ĉar la imagaĵoj pri soldatoj frostiĝintaj en Ruslando perdigis aŭtomatecon al miaj fingroj. Ĉu ekzistis kaŝita motivo pro kio tiaj imago-pensoj min sieĝis dum tiuj horoj?

Mi nun, min ekzameninte, trovas, ke mia identiĝo kun religio, tiom humiligita kaj mortigita de la sovetunia reĝimo, superlevis, ĉe miaj okuloj, italajn soldatojn al nivelo de krucmilitistoj, sankte bildiĝintaj, ĉi-tiuj, kiel kavaliroj volonte ŝarĝiĝintaj en la defendo de pilgrimuloj.

Sed la komplikaĵo komplikiĝis eĉ pli.

Se Italujo estas perdanta antaŭ la malamiko, kial ne profiti de mia nova amikiĝo kun Dio por peti de li la venkon? Funde oni adas peti de li la pacon kun militfino. Kial ankaŭ mi ne rajtas preĝi tiuintence, do por obteni pacon kun venko? Venko de krucmilitistoj nun humiligitaj? Ĝuste tia humiligo ekscitis novan problemon pri Dio: kial li koncedas, ke batalantoj pro Li fine estos venkataj? Kaj mi eksuspektis, kvazaŭ por forigi la suspekton mem, ke la aferoj povus esti, ke ĉe Dio ne distingiĝas venko el malvenko. Ĉu Jesuo krucumita venkis aŭ malvenkis?

Kaj mi ekpreĝis, sed ne tute sen vaga percepto de interna ĝeno: vage al mi travidetiĝis, ke Dio estas de mi uzata pli kiel ilo utila ol kiel amiko tute aminda. Laŭlonge de monatoj, eble de tuta trigimnazia lernjaro, la kontrasto pliprecizigis kaj mi povis al ĝi ekkonfrontiĝi, malgraŭ ĉiam duonvole kaj ŝajnenue. Foje, en miaj psikaj tordiĝoj, mi ŝatus pli forgesiĝi ol ekzameniĝi ĉe Dio. Tiom subtilaj kaj same senutile ruze aranĝitaj estiĝis en mia kapo la rezonadoj ke mi foje, kvankam preterkure, ekĉagreniĝis, ke Dio ektralikiĝus el ĉiuj partoj!

Dio torentis en mian menson, sed tralikiĝis en mian konsciencon kiel nebulpluvo. Estos konkludo de la pli matura aĝo.

## Ĉapitro kvara
# La novica vivo

Senaverte esperante, ke maturigaj fortoj solve agu pri miaj spiritaj baraktoj kaj afliktoj, la tagoj elfluis kun eventoj, publike grandaj, almenaŭ se konsideri iliajn dolorigajn sekvojn, kvankam foje apenaŭ trafadene de mi perceptitaj. Italujo sin trovis implikita en milito ankaŭ kontraŭ Sovetunio kaj Usono, certe ne antaŭvidite ĉar dekomence oni alkroĉiĝis al la ideo de fulme rapida milito. Impresis nemalmulte deprimige tiu *"kontraŭ Usono",* kies al neniu estis kaŝita la ekonomia kaj industria potenco, do milita, do potenciale kapabla kontraŭstari kaj fleksi italan atakon kaj reziston. Tio trafadeniĝis el interparoloj de la edukantoj kaj instruistoj, jam malpli prudentaj aŭ malpli singardemaj kvazaŭ la antaŭvidebla kaj nepreventita, eble nesenkulpe kiam eblis tion fari, nacia katastrofo ekscitus ilian juĝo-sendependon. Kaj kio el patro Francisko? Li mutis kun mi, sed mi vetis en hazardaj distrotempaj interkroĉiĝoj, ke li estas pensanta ion de miaj misjuĝoj pri la rapida fina venko. Fakte, okaze enŝteliĝante en forflugan konversacion, li konfidis sian komenton, je respekto pri la malpermeso endebatiĝi tra politikaj aferoj kun kolegianoj, al ne senmalica grimaceto samsona kun mia veto.

La proviantadaj problemoj (al ĉiu kapo du kuponaj ektogramoj da pano: ĉio estis porciumita, laŭ la ŝtataj anonaj leĝoj!) estis forgesitaj: la karitato de niaj kamparaj bonfarantoj kaj la simpatio ne jam perdita flanke de faŝistaj aŭtoritatuloj, maltrankvilaj pro la risko disipi la bonajn rilatojn kun la fratularo tiom simpatie sekvata de la popolanoj, provizis nian tablon per ĉio necesa ĝis ebligi, ke kvestantoj, ĉeporde frapante aŭ nigramerkate, arigu sufiĉe por aldoni kion mankis al la komuna leĝa ĉiutaga porcio da griza panpeco kun magra kumpanaĵo.

La tasko de la ĉeporda pandisdonado al povruloj foje pasis al pliaĝaj kolegianoj kiuj agis duope dum kelkaj horoj periode: estis bele, preskaŭ ekzaltiĝe, donaci kaj satigi malsatantojn. Mi eksentis ion kleran kaj elitecan trakuri mian spiriton kvazaŭ konfirmon, ke nia nacia energio ankoraŭ kapablas reagi aŭ, pli modeste kaj al moda ideologio pli konforme, meritas militvenki. Mistikeca pudoro malhelpis, ke mi parolu pri tio, sed la sama mistikeca pudoro reŝarĝis la koron per espero, ke fina, justa kaj deviga venko kovru kaj igu nekulpa la komplican mian malprudentaĵon pri la avidita milito. Bonanimeco al mizeruloj kon-

fuze ekasociiĝis al iu vaga sento de kulpoliberiĝo aŭ momenta kulpoforgesiĝo.

Sed eventualaj spuroj de tia ekzaltiĝo ekriveliĝis bazitaj sur neniuj seriozaj konsistoj kaj forfadis kiam mi vidis reveninta el militzono la ĉerkitan retaĵon de alta oficiro falinta en neprecizigita milita fronto: la splenda kaj aplomba ceremonio partoprenita de plurcentoj da personoj kun iliaj aŭtoritatuloj, ne sukcesis haltigi ĉesojle de mia subkonscio la malglataĵon, ke mi iam alstrebis la militon. Mi provis konfuzi aŭ malfiksigi la memoron el tiu kulpo pere de heroecaj fantaziaĵoj aŭ senmotivaj korpaj moviĝoj kvazaŭtikece. Min levis el tiuj pensaĵoj kadavreca fetoro ŝvebiĝanta el tralikvaĵoj de la travoje tro skuita kaj ne sufiĉe hermetike fermita ĉerko: io senodoriga ŝutita surplanken servis al nenio. La funebra ceremonio, kun iom retorika laŭdacio, estis finiĝanta per la solena pernoma alvoko de la mortinto kun milita ĉieskria armilsaluta respondo, lasante tamen en mi tiom naŭzan kunligon inter gloro kaj morto, en kiu la morto nuligas la gloron, ke mi nerimarkite devis eklipsiĝi tra sekurecelirejo kun granda volo plori. Sed ankaŭ la ploro restis en mia eno ĉar alia fratulo min imitis sekvante miajn paŝojn, eble pro la samaj naŭzoj.

Sed la fratulaj preĝoj plu trafadenis pacon kaj venkon: pli venkon ol pacon. Nur milita kapelano reveninta, kun io da grizo en la nezorgita barbo kaj sen iu ajn persona ekipaĵo, el rusa fronto, insistis por ke paco estu konsiderata, almenaŭ en niaj preĝoj se tio ne eblas en predikoj faŝistastile observataj de la reĝimo, pli alta ol la venko: dum ĉiuj kunvibris kun li, mi mutadis. Tiu homo per duonvortoj kaj neefike ŝtopitaj larmoj, pentris la preskaŭan nuligon de la itala armeo en ruslanda operaco. Tial fine preciziĝis la stumpinformoj, eke instinkte reĵetitaj, pri la katastrofa malvenkiro al la orienta fronto: preciziĝis kaj ekmalfajriĝis la certeco de *la venko, pere de armiloj, kontraŭ ateismo, kaj ateismigemo, de la komunisma persekutanto de religioj.*

Inter la kolegianoj, fine de 1942, almenaŭ kvindek aĝis pli ol deksesjare: kelkaj superis la deksepan. La malkvietiĝo, antaŭe invadetinta la edukan estraron, baldaŭ ekcirkuladis inter la junuloj. La edukantoj havis povon dispensigi de la soldatservo siajn edukatojn, kondiĉe ke tiuj ĉi estus votintaj, tio estas jam publike ligitaj al la ordeno per publikaj votoj. Sed kiel riski pervote akcepti en la religiula komunumo junulojn ne jam eble fruktodone preparitajn jen mense jen spirite? Krome tiu hasteco enordenigi junulojn tiom multnombrajn kaj ankoraŭ preskaŭ senstudajn, povus suspektigi la militan kaj politikan estraron. Elstariĝis dume ŝanĝo de strategio en la predikado kaj liverado de ideoj al tiustataj junuloj.

Iam, enirinte kolegion, ofte mi aŭdis saĝecan kaj akramuzan ekvalenton

*Vokiĝo por Buŝiĝo*, tiel interpretendan: malriĉeco kun ĉiutaga modesteco en la disponado de nutraĵoj aŭ bonstataj komfortoj povus influi kelkajn ulojn ĝis tiapunkte ke ili solvu la problemon transformante, eĉ senkonscie kaj bonafide, la *Buŝiĝon* (bezono sekurigi al si nutraĵon) en *Vokiĝon* (senti sin vokita al la religiula vivo). Periode la rektoro respondecigis la unuopulan konsciencon per tiaj vortoj: *"pro la honesteco de ni profesiata kaj pro la evidento, ke ni manĝas la panon de malriĉuloj, ĉiu ekzameniĝu cele al la esplorado pri la vera Divolo kaj lasu eventuale la lokon al aliaj vere vokitaj"*. Nun la slogano pinĉadis per *Militevitemo per Religiulemo:* la timo esti armeanigita povas surogate kreskigi la religiuliĝemon. La slogano haste refrene regurdiĝis inter la membroj de la komunumo kaj ekster ĝi, eble iniciate de la superuloj mem por lasi, eĉ ĉe armea ekzamena komisiono, impreson de rigora seriozeco.

Evidente tia risko ekzistis se la edukantoj ne timis insisti pri tio ne preterpaŝe sed intense invitante konsiliĝi pri propra vokiĝo kun la spiritgvidanto aŭ kun la konfesprenanto por eviti entrepreni vivvojon kontraŭ la dia volo kaj propra estonta feliĉo. Ĉu aktualis tia ankaŭ mia kazo? En mi foje eksaltis ankoraŭ duboj pri la historiaj kaj raciaj fundamentoj de la katolika religio, kiujn mi ne rajtis forigi pro kulposento aŭ kalmigi per indiferento ĉar, kiel klarigis mia konfesprenanto, estas rajto de la inteligento serĉi kaj trovi antaŭ ol korekte kaj legitime ekkredi: mia devo estu nur tiu de la honesta traserĉado. Sed, preterlasante ĉion alian, ĉu vere mi vokitiĝas? Eĉ pri tio mi rajtas prokrasti la respondon ĉar antaŭ mi staras ankoraŭ du senurĝigaj studojaroj. Pro tio mi aŭskultadis la edukajn instigojn sentime, eĉ kun la netrokaŝita nefrata espero, ke aliaj pliaĝaj kunuloj, vizitantaj la kvaran kaj kvinan klasojn, estu skuataj ĝis forlasi la kolegion.

Stranga tiu espero, ĉu ne? Anstataŭ deziri, ke ili trovu kaj kreskigu ene kaj ekstere pliajn signojn de vokiĝo, al mi ne malagrablis, ke ili el tiaj trovus tute ne aŭ perdus. Evidente, mi konvertiĝis sincere je mensa nivelo, ne komplete je kora nivelo, malgraŭ tio, ke la temo de frata amo *("amu la aliajn same kiel Dio amas ilin")* okupis la unuan lokon inter la predikaj instigoj kaj kialigoj. Eble, el aliulaj forlasoj, mi kredis eltiri pli altan estimon, ĉe la edukantoj, pro mia persistemo, kaŝe celanta igi min ĉiel la plej konsiderinda. Tia inklino persistis malgraŭ mia oscilada volo adaptiĝi, pli bone harmoniiĝi, al la riproĉanta konscienca voĉo.

Tra tiu etoso de necerteco kaj de bezono dubi pri sia rektanimeco, la epifanian (la sesan de januaro) tagon prezentiĝis miaj gepatroj por min viziti kaj ricevi informojn pri la efektiva direktiĝo de mia vivo. Ĉe tia vido min invadis

korŝira suspekto: ĉu ilin venigis la rektoro por al mi preme svati rezignon al la religiula vojo? Ĉu fine oni konvinkiĝis, ke mi koleganas nur tra profita ruzo? Mi pasigis, sub ĝojaspekta mieno, iujn horojn en plena malĝojo: kion mi respondu? Ĉu mi ekspoziciu miajn spiritajn nodojn? Mi ekĝuis la ĉeeston de miaj parencoj nur posttagmeze, malfrue, post kiam la rektoro prezentiĝis por saluta kontakto. Tiam li lasis komprenigi al miaj kontentiĝantaj gepatroj, ke mi estas rektanima kaj diligenta kaj multpromesa. Kiom mia ena kaŝita fluktuado eksteriganta, tamen, decidemon kaj rektanimecon efikis ĉe piemaj homoj!

Estu dirate tute haste, ke tiam, entuziasmigita de la orgojlo pro la nova rajtiĝo je estimo, mi petis de mia patro la pulovron, aĉetitan en Germanujo kaj do por mi altiroplenan, nun de li surmetitan por sin ŝirmi kontraŭ la vintra malvarmo. Kovra ekipitaĵo apenaŭ sufiĉa por bicikletanto. Post kelka hezito li min regalis per ĝi, malgraŭ nekonsentoj de la patrino. Kaj mi lin vidis, sen senti honton, rehejmeniĝanta en la vespera frosto kaj pene ekpedalanta biciklon sur stratoj ekkovriĝantaj je neĝo. Se la kunuloj gapadis al ĝi kun envio, la superuloj, post kelka tago, revenigis la longan lanan supertutecan pulovron al mia patro… se ne jam morte frostigita laŭstrate en la neĝa turbulado!

Se ne estus pro la ĉiam pli evidenta dua sinsekva malvenko en Ruslando (la dua ekspedicio *Armir,* tute nuligita, same kiel la unua *Csir),* pro la suferoj de centmiloj da soldatoj, mia pasio por la studataĵoj kaj ajnakampe plivastaj studobjektoj, kiuj altiris al mi simpation kaj pli altan poentaron, ĉio pasigus al mi la jaron ĝoje kaj triumfe.

La ĝoja konsidero kiel sukcesa lernanto, tamen, eltenis escepton: alpintiĝis antaŭ mi rifo aŭ diabla baraĵo kontraŭ kiu rompiĝis miaj klopodoj. Mi fiaske penegis, dum enlernejaj skribe plenumendaj klasĉambraj taskoj, por rakonte verki en nacia lingvo, kvankam brile sukcesa en aliaj lernobjektoj. Lerneje aŭ eksterlerneje, verki aŭ skribrakonti pri vizitenda temo, estis por mi, kvankam kutime vervema kaj fantaziema parole, turmento: mi restadis, enmanigite je skribilo kaj mallevinte la kapon, senskribe, maĉante humiliĝon antaŭ kompanuloj kaj instruistoj. Neniun fojon mi ĝis tiam estis gajninta poentojn je kontentiga nivelo ĉar eĉ profesorajn kaj kunulajn impulsetojn mi ne ekevoluigis al sufiĉeco egala al la famo de mia mensa vigleco en aliaj studkampoj. Iun tagon, jam dum la tria gimnazio, unubate mi malkovris tute sencele kaj senpene la arton skribe rakonti. La okazaĵo ne impresu longa kaj enuiga, ĉar eble ĝi povus instrui. Mi ĝin rakontu.

Post longa promenado, la tria gimnazia klaso finvenis viziti mezepokan kastelon, tiun de Soave, dekmilanima vilaĝo proksime de Verono, onidire li-

gitan al la legenda historio de Scespiraj Julieta kaj Romeo, kies supozitajn aludaĵojn ĝi konservus. La ĉiĉerono, gardisto de la kastelo, ekliverante informojn senpripense taŭgajn por emocii nesupraĵe sciantojn pri tiuj lokaj pasintaĵoj, kaj imagriĉe, sed kun persona ridinda gramatiko, bildigante historiajn kaj literaturajn eventojn, perceptigis, en mi, plezursentojn en sintonio kun la medio, historio, iamaj travivaĵoj ktp, kiujn mi neniam pli frue traspertis, kaj faris el mi, krom spektanto, eĉ fantaziplenan protagoniston de la rakontitaj eventoj. Kaj jen la miraklo.

La instruisto pri itala lingvo la sekvan matenon diktis: *diru la unuajn impresojn kiuj sin trudis al via menso aŭ fantazio kaj la emociojn, eĉ forfuĝe vibrantajn en via animo, spertitajn vizitante mezepokan kastelon.* Kiel kutime mi ŝvite kaj senfrukte penege provis krei pensojn indaj je priskribiĝo, kiam subite mi decidis trafemaltrafe priskribi spertitajn impresojn *forspitante, krom la lingva perfekteco kaj interesekscitaj pensoj, la instruiston kaj poentojn. Kial ne imiti tiun ĉiĉeronon kiu ekscitis sensaciojn kaj konceptojn sen neniel blokiĝi pro siaj gramatikaj deficitoj kaj sen sin senti stranga ĉe instruitaj vizitantoj?* Mi rakontis per senornamaj vortoj tion kio trasvarmis mian animon dumvizite, ne prizorgante, ke la enhavo havu originalecajn trajtojn. La sekvantan tagon, la profesoro senpremise: *"El la tridek, unu vere valoras. Bonvolu aŭskulti".* Li eklegis la mian. Kaj konkludis: *"Tiele oni verku!".*

Mi ekkomprenis, ke "originaleco" sprosis pro tio ke mi sekvis impulson tute ne intencante atingi originalecon. Mi fulme deduktis, ke la originaleco konsistas el esti si mem: nenion pli! De tiam mi nenion povis ol brili per splendaj lernrezultoj eĉ tiukampe, kaj fariĝis referencpunkto por aliaj serĉantaj sian sekvendan vojon. Estu pardonata la kvazaŭa memlaŭdo… kiu tamen estonte ekfariĝos vera minaco de orgojlo, ankaŭ se sur ŝajnvalida fundamento, kaj de egoismo kun elstariĝemo!

En la sekvantaj monatoj mi provis doni teorian fundamenton aŭ racian konsiston al mia persona malkovraĵo. Kiel ĉiu homa estaĵo havas vizaĝon kun trajtoj propraj kaj karakteraĵojn ekskluzive kombinitajn (tio cetere emerĝas ankaŭ de skribosignoj kiujn ĉiu havas proprajn do malsamajn ol tiujn de aliaj), tiel ĝi havas siajn proprajn pens- kaj sent-manierojn: proe oni jam estas originala kaj aŭtente unika! Sufiĉas fidele sekvi sin mem por perceptiĝi interesa. Okazas, male, ke pluraj sin kondutas kiel dubantoj pri si mem kaj faras enmetojn ecigeblajn, kiuj tamen nur aspekte plibonigas antaŭ la aliaj: tiaj aldonaĵoj fariĝas filtrilo subkuŝiganta la vere originalajn trajtojn kaj svarmiganta tiujn artefaritajn: mistifiko repuŝanta kaj kaŝanta la veran personecon; plie temas pri origi-

naleco tia, ke ĝi metas en sintonion kun la aliaj ĉar ververe humana. Tiajn vidpunktojn mi subtenis, kaj detale priskribis, en taska eseo liberteme ĉefelektita: ili tiom plaĉis, ke oni min spontane elstarigis lidera fakulo ankaŭ en tute aliaj aferoj!!

Ĉe miaj kunuloj, sume, rezonaĵoj kaj teoriumaĵoj tiaj faktoris por mi, almenaŭ en unuaj momentoj, kroma konfirmo pri mia esplorkapablo pri inteligenta-psikaj malkovrendaĵoj! Psik-spirit-analizanto! Kun invito pluuzi la arton.

Sed ni revenu al la religiula vivo al kiu oni ligiĝas per votoj.

La votoj, per kiuj oni sin ligas al la konsekrita vivo, estas tri, el kiuj tutsupre rangas, laŭ popola instinkta percepto, tiu de ĉasteco kun kiu ankoraŭ mi mezuriĝis apenaŭ fantazie. La virinoj de mia horizonto materiiĝis nepre kaj nure el literaturaj fontoj: *Beatrica* de Dante, *Armida* de la Jerusalemo Liberigita de Torkvato Tasso, maksimume *Laŭra* de Petrarca (Petrarka), *Lucia* de I Promessi Sposi (La Gefianĉoj) de A. Manzoni aŭ aliaj similaj aŭreolitaj je sankteco duone deseksigita; sed tiaj ne agitis mian fantaziumon kaj sentumon. Ne povis, certe, manki kontaktoj kun virino vera, sed tiom momentaj kaj hazardaj ke senpene asimiliĝadis kun tiuj reelvokitaj de la literaturecaj virinoj, kun kiuj mi mensfamiliariĝis kaj kiujn mi juĝis ĝis tiam kongrue kunviveblaj kun miaj neklaraj idealoj. Sed, fine, ne eviteblas percepti, ke virino reala havas korpon kaj moviĝojn altirantajn kaj ŝprucigantajn fizikan simpation pretan breĉeti nesolidajn idealojn. Jen la okazo.

Iun dimanĉon, ĉiuj kolegianoj estis veturigitaj al vilaĝeca festo honore de Sankta Antono. Ĉar la vilaĝo distancis kredeble pli ol dek kilometrojn, ni vojaĝis tra l' aperta kamparo per knarantaj kaleŝoj kaj kabrioletoj ĉevaltirataj pruntedonitaj de niaj bonfarantoj kaj de tiuj ĉi gvidataj. Dek kvin miaj kunklasanoj kun la pliaĝulo, kiu estis mi, alvojaĝis sur duĉevala kaleŝego kondukata de mastro akompanata de du niaaĝaj filinoj, kiuj senĝene kaj gaje interbabiladis kun ĉiuj, kaj ĉiuj kolegianoj samgaje korespondadis. Al mi bele efikis resti kun ili kaj en la momentaj silentoj mi deziris, ke ili pluparolu ĉar sen ilia voĉbruo la mondo estus, en tiu momento, malpli bela. Iliaj korpoj tuj ekeniris en mian kompleziĝon, dum min ĉarmis ilia gajeco, ilia svelteco en la moviĝoj: dum la balanciĝoj kaj skuadoj estigitaj de la malegala kampara vojo ne malplaĉis al mi, sidanta flankeflanke, ke io de ilia vestaĵoj tuŝu min. Kaj kiam allasiĝis okazo, mi ilin okulsorbis senmodere kvazaŭ altirita de belaĵoj neniel supereblaj.

Meze de tiuj sentoj, tamen, al mi ŝajnis, ke ne eblas amikiĝi aŭ nur amikumi kun tiuj belecoj kaj ĝui ties komunikiĝo kaj konfido, kaj samtempe kohere

malpermesi al si transiri la kroman pliallogan paŝon, tio estas sen ilin deziri kaj postkuri; kaj mi gape miris, ke miaj samcelanoj, pri kies aŭtentaj religiulaj aspiroj mi ne dubis, parolas kaj ridas kaj vortŝercas kun virinetoj kvazaŭ tio akordus kun ilia vokiĝa panoramo. Entute tiu ĉarveturado kun virinetoj tiom simpatiaj krizigis unubate, krom mia ekadmiro al ofera sindediĉo al Dio, ankaŭ la estimon pri miaj kunuloj tiom distriĝantaj kun virinetoj.

La evangelia konsilo pri virgeco ekŝajnis al mi, post tiu renkonto, sub alia lumo, iomete malpli brila ol kiom mi taksis ĝis tiam. Mi ne multe meditis pri ĝi, sed la eventualeco de mia restado inter ordenitoj ankoraŭ ne stumblis antaŭ la nepreco de la rezigno pri la am/amoraj kaj familiigaj ĝojoj. Nun abrupte novaj sentumoj elvokis endon reekzameni, sub novvidpunkto, la tutan aferon.

*"Jam vi pasigis la deksepan jaron kaj estas nature, ke viaj sensoj kaj sentoj enflamiĝas antaŭ inseksaj formoj altirante vin, kiel cetere spertis ankaŭ niaj gepatroj... Se iu rezignas fianĉiĝi kaj edziĝi, tio okazu nur pro tio ke lia koro statas jam okupita de la Sinjoro: ne unu virino por vi sed vi por la Sinjoro (kaj eventuale por unu virino, se vi elektos la vojon de kristana servado en la mondo)... La tempo kaj la preĝo kaj la lojaleco manifestos la dian volon kaj ankaŭ la gradon de firmeco de viaj intencoj".* Tiel kvietigis, almenaŭ momente, miajn sekrete brulajn problemojn la konfesprenanto kiu, certe kalkulinte tion por edukago, atendis la momenton kaj ankaŭ miajn reagojn.

La antaŭaj resumaj vortoj havis tujposte drolan ĉapelon por li kaj spontanan elmontron de mia nesciado pri gravaj vivaferoj. Kvazaŭ por konfirmi la sugeston de la spirita gvidanto kaj ratifi revenantan intencon sekvi la evangelian konsilon de virgeco, mi aldonis: *"Cetere la seksumado estas minimuma oportuneco en la para vivo, je la konsidero, ke ĝi eblas kaj licas nur unufojon inter unu kaj alia koncipado: funde iu ne rezignas grandajn plezurojn*". La pacienca viro petis, ke mi ripetu la frazon, streĉis la okulojn kaj orelojn kaj ekridis kvazaŭ mi estus enĵetanta spritaĵon indan movi ĉiujn sensojn de la aŭskultantoj. *"Uh! Kiaj plumpaj moralaĵoj! Prunteprenu de la disciplino-majstro la tekston pri moralo de moralisto Pighi aŭ de aliaj aŭtoroj kaj legu ĉar vin ensorbis pri tio strangaj opinioj. Post la legado, ni priparolu denove. En la geedzaj umaĵoj la seksumaĵoj plektiĝas laŭ la volo de la paro... kaj fine ne pro tia via stranga opinio pri amseksaj rilatoj iu sekvu la evangelian inviton".* Kaj li min forpermesis nekaŝe klopodante sin reteni el pale brua rido. Liaj vortoj kaj sinteno, kvankam iomete onkleskaj, reordigis miajn pensojn kaj serenigis miajn sentojn laŭ pliekvilibrigita eskalvaloro, kaj pasi-

gis min al malpli nekompletaj scioj pri la vivo. La unua kontakto kun virino vera, tamen, restis en mi kiel ombro ĉiam ĉeestiĝema, neniam nuligita.

Krom tio, ĉio fluis glate dum eĉ la spirita-intelektaj akiraĵoj kaj postuloj malimplikiĝis. La horizonto tamen nubiĝis ĉar la itala registaro printempe de 1943 proklame ordonis, ke la junuloj de mia aĝo prezentiĝu por soldatservi kaj poste, oni kredis, por militservi en kelka el la diversaj jam ŝrumpetantaj frontoj. En tiu momento estis kvar la junuloj rekruteblaj, mi kaj aliaj tri, komune taksataj taŭgaj soldatservi. Aŭ eniri staton novican, kies adeptoj, religie vestitaj, rajtas, laŭ Konkordataj Interkonsentoj inter la Ŝtato kaj Eklezio, eviti soldatservon, aŭ prezentiĝi kaj forsaluti almenaŭ pormomente la kleriĝon per senpagaj studoj preparantaj al la noviceja akceptiĝo: tia la dilemo mia kaj de la maltrankvilaj edukantoj. Dume la minaca proklamo devigis junulojn enskribiĝi ĉe la rekrutejo por havigi al si la atestilon pri siaj fartaj kondiĉoj cele de eventuala soldatservo. En tiuj momentoj energianta farto ekaspektis kiel malamiko de homo! Netaŭgulojn al militservo oni devigis ŝoveli teron kaj fosi senutilajn tranĉeojn, eble nur por konvinki, ke la malamiko ĵus invadinta Sicilion trovos popolon pretan rezisti ĝis la lasta gutsango.

Mi estus devinta resti ankoraŭ preskaŭ du jarojn en kolegio por kompletigi la kvinan gimnazian kurson, nome tempo kiu permesu al la edukantoj akiri pli da taksa juĝo pri ĉiu postulanto kandidatiĝi, kaj al tiu ĉi purigi siajn intencojn kaj mezuri siajn fortojn kaj igi pli pravigita, kaj do fidinda la juĝon de la tuta fratio: tiu ĉi konstatis, ke foje la okazaĵoj aliceligas la aspirojn de kandidatoj. Tiu antaŭenigo de la tempoj se ne malordigis la ideojn certe kontribuis ilin konfuzi ĝis peli al konduto laŭ eraraj kaj misgvidaj juĝoj. Ni kvar fiere kaj time marŝadis al la sankontrolejo por kroniĝi per atestilo pri taŭgeco aŭ maltaŭgeco al soldatservo. Ne eblis dubi: ni revenis soldatserve destinitaj kaj ekatendis la... savantan manon!

Inter la respondeculoj, lokaj kaj superaj, greftiĝis vigla diskuto ĉu la aspirantoj jam sufiĉe preparitas supri al la alta ligo de la religiula vivo aŭ estus por ili pliforĝe trapasi la soldatstaton. Por mi la damaĝo kuŝis en la perdo de kelka studjaro, por la edukantoj la risko, ke la soldata kaj milita vivo signus nin tutalie ol asketisme, forvaporigante la ekorientiĝon al la religiula vivo antaŭ ol en ĝi ni firmiĝus. Tiu problemo transpasis de ili al ni por ke ni donu pli klarajn signojn de la profundeco de nia konscia elekto aŭ plikvalifikigu nian ĝeneralan sintenon.

La diskutado interplektiĝis kun la nepreco trovi lokon en la sama novicejo, nun loĝe okupita ankaŭ de kvindeko da studentoj de la kvarteologia kurso

jam proksimiĝantaj al la enpastriĝo kaj devigitaj evakue forlasi la bombitajn urbajn studentejojn.

Certamomente sonis, ke la solvo ne estas trovebla dum la antaŭrekrutiĝa periodo senpiece daŭris pasi. Aŭdiĝis la majstro de disciplino, fama pro eldiroj laŭreale kaj amuze sintezantaj cerbumaĵojn kaj novaĵojn en efektivo stagnantajn, esklamanta pri la senkonkludaj diskutoj: ”*Ju pli da vortotrafo, des pli da kuglopafo!”*. La militeca etoso ekstampis eĉ la fratularan frazaron.

Ĉu vere la faktoroj instigantaj min al la deziro eviti la militservon kreskigis la rifuĝan deziron de la religiula vokiĝo?

Pri mia sincereco eble inokuliĝis dubo en kelkajn el la frataro.

Iun tagon abrupte, vere abrupte, mi publike ricevis la ordonon retiriĝi en la flegejan ĉambregon, tiam sengastan, kien oni min postpuŝis avertante kontraŭ gravegaj punoj se mi revene trapasos la neŝlositan pordon. Kiel miaj antaŭaj samsortuloj, en la soleco, unuamomente perceptita preskaŭ snobete kvazaŭ aventuro travivita nur por esti rakontata, mi travidis iujn surbretajn librojn kaj iujn duonĉifitajn malsanulejajn negliĝojn murhokitajn kun sube diverskoloraj veŝtoj. Kuranta kliŝo delonge dismontriĝas, ke kiam la superulo decidas resendi al familio junulon, tiu ĉi estas petata aŭ devigata retiriĝi en tiu apartamenton kaj atendi, tie apartigite, la alvenon de la gepatroj ricevontaj la rehejmeniĝontan filon *destinitan ekvalidiĝi bona kaj brava sekularulo.* La nova situacio, akceptita kiel aventuro, baldaŭ ekkonturiĝis kiel dramo kun, por solvo, la finiĝo de miaj sekretaj aspiroj.

Mi jam konis, ke kunulo de pliaĝa klaso antaŭnelonge estis loĝigita ĉi tie antaŭ ol resende rehejmeniĝi. La rakontoj ĝis nun havis fabelan aspekton en bildoj de mia imago; nun tio akiras la malmolecon de realeco ĝuste por mi, sen kompato de homoj kaj helpa partopreno de iu ajn. Senironie, sed preskaŭ kun delikateco, el la memoro ekmienis pormomente la vizaĝoj de kunuloj kiuj trapasis tiujn ĉambrojn sen mia kompato aŭ eĉ kun mia malfrateca likvidemo. Pormomente en eta murspegulo mi fine kuraĝis observi mian spegulatan bildon el kiu traspektiĝis enpensiĝa mieno ĝis tiam vidita nur preterfuĝe pro timo tro konsciiĝi: kaj tio pormomente kontribuis min paŝigi tra la realo bremsante la kirliĝon de la distordanta fantazio. Hazarde mi malkovris ke eĉ vigla moviĝo de unu angulo al la alia de la ĉambro forigas tiun fantazio-kirliĝon; tion farante mi eĉ kriis distrajn sensencajn vortojn…

Rezignaciinta, pli precize inertigita antaŭ la perspektivo de baldaŭa militservo kaj perdo de ĉio lerte akumulita aŭ ekakirata, mi restas ĉi tie tri tagojn, ricevante nur hastecajn vizitojn de la kolegia rektoro, fina responsulo, kiu ŝajnas

informiĝi rekte kaj afable pri mia farto kvazaŭ temus pri izoliĝinto en flegejo pro infekta malsano. Kiel malgraŭvola loĝanto pro sanaj motivoj, mi, kun senvole ironia rideto, rukulas, ke mi nun, rilate sanon, plibonigas la pliboniĝon kaj, ke dume mi daŭrigas legi kaj studi, malgraŭ manko de lernejaj tekstoj, min helpante per memoro kaj aktivigo de imagopovo, kaj min muldi al ekzameniĝo. Fakte, male, en miaj antaŭvidoj, mi estas timege atendanta la gepatrojn, pretiganta mian praviĝon antaŭ ili kaj giloŝanta senrealecan, milfoje ĉiuflanke kun senkonkluda obsedo ekzamenitan, programon same kiel farus studento senmona kaj ne je sojlo de rekrutiĝo. Ju pli rampas la tempo des pli mi penas regi furie inertigantan angoron ĉiam pli similiĝantan al tiu de la sovaĝa besto freŝe enkaĝigita. Por ekbridi aŭ flankenlokigi la gravegajn eniriĝojn de ne kontrolitaj pensoj dum la nevenkebla sendormemo drivanta laŭ la puŝo de timoj kaj imagitaj sindefendoj, mi regcele transformas la hororajn antaŭviditaĵojn de mia menso al imagitaj oratorecaj bataloj aŭ rafinitaj diskutoj, foje ankaŭ laŭtvoĉe, ilin lingve latinigante aŭ francigante: mi solas tra ok ĉambretoj ĉirkaŭantajn ĉambregon. La dormo finfine kompatas mian ekdeliron ĝin estingante en la drono de la dormiva mensa trolaceco.

En tiu tuta tempo mi ne provas preĝi, aŭ preĝi antaŭvide al io honeste preciza, ĉar la perturbita konscienco donus malmultajn esperojn esti, pro mia ne tute honestaj konsciencaj kompromisoj, senriproĉe elaŭdita. Kaj, eble, pro tio ke tra mia animo svagetis la timo ke ĝuste la konscienco povus konsenti kun la superulaj decidoj.

Ne multe pli frue ol la meztaga manĝo de la kvara tago, mi ricevas la altrudan inviton de la flegisto malsupreniri por manĝi kun la aliaj, ŝajnriproĉe savmiene aldonante "*ĉar mi ne plu deĵorigu restabiligiton*". Mi tuj iras reokupi mian kutiman lokon ĉetable: neniu salutas aŭ komplimentas resaniĝinton, neniu miras, edukantoj kaj instruistoj sintenas kun mi kiel kutime. Certe, mi detenas min el mieno de eksmalliberulo kaj tuj komencas agi kaj paroli kvazaŭ nenio okazintus: ankaŭ mia kontentiĝo rapide miene kaj ĉiuaspekte konturiĝis por ke ne vekiĝu, ĉe mi kaj kunuloj, konscio pri ŝanĝo iu ajn.

Neniam oni min sciigis pri la eksplodiga kaŭzo de tiu balanciĝanta agadmaniero de la edukantoj, al kiuj mi imputis tiun punon per forrabo de libereco. Eble senkriteria provo aŭ eksperimento elfiltri la artifikajn vokiĝojn, eble konflikto inter ili pri mia taŭgeco pluresti kandidato por la franciskana vivo: la disciplinomajstro, kiu plilongatempe travivadis inter la fratuliĝontoj, certe subtenis mian forigindecon ĉar, kiel suspektite, eble li jam traboris mian animon. *"Kaj nun al mi, vaganta ŝancelpense, ŝajnas, ke li surlipigas rideton kiu*

*allogas al vangofrapo",* mi notis en angulo de mia persona devoteclibro. Mi neniam enketis pri ekspliko, eĉ rezignis ĉe mi mem elkompreni la briditajn motivojn, eble pro timo reveki la problemon kaj miajn angorojn, kaj intime pretis estingi scivolemon de kunlernantoj; kaj mi ekagis same kiel malsanulo revenanta sana al siaj okupoj. Plie, ne povante ne percepti ion senintence interkonsentitan kaj, nemalice, aludan al punretenito, mi iom interne pufiĝis pro supozita komuna konvinko ke mi, nur mi, funde sukcesis eliri el specialaj, tutaj por mi, testo kaj provo.

Post kelkaj tagoj oni komunikis, ke ene de du aŭ tri monatoj ni kvar vestos franciskane kun la dispenso, tial, de la soldatservo.

En julio 1943a kolapsis la faŝista reĝimo, jam degenere faŝisma, kaj komenciĝis la periodo de la Badoglio-registaro (Badoljo). Ĝuste la sekvan matenon, 25an de julio, venis kun du bicikloj, atendite, mia patro, unu por li unu por mi. Li ne jam informiĝis pri la politikaj novaĵoj.

La edukantoj jam permesis aŭ konvinkis kandidatojn al la noviceja trejniĝo ferii kelkatempe ĉe sia familio. Ĉu ili volis krei al ni pli liberan situacion por ke, fore de mediaj senvolaj premoj, ni legu en ni mem? aŭ ĉio spiciĝis nur por ke ni adiaŭu la mondon, konforme al iliaj vortumoj? Kondiĉe ke, ĉiuokaze, la spontanaj konsideroj pri tio ne estu malebligitaj de cirkonstancoj kaj de la kutimaj familiaj kaj parencaj kaj najbaraj kontaktoj kaj de la militpremo.

Estu kiel ajn, fakto estas, ke ne fasoniĝis la esperita, ĉe edukantoj, oportuno por mediti kaj min ekzameni en tiu feria semajno, ne pro volmanko aŭ pro la neevitebla distro estigita de la parencaro kaj amikaro kaj najbararo, sed nur pro mia malprudento kaj informmanko. Bicikle revenante, fakte, el dimanĉa vizito al la geavoj kaj geonkloj, meze de la nokto, precize je la noktomezo kaj dek kvar minutoj, mi en kompanio de mia patro estis blokita de soldatoj kaj arestita kun aliaj malfruantoj nesciantaj aŭ transgresantaj pri la malpermeso de cirkulado de la dudeka vespere ĝis la sepa matene. Sur la ponto nomata *Della Torre* (= De la Turo) grandvoja deviga pasejo por alveni al mia domo dista ses kilometrojn, soldatoj, pliposte, kiam la itala regno gajnos ĉe la aliancanoj (la deksesan de oktobro samjara) per la militdeklaro kontraŭ Germanujo, la kvalifikon de kunbatalantoj, dirotaj Badogliani (= badoljanoj el Badoglio, nova ĉefministro), senindulge al mia naiveco, nin arestis kaj kondukis kun aliaj dek personoj al la proksima kazerno en la najbara urbeto Este. Dum unuhora paŝado oni babiladis pri la eventoj de la patrujo kaj pri la obskura sorto de la ĵus senpovigita Mussolini, certe nun ĵetita en sekreta karcero, eble per interna puĉo: mia patro abrupte konsciiĝis, ke la opiniata sendanĝera faŝismo-alli-

ga medaleto jake pinĉita jam fariĝis danĝerporta signo, ĝin malpinĉis kaj, ne rigardate, lasis ĝin perdiĝi en fosan randon. *"En ĝi,* al mi sindefendtone li flustris provante ŝajnigi senafekcion, *sidis miaj defendo kaj prestiĝo en Germanujo kaj helpis pangajnon por la familio. Sed nun ĝi, eĉ se mi pri tio plendas ene de mi mem, ne plu utilas al mi kaj al miaj bonfarantoj, male ĝi povas endanĝerigi".* Li eksilentis, dum lia dolora konsterniĝo trapasis ankaŭ al mi, kiu tamen penis distingi maldankemon disde senutilo de ĉiu rezisto.

Gardistoj nin enŝlosis prizonuloj, ne sen antaŭe min senigis je la okulvitroj kaj pantalona kaj ŝuaj rimenoj, en granda senluma senkuŝbenka kvadrata salono ĝis matene je la sepa.

Dum la restanta nokto, gajece sendorme ĝuita de samaventuremulo, svarmis spritaĵoj de la okazaj samsortanoj, iuj pli junaj aliaj jam rekrutiĝintaj samkiale enkarcerigitaj, kaj la kantoj kaj arifajfetaĵoj kaj subtilaj pik-aludaj blagoj kontraŭ al nedifinitaj politikaj aŭtoritatuloj. Mia patro dormetis sur la ŝtona planko*, kiel dum tranĉeovivo de la monda milito*, sed nemalofte vekiĝis kaj admonis, emigita de sia instinkto min defendi kontraŭ la maldecaj paroladoj kaj trivialaĵoj rikane materiigantaj sekssensaciojn, la krudparolantojn ke ili moderu la ridon kaj ŝrikojn kaj maldecaĵojn; pliposte li mallaŭtvoĉe manifestis al mi, ke per tiuj intervenoj li estis plenuminta la plej gravan, laŭ li, el la kvazaŭ-komisioj al li sugestitaj de la kolegia rektoro por protekti mian naivan senmalicon kontraŭ mondumaĵoj per kunestigo laŭeble inter bonmoraj personoj! La kolegiaj jaroj ne jam malgravurigis el mia memoro la aĉan, ĉe la metiejo de mia unua salajritiĝo, lingvaĵon turnitan al senpudora; sed nun la krudparolado spronis la lingvaĵon krei preskaŭ-kontakton inter la diro kaj la faro.

Kiam fine alvenis la sepa matene iu kapitano kun militema mieno kaj korpoteniĝo, al la vicigitaj prizonuloj legis superinstancan cirkuleron minacantan senprocesan enkarcerigon se ankoraŭ ni estos kaptitaj eksterhejme dum la kurfaj horoj. Kaj ĉiujn oni liberigis, escepte de unu, de mi: pro mia manko de dokumentoj kaj pro tio ke el mia aspekta aĝo mi devintus esti, laŭ tiu kapitano, en soldatservejo, li bezonis konfirmojn el superaj instancoj pri mia identeco, eventuale eĉ de la religiulfara kolegio, en kiu *rifuĝas kiuj provas eskapi la militservon,* li sendelikate eldifinis, aldonante, tamen, post paŭzeto, ke *ĉiuj kazoj ne egalas.* Kaj post momenta silento: *Kelkajn horojn en tiu arestejo, ne en puna karcero,* li plu precizigis, kun duonmoketa kaj distanciĝa tono. Mia gapa mirego moliĝis kaj maliĝis kiam la voĉtono de la kapitano pli aspektiĝis mola kaj bedaŭra, foje oĉja; sed senkiale ĉar mi ne eskapis el la fulma konsciiĝo ke mia feriada tempo konsumiĝos ĉi-tie je "ŝtataj kostoj", laŭ lia eble seni-

roniaj vortoj.

*Je ŝtataj kostoj*, tio estas nur pro la du hektogramoj da pano ĉiutage koncedītaj de la provianta karto. Mia patro, tion suspektinte, ĉiutage ial tial (aparte per nutraĵaj regaloj al jam aĝaj gardistoj) sukcesis alvenigi al mi nutrajn suplementojn.

La kelkaj horoj fariĝis tagoj kaj noktoj: mi restis arestita en tiu polica demandejo, en mucida ĉambro, ĝis la sekva ĵaŭdo matene, kiam mia patro sin prezentis al la militara kapitano, kune kun la pastro, kolegia majstro de disciplino kiu, mi ne scias post kiom da penado, sukcesis pruvi, ĉe la aŭtoritato, pri miaj persona identeco kaj rajto ĝui ankoraŭ kelkajn tagojn de soldatserva liberiĝo kiel seminariano-studento en atendo, ĉiukaze, de la definitiva papera liberigilo. Mia patro, kompreninte la faŝistemajn inklinojn de la ulo kaj celante dorloti la kapitanan galon por kreskigi la ŝancojn de mia liberigo, per fuŝvortoj, iom drole, aludis je la ŝildeto bedaŭrinde *ĵus perdita* proklamanta de si mem liajn faŝistecajn simpatiojn. Neglektinte tiujn vortojn kaj eble ilin juĝinte ruzumo de lasthora renegato, kvankam mia patro servoprete ekridetis, la kapitano min salutis premante mian manon, vorte pardonpetante dum mi en liaj okuloj kredis vidi ion sombrecan, pri kio mi plikonfirmiĝis kiam li klakige kunmetis, iom ironie, la kalkanumojn, dum epoleto, dekstraflanke malkudrita, de lia jakita brusto ŝanceliĝis pende, kaj al niaj salutoj vorte eĥis per ĝenata digno.

*"Viro-soldato humiligita pro la politikaj eventoj",* interŝanĝe komentis pliposte miaj helpantoj.

Miaj helpaj liberigintoj kondukis min al kafejo por ke mi revigliĝu per kafo kun lakto; ni trovis lakton kaj ne kafon. Ĉi tie homoj babiladis senkaŝe pri misfaroj de la itala police funkcianta armeo, kiu mortigis en Reggio Emilia, centkilometrafora urbo, dekon da laboristoj manifestaciantaj por paco malgraŭ se ne spite la malpermeson, kaj plurdekojn ĉe Bari (SudItalujo). Malbonŝance ĉio konfirmiĝos semajnojn poste fare de fratuloj hazarde spektantoj.

Malgraŭe, reveninte, post la kvintaga malliberiĝo, al la libero mi tuj ekprovis ĝojon kvazaŭ la mondo aperus tute bela; sed iom post iom la finferiaj tagoj lasis eksterigi en mi tiom da laceco (en la arestejo, la nenifarado kaj manko de libroj, malgraŭ unupaĝaj ĵurnaloj kiujn kompatema gardosoldato transigis al miaj manoj dum la aero-horo aŭ tra la spiono-truo, ne akordiĝis kun la dormo, male tio favoris maldormemon pro nebremsebla fantazia kirliĝado), ke mi devis longe dormi, por reordigi la cerbon kaj reakiri la fortojn. La plejparton de la restanta feria tempo konceditan al la amikecaj renkontiĝoj mi pasigis

nur detalante miajn ĵusdatajn aventurozaĵojn kaj silentis antaŭ la komunaj deziroj plikoni pri la religiulaj idealoj.

Konfuze firmigite de tiuj spertoj en mia propono elprovi, dum la provtempa periodo, la religiulan vivon, mi revenis al la kolegio el kio mi ekprepariĝis salti al la malpli leĝera kaj plisindeviga vivo de la novicejaj reguloj.

Se miaj edukantoj konjektis, kaj eventuale enprogramis eblon, ke la feriadaj liberaj agmanieroj povintus krei okazon por elturni el ambigua situacio nedeĉifreblan personon, ili certe ankaŭ antaŭvidis, ke la edukato revenu pli vigle intencita entrepreni la vojon provige celitan. Ĝuste tio kombiniĝis al mi.

Ludis plurinterkruciĝe pluraj faktoroj konverĝaj al la sama direkto: kiel elrevigi la evidentajn fierajn kontentiĝojn de la parencaro pro mia, laŭ ili, klara religiula vokiĝo-destino? kaj per ĉio ĉi la nobliĝon de la tuta familio? Kial ne konsideri la ekonomie mizerajn kondiĉojn malebligantajn studkarieron, kaj, eventuale, la riskojn baldaŭ rekrutiĝi senpatrie kaj sencele? Kaj, krome, kia humiliĝo interrompi studojn pro senrimeda familio! Ĉio ĉi kontribuis, ne sen mia kompliceco, vualigi la restantajn tamenecojn: eble ne malinfluis ankaŭ la avino, kies flustroj pri mia estonta glora kariero inter ekleziuloj estis eldiritaj kiel profetaĵoj. Kaj akiris forton la neniam mortinta argumento: se centoj kaj miloj da homoj sukcesis kaj fidele kaj feliĉe monaĥe vivi, kial ne kapablus mi? Kaj finfine estas parolate pri farota profunda ekzameniĝo dum la novica vivo, ĉu ne? Tiel preskaŭ sensufere kaj senkritike plisolidiĝis kio konfliktojn kaj dramojn proksimigis.

Post kelkaj tagoj de enkolegia feriado kun adiaŭaj festoj far de la plu restantaj plijunaj samkursanoj, la kvar noviciĝontoj karavanis laŭ dudek kvinkilometra vojo, foje apenaŭ distingebla el herbejoj kaj kultivejoj, tie kaj tie randumita de senmorteraj muroj, larĝparte flankita de kampoj riĉaj je aŭtunaj fruktoj, kie personoj, plejofte virinoj, prizorgadis. Ni, post momenta menslevIĝo al Dio kaj al Sankta Francisko, kantis kaj rakontadis ŝercojn okulumante la horizonton por haste ekscii ĉu ankaŭ hodiaŭ la bombaviadiloj sulkas la ĉielojn. Dum la haltado, por ripozigi la ĉevalon, la silento gravuriĝis en mi kiel vakuo sendistra kaj perceptebla mallogo: laŭmomente fuĝo, el tiu loko al la mondo, konturiĝis ebla, necesa kaj deviga. Kiel bloki la nebremseblan fatalan sinsekvon de tia serio ĉiam pli allasanta al psika inertigo?

Blokis la ekrumaĝado de bombavidiloj ekvidiĝantaj dekstre traĉiele. La tristondo disipiĝis tra la komentoj kaj observoj ĉu akompanas ĉasaviadiloj. Anstataŭ vidi en ili minacon mi klopodis, kaj eble sukcesis, vidi en ili ion belan kaj estetikan kaj inan je kontemplo.

Kiam elsaltis fore, sur la verto de terena ĝibaĵo, la masiva kaj impona noviceja konstruaĵo, neniam antaŭe vidita de ni, mia koro reprovis nefuĝantan ondon de malkvieto malfajriganta la ekpartoprenon en la ĝojaj ekkrioj de la stafete sendita fratula eskorto. Momenta sveniĝo-sento, kun totala estingiĝo eĉ de la novaĵsento, sed sufiĉe memorigenda kaj analizenda, min skuis kaj paralizis unusente. El tiu mia angore mensa foriĝo mi eliris nur por ne esti rimarkita en tia stato; tamen danĝertimo min akompanis dum la tutaj bonvenaj salutoj dum kiuj mi vane serĉadis samtempe, ene de la rezervo de miaj glatigaj pensoj, iun el ili sufiĉe ekscitan por tion preterpasigi.

Jen la giganta masonaĵo, enrokita sur eta morena altaĵo apud piedoj de Berica Montetaro (Colli Bérici = Kolli Bériĉi, provinco de Vicenza) ducent metrojn elstaranta de la ĉirkaŭa ebenaĵo, etendiĝanta laŭ kvar kvinonoj de ĝiaj flankoj, alirebla per larĝa vojo flankita de cipresoj. Tiun ĉi vojon ni trakuris piede por ne trolacigi la ĉevalon kaj por antaŭĝui la panoramon kun la sankteco jam enŝovita de la renomo. Supreniris malantaŭ niaj ŝultroj lamanta kamioneto (estis la unua sinmovilo de la tuta trairo) okupita de du soldatoj. Kial soldatoj ĉi supre?

Supre, nin kvar ridmiene akceptis la majstro de l' novicoj, kiu kun orgojla admiriga sprono prezentis la kvinan, al ni neantaŭsciigitan, novicon jam studenton alvenintan rekte el la sekulara mondo. Ĉar aliaj du soldatoj okultire farumadis nemalproksime, la atento iĝas scivola kaj levas la saman demandon al la ĉeestantoj: *kial soldatoj ĉi supre?* Estas soldatoj, oni eksplikis indikante aliajn dorsapogitajn kontraŭ la muraj bosaĵoj, ne tute siainiciate deflankiĝintaj kaj fuĝantaj al sia hejmo, aŭ necertaj pri ĝusta, kaj malpli danĝera, elekto. Ili estas atendantaj de la fratio civilajn vestojn por hejmeniri inkognite pro timo de la germanaj trupoj amase, oni pliinformis, descendantaj trajne kaj kamione el Alpoj al la italaj landoj jam de hieraŭ.

Kial soldatoj forfuĝas?

Kaj al ni estas klare konigataj la okazintaĵoj de dek, dudek horoj antaŭe: Itala registaro jam subskribis armisticon kun la alianca armeo angla-usona, la milito do jam finiĝis, la soldatoj ne havas servordonojn. En salono, fratuloj, junaj kaj maljunaj, kaŭre sidas ĉirkaŭ radiaparato aŭskultante la plej novajn priarmisticajn bultenojn; aliaj fratuloj, en alia deflanka lokalo, nun ne plu sekrete ĉar la militon oni kredis jam ĉesinta, sendistre suĉas informojn de *Radio Londono* aŭ de *Voĉo de Ameriko*, pri kies ekzisto mi nur nun ekscias. Surdeblinde percepteblas agitiĝo, plenplena de ĝojo kaj sufero, timo kaj espero: kun la aliancanoj Italujo akceptis senkondiĉan armisticon... *tial bataloj jam ĉesis,*

*soldatoj forfuĝas ankaŭ por ne esti kaptitaj de germanoj, kiuj pludaŭrigas militi kaj konsideras italajn soldatojn dizertuloj (do kaptendaj kaj punendaj) aŭ malamikoj (do armile eliminendaj) ...* Jen glava dilemo: ne ilin helpi malas al nia vivstilo, helpi povus morgaŭ kunporti kondamnon pro instigo al dizertado.

Je la kvara posttagmeze la majstro nin oficiale akceptis, asignis al ĉiuj po ĉeleton - “dormejo-preĝejo-studejo-penitencejo” - kaj invitis nin pluki vinberojn de la apuda vitejo: kvin/ses fruktplenaj plantoj allasis ion de siaj jam maturiĝintaj pendaĵoj, eble jam kutimiĝintaj tion ne plu suferi en la sama sezono flanke de la samaj personoj: fakte la plukado, kuraĝigita de la majstro mem *ĉar al la spirita purigado devas kontribui ankaŭ tiu evakua kaj tia uvo kaŭzas tian rezulton*, fariĝis malpermeso, la sekvan tagon: la majstro delikate premis por ke ni rezignu, post abundaj ventroliberigaj ellasoj, je la plezuro de plukado por komenci mastri niajn malsobrecajn sensojn. Ni, gardataj de li, postnelonge dehakante, por la manĝotablo, la restantajn grapolojn, estis invititaj rigore elmontri al ni mem, ke ni mastras niajn, eĉ nemalvirtemajn, sensacojn kaj deziratemon. *Tiuj vitplantoj*, sekve en niaj babiladoj oni ŝercadis, *ekstartigis la procezon atingigontan nian memkontrolon, abstine fastan kaj spirite asketan:lasi ekscitiĝi la deziro por tuj poste esti devigite ĝin mortigi! Sur nia tuta instinkta korpa-psika esto regu nur la volo!* Sed, neŝerce iu enpuŝis:*”ĉu vera hardiĝo de karaktero aŭ simpla sporta trejnado?”.*

Tamen la postajn tagojn la timata severa aspekto de la novicejo, tute medito kaj preĝo kaj penitenco, ekkunfandiĝis kun tiu de loko de ridoj, de ŝercoj, de gajeco, de promenadoj, de viglaj argumentadoj pri diversaj objektoj, eĉ senriskaj liberaj diskutadoj. De tuj rimarkeblis du tipoj de religiuloj, tiuj silentemaj, eble kun la menso inkliniĝanta konservi ĝojajn kontaktojn kun la dia sfero, kaj tiuj nedisdegnantaj ridi kaj babili, eĉ bruege, pri frivolaĵoj. Ĉiuj tamen kontribuis al etoso malkreditanta la unuajn impresojn de morna severeco malgraŭ ke io ekscitiga kaj samtempe inertiga, eble pro la primilitaj informoj, ŝajnis ŝvebe insidi la kunvivadajn gajecojn. Kaj tio malgraŭ ke la superulo ne mankis admone interveni: “Ne faru ŝercon el ĉio!”.

Ĉar ene de malmultaj tagoj ni ricevos la religiulan vestaĵon dum publika feste solena ceremonio, la majstro konversaciis kun ĉiu unuopulo pri la motivoj, la idealo, la atendotaĵoj de la religiula elekto. Mi ne aperigis miajn hezitojn, mian enan ekplastikiĝantan plastron, mian duecan konfuziĝon, des malpli la ondon de tristeco min invadinta ĉesojle de la novicejo. Bonŝance li aldonis, ke pri ĉiuspecaj vokiĝaj problemoj mi devas ĉiam elverŝi mian animon nepre al la konfesprenanto aŭ al la spirita akompananto, aparte kiam enirus la

menson eventualaj duboj serĉantaj certecon pri vokiĝaj aferoj, aŭ por pli profunde elbati sian vokitecon; kaj proponis al mi ordenan nomon anstataŭantan tiun bapta-civilan. Baldaŭ mi nomiĝos frato Alfredo, per kiu min oni oficiale alvokos dum la baldaŭa ceremonio, en kiu oni solenos la stigmatiĝon de Sankta Francisko. Alfredo angla reĝo, ekkristaniginto de Anglio, admiranto de Sankta Francisko kaj devotulo de sankta Antono, suplementos, erarege certe, mia patrino, malgraŭ mia preciziga envicigo de la historiaj eventoj laŭjarcentaj.

Spite al la malordo politika kaj milita kaj spite al la cirkulmalpermeso malpermesanta forhejmiĝi en la noktaj kaj vesperaj horoj, miaj gepatroj fiere ĉeestis mian vestadon kaj unuan fojon ili vokis min, iom amuzece, per tiu nova nomo, kies origino kaj signifo mi jam pretiĝis ilustri, eliminante ĉiun tamenan senton de klero kaj elito je kiu, oni ekrefrenis, mi senintence survojas tentiĝi kaj venkiĝi. La festa vestado, tiom aspekte ceremonia kiom intime religia, konkludiĝis per grandioza procesio kaj kantado tra la klostroj interna kaj ekstera, sed la kantado estis preskaŭ neaŭdebligata kaj poste interrompata de la disŝirinta diableca ululado de la alarmsireno ĝuste sur nia kapo.

*Kial sur nia kapo?* Preskaŭ abrupte, tri tagojn antaŭe, la zona militkomando estis rekviziciinta la nordan parton de la ĉelarkonstruaĵo kaj angulon de la konventa subtegmento, kie oni instaligis vid-son-kaptilojn kaj laŭtigilojn por averti pri danĝero, startigante intertempe telefonan tamtamon, la diversajn vilaĝojn de la ĉirkaŭa ebeno, preskaŭ senlima el tri horizontaj frontoj, kiam estos alvenantaj bombaviadiloj. Kvin teritoriaj, t. e. ne plu junaj kaj ŝarĝitaj gardi la patrujan teritorion, soldatoj kontrolis kaj funkciigis la krakantajn sonportilojn notante kaj telefone sinsekve komunikante, la direkton de flugfortresoj kaj videbla kvanto da ĉasaviadiloj. Ĝuste en tiu momento ekstartis la ululada alarmosireno peraere enrompa el tiu vaĉejo kaj aŭdigis sin ĝis, bonŝance, el kelkeloke oni decidis malsaltigi la kurenton.

Tra komentoj pri tiu surprizo kaj la deziro de pliaj informoj pri la sorto de nia nacio, ni forpermesis nian parencaron kaj admirantaron kiuj forveturis, piede aŭ bicikle, promesante, ke ili revenu por pli konkrete informi aŭ informiĝi pri militaj kaj teritoriaj eventoj. Ili vortigis *informi aŭ informiĝi* nepovante diri, pro la komuna nescio, nur *informi*. Validis la metaforo de kelkaj inter ni: *ni kirliĝas tra tenebroj.*

Nur unu el miaj novickunuloj ne ricevis viziton de parencoj, tro foraj kaj timigitaj de tiuj diverspecaj militaj fonoj. Li restis tute sola en novicejo kiam ekzakte el la vespera duonombro, el la gajaj bruegoj de la komuna forpermeso, ni vidis direktiĝi al ni virinon, eble pli ol sesdekjaran, petantan renkonti

sian enfratulitan nepon, longe neviditan, jam franciskane vestiĝintan. El ŝia anhelanta voĉo apenaŭ prononciĝis la nomo de la fratulo. Ni ĉiuj kredis, en la ĝenerala forpermesa ekscitiĝo, ke ŝi estas la avino de la solulo jam retiriĝinta al sia noviceja ĉelo.

Oni lin venigis kiu, kontenta kaj mirigita je la malmulte esperita vizito, pretis komuniki kaj transdoni sian ĝojon pro la laŭfranciska vestado. En la duonombro de la klostro la du ĉirkaŭbrakiĝis kaj interkisiĝis, dum la oldulino larmanta je ĝojo jam tro malebligita pro la milito, sub la same kontentaj okuloj de kunuloj kaj ties parencoj. Dume el la apuda koridoro ni revenis en la saloneton por repreni la pakaĵojn: kaj jen la kurento, liverita gutigile precipe dumalarme, abrupte revenis prilumi ĉion, ankaŭ la du parencojn ĵus renkontiĝintajn. Tiuj ĉi sin gape reciproke rigardante kaj interŝanĝante kelkajn rapidajn informojn, fulme konsciiĝis, ke ili fremdas unu al la alia.

Ĉe la rideksplodoj alvenigis ankaŭ multajn konventanojn, inter kiuj ankaŭ la klerika studento vere koncernata, jam franciskane vestiĝinta du jarojn antaŭe. La komentoj forgesigis, laŭmomente, la ĵusan ceremonion kaj la superŝvebantan militon!

Kaj la kisato komentis: “Vere preskaŭ mi riskis esti glutita de furioza kisanta buŝo!”.

### Ĉapitro kvina
## Novicado vera, sed interamuzaj distraĵoj

Pasis la tago kun siaj emocioj kaj komenciĝis la senprecedenca vivo. De tiu ĉi momento ĉiu el ni testu sian virtprovizon kaj sian inklinon doni sian vivon al Dio pere de l' obeo, de l' malriĉeco, de l' ĉasteco kaj sin lasu trejni en la arto malkovri kaj mastrumi kaj fruktigi siajn pasiiĝintajn emojn.

Meditoj kaj preĝoj ofte, sed iom malregule, estis interrompataj aŭ preterlasataj, krom pro kontraŭaviadilaj alarmoj, ankaŭ pro laboro de arbarigo de la monteta kulmino: per pioĉoj kaj ŝoveliloj kaj martelego ni rompadis rokajn skvamaĵojn ĝis trimetra profundo laŭ dumetra larĝo por prepari kavaĵojn, kiuj, plenŝutitaj je selekta grundo, fariĝos huma lito por cipresoj kaj pinoj jam zorgate kreskantaj en la forcejo. Ĉiu novica kovitaro vorte kaj memorŝilde fieris pri siaj kavaĵoj kaj siaj longvivaj enplantitaj arboj kaj rekomendis al sekva novica grupo la necesajn prizorgojn kaj respekton pri la ŝildetoj cizelitaj sur ŝtonoj je stilo de egiptaj faraonoj! Revizitite post dekoj da jaroj, la monteto aperas tute vestita je imponaj kaj prosperaj arboj, kontraŭ la malantaŭaj senplantaj elstaraĵoj, kiel verda mantelo sur la ŝultroj de la ĉirkaŭa ebenaĵo.

Kurioza epizodo, elnombrenda por komprenigi la cirkonstancajn etoserojn, ligiĝas al tiuj fosaĵoj.

Finnovembron, je la dekkvara kredeble, la klerika junularo, demetinte la religiulan vestaĵon, ĉirkaŭkonvente estis elfosantaj ĉiu aro sian rokan kavon kiam en la ĉielo venis kreskanta bruo sekvata de fumsignoj de ĉasaviadiloj, jam aŭdiĝas kraketado de mitraloj, plifore jen alvenas la kolono de aergigantoj. Ni jam alkutimiĝis ilin senti pasantaj sur nia kapo, sed hodiaŭ okazas io plia ĉar la aliancaj eskortaj ĉasaviadiloj nun flugas kontrastataj de germanaj samspecaj aviadiloj (tio efektivigis la lastan aviadilan oponon, de tiam la germana aviado tute forsaltis de ekzisto, en Italujo). Kion ni faru? Instinkte ni ĵete malsupreniras la proksimajn pli ol trimetrajn profundajn kavojn: bomboj aŭ kugloj, kies splitoj jam siblante ekresaltas ĉirkaŭe, povus nin trafi nur plonĝante vertikale, eventualo, se ne nula, preskaŭ hazarda. Dum brupaŭzo reskuas nin senespera voko; kelka el ni suriras la ŝultrojn de alia por vidi: distance je dek/dek kvin metroj kriegas kaj helppetas virino en kuŝa pozicio ĉe sia biciklo. Ŝi nin vidinte plonĝantaj en tian ŝirmejon, ŝi forlasas la biciklon, sin ĵetas en nian fosaĵon, sed, pro mallerteco aŭ pro malbonŝanco, ŝia kazako kun subvestoj ek-

kaptiĝas en rokpinto restigante ŝin pende ĉar la piedoj ne atingas la fosfundon. Ŝiaj vestoj disŝirite amasiĝas tutaj nivele de la brustokolo lasante la reston de la korpo tute nudan, tute senmovan kiel grandan bestopecon en buĉejo. Kaj aperas antaŭ ni dikaj, dikegaj tutnudaj sidvangoj nete dividitaj de la interglutea sulko!

Mankas tempo miri aŭ ŝerci, ŝi bezonas esti elzonigita antaŭ ol resti sufokita, ĉar el ŝi eliras neniu voĉa aŭ ĝema sono dum la kruroj kaj piedoj senmovas. Unu el miaj kunuloj (ŝirmiĝis tie ĉi du elfosantaj paroj en tiu momento) supreniras sur la ŝultroj de aliaj du por atingi la rokelstaraĵon blokantan la vestaĵojn funkciantajn kiel pendigilan ŝnuron; al mi, la kvara, altrudiĝis la tasko suprenlevi la senmovan korpon puŝante al alto ŝiajn piedojn; sed tiuj ĉi malrigidiĝas devigante min kapte preni ŝiajn krurojn, sed eĉ tiuj ĉi moliĝas kaj ne kunlaboras. Dume pliakre muĝas la aviadiloj kaj siblas la kugloj resaltantaj sur la ĉirkaŭaj rokoj. Mi tiam decidas, timide tra pudora kaj neevitebla, sed urĝite de la kuglosibloj, manapogi kaj surpeli alten tiujn senfinajn ruĝecajn nudajn gluteojn dum la aliaj reprovas dekroĉi ŝiajn vestaĵojn. Miaj manoj tamen ne sukcesas levi tiun kvazaŭmortan korpon, dua puŝo apenaŭ ĝin movas, mi petas helpon de kunulo ĵus veninta el apuda kavo ne jam fosita grave profunda, kiu tamen hezitas tuŝi (tuŝi ne tuj distingiĝis el palpi, mi diros poste) tiun ekspansiitan korpon; tiam, perfortante min mem, mi interpremas miajn ŝultrojn sub ŝiaj senfinaj tutrondaj glutejoj, jes ja mi nun estas sukcesanta, sed por pli efikigi miajn puŝojn mi glitigas eĉ mian vangon sub ŝiaj glutejoj. La virino (ĉu kvardekkvinjara?), fine senvunde dekroĉita, peze kolapsas sur miajn brakojn kaj tuje absorbiĝe ekkuntiriĝas, kun la kapo sur la genuoj kaj la vizaĝo protekte kovrita per ambaŭ manoj, en fosaĵan angulon senparole kaj sen iu ajn alia reago krom la hontruĝiĝo ekflamanta laŭ la oreloj kaj la kolo kaj la tuta vizaĝo, ne zorgante pri niaj ĝentilaj distrigoj kaj trankviligoj pri aviadiloj, kaj invitoj rideti pri la okazintaĵo.

Ĉesas la alarmo kaj do ni pretas supreniri, sed la virino restas en la kuntirita pozicio, ĉiam kun la okuloj premataj kontraŭ siaj manoj apogitaj sur la genuoj; unu el ni el la mezsupro longigas la manon por ŝin helpi supreniri, sed ŝi reagas nur per pli envolviĝa kuntiriĝo ĉirkaŭ siaj genuoj. Kunuloj tiam decidas iri preni pezan kaj longan porteblan eskalon, dum mi restas kun ŝi nesciante kion diri kaj fari: aliaj kunuloj revenintaj el aliaj fosaĵoj kuras vidi, konsili, amuziĝi. Oni lokigas la eskalon, sed la virino, invitita kaj solicitita surgrimpi ĝin, daŭrigas mincigi kaj fragiligi sian figuron en la fosa angulo. Ni tiam decidas lasi la eskalon interne de la kavo favorante al ŝi oportunon superi la inerti-

gantan hontstaton, levi la kapon ne krucigante la okulojn por kiuj ŝi pozis ŝvebigante siajn intimaĵojn, supreniri kaj forgesi, ke mem senvole montris sian neallogan korpon al junaj fratuloj.

Laŭ onidiroj, revenante al la apuda konvento, tralipe mi pli amuze ol misterume murmuradis: *"Ne plonĝu sur min la dua!"*.

Mi certe aludis postaĵon.

Post unu horo, ŝi kaj la biciklo bonŝance jam eklipsiĝis, sed el la fundo ne ĉesis "supriĝi bildo de neallogaj virinaj membroj", oni komentis. Plimalfrue, oni informiĝis, ke ŝi konatas patrino de tri gefiloj, el kiuj la plej aĝa disperdiĝinta en Rusio, el kie, englutita en glacio, neniam revenos, ne eĉ la korpaj restaĵoj.

Aldonendas, por iom pli portrete enkadrigi la situacion, ke dum tiu *senspira-amuza* operacio, kelkamomente ni vidis super nia kapo, ĉasaviadilon ekleviĝanta alalten kaj tuj plonĝanta singultante kaj fumante. Tuj kiam ĝi malaperis el nia vido, onin invadis vrakiĝkrakado. Tiel finiĝis la lasta germana regiona arkaika esploraviadilo. En la najbaraj aviadilhavenoj aperis, jes ja, diversformaj aviadiloj sed lignaj germanaviadile (Stuke) pentritaj, eble por alarmi kaj timigi la malamikon kaj… amuzigi civilulojn!

Dum la dekkvin minutoj de la batalo, miaj kunuloj, el aliaj ŝirmiloj, povis vidi trafumfajre ekfalantaj el la ĉielo teren sep flugfortresojn. Estis la lasta ĉielbatalo: de tiam la flugfortresoj naviĝos preskaŭ sporte.

Daŭrigante en ĉiam pli atentajn observon kaj esploron pri kaj ene de miaj sentoj kaj psikaj tordiĝoj, mi ĉiam pli klare malkovradis, ke la koeficiento *eviti militservon,* plielstariĝas kaj kukole jam formetas la aliajn ekduarangiĝantajn. Plikonsciiĝinte, ke la decidoforto trapuŝiĝas el tiu ne malruza motivo, ekvoĉetis ankaŭ mia konscienco: *ne licas,* ĝi sagacis, *ĉar vi manĝas la panon per kiu la donacantoj vivtenas en la studejo kaj prepariĝa stato tiujn kiuj sin taksas bonintencaj rilate al la religiula celo; aliaj homoj batalas kaj angoras anstataŭ vi; vi ŝajnigas piecon kiun vi ne havas kaj trompas la konventularon*. Ekŝvelis en mi nova interna alfronto inter la morala konscienco kaj la profitaj avantaĝoj, inter gajnoj socimateriaj kaj perdoj spiritaj. Sed mi ade plivigliĝis por ke mi ne diru mensogojn al mi mem, kion jam igis ne ebla nehazardaj, kvankam iom vole "amortizitaj", vicsuperulaj vortoj: *"io supozigas, ke iu inter vi penas por ne fetoreti je kazerna timo kaj profitema ruzeco"*.

Mi min detenis tion manifesti al konfesprenanto: certe tiu ĉi estus afable admoninta: *prikonsideru, preĝu, kaj demetu la ŝajnigan enfratuliĝadon; vi jam gajnis klarecon en via konscienco*. Ankaŭ kun la spirita gvidisto kiun mi vizitis, kvankam singardece, almenaŭ ĉiuduonmonate, mi stompis tiajn penigajn

temojn per silento aŭ ŝajna konsento kun liaj admonoj, malgraŭ ke li nemalofte pritraktis, eble suspektigita ĝuste de mia retenemo, kun mi pri la ruzecoj kaj la misintencoj artifikitaj de la milita perspektivo: *elektu laŭ rektanimo!,* resonis lia moto. Sed ĉio ĉi ne renversis min ĉar en mi kapleviĝis nova maniero rezonadi por min pravigi: *mi manĝas la panon de la bonfarantoj, ĉu? Tiuj ĉi funde helpas kredanton kiu siavice plisolidigos en la kredon homojn kaj plie mi intencas poste labori kaj lerte gajni por kompense repagi, al la kristana komunumo, la prunton kiun mi nun bezonas elspezi por mia ŝajnegoismo. Se mi iam vojŝanĝos, mi tiam respektos mian devon.*

Mi, je pruvo de la sincereco de mia intenco, fariĝis profitemulo kvitige redononta. Eviti la militon, ĉu vere kaŝa celo? kian militon? la laŭregulan aŭ la novan senfrontan? kun la *repubblichina* (republikino - eta respubliko, dirate malŝatige, la novfaŝisma respubliko ŝtatigita, en Altitalujo, de postrestintaj faŝistoj kun eminentaj civitanoj post la kapitulaca armistico de la oka de septembro 1943, kun la aliancanoj) aŭ kun la partizanoj aŭ kun la embuskiĝe eklipsiĝantoj? Ne eblas elekti informite, do mi ne elektas: mi elektas resti kaŝita en konvento same kiel aliaj sin kaŝas tramontare aŭ trakampare! Foje tiu justiĝo akiris konvinkan forton, foje ĝi min senpiece forlasis absorbita en kulposentoj.

Pri tiu lasta milita situacio mi havis rektajn informojn de la kvesto-fratuloj kaj de miaj gepatroj: tiuj ĉi rakontadis pri militrifuzuloj aŭ dizertuloj frapantaj ĉe ilia pordo por havigi nutraĵojn riskigante ĉe faŝistoj la enkarcerigon de la helpantoj ĉar kolaborantoj kun la malamiko.

Je helpo de tiuj ruzaĵoj repululis malnova subtileco: enfunde de mi povus reviglîĝi la ne malmemorigitaj, kvankam efemeraj, jam spertitaj entuziasmiĝoj kaj la ĵus pasinta rezonadmaniero kiuj legitime enjungus min al konventularo. La nebremsebla muelado de ĉiam novaj argumentoj trovis ĉiam grajnon taŭgiĝantan al miaj dentoj, kvankam foje mia cerbo riskadis kurtcirkvitiĝi.

Tiu furioza raciigado, pri mi kontraŭ mi, lante sukcesis kvietigi miajn mensajn malbremsaĵojn kaj kvitigi la ŝuldojn ĉe Dio kaj mia konscienco. Eĉ mi aŭdacis hipotezi tiujn solvojn nivele de teoria konversacio kun profesoroj de la samloke rifuĝinta teologilernejo, singarde tamen por ke la abstrakteca diskutado ne malŝirmu mian personan kondiĉon. Kaj komforte premiiĝis mia hipotezo pri rajto pluresti klerikulo dank'al socia kaj politika situacio. Eble en tiuj sacerdotoj, pri teologio docentoj, vibris io komprenema, io vere religia: *"Via abstrakta hipotezo jam ampleksas la solvon, tiun ĉi: post milito kaŝrifuĝinto honeste elektu sian veran vojon".* Tio kuraĝigis min paroli kun la spirita gvidanto. Kiel procedi kun li, sen ke malsekretiĝu tamen granda parto

de miaj ne tute kaŝeblaj ruzecoj kaj penskonduto, certe suspekteblaj enkadriĝi en la slogano *militevitemo* = *envokiĝemo?*

Tiu ĉi, je humanisma psikologio sperta, tuje ekkomprenis, ke mia hipotezo enkadriĝeblas, pli ol en pura teorio, en persona problemo. Fakte, ĉesinte esplori teorie, li ekparolis, eble sobriĝante pri sia kutima emfazo ekzalti la religiulan staton, pri la sekulara laika vivo, pri kieloj kaj kialoj per kiuj ĝi liveras eblaĵon kreski socie kaj morale, kaj kie oni povas akceli sian dignecon kaj kristanan formigon de la socio. En tiu ĉi momento mi admiris la neeksterscian flankon de edukanto de religiaj vokiĝoj kiu porokaze enŝtelas epitalamon pri la sekulara vivo: estis kvazaŭ poeto kantus inspire pri sia kutima senkonvinkaĵo. Fakte ĉi fojon la poemo sentigis veran poeton, tiom, ke mi, senfundamente, suspektis en li ion da sopiro. Eble li intuiciis, ke la hipoteza kaj ŝajnteoria kazo estas ŝarĝita ankaŭ je persona sufero. Li, min forsalutante, kvankam delikate, instigis, ke mi laŭkonscience elektu mian estontan sorton. Eble malfacilas priskribi miajn komplikajn esprimojn kun li por ke mia intenco ne aperu, baraktante samokaze por ke mi ne meritu, ĉe mi mem, intiman kulpigon de konscia mensogo antaŭ homo libere elektita kiel spirita konsilanto. La muaro pri vero pri mi plu subgastis en mia animo sendistinge kunmiksante en mi ion hontecan kaj fieran. Kaj la konversacio finiĝis en subtilan paŭton pri mi mem.

Hodiaŭ, je distanco de jardekoj, mi komprenas, ke por eliri el mia ĉarpentumaĵo mi bezonus je amiko al kiu mi estus povinta min laŭfadene rakonti. Klopodo sin rakonti rivelante intimajn konfliktojn, foje, funkcias kiel speguIo reflektanta bildon analizendan eĉ pri karakterizoj senpere nevideblaj. Sed amiko tiuspeca rigore klasiĝis entruda kaj leza ĝuste ĉe mi jam tro kutimiĝinta sensufere montri sintenon malsaman ol tiun veran.

Atenta psikologo povus diri, ke miaj oftaj kaj neĝisfundaj konfidoj anstataŭis la probleman solvon kiun mi ne volus akcepti. La ŝajna provo utilis por pacigi konsciencon kiu tamen restis malkontenta.

Ĉar dum la noviceja enfratuliĝa stadio oni studas, kaj klopodas ensorbiĝi je la spiritualeco de Sankta Francisko, kaj enprofundiĝi en ties vivkonceptadon, ties celojn, ties rilatojn kun aspirantoj sub lia eduka agado, ties influon la tutan eklezion ktp. Inter unu preĝo kaj medito oportune oni muntis apartajn instruajn lecionaĵojn pri franciskanismo… kun perlaj plusoj.

La perlaj aldonaĵoj estis abruptaj, neatenditaj intermezoj ruze elvokitaj de la novicmajstro por sondi, antaŭ ol la testito komprenu ke enfokusiĝas sondilo, la gradon de spontana aŭ vola akcepto de la franciskanaj idealoj kaj de la sincereco kaj kvalito de la aspiro al la vivo laŭ Sankta Francisko. Temis pri

ordonoj sen logika kohero, nediskutendaj sed farendaj. Pri tiu sistemo novicojn singardigadis novicoj de la antaŭaj kovitaroj. Plurfoje dum la amuzigaj rakontadoj oni antaŭavertis pri la abrupteco kaj malfrua konsciiĝo pri la okazantaĵo, kaj helpis pesi la strangecon kaj senĥekon de tiuj ekzercoj, kiel ekzemple disetendi lavitajn tukojn sub neĝanta ĉielo, rebalai longan koridoron nur pro tio ke harfende gvatanta okulo malkovris suspektan segaĵspuron, dormi apertfenestre dum subĉielo frostiĝas ktp. Ĉar cedo al emo sugesti plibonigaĵojn kaj korektaĵojn laŭ la ordonanto rompus la obeon *blindan kiel kadavron*, ĝuste tiun emon kunigitan al la vola kapablo ĝin regi kaj forigi edukantoj mezuris kaj pritaksis.

Rilate tion oni ne rezignas edife substreki, ke en "I Fioretti di San Francesco" (La Floretoj de Sankta Francisko, itala literatura klasikaĵo de la tujposta epoko de la sanktulo, nome XIII-XIV jj.), oni rakontas, ke iu noviciĝanta aspiranto estis ordonita planti brasikojn renversitaj, t. e. kun la radikoj al la aero; antaŭ la miro kaj hezito kun ekobĵetoj de la juna aspiranto, Sankta Francisko komprenintus, ke tiu ĉi ne vokiĝe alvokatas al vivo de religiula obeo. Domaĝe ke Sankta Francisko neniam legis "La Floretojn". koncernantajn siajn edukadmetodon kaj implicitan pedagogion! Tial li ne povis revizii distordojn pri sia verko: fakte, "subgrunde", oni inter ni diradis, ke la *floreta* artisma valoro ne ĉiam koincidas kun psika aŭ historia vero.

Kaj alvenis ankaŭ mia vico. La nekomprenon pri la eventa subiteco helpis la iom naiva kaj sekreta fieriĝo pri la nova ambiciita sed neesperita tasko ĵus konfidita: gardi kaj teni enordaj kaj senpolvaj ktp la freskojn kaj stiligitajn portretojn kaj skulptaĵojn ornamantajn la koridorajn murojn kaj foje kun spuroj de polvo pro, almenaŭ ŝajna, nezorgemo: freskoj ne nur etparte paliĝintaj, toloj je kadroj fendetitaj, kiuj tamen plu plenumas la funkcion elvokadi la "familiajn trezorojn de sankteco, de socia aktivado kaj novemo". Poste mi sciis, ke tiu konventa sektoro estis laŭlongatempe neloĝata pro akvotrafiltriĝoj el la tegmento. Mia kompetenteco etendiĝis ĝis la reordigo de la altartukoj, rolo kutime ludata de persono psike moviĝanta tra noblaj sentoj kaj profunda pieco kun delikata agadmaniero bele impresanta, kion malfacile oni trovus en mi. *Pro kio mi supris tiom ĉe la superula konsidero*? Tempo mankis por respondi al tiu demando, ĉar apenaŭ tri tagojn poste jen la sondilo oni demisiis min pretekstante, ke la regiona superulo, kelktaga gasto ĉe ni, "trafiĝis" per la liturgiaj ornatoj kaj vestaĵoj *malordigitaj* en la sakristia tablo kaj kandelabroj kun *langaj vaksaj strioj ĝistere*. *Malordigitaj* certe, ĉar mi devis haste foresti ĝuste de la sakristio ĉar urĝe vokita alitasken, abrupte, ĝuste de la novicmajstro;

*vakslangaj ĝispavime* ja, jes, sed pro tempomanko por zorgi post longa antaŭa malzorgo.

Ordonite genui sur la ŝtona planko de la salonmanĝo dum tagmanĝo, mi ricevis, antaŭ kvindeko da personoj, certe ne informitaj pri la reala fakta disvolviĝo, riproĉojn pro supozigita malfideleco al taskoj, kaj pro krudeco kaj nekapablo ordigi miajn fortojn por la komuna bono. *"Vi fatrase deĵoras same kiel vi fatrase vartas vian personan teniĝon dum distrumpetadas kaŝitajn opersonaĵojn",* la superulo disradiis kontraŭ mi, sendube spionante eblajn risortemajn reagojn. Mi ne komprenis tuj, malgraŭ la sennombraj alarmoj de la novicoj de la antaŭa kovitaro, ke tia renversaĵo efektivigas unu el tiuj famaj *testekzerco*j; male, pene mi kuntenis mian emon doni tujan laŭlogikan eksplikon por enkadrigi la okazintaĵon aŭ pliprecizigi, kontestante aŭ nur pliklarigante la superulon dum solena momento kun risko skandali la tutan fration kaj esti taksata netaŭga pro la religiula vivo... Kaj venis al mia memoro, ke humiliĝo akceptita por ne damaĝi la komunuman nesciantan, kaj do skandalizeblan eĉ pro justa reago, fratularon estas virto similiganta al justuloj kiuj amis fratemon pli ol sin mem. Mi akceptis la humiliĝon, ne komprenante tamen la instrumentalecon de la "provo". Kaj ĝuste la superularo pere de mia reago antaŭ tia kulpigo sentigita, certe, kiel maljusteco, kredis sin kapabla malkovri la ĉeeston kaj mezuri la kvanton de miaj submetiĝemo kaj memkontrolo.

La mensaj signoj de tia humiliĝo ĝeniĝe irrevenis en mia psiko longatempe, dum mi kredis, ke nemultajn ĉeestantojn tegmentis, ke io stranga juketas en la afero aŭ ke la superulaj riproĉoj senkialas. Kiel sekundara rezulto, pliiĝis mia singardeco kun nefidemo, kies simptomoj evidentiĝis precipe en la kontaktoj kun la samaj superuloj. Kaj oportune, postevente, al mi kompate helpis jen la medita reelvoko pri la fama Krista pasiono, kiu tamen ne estis testprovo, jen satiraĵoj pri la homa, kaj fratulara, strangeco, eĉ en la plej gravaj aferoj.

Sed ankoraŭ mi ne diris ĉion. Vesperon de tiu tago mi estis devigita, malgraŭ ne taŭge preparita, min metis ĉe harmoniumo por muzike akompani kantojn dum vespera religia ceremonio. La frataro ĉesis kanti pro la troa malkongrueco kun mia muzikado. La superulo laŭtvoĉe kriis el la altaro: *ĉesu la muziko!*

Kun la ceremonio-humiliĝo ĉesis ankaŭ la dujara preskaŭ ĉiutaga dudekminuta "fingrado sur la klavinstrumento". Iam la trigimnaziaj profesoroj permesis, ĉar la fruktoj de la studado estis konstante kontentigaj, ke iom de mia tempo estu elspezita por ekzercigi la fingrojn sur fortepiano kaj, sekve, sur harmoniumo. Mi min dediĉis pasie, sed la rezultoj, laŭ la muzikinstruisto, estis egalaj al mia muzika talento, nome neprofitdonaj. Post tiu "ĉesu la muzi-

ko", mi forlasis tiun pli volan ol sentan "sindediĉaĵon". Jarojn postajn mi rekomencis aŭtodidaktike muziki kun rezultoj onie nemalakceptaj.

La unua duonjaro de spiritualigita vivo konkludiĝis per kolektiva esploro pri la kristana spiritualeco, el kiu eno floris kaj sin nutras la franciskana spiritualeco: estis taskite ke, fine de tiuj lecionaj esploroj, ĉiu el ni donu difinon pri la kristana spiritualeco resumante, laŭ sia propra vidpunkto, la multajn priskribojn kaj interpretojn pri ĝi, interne kaj ekstere de la kristana kulturo. Eĉ, eltiri tiujn priskribon kaj difinon el siaj faktemo kaj spertiĝoj, senĝene estis juĝata valorriĉiga kaj "genia". Eĉ personaj opinioj preferatas kvankam malprecize diratajn.

De la diversaj priskriboj kaj trans ĉiuj difinoj pri spiritualeco, emerĝis, el niaj kvazaŭeseetoj, komuna denominatoro de kristana spiritualeco: *esti humilsintena, tendence ĝojesprima, antaŭ la Alia senfine malsama, senfine aparta, senfine Aliulo; esti ĉiam deziranta, ke realiĝu la plej intima alproksimiĝo al Li pensante kaj baniĝante en la konvinko de preciza distingo inter si mem kaj Li.*

La plej granda danĝero por la homa menso, ĉar nenio pli kontraŭkristanas, por mistikulo kaj spirituala homo, kuŝas en la emo aŭ tento malaperigi, en lia animo, tiun distingon. En tiu kazo la mistikuloj kontemplus sin mem, sian eston, sin igante ion absolutecan emanantan de la dia esenco. Alia risko: sin kvalifiki religia kaj spirite orientita nur pro tio ke la propra kontemplo koncentriĝas sintonie kun la aliaj kaj kun la naturo kvazaŭ tiuj estus objektivaĵoj diecaj aŭ diigaj. Tia nedistingo, favorata de orientecaj konceptaĵoj pri religio, povas atingi eĉ panteismon agrabligitan kiel unueciĝon kun la mondoĉiomo, nome la maksimuma kontraŭo de kristanismo. Tamen en tia pri Mond- kaj Dikonceptado la homa psiko povas ripozi trankvile, almenaŭ ĝis la racio malkovros la kontraŭdirojn.

Eĉ mistikemaj personaj fenomenoj venantaj, foje, laŭtakse de kompendioj de mistiko, kiel sekvaĵoj de la mistikula kontemplado, alarmas pri ili kiel pri riskoplenaj kaj fremdecaj kaj nenecesaj.

Tiulinie juĝiĝu ankaŭ la rilato, mensa-kora, kun la ennaturaj belaĵoj kaj fenomenaĵoj nin ĉirkaŭantaj, kiujn Sankta Francisko instruas igi ŝtupoj por faciligi la ascendon al Dio: ŝtupoj al Dio aŭ ideopostsignoj dissemitaj de Dio tar kaj en la kreitaro. Sume, en ĉiu unuopa ellaboraĵo estas substrekata la distingo de homo kaj naturo disde Dio. Distingo ĉiam ŝanceliĝanta, do senvelke restarigenda. Adhero aŭ kunfandiĝo aŭ miksiĝo en la dian realon, en la lingvaĵo de mistikuloj, estas nur metaforoj aludantaj nur intiman konformiĝon

samsentan kaj samcelan. Tiaj la pensoj en tiuj ellaboraĵoj, poste resumvoĉe eldiritaj.

Mi sintezis tiel mian penson: “Se iu petas de panteistoj ĉu la mondo povas ekzisti sen Dio, ili respondas «ne»; sed se ni petas de ili ĉu Dio povas ekzisti sen la mondo, ili respondas «ne»”. Alia krokizis sian pensaĵon tiel: “Spiritualeco atingiĝas per medito. Sed medito povas encentriĝi al la Absoluto aŭ al sia eno: la unua ekspansias, la dua enfermigas”.

Ni daŭrigu pri humiliĝoj. Tiuj ĉi, eĉ funkciante kiel perfortaj psikesploriloj aŭ edukkontribuiloj, malkvietigis nur momente ĉar mi kaj la kunularo senbare estis malkovrantaj tuj poste, kiam tamen la sagacaj pedagogiaj inĝenierecaj planoj de la majstro jam manifestis kaj atingis la celitan efikon, nome, ke la superuloj juĝu nin kapablaj aŭ nekapablaj konscie domini niajn plej ekvolajn aŭ refleksajn reagojn, sendepende de ties laŭmorala liceco aŭ oportuneco.

Male ol por tiuj, daŭre min suferigis la rigide regulita dormo rompita de la meznokta recitado de la breviera matutino: dekkvino da salmoj kaj himnoj, foje kantataj. Nur la sento de amikiĝo kaj proksimiĝo al Dio igis tiun dormsenigon penitenco akceptebla ĉe Dio kaj ĉe mi. Bonŝance, foj-foje, distris la bonvena ululado de la alarma sireno: tiam la matutino restadis nepreĝata en la breviero dum ni silente, sed ne tro, alrapidis rifuĝejon, kie oni anstataŭigis la oficialan dilaŭdon preĝante per la tempopasiga rozario, escepte se iu volus reiri al sia ĉelo por provi reendormiĝi: kiel ofte faris mi, ne ĉiam, tamen, kisata de la efektiva dormo pro amaso da pensoj kunfliktantaj inter si.

Timo de nokttempa bombado naskiĝis el la fakto, ke la granda konstruaĵo, kvankam izolita kaj fora de urbaj centroj, povus esti konsiderata municiejo kaj armea natura fortreso kontraŭ la invadantoj, plie estis montrate, ke soldatoj loĝas ĝuste en la masonaĵo. La memoro pri mondfama monaĥejo de Montecassino (Montekasino, sud Italio), kelkmonatojn antaŭe bombata kaj detruita ne malkontribuis alarmi la fration.

Oni faris ankaŭ sperton de la voto de malriĉeco. Je tiu ĉi mi spertiĝis, miakaze, ĉefe en hejtadmanko. Malvarmo en min influis de ĉiuj flankoj; mia nazo, kvankam kiomeble defendata, ĉiam ternadis kaj likadis. Nur dum la gimnastikaj aŭ distropaŭzoj mi perdis la vizion de mondo tute frosta, kiam kun miaj novickunuloj eblis furioze varmigcele kuri trakorte kaj laŭ ĉirkaŭbedaj padoj, kaj kiam mi ĉe mateno vekiĝis kovrita kaj varmigita; vespere, male, enlitiĝinte, miaj piedoj, dumtage senŝtrumpaj, longatempe sin konservadis en... glacio. Rilate tiun evidentan mian ĝenon oni, eĉ ŝerce foje, reciproke sin kuraĝigis elporti porcirkonstancajn penojn kaj igi la maceradon asketa maceriĝo pro la

spiritaj avantaĝoj evidentigataj de la jena flustre encerbigita eldiro: *"tiakondiĉe, pli facilas kontrasti eventualajn neĉastajn inklinojn kaj samspecajn fantaziaĵojn kaj forigi distraĵojn malefektigante la koncentriĝan kapablon".* Koncerne neĉastajn inklinojn mi kredas tion vera, aparte se en kombino kun religiaj konvinkoj; sinkoncentriĝo, male, por mi malpli pruviĝis.

Okazis tiujn tagojn, ke la konventa superulo volis koni mian realan sanstaton pri kiu mi malprudente naskigis dubojn plendinte pri fendetoj ĉe la alta dorso, eble kaŭzitaj de la vintra malvarmo. La ordenaliĝontoj devas fakte kaj aspekte elporti (!) sanstaton brila same kiel por la armeo, malgraŭ ke ĉi lasta jam ekbridis siajn pretendojn por ne manki je laŭbezonaj rekrutoj dummilite! Oni fiksis rendevuon kun kuracisto de la najbara urbo, alirebla pertrajne. Porokaze oni vestigis min civile kun supre la loza franciskana froko, kaj mi veturis tra mondo de mi apenaŭ memorata aŭ plumpe ignorata aŭ disdegne repelata eble pro timo esti de ĝi allogata: el miksaĵo de sentoj imponis tiu de svaga sed insista superreco antaŭ "mondumanoj".

Mia vesto ricevigis al mi riverencojn sed ankaŭ enviajn rigardojn pro mia privilegio, mi pensis, ne barakti por proviziĝi je eksterkuponaj nutraĵoj, tiam troveblaj preskaŭ nur ĉe la multekosta nigra merkato. La specialisto min vizitis lasante, post forflua elfarita esploro kun detalema babileca enketo, enpaperigitan diagnozon deklarantan, ke la *malsanemulo* estas tute sana.

Lin salutinte, pro deziro ne damaĝi liajn atendantajn klientojn mi preferis premi, riskante ĝin tute kunĉifi, mian frokon, momente demetitan, por senbalastigi viziton, en la valizon kaj resti kelkhore en civilaj vestoj.

Elirinte el la kuracistejo, kaj atendanta la posttagmezan trajnon, mi sidiĝis sur plurpersona ŝtona benko antaŭ la fervoja stacidomo, kie solece mi elpakis la du sandviĉojn preparitajn de la konventa kuiristo kaj jam mi ekmanĝis kiam en la sama benko eksidis diketa maturulino, eble tridekjara mi supozis, kiu, hezite ŝoviĝante miaflanken, eble hontece, murmuris, ke ankaŭ ŝi malsatas sed havas nenion por manĝi: *"fakte la tutan matenon mi ne gajnis ĉar la soldatoj trairas hastece kaj eble konfuzitaj pro ordonmankoj. Bonŝancu al vi,* ŝi flate aldonis, *kiu neĝenite manĝas antaŭ la paŝantoj".* (Antaŭ ol vesperiĝis kuros onidiro, ke soldatoj amase dizertis el la portrejna taĉmento de la kazerno en Vicenza. Fakto, tia, kiu provokos reagojn, ĉe lokaj militestroj, danĝerajn ankaŭ por la junuloj de la fratio, kiel oni konstatos pli malfrue).

Al mi ŝajnas klare, ke ŝi haveme celas al miaj sandviĉoj: mi do hastas meti en ŝian manon unu el la du, kiun ŝi akceptas kaj ekmanĝas avide, dum mi finas la mian. Postnelonge ŝi pliapudiĝas al mi, pridemandante kaj ruze provan-

te scii ĉu mi havas monon. Certigita, ke mi disponas je io da tia, ŝi iom malcerte manifestas, ke mem por sin vivteni malenuigas soldatojn per amoraj ludoj: por ŝi nun sufiĉus la duono de la sumo en mia poŝo. Ŝi silentas kiam aŭdas la motivojn de mia nekonsento kaj, mirigite, jam estas malproksimiĝanta, kiam mi realvokas ŝin kaj metas en ŝian manon ereton de miaj malmultaj liroj. Ŝi min rigardas, hezite kaj dankojn balbutante fermas kaj retiras la manon kaj malproksimiĝas kun paŝo nemalkaŝanta embarason. Tiam fariĝas rigardeblaj ŝiaj ŝultroj kaj la rekta dorsa linio ĝis la piedoj: malgraŭ, aŭ ĝuste proe, nome supraĵa juĝo ke naturo ne tro cerbumis por ŝin garnadi, por momento la fieraĉa kaj repuŝata ineco en miaj ŝablonaj juĝoj pri tiuspecaj virinoj fariĝas indulgo kaj frata simpatio.

Vere ekzistis ankaŭ la voto de ĉasteco. Tiufacete, el ĉiuj, legitaj kaj instruitaj, principoj kelkaj sulkigis mian menson:

*Junula koro ne povas resti senama, iu viva idealo devas ĝin tute okupis. La rezigno al virina komplemento ne valoras el si mem, valoras nur lige al la celo: ĉu ekzistas tiu alloga celo? tial antaŭ ol diri ne al io, necesas diri jes al io alia.*

Tio estas, antaŭ ol rezigni pri virina amo nepre necesas enpense kaj enkore jesi al alia persono. Kaj fone aperas Jesuo.

Kaj la temaro, spontane aŭ okazprofite, krozis sur pastra celibato. Spertulo pri tiuj temoj povis dedukti ke ni, inter la religiaj motivoj, kapablis ĝin aprobi, krom per religiaj motivoj, ankaŭ pro ĝiaj sociedukaj influoj. En mondo, kiu subsube opinias seksemon forto preskaŭ neregebla, preskaŭ io fatala, per la celibato religie motivita la eklezio montras, ke homoj povas sin senkateni el siaj impulsoj kaj alidirekti seksan forton. Plue ĝenerale la memrego en la seksa impulso agas, male ol veneno en eroto, kiel subteno kaj plifortigo de la seksaj rilatoj en geedza paro.

Sendepende de la perspektivo de tia evangelia enamiĝo, ekzistas la virino kaj inklino al ŝi, inklino laŭdata kaj ekzaltata de la Biblio (kies ĉi-rilatajn paŝaĵojn, iom sekrete, mi jam parkerigis kaj foje aktorstile recitadis antaŭ kunuloj) kaj de la kristana tradicio laŭ kiu rezignanto aparteni al iu virino, rezignas pri io kio igas por multaj la vivon vivebla. Kaj la samo por virino rilate al viro.

Eĉ se maloftigitaj, renkontiĝoj kun virinoj al la novicoj ne mankis, aparte kiam oni forfuĝis al kontraŭaviadilaj laŭokazaj rifuĝejoj, urĝe aranĝitaj por protekti homojn prizorgantojn en nemalforaj municiejo kaj deponejo de porsoldataj proviantaĵoj, kien venis preskaŭ ekskluzive virinoj pro evidentaj mo-

tivoj: junaj viroj, se plu loĝus najbare, en rifuĝejoj riskus enklikiĝi kaj armeaniĝi favore al Rsi (*R*epubblica *s*ociale *i*taliana), alnomata popole Respubliketo de Salò (Salò = urbeto kie ministerias la registaro de Mussolini) por batali kontraŭ la kontraŭuloj de la faŝistoj, jam batalantaj, oni certigis, sur montoj aŭ rifuĝintaj tramakisen, kaj pri ili vere ne mankis voĉoj pri militaĵoj kun mortigitoj: ĉio de mi sentata pli aventure ol riske.

Ofertiĝis apartaj okazoj en kiuj virino al ni pasis apude en ĉarmaj formoj aŭ ŝi riveliĝis fascine. Ne mankis nuptocelebroj en la konventa preĝejo dum kiuj gratuli la novgeedzojn estis plezuriĝa komplezo permesita ĝis maltimo esprimi juĝojn eĉ pri la graciaĵoj plej evidentaj de la junedziniĝinta. Certe en tiuj momentoj aranĝiĝis, kvazaŭ mem, ekalĝustiĝoj de la rilatoj inter siaj inklinoj kaj la forto de la vokiĝa idealo. Ĉi rilate rakontendas neforgesebla, por mi, renversiĝa psika remiksaĵo, longe resononta inter miaj repuŝendaĵoj: temas pri tiuj sentoj/inklinoj ĝuste okazigitaj de geedziĝo ĉisube priskribata.

Dum geedziĝo, celebrata en la preĝejo, mi deĵoris en la sakristio: nu, mi perceptis, ke min ronĝetis envio al la fratuloj deĵorantaj ĉe la altaro, povantaj tial perdi nenion de la ĉarmaĵoj de la junedzino. Kiam la novgeedzoj volis renkonti la aliajn deĵorintajn fratulojn en la gastosalono, mi povis sed ne volis manki kaj mi estis rekompensita ĉar la novedzino kisis ĉiujn: estis la unua virina kiso, krom se oni kalkulu tiujn, ege malsamspecaj, de la patrino aŭ de la fratinoj aŭ de la avino. Ĝi resonis nemallonge en mia animo malgraŭ ke ĝi elmetis nur la saporon kiun al ĝi levis mia fantazio. Subsube, eĉ se dummomente, mi sentis ĝin kiel fendon tra kiu rekompreni kaj reinterpreti la geedzajn tenerecojn, mondon ne ankoraŭ definitive flankenmetitan de mi, sed foje libervole de mi ignoritan pro nemalfascina invito, neniam tute eksplicite rifuzita, sekvi la evangeliajn konsilojn de la tri votoj.

Pro tio ĝuste la majstro invitadis koni la vivon sen enkaptiĝi, tamen, tra ĝi. Ĉu tio eblas? Eblas, sed neniu ordenpromesonto estas devigata ne enkaptiĝi. Mia arbitreco min lasis flosanta de unu elekto al ĝia kontraŭa.

Volonte mi konversaciis kun virinoj, sed preskaŭ ĉiufoje mi devis poste min ekzameni fronte al jenaj similaj trudiĝantaj, foje akuzaj, insistaj kaj bolantaj enŝteliĝoj: *Ĉu mi retroiras aŭ antaŭeniras? Jen la problemo: ĉu akcepti aŭ kontraŭstari la ekinklinojn al la vokiĝo? ĉu plifortikigi vokiĝon aŭ sin allasi tuj al la ama-edza perspektivo?* El tiuj demandoj foje mi elflosiĝis iom singêna kaj nervoza. Samtempe min mirigis, ke miaj kamaradoj, vivante en samaj cirkonstancoj, montradas neniun malkvieton kvazaŭ la du kondiĉoj, ĉastecvoto kaj ekŝpruciĝoj je virina fascino, senperceptiĝe emus surmetiĝi kaj senĝeniĝe

kunekzistus. Kiu scias kial tiam mi ne suspektis, ke ankaŭ ili ĉirkaŭiris tiajn luktojn en siaj sekretaj psiklokoj aŭ pri tio ili diskutadas nur kun sia spiritgvidanto. Eble mi min opiniis escepto en la noviceja pudora etoso.

Spicis la ordinarajn travivaĵojn ankaŭ malagrablaĵoj observataj pli nivele de komentoj ol de sufero: kiel la afero de la kvindekjara laika fratulo kiu "*trempas la vinon en la stomakon ĝis trempiĝo en ĝi",* oni senpiece klaĉadis: klaĉo bedaŭrinde superita de la fakto, ke li estas preskaŭ ĉiuvespere ebria, aparte dum eksterkonventaj deĵoroj miszorgitaj pro la englutita vino. Iun tagon li malaperis porĉiam: redonita al sia lando, oni ne senrikane aldonis. Laŭ mia hodiaŭa juĝo, do kun malvarma menso, li malsanis, kaj tial iom agacis tia al sekulo revenigo. Ankaŭ li forviŝiĝis sensalute sensente senfratsigne. Okazos ofte malapero de kunuloj kiuj ĝis la antaŭa tago avancadis ŝajne senprobleme kaj energivive en la porvokiĝaj akiroj. Okaze de malapero de amiko mi suferis ja, sed pro stranga motivo: mi min sentis desapontita kaj fraŭdita je la rajto konsili kaj konsiliĝi: certe je bazo aŭ kaŭzo de tiuj ilia decidoj agitiĝis sekretaj problemoj. Sed kiel je tiuj oni ne partoprenigis ankaŭ min?

Oni enŝtelis, ke tiu fratulo amis multe la vinon, sed inon pli ol vinon. Mi rilate tion, kvankam kiel intiman proteston, neracie havis por li malspritan kaj senpiecan juĝon, eble eksterliman de la kristana fratecsento, kvazaŭ li ofendintus rekte mian personon. Kial tiu severa sinteno? mi min demandos pliposte, kiam mia anima mempenetremo sin turnos ankaŭ kontraŭ mi. *Eble,* mi ekssuspektis*, por kuraĝigi min en la duoncelo eviti tiujn malmoralajn kontraŭdirojn kaj plisincertigi miajn intencojn, aŭ ankaŭ por akiri dignecon ĉe mi mem*. Jarojn poste, mi trovos, en taglibre dismetitaj notoj, mian mediton pri tiu kazo: en ĝi mia psikanalizemo jam ironie skribis: "*Por eviti memkonsideriĝi torso kondamnu la tarson!".* Nome, nur por eliri el mia situacia pendolemo mi severas antaŭ alies malregulaj kondutoj. Se mi havintus perspektivojn malpli elturniĝantajn mi certe estintus, en la deziro kaj prizorgo, ke la morala normo estu observata, pli indulgema al li en miaj pensoj: estis la unua, apenaŭ hipoteza, sed ne tro, malkaŝiĝo de mia eno.

Ni kvin novicoj rilatiĝis inter ni, kaj ial kun la tuta grupo de la studentoj jam teologistudantoj, amikece kaj, ŝajne, sensekrete unu por la aliaj. Ŝajne por surface, tamen, ĉar iun decembran matenon mi ne plu vidis mian plej karan amikon, mian samaĝulon. Kial li regresis el sia opiniata vokiĝo? Ĉu konsilite aŭ siasponte? Se konfidi tion al la amiko estus troe, almenaŭ saluti kaj certiĝi, ke iu sentoligo ankoraŭ restu inter ni! Ni ricevis du respondstumpojn fare de edukantoj. Mi neniam ion sciis pri tiu mia amiko: kiam, multajn jarojn pos-

te, mi decidos serĉi lin, ĉe lia intermonteta vilaĝo, jam preskaŭ senhomigita pro elmigro al urbo dungiĝcele, neniu klare memoros tiun personon, eble englutitan de militaĵoj, en kies brakojn li, ekskonventiĝinte, certe enfalis. Ĉe anagrafa oficejo, lia nomo estis akompanata de trista noto: seninforma! Al mi, kune kun sinceraj bedaŭroj, jen ne tute malaroganta humuraĵo, ŝajnis en tiu momento, ke ĉio okazintus aliel se lia amikecsento havintus konfidon al mi! Ja, ĉio okazintus aliel, ĉu por li aŭ por mi?

Eble la superuloj volis eviti al li humiliĝon aŭ al ni tro abruptan desupriĝon en niajn tre personajn problemojn kribrendajn en serioza privateco, aŭ ĉu ili. male, timis la riskon traperspektivigi sekularulan vivon pretan fascini ankaŭ nin? Porlonge zumis ĉirkaŭ ni tiuj demandoj. Kiel ajn estu, pri tiu fermita sinteno de la superuloj, ni kune, kvankam per paŭteca duonsilento, esprimis pritakson ne tute pozitivan.

Kvankam, laŭ iuj, mi malofte objektivas, la edukantoj tamen pritaksis min pli objektivema ol subjektivema. Eble alskribendas al tiu ambigueca juĝo, kiun mi elbuŝigis el unu de la iamaj profesoroj, se al mi estis permesite viziti la konventan bibliotekon, imponan je dekmilo da katalogitaj verkoj plus aliaj katalogotaj *postmilite,* laŭ ŝerca onidiro. Pli precize, mi estis taskita senpolvigi kaj reordige rekompaktigi, indeksi kaj registri la sekcion "hagiografio", kies tekstoj estis dise dislokitaj meze de aliaj sekcioj kaj disŝutitaj diverstable kaj stakite sur surpavimo, eble pro ofta konsultado: la aktuala senprincipa apudigado de la libroj malglatigis ties esploron.

Scivolemo produktis en mi pripensindaĵojn: ĉu la hagiografioj pri sanktuloj meritas seriozan atenton? Unuavide ili, almenaŭ tiuj de mi superrigarde legitaj, plenplenis je laŭdoj kaj mirindaĵoj kaj ludigis la sanktulojn ekster siatempa historio. La aliaj sektoroj, filozofio kaj historio kaj teologio kaj literaturo por mi ŝvebis eksterspace pro ilia ordonita netuŝebleco. Libroj kaj dosieroj stakis laŭ la antaŭa koridoro, kun folipartoj iom gapantaj eksteren. Tio mirigis min ĉar la du porkonsultaj ĉambretoj kunligitaj perporde al la biblioteko, nun malfermite montras spurojn de trivitaĵoj, dum iam ili unuarigarde ŝajnis seniaj ĉar destinitaj komforte gasti la konsultantojn.

En biblioteko foje mi trovis fratulon aŭskultantan radion *Londonon* kaj *la voĉon el Ameriko,* rigore kaj punminace malpermesitaj de la militaj aŭtoritatoj. Manke de pli novaj, tiujn elsenditajn novaĵojn mi kurigis tra la tuta novicejo kaj trans: *kun prudento,* certe, same kiel al mi nesenaŭtoritate hazarde invitis ŝajniganto ne vidi mian ŝtelan kaptadon, ĉar kelka ĝisostulo, eĉ inter la fratuloj, plue esperas en la fina venko kaj do en la efikeco kolabori kun la totalisma

reĝimo kaj, do, preta denunci. Mia animo travivis konstantan bedaŭron pro la suferoj kaj humiliĝo de la itala popolo; sed estis doloro iomete dampita ĉar elvoki ĝin troinsiste vekus ankaŭ la memoron, ke mi revis kaj plenpove, kvankam senefike, cinike volis la militon malgraŭ la avertoj antaŭvidigantaj pri humiliĝo kaj suferoj inter gentoj.

Oni diradis, ke en la biblioteko estas konservataj, krom dikaj kaj antikvaj volumoj kun folioj el tempoflaviĝinta papero, multege da libroj prohibitaj ĉar cenzuritaj de la Sankta Ofico kaj aliaj romaj kongregacioj, sed oni admone sciigis ankaŭ, ke tiuj libroj estas enŝlositaj en apartaj ŝrankoj ene de du flankaj ĉambretoj, kiuj funkcias ankaŭ kiel konsultejo. Min mi demandis kial al ni junuloj, fakte liceaj studentoj pri filozofio aŭ jam je sojlo de priteologiaj kursoj, estis severe malpermesate eksporti aŭ konsulti bibliotekaĵojn; malpermesate kaj ankaŭ punminacate. Je justiĝo de tiu ordono oni ne disdegnis sin apogi sur la saman sistemon de protestantoj kiuj, kontraŭ la kvar miloj da titoloj de la katolika *Index* (Indekso), en Zurigo inkluzivis en sia I*ndex* dekdu milojn da tiaj.

Ankaŭ por la deĵorantoj etendiĝis tia ordonitaĵo, kiu do altrudiĝis ankaŭ al mi. Mi, male, jam longe vestis, ĉe mi, la galonojn de maturulo kaj do aŭdacis haltigi la rigardon kaj etendi okulojn kaj manojn, kaj legi malpermesitajn, kaj malmulte trivitajn kun kelkaj ankoraŭ paĝnetranĉitajn, librojn momente kuŝantajn sur granda tablo kaj atendantajn esti reenbretigitaj en aliaj du flankaj ĉambretoj. Longatempe mi legadis: famaj verkaĵoj kiel la *Vive de Jèsus* de E. Renan, la *Gaja Scienco* de Nietzsche, *Candide* de Voltaire, *Dialogo sopra i due massimi sistemi* de G. Galilejo ktp; sed por sukcese legi, eĉ supraĵe, mi devis ŝajnigi eksterpostenan eltrovaĵon kaj engluti enhavon unuside: miafavore kunludis la juĝo de la konfesprenanto, laŭ kiu tiu normo celas defendi nekulturitajn personojn kaj la malprudentulojn… inter kiuj mi ne enkalkulas min!

Sprinte sparkis inter miaj deziroj io nova: mi forlasis ĉiun tekston malpermesitan por mi koncentriĝi al alia ne malpermesita sed ĉiam kaŝita: tiu pri la Biblia Kantiko de Kantikoj aŭ Alta Kanto, ĝis nun legita nur en purigataj eltiraĵoj. Ĝi el la sobra latina lingvo kondukis mian imago-menson rekonsideri miajn juĝojn, kiujn, jarojn poste, mi trovis difinitaj kiel *sekso sakralizita kaj sublimizita*, pri amo kaj sekso, celebritaj en la poemo. Tamen mi devis legi la etan libron du fojojn ĉar en la unua legado la potenco de la mistika interpretado elkarniganta la lingvaĵan konkretecon, je kiu mia menso estis impregnita, spiritigis esprimojn ĝis malaperigo el la scenejo de la du enamiĝintoj; eble ankaŭ la dua legado ne komplete sin senigis je tiu tendenco. Reenbretigante la li-

bron mi ne provis eĉ minimuman senton de kulpo, kiu tamen ne estus la mezuro de kulpeco ĉar tiu ĉi povas estiĝi nur nivele de nepasia juĝanta konscienco.

La inviton kaj ordonon, tamen, ne aliri la du etajn ĉeflankajn ĉambrojn, kiuj de kelkdeke da tagoj foje montris la pordojn duonmalfermitaj, oni akcentis mistere senesceptaj.

La malpermeso-ordonoj fakte estis ripetitaj plurfoje kvazaŭ el tiu konduto dependus la elsavo de l' mondo. La malsukcesintaj provoj postspuri racian eksplikon pri tiu stranga afero, ĝis tiam dankita al la neceso gardadi la malpermesitajn librojn aŭ konsciigi kiun ajn, ke tiuj libroj entenas ion kontraŭkristanan, iun tagon ricevis ankaŭ alian pli pragmatan pravigon.

De kelka tempo mi rimarkis, ke la helpkuiristo, frato Sebastiano, iom antaŭ ol sidiĝi apud mi ĉe la manĝotablo, svelte rapidiradis al la supraj lokaloj portante du pladojn kun diversaj nutraĵoj. Mia scivolemo rompis lian diskretecon jam malplifortigitan de mia daŭra deĵoro en biblioteko: li fine konfidis: *"neniu konu, ke en la biblioteko, pliprecize en apudaj porkonsultaj ĉeletoj, kutime opiniataj malŝpare vakaj aŭ entenantaj malpermesitajn librojn, loĝas kaj travivas du judoj,* enbretigitaj *inter libroj, garditaj kontraŭ poruloj de faŝismo, kaj kaŝitaj al ĉiuj por ke la novaĵo ne transiru al la soldatoj vaĉantaj en la alia konventa alo. Ke via scivolemo ne fariĝu scivolemigo!".* Mi sukcesis gardi la ruze ŝtelitan sekreton.

Voĉo zumis, mi tiam memoris, ke jam eĉ katolikaj hebreoj estis serĉataj kaj enprizonigataj de nazioj, reage al kolektiva kaj publika protesto de la nederlanda katolika episkopara konferenco kontraŭ la sendiskriminacia aresto de hebreoj kaj engaĝiĝantaj kristanoj en regionaj okupataj de la germana armeo aŭ patrolataj de iliaj kolaborantoj. Por ŝtopi la buŝon al la ekleziuloj, la nazioj pliintensigis persekutojn tuj post kaj konsekvence de ĉiu protesto kvazaŭ la protestoj estus la kaŭzo, kaj do kondamnindaj kaj evitendaj, de la persekuto mem. Oni diradis, ke eĉ post papaj diplomatiaj "enŝoviĝoj" tio ĉirkaŭe notiĝis.

Kelkajn tagojn poste, mi ilin vidis parolantaj kun la superulo ĝuste en biblioteko kaj salutis seninterparole ĉar mi devis min ŝajnigi nekonanto de la afero. Ili taksiĝis al miaj okuloj mezaĝaj viroj kun neniuj apartaj signoj krom deflanke rememorigi, en miaj pensoj, ke Jesuo certe havis ion de ilia fizionomio: neniam mi antaŭe renkontis hebreojn! Sed eĉ tia deflanka rememorigilo, monatojn poste, ekkorodiĝis kiam oni babilumis, ke la hebrea sango, laŭjarcente, miksiĝis kun pluraj, se ne multaj, fremdaj sangoj kaj ankaŭ fizionomioj ne plu estas tiuj originaj... Tiam mi rifuĝigis mian konvinkon en la certeco, ke al-

menaŭ la kultura fono tiun rememorigilon oni rajtas alstrebi vidigi.

Ke la judojn nazioj kaj faŝistoj enprizonigas por ilin sendi al la trudizolejo pro politikaj kaj rasismaj kaŭzoj estis al ni pli ol sciigite, ke la rasismaj leĝoj de la itala regno tiam ekaplikiĝis kun pli rigoraj plenumo kaj ekzekucio flanke de la respubliketaj dummilitaj regaĉantoj urĝitaj de germanoj kiuj ofte ne disdegnis agi mem fronte al la inerteco de italoj, ke la papo kaj la loka episkopo sekrete spronis gastigi hebreojn forfuĝintajn el kaptiteco reala aŭ minacata, leviĝis al temo nemalkutima inter ni novicoj; ne estis konigite al ni kaj al iu ajn inter la profesoroj, klientoj de aliancaj radioj, ke hebreojn oni koncentris en ekstermigaj lageroj, kvankam unufojon mi estis aŭdinta okazan gaston, kapelanon revenintan el rusa fronto, rakonti pri vagonoj kun homoj kriantaj kaj agitantaj manojn el la altaj brutvagonaj fenestretoj: el ilia helpalvokoj li kredis dedukteble, ke tiuj homoj uzis esprimojn indikantajn juddevenon: eĉ li sukcesis interbabiladi kun envagonitoj devenantaj de alia koncentrejo, *kie oni mortigas homojn per malaperigo en neniejo*.

Kiam la ĉeeston de la du ne plu eblis kaŝi, ili ekaperis en la komunumaj lokoj kaj kunlaboris en normalaj farindaĵoj ĉiam froke vestitaj pro timo de kontrolo de simpatiantoj al Germanujo, kien ili timis esti koncentrejen deportitaj kiel kolaborantoj kun la malamiko kaj devigitaj punlabori.

Mi ŝatis la konduton de miaj konventestroj, sed funde al mi ŝajnis karitato preskaŭ senutila ĉar la milito estis finiĝanta, laŭ mi, tial ĉiuj libere revenos siahejmen. Jarojn poste, scivolemigita de la hidaj rakontaĵoj de postrestintoj, mi sciis, ke la ĉeesto de la du gastoj estis konata eĉ de la mezaĝa rezerva oficiro estranta la kvar/kvin teritoriajn soldatojn, kiu jam kapablis ilin lokalizi, eĉ franciskane vestitajn, inter religiuloj. Kaj ĝuste pro tiu ignora protektanta (ĉar la oficira ĉeesto estis garantio ĉe la germana polico kontrolanta eĉ konventojn) scio, atestita de la du judoj, li evitos la elpurigan proceson aŭ flankenigan punon pro soldatoficira kolaborado.

Kiuj estis tiuj du judoj? Neniam mi renkontis la tiaman konventan responsulon por komplete kvietigi mian scivolemon dum eĉ en la konventaj kronikkajero nenion pri tio oni registris, eble por ne regali per spuroj okaze de eventuala abrupta nazifaŝista enrompo; kaj tiel ankaŭ mia deziro ilin gratuli pro la hazarde evitita gasekstermejo (“*ne sen la kontribuo de mia silento*“, mi eble stultece dirus), pri kies tragika esteco mi kaj eble ankaŭ ili ne sciis, eble restos tute fora de la verŝajno realiĝi.

Meze de tiuj eventoj estis celebrita la tritaga preĝo honore al la Sankta Spirito, kies tasko, interalie, laŭ la kutima predikado, koincidas kun la intimiĝo

en la devo sin elvringe ekzameni sincerece. La preĝo, inventita okaze de la konventa liturgiisto, recitas: *"Donu, Sankta Spirito, al mi la kapablon kaj kuraĝon koni min mem; ke via lumo ne forlasu min en la mallumo pri mi, ke mia konscienco ne forlogu min kaj, ke mi ne provu ruze trompi ĝin..."*. Sed mi provis iomete da embaraso estante mia konscienco jam klara rilate konscion pri mi: mi provis preskaŭ distriĝi por ne enŝoviĝi en kulposenton. Dio, en tiuj tagoj, efikis por esti juĝata, de mi, tro penetrema en la homan konsciencon!

Porokaze la novicestro invitis el Triesto faman, sed por ni nekonatan, pastron, lin taskiginte, mi kredas, grundigi, pli ol ardigi por religiulstato, en ni la ĝustan scion pri ni mem, la plej malfacilan arton. Li uzis kun ni kvar oratorarton preskaŭ malparadan kaj familian lingvaĵan, sed kun lacigaj vastoj inter vortoj (inter unu kaj alia vorto *pasas flegma bovo,* estis goliardeca eldiraĵo). Ni emfazis, amuzsprite, pro oftaj movoj kaj flirtigadoj de liaj manoj kaj brakoj de ekstere al lia brusto, kvazaŭ li provus ilin meti en siajn konceptajn profundecojn, ke li vibrigas samtakte la kosmajn spacojn, krom niajn spiritojn. Tamen vere atenton kaptadis lia parolado ankaŭ pro tio ke la vorta malrapideco lasadis al ni tempon por diveni la sekvan vorton, kiu nemalofte ne kunlimis kun nia "travido", dum ĝuste la nedivenita vorto ekmalfermadis novajn kulturajn horizontojn.

Estis tiam, ke mi ekkonis kion mi plimalfrue juĝos pli eduka rekantado ol historia okazaĵo, ke Martino Lutero religiuliĝis inter Aŭgustenanoj por koheriĝi kun sia promeso farita al Dio dum malordinara emocio, pro subĉiela restado dum ŝtormo kun minacaj fulmoj, kvankam tiaj promesoj neniam tenas antaŭ Dio pro manko de rezonadtempo. Kazo de religiuliĝo sen sufiĉa enfosiĝo en si mem, meditenda por ni!

Ĉu oni celis ankaŭ kredigi, ke tia estas la radiko de la kontraŭeklezia ribeliĝo de Lutero kaj de ties konsekvencoj?

Oni ekuzis tiam novan vorton aŭ vorton kun nova signifo: *raciecigo (raciigo)*. La pri ĝi ilustro provokis en mi mensa-vortan ŝatopukon kaj alportis novajn interesojn. Kial vi manĝas? Kial vi rigardas trafenestre, la okulojn tute ridemaj? Se vi respondus *"por min nutri"* kaj *"por informiĝi pri la vetero"*, vi eble pretiĝas eniri *raciecigojn*, ĉar vi eble manĝas nur por kontentigi *vian frandemon,* de vi mem juĝata malvirteca, kaj rigardas trafenestre por *pasigi la tempon aŭ por vin distri*, dum la vero estas, ke vi esperas vidi amatan personon, kies amo kontrastas kun via morala konscienco. Raciecigo estas *"artifiko de la nekonscio por maski viajn vidpunktojn per argumentoj akcepteblaj ĉe via valorsistemo dum la aŭtentaj malakceptataj motivoj restas nesciataj de la*

*konscio. Iu ajn prefero aŭ decido ne povas sin bildigi stulte aŭ malmorale, almenaŭ ekkomence, do ĝi provas akiri pravigojn akcepteblajn sed, foje, trompecajn".* Tiuj prelegaj ilustraĵoj ekscitis ludon inter ni: al la serĉado pri la veraj kialoj kaj kieloj de agoj, kaj al komentoj de unu pri la alia, ankoraŭ tamen nesufiĉe penetrigitaj en la freŝaĵojn pri la hipotezita vera subkuŝanta aktoro de tiu unusenca maskovestiĝa vortumo: la sekseco!

Jarojn poste, mi malkovris la originon de tiu vorto: el la psikanalizo; fakte tiu predikanto venis el Triesto, kie la kulturo de la *Aŭstria felix* tre bone ankriĝis; sed samtempe mi pruntis la saman koncepton el la kristana literaturo, kie la suspekto kaj la timo de aspekte honesta trompiĝo pri si mem en internaj eventoj admonas la animgvidantojn kaj superŝutigas la primeditajn mistikulajn kompendiojn kaj eĉ la... tritagan preĝon honore al la Sankta Spirito. Mi fakte sperte, kaj per konstanta memanalizo cele al memkono, jam sciis, ke miaj animstatoj estis altirataj de du diverĝaj tendencoj, pri kiuj, eble ĝistede, plurfoje mia romano/taglibro sekve atentigos.

Rilate tion, ni estis invititaj "ekspertizi" nian animon, profitante eĉ de la sperto pri propra pasinta konduto, por malkovri, kaj do malgisi kaj malmunti ĝin, la propran precipan aĉkvaliton, per kiu, proprajuĝe, nin provas regi aliaj kaŝitaj malvirtemoj. Miaj analizoj konfirmis kion mi jam sciis: ke mi inklinas lasi min domini de envio: nome iu subtila sufero pro la estimindaĵoj kaj estimitaĵoj je kiuj eventuale riĉas miaj kunuloj, iu spontana tendenca megalofobio dezireganta, ke tiuj ĉi ne posedu aŭ senigu je tiaj, kun provo malestimigi la bonŝanculojn ĉe mi kaj ĉe la aliaj. Se ĉe la unua kontakto kun io nekonata, la unua impulso estas spontana kontraŭstaro, tion mi jam konstatis kamufle kunvivanta en mi, sed tiu *enviozo* kamuflas eĉ la kamufladon, eble por evitigi la hororajn reagojn kaj la sekvajn laŭmoralajn realĝustaĵojn. Ĉar aferas pri tendenco, ĝi neniam el si mem malmoralas: malmorala fariĝas la konduto se oni akceptus kaj cedus al tiaj psikaj emoj. Foje, pliprecize preskaŭ ofte, mi cedas, malgraŭ la konstante pululanta invito alkakuli al la Dia Semanto de bonoj ĉiun altkvaliton de miaj similuloj kaj pro tio alstrebi provi ĝojon. La scia konatiĝo kun tiu radikala malvirta fonto faciligas la memevangelizadon kaj ebligas ĝin vidi apenaŭ eksurfaciĝanta kaj ĝin senmaski. Eĉ la orgojleca devizo, de mi kelkatempe nemaskita, laŭ kiu mi ne bezonas envii aŭ deziri ion ajn posedatan de aliaj, ekmontras sian ruzan aĉecon, tian: *mi ne envias ĉar mi jam dotiĝas per kvalitoj pli enviindaj ol tiuj envieblaj.* Sinteno, krom falsa, ne tute kristana kaj nun riproĉanta!

Alia ne brila ruzeco blinkis el tiu analizo: ke, jes, mi prudentas kaj bridas

mian eventualan koleremon kontraŭ kontraŭanto, sed ruzece en kadre de pli subtila kontentiĝo de tiu tendenco. Specimene: mi ja jes rezignas venĝon, sed nur pro tio ke estas antaŭvidita humiliĝo aŭ malestimiĝo de la ulo kontraŭanta.

Ke mi bedaŭrinde estas knedita el tiaj pastaĵoj, estos konfermite ankaŭ de korekta kaj preciza analizo per sciencesplora vidpunktaro. Pripsikaj sciencoj hodiaŭ konfirmas klarvidajn intuiciojn de mistikuloj kaj de la humanisma psikologio atestatajn de jena invito: lasu, ke alia fida persono vidu ene de vi! La animgvidanto! Kompreneble, tiu memanalizaj provoj valoras ankaŭ kiam ili koncentriĝas ĉirkaŭ la serĉado de moralŝatindaj kvalitoj.

Proksimiĝis la tradicia festo de Sankta Francisko (la kvaran de oktobro), kiam la novicoj per publikaj votoj sin devigas vivi laŭ la idealoj de Sankta Francisko por la daŭro de tri jaroj, en kiuj ili jam sin per privataj promesoj devontigis. La superuloj, precipe la rekta responsulo, nome la novicmajstro, ripetadis sian efike orkestritan abruptan *skuadon de la arboj*: la arboj estis ni novicoj, la skuado la insista preme ĝispetega invito, ke ĉiu el ni, kiu sin religiulemiĝus nur por eviti militon kaj havigi al si travivfacilaĵojn, forlasu la konventon: senhonte, sendanĝere kaj malprofite al la ordenanoj kaj antaŭ la mondo! La invito ĉien direktis; tamen al mi iomete ŝajnis, ke la majstro, turniĝante al kelkaj el ni, atentigas, vualite sed akurate, pri mia persono ĉar li priskribas ĉu supozitajn ruzerojn ĉu la supozitajn mavajn ŝanceliĝantajn pensojn de duonŝajnigulo. Spontane envenis en pozicion mia hipokritemo manifestante, dum la tujposta ripozpaŭzo, apertan konsenton pri liaj admonoj, kaj eĉ senpudore aldonante miajn tiudirekte aprobajn konsiderojn, kiujn li akceptis ne sen tamen montri agrablan surprizon kvazaŭ mi esprimus pensojn ne tute kongrue dankeblajn al miaj rutinaj pensado kaj sinestrigo, kaj do neantaŭvideblajn.

Poste, solece en mia ĉambro, mi trabatiĝis por alhoki ne tute maldignan pravigon: tiufoje mi alkroĉis memabsolvon sur la bonŝanco, ke mi ankoraŭ havas la trijaran tempon por min pliesplori kaj decidi. Tiel mi pli kaj pli enpraktikiĝis en la arto de ŝajnigado kaj fintado. Mi daŭrigis kredi je Jesuo kaj je la valoro de la evangeliaj idealoj, kaj samtempe rafinadis mian arton montri piecon kiun mi ne havis!

Tamen ne ekskludendus, ke la ŝatebleco kaj valoro de la votstato intimiĝos, eble per nekonscia altiriĝo, en la subtavoloj de mia pensmaniero ĝis propulsi, ke mi sekvu la votojn kaj restu kontentiĝe inter la fratularo.

Tri tagojn antaŭ la publika pervota devontiĝo oni pasigis tramane de votpromesontoj faksimilon entenantan skemon de testamento: mi devis manskribe

kompili dokumenton el kiu klare kompreniĝu, ke mi rezignumas je ĉiu aktuala aŭ venonta heredaĵo avantaĝe de kelkiulo kiu ne estu la religia ordeno: mi, nenionhavanta kaj je sojlo de dudekjariĝo, herede investis miajn sensciajn gefratojn. En la dua eldono, ĉar mi devis ĉion refari pro nevalido de la manpresliteroj, mi ilin ŝpinis ankaŭ pernome.

La momento de la votpromeso okazis preskaŭ mildece. La kompromiso ŝajnstabile morterita kun mia konscienco (mi povas votpromesi antaŭ Dio kaj homoj, kun la penso, ke funde temas nur pri tri jaroj dum kiuj mi rajtas ankaŭ peti indulgon por forlasi la religiulan vivon; kaj, krome, kiu scias, ke en mi ekfloru aŭ kresku estimo pri la aferoj de vokiĝo) aperigis, ke ĉio enordas en ĝi malgraŭ eta dubo, ke tiu solvo estas influita de evidentaj plusoj de miaj sekretaj celoj: ĉiukoste daŭrigi en la studoj.

Kaj fine jen mia publika ĉealtara proklamo: *Mi, frato Alfredo, promesas al Dio kaj al vi fratoj vivi laŭ la regulo de Sankta Francisko en obeo, en malriĉeco kaj en ĉasteco.*

La festado ĉirkaŭ ni fluis sincera kaj varma, malgraŭ ke mia dekokjara frato ne rezignis ĉeeston riskante tiel trudrekrutiĝi aŭ enkarceriĝi, kaj mia patro restis dome por defendi kaj savi grenejon kaj aliajn rikoltaĵojn, parte en kaŝejoj, ĉiam je risko esti rekviziciitaj, leĝe de *respubliketanoj* aŭ eksterleĝe de partizanoj aŭ embuskantoj, ĉiuj lasantaj sindevigaĵon por postmilita kompensado. Mia patro lertis en la arto konvinkige enŝovi, ke konfiskantoj subaĉete bonfaru al si mem ŝajnigante okazinta tion kio jam vere okazis, nome rekonu el senformaj dokumentoj, sekve de rekompenco, ke la bieneto jam cedis al la kolektejoj laŭleĝe.

La miaj, inter gratuloj kaj regaloj, festantaj la ceremonion, bildelvoke rakontis, ke ili mem, interne aŭ najbare de sia bieneto, “kolaboradis" por teni kaŝita sudafrikan aviadiston, eskapintan, post la armistico de la 8/10/1943, el najbara militkaptita koncentrejo. Vespere tiu ĉi apudiĝas al la hejmo siblante aŭ fajfante, per kio *kvietigus eĉ hundon*, kaj vokante miajn fratinojn, pli inklinajn pro aĝo al simpatiecaj kompataj junulaj helpalvokoj, por ke ili kortuŝite premu sur la gepatrojn ke la fuĝulo estu pluse nutrata kaj enloĝigata almenaŭ en la bienaj budaĵoj. La fratinoj profitis de la vespera mallumo por iri tra kampare porti nutraĵojn kaj litkovrilojn. Sed tuta familio estis minacata je engermanujigo se taksata kolaboranta kun la malamiko. *“Bedaŭrinde la heĝoj havas orelojn kaj okulojn dum envio kaj malprudento tiutempe instaliĝis ĉie”,* finis mia patrino.

Estis jam okazinta io simila antaŭ unu semajno kiam iun posttagmezon pre-

zentiĝis ĉeporde du germanaj soldatoj. Malmulte da germana lingvo fare de mia patro, sed multe da vino kaj vera salamo ĝentiligis la du soldatojn kaj aliajn du restintajn ĉe la ekstera pordego: ili manĝis kaj kantis kaj, laŭ mia patro, ili ŝajnigis trovi nenion kriman, malgraŭ en la stalo varma kuŝejo ne estis tute sensuspektekscita.

Ekregis suspekto, ke profitcela najbara spionado kaŭzis la viziton; aŭ, eble, tiuj soldatoj ŝajnigis ion por obteni alion.

Vere tiu rifuĝulo estis en makiso nur por eviti la koncentrejon, ne por partizani kontraŭ la germana armeo. Kompletige aldonindu, ke, postmilite, la sudafrika registaro, aŭ alia aŭtoritato, rekompencis miajn gepatrojn per tri mil liroj, kiuj tiam estis multvalora trezoreto, kvankam disduigita kun alia najbara familio.

Pasis tiu tago, pasis la sekva, fine la *obeo* (eŭfemismo por eŭfemisme aludi *ordonon*) destinis nin al la konvento-studentejo de Gemona de Friulo (Ĝemòna, de nun Ĝemona). Tuj, kiam la trajno trovos la relon ne interrompita kaj bomboj paŭzos, ni kvar forveturos. Inter biblioteko, dum la koncedita tempo musege vizitata, kaj perfektigado de mia taglibro, kiun kvankam kun kelkaj *vakuoj* mi daŭrigis kompili, pasis kvietaj kaj feliĉaj tagoj.

### Ĉapitro sesa
# Eraroj kaj peripetioj

Abrupte, neantaŭatendite, iun trefrue matenon venis milita teritoria oficiro kun pliko urĝe legenda kaj pli urĝe plenumenda: la junuloj (kies nomoj estis tie listigitaj) prezentiĝu ene de ses horoj, al la milita komandejo por prepariĝi al eventuala dungiĝo por teritoriaj servoj, kiujn ni interpretis "fosi tranĉeojn aŭ helpi bombitojn aŭ deĵori inter revenintoj vunditaj ktp". La konventestroj tuj memoris, ke surfone de aliaj similaj cirkonstancoj, antaŭ ol esti trudite rekrutitaj por militecaj zonoj, viroj estis kunvokitaj per simila deviga preceptilo kaj, male, poste ili estis englutitaj de nekonataj destinoj. Kaj ili memoris ankaŭ, ke la neakurata ordona plenumo estis provokinta supermezuran punan reagon. La konventestroj, post rapida kaj prudenta pertelefona konsultiĝo kun franciskanaj estraraj plejgravuloj de Venecio, decidis inviti nin junulojn, jam ekipitajn per nurprovizora militserva liberiga atestilo, fuĝkaŝiĝi ĉe aliaj konventoj aŭ ĉe niaj parencoj aŭ aliloken aŭ, libervole, alestiĝi en la indikita kazerno. Avertaj sciigoj kiel *"eĉ iri hejmen, ĉe sia parencaro, se laŭ propra juĝo danĝero ne minacas"* ŝvebis kiel precipa sugesto; tiel ni interpretis en tiu ĉiesa malkutime ekscita etoso.

Kial la armea estraro ne konsideris, ke ni, jam religiuloj, ĝuas dispenson je soldatservo? Oni komunikis, ke okaze de ĝenerala mobilizo tia dispenso ne validas. Ĉu nun temas pri ĝenerala? Lokaj superuloj ne volis fali en fatalajn misojn kaj invitis kaj incitis al kaŝiĝo.

Mi akceptis inviton de amiko Leonardo, ĵus votligiĝinta kiel mi, iri kun li ĉe liajn parencojn por poste, eventuale (eventualeco ekskludenda ĉar liaj familianoj loĝas, laŭ lia sekuriga aserto, *teritorie kaj socirilate* protektaj!), kaŝiĝi intermontare, kie eble ni trovos aliajn forfuĝintojn kaj ankaŭ partizanojn. Superuloj iom hezitis antaŭ tiu solvo, sed fine ili konfidis en la inteligento kaj prudenta entreprenemo de ĉiam rekonata al mia kunulo. Certe mi ne povintus svatige liveri samspecan proponon, se konsideri la kontrolojn kaj suspektojn de kolaboremo per kiuj militaj ĝendarmoj kaj faŝista polico ĝuste antaŭhieraŭ investis mian gepatran hejmon. Ni nin vestis, iom okaze sed distrite, per civilulaj vestoj, haste, kaj fuŝe, faldis niajn frokojn kun malmultaj personaĵoj, kaj for de la trafikita ŝoseo, kie ofte pasis kamionetoj kun germanaj soldatoj en la direkto de la sudo pro, oni malkaŝis, nova milita albordiĝo de aliancanoj, sin-

garde ekpaŝis flanke de la fervojo.

La sekvo de tiuj decidoj estis nekredebla konvulsia hastado kaj la sekvo de tiu nervoŝira hastado kluĉis fuŝaĵon post fuŝaĵo kun suferoj por ni kaj por aliaj.

Ni intencis kaŝiĝi je ĉiu trajnopasado kaj, ĉe la unua stacidomo fora de nia loka milita jurisdikcio, surtrajniĝi en la direkto de la Friula nordorienta regiono, ne malproksima de la konvento-studentejo de Ĝemona. Laŭ tiu plano ni kondutis ĉe la unua kaj dua trajnpasado; sed la tria fervoja konvojo, en la direkto de Udine (Ùdine, ĉefurbo de Julia Veneto, nordorienta Italujo), bremse malrapidigis la kuron kaj haltis ĝuste antaŭ nia trakreskaĵa kaŝejo: ni spertis teruran momenton. Ni ekinformiĝis tuj poste, de la pasaĝeroj trakamparen forkurantaj el la vagonaro por sin ŝirmi kontraŭ alarmsignalitaj eblaj elaeraj bombado kaj mitralado, ke la trajno haltis eksterstacidome ĝuste por ne fariĝi homŝarĝita trafebla celo de angla-usonaj ĉasaviadiloj senlace pretaj mitrali aŭ bombi ion ajn similan al truptransportiloj, pri kies minaca proksimiĝo nin avizas la febla sed insista eltrajna fajfado. Aviadiloj elrampis fore, en la ĉielo, direkten al norditalaj okcidentaj urboj. Duobla pli akuta fajfado, post kelka horo, anoncis la restarton.

Tiupunkte ni alprenis senprudentan, „mempafan“ decidon. Kial ne profiti ankaŭ ni je tiu trajno, sur kiu jam resupreniras homoj revokitaj de la trajnfajfado, kaj kial ne iel eviti terpavimajn kaj polvajn stratojn, des pli ĉar, laŭ pasaĝeroj, trajnkontrolistoj ne vidiĝas kaj okaze de bombadminaco ili estos prizorgantaj en aliaj pli urĝaj aferoj? Niaj personaj surŝultraj posedaĵoj kun okazaj nutraĵoj pezas malmulte, sed pezas. Kvankam endubigitaj pro ekscesoj de necertecoj, ni decidis surtrajniĝi.

Gapaj rigardoj de la ĵusaj envagonirintoj kunpelis nin deklari nian identecon ĉar inter la gvatantaj vojaĝantoj susuris voĉo ke ni estas judoj. *“Nur hebreoj rajtas esti dispensitaj el militservo eĉ se tiom junecaj”.* Kaj tio pormomente al mi ŝajnis envienda privilegio pri kiu ni ankoraŭ ne aŭdis kaj do ne pritaksis, malgraŭ la bibliotekaj gastkaŝitoj. Kiam kunligiĝis, post kelkaj minutoj, en mia menso malcivitaniĝo kun malindeco militservi kaj forigo el la armeo, mi dubis ĉu la amase envagonaj babilantoj almenaŭ vage perceptis tian ligon aŭ male vere konfuzis persekuton kun privilegio.

Ni ekemis akcepti ankaŭ la konsilon resurmeti la religian veston ĉar per ĝi *”vi plifidendas kaj pli sensuspekte povas profiti”,* protektcele insinuis iuj virinoj sin patrine montrantaj animhavaj, kion ni komprenis nur en la sekvo de la eventoj.

Ni do supreniris kaj okupis starlokon meze de la koridoro paralele dividanta la longajn vicojn de senkupeaj kvarsidlokoj. La trajno moviĝis fumblovante kaj singulte kuretis ĝis la pala suno ekkliniĝis okcidenten. Iuj kunvojaĝantaj virinoj, aspekte kvar/kvin/dekjaraĝaj, ĉe kiuj ni estis premamase striktumigitaj, post kelke da hezitoj kaj flustroj inter si, ĝentile scivolis ĉu ni estis soldatiĝontaj aŭ forkurintaj, perceptigante al ni korinklinon pro niaj aferoj. La simpatio de tiuj civitaninoj venkigis al ni timidecon kaj senton de neaparteneco al ilia mondo.

Sciiginte pri nia intenco finiri al Carnia (Karnja = Karnio, Friula parto de Julia Veneto norde de Udine), inter la Karniaj Alpoj kaj la rivero Tagliamento (Taljamento), ili komencis frapvorte bedaŭri, *ke ni estas irontaj en la buŝon de l' leono*; kiam ili sciis, ke ni jam kandidatas por la franciskana enfratuliiĝo kaj vidis nian malhele brunajn frokojn kun la blanka kordono ĉifite eltiritaj el la pakoj, ilia helpvolo duobliĝis: *en Udine certe oni vin blokos kaj vin soldatigos aŭ kaptos por Germanujo,* sufermiene interbabilis kvino da virinoj konsultiĝantaj por sugesti al ni la plej efikan artifikon por eliri el la kaptilo en kiun ni estis malsagace irontaj: inter la proponoj oni iniciatis ankaŭ jenan ŝiboleton, tiun de kamuflo de propra vizaĝo aspekte kreskiganta nian aĝon kaj plipeziganta nian paŝadon. Ĉiukaze, ili zorge insistis, ne agitiĝu kaj paŝu normale kvazaŭ sentime. *Efikus plej favore al sukceso, se vi daŭre surhavus vian religiulan frokon.* Ni montris akceptemon pli pro komplezemo ol pro vera timo, jam iom miksita je la kontentiĝo de ilia interesiĝo pri ni.

Sed la konvinko ke ni estos ĉiukoste protektitaj de la parencaro de mia amiko rezistigis nin al iliaj insistaj konsiloj, iomete tro malavaraj kaj kontraŭdiraj.

La trajno haltas en la stacio de Treviso (Trevizo), kie disversiĝas kvanto da pasaĝeroj liberigante star-spacon: mi nun spiras senenspiri la harojn aŭ la nazon de la ĉiuflankaj premantaj personoj kaj okupas star-lokon ĉe vagono-fenestro tra kiu vidiĝas ekmoviĝantaj multvagonaroj, sur flankaj trakvojoj, ŝarĝitaj je militvestitaj homoj en la direkto de la sudo, kie la Alianca Armeo denove ŝrumpigis la germanan fronton, laŭ susuraj onidiroj. La spirhaltigan stampon de minaco, ne difinebla ĉar tro intensa kaj multafonta, kreskigas amasigo de diversaĵaj ruinaĵoj kaj breĉfendaj palacoj, travideblaj trans la basaj stacidomaj tegmentoj. Iom post iom klariĝis, ke ĉirkaŭe ĉio senreagige tristas: vojiĝantoj mencias kaj mallaŭtvoĉe memorigas la ruinigegan bombadon de la antaŭa aprilo kun mil sepcent elvivigitoj.

Malmultaj pasaĝeroj envagoniĝas; fine oni komunikas, ke la trajno startas,

sed kiam ĝi apenaŭ moviĝas tuj sin blokas: dek/dudek junaj, tre junaj gefaŝistetoj kure alvenas okupi la apudan vagonon, rezervitan por militeca personaro, kaj post kelkaj minutoj malsupreniras, forigante, senscie sed certe senmerite, nian kaŝitan kaj eknekontrolebran angoron. Kun io da ne sensuferiga malhasteco kaj skuegoj la trajno prenas la vojon al Udine.

Absorbitajn en tiuj, por ni iom ne zorgoplenaj, jam pli distraj ol gravaj babiladoj kaj komentoj, kaj jam alvenantajn en la urbon Udine, nin enrompe trafas singulta alarmsireno kun preskaŭ samtempa bombavia bruego: oni sin ĵetas korpplanken, la plej bonŝanculoj enpremiĝas inter lignaj sidiloj kaj planko. La memoro pri sendiskriminacia mitralado kun mortigoj frenezigas kaj kriigas personojn premantajn kontraŭ rigide fermitaj trajnpordoj. Estis antaŭvidite en similaj kazoj, ke la trajno tuj haltu por ebligi la fuĝon de vojaĝantoj. Male, nia konvojo pluiras. Neniu signe protestas ĉar klaras la motivo: konduki la vagonaron eksterurben por limigi la lezojn al personoj kaj aĵoj, se reale la bombado aŭ mitralado okazos.

La elektita haltejo, post kvaronhoro, situas en aperta kamparo kaj tuj ĉiuj, sendelikate eltrajniĝinte, dispeliĝas inter plantoj kaj garboj da fojno aŭ pajlo, stakigitaj ie kaj tie, kiom eble plej fore de la trajno kaj fervojo. La suno, dumtage plurfoje apenaŭ vegetanta, nun jam ne videble formigras allasante apenaŭ palajn vesperecajn duonhalonojn. El ekmallumo nur voĉoj senĝenite respondas al voĉoj sin interserĉantaj ĉar la bruo *ne stiras la malamikon el la ĉielo sur nia kapo,* malkiel la lumo: ĝuste karbonaj fajreroj de la lokomotiva kamentubo estiĝas senpudore, kaj senrimede, invito al deaera atako. Ni ne travidas alten aliancajn aviadilojn, kies ĉeeston kaj direkton helpas diveni nur surdiga bruego: bonŝance la timata kaj atendata siblo de elfalantaj bomboj ne venas. La aviadiloj pluiras nordokcidenten; *kiu scias kien ili iros deĵeti sian mortigan ŝarĝon?* Mi kore dankas al Dio pro la eskapita danĝero. Verdire la danksento iom dampiĝas ĉar tio ĉi travidetiĝas al mi egoismeca: ĝi enŝoviĝe suspektiĝas ĉe mi, ke tio kovras ankaŭ la kontraŭfratan dankon por ke Dio antaŭenirigu la aviadilojn elfaligi siajn bombojn sur aliajn urbojn, aliajn gentojn. Mi forigas tiun malkvietigan flustron pro tempomanko rafini la spiritekzameniĝon.

Ni akceptas, de pasaĝeroj, la milojn da konsiloj, liverataj preskaŭ kiel liberiĝo el ĝena ĝentileco kaj de mi afable atentitaj nur por ne malkomplezi al proksimuloj, revenas al la vagono por palpe elfosi el la enmalluma malordo niajn pakaĵojn; kaj senĝene kaj senscie enpenetras kamparajn stratetojn direkten de proksima vilaĝo en la jam malheliĝanta mallumo dum la granda parto

de pasaĝeroj restas atendanta surtrajniĝi revene al la urbo.

Kontentaj kaj, eble, gravigitaj de nekutimaj eventoj, ni ektrairadis kamparon sub eklumo-mankiĝo unu horon kaj duonon evitante apudiĝi aŭ kontakti kampardometojn kiuj senlumitaj timide apenaŭ malkaŝiĝis al ni.

Mia amiko ekgrumblis, ke li eble malprudente agis elektante rifuĝejo sian familian hejmon en Karnio; kaj bedaŭris, ke mem ne akceptis mian sugeston: resti ĉe najbaraj vilaĝoj, ekzemple najbare de mia hejmo en la pada delto; lia bedaŭraj esprimoj ju pli intensiĝis des pli la nokto devigis antaŭeniri preskaŭ blindpalpe.

*Dume ni marŝu ĝis la unua vilaĝeto aŭ domego*, proponis unu al la alia.

Kiam la alkumuliĝo de emocioj kaj de peziĝintaj paŝoj kunefikis ekfleksi niajn energiojn, ni decidis peti pri gastado ĉe kampara domego kun granda stalo apude, el kies fenestro io lampira apenaŭ blinketis. Ni laŭtvoĉe alvokis respondan voĉon, kiu manifestiĝis nur kiam ni grumble jam ekpreteriris postkurigitaj, transe de la heĝo, de hundaj bojadoj. Hezitaj, unuamomente, poste trankviligitaj per niaj paroleroj, du virinoj elsuĉintaj el mallumo, sekve tri, ĉar alia alsupreniriĝis el la hejma pordo, ordonante al la hurle bojaĉantaj hundoj limiĝi grunti el transe de pritondita heĝo, malfermis kaj permesis al ni eniri la stalon, kuraĝigite, ili poste konfidis, de la longa en mallumo apenaŭ travidita religiula vestaĵo, per kiu ni nin vestis pro la antaŭnokta ekmalvarmiĝo.

Atente spurante, iliaj okuloj nin brovumis bonkore kaj kompateme. Dume el pordo elŝprucis oldulino kiu, riverencata de la aliaj, nin pli esplore rigardis kaj starigis mil demandojn kaj fine montris kredi niajn diraĵojn aprobante la faraĵon de la virinoj, siaj bofilinoj, kiujn ŝi, eble, ja plencele protektas laŭ deziro de la fore rezistantaj filoj; tion ni scios sekve. Sub fadena lumo de kandelstumpo niaj vizaĝoj eltiris ilian protekte kompateman miron: “vi ne povus farti pli aĉe!”

La virinoj entabligis por ni preskaŭ nenion: preskaŭ honte ili komunikis, ke pano kaj polento kaj lakto estis ĵus elprenitaj de aliaj, eble, ni eksuspektis, de iliaj viroj kelkie makisaniĝantaj; ili pretus melki bovinojn, kiujn bedaŭrinde mem ĝislastagute elpremis antaŭ nemulte. Ni ŝajnigis esti jam manĝintaj sufiĉe el niaj finiĝintaj provizaĵoj. Vere tramallume marŝante ni mordetis ion el la jam senforma sako prokrastante la momenton de pli satiga manĝo. *“Se ne lakton, ni havas vinon: ni ĝin konservas por niaj viroj se aliaj homoj ne pli frue ĝin trinkos. Ĉu vi volas vinon? Jes, ni tuj portos vinon!”.*

Ni, heroece, akceptis vinon, ankoraŭ neklaran eble ankoraŭ fermentantan, kaj enverŝis ne multe sed sufiĉe, pro niaj laceco kaj stomaka plenvakuo, por gi-

rigi niajn kapojn, kiuj montros tuj poste signojn de ŝanceliĝo kaj, eble, elverŝis malmultan koheron en parolado kaj agmaniero. Oni enkondukis, tire-puŝe pro la troa oscilado de la kandela lumo, nin en bovinejon, mienis al ni pajlokuŝejon: senvande, inter du bovinoj jam sur pajlo sternitaj, mi inter du tutblankaj eksvirbovoj, mia amiko inter du blankaj makulitaj je nigraj punktoj! Timigitaj el la karna amaso de la remaĉantaj bovinoj, ni rapidiĝis demandi:

*"Kaj se ili, por renversiĝi, elstariĝas kaj poste enkuŝiĝas sur nin aŭ metas la kornojn…?"*.

"Ne, tioj ne okazos, ĉar ili restos tiupozicie la tutan nokton".

Ni ne havis la forton por plu treniĝi tra nia dubo: ni komplete senenergiite falis sur pajlon tuj kaptotaj de la dormo, kiu kontinuis, malgraŭ intertempaj bovinaj spirraspaĵoj kun ŝmacadoj kaj ĉevalaj stamfaĵoj el apuda senporde kunligita ĉevalejeto, senpaŭze ĝismatene kiam la virinoj revenis por furaĝprovizi kaj melki la bovinaron. Striglante la bestojn kaj delikate tiujn flegante, ili gajece paroladis inter si kaj kun ni, fine iom malpli lacaj kaj jam elirintaj el fumoj de alkoholaĵoj, pro malsato englutitaj la antaŭan vesperon.

La virinoj nin invitis sekvi la lumon difuzitan per kandeloj de ili portataj; ni eniris grandan ĉambron sur kies muroj kelkloke la farbo fendiĝis kaj forfalis aŭ neniam ekzistis. Kiel matenmanĝon, je la sepa, ni trovis, sur tablo kovrita per vakstolo, lakton freŝe melkitan kaj ĵuskuiritan maizkaĉon. Nin tableservis virineto tute silenta kaj kun la piedoj senstumpaj, kiel la gastigitaj du fratuloj, kaj senŝuaj. Kelkajn vortojn, kiel *bonantagon, dankon, ne dankinde* kaj poste silento: silento tamen okupiĝanta de ŝiaj gestoj kaj ŝtelrigardoj, kun pintoj de impertinenteco, reciprokaj: al mi plaĉis, ke ŝi sin sentas rigardata de mi aŭ ke ŝi konsciiĝas, ke mi ŝin okulumas. Sed samtempe antaŭ ŝi ekburĝonis en mia animo nova neantaŭvidita tikliĝemo fuŝanta la plezuron ŝin rigardi kaj kun ŝi fantazie babili.

Ĉu nur *vidi* aŭ eĉ *rigardi* tiun virineton, kiu, kvankam krude, moviĝante okulfrape riveladis kurbiĝojn en inaj karakterizoj? ĉu simpatie reagi responde al ŝiaj servoj aŭ ĝentile rigide resti, laŭ la eduka stampo por pluteni miajn pensojn vage orientitajn al la votĉasteco? Meze de tiuj malcertecoj, pli klare provoj enteni ambaŭ elektojn, mi estis ekspertanta la unuan preskaŭ neregeblan altiron al knabinformoj dum hazarda renkontiĝo kun virineto vera, kies eĉ la dorsaj formoj, pli ronde evidentiĝantaj kiam ŝi kurbigis la dorson por pli aŭdebligi la kanaretojn en la kameneta fajro, neatendite okulfrapis per io ĉarmeca. Miaj okuloj certamomente sin allasis rigardi la ŝiajn, kaj senĝene ricevi de ili. Kutime, antaŭ miaj samaĝulinoj, mia vizaĝo turnigas la okulojn for de ili, por

ke ili ne spertu inviton fiksi la ŝiajn sur mia nazo sentita kiel karna eksceso ekfuŝanta la agrabliĝon de la reciproka rigardado. Ĉifoje mi superis tiun embarason, eĉ ekdeziris, ke malgraŭ tio ŝi min rimarku kaj notu miajn ŝtelecajn rigardojn; kaj plaĉis al mi ŝiaj atentoj al hejmaj prizorgendaĵoj, dum kiuj kelfoje ŝiaj okuloj ŝtele al mi turniĝis.

Ŝi manĝis polenton uzante rekte la manojn enpikante en ĝin la pinĉajn fingrojn nigrete punktitajn dum unu el tiuj, per rapidaj movoj, de tempo al tempo provis ŝtelece fosi la nazon. Tio iom min agacis ĉar la virineto de miaj absorbitaj eksterspertaj pensoj estis gracie senmateria, tio estas la nutraĵoj en ŝiaj manoj, ĉe miaj forfuĝantaj imagaĵoj, povus esti nenialio ol senpezaj kaj senvolumaj, preskaŭ spiritizitaj. Tiuj ŝiaj gestoj malis al mia ideala vizio pri virineto. Mi suferis, kun ekprotesto kontraŭ io neklara, ekdisreviĝon. Ŝi havis ankaŭ grandajn okulojn, sed ne ridemajn, malkiel en mia imagado. Nur fine de la manĝo mi aŭdacis fari ankaŭ miajn okulojn konstativaj kaj ĝojemaj pro ŝia materia ĉeesto kiam ŝi ekparolis elvokante respondon kaj tiam ŝia figuro sufiĉe gentiliĝis, kaj aspektis klare, ke ŝia korpo ekkonkaviĝas kaj ekŝveliĝas en la okulplaĉaj lokoj. Certamomente la kaskado de ŝiaj taŭzite balantaj haroj aspektis kiel signo de beleco tiom sekure kaj nesenscie posedata, ke malzorgo nenion povus ol ĝin heligi kaj kreskigi. Kaj la deziro alproksimiĝi kaj tuŝi tiun fonton de beleco kaj allogo ekimagiĝis en mia fantazio tiom intense ke, eble, mi ekruĝiĝis.

Tuj post la manĝo la fraŭlineto iom malproksimiĝis el la tablo kaj, preninte ion de apuda sidilo, ekagitis ŝtrumpojn sur piedojn kaj gambojn. Mi mallevis la okulojn por ne vidi kiom supreniras la genuojn la longaj ŝtrumpoj; sed dum la okulmalleviĝo, laŭsekunde, en mi kunfandiĝis io ĉarma akompanata de sento de io delikate travidita kun sento de io perdita. La privirina sublimigo ekakordiĝis kun la reala virino!

La forsalutojn mi malbrile faris balbutante nur iujn el premantaj vortoj dum ŝi, senscie iomete bagateligante mian miron pri ŝi, jam direktadis sian atenton al siaj farotaĵoj.

Laŭvoje poste, la konscienco min malicete demandis ĉu mi estis fidela aŭ ne al la idealoj kiuj, plurfoje, mi al mi proponis aŭ ne ekskludis, pro tio ke evidente mi simpatiis por ŝi kvankam ankoraŭ en mi restis spuroj de seniluziiĝo pri ŝiaj gestoj ankoraŭ neprovizitaj je poezia leĝereco. Kiel ajn volsubtenitaj, evidentiĝis ankoraŭfojon, ke miaj sentoj restas skueblaj kaj altirataj de ĉiu virineta ekblovo: min brogas ekenamiĝo al ĉiuj virinetoj apenaŭ ekvidiĝintaj! Ĉu en mi observeblaj nur jam plenumiĝintaj tiaj allasiĝoj al junulinecaj allogoj?

La korsenta problemeto tiom okupis, kvankam en etoso jam malsentimentala, mian animon, ke pormomente duarangiĝis la radielsenda informo, konfirmita ankaŭ el radiogaleno, angore disflugita de la virinoj: *Hieraŭ posttagmeze grava teroriza bombado duondetruis vilaĝojn kaj urbetojn laŭ la fervojo Trevizo-Udine, en kies najbaraĵoj estis aranĝita renkonto de germanaj generaloj kun marŝalo Graziani, ministro pri defendado de RSI kaj ĉefo de la rearanĝita itala armeo*. Oni scios, pliposte, pri plurcentoj da homaj viktimoj. Kaj la informo, eble iom pliigita, jam ekfariĝis obscene disrompa intervilaĝe dum al ni ŝajnis nereala la hieraŭa haltado ĉe tiu kampara improvizita trajnstacio.

Necesas antaŭmeti, ke la konfido en la amiko estis favorata de mia nescio pri la loka geografio. Por alveni ĝis la regiono Karnio, kiu grandparte situas trans rivero Tagliamento kie loĝas lia nin savunta parencaro, ni bezonos paŝi ankoraŭ plurajn tagojn, kaj laciĝi en trakampaj marŝadoj kaj sennombraj insidoj. Tion diradis personoj pridemanditaj de ni. Mi kredas, ke pluraj kompatis nin. Salt kaj Povoletto, vilaĝetoj aŭ vilaĝegoj pigre preterpasitaj, aŭ de ni apenaŭ marĝene surtretitaj kvankam orelvekaj por aŭdi bruojn, voĉojn kaj frazaĵojn, enpremis en mi, malgraŭ ĝenata de seriozaj prizorgoj, memoron pri ilia atentoveka prononco. Mia amiko tradukadis lingvon de mi apenaŭ intuicie komprenatan; najbare de lia Karnia denaska vilaĝo, same kiel li al mi kun memkontenta precizeco ripetadis, oni parolas la ladinan orientan, ne tro malsimilan al la friula; kaj kiam ili parolas itallingve, artikulacias tiom flagre, ke ĉiuj vortaj silaboj efektas kiel harmoniaj ŝiboletaj klakoj.

Pafis nin, kiel inertiga veneno, la informo, ke la zono jam estis deklarita germana teritorio kaj aneksita al la samlima aŭstra regiono, do speciale kontrolita, kaj, ke la junuloj estis armeanigitaj, rekte, en la germana armeo kiel germanaj civitanoj. Ĉiukaze vastan zonon, ĝuste Karnion, kontrolas kaj patrolas Kozakoj[1]: temas pri anoj de rusigitaj popoloj (geogianoj, grusanoj, ĉirkasoj) ribeliĝintaj al la opresema stalina reĝimo kaj sekvintaj la germanan armeon retiriĝantan el Kozakio: senditaj en Karnion kaj najbaraĵojn, ili rege kontrolas teritorion *enpestitan de banditoj kaj ribelemuloj,* tio estas militrifuzintoj kaj partizanoj: oni aldonas ne senmalplaĉe, ke al ili estis promesita la rajto setli en la teritorioj liberigitaj *el tiuj pestoj.* Informoj ĉiuj konsoldonaj kaj memorigantaj esprimojn de la virinoj en la trajno"*vi iras en la buŝon de l' leono!*".

[1] Militfine okupantaj aliancanoj ilin koncentrigis proksime de la rivero Tagliamento kie multaj obskure malaperis kaj la supervivintoj estis revenigitaj al Ruslando por esti, fakte, juĝataj kiel perfidintoj al Patrujo kaj allasataj al la Stalinaj metodoj. Pri ilia sorto ankoraŭ ne ekzistas, komunascie, esploro iu ajn.

Ĝuste, ekzemple, tiu kozakaro kun siaj *aĉaj kozakaĵoj* malkonsilas, ke ni profitu je iu ajn okaza surstrata aŭ surfervoja transportilo. Bonŝance tiuj kozakoj inklinas al granda submetiĝemo al la germanoj, al ili blinde obeante, kaj havas gravan kapablon familiariĝi kun la lokanoj, kun kiuj ili miksas ne tro maltolereble simpation kun senindulgo, ruzajn flataĵojn kaj kaĵolaĵojn, por sin provizi je bezonataĵoj por siaj sekvantaj familioj, kun subita terura elastecmanko. Niaj konsilantoj elkore insistis por ke ni revestu la religiulan veston, momente de ni demetitan por marŝi pli rapide, kiun la kozakoj piece, se ne superstiĉe, riverencas; kaj avertis ke por mildigi ekscesojn de ilia patrolada operaco konvenas senprokraste postuli, okaze de aresto, renkonton kun la pli proksima germana teritoria kvartiro, forte kriante *"komandantur, komandantur..."*, kion ili komprenas kaj fiere plenumas. La sono de la germana vorto efikas ĉe kozakoj *kiel la bato de enbotaj kalkanumoj* de germanaj soldatoj firmpaŝe klakantaj surstrate! Fakte eĉ en minimumaĵoj komandas germanoj.

Se en mi fontis la dubo pri la taŭgeco de tia nia fuĝo, al mia amiko tio miksiĝis kun evidentaj signoj de perdo de memestimo: tio emerĝis el tro longigitaj silentopaŭzoj kaj el malentuziasmiĝo en kunlaboro dum la serĉado de loĝaj kaj iradaj malimplikaĵoj. Ligo de amikeco aŭ neceso de kunlaborado min pelis provi kredigi al li, ke la kulpo de la *al Germanujo supreniro kaj nia enbuŝiĝo al leono* estis tute al mi, estinte mi la verva politika cerbo de la novica grupo kaj la persona plej fidoĝuanta ĉe la superuloj. Li estis kaptita unuflanke de la deziro elmontriĝi neatendite antaŭ siaj parencoj kaj aliflanke de la timo, nun aperte riveliĝanta, ke male tiuj ĉi povis esti jam eskapigitaj el sia vilaĝo. Pri tiaj kazoj, tio estas pri vilaĝoj komplete forlasitaj de la loĝantaro por sin savi el reprezalio de la okupantoj kun faŝistoj aŭ je ties komisio, pliinformiĝos mia scivolemo laŭ la vojo en la direkto al Ĝemona.

Ni marŝadis tra kampaj stratetoj, ĉiam pretaj forgliti en la mezon de la maizkanaj vicoj jam senspadikitaj aŭ ĵeti sur niajn ŝultrojn la franciskanan robon. Ne necesis, ĉar ni vidis nur la spurojn de kozakaj vaĉejoj, tie kie iliaj ĉevaloj, eble dresitaj por ne heni, malkreskigis sian malsaton vorante grapolojn kun vitfrondoj, aŭ defore kozakojn mem senpermese rikoltantaj spadikojn por si kaj siaj familioj. Ili prenis kun mastra memfido ĉar la germanoj, prave laŭ ili, legitimis ilin alproprigi je ĉio videbla. La loĝantaj familioj senpercepte observis kun jam vanigita la kapablo indigni: *sufiĉus, ke ni eskapu el iliaj manoj,* rezignacie diradis homoj bonfarantaj kaj nin konsilantaj aŭ pormomente nin liberigantaj je niaj jam ne plu leĝeraj tornistroj minacantaj plipezigi pro pluvgutoj apenaŭ tamen alarmantaj ĉar la sunaj radioj eksukcesis dispremi la nubojn.

Nur unufojon, preterpase notatu, ni blokis niajn movojn kaj kaŝite atendis spirretene, iom engrimpante terenon kovritan per fojnaj forĵetaĵoj, la preterpasadon de ĉirkaŭ dek fusilŝultraj kozakaj kavalerianoj, el kies vicoj aŭdeblis pafbruoj: pasante sur ŝtonpremita strato: ili rajdadis, duvice trotantaj, sekure kaj jubile kvazaŭ irantaj al festo. Kial havi tioman timon ĉe tiuj preterirantaj homoj? Ni tamen nur kiam certis pri la kunteniĝo de ĉiuj miaj membroj, leviĝis por repreni la marŝadon.

La vetero profiliĝas ĝenerale seka, kaj milda, supozeble laŭ la komuna deziro: nia atentokapablo tamen jam tute disipis la spiritstaton taŭgan al konsidero aŭ ĝuado pri tiu beleco: nur poste, dum refreŝiĝo de rememoraĵoj, mi revivigis belaĵojn kaj perceptitaĵojn tiam apenaŭ konsciiĝintajn. La familioj, nin vidante, rigardadis la strangulojn antaŭe kun suspekto poste kun respekto, aparte kiam la unuaj okuloj nin gapantaj estis tiuj de infanoj aŭ de junulinoj. Tiuj lastaj devis antaŭe certigi sin, ke ni ne estas kozakoj, tiujn semajnojn, eble pro manko de soldatmanĝaĵoj, pli rabantaj ol ordinare kaj samtempe ĉasantaj eĉ de virinoj trovitaj, hejme kaj forhejme, solaj. Denuncon kaj sinturnon al la germana roto, oni informis, malebligas la distanco kaj eble ĝia senpova kontrolo pro malabundo da personaro.

La kvaran vesperon ni etapis ĉe paroĥestro de Magredis. Tre facilis por li certigi nian realan devenon kaj superi siajn ekajn perpleksojn: niaj respondoj kongruis kun liaj pasintaj spertoj pri seminaria vivo. Li protestis, arde protestis kontraŭ la superuloj kiuj allasintus nin al nia malprudenta kaj sensperta sorto, *escepte, ke vi misinterpretus kaj profitus por viziti parencojn*, li ne amuze plurfoje enŝteliĝis. Scivoleme sed komplezeme okulumante al mia amiko, mi lin komprenigis, ke mi fine akceptas gaje pluiri laŭ liaj eventualaj sekretaj intencoj!

Post la kamaradeca vespermanĝo, lin sekvante ni trenis nian lacecon al la iom malapuda preĝejo kaj preĝis la rozarion "*ĉar*, li admonis, *al vi oni sciigis, ke nepras, ke Dio ĉeestu al nia spirito kaj nur la preĝo vigligas la vokiĝon… pli ĝuste la vokadon de Dio*".

La postan matenon, ripozitajn kaj sufiĉe alertitajn, nin preskaŭ senpiece enkurigis en la direkton de la riverbordo de Tagliamento, du viroj, eble sesdekjaraĝaj, ekstravagancaj tipuloj de tempo al tempo trinketantaj gutojn de likvoro: ili lasis fali ponombre parfumitajn gutojn sur sia elbuŝigita lingvo, kvazaŭ ili prizorgus sian sanon per tia kuracilo. Demandite kiun malsanon ili trasuferas, la respondo ŝercis, ke temas pri ĉionkuracanta neŝparenda vinbrando "*kiu igas nin pli kapablaj snufi la aeron",* aludaĵo al danĝeraj renkontoj; tamen

ili antaŭ la adiaŭo permesis, eĉ ĝentile devigis, al ni po unu glutegon, ne pure simbolan, da preskaŭ pura alkoholo, certe kontrabande distilita kaj tial tro haŭtraspa pro manko de purigado, aromatizita per nekonataj herbaj sukoj: ardis akre la lango, sed la kapo ne kirliĝis kaj la kruroj bonŝance ne ŝanceliĝis. Se licas momenta pensvagado, oni ne ignoru, ke tiuregionaj loĝantoj fieras je sia elteno pri fortaj likvoroj kaj facile engaĝiĝas montri tian sian, ne tute malvirtan, kutimon *precipe en tiuj aĉaj vivsituacioj bezonantaj kuraĝiĝon.*

Ni pasigis ankoraŭ unu nokton ĉe iliaj parencoj, kiuj insiste proponis, ke ni aliru rekte al la nefora konvento de Ĝemona, kion ni repuŝis konvinkite, ke ni estas serĉataj de milita polico kaj "*pro tio ke tiel*, suplementis, ne sen mia miro, mia amiko, *fuŝiĝus tuta nia plano*", nome vizito al liaj parencoj. Tie ĉi ĉiukaze plikreskis niaj timoj. Vilaĝanoj avertis nin kontraŭ kromaj riskoj: se mia amiko naskiĝis civitano de Karnio, do li estas iamaniere germana civitano ĉar tiun Friulan zonon jam la Tria Regno aneksis al la germanaj teritorioj. De nun tiam ni devis ekdeflankiĝi ankaŭ kiam je horizonto prezentiĝas germanaj armeanoj kiuj ĝis nun timigis malpli ol la kozakaro kaj faŝistaro.

*"Vi entiriĝas en la kaĉon,* respekteme komentis kamparanoj iom mirigitaj je nia obstino*, irante al Karnio".* Kaĉo por manĝaĵo tuj vorebla kun ĝia tuta enteno, nome la du naivuloj!

Sekvamatene ni reprenis niajn tornistrojn kun pakaĵetoj kaj nian paŝadon. *La vadado okazos ĉe Rivoli di Osoppo,* komunikis la akompanantoj.

La du viroj, nin gvidantaj, fine almontris la riveran punkton niariske travadeblan.

La pontoj laŭ la loka riverkuro, certe patrolitaj de germanoj aŭ ties kolaborantoj, estis ofte aerbombitaj, kvankam tremalofte trafitaj; aparte tiu de Venzone, ĉiukaze haste funkciigita pere de antaŭpreparitaj lignaj ĉevronoj. Tiujn monatojn partizanaj grupoj aŭdacis ataki ie tie: lezojn al la milita malamiko ili kaŭzis minimumaj, male la reprezalio flanke de la okupantoj lasis malantaŭ si vilaĝojn bruligitajn: protektado por kvietuloj, "cindrigita tero" por partizanhelpantoj!. Iuj informoj elbuŝiĝis de la kamparanoj, kies ŝajnaj krudeco kaj ruzeco, en itallingvaĵo seka sed brilpreciza, estis pli aludataj ol priskribataj, eble pro nia persona neklara tuja karakteriziĝo.

Vadinte tra akvo tute, kiel timite, malvarma, kaj rapidiginte la paŝon sur ŝrumpintaj ŝtonetoj kaj sableroj intermiksitaj de molaĉaj herbaĵoj, laŭinstrue de la du akompanantoj, ni atingis la frontan riverbordon, kies rando perdiĝis, dekstre kaj maldekstre, tra herboj kaj arbustoj kaj marĉeroj. Plezurigite de la sukceso, plibone bonŝanco, kaj ripozante ĉe makisaj spuroj ne foraj de stratet-

kotaj limoj, mi aŭdis unuafoje mian amikon infane ekzaltiĝi, eble konvinkiĝintan, ke la plej peripetiplenan ni jam superis. Enmensiginte pliafoje la nomon de la vilaĝo kaj la nomon kun antaŭnomo kaj la kromnomo de parencoj de mia samsortulo, ĉar ignori la eblon, ke cirkonstancoj nin *dividus unu de la alia malprudentas*, mi provis fine dormeti sur sekaj folioj, amasigitaj perpiede kaj permane. Sed oni ne dormis ĉar tiam mia amiko preferis malstreĉiĝi babilante.

Mi bone memoras tiun dialogon ĉar mia amiko iom post iom delasis la singravigeman kaj investantan tonon kaj eniris en kvereleman staton, de mi en li pli frue ne suspektitan, kaj eltiris el sia konfuza armilaro malnovajn akraĵojn apogante siajn rezonadojn sur la plej longa historia kverelo inter la franciskanaj fratioj, kiu kostigis al la ordeno malunuecon, disdividojn, luktojn, malamikaĵojn, murdaĵojn, senfinajn reciprokajn fifamigojn ĉe la superaj ekleziaj instancoj. Li lasis elbuŝiĝi komplete ellaborita penso:

"*Mi scias jam kial ni renkontiĝas kun tiomaj malagrablaĵoj dum tiu nia senŝirma vagado".*

"Malagrablaĵoj kun aventurecaj malkovroj kaj kun riskoj rakontendaj ĉie. Diru la kialon, ke ni certe pli kapabliĝos ilin eltene superi kaj gaje marŝi al nia celo".

Li akre inter seriozaj asertoj:

*"Ni havas poŝe monon. Nia patro fondinto, sankta Francisko, malŝatis monon ĝis feki sur ĝin. Ni konfidas je mono: pli da mono en poŝo malpli da fido je Dio! Ju pli da mono en poŝo des malpli da dia protektado".*

"Ni da havas certe, sed ni elspezos ĝin nur se la servon bezonatan oni ne jam kutimas almoze donaci".

*"Tiun distingon ne venas de sankta Francisko. Ni remburas nian poŝon per mono kaj pro tio la Sinjoro forlasas nin al nia destino".*

"Ni akordiĝis kun niaj konventaj superuloj, kiuj akordas kun la ordenaj reguloj".

*"Al nenio utilas tiaj mistifikaj elpensaĵoj! Por ricevi nian memfidon ni nepre devas senkateniĝi el tiu mono!".*

Ni havis entute, en la froka poŝo de mia amiko, 160 paperajn lirojn egalajn, se la mona kvanto povus klarigi nian sintonion kun tiu kiun poeto Dante, tiel genie kiel unue, inspire kromnomigis "Damo Povreco (Purgatorio 11, 58)", tio estas Virino Seneco, al 20 kg. da anona pano (se tiam trovebla). Mia amiko, forskuante kotigitajn foliojn el ŝuoj. elpoŝigis la monujon kaj komencis furioze dispecigi la paperan monon. Mi kriis:

“Haltu, ne estas via, ĝin propietas la malriĉuloj, la donacintoj, al kiuj ĝi devas esti redonata se neelspezita”.

Mia amiko ŝajnis kvietiĝi kaj, surprize repacigita kun si mem, montris aprobon kaj spinis: *“Ĝuste kaj juste! Ni metos tiun monon en almozkeston en preĝejo... kvankam la mono el si mem simbolas danĝeran riĉecon kaj tial spitindan. Se ni tion ne faros, ni disveturos”.*

Jen Sankta Francisko bildigita ĉifoje malamiko de ĉiu riĉeco, eble de ĉiu komforto ĉar la vera kristano, kiel li estis, ne povus ol malŝati eĉ la simbolon de riĉeco: per tiu tezo, laŭ kiu monuzo ideniĝus kun monalligiteco, ordenaj franciskanaj reformistoj laŭvice atakis ordenon kaj civilan socion kaj eklezion kaj la plejreformistoj la moderajn reformistojn ktp. Nun eĉ mia amiko ajnisme suspiras, ke riĉeco ne kunfratigis fratulojn kaj homojn kaj pretas enŝovi, ke li malkovris la kaŭzon de ĉiuj konfliktoj!

Li reenpoŝigis ĉion kaj ni risortigis nin por repreni niajn pakaĵojn kaj ekpreterpasi arbaretojn kaj herbajn deklivetojn dum inter ni restis densa silento.

Nia vortinterbatalo daŭris, eble, unu horkvaronon.

Prudentis provi forreteni la kverelon tro komplike enmiksiĝantan, laŭŝajne, kun lia animstato. Verŝajne lia eksplodo estis momente retenita, aŭ ĉu pli ŝarĝita?, de la rimorso esti facilanime proponinta, dum la ĉiesa ekscitiĝo dum la forfuĝo el la pornovica konvento, sian landon kiel nian rifuĝejon. Sed same kiel la akvo, en konkitaj manoj, se blokita de unu interfingro fuĝas de la alia, tiel mia amiko remalfermis la buŝon por senkompate dehiskigi sian penson kaj fine lanĉi siajn akuzantajn opiniojn kontraŭ ekleziaj politikistoj kiuj celus nur siajn avantaĝojn preterlasante la sorton de la popoloj. Li ekspicis vortojn sence malligitajn inter si antaŭ ol li sukcesis elforĝi precizan propozicion. Jen:

*“La milito, eĉ tiu ĉi ĉion strasiganta milito, se kelkaj volus, tuj ĉesus. Se la papo volus* (ne longe antaŭ, en la unua deko de junio 1944, estis senbatale kaj konkere liberigita, de aliancanoj, Romo kaj oni ekkredis, ke konekse kun tio la papo havus pli da ebloj por pacigi la militantojn), *se iu volus! Ĉiuj tiuj ruinoj kaj mortigoj pezos ankaŭ sur lia konscienco. Agojn liajn malfavorintajn la militon oni ne konstatas...”.*

Kaj tie ĉi liaj vortoj, tra salivumaj spirellasoj, trajtiĝis eĉ plej skrapvunde ankaŭ por mi ĉar disopiniecon, malebligite paroli pro lia impeta vortofluo, mi ekesprimis precipe per gestoj. Fine mi provis:

“Kiu vin instruis pri tio? Aŭ ĉu vi memrezone konkludis? Eĉ la plej ŝtipkapa fanatika kontraŭpapa propagando ne aŭdacas disvastigi tiun urban fabelon”.

Mi min demandis dume kia nekonata, de mi aŭ eble ankaŭ de li, elreviga

timo senbridiĝas eksplodigante el lia eno tiajn reagojn. Plimalfrue mi kredos ke tio kuŝis en obskura kaj forta trasento kaj antaŭvido de granda malgajo. Kio deprimas mian amikon? Dume la diskutado pluiras:

*"Vidu, se la papo volus,* li ĵetis ekstremprove*, sufiĉus eĉ unu sola ekskomuniko. Kiom da fojoj la papoj per ekskomunikoj repacigis popolojn kaj izoligis krucmilite fifarantojn! Tro senpena limiĝi je preĝoj, je rozario por la paco. Ĉu li ne vidas mortigitojn, bombojn, plorojn kaj detruojn?".*

Kiel veras, ke mi kaj herolde mia amiko pri ekskomunikoj estis trakurantaj ankoraŭ malobjektivaĵojn traturnigitajn en nin de senkritikaj predikoj, kiuj ankoraŭ ne sin mezuris per la "historio-studoj" de la estontaj jaroj de la teologia kurikulo!

Obskure ekklariĝis, ke mia amiko bezonas akuzi kaj vorte investi ion ajn, kaj ke li per tia elverŝo ekvilibrigas sian enon, kaj tiam mi fariĝis aŭskultema kaj ne disdegnis paroligi lin, ne rezignante tamen al li argumentite kontraŭstari per dubigaj demandoj.

Dum mi provis delikate submini la enpensaĵojn de mia amiko, li daŭrigis ŝpini historiajn kazojn, nome Gregorio la 7a kun Enriko la 4a, Pio la 7a kun Napoleono ktp. Pri tiu lasta ekzemplo, ankaŭ mi antaŭnelonge estis aŭdinta el predikanto defendi la potencon de l' ekskomuniko *faliginta fusilojn* el manoj de la napoleonaj soldatoj en Rusujo, ĝuste kontraŭ la defio de Napoleono mem mokanta la papan ekskomunikon. Nun tiuspecaj frazoj elbuŝiĝis el mia amiko, kune kun nekontroleblaj salivaj ŝprucetoj, en groteska sensenco, tramiksitaj de balbutaj ŝuŝaĵoj ne min ridigantaj nur pro la seriozeco de la temo kaj psika memregomanko de mia amiko.

"Mi opinias tute malsame ol vi", mi seke ĵetis reprovante agi bufre, precipe pro timo ke trakamparaj oreloj interpretu fratulaj malamoj diskutajn disopini plandi tra kampoj ojn. "Vi havas nek pruvojn nek validajn studo-ekspertizojn, vi havas nur psikajn, eble el laciĝo, ekscitegojn. Kial, kio okazas en vi?".

Mi engaĝiĝis advokati al la papo, kvankam preterportata nur de mia pieco kaj fido je la honesteco de religiaj regantoj. Mia amiko, tamen, ne avaris pluteni sian opiniaron. Pri tiu diskuto mi en estonteco ekmemorigos kiam oni bezonos kuraccele informi pri liaj ekscentraĵoj kaj memregoperdoj. Se mi tiam opiniis alfronti homon tro ekscitita pro laciĝo, plimalfrue mi taksos homon senpsikekvilibra.

En la soleco de la kamparo, fine la vortoj sobriĝis, la pensoj reordiĝis, la insista puŝo al reagoj ekis kvietiĝi. Ne tute, tamen, ĉar, se taksi la kvanton da variado de niaj sentoj, observanto dirus, ke ili pasadis de kvazaŭletargio al

kvazaŭekzaltiĝo, kun bona plejparto de ĉi lasta ĉar ĉe nova obstaklo reiris al la buŝo aludoj al antaŭaj mordemaj frazoj.

Ni ne perceptis, ke la diskutado, jam drivanta de unu al la alia, estis malpliiganta niajn singardojn kaj malŝirmiĝanta kontraŭ malprudentaĵoj; ni pri tio konsciiĝis ekvidante, ke iuj gekamparanoj estis surprizite nin gapantaj elmeze de apudvoja herbejo dum iom pli fore aliaj rikoltadis, ilin deigante de la maizkanoj kun nekadencaj kaj varie intensaj klaketoj, spadikojn, kaj aliaj malantaŭe meze de kampo trانĉadis la ĵus senfruktigitajn kanojn. Estis, certe, la lastaj gestoj de malapogeanta rikoltsezono, kiel poste ili konfidis, kaj por tiu peno idealis la vetero.

Estu kiel estu, naskiĝis tuj konversacio kun la kamparanoj kiuj, el surpriziĝoj al surprizigoj, informis nin kiavoje, kiasingarde, kiahelpiĝe ni povos procedi por dudek kvin/tridek kilometroj. Ni informiĝis ankaŭ pri ĵusdataj eventoj: iu vilaĝo antaŭnelonge fariĝis militejo: kozakoj pafis kaj, reage al kontraŭpafoj, bruligis vilaĝon, kies loĝantoj estis deportitaj kiu scias kien. La noticoj faladis sur mian amikon kiel ŝtonoj: la vilaĝo bruligita kaj pirate disrabita najbaras la lian malpli ol du kilometrojn. Eble pro tio ekde pli ol unu monato li ne informiĝis per poŝtaĵoj pri siaj familianoj, kiuj ne prezentiĝis eĉ okaze de la ankoraŭ ĵuse celebritaj votpromesoj. Mi, kvankam obskure, ekkredis, ke la ĵusaj kondutaj kaj vortaj strangaĵoj de mia amiko devenus ankaŭ el liaj obskuraj antaŭsentoj, kiuj tamen nun alproksimiĝas al antaŭvidoj, kvankam sencertaj bazoj, bedaŭrinde plifortiĝontaj laŭlonge de la alproksimiga marŝo.

Kamparanoj invitis nin restadi dumnokte ĉe ili. Sed ni, ĝentile rezigninte, preterpasis ilian najbaran vilaĝeton kaj reprenis, kvankam mankis nur kelketo da horo al la sunsubiro, plandi tra kampoj, ĉiam paŝante tra iom foraj duonkotaj stratetaĉoj, ankoraŭ kvin kilometrojn sen renkonti vivan animon. Ankaŭ mia amiko moderigis sian malprudentigan haston por ke, laŭ la kamparanaj avertoj, ni ne falu en la brakojn de kozakoj stratkroĉiĝe patrolantaj kaj *ĉie kvaropirantaj*. Post kvinkilometra penega iraĉado sub restaĵoj de ĵus sinkinta suno, la jam densiĝinta krepusko nin decidigis rifuĝi en duonŝedon, parte okupitan de ruraj iloj, triflanke brikŝirmitan, kun la kvara nur araneaĵoj inter malmulte da palisetoj vertikale apogitaj sub la unuklina tegmento ekglitanta eksteren kaj ruiniĝeme falanta interne, sed tio trabrilis al niaj okuloj nur la sekvan matenon nin feliĉigante pro la apenaŭ evitita “entombigo”.

Por nin nutri la restaĵoj de la bonkoraj paroĥestraj provizoj sufiĉis, kaj ni dormis kovritaj de nia froko kaj de jam amasigitaj sekaj folioj kaj fojnaĵoj, manpremitaj ĉiuflanke kaj ŝrikantaj je ĉiu nia movo, kaj por kuŝejoj fasko da sekaj

frondoj. Komforte kaj distraĵe min ekblovis, el mia memoro tiam ne facile forgesanta legaĵojn kaj librojn, la originala alegorio de franca romanisto Albert Camus, laŭ kiu eĉ *homo enprizonigita en arba kavo konservas liberon kaj ĝojas se li restas deziropova revidi la flugon de hirundoj vespere*. Sed tiuj imago-rememoroj ekblinkis fronte al aliaj pli urĝaj dum surŝutiĝa dormo invadis min ĝuste perceptantan, ke ekstere ventetblovoj estas susurigantaj falantajn aŭ sekajn foliojn kaj foje movetantaj tiujn min kovrantajn.

Kiam ni vekiĝis, aŭroriĝo jam krepuskiĝis kaj la mondo sin ofertis bela, ridanta, freŝa, inda je la tradicia fieriga franciskana poeziarto, kun ĝoja kaj plursona kvivitado de paseroj kaj pepado de alispecaj birdoj. Skuiĝante el la dormo ni skuiĝis eĉ el la folioj inter kiuj ne mankis insektetoj, kiuj komprenigis kial ni insiste devis nin grati.

Ni silente reprenis nian marŝadon tra deklivoj kun montetoj ĉe nia maldekstra flanko kaj, kvankam foraj, altaj montoj, plifore fariĝantaj alpoj. Mia amiko miris, ne pro ilia beleco, sed pro tio ke li trovis la lokojn de sia knabaĝo novaj kvazaŭ se li ilin neniam vidintus. Veras, ke li forlasis la regioneton ses jarojn antaŭe, kiam ne interesis konservi en imagokesto ĝiajn konturojn kreditajn neforgeseblaj kaj ne indaj je tioma admiro, sed nun tia malmemoro igis lin pli necerta kaj timema.

Tiu naturo, dolĉe sensurpriza, krepuske apenaŭ dekadenca, preskaŭ estiganta ĉion senaspekta kaj senanima krom la jam disperdiĝintaj birdaj kantoj, ekscitis en mi sensivan senteblecon al kiu tamen la nefavoraj cirkonstancoj ne permesis superi la supraĵon de la amino.

La matena suno jam altis kiam ni, ekvizititaj de malsato, decidis aventuriĝi en korton plenplenan je rikoltaĵoj pendigitaj laŭ la eksteraj hejmaj kaj stalaj muroj. “Almenaŭ panikojn kaj kukurbojn ĉi tie ni trovos”, ni pensis; *“aŭ oni sekigos nin kun ili surmurpariete“.*

Ni devis krii por signali nian ĉeeston. Post la kutima ekmalfido, la fido ĉirkaŭirigis al ni simpation kaj kompaton kiuj baldaŭ fariĝis helpo, manĝaĵo kaj konsiloj kaj informoj dum infanoj premiĝis ĉirkaŭ ni. Ni manĝis, dankis, promesis memorigi ĉe la Sinjoro ilian bonfaraĵon, kaj, antaŭenpelite de la angoraj duboj de mia amiko pri kiuj la konturoj pli kaj pli netiĝis, ni gajnis ok kilometrojn antaŭ ol decidi apudiĝi al homoj en la placo de eta vilaĝo. Kelkaj virinoj, patrinoj aŭ edzinoj, senorname beligitaj de ilia ardsenta bezono havi informojn pri siaj viroj ne ankoraŭ revenintaj el diversaj ŝrumpintaj militaj frontoj malorde forlasitaj de la italaj armeoj, nin petis kaj repetis, kvazaŭ necesus eltordi el ni sekretaĵojn, pri kia fronto, pri kia bataliono, pri kia trairo, pri kiaj

gentoj, pri kiaj fontoj de niaj lastaj informoj pri militaj frontoj. Kiajn neeviteblajn suferojn ni kaŭzas rivelante al ili nian malpli tragikan historion, niajn ordinaraĵojn vidalvide al ilia angoro! Al ni ŝajnis, ke ni estis greftantaj pluajn angorojn sur iliaj angoroj. Egoisme kaj iluzie, mi tiam intense revis min validigi paliativa plifeliĉigisto, arto kiun ĝis tiam mi taksis malrespektinda disiriĝo el la realo, kvankam uzata de pastroj kaj nobligita de la humanecaj intencoj: fakte mi iam klopodis postspuri vortojn kaj komunajn konitaĵojn bonportantajn al iliaj esprimoj mankantaj je sufiĉa fundamento. Pli poste, solecaj, ni komentis, nur por distri nin el nia penado, troevidentaĵon, nome ke niaj suferoj paliĝas antaŭ aliulaj suferoj. Kaj se ni akceptus niajn penojn ankaŭ kiel penitencon pro niaj kaj komunaj pekoj? Tamen ni kun tiuj virinoj timis uzi tiun sugeston: ni preferis paroli pri la mistera, sed sendubebla amo de Dio al ni malgraŭ manko de konstato.

Reprenante nian paŝadon, ni pormomente estis puŝataj rimarki, ke maldekstre plialtaj montetoj arbvestitaj etendiĝas tra malabruptaj deklivoj dum la suno malaperadis forĵetante striojn malpure ruĝajn. La loka naturo kaj panoramo estis tiel belaj kaj allogaj, ke ŝajnis kunstari senkontraste en nia animo kvankam enpuŝita tra laciga kaj sennecesa aventuro. Nebrideble, fakte, alternis sento de senutileco de nia aventuro, iom min ekagacanta, kaj momentoj de allogiĝo en la kontemplado.

Ni deziregis renkonti homojn; sed for de la stratoj, foje laŭiritaj de militecaj konvojoj; homojn ni ne vidis kaj kiam bruo suspektigas niajn orelojn, la unua baraĵo aŭ fosaĵo kaŝis la du malaŭte kaj stumpe konversaciantojn; foje ĉevalblekado kun hufbatadoj aŭ similaĵoj nin avertiga pri kozakoj malaperantaj en terenmalaltaĵoj kaj reaperantoj en strataltaĵoj: foje vidiĝis nenio aŭ nur kamparanoj rehejmiĝantaj aŭ rabotantaj aŭ atentgvatantaj la kozakajn marŝadojn. Unu domaron ni diste preterpasas, alian apude transigas, trian konfide tanĝas: ni ŝanĝis kaj reŝanĝis kaj fine adulteriĝis la kriterioj de unulinia konduto. Ĉe la vespera ekkrepuskiĝo ni kompatis nin kaj pafis: *ni iru tiun ĉi vilaĝon por ripozi kaj vivigi niajn esperojn! Kiu povas aserti, ke en ĉiuj vilaĝoj vaĉas kozakoj? Eble kozakoj nin festos. Risku ni kion ajn!*

Lace trenante la piedojn kaj kun la tornistroj jam deŝultritaj ni ekiris en la direkton de la sonorilturo. La vilaĝo nomiĝis Cavazza Carnico (Kavaca Kàrniko). Scivolemaj vilaĝanoj nin kondukis al la paroĥestra domo; sed la paroĥestro forestis; la sakristiano provizis nin je nutraĵoj kaj disponigis por ĉambreto. Sed li senvole pafis nian restantan trankvilecon kiam, demandite de mia kunulo pri aferoj de sia patra vilaĝo, lin informis tragikaforme, kvankam laŭ-

vere: mia amiko ekploris kaj insiste provis altrudi, ke la eventualaj proponitaj akompanaj helpuloj por la posta tago tuj nin akompanu senprokraste, eĉ piede kaj senbagaĝe. Nur malfrue li sukcesis ekdormi, kaj bonŝance la dormo lin kaptis ĝis en la pleno de la posta tago: la antaŭa plorkrizo lin tiom lacigis!

Ni akceptis preskaŭ nenion de la malavareco de vilaĝanoj, ne eĉ konsilojn kaj forveturis piede, kaj sole, ĉar trakampare ne eblis sin movi ĉare dum trastrate la proponitaj kondukantoj ektimiĝis pri reago de kozakoj aŭ aliaj kolaborantoj pro la ne klara leĝa pozicio de la du *forkurantoj,* kies referaĵoj eble ekriveliĝis neklaritaj kaj miksitaj kun ne tute kompreneblaj malprudentaĵoj. Ĉe vesperiĝo ni eksurpaŝis la ebenaĵajn limojn de la sopirate feliĉiga, sed nun ne pli tia, regno de mia amiko.

Ankoraŭ unu streĉo kaj fine ni ektretas la kamparon ĉirkaŭantan nian celatan lokon. Ĉu ni finiĝas barakti kun la akvo ĉe la gorĝo? Jen do la vilaĝo de mia amiko, etendiĝanta antaŭ foraj montoj kaj malantaŭ fora rivero. Vere ĝin travidis nur mia amiko; miaj okuloj, male, respektis la kondiĉojn de la jam falanta mallumo.

Konsilite de diversaj personoj, ni ne ingiĝis en ĝin.

Jam pri ĉio informitaj, de loĝantoj de la najbaraj vilaĝoj, ni nun scipovas la okazintaĵojn: iuj de tiu vilaĝa landeto kolabore helpis kaj gastigis partizanojn, kiuj, kiel ajn ĉirkaŭite per faŝistoj kun kozakoj kaj germanaj armeanoj, rezistis per okazaj armiloj. La popolanoj, subite atakite, kuraĝis reagi ne nur per fuĝo laŭ la vilaĝaj disbranĉantaj stratetoj. La kontraŭe reagantoj, sange permilititaj, venĝon provokis kun jenaj sekvaĵoj: iuj partizanoj enprizonigitaj kaj deportitaj eble al Germanujo, iuj popolanoj vunditaj, la vilaĝanoj forfuĝigintaj, la vilaĝo duonbruligita. Tiun ĉi nun vaĉe enloĝas kozakoj kun siaj familioj. Por ĝin eniri oni riskas grave: kozakoj por kreskigi pri si estimon ĉe germanoj, ŝajnigas esti kaptintaj ribelulojn kiam, male, kaptas nursole missortulojn. Malfacilas, sekve, por komunaj civitanoj pruvi la veron.

Bone konsilite, ni reĵetis niajn jam pli trenitajn ol portatajn pakaĵojn ĉe familio, kaj en malhela vespero pluirante laŭ tre deviaj vojoj surpaŝe de akompananto, tra rojetoj kaj laŭ malĉefaj padoj spaliritaj de raraj arboj kaj saltante limsignajn barilojn, post unu horo kaj duono ni venis ĉe la rifuĝejon de la familio de mia amiko: malmultaj, eble blankaj, dometoj apenaŭ leviĝantaj desurtere, senlumaj ene kaj ekstere, el kiuj elmontriĝis fantomaj personoj. La voĉo kaj la alvokoj de la akompananto vekis kaj altiris la tutan vilaĝanaron: fulme, la gepatroj de mia amiko sin ĵetis sur lin brake, kise, parole. Kiam la familianoj nete distingis min de la figuro de la akompananto, ilia lingvaĵo italiĝis. La amasiĝoj

de salutoj kaj brakumoj kaj miresprimoj, kie ĝojo kaj tristo faris iom komikan patoson, fine kvietiĝis kaj estis eble, sub eta petrola lustro vidi kiom niaj vizaĝoj estas fizike streĉitaj kaj, precipe, figure senpsikaj: tion komprenis la patrino kiu ekpenis aranĝi por ke ni ion manĝu kaj tuj ekripozu.

Kondukite en ĉambron feble prilumatan per preskaŭ forbrulanta meĉo de duonkandelo pro manko de petrolo, dum nia akompananto forpermesiĝis, mi pli akre ekperceptis, ke mi fariĝis gasto de elhejmlandigitoj, sed la emocioj ekstumpigis tiom rapide la stumpitajn rakontojn, ke mi komencis min spekti, antaŭe per fantazio tuj poste per reala ekkolapso, sternita sur la brika benko apenaŭ de ĝi iom levita pere de subtila matraceto, lasinta fine min fordoni al dormo ene de miaj gluecaj vestoj. En la sama ĉambro, fine, ni kaj du aliaj viroj, kuŝis sammaniere kaj senmove. La sekvan matenon mi min trovis antaŭ vandaj ŝranketoj plenaj je pendantaj prenpretaj uzoobjektoj, manĝilaro, tranĉiloj, kestetoj, teleroj, ne rimarkitaj la antaŭan vesperon dum la sobra kaj nemultegusta manĝo surbaze de lakto kun griza-brana pano kaj revarmigita polento. Nun sur la ĉemura breto vaporfumetis du bovloj plenaj je blanka lakto: kaprina lakto, poste estis precizigite, *"ĉar bovinoj estis delonge ĉiuj rekviciitaj de la armeo aŭ irigitaj for de la okuloj"*. Ilin vidi kaj trinki estis preskaŭ unubato por mi kaj mia fine serenigita amiko, kies konversacio nun ekliberiĝas el distordiĝantaj emocioj dum li ne ĉesas pardonpeti de mi pro la neantaŭviditaj malagrablaĵoj.

Mi klare distilis, ke parencoj kaj gastantoj timis pri nia libero pro la kapilara kaj senelasta kontrolo fare de kozakoj, ke ili ĉiutage atendis novaĵojn pri la aliaj du filoj kiuj de dekkvar monatoj silentas el ŝrumpintaj militfrontoj, ke la bebo lulita de juna virino, fratino de mia amiko, estas filo ŝia kaj ankaŭ de ŝia fianĉo kiun ŝi atendas, ĉiubrue korpulse, de fora nekonata militzono; ke baldaŭ niaj tornistroj atingos nin; ke dume pri nia ĉeesto informiĝos la loka paroĥestro, jam la vera aŭskultata aŭtoritato dum la civilestroj devas kunlabori, kaj foje kolabori, kun la okupantoj; ke ĉiuj viglos por ke ni nutriĝu kaj noktumu sekure. La postan tagon preciziĝis informo pri la sorto de la paroĥestro de la duonbruligita vilaĝo: post striktega pridemandado kaj translokiĝo de unu kazerno al la alia, oni lin ellasis, devigatan tamen sin prezenti al la najbara ĝendarmejo ĉiudutage; sed nun neniu scias ĉu li estas forfuĝinto aŭ forfuĝigito.

La sekvanta mateno kunportis dimanĉon senvivan kaj eble senfestan: ni, post la aliaj, treniĝis al la preĝejo iom malproksima, kvankam nia paŝado dolorigis piedojn kaj krurojn kaj koksojn. Meze de la popolanoj kaj protektataj de la frokaj vestoj, eble ni aperis al kozakoj kiel pastroj dispensitaj el militser-

vo malgraŭ nia juna aĝo. La familianoj de mia amiko deziris konsiliĝi kun la loka paroĥestro pri tiaj aferoj, kaj krome por serĉi por la du franciskanoj pli dignan enloĝadon, eble ĉe la paroĥestro mem. Nenio timenda, kuraĝigis popolanoj, antaŭ la dimanĉaj irreirantoj de la preĝejo ĉar kozakoj preskaŭ pli pro superstiĉo ol pro provosa tasko respektas la devotecan ceremonion kaj ĝiajn partoprenantojn.

Dumpreĝe kaj poste antaŭ la preĝejo miaj okuloj daŭrigis subrigardi miajn gastigantojn, kontentajn en iliaj vestoj el velkinta nigro kun truetoj apenaŭ kamuflitaj, parolantajn kvazaŭ statue. Min ekinvadis kompato kaj simpatio al ili kaj riproĉo pro mia peza plonĝado sur ilin.

Mi havis dum la tuta mateno pluajn konsciiĝojn, ke ni erare interpretis la ekajn agitigajn okazaĵojn fipremantajn por ke ni foriĝu el la konvento, kaj ke, plierare, ni elektis tiun ĉi rifuĝejon. Eble ni devintus, dum la alproksimiga marŝado, kontakti la fratularon de la konvento de Ĝemona el kiu ni, male, malprudente deflankiĝis. Tiuj riproĉaj sentoj duobliĝis kiam la paroĥestro, aŭdinte pri la aventuroj kaj ties plej danĝeraj riskoj, silentis manenkape en la ĝenerala silento kaj, post nelonge, preskaŭ medite kun la okuloj pavimen juĝis: *"Se iam hazarde vi emis al aventuro, nun en ĝin la fuĝo trempas vin tute viariske; krome se la aferoj plonĝas sur nin tiaj, la paroĥejaj lokaloj porokaze fariĝas la ejo malplej sekura por vi kaj samtempe la plej riskoplena por la vilaĝanoj. Kaj se la aferoj tias, kion mi faru?".*

Ni ĉiuj estis forpermesitaj de la paroĥestro kun la promeso, ke mem venos ĉe nin posttagmeze, kiam li liberiĝos el la taskoj de la devotecaj diservoj kaj instruado pri katekismo al la popolanoj. Antaŭ ol elgrupiĝi li nin invitis, iom kaŝante la tre rivelan ektimon de sia vizaĝo kaj eble por liveri ĉirkaŭen aspektan normalecon, sentime spekti la heraldikajn enskribaĵojn sur la preĝeja kaj urbestreja fasadoj, plurcentjaraj: temis pri blazonŝildoj, iom tempe kaj vetere ronĝitaj kaj ferrustigitaj, kun engravuritaj nomoj de iamaj regantaj sinjoroj, tiukaze de la Patriarko de Aquileia (Akvileja, historia urbo en la direkto de Triesto, iam romia marhaveno) kiu feŭde regis kelkatempe ĉi tie: la siglozaj skribstiloj dolorigis nian kapon. Sen ke ili povus sciigi pli rilate sian historion, la paroĥanoj orgojligitaj de nia scivolemo, rigardadis dezirante, eble, aldoni kaj aŭdi eksplikojn pri la surmuraj "survandaĵoj". La cirkonstancoj permesis nur intuicii kian riĉecon de emociigaj kaj informigaj historiaĵoj ni apenaŭ ekĝuas kaj pro timo preterlasas. Nemalproksime, sed respekteme, staris kozakaj gvataj sentineloj, promenantaj irrevene sur la placo: ankaŭ pro ili, eksterpatrujaj kaj eble kun trista destino, la popolo havis kompatsentojn kaj kortuŝe

parolis pri ili kaj, per gesto-vortoj de intuicia komunikado, kun ili.

La paroĥestro venis, fakte, al la domo de la gastigantoj de niaj gastigantoj, sed nur por diri ke li revenos la postan tagon.

Sed la necertecoj kaj la komplikaĵoj fariĝis eĉ komikaj, se ridi pri tio. Okazis, ke la paroĥestro, la posttagon frumatene, nesenruze, sukcesis sin plidokumenti, per diversaj sukcesaj telefonvokoj, pri miaj personaj anagrafaj kaj religiulstataj datenoj. Posttagmeze, al li hazarde prosperis telefone kontakti ankaŭ la fratularon de la konvento de Ĝemona, kie laŭ siaj priscioj nun loĝas grandnombra studentaro pri filozofio kaj teologio de sama ordeno de la du fuĝantoj fuĝigitaj. Tio facile konstateblis, pruvo estas, ke intertempe, kiel ni scios pliposte, la tuta anaro de la studentejo ĉe la noviceja konvento estis evakuinta la lokon por pli sekura kaŝloko en Ĝemona! *"En la letargia starejo de urso, esperante, ke ĝi ne vekiĝu!",* remetis kun ironimiena spriteco la paroĥestro.

*Kial tiuj ĉi du ne troviĝas kun ili?* Li telefone insistis, do, petante paroli pri ni du; sed la respondvoĉo, post iometa trafoliuma serĉado, fuŝparole respondis, ke tiuj du nomoj ne troviĝas en lia listo, ĉeestis male nur kvindeko da ĵusvenintaj diversklasaj klerikoj, sed ne tiuj ĉi du. La paroĥestro provis tiam paroli kun la superulo aŭ alia respondeculo pliinformita, kiuj bedaŭrinde forhejmis predikadcele. Sume, ni unuakonstate ne ekzistis: tamen mia amiko estas tie ĉi subokule kaj konvinkige konata!

Li kune kun ni, en la provo ordigi la pensojn, ekpensis pri poŝtmalfruo, rilate la sorton de niaj atestiloj liberigantaj de militservo, okaziginta malordiĝon de la informoj el la novicejo al Ĝemona. Oni konjektis ankaŭ pri subtavola perforto de militestroj de Vicenza kiuj sendistinge, pro erara interpreto de la "bando" (militestra amasrekrutada proklamo) minacis punojn eĉ al civitanoj jam liberigitaj el devo soldatservi aŭ apenaŭ suspektataj pri kolaborado kun partizanoj, aŭ eble pro tieaj stultaj, far plej altaj oficiroj, reagoj al la dizertema kaj delasema etoso tiam ekscesa kiel neniam antaŭe en tiu kazerno. Vere ni nun memoras, ke semajnon antaŭe vizitis la novicejan konventon *respubliketa* oficiro decide kaj aŭtoritatece proponante, ke ni armeaniĝu volontule en la respubliketa armeo. Alia hipotezo, pli probabla, konjektigas, ke la konventaj ŝarĝitoj tro malfrue aŭ malzorge komencigis la aktaron por la porĉiama (tiu provizora jam ĉesis validi) liberiĝo de militservo aŭ ke la nervozeco de la momento malfruigis la ĝustan komprenon kaj la oportunan defendan strategion. *La cerbo ne ĉiam strategias por si*, detene eksplodis la paroĥestro. Cerbo de kiu?

Dume, dum la unuaj sinsekvaj longaj kaj enuigaj tagoj, ni provis almenaŭ distriĝi per infanecaj ludoj kun vilaĝanoj aŭ ludkarte vespere kun maljunuloj

sub pala kandela lumo. Sed baldaŭ prudento konsilis, ke ni du alproksimiĝu nur asimptote (vortoj de niaj geometriaj studoj ekuziĝis por distri de la fiksaj pensoj!). Tiukaze por signifi "resti for" de la vilaĝo.

Kio ajn estu, la paroĥestro dancis provante iri persone, buse, al Ĝemona por persone kontakti la konventestrojn. Dume ni atendu kaj preĝu kaj kaŝiĝu, precipe por ke ne estu damaĝata la travivaĵo de tiuj plurvilaĝetaj lokaj *bonemuloj*. De sia vilaĝo, la postan matenon, li surkaleŝiĝis en la direkton de la busstacidomo de Oncédis, mi kredas, kiun li trovis, kiel jam suspektite, maltaŭgigita al servo ĉar la stratojn interrompis tie kaj tie la *ofta nokta aviadila* bombado de la antaŭa monato *tute suno kaj luno, do altira por avioj*. Tiam li revenis decidinte sendi urĝan leteron al la konvento ĝin mane liverigante pere de kuriero, viro kvindekjara senlace dediĉata je servo de la bezonoj de la paroĥo. En la letero estis rakontate pri ni, jam laŭ la ŝtata leĝo ordenanoj, do jam laŭleĝe ĝuantoj, se ĉio korespondas al la vero, de soldatserva liberiĝo, tamen forfuĝigintaj pro minacata neklarigebla rekrutado. *Ĉu ilin atendas la fratio? Ĉu ili povas vojaĝi sen kromaj riskoj ĝis la konvento? Ĉe kiu naskiĝis tia konfuzaĵo? Ĉiel ajn, kiasence vi bezonas nian helpon? Kaj kio intertempe farenda sendanĝere, ankaŭ al ni kaj precipe al la popolo?*

Inter linioj oni povis trapercepti ion riproĉan pri tiu nekomprenebla akumulo de malprudentaj decidoj fare de multaj.

Atendantajn solvon, kaj ĉiam pli konvinkiĝintajn, ke ni du agis malprudente elektante forgliton al parencaro tiom kontrolita de germanaj kaj faŝistaj kaj kozakaj armeanoj pro nesporada partizana militagado, nin, almenaŭ min, agaciĝe invadis kulposento pro la loĝa kaj nutraĵa pezo ŝarĝita sur la ŝultrojn de familioj jam tiom elprovitaj de malfeliĉo, kaj pro honto de stulta konduto. Sed oni kutimiĝas al ĉio, tial eĉ tiu ĝeno droniĝis en enuo dum ekkolero kontraŭ mia netaŭgeco antaŭvidi eventojn jam okazantajn absorbiĝis en pli urĝaj bezonaĵoj.

Oni nin konsilis, sed duonembarasitaj insistoj de la paroĥestro igis la konsilojn ordonoj, resti kaŝitaj iom ekstere de la vilaĝo por ne suspektigi kozakojn je io kolaboreca kun partizanoj, okaze de kontrolo ĉiam minace svebanta.

Ni pasigis tagojn trakampare, kaj, rekonsciiĝinte pri la religiulecaj devotaĵoj, ni alternvoĉe brevieris subarbare. Laŭtvoĉe, sed ne tro, ni kantetis aŭ babilis pri la taŭgeco de psalmaroj disradii, el nia animo, religian spiritualecon se rilatigitaj al nia situacio aŭ al la ĉirkaŭa kamparo. Sukcesis ankaŭ al ni la ludo kutima ĉe fratuloj, tiu ĉi: ke la naturbeloj ekscitu la admiron kaj inklinon al la belo kaj grandiozo de Dio. Tio allogas tre franciskane, nome la naturaj

belaĵoj kaj ŝanĝiĝoj, eĉ incidentoj kaj akcidentoj, fariĝas ŝtuparo al Dio dum ĉiu el ili manifestas ion de Li sen ia ajn miksiĝo kun Li *(Ŝtuparo al Li, ne io de Li,* estis preskaŭa slogano kontraŭ alloga pandiigo) sed mia sento estis pli ekzerco de bona volo ol spontana absorbiĝo: naturo por mi ankoraŭ ne sin levis al sanktaĵo kaj restis knedita nur je materiaĵoj malgraŭ iliaj mirigoj.

Bela certe la kamparo, allogetaj la bruoj de terkulturiloj movitaj de kamparanoj, distraj la kamparanecaj babiladoj, interesaj la animaloj same kiel la ĉevalo kiun ni vidis ekprancanta antaŭ niaj figuroj nekutimaj, kompateblaj kaj simpatikreaj la virinoj dorsoŝarĝitaj je korboj plenaj je premitaj folioj aŭ fruktaĵoj, distraj eĉ niaj provoj malpliigi niajn ŝuldojn raste delokigante sekan foliaron el la herbejoj, kiam la vento ne jam arogis al si la taskon mem malorde ĝin dislokigi, aŭ rikoltante arakidojn aŭ stakigante brullignon aŭ (sed estis peno tro laciga por delikataj muskoloj!) rompante per neleĝera pioĉo terbulojn aŭ elradikigante herbaĉojn. Sed mia koro estis aliloke, mi ektaksis tiun triviĝantan tempon tempo ne jam plu aventureca aŭ riskeca, simple tempo sterila.

La noktojn, la plilongiĝantajn kaj ĉiamdaŭrantajn aŭtunajn noktojn, de tiuj eternaj semajnoj ni pasigis en tre malalta budo, kaŝitaj inter kreskaĵoj kie la kamparanoj tenas kaŝitaj multajn etajn grensakojn por ilin savi el ĉeporda raziado de kozakoj. Ĝuste sur tiuj plenaj sakoj, virinoj aranĝis krudajn kuŝejojn por nin protekti kaj, mi pensis poste, endomigi nin aliloke ankaŭ por konservi la striktajn domajn plenŝtopitajn spacojn por si. Post kelka tempo la noktan ĉiamdaŭran tempon ni ekokupis per improvizado de senritmaj kaj senmezuraj versoj kudreblaj en poemaj rimaj trioj aŭ kvaroj, kiujn ni lanĉis unu al la alia atendante, ke la suno vekiĝu aŭ ke la dormo fermu nian tro konscian enuiĝon.

Ĉar por ni estis antaŭviditaj studoj pri filozofio kaj teologio, kaj tiuj disvolviĝos en la latina, kial ne ekprovi esprimiĝi latine? La ludo ne devus esti tro malfacila, se enkalkuli la kvar jarojn de feliĉa kuniĝo kun la gramatiko kaj sintakso de la klasika latino kaj unu plusan jaron de laŭtvoĉa en latina himnorecitado plus ĉiutaga legado de latinigita psalmaro kaj de brevieraj hagiografiaĵoj. La latina uzata en tiuj lernejoj ne furoras pro klasikeco, sen tamen ĝin ekskludi, kaj praktike simpligas la komplikan gramatikon, tial la parolado kaj ankaŭ la skribado ne ĝenas kaj fine rutinas. Ni provis ekzercocele, stumblante tamen nemalofte, kaj ĝi entute eksentiĝas ĉe ni peno eltenebla kaj eĉ plaĉa. Kontribuis al nia "lingva" distro ankaŭ la, eble tro evidenta, latina origino de la lokaj dialektaj esprimoj, el kiuj ŝajnis vera la informo ke iam tiuj popoloj parolis, aŭ strange miksis kun la sia, la latinan.

La ĉirkaŭa medio ŝajnis, certamomente, sinteni favore al nia ekzerciĝado:

la brevieraj *laŭdaj* himnoj ofte inspiriĝas el naturaj belaĵoj por levigi meditanton al ĉielaĵoj. La loka instruitulo, t. e. la paroĥestro, provizis nin, el sia libraro, je trivita kaj flaviĝinta *Calepino* (Kalepino) tiel densa kaj fama kiel multekosta latina-itala, kun eroj de latina-germana (kaj de aliaj lingvoj), vortaro. Raraĵo en tiuj lokoj!

Eĉ tio, tamen, redukte kontribuis forteni oscedan enuon pro manko de interparolantoj kaj pro manko de libroj, krom tiuj malnovepokaj pruntedonitaj de la paroĥestro. Finfine la breviero, jam legita kaj foliumita ĝis ĝia malbindiĝo, estis nur la breviero.

En nia latinigado ni procedis, se tio ne malmodestas, palpe pardonpetante unu al la alia pro la ekscesoj de italismoj aliigantaj certe ankaŭ la pensojn. Tia ni pritaksis tiun okazan pratikadon en tiu kiu estos nia unua helplingvo, pliposte revizitante nian malnetajn kajerojn, eĉ tiujn ĉi donacitajn de la paroĥestro, kaj ĝin komparante kun la latino de la normalaj lecionoj. Tamen ankaŭ tia strebado, eble kulture nevana, helpis nin superi la solecon.

Mi memoras kiam mia amiko min surprizis per la malsamon induktanta frazo ĵus legita en Kalepino *"Diu porcus est"*. Sensciulo horore perceptus: "Dio estas porko!" misirigita pro la sono "Diu" kiu multe similas al "Dio" dum singnifas "Longe manĝas porko". Ni ridis kaj goliardece ripetis, sed tuj singarde eksilentis ĉar aperis niaŝultre...Matilda.

Preskaŭ izoligitaj en tre malalta kabano, inter jungilaroj kaj kamparbestaj ekipaĵoj, pro timo de tuja rastado, ni klopodis certe travivi senpostlasi spurojn suspektigantajn pri nia ĉeesto; sed tio kostis al ni solecajn apartaĵojn, apenaŭ mildigitajn de la ĉiutagaj vizitoj de... Matilda, la plej juna apenaŭ dekkvarjaraĝanta fratino de mia amiko, proviantistino por senanonaj konsumantoj, per kies servo ni povis ne malsati kvankam neniam plene sataj. Nur kelkfoje ni povis manĝi ĝis satiĝo.

Tiu ĉi maŝinece babiladis infanvoĉe kaj samtempe ŝajnis ne konsciiĝi, ke ŝi jam montras senintence multajn el signoj de maturiĝanta sprona ineco; ne sen indulgo al simpatio pri io ŝia da naiveca ineco, ene de mi mem, post kelktage, el mi varte floriĝis difino pri ŝi konfideme kaj tinte ridetanta kaj kun knabeca senzorgo moviĝanta kaj certe nescia pri sia allogo sur mi: *Jen vata tufo impregnita je ĝojo!... Jen la senkulpo eksplodanta en senpensan naturan ĝojon!* Sed kunfande kun tia surpriziĝa rigardado kaj enfraza kondensado, kvazaŭ provo ŝin pordaŭre reteni, miksiĝis io tra rimorsa kaj fatale altira kvazaŭ estus maldelikata profanado kaj samtempe neevitenda malpurigado de io pura!

Eble en tiuj sentoj kaj efemeraj imagoj agitiĝis poeta rebrilo, sed ne senkonscie, tamen: fakte, miaj sentoj kaj la natura medio ekrandigis al ni versaĵojn de konataj poemoj de Virgilio kaj Dante aŭ Petrarca aŭ Tasso. Mi ne komunikis al mia amiko mian novan impulson... al poetado, sekrete luliĝantan ene de mi, por rezervi tute por mi tian kontempladon.

Escepte de tiu distro, al ni mankis informiga radio ĉar al tiuj landuloj mankis eĉ elektra energio kaj eble ankaŭ la konscio pri tia manko. Nur kiam la paroĥestro treniĝis ĝis ni, eblis ricevi kelkajn informojn, kvankam nefreŝajn: ni eltrovis ekzemple, ke la pontoj de la fervoja kaj strata linioj inter Ospedaletto kaj Venzone, strategiaj pasejoj nur malmultajn dekojn da kilometroj foraj, suferas plurfoje dumsemajne bombadon, sed tre malofte trafiĝas, eble pro la troa alteco trudata al la aviadiloj de la ambaŭflankaj montopintoj. Tio tamen ne estis novaĵo ĉar la furoraj bruoj de ne vidataj aviadiloj plonĝantaj kaj spacgrimpantaj jam vekis nian atenton kaj kreskigis nian angoron. Ĉiumomente la kondiĉaro, fakte, loĝa kaj psika, peladis nian kunnaskan bonhumuron tra meandroj nedifineblaj sed senperspektivaj, el kiuj aliras nur enuo. Se la silenton difektis la superflugo preskaŭ ĉiutaga de militaj aviadiloj, la enuo pludaŭris, foje, subtila kaj ne nur ŝajne jam forĝita. Kelkfoje la sunsubiro longe tenis en agoniado la tagon: la agonia estas nia sendormo. Ni evitis ankaŭ kanti, vespere, pro timo esti malkovritaj, en la resonanta silento, de kozaka okaza rundo pri kiu oni prizorgis por ke ni estu rapide informitaj per avertigaj varispecaj signaloj; tamen tio neniam reale ĝenis.

Ni provis dissaltigi la izolecon ankaŭ per kartludo, sed la peno trakompreni la kartasignerojn, trivitajn ĝis la kolorperdo, baldaŭ forvaporigis eĉ la emon al distriĝo.

Iujn vesperojn, laŭ kelkhore, ni revenis al la gasta hejmo kien vilaĝanoj kunvokiĝis por trapreĝi la rozarion kiun oficiale prezidis mia amiko kun travidebla kontentiĝo de siaj familianoj; la sekvaj babilaĵoj kaj intersalutaĵoj estis longaj en la mallumo apenaŭ traheligita de la duonluno kaj de steloj.

Tiuj momentoj fariĝis prefere la neatendite bezonata manifestejo de sentoj kaj korinklinoj de tiuj simplaj homoj, kvankam neniam elstariĝis opinioj pri la jama stato de nia ŝtato duigita: ĉio turniris ĉirkaŭ la sorto konata aŭ nekonata de iliaj soldatigitaj kaj, verŝajne, forfuĝintaj familianoj. Apenaŭ susurata voĉo, el ĉirkaŭaĵoj, pri reveninto, alkurigis personojn por ekricevi esperigajn informojn.

Dum preĝado kaj babilado atentaj oreloj prizorgis rapide taksi la sencon de ĉiu knaro aŭ bruo aŭ skrapo el la ĉirkaŭa kamparo: ĉio povas esti signo de

rastado! Tamen ni jam ŝatokupe antaŭstudis fuĝvojon, pri kio mi ŝatis paroli kun Matilda kunportanta akvon ankaŭ por niaj enkrustitaj vizaĝoj.

Ĉu tiuj kamparanoj helpis ankaŭ partizanojn sen, tamen, kunlabori kun ili? Neniam tio estis aludita de ili kaj des malpli de ni, al kiuj kaj informoj kaj intereso.

La vendredan vesperon de la sekvanta semajno, tuj post nia ne mallonga tersterniĝo senmova pro timo esti malkovritaj de ne tro malforaj patrolantaj kozakoj, alvenis la paroĥestro, kiu mankuriere ricevis leteron el konvento. Kial tiom da tagoj pro transdoni pliajn informojn? Pro malfavora okazkombiniĝo ankaŭ la studentejaj superuloj mankis je informoj pri ni, dizertuloj kaj serĉataj de polico, kaj ili devis konsultiĝi kun la generala superula delegito loĝanta en la "ĉiam pli fora" Venecio.

La paroĥestro do legis al ni la respondan leteron el Ĝemona, portitan mane de konventa helpanto por eviti cenzuran kontrolon: la konventanoj konas niajn nomojn ĉar ili ricevis ĝuste antaŭ tri tagojn "la obeojn" asignantajn niajn personojn al tiu ĉi konvento-teologejo; la truda rekrutprovo flanke de la militaj aŭtoritatoj de Vicenza estis, supozeble, eksterleĝa reago kontraŭ la preskaŭ amasa forfuĝo de lokaj rekrutitoj agaciĝintaj kontraŭ la okupantoj kaj ties favorantoj; estas atendataj atestiloj nin liberigontaj el la soldatservo; dume ni singardeme restu kaŝitaj pro tio ke, kaze de aresto, la kontrolo pri la fidindeco de rnematestoj nun bezonas longan tempon ĉar la burokratiaj aŭ militecaj sinkronaĵoj ne plu ekzistas en tiuj ĉi malbonportantaj konjunkturoj. Kaj ni atendu informojn de superuloj. La aŭtoroj dankis al la paroĥestro certigante, ke mem repagos ĉiujn elspezojn alfrontitajn kaj alfrontotajn ĉe paroĥestro kaj ĉe gastigantaj familioj. Kiel eble plej frue ni ricevos viziton de superula delegito, dume ni preĝu kaj studu.

"Studu"? Eble la vorto estis trenita de la kutimo "instigi kaj admoni" propra de la predikanta stilo ĉar ne eblis ignori, ke al ni, en tiuj cirkonstancoj, ne povis ne manki libroj kaj apenaŭ sufiĉe libera privateco. Ni ridetis dum la paroĥestro flustris "ni vidos".

Kiu scias ĉu la aliaj niaj du kunnovicoj jam alvenis ĉe la teologejo de Ĝemona? Kiu scias ĉu ili ricevis la atestilon je soldatservo liberigan? Kial nin oni forkurigis tiom hastece? Kial, kial...

Dume ni faris sperton pri teruro en ni kaj ĉe la loĝantoj. Voĉoj el voĉoj disvastigadis pri mortigoj de Karnieloj (Karnieli estis alnomataj la loĝantoj de Karnio) aŭ pri kaptitoj kuntrenitaj al Germanujo. Rilate tion la paroĥestro insiste instigis por ke ni, arestokaze, tuj akceptu soldatiĝi en la respubliketa ar-

meo: rifuzo sendus malreklutiĝinton rekte al germana koncentrejo kiel ribelulon. Ni estis ankaŭ varbe kontaktitaj de junulo, serĉata de polico pro ribela malreklutiĝo, al ni proponanta kolabori kun partizanaj rezistmovadoj por ke la germanoj kun faŝistoj estu malebligitaj detrui niajn industriojn kaj pontojn ktp okaze de la retiro de la forfuĝantoj venkitaj. Eblus uzi fusilojn nune kaj aliajn armilojn estonte : jam ”plagas kaj plagigas” homoj tiaj. Al ni ambaŭ tio ŝajnis tro kontraŭa al niaj sentoj kaj juĝoj ankoraŭ plektitaj al la ekvacio *faŝisma reĝimo = patrujo* kaj gipsume blokitaj de la suferoj pro la milita katastrofo. Kiu ajn elekto ŝajnis ofendi kelkan. Se juĝoj foje glitis al la preciza indiko de la batalenda malamiko, la sentoj ilin plu blokis, kvankam la junulo ronde frapfrazis, ke*“la partizanoj elpaŝos kiel la embrio de la nova Italio; kaj de nun oni luktu inter, ja jes, multspecaj penoj sed fore de damaĝa kaŭremo. Sortoturniĝas...”.* Tro entenajlita en miaj personaj aferoj inter komplikaj ebloj/malebloj kaj defioj, mi apenaŭ perceptis kiel aludon al ni tiun „kaŭremo“ kaj apenaŭ eniris en la problemojn de la “postmilito“; tamen ni ekkonsciiĝis, ke ili aktore prezentiĝos en la politika agono rajtigitaj de la rezistmilito, malgraŭ ke nia inerteco nun sin pravigas ankaŭ per ĝiaj ambiguecaj karakterizoj. Tiuj ambiguecaĵoj, postmilite, rajtigos historiistojn paroli pri enlanda milito pli ol pri rezisto al eksterlanda malamiko.

Fakte ni ĵus informiĝis pri partizanaj ribelekspedicioj provokantaj reagojn de la respubliketaj fortoj. Onidiro ankaŭ oftiĝis, ke pli okcidente partizanoj tiom superis la okupantajn postenantojn, ke tiuj ĉi preferis, ol morti senrezulte kaj frustre, forlasi la teritorion kaj koncentriĝi en urbetojn de la maldekstra flanko de Tagliamento: la zonon tiel jam liberigitan oni nomis “Teritorio Sendependa” aŭ “Karnia Respubliko”. Ĉar de iuj tagoj el la najbaraj vilaĝoj foriris la garnizonoj aŭ vaĉoj de kozakoj, oni petadis ĉu ankaŭ nia vilaĝo konsideriĝu ero de tiu respubliko kiu, laŭ konversaciado interpastra, ekprizorgadis kvazaŭregistarajn funkciojn. Ĉu vere ekzistis liberigita kaj sendependigita teritorio aŭ ne? Jarojn poste, tiu ĝermo de liberiĝo el faŝista opresado estos multe ekzaltita: mi estis meze de ĝi aŭ apude kaj, malgraŭ tio, apenaŭ io flustris pri ĝi al miaj oreloj!

En ni ne estis vigleco por tion konstati ĉar kvazaŭvolontule kaj fizike kaj politike izolitoj ĝis la 30 de novembro, kiam letero el la studentejo petis de la paroĥestro ĉu ni povus senriske alfronti, eventuale piede, la eble 40-kilometran vojaĝon por aliri la konventon. La paroĥestro ne senkelke da hezitoj opciis, esperante en la Providenco, por ĉi solvo: provizis nin je nutraĵoj, nin instruis per rekomendoj ripetotaj eventuale ĉe aliaj paroĥestroj laŭvoje, nin benis

kaj, frate sin ŝirmante de niaj varmkoraj kaj iom kulpsentemaj dankoj, akompanigis laŭ kelkaj kilometroj perkaleŝe, kiu je ĉevala paŝo sur kavoplena strato zorgopele lulis nian kreditan trankvilan finaventuron. La duan matenon, dankante al la nova gastema paroĥestro kiu nin afable jam gastigis la antaŭan vesperon je nomo de la rekomendanta paroĥestro de Alesso zorgigita de nia rekomendanto, ni turniĝis iom sudorienten kie la riverlito plilarĝiĝas kaj do la akvo malpli profundas, travadis la riveron apogante la piedojn sur ŝtonoj amasigitaj de aliaj travadintoj. La akvo frostigis la piedojn kaj genuojn, tial tuj poste ni nin revestis per la froko. Estis tagmeze kiam klare ni vidis la faman fortikaĵon de Osoppo, situantan ne multe fore de la rivero Tagliamento. Sed ĝi povis manifesti nur per la impona strukturo sian glorplenan historion ligitan al la aŭstra-napoleonaj militoj. Ĝi ne plu trovos oportunecon malfaldi al ni siajn enajn historiaĵojn antaŭ ol frakasite maliĝi sub la aliancaj senutilaj bombadoj.

Sur la precipa strato la nia aspektis al ni pli fiera tramarŝo ol duonkaŝa hejmenreveno, renkontante, bonŝance, malmultajn personojn. Ni transpasis Cesclans (Ĉesklans); ĉe Somplago ni iom ripozis konsumante la lastajn provizojn por maldilatigi nian sakon; rondiris Oncedis dum infanoj, nin vidintaj, kuris travoje por anonci la alvenon de kvestantaj fratuloj; ĉe Trasaghis ni vizitis pormomente la preĝejon kies pordoj apudas la precipan straton; flankenlasis Osoppon; ankoraŭ du vilaĝetojn kie ni renkontis, preskaŭ neniel angorigitaj ĉar ni sentis spontane kreski en ni certeco, ke jam ne ekzistas por ni danĝeroj, tri germanajn soldatojn kiujn poste ni eksciis anoj de senskrupule severa Altadiĝa (aŭ Subtirola) germanigita garnizono ne malkiel tiuj mortigotaj en vojo Rasella en Romo (44/3/23) per bombatenca embusko fare de partizanoj: (atenco, tiu, kiu pretekstis la masakron de *Fosse Ardeatine)*. La lasta marŝado, kvazaŭ por ni ne ekzistus danĝeroj, flugtuŝis la stacidomon de Ĝemona preskaŭ senhoman, kaj tuj ni frapis la konventan pordon. Kien kaŝiĝis la timataj danĝeroj? Ĉu vere ni riskis areston kaj deportadon al germanaj punlaboroj?

Dek, cent, mil scivolaĵoj fare de la klerika studentaro kaj samtiom, se ne pli, de la superuloj kaj profesoroj, entrudiĝis kaj obsedis la “aventuristojn”.

*“Kial vi ne venis rekte al la studentejo, almenaŭ por konsiliĝi? Ĉu vi ne agis tro sendepende, nome tro eksterobee?”.*

*“Kial serĉi kaŝlokon en la domo de la malamiko? en Karnio ĵusdate perforte aneksita al la teritorioj de la Tria Regno?”.*

*“Kial, kiam oni igis vin elirontajn el novicejo, oni al vi ne indikis la precizan adreson de via kaŝejo?”.*

*“Kion vi manĝis, kion vi surportis por ke la tutmondo kalkulu je vi? Kie vi*

*hejmis?”.*

*“Ĉu vi malkuraĝiĝis? Kio kuraĝigis vin…?”.*

*“Kiu elreviĝo finigis vian bohemadon?”.*

*“Kiujn misojn vi faraĉis tramonde?”.*

*“Ĉu vi vin provizis je homaj komplementoj por venki solecon?Kiaj reagoj de la solitarulo en la dezerto”.*

*“Kial vi nun ne aspektas mise? Kial viaj nazoj ne perceptas stinkan odoron elspirantan el viaj vestoj, sekve de tiom da travivaĵoj subĉielaj?”.*

*“Kiel la batalemuloj per fuĝo fariĝas senparfumaj konventanoj?”.*

*“Kien vi aventurumis kaj kiam vi, boheme ŝvitplenaj, aventuros en bolanta bankuvo?”.*

Se ne estus pro tiuj lastaj scivoloj, elmontrantaj, ke se la forpuŝigaj odoroj troas, la flarsento kutimiĝas ne plu suferi naŭzon (kaj tiaj estis niaj nazoj fronte al nazoj de amikoj ankoraŭ bonŝance distingantaj stinkon el parfumo), ĉi demandaro povus ŝajni inkvizicia demandaro, male ĝi estis la ĝoja festado pro amikoj liberiĝantaj el penaj maltrankviloj por ĉiuj. Tamen la amasa demandaro ial faligis en min ion netrankvilan, kvankam oni precizigis, ke ne klaras kie nun la itala ŝtato samlimas kun Germanujo kaj ke novaj leĝoj altrudas novan konduton kun nepreco pri novaj penoj! Pri tiu koncepto insistis la superulo.

Niaj novicejaj kompanuloj jam loĝis tie ĉi senproblemaj, iom amuzigitaj de la rakontado pri niaj trakuradoj. Ili, tuj post nia forfuĝo el la loko, decidis viziti la lokan karabenistan kazernon, kaj trovis tie kuŝantaj siajn atestilojn de definitiva soldatservo liberiĝo, kaj do povis atingi Ĝemona pertrajne senobstakle.

“Ĉu vi vidis ankaŭ niajn atestilojn? Kial vi ne prenis ankaŭ la niajn?”.

“Eble ili staris ĉiuj kune, sed al ni nenion oni komunikis. Eble via agitiĝo neglektigis ion ganglian”.

Bano varma kun vestŝanĝo, arde imagita, fine karesas niajn korpojn laŭ nia deziro kaj laŭ ne senmotiva invito de la fratularo. Ĉe vespermanĝo, aplaŭdo kun fina dolĉaĵo kun fruktoj por ĉiuj sentigis al ni, ke ni estas franciskane akceptataj. En mia ĉeleto poziciiĝas novkursaj libroj kaj alia, kvankam iom eluzita, lana froko.

Ĉio enorda, do.

Tiom da ĝoja festo kaj ordo, tamen, ekmalheliĝis kiam la superuloj, hastece kaj sekretece, anoncis sian viziton ĉe niaj ĉeloj. Mi eniris mian ĉambron kun la konvinko ke ĝi estos mia hejmo por la tuta studjaro, kvankam tiu vizit-anonco igis tratime oscilanta la scivolemon.

### Ĉapitro sepa
## Al la konvento inter aventuroj

Ĝuste la matenon de tiu sama tago prezentiĝis ĉe la konvento du policanoj demandantaj, ne nur informcele, pri ni du: ili faris klare kaj precize niajn personajn nomojn kun familinomoj. Se oni antaŭe esperis, ke ili estas portantaj la atenditajn atestilojn de soldatliberigo, oni ŝanĝis opinion kiam el ili likis, ke la militaj aŭtoritatoj nin persekutas kiel militrifuzintojn kaj kulpigitojn, se oni klare komprenis, pri kolaborado kun sabotantoj.

La superuloj volis unuflanke ne riski la sekurecon de kvindeko de junaj kandidatoj, kaj aliflanke sekurigi nian bonsorton. Sur dupiede oni destinis, ke morgaŭmatene, tre frue, akompanataj de du kvestantaj fratuloj kaj kun versimilaj dokumentoj, ni iru najbaren de Monteprato, dumilanima vilaĝo, dista dudekkvin kilometrojn de Ĝemona, ĉe amika paroĥestro por tie loĝi ĝisbezone.

Tiu decido kaj ĝia plenumo restu sekreta por ĉiuj, eĉ por ni. Nur kiam ni, fakte, ekripozis, ĉiu en sia unulita ĉeleto, alvenis la superulo kun la novaĵo. La sekreto senescepte koncernis la finan lokon ĉar konservigi ĝin tia ĉe 70 fratiaj personoj neniu rajtas esperi. Frumatene, ni rapidege repakis niajn ĵus elpakitajn kaj enŝrankigitajn aĵojn dum profesoroj hastis pretigi librojn de la koncerna studjaro, ĉion rekunvolvinte per ĉemizoj kaj subroboj ankoraŭ malzorge disaj sur la seĝoj kaj pavimo, kaj enpoŝiginte ion manĝotan, silente fuĝeliris tra duonkaŝita pordo. Nova papera identigilo min nomis "Frato Egidio Clementel", kies fotaj vizaĝtrajtoj kaj naskiĝdatoj tolereble kongruis kun la miaj realaj: ke mi ne forgesu, ke mia regiona naskiĝlando nun estas Sardinio!

Trapasante stratojn kaj kvartalojn de Ĝemona, ni renkontis dekon da faŝistoj, junaj, tre junaj apenaŭ adoleskaj, eble revenintaj el dumnokta patrola kontrolo, babilantaj fidoplene. La du fratoj akompanantaj laŭtvoĉe salutis dum ili, post supraĵa kontrolo de la cirkulpermeso, managitante festis kvazaŭ ni estus iliaj plej karaj amikoj. Ni sciiĝis pliposte, ke la du laikaj fratuloj jam havigis al si, ĉe la faŝista kazerno, cirkulpermeson en matenaj kurfhoroj je preteksto de kutima kvesto, fore, trakampare. Mi rigardis la faŝistetojn, babilantajn sub palaj lumstrioj de forta petrollampo, helpanta tiujn elektrajn malpotencigitajn aŭ frakasitajn, per kiuj iam eblis inspekti paŝantojn, dum miaj lipoj moviĝadis en salutrideto, kaj samtempe mi sentis ion malĝojan en mia koro, miaj sentoj ekmoviĝis al kompato por tiuj dekkvin/dekses senkonsciuloj kun surkape ni-

gra fezo je kvasto svinganta kaj kun traŝultre musketo, eble senkugla: senpere mi ilin klasis kaj sentis kiel senkulpaj turmentantoj/viktimoj vane kaj senarte batalantaj favore al kolapsanta reĝimo kaj tial senscie enprofundiĝantaj en la pli kaj pli alproksimiĝantan tristan sorton; mi deziris amikiĝi kaj ilin certigi, sendepende de ilia politikaj vestoj kaj estontaj senesperaj reagoj, pri miaj sentoj kompreneme kaj pardone solidaraj kun ilia, vole kaj prave supozita, senscio ilin senkulpiganta.

Antaŭ la kazerno gardostaris du faŝistoj, malpli junaj ol la antaŭaj, enue marŝantaj tien kaj reen ene de limigita spaco, kiujn mi lice taksis transaspektaj kaj naivecaj kvankam la memoro ne rajtigis tute prave tian juĝon.

Eksterurbete, sur kruza malluma strato, la hufobruaĵoj de la ĉevalo ŝajnis eĥigi la terenon, lulante kaj miksante en mi ian neniosenton en palpa sencerteco kiun mi ne spertis en la pasintaj tagoj. Kaj ĉio ŝprucigita per aventurecetoso. Post kelkaj penigaj, kaj orgojlaj, eldiroj pri la sukcesa trompo ĵus uzita por ne veki suspektojn en tiuj landokontrolistoj, oni aplaŭdis la leviĝantan sunon, pene ekokulumantan, kvazaŭ el ĝi venus certeco, ke jam ni eliris el la minita tereno!

Estis la dua de decembro 1944, la sesa matena, la vetero ĉe miaj okuloj havis neniun apartan karakterizon krom glima nebuleto kiu poste ju pli rozecis des pli maloftiĝis ĝis tute vanui sub la vigliĝanta suno; rosgutoj, eble glacifadenetoj, sin formis sur miaj brovoj. Ni preĝis laŭde al la Sinjoro, memorigis la forpasintojn, ne forgesis niajn bonfarantojn, *kiuj spertas elspezojn por doni al ni manĝi kaj trinki kaj studi*, preĝis ankaŭ unu por la alia, preterpasis du etajn kozakajn tendumejojn, kampadantajn sur herbejo marĝene de arbareto, kies vaĉantoj afable reagis al niaj ŝajnsimpatiaj salutaj voĉgestaj mansvingoj, devancis du kozakajn ĉevalĉaretojn kiuj dekomence alvostiĝis al ni, sekve ekpostrestis kaj fine niabonŝance devojiĝis, kaj post peno kaj laciĝo, niaj kaj aparte de la trenanto, pro la streĉo eviti dum gvidado, laŭ sekundaraj stratoj, densigitajn grunderojn, mezmatene ni elkaleŝiĝis por ripozigi la ĉevalon.

Ĝis la deka sur la stratoj pasis preskaŭ neniu. Ni du decidis, iom distanciĝante de la strata tie polva kaj tie flaka limo, malrigidigi la gambojn kaj supreniri longan sinuoplenan morterrubejan teraltaĵon senarban kaj senherban kaj apertan al la tuta ĉirkaŭa ebeno, de kie la okuloj ampleksas vastece: kamparo, fervojo ĝis nun sentrajna bruo, asfaltata ŝtata strato fore antaŭe, longa neklara zigzaganta linio de la rivero Tagliamento pli fore, alta montaro kun bele konturiĝantaj antaŭdeklivoj norde, rigidiĝanta mallarĝaĵo kien kunfluas ŝtata fervojo kaj rivero dekstre. La tramontara gorĝo je dekstra flanko brilis en la

kontrasto de trajtoj tie ombraj tie sunaj. Jam ni finis nian manĝeton kiam aviadilbruo retenis nian atenton: dekstre du leĝeraj aviadiloj, plonĝpegaze malsupreniras, preskaŭ orte, kien la vala mallarĝaĵo, parte enombra parte ensuna, kie la ĉielo ŝajnas arkiĝi supre de la ponto kaj apogiĝi sur la ambaŭflankaj montpintoj. "*Same kiel aliaj tagoj, kiam sunas sennube kaj sennebule*", laŭtvoĉas la fratula veturiganto. La du aviadiloj lasas fali po du pezajn objektojn, certe bombojn, je intensiĝanta siblo en la aero, kaj anhele grimpas, preskaŭ orte, spacojn paralelajn al montpintoj. La veturiganto krias gaje, neleĝere ektuŝante mian dorson: *"Ĉu trafita aŭ ne, la ponto? Mi diras ne! Vetu ankaŭ vi!".* Fakte la bomboj frakasiĝas kontraŭ la rivera akvosurfaco. "*Rigardu la ponton! Ankoraŭ netuŝita. Tiuj du certe revenos".* Aviadiloj fakte ree pasas, ĉu la samaj aŭ aliaj?, sur nia zenito rekomencante la plonĝon, ellasas kvar videblajn bombojn, po du, maltrafante tamen la celon, kaj plenpotence resupreniras.

Tiom plaĉis la novaĵo, ke oni bedaŭris ilian malaperon en la ĉielo orienten. Je mia granda surprizo, mi perceptis, ke la scenejo ne okazigis en mia kapo la konsideron pri la sorto de la tieaj loĝantoj kaj de la batalantoj. Ili tute ne ekzistis: ĉe miaj okuloj la milito, jam ankaŭ por mi, fariĝis spektaklo. Certe, silentadis kontraŭaviadila artilerio, certe la loĝantaro rifuĝeje ŝirmiĝis, la agroj indiferentas en sia postaŭtuna bela nudeco, la birdoj en la horizonto ne ĝenis, la homoj malvarmsange kaj senzorge pasadis laŭstrate: la milito jam trajtiĝis kiel natura kaj kunvivanta kutimaĵo!

Kien ni impetas, kvankam distre? En la ĉirkaŭaĵojn de Monteprato, kampara milpersona vilaĝeto kun alia milo en la trakamparaj bienetoj, lime al Slovenio: tiu ne tre fora lando jam okupita de italaj armeanoj, nun preskaŭ tute posede kontrolita de Tito, jugoslavia ĉefpartizano kaj estonta diktatora reganto de Jugoslavio, krom la urboj terure garnizonitaj je germanoj kaj iliaj kolaborantoj. La du fratoj kvestantaj montris, ke ili distingis, precize informite pri fakta demarkacio, la zonojn teorie regkontrolitajn de slavaj partizanoj disde tiuj samrege kontrolitaj de italaj partizanoj.

Tiuj lastaj, plie, dividiĝas en du kurentoj, tiu kristana kaj tiu komunista, ambaŭ unuamomente malfidemaj al la slavaj rotoj pro ties komunismo tro naciisma; sed lastamomente la du komunistaj grupoj eksimpatiis kaj kune provis forigi la kristanajn aŭ simple demokratajn grupojn. Oni timis kaj nun jam parolas pri ĵusa armita kolizio interfrakcia kun mortintoj kaj vunditoj: komunistaj partizanoj eksterme sturmis la nekomunistan grupon por malebligi, ke postmilite eĉ ĝi aperu (jen juĝo de postmilita prifakta analizo), antaŭ la popolo, batalintoj por la liberigo de la patrujo. Tial anticipe estis eliminataj politikaj kon-

traŭuloj. Je tio vage aludis ankaŭ unupaĝa loka faŝistema ĵurnalo. Ĉio triste klariĝos la venontan jaron kiam militaĵoj okazos, pro motivoj etnismaj kaj nacionalismaj krom ideologiaj, inter banditaj grupoj en loko eble nomita Porzus[1], en itala teritorio. Laŭ la du kvestantoj, la milita faŝista/germana reĝimo, jam milite depotenciigita, fakte kunvivas kun lokaj partizanaj taĉmenteroj. Ĉio funkcias netragike ĝis kiam ambaŭflankaj ventkapuloj ne plenumu militagojn estigante reciprokajn sangajn reagojn.

En la vilaĝo de nia destino animzorgas sacerdoto, instruisto pri teologio ĉe la dioceza seminario en Udine, granda bonfaranto de la franciskana konvento de Ĝemona. Li akceptas, ke ni, ĉiam inkognite kaj laŭeble kaŝite, loĝu ĉe si ĝis la administraj aktoj kaj juraj aferoj nin rajtiĝos ĉe la militaj instancoj, ĉar, laŭ ĉefkonventanoj, nur en burokrata misordo implikiĝus nia afero.

*"Ĉar la afero koncernas franciskanajn ordenanojn, konjekteblas, ke vi nepre evitu la malprudentaĵojn damaĝuntajn ĉiujn pli ol la ĝenerala malordo",* oni ne ĉesos substreki.

La pastro nin feste ricevis, kvankam ne ankoraŭ komplete informita pri la afero; li mildmiene sed energie malproksimigis la multnombran geknabaron scivole amasiĝantan ĉe nia ĉaro, kaj enkondukis, laŭ koridoro flankita ambaŭrande de staketoj de libroj kaj staplitaj gazetoj, nin en dulitan ĉambron kies dekstran vandon kovras libroplenaj bretoj kaj la maldekstran senbrakteigitaj maizblankaj spadikoj; funde de la ŝtuparo sur iuj stativoj trapolve ripozis aro da skatoloj. Konsilite, pliprecize ordonite, neniam tuŝi la telefonon, kaj invitite neniel malfermi aŭ malfermeti la ŝutrojn, informite pri la krompordo por eventuale fuĝo el la hejmo *"ĉar jam okazis du rastoperacioj, sendanĝeraj Dilaŭplaĉe. Vi povus erarpreniĝi kiel partizanoj",* ni sidiĝis ĉiu ĉe sia eta skribotablo kaj ekmalpakis librojn de sia sako. Sed ni ne eklegis pro tio ke la alnorda suna lumo ne plu kapablis utilige enfiltriĝi el la truoj de la fermitaj ŝutroj dum la elektra lumo ŝajnis ekscesa malŝparo kaj lukso se ankoraŭ memori pri la gastado en Karnio. Nelonge poste, ni sidiĝis ĉetable por manĝi ĉiuj kune en "familieca traktado" pro la *abrupteco de via alveno*, komentis la paroĥestra

[1]Pri okazintaĵo "Porzus" (kiu datas je la sepa de februaro 1945, do iom post la fino de la eventoj enromanigitaj), postmilite, oni sciis, ke la partizana kontraŭfaŝista taĉmento atakita kaj detruita estis la brigado Osoppo kristantendenca, do nekomunista, kaj ke ĝi oponis la aneksadon, jam akceptitan de italaj komunistaj partizanoj, de itala teritorio al Titoa Jugoslavio. Inter la mortigitoj oni trovis Ermes, fraton de poetoverkisto PetroPaŭlo Pasolini, kaj onklon de kantisto Francisko De Gregori. Sed tiuj ĉi, aktivaj komunistaj, ignoris por ĉiam la perdon, eble por ne pridiskutigi la moralan ĉiosuperecon de komunismo; eĉ en la lernejaj tekstoj Porzus neniam aperis, eble por ne malfortigi kaj malcementi la imagon de popola unueco, mastrata de kompartio, kontraŭ la diktaturo. Porzus estis nur la kazo malpli kaŝa.

fratino. Sonoris la pordsonorilo: la tintado vekis ĉe la pastra memoro pluan decidan ordonon: *vi neniam prezentiĝos ĉe la pordo! La bronzeto ne tintas por vi”.*

Ni estus estintaj solaj morgaŭ, estonte la pastro eksterdome pro instrutasko kaj la du kvestanoj forpermesontaj. Fakte la sekvan matenon la du fratuloj anticipis la forveturon je la tria pro alia tasko inter la montetoj orienten, landlime inter Italujo kaj Slovenujo, eble, ni opiniis, por informi kaj informiĝi pri la zonoj kien kaŝe koncentriĝas partizanoj.

La unua kaj unika kontakto komunikiganta kun la ekstera mondo, ni amuze komentos rakontante la tuton, estis nur iuj susurantaj grimpplantaj folioj sekiĝintaj inter fendaĵoj de la lignaj koneksaĵoj de la ŝutroj.

Ni plonĝis tuj en studadon, laŭ la sekvaj kriterioj: antaŭe ni studos la jaran programitan matematikon kaj geometrion en kiui ni kredis nin pli kapablaj je meminstruiĝo, poste ni alfrontos la literaturecajn objektojn kiel historion kaj apologetikon kaj filozofion. Sendistre kaj izolite, ni havis oportunon kaj energiojn nealie elspezitajn. Nur vespere kaj antaŭnoktiĝe ni plenumis niajn devotecajn taskojn kaj la aŭskultadon de la aliancaj radielsendoj. Poste, foje, kune kun la pastro, ni provis kunfliki la nestabile konfliktantajn informojn el la radielsendoj. Tielaj niaj okupoj laŭ proponoj. La vintraj tagoj treege ŝrumpis, sed la noktaj horoj, superante nian dormobezonon, artifike antaŭenmotoris siatempe la tempofluon moviĝantan tra nia kreemo de spritaj komentoj kaj, foje, de versoj legotaj poste al la vasta... domloĝantaro!

Post kvin tagoj, posttagmeze, la pastro invitis nin descendi en la korton, (kion ni jam faris plurfoje por vidi elĉielan lumon kaj por aŭdi kaj pli komprene aŭskulti elstratajn homajn voĉojn) kie, kvazaŭ malkovrante niajn malbonstatajn eksteraĵojn nur en tiu momento, decide dekretis:

*“Viaj redundaj haroj ne plu aspektas fratulece. Oportunas, ke morgaŭ via kapo tonsuriĝu larĝe kaj evidentiĝe. Estas malpli kredeble, ke iu sin masku per trenaĵo de siaj kapharoj!”.*

“Ni certis, ke sentonsura hartondo faciligas la kamufladon de nia identeco”.

“*Ke vi estas konventuloj oni vidas for unu kilometron. Enfratuliĝu do komplete. Kaze de rastado kun interveno de germanoj aŭ faŝistoj aŭ kozakoj, tonsuro okultira sed distordanta la naturan ornamon de kaphararo igas malpli suspektebla la kamufladon”.*

“Sed ni ne havas aparaton...”.

*“Tio minoras: tondiloj, tondiletoj, razilo...”.* Kaj montris el ili sortimenton sufiĉan por kazerno, restaĵon kaj memoraĵon de la antaŭa monda milito in-

terbatalita praktike ankaŭ en tiuj ĉi lokoj. La soldataro itala kaj aŭstra, forlasinte la lokon, forlasis ankaŭ multe da utililoj.

Kaj tiel la postan tagon, sur la kapo de mia amiko, tremante mi ronde kaj larĝe nulrazis la supron de la kapo lasante nur kapmeze tricentimetran cirklan harstrion kun sube denove zonnulrazita ĝis harfino. La similon la amiko redonis al mi. En tiu momento tonsuro, malŝate masakranta nian junulan kapharon, jam nekonebla post pli ol kvardek tagoj de vaganta vivo, akiris sian originan franciskanan formon kaj signifon: signali reciproke al la samsignatoj kaj al la mondo, ke tiamaniere oni rezignas, ŝajnante tamen regresantoj, ĝuste mondumecon.

Ĉiun dimanĉan matenon la pastro portis al ni la Eŭkaristion, ĉar daŭris la risko esti malkovritaj kaj disrumpetitaj de la scivolema, kaj foje malprudenta, popoleca babilademo, kies voĉoj kaj sonoj plezurige alvenis al ni de la antaŭa placeto. Bonŝance, nin vizitis ankaŭ la du konventaj kvestantoj portante al la pastra domo nutraĵojn kaj vestaĵojn kaj longajn babiladojn kaj… humuraĵojn ĉar el tiuj du fratuloj ne mankis spritaĵoj ŝpruciĝantaj el konstanta ilia gajeco Tio tial permesitis, pro la ĉeesto de la du fratulaj kvestantoj, ĉar la voĉbruaĵoj kaj la festaĵoj estus atribuataj, ĉe scivolemuloj, al la festekscita gastaro. La konventanoj tamen kunportis la novaĵon, ke neniu nova koncernas nin, krom varma patra beno de la superulo.

La okan de decembro, tagon dediĉatan al tre Sankta Maria, ni decidis transiĝi, el tuttempa restado en dormoĉambro, al la kuireja ĉambro por studi kun iom pli da malfrosto. La vetero splendis kaj la frosto pliiĝis dum la persona provizo de vestaĵoj staras tuta sur la respektiva korpo, aparte la mia, ĉar pro malbonŝanca misgvido mi ricevis nur katunaĵojn: el tio mia ĉiama malvarmuminta stato. La pastro ankaŭ konsentis, ke lia maljuna fratino hejtu kameneton ĉirkaŭ kiu ni sidiĝu, kondiĉe ke neniu el ni du aliru al la pordo kiam ĝi *sonoriltrilas*. Rehejmeniĝinte, vespere, li ne preteriris la rutinan frazon *"dum ĉio iras glate, la tago, kiu nun pasis, kion al vi gajnigis?"*. La rutinemo celis nur transdoni lian pasion por la studoj, sed al ni ne domaĝis, ke li kontrolu kaj helpu nin kritike diskuti pri la lernitaĵoj.

La enuon de tempo al tempo rompis aviadiloj returnantaj pro la sama afero. Ne vidante la foran ponton sur la rivero Tagliamento ĉe Venzone kaj imagopove plilongigante la linion de la malproksima rivero, mi sukcesis kalkuli la eblajn rezultojn de la bombeksplodo el la siblabtempo kaj intenso kaj brutipo de la klakego. Se aviadiloj ne traflugos la ĉielojn laŭ pluraj sinsekvaj tagoj, tio signifas, ke la ponto estis certe trafita; revenante samtage aŭ la postan ta-

gon, ili komprenigas, ke la ponto aŭ ne estis trafita aŭ estis jam ligne refarita kaj ke traireblas la pasejo inter Italujo kaj Aŭstrujo. Sed aperis la nebulo kun subtilguta pluveto kun ĉielnigriĝo malebliganta la ĉasaviadilajn plonĝojn, dum daŭrigis pasi la longa malfacile videbla vico da superfortresoj alirantaj *super-flugi* (kvazaŭ karesa eŭfemismo de Akso[2], nepovanta malhelpi aŭ kaŝi la bombadojn sur teritorion opiniigitan aerspace nepenetreblan) Germanujon kaj malŝarĝi bombojn, aŭ revenantaj pli leĝeraj kaj kun malpli intensa bruego. La popolo pasadis surstrate, ni imagis, preskaŭ senrigardi la bruegan vicegon jam perceptitan kutiman kaj sendanĝeran. Eĉ la spektakleco malefektiĝis!

Dume ni senhalte antaŭenprogresis ankaŭ en la komprenado pri filozofio. Neprajn pli ol eventualajn dubojn aŭ miskomprenojn igis klare lumetantaj la pastro/profesoro kiu ĉiuvespere restis plurhore kun ni: kaj tiam li paŝigis nin tra historiaĵoj kaj ideaj kaj idealismaj verkoj kaj imagigis subtekstojn dum ek-flamoj de latinlingvo favoris la sintezon kaj parkerigon pri la konversaci-objektoj.

Kio entute certigas, ke ni komprenis kaj asimilis? Foje la pastro trapipofu-me ridetis: *"Lasu, lasu. Siatempe, siatempe!..."*. Foje ŝajnis, ke li spicas klari-gaĵojn gutete kvazaŭ por sin feliĉigi per sia donota scio.

Tamen la dumtaga enuo nin fidele akompanis kaj por ĝin venki, ĉiam pli nur per bonavolo, ne sufiĉis la foja eferveskiĝo de io da humuro pri okazintaĵoj pribabilataj de la pastro kaj ties fratino: ĉio malfajriĝis haste!

Lacigitaj kaj enuiĝintaj pro la neebla mensa-krura "dispeliĝo", tiom ni in-sistis, ke la pastro, post multe da ne kaj jes, duonkonsente konsentis, ke ni *"senriske"* risku ekskursi tra montoj altaj, iom je nia maldekstro, pli ol ses-cent metrojn. Provizitaj je nutraĵoj kaj tre amatore ekipitaj ni distanciĝis, frumatene, el la vilaĝo proksimume kvin kilometrojn, scivoleme rigardataj de la malmulta loĝantaro, nekomprenanta ĉu ni estas uloj monaĥeske vestitaj serĉantaj partizanajn rotojn, aŭ membroj de la Titoa armeo, tute komunis-tema, aŭ fratuloj veraj. Tiom estis la emo promeni perpiede ke ni voris stra-tojn, padojn kaj fosaĵojn kvazaŭ persekutataj de malsavigaj malamikoj. Ni pi-knikis enspirante sekan aeron sub brila suno kaj kun la oreloj plenaj je la plaŭde-toj de apuda gluglanta akvo kiu el glacieroj pene streĉis versiĝi tra sekaj bov-sterkaĵoj al nekonata, eble klarakva, rivereto. Dividante panon kaj viandajn tranĉaĵetojn kaj vinon ni babiladis kvazaŭ el la mondo ĉirkaŭa minacoj ne ĝe-

[2]Alianco inter Berlino kaj Romo, alidirite ankaŭ ŝtalpakto, al kiuj pliposte asociiĝis Tokio, kies agadsinkroneco kaj solidareco estas simbolata de *akso* (akso de la historio, de la nova civilizo....)

nus. Al tiaj vekigis nin, tujposte, personoj de la lastaj domaretoj kiuj konvinkis nin rezigni *“ekskurse grimpeti”* pli altajn montetajn pintojn ĉar *“eĉ la plej etaj padoj, precipe se flankitaj de arboj implikantaj unu sur la alia, ekde ĉi tie estas malsekurigitaj de la draste frapantaj konfliktoj inter partizanoj italaj kaj tiuj slavaj. Eĉ monaĥaj roboj ne povas cirkuli sensuspektige!...devotaj spionantoj”.* Kaj ni pliinformiĝis pri armluktoj, kroniĝintaj per kugladoj, inter partizanoj de kontraŭa limrando, kaj pri ŝanĝo de fakta superregado en la teritorio.

Foririnte el la diverskiale nepenetrebla teritorio, ni feliĉe hejmvenis sed ne samfeliĉa trovis la pastron kiu, male, sin montris paŭtmiena kaj pentinta pri la permeso koncedita *“ĉar neniu povas senriske vintre montumi kaj silvestrumi tiom fore tra tiuj regionoj, malpleje vi. Vi estas enŝovantaj bastonon interrade de nia malfirma trankvilo! Ankaŭ mi, tion koncedinte, montris la kapon fendita!”.* Post la koncedita permeso, Li ekmalkvietiĝis, laŭ vojaĝo al seminario, ĉar li ekintuiciis, ke eble ni tro profitus de lia “eltirita kaj eltrudita” konsento finkompromitante nin kaj lin kaj la vilaĝanojn jam provitajn de minacoj ĉiuspecaj. Nun niaj certigoj, ke ni sukcesis teni sekreta nian kaŝlokon kvitigis niajn ŝuldojn kontraŭ liaj timegoj. Vere ni kondutis bone sed senkriterie paŝante trariske, pelitaj, laŭ postaj prijuĝoj, de nebremsebla volo forfuĝi momente el oprima klostreco.

Dum la noveno prepara al la kristnaska festo, la du kvestantaj fratuloj revenis por regali nin per radio-galeno, aparato tre simpla kiu en bonŝancaj kaj lertaj manoj ebligas aŭdadon de radielsendoj se radipontitaj ne tro fore.

*Ĉu ne estas malpermesite ĝin uzi kaj ankaŭ nur teni?*

*Jes, sed tio buntas laŭtempe kaj laŭloke! Tiu ĉi escepto por malhelpi, ke solitareco frenezigus vin,* ili precizigis iom singarde ĉar tia aparato estis ilia persona regalo. Nin ili regalis ankaŭ per korespondaĵo fare de niaj familioj malkvietiĝintaj pro nia koresponda silento; kaj ni devis surdupiede skribe respondi senindike pri la situacio kaj senklarige pri la loko por, kompreneble, ne esti lokalizotaj de la cenzuro, kiu legadas ĉiujn enkestigitajn leterojn. Ankaŭ la ĵusdate ricevitaj surportis la paperan resigelan bandeton algluitan post la profaneca porkontrola malfermo.

Ĝis tiam ankoraŭ ne konkretiĝis la timata rastado, malgraŭ ke kelka respubliketa soldato aŭ germana militisto estis embuske vundita aŭ senarmigita de la makisanoj. Oni vidis foje marĝene de la vilaĝo kozakajn kavalerianojn tiom altire sveltajn surĉevale kaj tiom nacikostume ornamitajn, kun bukita ĉirkaŭ la talio bunta leda zono, kvazaŭ ili spaliru, parade trotante, la ĉirkaŭan pejzaĝon. Ili estis tiom alloge lertaj kaj samsentaj kun la ĉirkaŭa medio, ke fa-

cilis bildigi ilian ektrotadon kiel ekflugadon de birdoj el herbejo al alto. (La komparo kun birdoj fontas el amasa ties alaerleviĝo ĉe ilia paŝado, ĉerpita el virinaj komentoj de ni aŭditaj el la placeto).

Eĉ la pafpretaj mitraletoj diagonale pendantaj sur kozakaj brustoj kaj la longaj revolveroj, peze malsupren klinantaj la zonon aŭ la poŝon, fariĝis ĉarma kaj cirkla spektaklo. Unuanime, aparte la virinoj, observadis ilin kun ne kaŝita admiro. Kaj foje kompatemaj kamparanoj spontane donacadis superfluajn vestaĵojn kaj ankaŭ nutraĵojn: fakte, kun ili konvenas amika apudado kaj pro ilia foja kapera agado, kaj pro manko de germanarmea kontrolo, kaj por iom bremsi ilian, laŭ popolaj rakontoj, emon transformi eksimpation por virino en rajton ŝin kapti.

Dume, pliprecize denove, ni eltrovis de la pastro pri neamikaj aktivadoj, eble, embuskoj inter partizanoj italaj kaj slavaj. Oni parolis pri diversaj precizaj epizodoj de malamikeco flanke de slavaj embuskintoj kontraŭ italaj partizanoj malakceptantaj, ke limtuŝa parto de Friulo fariĝu juguslava tero. *"Preparigâs la scenaro de la venonta malgaja estonto,* diradis la pastro, *Italujo riskas komunistiĝi. Nin embuskas la risko de slaviĝo".*

Sed fine kion li pensis pri la ne multforaj gerilanoj? pri kontraŭfaŝistaj armeanoj? Pri tio li sin montris multe deteniĝema kvazaŭ liaj vortoj timus aŭskultiĝi eksterdome.

Al ni li klarigis, ke diversaj junuloj, eĉ jam soldatoj aŭ oficiroj, ne scias kion fari, do ili forfuĝas el la armeo, aliaj forfuĝas ĉar ne plu aprobas militon, aliaj por armite batali kontraŭ. Li restis iom distanca el tiuj ĉi lastaj, al ĉiuj tamen liverante porokazan helpon. Ni estis inkognitaj, kaj senvolaj, spektantoj de iu sceno plursignifa. Iun fundan nokton, iuj junuloj voĉetis kaj frapetis ĉe la domparoĥestra pordo, kaj ĉe teretaĝaj ŝutroj, certe serĉante ion manĝotan. Ni saltleviĝis kaj kuris alarmite observi el fenestraj fendoj, pretaj forfuĝi al la kamparo tra la malantaŭa kamuflita pordo.

Ĉu la timata rastado? Ne! Estis nur junaj *vaguloj*, deŝiriĝintaj el siaj familioj por eviti rekrutiĝon kaj eble ne tute simpatiantaj kun partizanoj, petantaj pri io nutraĵa. La pastro por montri sian lojalecon al eventualaj faŝistemuloj, ĉar ties simpatiantoj plu restadis en la vilaĝo kaj en domoj ne malnajbaraj de la lia, malĝenate laŭtvoĉe ekkriis el fenestro kontraŭ la *disiruloj kaj banditoj*, sed tujpost subvoĉe flustris:

*"Puŝu la pordon, prenu de la tablo kaj fulmtuje iru for kun la dia beno".*

Kvar/kvin junuloj eniris, elprenis jam preparitajn nutraĵojn pleniganto poŝojn. Kaj la silento refariĝis! Morgaŭ ni eksciis, ke samtempe kaj najbarloke

estis kunsidantaj ĉefagitistoj de iu marĝena partizana frakcio, kiu, laŭ onidiroj malofte disvastigitaj senaliiĝe, ne multe akordis kun aliaj frakcioj aŭ subfluoj de rezistantoj batalantaj. Eble temis pri kristana frakcio kiu celis damaĝi la malamikon evitante, tamen, kaj precipe, ke la popolo estu suspektata pri kolaborado kaj, do, amase punata.per deportado aŭ dizertigado de lia teritorio. Nome, akiri la popolan konsenton per konsciiĝo ne per la reago kontraŭ la dizertigantoj.

Fermu tiun ĉi paragrafon konsterna informo: vilaĝa junulo, armeaniĝinta, perdis la vivon en nekonata batalo. Kial konsterna se la morto ne plu impresis? Se morto ne konsternis, plej sensaciis, ke tiu junulo volontulis en la germana armeo.

La konversacio, iun vesperon, hazarde enfokusiĝis pri hebreoj, pri italaj rasismaj leĝoj kontraŭhebreaj, pri kies ekzisto mi iam ajn aŭdis kaj kies enhavon mi preskaŭ tute ne sciis. Mi tiun aferon viziis kiel sportecan maĉon, en kiu oni bondeziras venkon al sia afekcie preferata teamo. Krom la hazarda kaj preskaŭ senparola konatiĝo trakoridore de la noviceja biblioteko, nur nun pere de la galenradio mi eksciis ion plian, kaj pli kaj pli trafe mi scivolemiĝis: plurfoje aŭdiĝis pri *"honto de faŝistaj leĝoj kontraŭ hebreoj"*. La pastro-profesoro, pridemandite, informis, ke italaj hebreoj estis devigitaj forlasi ŝtatajn laboroficojn dum iliaj idoj devis viziti neŝtatajn lernejojn, *"sed la milito restigis tia tiun aferon ĝis la germana armeo komencis agi mem en la ĉasado kaj arestado de italaj hebreoj, aplikante la pli restriktigajn germanajn rasismajn leĝojn, devigante "molajn" italajn aŭtoritatojn simile agi. Monsinjoro Santin, episkopo de Trieste, kosmopolita urbo kun granda hebrea loĝantaro, iris persone protesti ĉe la Duĉo, ĉe kiu li ĝuis je ne malbona akcepto..."*. Mi konsciiĝis tamen, ke tiu temo ĝis nun ŝvebis en mi preskaŭ forestaĵo kaj, ke mankis adekvata kaj produktiva resonanco far la edukantaro kaj profesoraro.

Groteskan, je unuavido, opinion subtenis mia amiko tiukaze: laŭ li, la diasporaj hebreoj ne plu ekzistus kiel aparta gento, ĉar ili tra dudek kvin jarcentoj mikspote kuniĝis kun ĉiuj gentoj: ni ĉiuj sange estus iom hebreaj, eĉ se ne laŭ religio aŭ censo aŭ sento; tial persekuto ne solvus la problemon de raskontaminado, se ĝi entute valorus kaj ĝin oni ne pretekstus por persekuti. Eble rasismaj leĝoj trafus falsan celon, eble ĝi kovras aliajn nekonatajn aferojn, malkovrendajn tamen por eviti refalon. Por la pastro, cetere, "raso", kvankam koncepto kun varia geometrio, iom grincas se ĝi koncernas la homaron.

Temen, oni konkludis, kristane agas kiuj kaŝas hebreojn malgraŭ ke ili daŭrigas trakti kristanojn, kiam eblas, laŭ la normoj priskribitaj en Talmudoj.

Kvankam tiaj interparoloj, pri la problemo, komplete, ni konsciiĝis en ĝia efektiva amplekso nur post la militofino. Dume la plejo estis ke ni por efikigi nian sindefendon emis ignori la aliulan sorton.

Alproksimiĝanta la kristnaska festo, la pastro kunvokis, en la paroĥestra domo ĉar malpli malvarma ol la preĝejo, la junularon, kiu fine konsistis preskaŭ ekskluzive el junulinoj. Ni estis prezentataj kiaj du kvestantaj fratuloj okaze gastigataj, kiel kutime, ĉe la paroĥestra domo. La konversacia temo montriĝis tuj tre nekutima: "*Ĉu tiu infano, simbole en la kripo kaj iam reale en portebla bestmanĝujo, estas vere la enkarniĝinta Difilo aŭ nur la filo de nia deziro?* nome la filo de nia bezono de senkulpeco kaj de renoviĝo kaj interna refariĝo? Hodiaŭ oni dirus: ĉu ĝi respondas al arketipo kuŝanta en la nekonscio de la homa psiko aŭ ĝi trafas historian kaj realan konsiston?

Ne dubendas, ke por la paroĥestro kaj la aŭskultantaro ĝi kadras historiajn kaj realajn eventojn. Sed ĝi samtempe korespondas al bezono por la homa psiko, do al la arketipo. La paroĥestro sin montris (mi tion deduktis jarojn poste) ŝarĝita je la konceptaro kaj problemaro de C. G. Jung, kiu kredas trovi stampitaj en la homa nekonscio skemojn, ja arketipojn kiel prastampojn, kiuj enkadrigas, aŭ modifas, la percepton de la realo: “arketipoj estas universalaj heredaj dispozicioj kiuj ekde pratempo kaj ĉiam denove elĵetiĝas el nia eno per impresaj, mitaj, numenecaj simboloj”, provis komprenigi ĉe la popolanoj la paroĥestro. La arketipo, se ekzempli, de la *tute senkulpa infano ĉion renoviganta,* je nivelo de psiko certe ekzistas kaj spertiĝas kia bezono de kulpoliberiga savanto kun kiu identiĝi aŭ je kies kvalitoj oni emas revestiĝi. Sed nenio malhelpas - estis la komentoj instinktaj sed ne maltrafe - ke la realo foje korespondas al la arketipo kiu ĝin senvelke akompanas kaj per si povas plibone komprenigi la realon mem. Ĝi vere povas helpi en la interpretado de la historiaj okazintaĵoj. Sed arde deziri ion, ne malhelpas, ke tio reale okazu. Jam aliaj arketipoj surfacigas faktan enveriĝon, ekzemple tiu de la refariĝo nova pere de la patrineco: la patrino vere naskas; aŭ tiu de amatulo celanta al la ama sinofera sindediĉo kaj kunfandiĝo kun la amatino: ĉu tio ne okazas en geedza unuiĝo kaj kuniĝo?

Kristanismo ŝajnas eksplicitigi kaj plenplenigi tiujn arketipojn, kiuj certasence liveras pluan favoran pruvon por pli motivi ĝian akceptiĝon: kristanismo ŝajnas respondo al la postuloj de enhoma nekonscio! Tezo aŭdaca, kiun tamen, pli akurate dispartigite precizigita, mi trovos en postaj lernendaĵoj pri psikologio. Aŭdaca sed ankaŭ kaj eble ekstere de la komprenscipovo de la publiko.

Kaj tiupunkte oni rehaltis sur la reala kripo, la alloga dolĉeco de la infano kaj ties donacado de homaj ĝojoj. Tiupunkte la publiko ŝajnis pli partoprenanta kaj kuntrenita, eble taksanta la antaŭan prelegan eron iom abstrakteca. La popola partopreno esprimiĝis preĝe, kante, lude kaj babile.

Iom doktece okupis la scenon ankaŭ la du pliestimataj uloj de la loko, nome la kuracisto kaj apotekisto, kiuj samkoncepte esprimiĝis per malpli komunikiĝaj vortoj, sed tuj ĝuante je la komuna konsento.

Ni du, franciskanoj, do filoj de la inspiranto de unua okcidenta realisma kripo, sprosigis el la historio priskribon de la betlehema origina kripo, distingigante tion historian el tio piece fantazia.

La maljuneta fratino de la pastro, kvankam lameta je unu kruro, piede reiradis plurfoje tage ĝis la preĝeja placo en kies debitejoj troveblis ankoraŭ io nutraĵa: kaŝtanoj, rikoltitaj montare de infanoj kaj eksterkupone vendataj al malsatemaj aĉetantoj. Kelkajn eknoktiĝojn, kiam la frosto firmigis dome la loĝantojn, kun la pastro eĉ ni, iom trafrostitaj, promenis ĝis tiu publika placo por alverŝi la poŝojn per tiuj rostitaj kaŝtanoj. Ni promenis, trankvile manĝante, ĉar ni en tiuj horoj estis nerekoneble viditaj, eventuale, de malmulte da personoj dum la cirkulprohiba tempo ne rajtas bloki pastron, kaj liajn akompanantojn, se alvokatan de malsanulo, kiu ne nur pretekste tie kaj tie en la paroĥeja teritorio vere ekzistis: kaj la pastro havis ĉiam preta vizitotan malsanulon! La enuo, tial, kiu ne evitis alpintiĝojn en ĉiamdaŭraj horvesperoj, trovis momentan distrigilon. Al ni, fakte, komenciĝis ne plu sufiĉi la studobjektaj novaĵoj de la antikva historio aŭ kristana latina literaturo, al kiuj ni jam alproksimiĝis en nia furora studa progreso.

Kiel lasta, sed nemalgrava kaj ne forgesita, distro, eble pli kurioza ol raportinda, estis jeno: preskaŭ ĉiunokte alte super nia kapo zume aerpatrolumis alianca esploravio senĝene eliriganta mitralpafilajn kuglojn aŭ brulbombojn sur ĉiuspecan luman. Aliancitoj eble per tiu teruro celis kunpeli la popolon al ribeliĝo kontraŭ la okupantoj.

*Pippo* (joĉjo, onkleto, jozefeto) la popolo ĝin amuze kromnomis eble pro ĝia kadenca insisto kaj senofenda ĉeesto: senofenda se atenta obskurado malhelpis al ĝi vidi aŭ supozi ion militecan. Proksimume centoj de tiaj "pipoj" ĉiunokte fluge operacis kiel nevidebla glisilo, plutenante la altecon de cent/ducent metroj, super la norditala ebena teritorio: po ĉirkaŭ kvindek/cent kvadratajn kilometrojn.

Oni ĵuris, ke foje junulaĉoj, distrocele, ie kaj tie trakampare ekbruligis stoplojn por provoki "pipan" reagon dum la sinsekvaj rundaj karuseloj. La reago

estis mitralado pro supozita, esupereble, militeca aferaĵo. Foje la sekvan matenon estis troveblaj surterene propagandaj paperfolioj. Pippo sume distris ankaŭ nin, escepte ĉekomence de la unuaj ĝiaj vizitoj kiam germanoj aŭ iliaj kolaborantoj provis per maltaŭgaj mitralfusilaj kugladoj trafi nevideblan malamikon brave rondirantan en la noktaj ĉieloj.

Sed tiuj aviadiletoj, leĝeraj kun unu aŭ du okupantoj, se ne pro malamikaj kugloj foje falis el si mem. Unu el tiuj hazarde, eble averie, elaeriĝis nemalproksime de la vilaĝo: oni aŭdis la falbruon sed neniu alkuris: nek vilaĝanoj, pro timo renkonti armeajn patrolantojn dum cirkulmalpermesa tempo, nek soldatoj eble tro foraj. Okazis surfone de tiuj eventetoj, ke oni pli konkrete "ekspertizis" la kadukiĝantan konsiston da garnizonantoj (kozakoj aperos kelkajn tagojn poste), sed samtempe plikreskis la timo pri reago de desperuloj. Neniu malkovris kien rifuĝis la aviadila skipo: eble ĝi scipovis kien sin direkti, plie oni parolis pri kelklokaj dumnoktaj paraŝutigaĵoj de milita materialo, okulumita kaj serĉata ankaŭ de civiluloj ĉar entenanta, krom leĝeraj armiloj kaj municioj, manĝaĵojn kaj vestaĵojn. Nerajtigitaj alpropigantoj de tiaspecaj pakaĵoj, laŭonidire, troviĝis inter partizanoj kaj faŝistoj, foje interkonsentiĝantaj. Tiu-ĉi-kaze ili nur mirakle evitis interŝanĝon de kugloj.

Ne povis manki la momento, aŭ la tento, de la poezio. Eble por rompi la enuon en la enuan etoson, eble por neceso enkanaligi la superfluon de niaj sentoj, ni engaĝiĝis en la soleca kreado de "*enurompaj*" poemetoj legotaj kaj taksotaj… ĵurie. Ni estis ankaŭ, tial, la sola juĝantaro, kiu tamen fariĝis ankaŭ elcerbiganto de agrablaĵoj unu por la alia. Bedaŭrinde mi ne konservis la poemojn, efike pentrantajn plej subtilajn movojn de liaj emocioj, de mia amiko dum la miaj havis alian sorton ĉar ĝuste tiam ekprovis impulson ekentaglibrigi mian senartacelan improvizaĵon, same kiel aliajn pliposte, trovintan inspiron el vilaĝa eta tombejo kiun ni travidadis el la fenestro de la hejma malantaŭa flanko kaj kiun ni atingis, kiam permesite de la pastro, por malrigidigi la gambojn kaj venki ankaŭ permove la frostiĝon. Neniu paroĥestra komplezo al niaj strase poemecaj produktaĵoj kiuj certe ne malcelis artaĵon sed ĝin ne pretendis, des pli ĉar la pastro ĉi-foje spektanto kaj juĝanto trabatis siajn vizaĝmuskolojn por sin reteni el dormetemo dum la de li kompleze postulita recitado.

En unu el tiuj taglibre restintaj poemoj, karambolojn nedisdegnanta, ankoraŭ ne sufiĉe bakita pasto de emocio-sono-ritmo, la "poeziumanto" kredas travidi, sub la neĝa freŝa tavolo, en la tombaj ornamaĵoj, spurojn kaj signojn de la pasintaj tenerecoj kun la vivantoj kaj de la serĉita kaj esperita, aŭ almenaŭ alude ne malesperita, transtomba vivo. Ĉu la versoj transdonas ion pli ol

tiu duoncerebra komento?

***Vintre inter solitaraj tomboj***

1. Glaciaj neĝaj kristaloj
   en silentaj bandaĝoj,
   varie opalaj franĝoj
   ĉe eksteraj domaj bordoj;
   nenio en la aero
   neniu sur la vojero.

2. Sur la sengarnaj murbranĉoj
   glaciaj sagaj pintlancoj,
   vitre veluraj aranĝoj.
   Padoj je tretita neĝ',
   la pinoj, la ŝtona seĝ',
   la potŝirmiloj senfloraj,

3. tempaj sentempaj gardecoj
   de la rompitaj dolĉecoj:
   kampo de homoj senvivaj
   tra la giloŝantaj vivaj
   rondaj kvadrataj ŝtontombaj
   el freŝa neĝo inundaj.

4. Ŝtonoj krucoj nomoj datoj...
   al nova vivo aludoj:
   kadavroj por renaskiĝi
   kaj por fine elteriĝi
   kaj por aliri vivuloj
   kaj riveliĝi ĉiamuloj.

Tratombe paŝante ni faladis en teologiajn problemojn, ne jam en ni kritike enkadrigitajn. Kiamaniere Kristo nin liberigis el morto, se homoj daŭre mortas? El niaj meditadoj klariĝis, ke la liberigo de Kristo koncernas la timon de morto ne la morton, la postmorton ne la morton. Mortemulo konkrete scias, ke per la morto li falas en la diajn brakojn. Nekredanto alfrontas la morton kiel finan viveventon aŭ provas fajfe senpripensi pri ĝi.

Pasis kristnaskaj festoj, pasis la novjariĝo, pasis la epifanio kaj ni pretis re-

freni "Epifanio ĉiuj festoj al forgesio" kiam fine el la horizonto elvenis la milfoje elvokitaj fratuloj kunportantaj, krom liveraĵoj, la novaĵon tiom atenditan: ni estas liberaj, oni trovis niajn burokratecajn dokumentojn nin liberigantajn el soldatservo kaj, precipe, el akuzo pri dizertado!

Promenante tra la vilaĝo kaj salutante virojn virinojn infanojn animalojn neniam renkontitajn, ni rikoltis gratulojn de ĉiuj al kiuj la pastro kaj ni estis fadenantaj nian ĉe pastra domo enkarceran aventuron. Ili aplaŭdis ĉar, eble, ni estis "herooj" lokomerite kaj pro "ilia" paroĥestra, fine konata, protektiga bonagado. Estis precipe junulinoj interesiĝantaj kaj komplimentantaj. Miaj sentoj estis priradiataj de nova penso: mi estis imaganta, ke ili min rigardas fianĉiniĝokazo perdita por si kaj al mi ŝajnis, ke tia ilia emo des pli pliiĝus ju pli mia vervo rakontadis kvazaŭ sugestiante tian ilian, eventuale nekonscian, penson: penso rajtigita de la ne nura ŝerca gurdaĵo laŭ kiu junuloj jam *ŝpare* tralande notiĝas same kiel la malabundaj anonaj nutraĵoj de la *provianta karto*. Apika psika perturbo, tamen, tujposte, investis min: ne orgojla kaj vanta mi min juĝadis sed prefere ne jam laŭdeve mastranta mian koron kaj ĝian bezonon sindoni. La interna riproĉo daŭrigis alterni kun la fantazia babilado kaj la supozitaj aspiroj de tiuj fraŭlinetoj. Fakte, longe haloe traflugis en mia animo sentokulpo kvazaŭ tiu ilia miasupoze bedaŭrata perdo estus kaŭzata de mi, de mia obstinaj forveturo kaj plurestado en la senfianĉina kaj senjunulina vokiĝo: ŝajnis, ke en ĉiu junulino mi estas perdanta ion ne plu troveblan, kaj ĉifante okazon feliĉigi admirantinon. Ĉies mantuŝante, mi ridetis trairite de nedifinebla bedaŭro kaj dezirante resti sola por ĝin kontempli kaj kontentiĝe analizi.

La sekvantan matenon ni forveturis kun niaj pakaĵoj sur kaleŝego, sed ni volis iom marŝis senĉevale: akumuliĝis tiom da energioj en miaj kruroj, ke mi povus senlaciĝe rondiri la mondon, kiu en tiu momento konturiĝis kiel libero. Adiaŭ, Monteprato kaj najbaraĵoj! Mi iras al libero, al libero!

Tamen ĝojo kaj konfuziĝo ne malhelpis, ke io nostalgia ekbaŭmu el mia disiĝanta spirito. Mi ne revidos, tujpost la milito, la vilaĝon aŭ kelkan el ĝiaj enloĝantoj! Revizitante, memvojaĝe kun mia familio, la lokon post kvardek jaroj, ĝin mi malkovris neniel similan al la figuroj de miaj memoraĵoj kaj neniu el loĝantoj alparolitaj montris rememori aŭ esti aŭdinta ion similan, eĉ la nova paroĥestro ne trovis postsignojn de nia restado; nur la tombejo ŝajnis simili al tiu iama, sed, eble, nur pro tio ke en mia memoro ne estis registritaj la iamaj nomoj sur la tomboslaboj. Ĉu pli erarvaganta iam aŭ tiam? Konstati, ke neniu scias, kaj do altetaksas, tiun aventuron estis kiel abrupte konsciiĝi pri senkonsisteco de ĉio. El forgesiĝo al neniiĝo!

Eble por lasi, ke pli rapide malfadiĝu pensoj kaj emocioj, ni trotigis la fortikan ĉevalon. Post du horoj ni trapasis Ĝemona/n observante faŝistetojn vigile babilantajn antaŭ la kazerna pordego larĝe aperta. *Ili vigilas por la nenio da homoj kaj aĵoj,* elpuŝis okaza piediranto sentone kun ŝajna, eble vola, senemocio.

Tuj post la Ĉefpreĝejo, preskaŭ fronte al la fama grandioza statuo de Sankta Kristoforo, sub ekvarmeta suno ok aŭ dek faŝistaj virinetoj pimpaj en siaj nigra kolonijako, plisjupo kaj blanka ĉemizeto kun kravato saltetanta sur la mamozono jam ekvolbiĝanta, gaje babile bruadis kvazaŭ ĉirkaŭe kreskus rozoj kaj floroj. En tiu ne malplaĉa faŝista sobra uniformo, ili emanis ĝojon kaj senkonscion, senpripensan allogiĝon kaj foriĝon el la vivo. Eble ili ne eksupektis, ke la katastrofo jam ekfalas sur ilian kapon forbalaonta ilin el ilia hejmoj kaj eĉ el la vivo mem, aŭ, eble, ili bruridis por forfuĝi el tiu ekstringa penso kaj certe ne sciis, ke mi, inter homoj antaŭvidantaj la venĝan momenton, ilin rigardadis kun kompatema simpatio kaj instinkta protektemo. Ĉu en iliaj familioj oni ne travidas la direkton de la disvolviĝantaj eventoj, aparte nun kiam la anglo/amerikanoj jam vaĉas kaj premas ĉe Florenco kaj Bolonjo, do la centra Italio jam okupitas, dum la rusoj renversige jam ektratranĉas la orientajn germanajn limojn, ĉiuj ne indulgemaj kun la restaĵoj de faŝismo?

Mi ilin rigardis longtempe, sen aŭskulti alies komentojn, sen aŭdi la alarmsirenon, apenaŭ moderigante mian fantaziadon antaŭ la stratblokanta svarmado de timigitaj homoj. Momente, eĉ timante pri ili, mi deziris esti kun ili por festi eble nenion, nenion kiu momente efikis por zomi for de la realo; ilia antaŭvidebla sorto ĝermigis timon kaj kompaton pri ilia ina juneco, kaj ekirigis fluon de miaj kavalirecaj fizikaj kaj plendaj defendoj iliafavore. Fluaĵo de ĝojo inundis min same kiel, infanaĝe, mi luliĝis tra amataj brakoj. Tiu ineco brilegis kvazaŭ la celo de l' mondo, la kontentiĝo de ĉio! Kaj pormomente mi min fantazie dekoraciis la kavaliro savanta el minaca danĝero.

Delogitaj de la insista sirena invito iri direkten al la kontraŭaviadila rifuĝejo, ni dekaleŝiĝis kaj kuris al la apuda subrokejo, kien post ne multe alvenis ankaŭ la virinetoj faŝiste vestitaj. Ili obeis al pli altrangulino, eble dudekjara, kiu distribuadis subvoĉe taskojn por, je la fino de la alarmo, ordigi la homdefluon, kaj intertempe inventis kaj ekirigis luddistraĵojn, aparte kun etulinetoj, dum mem kaj ekadoleskantinoj ne kapablis sin reteni el ridado. En la trafa momento ili sin metis ĉe la pordoj, milde severemaj en tiom pura uniformo, ambaŭflanke de la roka rifuĝejo por semi gestajn graciaĵojn inter homoj silentaj aŭ subvoĉe graŭlantaj. Kaj viroj paŝante ridetis kaj ĝisis kaj sin turnis por rigardi, eble tuŝitaj de sentoj similaj al la miaj.

La kaleŝo kun ĉevalo restis, iom pli fore, sub ilia kontrolo.

Aventurfine, ni eniris la seminarian studentejon, kie nin festis kvindeko da "filozofoj kaj teologoj", jam kiel ni malordigitaj en ĉio, studado kaj preĝado kaj homaj rilatoj, ĉar la lernejo kaj rokrifuĝejo alternis ofte kaj longhore.

Anstataŭ rokrifuĝejon, al kiu aliri kun faldeblaj taburetoj, aŭ alian ŝirmilon kontraŭ preskaŭ ĉiutagaj ĉirkaŭe aviadilaj bombadoj sur foraj fervojaj ganglioj aŭ sur precipaj strataj konvojoj, eblis elekti ankaŭ alian solvon: supreniri la kvarcent- aŭ kvincent-metrajn montojn, superstarajn ŝultre de Ĝemona, de kie eblis observi la okazantaĵojn transformante, komplice de la ofteco de la malhumanece obscenaj eventoj, la militon en nemallogajn spektaklojn. Sekvajn semajnojn, la tuta klerika studentaro, je la unua alarma siblo, rapide marŝadis ĉiu kun kelka libro subbrake al la proksimaj nordvilaĝaj montetoj sur deklivoj de la monto Glémina, kie riskoj estis minimumaj kaj la spektaklo, okaze de bombado, garantiata. Frua printempo, suna kaj senpluva kaj sennuba, prosperis al la ampleksiga vidado de la tuta panoramo lasante la impreson troviĝi, nevundeblaj spektantoj, inter la militaj eventoj. El tiuj impresoj elstariĝis jeno: iun sunan matenon ni vidis reale disfendiĝi kaj malaperi, sub bomboj, en svarmego da subita densega polvonubo, la fuorton de Osoppo kun sia tuta historio. Jen la sinsekvo: surdiga siblo de videblaj bomb-grapoloj dehokitaj de aviadiloj, enrompo de elgrunda polvo, kaj tujposta eksplodbruego. La polvo stagnis sub la loka ĉielo laŭ horoj lasante fine la fortresan altaĵon senigata je ĝiaj muroj kaj turoj, kaj senkonstrua kiel kalva kranio.

Popolanoj, aŭskultantoj de Radio Londono aŭ de la Voĉo de Ameriko, raportis pri aliancaj ekskuzoj pro mistrafe neevititaj civilaj konstruaĵoj aŭ senutilaj ruinigoj same kiel en la kazo de Osoppo sensoldata kaj sen ajna kazerna aŭ armea deponejo, kaj refrenadis: *"Ju pli da pardonpetoj, des pli da rajtiĝoj bombadi!"*. Kaj, tamen, ĉiuj deziris vidi aperi el la horizonto la unuaj novaj okupantoj kies okupo bildiĝis je vaga libereco kaj abundaj komfortaĵoj.

La militaj eventoj jam sin derulis al finiĝo kaj ĉiutage ĉiam pli evidentiĝis la kialo pro kiu ni estis invitataj kaj insiste urĝataj ne paroli senŝirme aŭ sensingarde, malgraŭ ke ties plenumiĝo estus nur apenaŭ praktikebla. Ekaperis flosen, fakte, ke iuj profesoroj ne malnutris simpation al Germanujo, konsiderita disciplina elemento por la civilizacio, kaj bastiono, fakta kvankam ne tiucele intencita, kontraŭ la dogmoj de sovetia avancanta komunismo: Sovetunio preparinta konkeron de la limtuŝaj orientaj eŭropaj landoj, kiel ponto al la tuta mondo, kaj altirinta Germanujon al preventa, sed publike taksebla agresa, milito! Unu el tiuj, en feria tago, promenigis la klerikaron al monto Glémina tuj

ŝultre de Ĝemona el kie eblis observi movojn de germanaj trupoj descendantaj aŭ direktiĝantaj al Germanujo. Tiuj vidaĵoj, por li pli tristigaj ol informigaj, trafis okazon por ke li disprezentu siajn prisituaciajn starpunktojn kaj rezolute rezistu al niaj duboj pri la pravoj de Germanujo. El lia minca kaj tamen muskola energio la vortoj elbuŝiĝis malrapide kvazaŭ retenataj de la neceso kontroli la troan pasion kaj sensentemaj pro tro longa senesprimiĝo, lasante spacojn al niaj respektaj kaj malrespektaj reagoj.

"Germanujo deportis centmilojn da italaj soldatoj ilin enfermante en koncentrejoj", ni replikis obĵete. Ankaŭ inter kunstudentoj estis dezirantoj ke la profesoro pravus. Mi situis, sencerta, inter koro deziranta ke Germanujo ne militperdus kaj racio kiu ektravideblis alie.

*"Jes, sed je kaŭzo de la abrupta renversiĝo de Italio kiu akceptis armisticon ponardante Germanujon ĉe la dorso":*

"La germana registaro estis preta enprizonigi la papon. Kiu bela kredbastiono!", aldonis alia studento esperante trovi respondon ne tute favora al Germanujo.

Tiupunkte la profesoro aliris al hajlo de akuzoj, al bukedo de misfaroj de la aktuala papo, Pio la 12a, "kontraŭ Germanujo". Li neniam pistis ankaŭ "kontraŭ naziismo" aŭ kontraŭ milito kaj deportadoj.

"Ni ne pri ĉio informiĝas. Ĉiukaze oni pafas eĉ la malon, tio estas la papo kondutis kun ne sufiĉa lerteco, tio estas li ne malkuraĝigis la rearmiĝon de Germanujo. Ĉu tio samvojas kun viaj rezonadoj?", respekte enirigis alia kleriko.

*"Li igis Pion la XIan strebanta kontraŭ Hitlero, eĉ li persone skribe verkis la* MIT BRENNENDER SORGE (1937)[3] *kaj ĝin legigis germanlingve en ĉiuj preĝejoj samdimanĉe, ekstartigante antaŭjuĝojn kontraŭ Germanujo, de kiuj profitis, antaŭ kaj dum milito, la aliancanoj. Tuj post la subskribo de la Konkordato de la Sankta Seĝo kun Germanujo, li publikigis en L'* Osservatore Romano *noton en kiu estis artifikece klarigite, ke la katolika eklezio ne intencis, per tiu konkordato, apogi doktrinojn kaj politikon de la Tria Regno, sed nur favori la religian pacon inter germanaj popoloj. Tio ĉi konfiguriĝas kiel provo disigi la germanan popolon de sia registaro, ĉu ne? Kiu registaro akceptus tion? Kiel Statsekretario (1937), li per al sanktejaj demarŝoj publike veis kontraŭ Germanujo pro fantaziaj persekutoj kontraŭ katolikoj kiuj, male, kulpis je gravaj krimoj. Tiaĵoj armeigis, psikologie kaj propagande, la malamikojn*

[3] Konfidencis voĉo laŭ kiu Edita Stein, katolika filozofino juddevena kaj mortigita de nazioj, sugestis al la papo la senprokrastan proklamon de tiu kondamno, per letero evidentiganta la antikristanecon de naziismo; la voĉo trovis poste konfirmon. Nun Edita Stein estas levita al la gloro de la kanonizita sankteco.

*de Germanujo, ĉu ne? Vatikana Radio, ĉiam pretas kondamni militajn ekscesojn de germanoj, silentis pri tiuj de aliancanoj kiel la bombado sur la abatejo de Montecassino kaj la nuligo, kun ĉiuj loĝantoj, de urbo Bremo. La papo protektis ankaŭ adversulojn al la Tria Regno kaj kurigis kontraŭ Hitlero akuzon je framasonismo. Kaj krome la kristnaskaj radimesaĝoj plenplenaj je aludoj al supozitaj misfaroj de Germanujo... Tio ĉio kompromitis la rilatojn inter Germanujo kaj la Katolika Eklezio. Li ne uzis similan sintenon rilate komunismon. Lasttempe li sukcesis fiaskigi, per la sekretaj vojoj de la vatikana diplomatio, la iniciaton de la* "generalissimo" *Franko celantan kupli Germanujo kaj aliancanojn kontraŭ Sovetio, forĝejo kaj forcejo de ateismo en la mondo".*

Lia parolada tensio nun fariĝis ŝtormanta parolado kaj tiom elaniĝis, ke li aspektis ne plu tute sinrega kaj konsilis al ni ne rebati, ke Pio la XI jam reĵetis, kvankam vane, ateismeman komunismon en la enciklika letero *Divini Redemptoris (1937 n. 73 kaj diversloke);* ke nazioj, por fermi la buŝon al la papo, reage al papaj protestoj pro perforto aŭ amasaj deportadoj, pliintensigis la jam leĝe dekretitajn persekutojn por ke tiuj ĉi instigus la papon al silento. Eble ankaŭ pro tio oni ne ĉagreniĝis kiam la papo, rigarde sinsekvajn gravajn aferojn, preferis kaj agadi kaj agumi per diplomatiaj vojoj kaj inspirante la katolikajn komunumojn al la protektado de deportitoj aŭ je deportado minacatoj.

Kelkaj el ni kunligis, el lernecaj lecionaĵoj, lian nun eksplode senrezervan politikan elekton kun subtilaj liaj instruaĵoj. Elĉerpante, fakte, el la historio, li deliĉis ekzaltiĝi pro la sentima decidemo de nia religiula fondinto kaj ege admirato de italoj, sankta Francisko el Asizo, aŭ pri ties senhezitemo en la orientigo kaj altcela regado super fratioj, malgraŭ kaj ĝuste pro interfrataj ekkonfliktoj kaj akuzoj kaj klingeskaj kalumnioj: *"traktoj difinantaj lian totalismecan stilon, kiu ne preterlasas okazon por energie treni al la plej altaj valoroj, geniece intuiciigitaj kaj parafrazitaj. Nur geniuloj ludas tiun rektan rolon, malgraŭ suferigaj miskomprenoj kaj maljustecoj kaj kalumnioj. La samo okazas hodiaŭ: supozitaj politikaj kaj militaj misfaroj ŝuldiĝu nure al elvojigantaj akuzoj de propagando de multfaceta malamika atako".* Klare nun sur la fono aperas la Duĉo: genia kiel sankta Franĉesko kaj kiel tiu ĉi mistaksita pro la suferoj altruditaj de la gravaj destinoj de la patrujo!

Ni nun klare komprenas tion kio tiam vage subrestis: ke la totalitarismo de faŝismo reproduktas valoron pro ĝia supera kaj tuteca enrigardo, kaj ke la politiko de Mussolini trenas reagajn kalumniojn pro la gvida stampo de lia geniuleco!

Geniuleco per kiu li eĉ ne ĉiam konsentis kun Hitlero *"kiu milite atakis kun unu kontraŭ dek (aludante Sovetunion)".*

Por pli ilustri la kadron de sintenoj pri la *celoj kaj esperoj* je kiuj estis taskigita Germanujo, direndu ke ankaŭ mi iam nutris tian vizion: mi intime trapikiĝis pro ĝia misakordiĝo kun kristanismo kaj pro lastatempaj krimoj kaj masakroj, kiujn mi longatempe provis eklipsigi el mia horizonto, kaj nun en tiu dialogo al mi ŝajnis, ke io ekscesas ankaŭ ĉe mia flanko, nome, ke kun la malvenko de Germanujo nuliĝus okazo pli efike savi la kristanaron el marksismaj kaj marksistaj allogoj.

Pri la lasta aludo al la obskuraj kialoj insinuantaj la oportunecon de la rasecaj leĝoj kontraŭ Judoj, li remetis:

*"Por eviti, ke judoj pligravigu judan koloniadon ĉe eŭropaj kaj sudamerikaj ŝtatoj. Jam ĉio judis!".* Sed, je lia senkulpigo, koniĝis, ke ankaŭ li ankoraŭ ne konis la gravecon kaj vastecon de la kontraŭjuda persekuto, kiu poste meritis la difinon de genocido. Kaj tie ĉi li listis longan serion de instancojn publikajn kaj privatajn publike aŭ sekrete posedatajn aŭ mastratajn de la juda potenco.

Certe li ne sciis en tiuj horoj, ke tiu *subtila kolonia potenco* jam estis en Eŭropo, eventuale, draste malkreskigita se ne eklipsigita. Reveninte al la studentejo oni sciis postkelke da tempo, ke li estis riproĉita pro rompo de sia iama promeso ne paroli pri politiko aŭ milito kun la studentaro.

En tiuj tagoj venis atendita novaĵo, ke la aliancanoj transpasis la idealan Gotan Linion, lastan baraĵon al Norda Italujo.

### Ĉapitro oka
# Konventa kaj klerikeca travivado

Finfebruare 1945 do ni revenis, kiel dirite, el vagabondado, al la konventa studentejo. Rekomenciĝis la klerikstudenta vivo. Post festaĵoj, brakumoj, klarigoj, mi kaj mia amiko estis loĝigitaj ĉiu en laŭokaza ĉelo ĉe la alnorda parto de longa koridoro de la dua etaĝo. La vetero daŭrigis sereni, la frosto glaciigis ĉion likvan, la malvarmo malmoligis la korpon: la piedoj, nun senŝtrumpaj, pli ol aliaj eksteraj membroj, sentiĝis tiom malmole, ke el mi haste svagiĝis la fiereca rakontemo pri la ĵus pasintaj erarvagaĵoj: post du/tri tagoj la pasinto ne plu ekzistis ĉe ni kaj ĉe nia kunstudentaro. Pri piedoj, ĉesinte la kondiĉo de malfavoro pro ĝena vagado, ili, kiel aludite, ellasis la rajtojn surmeti ŝtrumpojn kaj devis konduti laŭregule: sin enŝovi en pezajn ŝuojn je dika poploligna plandumo kaj ledstrie kovritajn, por iom prokrasti la momenton de la plumba frosta malmoliĝo. Sub la piedoj finvintre, iom nunjare sed pli evidente en la venontaj vintroj, formiĝis haŭtaj malmolaĵoj kaj samtempe de la piedoj la ekfrostiĝo pinĉe transdoniĝis al la nazo kiel konstanta duonmalvarmumo, al la daŭre interfrotiĝantaj manoj kiel frostadabscesoj, al la oreloj kiel ruĝaj ŝvelaĵoj. La eksteraj pintoj de tiuj sentoorganoj ĝismedole degelis, oni observis, nur en la komuna salono aŭ en klasĉambro, la solaj varmigitaj, kiam en ilin estas allasata enrompo de la sangocirkulado puŝita ankaŭ de insista, kaj nesingarda, frotetado.

Bonŝance la klasĉambron, je nia dispono ankaŭ en la studadhoroj, oni stove hejtis. Tie mi ĉesadis piedmovi kaj salteti por daŭrigi senti la piedojn koneksaj al la cetera korpo.

"*Penitenco pro siaj pekoj*", oni vortigis; kaj, ĉe mi, la memoro igis ĉeestaj tiujn fiajn dezirojn, ke milito venu pligrandigi mian patrujon kaj orgojlecajn patrujaĵojn; sed la malkomforta eventaro ĝenerale ne malpliigis mian dediĉon al la studo. Dio, male, en miaj juĝoj, konturiĝis al io nova: je teorinivelo li ekscitas ĉiam ĝojon, amikecon, certecon, sed je sentnivelo li daŭrigis esti, foje, perceptata kiel ebla, se ne kaduka, ĝojo, rezerva amikeco, eventuala apogilo dum momentoj de necerteco. Kiu scias ĉu eĉ en miaj kunuloj sentiĝis tia animŝanĝiĝo? Aŭ ĉu tio ekdiferencigis min de ili?

Al mi agrablis ankaŭ, post malfrostiĝo kaj varmiĝo en la komunuma salono, plurtempe resti ĉele, tiel, ke la studadon interrompis, krom alarmosireno,

ankaŭ la elstrata bruo, ĉar el mia ĉambro, ununura en la tuta klerikstudentejo, eblis vidi kaj observi travitre preterpaŝantojn kaj preskaŭ aŭdi iliajn babilaĵojn kaj la eĥon de iliaj paŝoj. El la tembro kaj laŭ takto de la paŝobruoj, perceptitaj antaŭ ol la preterirantoj eniros la areon de mia vido, mi provis diveni kaj imagi la individuan aĝon kaj fizikajn aspektojn de la personoj. Tiu libera spaco ebligis distriĝan veton laŭ miaj ekvekiĝantaj fantaziaĵoj: ĉu viro? ĉu virino? ĉu junulino aŭ infano? La malvarmo la irantaron tiom supervestigis, ke maleblis distingi junajn de maljunaj inecformoj, tamen la paŝmanieraj bruecoj iom min spertigis vete antaŭkompreni. Mi min perceptis scivolema kaj eĉ duonmalplezuriĝanta kiam la paŝbruaĵoj kun la sekvaj aperantaj figuroj rivelis maljunulinojn anstataŭ junulinojn. Ĉu mi recidive ne rezistas junulinecajn atakojn? Ĉu distriĝo aŭ nostalgiemo kun nekonscia sopiro?

Se tiu fenestro restis faktoro de tia ŝrumpiĝo, ĝi ĉesis influi apenaŭ kelkajn semajnojn poste. Belan posttagmezon, reveninte al la ĉelo kun miaj libroj subbrake, mi trovis surprizon: enrigardo al la surstrataj preterpasantoj ne plu eblas. La fratulo aranĝanta (panfaranto = ĉiofaranto, ni jam lin difinis), geniuleto ĉiam zorganta pri sennombraj loĝejaj riparendaĵoj neprigitaj de la eluzo de kvindeko da loĝigitoj, aferumaĉis ankaŭ en mia ĉambro por alkroĉi, inter la vitroj kaj ŝutroj, al la metala krado, alian fiksan mezaltan lignan ŝutron malebligantan transrigardi al la paŝantoj. Mi povis vidi nur tegmentojn, etendiĝantajn ĝis kie ili ne plu distingiĝis de la kamparo, same kiel el ĉeloj de miaj kunstudentoj. Ekŝvebis sur miaj okuloj, liberaltire, parta ĉielstrio el kiu, tiujn noktojn, tralumiĝis, kelkhora turniĝe fuĝanta pala luno kun minimuma stelporcio, kiun mi, eble, pli frue ne rimarkintis. Bonŝance la geniuleto forgesis obskurige enkradigi la tutan fenestran aperturon min apartigante komplete el la mondo!

En la porfratia salono oni sukcesis instali laŭokazan radioaparaton el kiu eblis aŭskulti nur informojn el la "Sociala Respubliketo" ĉar tiuj de aliaj radifontoj estis furioze brusible distordataj de la politika reĝimo kaj severe, pro timo de subita kontrolo, malasistataj de superuloj. Malprudentuloj loĝis ankaŭ inter ni: oni rakontis pri ne konjektitaj policaj vizitoj sekvitaj de severaj admonoj pro suspekto ke la konvento kaptus kaj buŝe disvastigus inter urbanoj aliancan propagandon. Kaj, krome, inter la fratularo plu restis, kelka fantaziulo esperanta je morala kaj milita releviĝo de la jam degenerinta kaj ŝrumpanta faŝisma reĝimo. Ĉiukaze kiam el la aparato eliris kanzonoj kantataj de virinaj voĉoj, la majstro de disciplino ektrovis pretekston por ĉion malŝalti. Sed kiam la fratio volis rapide informiĝi je kiu punkto de la duoninsulo *nun vaĉas la amerikanoj diboĉe atendantaj ke italoj gerile buĉu la tutan germanan ar-*

*meon*, ĝi devis reiri, iom sekrete, al kaŝita aparato aŭ al la radigaleno ricevantaj nelokalizeblajn aliancajn elsendojn, ofte allogantaj per la Behetovena kvinsinfonia "ti.ti.ti.ta". Prefereblis *amerikana* okupo ol *amerikanaj* bomboj!

Mian „galeneton", kiam kunuloj kredis momente pli sekura ĉe mi, mi tenis ĉiam poŝe por eviti, ke superuloj estu devigitaj ĝin malkovri kaj konfiski.

Inter la edukantoj foje, eble en gravaj momentoj, oni ekanoncis la principon: nia junularo kontaktiĝu ankaŭ kun la reala vivo ĉar la forcejaj floroj, se tro zorge apartigitaj, vivas malmulte elmetitaj en aperta aero. Tiu principo nemalalte taksiĝis ĉe la klerikejaj studentoj. Kadre de tiu principo al mi estis, provizore kaj prove, destinita la kontaktiĝo kun personoj vizitantaj la sakristion, komisiantaj mesojn aŭ almoze bonfarantaj al la fratularo. Foje la konversacio kun vizitantoj plilarĝiĝis ĝis manifestiĝo de suferoj kaj penoj fare de konfidenculoj: mi tiaĵojn preferus ignori sed ili elrompis tiaj, ke mia koro pleniĝis de kompato. Fratulaj robo kaj bonkoreco al mi trapuŝis aŭskulti kaj trovi la ĝustajn vortojn kaj tonon. Foje la konfidencoj fariĝis tiom intimaj ke ili atingis prikorajn kaj priamajn aferojn. Estis precipe junulinoj kiuj rakontadis pri siaj foraj kaj malrekrutiĝe forfuĝintaj fianĉoj: ili malfermis animon, certe sekurigitaj el la sankta vesto kaj altiritaj ankaŭ de la juna aspekto de la konfidencricevanto kaj eble esperante igi malpli necerta la sorton de la amato. La edukistoj tamen malkonsilis eniri en tiujn koramajn aferojn aŭ sentimentalajn kontemplajn aludaĵojn pro tio ke ni apenaŭ eksuspektas la kompleksaĵojn de la homa koro, kaj mia konfesprenanto arde puŝis min pliesplori ĉu tiaj konversacioj estu ankaŭ kuraĝigitaj de nekonscia deziro *boleti* (estis lia vorto), nivele de emocioj, en la samaj koreventoj. Nekonscia protagonismo vivita en alia simpatia persono.

Ne manku informo ke tiujn tagojn en Gemona plenpleniĝis el militvidvinoj: komencis alveni, fakte, oficialaj noticoj pri itala torpedita ŝipo plenplena de Gemonaj "alpinoj", sinkigita en la Egea Maro. Pereis plurcentoj da homoj.

Nova juĝo, samtempe, pri populara religieco, ekformiĝis en mi. Datiĝas tiutempe la ekpenso, tiam taksita sakrilegio, ke se ne estus suferoj eble homoj ignorus religion kaj Dion. Sufero ŝtupo al Dio: vere! Sed se ne estus sufero, kio homa en homo puŝus lin priserĉi Dion?

Ankaŭ en la tasko de la kvestado oni engaĝis nin por ke ni vidu per kia kosto la bonfaraĵoj de niaj bonhavuloj kontribuas al nia prepariĝo al la pastra misio. Mi akompaniĝis kun oficiala kvestisto plurfoje laŭ du sinsekvaj tagoj: antaŭ la ne ĉiam brila bonstato kaj antaŭ manpalpebla malavareco de bonfarantoj mi certe ne povis min riproĉi pro manko de seriozeco en la studaj

sindevigoj, io riproĉebla tamen okulumis el mia neklarigita turmentita vokiĝstato, kies konsisto kaj aspektoj variis, de semajno al semajno, de fervora sintoniĝo kun la franciskanaj idealoj al snobeca distanciĝo, dum kiuj la mondumecaj ĝojoj spektiĝis dezireblaj kaj nefidindaj, nerezigneblaj kaj anstataŭeblaj per io pli konsista. Kaj tuje kontentiga.

Mi ne preteratentis la reagojn al tiuj spertoj ĉe miaj kunuloj. Ili ŝajnis pli amuzataj ol pensumigataj, pli ŝercemaj ol scivolemaj, pli engaĝiĝantaj en la enŝovado de religia pravigo en la profitemeca almozpetado ol en memanalizoj pri sia taŭgeco al la franciskana stilo. Eble tiu sereneco malsupreniris el ilia intencoklareco koncerne vokiĝon: naturan kuniĝon de animtravidebleco kun ĝojemo mi kredis konstati ne sen envio. Envio laŭ mia stilo, tio estas ke ili tion malhavu.

Iun tagon ĉio skuiĝis: la aviadiloj trapasantaj sur la ĉielo en la direkton, unuajuĝe, de la germanaj teritorioj, faligis siajn mortigajn ŝarĝojn sur la stacidomon de urbo Ĝemona, detruante laŭ centmetra radiuso kaj mortigante plurajn homojn. Kiam la krakaĵoj abrupte atingis niajn orelojn, ni estis amase protektataj en la subroka rifuĝejo. Kelkaj forvenas kaj senŝirme kuras tra la fumo, tra muraj ruinaĵoj, por helpi al eventualaj vunditoj ĉar oni scias, ke multaj rezignadis la rifuĝejon fidante je la neglektebla strategia situo de la urbo. Kie ili estas? Ni sukcesas altrudi silenton al pluraj kriantaj bonvolaj okazaj sukuristoj pri siaj karuloj kaj ekaŭdas helpalvokojn el kelkaj punktoj kaj komencas fosi permane, dum el apudaj lokoj kelkaj voĉbruas kaj brake strekas por averti, ke inter ruinaĵoj kuŝas ŝrapnelaĵoj ne jam bruligitaj kaj do pretaj por incendicele eksplodo. Vivdanĝere vunditojn, kies fina sorto restos por mi nesciata, ni provis flegi ĝis la alveno de oficialaj ŝarĝitoj.

Mi mismemoras kiom estis la mortigitoj kaj la vunditoj: mi menciu tamen, ke postajn tagojn, dum novaj alarmoj, kuraĝuloj daŭrigis elfosi por liberigi el sub ruinaĵoj mankantajn personojn certe jam kadavriĝintajn.

Kial tiu bombado, se la fervojo estis jam plurloke interrompita najbare de Venzone kaj Ospedaletto, vilaĝoj proksimaj? Ĝemonanoj fasonis la moton: *"pagitaj je tunoj"* insinuante ke aviadilistoj ju pli monrekompensataj des pli da bomboj sendiskrimine plonĝigitaj sur loĝataj lokoj. Al la kvalito, tamen, aŭ juĝekvilibro de la protesto oni povis almezuri ĝian latentan humanecon kiam, postnelonge, flugfortreso revenanta, aerkaravane kun aliaj, el Germanujo, do deŝarĝita, devis difektkaŭze sin lasi vrakiĝi en kampara teritorio najbare de Ĝemona: homoj alkuris por helpi kaj ankaŭ embuskigi eventualajn supervivantojn. Neniu bezonis tion ĉar la okupantoj jam mortis. Tiam la alkurintoj

limiĝis liberigi ilin el felaj vestoj kaj botoj kaj aliaj utilaĵoj jam senutilaj por la mortintoj. Ankaŭ fratuloj piece altiriĝis, vidante tamen ekaperi piedoj senŝuaj kaj brustoj senjakaj. Kune homoj obtenis el la loka germana komando permeson entombigi la korpajn restaĵojn en tombejoj post religia hasteca propeto, al kiu partoprenis ankaŭ mi, penante tamen sperti, je nivelo de sentoj, kompaton por… malamikoj! Ja, ĉu malamikoj aŭ aliancanoj ankaŭ por norditaloj?

Tra eventoplena kaj seka ekprintempo venis aprilo-majo. Radiogaleno fiere disvastigadis, ke la germana fronto “Sigfrido”, ekallasis signojn de cedo. Ĉirkaŭ la dudeka de aprilo sur la ŝtata fora strato komenciĝis la retiriĝo de disbatitaj Wermach-aj germanaj senblenditaj konvojoj al Aŭstrio, nome al Germanujo: la soldatoj kiujn mi imagis artikigitaj nur por sturmi! Kelka germana duonmotorizata trupkonvojo estis sekvata de lante procesiantaj soldatoj, lace kaj senformacie defilantaj malmulte germane: mi sentis kompaton kaj deziron doni helpon ankaŭ al ili ĉar, funde, ili devintus esti la kolaborantoj de la glorigo, de mi revita, de Italujo. Samtempe grupoj veturis ankaŭ fervoje, sed tiom malrapide, ke eblis kalkuli la senarmile retiriĝantojn.

Iuj partizanoj, transpaŝante la konjektitajn ordonojn, kredis sian heroaĵon kugle ataki germanajn soldatojn, preskaŭ senarmajn malmilite retiriĝantajn laŭ reciprokaj konsentoj kun partizanĉefoj, eble ankaŭ kun avangardaj aliancaj komandoj: marĝene de krucvojo restis vunditaj soldatoj, unu eble mortigito. Post kvaronhoro du germanaj kirasveturiloj revenis venĝe pafante, iom hazarde, oni atestis: sur la grundo restis mortinto, eble partizano aŭ civilulo, kun diversaj vunditoj. Ĉu estis paktoj aŭ ne estis? Popolo koleregis parte kontraŭ partizanoj parte kontraŭ germanaj armeanoj. En la kirasveturiloj oni ŝarĝis germanajn vunditojn kun eble mortinto.

Ĉiu trajno el Udine esperigis, ke almenaŭ la vostaj vagonoj transportu usonajn avangardojn de novaj okupantoj eĉ leĝere armitaj ĉar komunakorde la germanoj jam ĵetis ĉion militan. Ili fine vere flagris survoje, ĉe la monatfino. Kian feston kun manklakadoj kaj mansvingoj kaj dancoj ili ricevis kaj kiom dankeblaj ili prezentiĝis, malgraŭ ne sen foje ironiaj aludaĵoj al la sendiskriminaciaj bombadoj: ironioj kiuj intensiĝis kiam oni vidis la enmarŝon de anglaj regimentoj al nia zono kiu, do, estos garnizonita de Angloj anstataŭ de Amerikanoj. Nu, ĉie, al kelkaj, indikante fingre la ruinaĵojn, protestantaj kontraŭ ili pro la terorisme sendiskriminaciaj bomdadoj, venis respondo, ke tiujn ĉi praktikis unuaj la *asanoj* sur aliancaj teritorioj. Tamen la trikolora flagsvingado invadis, kvazaŭ per magio, fenestrojn kaj placojn, aparte kiam aperis no-

vaj taĉmentoj de venkintoj.

Kelkan tagon antaŭe, trapasante la urbon, mi revidis la faŝistajn garnizonantojn, eble jam forlasitajn al la antaŭvidita destino. En tiuj senbarbaj junuletoj, kiujn mi jam vidis kvin monatojn antaŭe, restis la tuta kruda naiveco: ili ŝajnis ankoraŭ nekonsciaj pri la drama okazantaĵo kiu estus signonta ilian vivon, se por ili sukcesiĝos pluvivo. Ili staris, aspekte senpripensaj, rande de la stratoj kvazaŭ gaje ripozantaj kunordigantoj de neekzistanta trafiko. Kial partizanoj ne alfrontis ilin? Ĉu kalkulita prudento kun sendanĝera kompato, kiel mi suspektis, lasis ilin krisoliĝi en la konscio pri sia krimula kondiĉo kaj spontane foriri el la kazerno?

Mi suspektis, ke tiuj gejunuletoj estas filoj de patroj militfalĉitaj aŭ forfuĝintaj por eviti la unuan popolan senprocesan reagon.

Dum la *liberigantoj* prokrastas la alvenon, kaj dum laŭ la ŝtata strato maloftiĝas la longa nigrabruna strio de germanaj soldatoj, transvivintaj el cento malvenkoj kaj forlasintaj la pezajn armilojn, kaj piedsuprenirantaj al aŭstriaj alpaj pasejoj, sur la sama strato, el landlima montpasejo de Tarvisio, alia homfluo de uloj magregaj, vestitaj el ĉifonaĵoj ope aŭ plurope treniĝas al Italio. Fuĝinte el jam ne plu garditaj germanaj koncentrejoj, aspekte kaj energie elĉerpitaj, italaj eksprizonuloj koncentriĝas ĉe la stacidomo de Ĝemona esperante, ke trajno forveturos al la ĉefprovinca urbo Udine; el tiuj kelkan oni sukcesis rekunmeti, el diversaj difektitaj vagonoj, kaj reale funkciigi. Sed la restantaj aŭ malfruantaj revenantoj komencis frapi ĉe la konventa pordistejo almozante pri io por manĝi kaj sin vesti. La superulo malplenigis la provizejojn por satigeti la plej bonŝanculojn, pretajn je ĉiu servo kondiĉe de panpeco. Apudaj loĝantoj kunlaboris per ĉiuspecaj helpaĵoj.

Altrudiĝis, ke ni devis dilui lakton per akvo por havigi al ĉiuj po unu glaseton kun unu hektograma panpeco. La konventa superulo estis, se tiel diri, la ununura aŭtoritato en la urbo, el kiu jam eklipsiĝis politikistoj kaj publikaj agantoj: li igis la kvestistojn karuseli ĉe nutraĵvendejoj, ĉe la nigra merkato, ĉe bonfarantoj. Eksprizonuloj bivake atendis kaj dume, sterniĝinte sur la ŝtonaj klostraj benkoj kaj sur la herbo de la interklostra ĝardeno, sin lasis fordoni al delaciga dormo.

Ĉe la fino de la alfluo, jen prezentiĝis sicilia ĵus liberiĝinta prizonulo akompanata de pola junulino, kun kiu li sukcesis kaŝite kunvivi iujn semajnojn najbare de koncentrejo, Li intencis ŝin konduki kun si, cele geedziĝi feste, ĝis Sicilio, sed nun li kaj ŝi, eble graveda laŭsiadire, mankas je ĉio, eĉ urĝadis nin oficiale geedze unuigi ilin. Sen iu ajn definitiva solvo, ili malaperis post

kelkaj tagoj, eble piede renkonten al trupoj aliancaj el kiuj eblis, laŭ onidiro spertita plifrue vera, rimedi almenaŭ ion manĝotan.

Mi travivis tiujn neforviŝeblajn tagojn tra ekzaltiĝoj kaj deprimiĝoj: kiam oni kredis, ke la nutraĵoj sufiĉos, jen aliaj kompatekscitaj petantoj; eĉ perdiĝintaj germanaj soldatoj, eble militkrimuloj, helppetis. Postevente, pritaksafaze, oni suspektis, ke iu el tiuj lastaj estis oficira estranto ĉe la rizlaborejo de San Saba (Sankta Saba) apud Triesto, kie la nazioj estis pretigintaj kaj eble funkciigintaj la solan eksterman lageron en Italujo.

Bonŝance la nemalproksima milita provianto-magazeno kun kantino, ankoraŭ provizita je nutraĵoj kaj aliaj necesaĵoj, forlasita de la faŝista gardistaro kaj zorgantaro, antaŭ ol esti komplete senbalastigita de malsataj popolanoj, ricevis ankaŭ la viziton de niaj kvestantoj.

Hejmenanhelantoj dankemaj, satiĝintaj kaj refaritaj je okazaj vestaĵoj, reprenadis sian preskaŭ nudpiede stratpistadon tra ruinoj kaj lokanoj tentataj tute okupiĝi pri siaj malcertaj aferoj. Ili ne sciis, same kiel ni, ke la venonta Italio forgesos laŭlongatempe tiujn ulojn difinitajn en Germanio «militaj internigitoj » do senprotektaj de internaciaj konvencioj, kalkulitajn je 700.000 homoj, ĉar la tuta atento kaj admiro devos orientiĝi al la landaj rezistintoj, el kiuj venos la iluzio, ke Italujo la militon ne perdis sed venkis pere de la rezistula gerilo, kiun nun ero da historiistoj taksas intercivitana milito. Nur post dekoj da jaroj tiuj internigitoj, pri kiuj la publika memoro jam estis preskaŭ malaktualiĝinta, estis egaltaksitaj kiel la rezistintoj por la libero: efektive ili suferis pro sia rifuzo aniĝi al la faŝista armeo kaj pro tio, nur pro tio, ili estis deportitaj, enlagerigitaj, amasigitaj kiel bestoj kaj, kontraŭ la statuto de milita pri prizonula konvencio, laborigitaj por la germana armeo. Krome kaj pro tio, el ili almenaŭ 50.000 perdis la vivon.

La tragedio daŭris kvin/ses tagojn ĝis la okupantoj decidis interveni per nutraĵoj kaj transportiloj.

Kiel timite, kiam la milito malhisis sian flagon tuj komenciĝis la purigcelaj kriminalaj procesoj. Pro vaporiĝo de laŭleĝaj aŭtoritatuloj foje la purigcelaj forigenduloj trovis kriantan popolon kiel juĝiston: en Ĝemona ne okazis kontraŭleĝaj krimpunoj pro tio, ke ankaŭ tiakaze entrudiĝemaj kaj estimataj konventanoj tre engaĝiĝis, per ia *humaneca entrudiĝo en politikajn aferojn,* por konvinki aresti, nur aresti, kolaborantojn transdonotajn al oficialaj tribunaloj. Kvar monatojn (tiom daŭris la transiro al la normala civilvivo) oni pasigis timante akuzon kaj trenadon al placo. Kiel malfiksiĝi el la memoro pri la sorto de tiuj junulinoj kiuj, kiel ajn faŝistigitaj veste kaj geste, iam movis miajn kompate-

majn sentojn? Ili estis ĉiuj arestitaj, post kelkaj tagoj de malliberejo la plejparto suferis punon per kapa ĝishaŭta razo dum la plej aĝaj estis publike humiligitaj antaŭ pli amuzata ol venĝopostula publiko: por malgravigo de ilia kulpo ludis la fakto ke ili neniam portis ofendajn armilojn. Plej grava puno aljuĝita, oni diris, estis, ke ili restu pune apartigitaj el popolaj daŭraj dancadoj. Dancadoj ĉiuspecaj, fakte, kaj ĉiuloke svarmis kvazaŭ tensio kaj suferoj fine merite trovus kompenson. La vortoj novaj "Boogie-Woogie, blues, swing ktp" kun sia ekzotikeco diseligis ion misterece allogan.

Semajnojn poste, tri el tiuj junaj faŝistinoj kaj "helpantinoj", la malpli junaj kaj plej influaj, abrupte ĉesis cirkuli, eĉ forsinkis de siaj hejmoj. Pro honto, oni suspektis kvankam iliaj familianoj senĉese ilin serĉadis. Jarojn poste, oni malkovros iliajn kadavrojn emerĝintajn el riverborda subgrundo!

Kiel starto kaj urĝo al tiuj eventoj agis novaĵo, la timata novaĵo: la mortigo de B. Mussolini, senprocese pafekzekutita kaj poste nudigita kaj venĝe pendigita en Milano. Inter la fratularo, post kelkaj silentaj konsterniĝoj ekfalis diverspecaj komentoj dum la juĝoj diversmotive akriĝis: la fratula plejparto lin respektis pro iuj iamaj nemalbonaj sociaj kaj politikaj agadoj, kelkaj lin malrespektis ĝis aprobo aŭ aplaŭdo pri la ekzekuto, unu, iam inkliniĝanta al faŝismo, sin senkulpigis dirante ke mem estis *nur ĉe faŝistoj* . Se por li mi esprimis pli da respekto kun kompato ol da indiferento, ankoraŭ mi ne suspektis, ke instruitaj religiuloj povas, pro tiuj aferoj, perdi sinregon, tiel ke la konventestro sin sentis devigita premi ĉiujn por ke la publikaj konversacioj tranĉu for komentojn pri tiu evento.

La senprocesa ekzekuto de Mussolini ekigis aŭ plifajrigis, en tuta Alta Italujo, la kontraŭfaŝistan elpurigon, kredigitan necesa por adekvate puni la dummilitajn krimojn. Montriĝis de tuj du inklinoj, unu emis puni nur post normala juĝa verdikto aŭ prokrasti la penon kaj ĝin kongruigi al humanecaj, kvankam miksitaj al venĝovolo, kriterioj, alia senmizerikorde emis mortpuni apenaŭ la faŝista kulpulo falas en la manojn de la partizanaj milicanoj, nun politikregantaj. Ŝtupon post ŝtupo elkerniĝis la veraj motivoj de tiom da elpuriga ardo; ĝi fakte baziĝis ankaŭ sur aliaj antaŭvidoj kaj celoj: oni antaŭvide supozis, ke faŝistoj kaj ties simpatiantoj neniam enviciĝus komunistaj kaj certe ili enirus reemfazi kaj plifortigi la moderajn partiojn kun kiuj certe la komunistoj devos, en venontaj balotoj kaj klasluktoj, rivale dueli. Tial urĝis elimini tiujn ulojn antaŭ ilia apero en la proksima postliberiga socipolitika scenejo. La justicvolo de la ekstrema maldekstrularo trenis la popolon al konsento aŭ al sendecida apartado. Kaj oni elvivigis, en la tuta Italujo, 30.000 homojn ĉirkaŭ, kul-

pulojn kun duonkulpuloj kaj dubkulpuloj kaj senkulpuloj: ĉiuj certe antikomunistaj.

Sed la vivvolo venkis super ĉio: dancadoj, festoj ĉiuspecaj.

Tamen, se la potenco de la homaj aspiroj al vivo forgesigis la ĵusajn hororojn, jen nova fonto de suferoj: nun amase alvenas forfuĝintoj el Istrio, ekstremelasta itala aneksita teritorio limiĝanta kun Juguslavio, praktike jam aneksita al Jugoslavio: ĉi tie la etna purigado procesis por elimini italan etnon: aŭ eksterlandigo aŭ enfojbigo (profundaj fosaĵoj en regiono Karsto). Dekomence oni emis kredi, ke la rifuĝintoj estis faŝistoj punotaj pro krimoj, poste la loĝantoj komencis ilin gastigi kaj satigi kiel persekutatojn: ankaŭ la konvento faris hospico la lokalojn destinitajn al vizitantoj kaj senhejmuloj. Eble, nun en tiuj fojboj kuŝas du/tridek miloj da senkulpaj italaj civitanoj, kies teritorio, por pli definitive esti aneksita al Jugoslavio, devis purige liberiĝi el ĉiuj italaj civilizaj signoj.

Post la agitiĝo de tiuj tagoj, la klerikeja vivo reprenis sian kutiman disvolviĝon; sed io nova ĝin ektrakuris. Kiel jam dirite, nova gnomo eksonis. *"Nepras, ke junaj fratuloj kontaktiĝu kun la vivo reala"*, oni frapfrazis kaj ekrenoviĝis io, kvankam konfuze. Ene de tiu ema projekto edukantoj enirigis klerikojn ankaŭ en la taskon de asistado al mortantoj. Ke mortantaj homoj okupu larĝan spacon de nia sperto, ĉu dubinde? Certe ne, ĉar en granda fratula komunumo la evento-morto estas ĉiam alestiĝanta. Okazis fakte, ke frato Vilhelmo, maljunulo tamen ĉionzorganta, post fervora kaj krianta prediko, kolapse svenis. Transportita al sia ĉambro (la loka malsanulejo tiam ankoraŭ mankis je elementaj necesaĵoj forestigitaj de militistoj), li estis flegata laŭ kuracistaj preskriboj, sed ankaŭ estis diagnozita la baldaŭa morto. La fratuloj ame lin diurne asistis, kaj kiam endis mildigi la penon de la oficialaj flegistoj, oni pensis al junaj klerikoj; kaj la tasko falis ĉi-foje sur min. *"Vi certe kapablas partoprene ĉei kaj eventuale paroli delikate kaj laŭ kristana karitato kaj flegi laŭbezone"*. Mi konsentis kaj plenumis mian taskon laŭ maniero, oni poste senapelacie mezvoĉe deklaris,... mallaŭdebla!

Sed priskribiĝu laŭsinsekve la faktoj. Kiam mi aliris la ĉelon de la malsanulo, tiu ĉi estis ĝuanta efemeran revigliĝon, kaj montranta deziron interparoli, tial ke la flegado fariĝis nemalagrabla, kaj mi, por ĝin plifaciligi, glitigis la konversacion ankaŭ al miaj ankoraŭ atentovekaj ĵuspasintaj vagabondaĵoj: la malsanulo aspekte aŭskultis atente miajn, antaŭe delikate kaj senemfaze diratajn sed pojome pli viglige, rakontaĵojn. Certan momenton, mia asistato, spite sian senvivecan korpon kaj senkarnan ostan framon, rompis la fluon de miaj

vortoj per ne plu retenebla kutima tenora voĉo:

*"Kio vin opiniigas, ke liverado de ĉi tiuj viaj aventuroj valide min preparu al la renkonto kun Disinjoro? Se iam pri miaj mankoj mi devis raporti antaŭ mia konscienco, mi pri io alia ekraportas antaŭ Dio".*

Mi ne sciis kion, almenaŭ balbute, respondi kaj provis elstreĉiĝi el la sinsekva akuza silento per ridetoj kaj tuŝetoj. En lia voĉtono mi perceptis, eĉ sensis, ion predikecan similan al lia famo. Tiam, post kelkminuta silenta paŭzo, mi ekrajdis sur la temo de nova supoze konvena konversacio, ĝuste tiu de la predikantoj inter kiuj li rangiĝis kiel unu el la ĉefaj regionaj figuroj; jen, antaŭe timide poste emfaze ekradiis el miaj lipoj kio taŭgiĝus kaj kunsonus al la cirkonstancoj kaj favorus la interkonsentiĝon de la spiritoj. Mi al li adresiĝis, ne sensapuma akcentado, tiel: *"Ĝuste mi ekpensas al viaj predikoj per kiuj vi plikristanigis la popolon, ĝin instruante pri la kristana doktrino. La Sinjoro certe feliĉigos vin pro tiuj doktrinaj kaj ardaj predikoj*".

Li etendis brakon montre al io, kupumis la sekan manon ĉirkaŭ la naz-buŝo kaj, rigidigante la palpebrojn, per sammana fingro vertikale antaŭbuŝe trudis silenton kaj min aldirektis kvazaŭ invitante, ke mi ne malkaŝu ion malhonoran:

*"Diru subvoĉe. Se la Sinjoro pri tiuj miaj predikoj ne priparolos min, mi al li pri ili ne parolos certe!"*. Post tio konvulsie ektusis.

Frato Vilhelmo, la okdekaĝulo, eligis sian animon kelkan semajnon poste, piece kronante admiratan vivon heroldiĝinta en la predikado. Ne plu al mi estis permesite intertempe revidi lin *"ĉar vi, nebridebla babilanto anstataŭ levi la animon, vi lacigas ĝin per ekscesoj de vante spritaj vortoj. Eĉ en tia cirkonstanco vi pavis vian parademon",* digne komentis la superulo, kiu tamen tuj mallaŭtigis la tonon, certe pro tio ke ankaŭ mem komprenis, ke tiun lian riproĉon pri mia maladaptiĝo al la cirkonstanco-morto mi nedomaĝe interpretas kiel definitivan dispenson de tiu neamata tasko.

Tri jarojn poste oni denove metis min en asista zorgo ĉe fratulo mortanta, kiu tamen ankoraŭ ne konsciis tiun sian okazontaĵon. Li kredis sin kompreninta el miaj vortumoj, al kiuj tamen mi nenion riproĉendan imputis laŭ miaj postaj ekzameniĝoj, aŭ li abrupte kuraĝis ekkonscii ion jam subkonscie sciatan sed tamen konscinivele ankoraŭ ignoratan, nome ke liaj tagoj, eble horoj, senprokraste retiriĝas el l' homa vivo. Li komprenis kaj, streĉante la okulojn kaj min gapante raŭkis kun voĉo mortiĝanta*: "Mi finis feki, ĉu do?",* kaj torporiĝis kaj sin enfermis en nemalblokebla senvorto, dum mi ŝvebis enalte serĉante nedepriman rokdenton por rozkolorigi lian subitan konsciiĝon.

Senaverte, mia menso turniĝis al la mistereca Dio, duonkontraŭ li paŭte grumblante:

*”Kial, ho Dio, ne igi pli facila kaj malpli dolora nian disiĝon de l' vivo? Kial Ijob, la biblia protestanto vizaĝe al Dio pro la homaj suferoj en senkulpulo, ne grumblis ankaŭ pri la morto, kiun li ŝajnas juĝi akceptebla se Dio distribuu laŭmerite ceteraĵojn*[1]*?”.* Kiel ajn, de nun morto, pri kies natureco antaŭe mi senprobleme konsentis, ekbildiĝis per la plej kontraŭhoma afero, kaj mi primiris, ke tion mi ne pripensis antaŭe kaj, ke mi travivis adaptiĝante al tiu fenomeno kvazaŭ ĝi neekzistus. Eble tiu konscia nesento enkalkuleblas inter la misfaroj de la milito, dum kiu la mortoj impresantaj estas nur tiuj pro militaj kaŭzoj: kvazaŭ se tiuj ĉesus, eĉ la morto malaperus!... Sed haste ĝi reprenis sian ĉeeston ekscitante angoron kaj problemon.

Tamen ĝenerale la travivo fluis gaje dum abundis reciprokaj ŝercoj kaj amuzaj spritgestoj. Sed la kostojn de tiu junula emo pagis iuj el la komunuma fratio. Ĉar la kristana karitato influis nin pardoni aŭ esti indulgemaj rilate la moralajn mankojn, pritraktotajn, eventuale, en kadro de frata korektado, la emaĉo klaĉe kritiki kaj flankenvipi, devenanta el ne malkovrita aŭ *malpridiskutita* agresenergio, forkonsumiĝis per la pliakcentigo kaj ne nur amuzveka pligrandigo kaj distordo de karakteraj strangaĵoj aŭ psikofizikaj mallertaĵoj de la kunvivantaro. Kaj el tiuj abundis la tagoj fierigante, en daŭra konkuro inter ni, niajn goliardajn eltrovaĵojn kiuj foje el apenaŭ malicetaj glitis al vere malicaj.

Nutris nian vortludemon la fratulo tabaksnufanta kun la brustvesto neforigeble flartabake makulita, pri kiu estis dirate, ke la fiaskego de snuftabako, plenplena kaj lokigita sublite, pli ol surogate anstataŭas la rezignitan edzinon. “*kiel fartas via edzino? Vidu ne indulgi sternegojn por ke ne teruriĝu la sublita edzino... Vidu ne ŝin inviti supreniri inter littukoj!”.*

Estis ankaŭ fratulo kiu tute absorbite sin forgesanta en nevizitita preĝeja angulo dum la aliaj tablemanĝas. Pri tiu ni inventis la amuzesprimon: “*Vi trovis*

[1] Ijob: Biblia libro, verkita per pluraj redaktadoj de la Va ĝis IIIa jarcentoj aK, en kiu estas forĵetita la kriterio de la strikta rilato inter feliĉo kaj fidela obeo al la diaj ordonoj kaj adorkliniĝo al Dio ktp, kaj oni provas esplori novan teologian solvon pri la origino de la homa sufero. Kadre de tio, Ijob petas de Dio eksplikon pri la motivoj de siaj, kvankam senkulpa, suferoj. Laŭ la antaŭa *saĝeca* tradicio Ijob, justecplena pro siaj religiemo kaj submetiĝo al la diaj ordonoj, rajtus esti feliĉa kaj daŭre rekompensata de Dio ĝis la fino de siaj tagoj. Por li la fina ruiniga evento “morto” ne konstituas malharmonion, kontraŭaĵon al la homaj aspiroj: morto malŝatiĝindas nur se plonĝanta sur junulon aŭ justulon. Bonŝance Ijob, ĉe la fino, rezignas pretendi eksplikojn kaj akceptas, ke ĉe Dio ekzistas alia mistera justeco supera al homa kompreno, kaj decidoj respekte kaj ame akceptendaj.

*la manieron okupi la tutan Dian Diecon... Ni fine malkovris kial ni ne plu sukcesas konversacii kun Dio: tiun ĉi vi ostaĝe piratis!".*

Estis ankaŭ fratulo dandece eleganta kaj parfumita kun la haroj bele kombitaj aŭ arte taŭzitaj. Pri tiu ĉi ni, netute nur amuziĝe, taksis ke, kvankam elirinta senkunula, povus tamen okazi, *ke li revenu edzine akompanata*.

Estis ankaŭ fratulo indulgema al vino, al kiu ne malplaĉis viziti, kun ruze adaptita falsa ŝlosilo, la *edzinon... kelan, kvankam ĉasteczone ŝirmitan per duobla seruro.*

Virino, edzino, inecaj aludoj! Ĉio tio povus travidebligi sopiron kiu el io nevole konscinivele formetita fariĝas vorto, ŝerco, anstataŭiĝo, nome kamuflado vera kaj propra. "*Ne estas skeptikulo senaspira al Dio kaj ne estas asketikulo neplutenanta funde de l' koro iun nostalgion pri la bonaĵoj rezignitaj*", diradis la spirita akompananto, aldonante tamen: "*Se la konscio pri tio fariĝas sopiro kaj bedaŭro, tio signifas, ke via vojo devas esti alia, tiu de la geedziĝo: la spritlingvaĵo povas helpi al vi vin pliprofunde koni. Vi pliinsistu en la sondado kaj inspektado de via eno, private kaj kun gvida konfidenculo, kaj ŝanĝante, se eblas, la lingvaĵon de viaj goliardaĵoj* ".

Al niaj, foje respektmankaj, ŝercemaj sagoj ne forfuĝis nia kunulo Albino, tiom ekipita je grandaj videblaj aŭdorganoj, ke ni kromnomis lin "elefanto balaanta la aeron perorele".

Frato Pacifico (Paĉìfiko), profesoro pri bibliaj sciencoj, emeritulo grandverva kaj iom pompe vizitante siafakajn konferencojn kaj simpoziojn, iun tagon tagmanĝe plumpe komunikis, ke fine granda disfamigita pli ol populara revuo destinis lin dungi kiel konsilisto-kontroliston pri temoj de la antikva mezoriento, semidaj lingvoj kaj arkeologio kaj historio, kaj svingis, tre aplaŭdita, la telegramon ĵus alvenintan. Telegramo false kombinita kaj liverita ĉeporde de iu el ni, poŝtiste kamuflita! Pri nia subkuŝanta krueleco, aŭ volo de agreso kiel interpretis profesoro pri historio, ni konsciiĝis, kelkajn tagojn poste, kiam frato Pacifico ektaksis la aferon mistifiko kaj estingiĝis longatempe el lia mieno la kutima bonkora vizaĝo kiu, kiam reaperis, ne plu estis la sama. La limo inter ŝercarto kaj insulto kun kaŝcinika krueleco ne ĉiam tuj brilis dum la karikaturoj de komune homaj karakteroj; ĝi ne disdegnis, almenaŭ foje, kamufli agresemon sub vestoj de satira bonvolemo, foje kritike tolerata de edukantoj, kiuj avertis nin pri io ne enkadrigebla en laŭkristana stilo. Nur pli malfrue mi sukcesis, per spertoj kaj studoj, legi en la homa psiko la bezonon agresi kun, el tio, nepreco ĝin regi malkaŝante ĝian imperiemon pere de rezonadoj kaj pliagrabligaj idealoj.

Frato Marjo splendis je haŭto delikata kaj rozblanka kun fajnaj vizaĝaspektoj kaj iom afekta sed fascineska ĝentileco en parolado kaj gestado per ineca voĉo. Ĝuste tian voĉon preninte kiel pintmarkon de ineco, kun li ĉiuj komplimentadis kaj distrotempe aŭ kunlabore akompaniĝis: bunte gamiĝis dolĉaj gefianĉaj amaludoj: *ho, mi vin kisus! Kiam vi rericevos mian edzinringon? Certe kun vi nur geedziĝo daŭre en ĉasteco! Kiu estos la preferito inter ni?...* La ludo, observata de edukantoj, daŭris ĝis al Marjo, preskaŭ fulme, maskliĝis la voĉo, la apenaŭ lanugaj haroj disfloris al barbaj elkreskaĵoj aparte sur la mentono, la gestoj ekperdis rafinitecon. Kunuloj goliarde ne prisilentis sian seniluziiĝon, postkriis al perfido kaj deklaris sin senigitaj je kontemplado de inecaj ĉarmoj. Li, tamen, seninterrompe kaj feliĉe kaj senaverte maskliĝis ĝis la goliardaĵoj pro lia indiferento ĉesis.

Ĉar estis antaŭfiksita por ni kandidatoj al la pastreco ankaŭ la predikado, kial ne prepariĝi ek de nun montrante sian kvanton da dispozicio al la oratorarto, celo de la ĵuse enkondukita lerno-objekto retoriko? Ĉiusemajne unu el ni oratore prelegis antaŭ la fratularo pri sia elektita religia temo. Mi elektis "*La devo anonci"* (evangelia ordono al ĉiuj kristanoj, aparte al la ekleziaj regantoj) kaj provis kunesti kun la publiko dek kvin minutojn: mi parolis, pliekzakte mi predikis, plejprecize mi tondris kvazaŭ minacanta kontraŭ la rezignantoj de tiu devo. Mia prediko, kiel kredeble, muldiĝis el knedaĵo de frazoj jam aŭditaj el predikoj kaj el ŝablona stilo bombaste ŝvelparola. La fratula komunumo aŭskultis senpasie kaj sensigne de laŭkutimaj aprobo aŭ kuraĝigo, male kun reciprokaj kaŝridetoj kiam mia voĉtono atingis la finan klimakson. La unua komento, de mi pete eltirita de la pastro plej malzorgema en la vestoj kutime varimakulitaj, kaj malpli estimata en la oratoria kampo, sonis tiel: "*vi faris venton senblovan per via krea elmontriĝo... Tiel oni predikis iam, en la baroka tempo... Kvazaŭ vi mem bezonus fortikigi vian propran konvinkon. Erudita parolado kaj potenca voĉo ne kovras malfacilecon de adaptiĝo kaj aktualiĝo".* Li parolis mallaŭte zorgante, ke lin ne aŭdu aliaj, nekutime sprita kaj neniom retenata de la evidenta persona malzorgeco kiu min kredigis lin ne kapabla tiom decide juĝi.

Estis vere. Min enkadriginte, poste, sub pli diskreta lumo, mi malkovris en mi inklinon emfazi ĝuste tion kio en mia pensrako allasas dubojn kvazaŭ tio povus kontribui forigi mian dubstaton: la emfazo kiel subtenilo kaj kaŝigilo de pruvo- kaj konvinko-manko! Ne ke la devo anonci ne ennestiĝis ĉe miaj konvinkoj, sed ne partopreniĝis klara aspiro oficiale ŝarĝiĝi je tiu tasko. Ĝuste tio, mi pliposte konkludis en mia humiliĝo, generis en mi tiom da aplombo kaj

eksceso, ke foriĝis el mi natureco kaj konvinkiga forto.

Neniu min publike laŭdis, neniu min aperte kritikis, sed ekzakte tiu silento kostis al mi daŭran kaj neellaseblan humiliĝstaton ĉar aliaj antaŭe ĝuis favoran traktadon en la fratularaj babiladoj. Tiel mi debutis predikanto, sed tia mi memlaŭreatiĝos nur kiam mi eksukcesos kompreni la verajn problemojn de la homa animo kaj ilin eventuale ne miksi kun la miaj.

Sprinte, kiel fulmo en steloza ĉielo, venis la novaĵo pri delaso, pere de la usona milita aviofloto, sur Japanujo, de la unua militcela atombombo la sesan de aŭgusto ’45 sekvata de la dua la sekvan naŭan. Pri atombomboj, energio = maso multobligita per la dua potenco, izotopoj, nome materio konsistanta el diskretaj atomoj kaj atomoj el diskretaĵoj, fisio per nuklea fendiĝo (tiam nekonatis fuzio per kunfandiĝo de pezaj atomoj)… ne surface plenigis niajn intelektopovojn krom disputoj. La diskutado fokusiĝis, pli aspekte ol devige, al la morala taksado: ĉu licas mortigi homojn tiele? Du partioj kreiĝis inter la klerikoj: ĉu lasi mortigi proprajn soldatojn en longaj kaj sangaj bataladoj aŭ, eĉ per tia atombombado, devigi la malamikan ŝtaton senkondiĉe formeti la armilojn? Mi viciĝis inter la duaj partianoj dum la necertaj estis multaj. Sed subsube la mortintoj eniris angulojn marĝene de niaj konsideroj. Havis venkan ludon la scienca-teĥnika spektaklo kun la allogo de la novaĵo ĉiam pli postulanta enprofundiĝojn. Tion rimarkigis kvazaŭriproĉe la fakisto pri moralo. Konsentantoj aprobe treniĝis ankaŭ el konvinko, ke tiu politika teĥnika milita sistemo estus helponta por bloki la teruregan avancon de komunismo, kiu laŭ komunaj niaj informoj jam mortigis milionojn da kulakoj kaj nenocaj kristanoj pro la nursola motivo, ke ilia kredo malebligus sin lasi eduki al nova vivsistemo kaj rekreiĝi en la nova homo. Estis la unuaj antaŭsignoj de la malvarma milito naskiĝanta el la homaj timsentoj, kreskigitaj de la politikaj kondutoj. Fine ĝenerale oni konvenis, ke eĉ atombombado povas enkadrigi en la natura rajto sin defendi.

Somero senaverte sojlis aŭtunon, dum la preskaŭ ĉiutagaj enĉiele pasantaj bombavioj definitive jam silentis, la preĝejo plenpleniĝis je homoj, la tagoj alproksimigis la celpunkton de la *solena* religiula *votpromeso* kiam la konvinkiteco, se pritaksita sufiĉa de la edukistoj, pri la definitiva ligo al la ordena vivo, promesas per votoj resti fidele ligita por ĉiam. Ne nur por tri jaroj, kiel en la *simpla* (portempa) de la finnovica periodo. Nun la edukistoj, spite aŭ malspite rektanimajn sekretajn intencojn, devas plicertiĝi pri la spirita karaktera taŭgeco de unuopulo. Kion mi elektu?

En septembro el Venecio venis la ordono, ke la plurklasaj klerikoj travetu-

ru al Verono, en kies konvento-studentejo ni daŭrigu la studojn kaj preparon al la vivo modliĝonta ne nur sur tiu de la sankta fondinto, kiu taksadis sin "senklera kaj idiota", sed tiukaze ankaŭ sur tiu de lia posteulo en Venetia zono, nome Sankta Antono difinita ĝuste de li "doktoro kaj majstro".

Antaŭ ol forveturi al Verono ni volis, enkadre de la meditado pri la morto, viziti, ĉe najbara vilaĝo, la famajn mumiojn, kadavrojn sekigitajn de la mortersimila grundo en kiuj ili estis enterigitaj. Ili montris ĉion, eĉ la okulojn, apenaŭ senkolorajn kaj gapantajn aliloken kvazaŭ hontplenajn, eĉ barbfadenojn el la naztruoj. La scenejo min tuŝis profunde ĉar ĝi montris kiel krevas nia realo. Vere la morto, kun la korpa malfariĝo, ŝvebas superrege kaj senkore ankaŭ kiam la meditado enfokusigas la resurekton jam okazintan en Kristo. Se establiĝis tempo dum kiu la morto ŝajnis kaŭzata, malgraŭ kontraŭaj konstatoj, nur de la perforto de la militaj eventoj, nun ĝi, male kaj senpudore profiliĝas impregnanta ĉion sendepende de ĉio.

La Veronan monumentan konventon, merite enlistigitan inter la artaĵoj de nacia kaj protektmerita valoro, bombis la aliancanoj ĉe la fino de la antaŭa jaro: nun sur ĝiaj stumpaj muroj oni legas la ironiajn vortojn: *"Verko de la liberigintoj"*. La alianculoj nin certe liberigis el diktatoro, sed ne necesis sendiskriminacie bombadi ĉion, en urbo ne defendata de aviado kaj preskaŭ sen efika kontraŭaviadila artilerio ĉar senstrategiaj perspektivoj laŭ publikaj komentoj, eble pro ekdisfaliĝo kaj misorganiziĝo de la okupantoj: sufiĉus frakasigi du/tri surfervojajn pontojn por bloki la tutan militan trafikon. Ankoraŭfojon, aperte oni akuzis, ke Usono kutimis rekompensi bombantajn aviadistojn laŭ la kvanto da bomboj allasitaj al hazardaj objektivoj, kaj, ke fakte ili cinike disbombadis kvazaŭ ĵetante konfitaĵojn aŭ karnavalajn konfetaĵojn. Plejeble angloamerikanaj politikistoj planis ribeligi, por ŝpari vivojn de sia armeo, kontraŭ la okupantoj italajn gentojn tiujn ĉi terurante kaj mortigante: aŭ ribeluligitoj aŭ teruritoj! Ĉu licas pretendi tiaĵojn de popolo senarma kaj sennutraĵa kontraŭ laŭregula kaj milite ekipita armeo same kiel tiu germana kolaborata de faŝistoj?

Bonŝance la aera bombado ne sukcesis faligi la konventon en ĉiuj ĝiaj partoj: la monumenta artisma verko konservis integra unu flankon kaj apudaĵojn kun du longaj murfreskitaj koridoroj flankitaj de dudeko da ĉeloj kaj de salono grandioze freskita kaj iam ofte vizitita; kaj nun, ĉe nia alveno, ŝtatelspeze, kaj eble kontribue de la usona registaro, fervoris la laboroj por refari/ripari/rekuperi la aliajn damaĝitajn flankojn kaj iujn reunigotajn pentraĵajn fragmentojn de freskoj de kvincenta pentristo Francisko Morone, kies dediĉa kapelo kun fama *Krucumo* bezonis urĝajn protektajn ŝirmilojn.

Nia loĝeja sistemado estis iom laciga pro neceso rekunmeti ĉambrajn meblojn kaj litojn kaj reordigi ĉelojn kaj igi funkciantaj fenestrajn komponantojn, kaj elimini ruinaĵojn.

Fine, kiel antaŭvidite, la klerikoj multenombris pli ol la unupersonaj ĉeloj, en kies spaco vere nur unu persona povas vivi. Mankis unu ĉelo. Kuris propono: *kiu akceptu dormi, nur dormi, en la unuaetaĝa klostro, kelkemonate, ĝis la masonistoj pretigos novan ĉelon en la rekonstruota flanko?* Temis pri klostreto trimetra larĝa kaj okmetra longa, kie oblikva pluvo foje lasas flaketojn. Akceptis mi, pli pro aventurspirito ol pro bonvolemo kaj tial la klostro je la kvara flanko duonĉielaperta fariĝis por mi preskaŭ ĉiela loĝejo, ja ne nur tio sed ankaŭ okazo de pliestimo pri miaj supozitaj altruismemaj virtoj ĉe la fratula komunumo. Tion ĉi vere mi ne dancigis kaj ne antaŭvidis ĉar tro dista el la vero kaj, almenaŭ intence se ne aspekte, fremda al miaj ambicioj. Bonŝance la malvarmo ĉi-jare ankoraŭ ne senbridiĝis kaj ne eksignis mian korpon, malkiel en la pasintaj vintroj, per ŝveloj kaj abscesoj ĝenantaj figuron kaj movojn.

Ĉiuvespere, miaj samkursanoj min vizitis kaj plikovris per ledaj litkovriloj. La finseptembra/oktobra/novembra/decembra ekfrostiĝo ne timigis min ĉar la nokton mi pasigis tiom endorminte kaj lankovrite, ke ĉiumatene oni devis veni min perskue veki. Findecembro inde plonĝis en la novan ĉelon.

Sed en tiaj kondiĉoj de separateco el la grupo, la emo al diskutado iom malfajriĝis je naskiĝo. Okazo nova elstarigis, tamen, urĝan scivolon nepermesantan prokrastiĝi: rotogazetoj kaj filmaj dokumentigaj reporteraĵoj plenplenis, tiujn tagojn, je naziaj lageroj kaj amasoj da kadavroj de gasitaj, aŭ alimaniere mortigitaj, judoj. Ĉu vere, ĉu ne vere? La kondukanto de najbara paroĥa kinejo rikoltis plurajn de tiaj dokumentigaj filmoj kaj invitis la fratularon spekti ilin. La obscene terura spektaklo, inspektigita plurfoje kun la espero senvualigi artifikojn kaj trukojn, pruviĝis nekredeble kredebla kaj hontinda por ĉiuj. La sekva nia silento estis trudita de la embaraso kaj neeblo trovi pseŭdoraciajn eksplikojn almenaŭ aspekte pravigantajn, malgraŭ tio, ke, eĉ ĉe persekutantoj, el tiaj ne povis manki.

La diskutadoj rekomenĉiĝis la postan tagon, dum kiuj ĉiuj opinioj, eĉ la plej bizaraj, havis civitanecon. Ok tagoj pasis dum ni atendadis la lernejaran inaŭguron. Ĝuste por tiu tago oni anoncis prelegan debaton pri la historio de la diaspora hebrearo kaj la ĵusaj persekutoj kontraŭ ili. La studentoj estis invititaj starigi demandojn aŭ opiniojn kaj rakonti spertiĝon.

Patro Aleksio, sufiĉe konata inter ni pro sia studentrestado kaj instruiĝo ĉe la *Studium Biblicum Franciscanum* de Jerusalemo kaj doktoriĝo pri eklezia

historio ĉe *Antonianum,* la franciskana superagrada studumo en Romo, deklaris inaŭgurita la novan studjaron kaj ekscitis grandan indignon rilate lagerojn kiuj jam estis sufiĉe dokumentitaj, kaj instige ekigis la demandaron de studentoj, apogita, li aldonis, sur la sekuriga ĉeesto de la profesoroj, kies laŭsciencaj studmetodoj kaj erudicio ne nur en sia faka scienco, garantias, krom objektiveco, kompetentecon. Jen vicas la demandoj, parte jam zorge pripensitaj parte spontanaj kvankam nekonvenciaj:

"*Se naziistoj punis tiel tremende hebreojn, ĉu tio ne povas signali, ke tiuj ĉi vere, je nacia aŭ internacia nivelo, politike aŭ finance aŭ diversmaniere, komplotis kontraŭ Germanujo?"*.

"Pri tiu komploto mi ne kompetentas. Ni atendu la esplorojn de historiistoj. Dume ni diru, ke en tiuj kazoj la supozitajn malamikojn oni rajtas nur koncentrigi en politikaj izolejoj, kiel faris Usono rilate italojn dummilite".

"*Ĉu povas esti, ke hebreoj fine pagis adan sian lukton kontraŭ Kristo kaj kristanoj?"*.

"Laŭ kristanismo kulpo estas individua, persona. Cetere multaj hebreoj akceptis kristanismon, eĉ hodiaŭ. Eĉ koncedite, ke ili kulpis, neniam ni povas scii la kialojn de la diaj permesadoj. Tion pretendante, ni rondigas Dion laŭ niaj homaj niveloj, je servo de niaj vidpunktoj. Tio egalvalorus nuligi Dion. Kaj fine iu povas rifuzi kristanismon pensante tion sia devo: se homoj konvinkiĝas, ke Kristo eraris, mem devas lin rifuzi aŭ formeti. La Nova Testamento revus la okazaĵon sen distingi bonintencon el malbonintenco. Veras tamen ke tiu kontraŭ Kristo misfaro de iuj tiutempuloj hodiaŭ najligas posteulojn en kontinuigita sindefendo en kiu foje, kun ŝajnaj pravoj kaj malpravoj, enŝteliĝas kondamnaj interpretoj de ĉio kristana".

"*Ĉu ne okazis, ke niaj akuzoj al hebreoj piloriintaj Jesuon kaj kristanojn, aŭ erare, laŭ ni, interpretantaj la Sanktajn Skribojn, povis kuraĝiginti kontraŭjudajn elpaŝojn kaj persekutojn?"*.

"Eblas. Sed necesas distingi polemikojn disde malsamaj interpretadoj pri Skriberoj aŭ deirantaj el malsamaj prihistoriaj filozofioj. Tiuj lastaj ne devus influi en la afero. Ĉiukaze, se kristanoj akuzis hebreojn, hebreoj akuzis kristanojn. En kiu kvanto la akuzoj el kristana medio akcentis persekutojn kontraŭ hebreoj, kaj laŭ kiu kvanto la akuzoj el hebrea medio kontraŭ kristanoj incitis al persekutoj kontraŭ kristanoj? La demando turniĝu al la estontaj historiistoj liberiĝintaj el pasioj, kvankam kiu ajn respondo misuzus alies konfidon se oni subgrunde debatus pri rajto aŭ malrajto de judoj pluekzisti kaj daŭrigi ne nur

pastiĉe trapenetri la etnajn kulturojn.

Se komplete kredi je la Skriboj, en tiuj ĉi estis ankaŭ antaŭvidita la miskompreno de la popolo koncerne la Mesion". Por kompreni ĉu tio okazis oni legu la pli ol biblian Talmudon per kiu estis kalumnie prezentataj Jesuo kaj kristanoj.

*"Kial naziistoj persekutis hebreojn? Ĉu pro rasaj motivoj aŭ tiuj estis nur efikaj pretekstoj? Ĉu kredeble, ke rasaj motivoj allogis ne malkulturitan popolon, ĉar bedaŭrinde popolo restis apenaŭ kunlaboranta se ne apenaŭ indiferenta?".*

"Jen nunmomente grava demando. Mi opinias, ke la rasismaj motivoj sidis ankaŭ en la bezono de kiraso sub kiu protektiĝe kaŝiĝis aliaj motivoj, specimene: la timo, prave aŭ neprave, esti jugata kaj dominata kaj intelektule kaj kulture kaj ekonomie, politike kaj finance, de eksterlanoj, anglosaksoj kaj francoj kaj slavoj, fakte traregataj de la internacia hebrea lobo.

Ne forgesendas, ke kiam kreiĝis la naziismaj teorioj, Germanujo estis forte impregnita de komunismo kaj komunismo signifis Sovetunion kaj Sovetunio havis tiuokaze en la registara skipo la plimulton de ministroj je hebrea origino same kiel en hebreaj manoj estis la plej altrangaj germanaj kompartiaj oficoj[2]. Plie la precipajn kaj gangliajn universitatajn katedrojn en Germanujo okupis hebreaj profesoroj apude de la ĉionombranta figuro de hebreo Markso: antaŭ ĉio ĉi germanaj naziistoj kredis tion la kaŭzo de sia malsuperrego en la tiama mondo kaj malvenko en la antaŭa unua mondmilito. Aldonu, ke la enŝovaĵo facile enradikiĝis ĉar tradicie la kontraŭhebreaj polemikoj en religiaj movoj, aparte en tiu de Lutero, spertis longan serion. Ĉu kontraŭhebreismo originis ekskluzive el rasisma vizio aŭ ĉu ankaŭ el psikologia kaj mensa teruro pro sociaj malfavore juĝataj spertoj, laŭ mi estos temo diskutenda en socipsikologio. Solaj, la rasismaj teorioj premas sed konvinkas specife prematojn aŭ sintaksantajn tiaj".

*"La purrasa doktrino kun la supereco de la arja purraso povas esti iu ŝirmilo, iu instrumento por altiri la germanajn gentojn. Pravigi la persekutadon*

2 Detaloj pli specifaj plurloke aperis en verkoj de Vittorio Messori kaj en *"lettera ad un amico ebreo"* de Sergio Romano. Iu historia vidpunkto estas subtenata ankaŭ de Aleksandr Berdjajev, *Moskvo, Eŭropa Jura Universitato*. Lia fina juĝo: "Mi estas inklina pensi, ke eĉ aktiva partopreno de judoj en la rusa komunismo estas karaktera trajto de Rusio kaj rusa popolo. La rusa mesiismo estas proksima al juda mesiismo (p. 97)". Eĥo de tiu situacio troviĝas ankaŭ en rakontaĵoj de yidiŝa I. B. Singer kiu bedaŭras, ke hebreoj rezistintaj kontraŭ idolatrio laŭ trimil jaroj nun fariĝas "ekstremaj instigantoj de ateismo kaj lideroj de internacia komunismo".

*kontraŭ hebreoj ankaŭ per tiu teorio pli malrezistigas malkonsentatojn kaj dubantojn, kaj fortikigas pli konkretajn pretekstajn motivojn kiel tiun, laŭ kiu la germana kompartia estrara establo de la jaroj antaŭ ol nazioj ekregadis, estis posedo de eminentaj hebreoj. Ne elglitu el memoro* Levien *kaj aliaj kiuj, ĉiuj judaj senkompromisaj ateistoj, devontiĝintaj en la detruo de ĉiuj religiaj institucioj, eĉ hebreaj ĉe kelkaj, de Germanujo. La hipotezo de persekuto pro simplaj purrasaj motivoj eble helpis duarangigi kaj samtempe plievidentigi soci-grundojn rajte aŭ senrajte sentitajn premegaj. La purrasisma teorio estas, ja, pli hontiga ĉe ni, sed ankaŭ pli efika ol devi eventuale sin defendi de akuzo de senmotivaj aŭ senfundamentaj malamo kaj persekutado; kaj estis pli facile unuigi germanojn metante fronte al ili tiuspecan malamikon. Laŭ mi, la purrasismaj principoj estis precipe ekspluatcelaj, kvankam eĉ ili sekve provokis misfarojn. Ĉu licas tiel pensi?".*

"Mi havas iom da malfacilaĵo respondi pri tiu demando garbiganta historiajn kaj psikologiajn kaj politikajn traktojn de la problemo. Ĉiukaze, valoras la penon postuli, ke estu trabriligataj ĉiuj faktoroj rolantaj en la historia fenomeno. Certe, fenomeno tiom obscena kaj damaĝa ne naskiĝas sen kaŭzoj kaj pretekstoj, ruze pravigitaj aŭ almenaŭ ŝajneble pravigantaj".

*"La nazia reĝimo persekutis ankaŭ katolikojn. Ankaŭ kontraŭ tiuj ĉi povas influinti eksteraj motivoj: kiel oni scias, laŭ la germanaj ĵurnaloj, tiam nur naziiĝantaj, kaj laŭ sennombraj dokumentoj ĉe diversaj milititaj kancelarioj, la Tria Regno enkalkulis la katolikan eklezion inter siaj malamikoj, aparte la Sanktan Seĝon, kiun ĝi nesenmalŝate vidis kunglobita en Vatikano. Tiu persekuta sinteno povus esti provokita ankaŭ de la intervenoj, kondamnantaj naziismon, peritaj de la papa nuncio Pacelli en homilioj ĉe Lourdes, ĉe Lisieux, ĉe Budapeŝto, ĉe Parizo... Ĉu malprudentaĵo aŭ rebrilo de laŭdeva kuraĝo? Ĉu el tio ne eblis antaŭvidi la tipon de la naziaj reagoj?".*

Mi opinias, ke la nuncio devis konigi al la kristanaj popoloj kiom da kontraŭkristana enestis en naziismo. Pro tio papo Pio la XI forlasis, per forfuĝo al somerferia Castelgandolfo (Kastelgandolfo), Vatikanon kiam Hitler vizitis Romon, gasto de la itala registaro. Simbola gesto, ĝi similas centon da aliaj por sciigi kaj alertigi la kristanaron, ke la nazia soci- kaj viv-konceptado, malgraŭ kontraŭaj proklamoj, kontraŭkristanas kaj kontraŭhomas.

"*Kvankam persekutantaj kristanismon aŭ eksterkristane agadantaj, la naziistoj naskiĝis inter kristanaj popoloj. Do kristanoj, iusence, provis detrui la hebrean rason...*

“Domaĝe ke tia apudiĝo de malsamo kaj kontraŭo tentos kaj konjekteble peze pastiĉos la kulturon kaj la estontajn publikajn kaj neeviteblajn rilatojn. Ne neglektendu tamen, ke nazioj sin prezentis, dekomence, al la kristanaj popoloj konsentdignaj kaj ke la kristanaj eklezioj ne ĉiam havis eblecon kaj teknikajn kaj monajn ilojn por alertigi siajn adeptojn. Je kompletigcele oni prikonsideru, ke ni katolikoj ĉiuloke kaj ĉiumaniere strebis kaj sukcesis kaŝigi kaj savi el neniigkoncentrejoj hebreojn... Kaj lastafine niaj religiaj aŭtoritatuloj ne sukcesis savi el sama aŭ simila sorto milojn eble milionojn da katolikoj. Se ekleziaj aŭtoritatuloj ne sukcesis malebligi la malaperon de miloj aŭ milionoj da katolikoj, kiel ili povus savi hebreojn? La vatikanaj protestoj kontraŭ senjuĝaj deportadoj estis por la defendo de ĉiuj, ne nur de la solaj hebreoj”.

*“Dume ni daŭrigis kanti, paske,* Oremus pro “Perfidos Hebraeos”*, implicite ilin akuzante pri Dimurdo, la plejkulpa krimo”.*

“La vorto *perfidos* malagrabligis sian sencon laŭ jarcentoj. Kiel ajn estu, aktuale ni bezonas ĝin ŝanĝigi aŭ forigi tute[3]. La aktualaj kontraŭjudaj persekutoj espereble konsciigos kristanojn montrante kien la konstanta reciproka polemiko transintence kondukis la popolojn. Bonŝance, katolikoj, je plej altaj instancoj, komprenis, je la unuaj rasismaj leĝoj, tion kaj, laŭ sia povo, engaĝiĝis savi kiom eble plej da hebreoj. Mi citu nun Monsinjoron Pietro Barbieri, la plej grandan falsiston de la mondo (tiel lin helpitoj), se ni eluzu detektivromanan lingvaĵon, kiu provizis kredeble 20.000 judojn je falsaj rekonkartoj. Krome nia kunfrato, patro Ceccacci en Asizo sin trovis plurfoje antaŭ ekzekuta roto pro kaŝgastigado de ĉasataj judoj kaj pro falsigo, laŭsugeste de la loka episkopo, de plurcentoj da rekonkartoj per kiuj sukcesis elmigrigi for de la teritorio okupata de germanoj plurcentojn da ili. Eble post tiaĵoj, oni de nun sekvigos la definitivan pacigan klarigon kaj glatigos vojon al la reciproka pardono. Por ke tio okazu, nepras, ke ambaŭ agnosku siajn kulpojn”.

*“Kial la katolikaj aŭtoritatuloj, la episkopoj kaj papo, ne malhelpis la inicadon de Italujo en la rasdiskriminaciajn leĝojn? Ni legas, ke eminentuloj de nia kulturo silentis aŭ kurbiĝadis por rekuperi justigojn pri tiu leĝo?”.*

[3] Tiuepoke, en liturgia kanto de la Sankta Semajno oni invitis la partoprenantojn preĝi por “Perfidis Hebreis”, *por perfidaj hebreoj*, pro ilia agado dum la pasiono kaj mortigo de Jesuo Kristo. Intervenis papo Johano la 23a kiu *Motuproprio* por elpeligi el liturgioj tiun ofendan frazon kaj similaĵojn. Pri la mortigintoj de Jesuo Kristo eklezio havas dogman sentencon: la pekuloj, la homa pekemo! Kiuj fakte aranĝis kaj pretendis kaj fizike mortigis, estas duaranga afero, ĉiukaze afero de historiistoj, kristanaj aŭ ne, ne influanta sur la senco de la Krista elaĉeto.

"Mankis io inter ni, kvankam la centraj organoj malaprobis (vidu en *L' Osservatore Romano)* diversfontajn starpunktojn nemalkonsentemajn kun rasaj leĝoj. Oni kredis, naivege certe, ke tiuj leĝoj de 1938 ne atingus, laŭ nemalofta itala kutimo, la nivelon de efektiva aplikado, aŭ ke ili ne estus fakte reduktontaj hebreojn al la duonigita civitaneco, ankaŭ pro tio, ke multaj el ili iam publike kaj lojale asociiĝis kaj mone enrajdis la iam naskiĝantajn faŝismajn partion kaj reĝimon. Bedaŭrinde katolika intelektularo kaj elitaro dividiĝis kaj pritaksis malsame la aferon: estis iuj ne rifuzantaj la utilon limigi la financan kaj kulturkampan hebreajn refleksojn okupantaj la tutan nacion aŭ al ili imputis marksismon kaj freŭdismon kaj monkoncentrigajn ekscesojn kapitalismajn ktp. Ne mankis kiuj imagis, ke la itala kutima ruzeco evitu la leĝajn konsekvencojn, la naziisman ideologion kaj ŝajnrespektante triaregnajn premojn. Temas pri paĝo malglora. Bonŝance aliaj katolikaj instancoj, diversnivele, enkape la kardinalo de Milano, kiu aŭdacis sin deklari kontraŭa, kaj ĵurnaloj de katolikoj, alimaniere juĝis".

*"Ni franciskanoj, en XIV-XV jarcentoj, por defendi la kristanajn civitanojn de la buĉado de la uzura prunto, kreis aŭ inspiris en preskaŭ ĉiuj eŭropaj urboj lomdardejojn. Se tio okazis pro la uzura pruntedono, ĉefe de hebreoj, ĉu tio ne povis influinti la kreskadon de la ĝenerala malsimpatio al hebreoj, ruliĝonta poste en la pogromojn kaj holokaŭston?".*

"Franciskanoj inventis, ne kaprice, la lombardejojn, kiuj, trapuntinte la eŭropan kontinenton, defendis kontraŭ la kaptilo de la uzura ĉiuflanka prunto, en epoko en kiu estis damaĝe malpermesate al la kristanaro monalprunti intereze. Kiom da tiuj originis el miskonduto de hebreaj medioj, al kiuj estis ĉiam permesite pruntedoni ĝis interezo de sep/ok procente laŭ ŝtataj leĝoj, estas historiista problemo. Franciskanaj arkivoj pretas malfermiĝi antaŭ ĉiu esploristo. Antaŭvideble, el tiuj arkivoj ne eliros la *Komercisto de Venecio* de Ŝespiro, nur provoj reekvilibrigi kaj repacigi la intersociajn rilatojn. Ĉiukaze oni nun scias, ke ĉiu tiama ŝtato perleĝe fiksis limojn trans kiuj oni kulpis je uzura prunto: en Venecio estis, ekzemple, ok procente… monate!".

"*Eblas distingi kiom influis la akuzoj, kontraŭ hebreoj, de Lutero kaj de Voltero, kaj ties sekvantaro? Kio pli antisemita ol tiuj?".*

"Delikata kverelo. Laŭ mia impreso, nur impreso, mi ripetu, Lutero ne kontraŭsemitas, li kontraŭjudas pro religiaj motivoj, prave aŭ neprave. Voltero antaŭenigas ankaŭ rasisme odorajn motivojn. Certe ĉi du formis multon de la eŭropa kulturo, aparte Voltero kiu ne disdegnis akuzi, kvazaŭ nepardonebla

kulpo, la katolikan eklezion akcepti pruntedonojn kaj amikiĝi kaj fripone akordiĝi kun hebreoj...”.

*“Kristanoj kaj Judoj dikredantaj povas trovi reciprokan toleron kaj akcepton: sed, laŭ mi, tiu akcepto estos ĉiam ekkriziĝanta ĉar hebreoj atendas, ke kristanoj rezignu sin koncepti la hereduloj de la mesiaj kaj profetaj promesoj kaj remetu la eventon-Jesuon en la sferon de nure homaj eventoj: nome, ke kristanismo rezignu esti kristana. Ĉu eblas tio kaj tio respektas la homan liberon?”.*

“Eble. La afero tuŝas pli teologion ol historion. Cetere, oni informiĝu, ke en porklerula kontraŭjuda rasismo de nazioj la hebreoj kulpas precipe pro tio ke el ilia sino naskiĝis kristanismo kiu, laŭ ili, senenergiigus kaj polucius la karakteron de la germanaj gentoj, malebligante, ke ĝi estu la vera homa purraso: *detrui hebreojn por detrui kristanismon, kiu de jarcentoj celus debiligi la germanan rassuperecon*, jen la kerno de ĉio”.

*“Kial la papo ne pezigis sur la nazioj antaŭ la tuta mondo sian moralan aŭtoritaton por ĉesigi la genocidon de hebreoj, se pri ĝi informiĝis?”.*

“Laŭ mi, pro la sama motivo pro kiu li ne sukcesis malhelpi la militon kaj la mortigon de milionoj da katolikoj, aparte miloj da katolikaj sacerdotoj aŭ gereligiuloj... Ĉu oni povas lin kulpigi pri manko de obsediĝa strebado por la protektado al katolikoj?”.

*“Ĉu povis favori la persekutadon kontraŭ hebreoj la ne kontrastata konvinko, ke hebreo, fronte al kristanismo, ne sukcesas ne peni por ĝin ne malami kaj frape trakribi?”.*

“Pri tia peno mi ne havas spertojn, kvankam iuj hebreoj ne simpatiis al kristanismo tiom kiom iuj kristanoj ne simpatiis al hebreismo. Kontraŭ ĝi, se ĝi estas, licas nur liberaj diskutadoj aŭ argumentadoj. Fakte mi konas kaj scias hebreojn kristanajn kiujn eventuale superis tiun, se vere enestas, penon”.

*“Mi legis ion de la du Talmudoj, kie la diaspora hebrearo longe kolektis tradiciojn, pensojn, meditojn. Inter tiuj ĉi vi trovus (se vi legus la integran libron), ke hebreoj sin konsideris popolo supera, gento destinita al superrego super aliaj popoloj, aparte super kristanoj, tiujn ĉi eventuale utiligante kaj ilin humiligante. Eĉ malmoralaĵoj, se plenumitaj kontraŭ kristanoj, fariĝus permesitaj kaj meritfontaj. Ĉu rasismo antaŭtempa?”*

“Mi pri tio ne informitas. Sed tiaj elpensaĵoj kun similaj frazaroj malnoble flosas en multaj literaturoj”.

Sume, komentante la rezultojn de la diskutado kaj la ekscitiĝojn de la antaŭaj interparoloj, al mi liveriĝis la impreso, ke tiuj kiujn, dekojn postajn, oni difinis kliŝoj kaj sciaj kaj malsciaj antaŭjuĝoj, flosis pli tenace inter profesoroj ol inter la studentoj. Eble ni junuloj, laŭ okazaj interpretoj, kuŝis ankoraŭ sub la influo de legaĵoj ne ankoraŭ purigitaj aŭ kritike kribritaj; kio okazos baldaŭ ne sen ŝirantaj diskutoj kaj psikaj tamenoj ĉar la hebrea medio emas inertigi, socie kaj kulture kaj defende, la kristanajn mediojn per ĉiam pli ŝaŭmantaj kaj senhonorigantaj kulpigoj dum la katolikaj medioj hastemas, foje sendiskriminacie, pardonpeti por akiri plibonan akceptatecon ĉe hebreoj.

Je la unuaj de decembro 1945 mi devis alfronti penigan okazaĵon, kvankam kutiman kaj antaŭanoncitan: ĉiujarajn spiritajn ekzercojn. Dum ili oni plej intensigu sian adheron sentan kaj spiritan kaj mensan al Dio tra Jesuo, sed samtempe ekzamenu, akute kaj senmizerikorde kaj fore de mensogemoj instigitaj de satiĝemo de propra mio aŭ de psikaj, konsciaj aŭ nekonsciaj, tordaĵaj ruzaĵoj, kiom fidelis al la votoj: el la kvanto kaj kielo de la pasinta fideleco al la votoj oni, konjektante pri sia estonta ebla fideleco, elpensu spiritajn rimedojn por ĝin kreskigi.

Ekaperis antaŭ mi la endo diri al mi mem ion klaran pri mia ekstertipa vokiĝo. Kiun sencon havis miaj transsaltoj el ardaj decidoj al senardecaj eĉ filistrecaj sintenoj? Kies signaloj estas unu semajnon preĝi fervore kaj la alian preĝi nur aspekte? Ĉe okuloj de kapablulo psikesplori, kiu scias kiom da ercaĉoj malkovrus!

Sintonie kun la porokaza moto "lesivu la pasinton!" venis tra niaj manoj, eble lasita de la predikanto, libreto, eldonita en Trieste, nun forgesita rilate la titolon sed parkerigita rilate la enhavon. Ĝi prilumis la diversajn psikajn meĥanismojn de la homa nekonscio, laŭ freŭdismo: tiaĵoj, kvankam ne tute novaj por mi, tiklis mian atenton kaj kontribuis al *memanaliza* ekzameno.

Se insisti, parenteze, pri la kunpuŝiĝa malkovro aŭ teorio de nekonscio, disputo, tuj post la spiritaj ekzercoj, ekbrulis inter la konventuloj pri la realo aŭ ŝajnrealo ĝuste de io kiu staras trans la nomeblo kaj konscia sperteblo. Ĉu ĝi vere estas konstato kaj genia malkovro aŭ la psikaj fenomenoj pere de ĝi estas nur plisenmaskigitaj ĉar jam konitaj kaj, kvankam ne sisteme, jam pritraktitaj de la humanista tradicia psikologio?... Kaj defadeniĝis la pluroblaj interpretoj, sine mem de modernaj psikologiaj sciencoj, kaj diversaj difinoj de nekonscio. La diskutoj daŭris longe: ili nun servas al mia memoro por reelvoki la kulturan kaj edukan etoson de tiu medio, ne sendistre enŝaltitan ankaŭ de mi.

Kiel ajn, mi konvinkiĝis, ke miaj problemoj klarionis tute je nivelo de konscio: mi konis tre bone la pasintan kaj aktualan itinerojn de motiviĝo de miaj agoj. Mi ne rezonis pri tiaĵoj kun la pastro meditdiktanta ĉar antaŭvideblis liaj respondoj. Unu el tiuj, kaj eĉ la plej interesan kaj efikan, mi mem jam donis al mi: resti ĉe la fratularo ĝis la konkludo de la liceaj studoj forlasonte, se ankoraŭ mi tiel hezitemos, la fratularon kiam ĉesos mia trijara pervota ligiteco.

Tiu solvo (aŭ ĉu memabsolvo?), kaŝis subcelon, ne mavan el si mem sed interplektitan kun egoisma ruzaĵo: ĉe la fino de la liceo mi transiros kiel privatulo al la abiturienta ekzameno ĉe ŝtata komisio kaj akiros ŝtatan diplomon, necesan por aliri universitaton aŭ por eniri profitodonajn profesiojn. Kion dirus miaj superuloj se ili konus tian mian kalkulitan disponeblecon al kaptado de la oportunoj? Nepras sciigi, ke en tiu epoko, tia inklino diplomiĝi ĉe ŝtataj instancoj ĉiukaze suspektigis pri volo profiti de instruado kaj vivtenado por poste fariĝi libera birdo. Tion oni rakontis, kaj poste konstatis rekte ankaŭ mi ĉe miaj kunuloj, dum la transiro de liceo al teologiaj studoj. Se tio okazas pro ne enprogramita vivcela ŝanĝado, tio ĉe la konventularo taksiĝas okaza kaj honesta kaj, se ne konsideri ilian seniluziiĝon, laŭdebla eĉ justa elekto: se, male, intence celita, oni ĝin kondamnas kiel moralan misordigon, plejkulpan pro konstanta mensoga konduto kaj ekspluatado de la fidelulaj karitataj vivtenaj almozdonoj.

Endas eĉ al simplaĉa rakontado anticipi tuj, ke ankaŭ tiu solvo (la finlicea ĉeŝtata diplomiĝo kun la sekva forlaso de la ordeno) montris tuj, ke ankaŭ la tromparto kostas penadon kaj riskojn. Koncedite, ke mi, finlicee, flugos al la sekularaj liberecoj, jen la soldatservo preta min faŭke engluti por du jaroj. La birdvolo, el nesto al la mondo, kien kuŝiĝos aŭ frakasiĝos? Tamen mi bezonis koni sufiĉe la italajn leĝojn tiurilate. Mi tial decidis akiri precizajn informojn.

Ankaŭ tiu informakiro devis laŭiri sekretvoje ĉar tia preciza informpeto ĉe superuloj dubindigus ĉe ili mian sincerecon. Mi provis informiĝi sekrete, dum engrupaj promenadoj, ĉe la urba Milita Distrikto.

*"Ĝis kia aĝo oni estas devigita soldatservi?".*

"Ĝis tridekokjaraĝo", estis la frostiga respondo. La abrupta konfuzego de mia kapo malordigis ankaŭ la ordon de la torditaĵoj diritaj al mia kunulo por ke li min akompanu sen ŝovi la nazon en la aferon. Mi pretekstis al li bezonon de tiuj informoj por plialarmigi mian malruzan kunfraton; mi ne sciis, ĉu mia ŝrumpa reago al la senentuziasmiga respondo plu lasis min kredata ĉe li.

En Italujo la popolo, post la falo de la diktaturo, estis laŭte eniranta en la

demokratiajn sistemon kaj praktikon, eble faciligitan ankaŭ de la kulturaj elementoj jam inokulitaj de la propagando de la faŝista reĝimo kiu instigadis por ke la popolo plisociiĝu kaj unuformiĝu lingve kaj sente: se falis la reĝimo plurestis bonŝance la nova percepto de unueco.

Nun la balotoj trempiĝis per niaj socialaj pasioj kaj fariĝis efika politika konsciigilo ĉar politikaj partioj kaj ties programoj okupis ne nur nian distrotempon. La orientigo al demokratieco, en la ŝtataj administrado kaj regado, de la papo, kies ĉiu vorto enfalis nian disponon ĝin akcepti kaj realigi, altiris nin okulumi la eksterkonventan socion kaj disperdiĝi tra "Senfruktaj palavroj" kun damaĝo por nia koncentriĝo al la aferoj de spirito: fakte, tiu nova etoso estis taksata de iuj profesoroj danĝero por nia memformado, aliaj male juĝis natura, eĉ devontigeca kaj neevitebla, tiun enmergiĝon pro tio ke, en mondo konsciigita pri homaj rajtoj (kaj sociaj devoj) neprotagonistoj difektas ĝuste je nivelo de sia homa stato. Tiu nova inklino, iusence revolucia se ekscitita en religiuloj, ekmasonis siajn sloganojn: *Religiulo ne de la mondo sed en la mondo!* Aŭ: *Modifi la mondon por ne asimiliĝi al ĝi!*

*"Novaj pedagogiaj celoj, do novaj pedagogiaj atingoj, do novaj pedagogiaj metodoj estas postulataj kaj pristudataj en la vasta mondo",* resonis kiel subflustrita nova devizo. Kaj krome *"ni devas defendi la kristanajn valorojn. Kiamaniere ilin defendi, se ni ne konas profunde la socion ene de kiu dissemendas ĝuste tiuj valoroj?".*

Ĉiukaze tiuj novaj zorgoj kaj perspektivoj pretiĝas al mi kiel azilo kaj ekzilo! Azilo al miaj aspiroj kaj ekzilo disde miaj ne facile forgesendaj personaj problemoj.

Ekestis videble praktika kontrasto inter la edukantoj pri la nova eduka sistemo. Dume mi ne povis atendi: neniam mi foruzis okazon kaŝe akirigi por mi ĵurnalojn kiujn, post avida legado, oni devis tute ĝisspure elimini ĉar estis malkonsilite eĉ malpermesite al klerikstudentoj perdi tempon kaj *distriĝi* pri tiaĵoj, detruantaj, oni zorgigis, la laŭdeve neanstataŭeblan konstantan memkoncentriĝon per medito kaj preĝo. Mi je tiuj akiradis prenante, kaŝe, el la profesorara salono kaj foje eĉ aĉetadis, sekrete, eluzante monerojn sekrete ricevitajn de parencoj aŭ donacantoj. Devis pasi ankoraŭ kelke da jaroj por ke oni permesu kaj kuraĝigu la legadon kaj interesiĝon pri gazetaro.

La nova demokratio altrudis al ni novan taskon: baraĵon kontraŭ marksismo, je kiu riveliĝis impregnita la kompartio, ni nin engaĝis krei: pro tio, preskaŭ spontane, la klerikoj komencis purige liberigi el marksismaj/komunismaj allogaĵoj siajn parencojn per propagande laŭgradaj aranĝoj kaj per

oportunaj konversacioj kaj per leteroj kun alcelaj invitoj kaj instigoj. Nepris evidentigi, ke marksismo bataladas religion ĝis ties detruo kaj ke religio ne estis eltrovita kaj inokulita por profitigi gravulojn kaj riĉulojn. Estis granda lukto, foje kun dialektikaj ruzecoj. Por ke tiuj ĉi fondiĝu sur pravaj bazoj, la profesoroj pri filozofio anticipis diversajn studobjektojn por tuj alveni al la bezonata studo pri historia kaj dialektika materiismo, pri ĝiaj fundamentoj senfundamente supozigitaj sciencaj. Se al ni facilis repuŝi tiujn teoriojn, malfacilis, kaj suferigis, dispeli en la nenion la prematan krion de doloro de la proletoj, pro kies senhaltaj avantaĝoj oni inventis tian filozofion. Tiu dolorkrio ŝajnis modliĝe deveni el la Evangelio mem, el la parabolo de la bona Samariano helpanta la forlasitan vunditon. Jen la nova misio por la modernaj klerikoj, socie engaĝiĝantaj: grundigi medion taŭgan por superi tiujn maljustaĵojn kaj samtempe rifuzi la neadon pri la ekzisto de Dio kaj pri la dieco de Kristo.

Komenciĝis rapidaj studkursoj pri la Socialaj Enciklikoj, la “Rerum Novarum” de Leono la XIII liverita sojle de deknaŭa jarcento, kaj la “Quadragesimo anno” de Pio la XI kaj la radiomesaĝoj de Pio la XII. La problemo estis kiel transmeti tiujn doktrinojn al la laboristoj kaj kamparanoj. Pri tio, ĉiu serĉis sian vojon kaj nemalofte spertis sian... neĉiaman sukceson!

Aperis ĉiam pli klare, ke la laŭtradicie planitaj klerikaj kaĝstato kaj separateco el la mondo jam proponitaj kaj ankoraŭfoje duonaltruditaj de malfruantaj edukantoj, ludis kontraŭ al la novaj sociaj celoj. Stari, ĉirkaŭzonite la lumbojn per la devo kaj devontigo defendi la kristanajn valorojn, kaj klostre resti, okupite la menson nur per devotaĵoj, evidente kontrastas.

La devo/tasko interveni koliziis kun, fakte, ĉiuspecaj limoj kaj kuspiĝoj. Tial la inteligentaj energioj alfrontis tiujn baraĵojn.

En tiu etoso, ne pasis monato, ke kelka klerikeja gasto foriru al la retrovita mondo aŭ al la perdiĝo de sia vokiĝo, laŭ la plurobla vidpunktaro.

Tiu kunvivada kaj socialema klimato kondukis min refari pri mi novan juĝon. Kiam malaperis, kaj abrupte, en nenion kunulo kunvivinta ĝis tiam komunece kaj montrinta la samajn celojn kaj socipolitikan vidpunkton, al la surprizo plektiĝis, en mi, ankaŭ sento de ofendiĝo kaj stranga desaponto pli pro lia silento ol pro la definitiva forigo de amiko. Kial mia kunfratulo sin permesis min malfajne forlasi, malestimante mian eventualan konsilon? Kial ne konfidis al mi siajn animŝanĝiĝojn? Kial li min ne riĉigis je sia sperto, kiun mi multe bezonas? Ŝajnis, ke al mi forfuĝis mondoparto, kiun apenaŭ iom pliantaŭe mi povis profiti laŭ mia bezono.

Alifojon sin eklipsis por ĉiam iu kiu jam novicis kun mi, fratulo Tranquilli-

no (=Trankvilino), kies trankvileco travideblis ĉiuokaze ĉar li komplezece akceptis fariĝi celobjekto de la neĉiama nenoca volo de kunuloj sin liberigi el misrege kontrolita kunnaska agresemo. Ĝis antaŭkelkjaro li strebis, sed ne ĉiam sukcese, kaŝi sian plezuriĝon pisumi la liton. *Pisiĝulo* oni pensis pri li, sed la vorto antaŭ li neniam laŭtiĝis. Iujn matenojn, enprizonigita en la dormo ĝis la lasta momento, li ne trovis tempon por sin purigi el la restaĵoj de la neestetika nokta evento, tiam li moviĝadis lante kun la kruroj iom pli inklinaj dilatiĝi ol normalkaze. La apenaŭ konscia kunulara kruelo tiam havis preta la komentaĉon: *"La litpisulo fariĝis enkotiĝinta paŝulo".* Certe al li ne ĉiam forfuĝis la eksceso da gajeco ekscitita de lia moviĝo en tia stato de enkaĉigito.

Ĉio tio jam estis pasinta forgesejen; nun oni ne sin detenis el la komentoj pri lia malapero. Ĝuste dum tiuj komentoj, mi perceptis en mi novan senton, senton kiu eble jam trakuris meandrojn de mia psiko, sed kiu en tiu momento manifestiĝis en sia insida miseco: ekĝermetas en mi, sub la aspekteca bedaŭro, io memkontenta: jes, al mi konkrete ne malplaĉis, ke mia amiko forlasis la kunularon, kvazaŭ se ni restus nur malmultaj, plivaloriĝus mia pozicio de konstantulo, kaj samtempe la evento trovus okazon por montri la bonegecon kaj taŭgecon de miaj komentoj kaj interpretoj pri la evento mem. La plezuro pro la oportuneco de miaj *"glosoj"* superis kaj estingis la domaĝon pro la perdiĝinto. Kio ajn estu, la konscienco min avertis, ke mia sentado kristana, elfareme kristana ankoraŭ ne fariĝis. Ĝoji kun ĝojantoj kaj suferi kun suferantoj, eĉ nur nivele de volo, restis foje pli kontemplado ol alstrebado. Kaj konscie mi devis kontraŭstari alian malamikon sendube pli feran ol la antaŭaj.

La pordisciplina majstro, kiu prezidis al la operacoj *de deaĥigo aŭ softa forigado* de la jam taksitaj "nevokitoj", komunikis dumpromene, ke nia Tranquillino, post seriozaj pripensoj, *konsciiĝis, ke li alstrebas belan edzinon kaj multajn gefiletojn*. Mi, tamen, ŝatus scii ankaŭ alion, ekzemple, ĉu li povos daŭrigi studadon hejme? Ĉu li sukcesos dungiĝi malgraŭ la vasta maldungiĝo (30%)? Ĉu li evitos la englutiĝon en militservon je dudekkvara monata? Kaj, plie, kio aŭ kiu konsentis aŭ malhelpis, ke li haadiaŭu, almenaŭ forfuĝe, delongatempajn samsortanojn?

Je la fino de 1947 nin vizitis nia kunfratulo, jam sacerdoto, patro Andreo. Tiu renkonto gravuris signon sur nia menso. Sana kaj karnaosta tiom kiom sufiĉas por apenaŭ sin movi kaj asistite vojaĝi, kaj barbablankiĝanta kvankam tridekkvinjara, lia persona historio estis jam konata kaj priparolata kaj admirata. Jen ĝi: li kapelanis en bataliono kiu amase rifuzis (tuj post la armistico de la septembro 1943 kiam Italio rompis aliancon kun Germanujo) subiĝi al ger-

manaj armeanoj en Greklando, pro tio li estis sendita, kune kun postvivantoj kaptitaj en montara rastado, al Germanujo, precize al la lagera koncentrejo de Dachau[4] (liaj kompanuloj al Mauthausen kaj Gusen) kie li sin trovis enkadre de centoj da aliaj katolikaj sacerdotoj. Tie li restis 10 monatojn. Kun voĉo lace sordinita en anhelanta spiro, li rakontis kiel pasigis la tagojn, kiel tieaj prizonuloj kune brevieris nur parkere, kiel ili reciproke kuraĝiĝis, kiel kiel... La atesto plifirmiĝis sur la konduto de sacerdotoj: dekomence subtenitaj de la propra kredo kaj spirita *alkroĉiĝo al la kruco de Kristo*, poste, kiam malsato kaj frosto kaj altrudita laboro kaj malsanoj febligis iliajn korpon kaj psikon, la vivinstinkto nerezisteble premegis forgesigante, ĉe iuj, eĉ la kristanan fratan amon. Li vidis pastrojn, en la ĝenerala tensio de la rilatoj inter kaptitoj, forŝtelintaj panpecetojn de aliaj malsatantoj, ne nur nigran kaj segalecan panon sed eĉ ŝimajn panpecojn hazarde finitajn tramane de sammisfortunulo momente malpli misfortuna, li propraokule kun hororo konstatis, ke iuj atendis nepacience, ke la apuda mortanto forpasu por profiti je ties drelikaj vestoj kaj ĉifonaj kovrilaĵoj. “Kelkajn personojn suferoj transformis al ekspersonoj”.

*“La kondiĉaro fermigis, paŝon post paŝo, la febligitan menson kaj la koron devigante homojn tutegoisme konduti, perdigante kulposenton antaŭ Dio kaj homoj. En kontakto kun ĉio tio mi ekkomprenis, ke la kruco por ni, ĝis tiu momento, peziĝis senpersonigite: ĝi estis aĵo, afero, instrumento, ne estis Li, Jesuo, Persono. Mi ekkomencis vidi plireale en mia kunfrato Jesuon kiu suferas ĝis la perdo de memkontrolo”.*

Kompreneble, li konstatis super ĉio senkondiĉan fratan amon similan al tiu, ni nun povas ekzempligi, de la rektoro de la universitato de Nimega (pastro Tito Brandsma), kiu finis siajn tagojn ĝuste en Dachau, sed nin interesis kaj malĝojigis tiuj nesuspekteblaj malbelecoj de la homa psiko, eĉ en plej profunde edukitoj kaj entreniĝintoj en la mediton. Ĉiukaze li vidis centojn da pastroj, malsaniĝintaj pro punlaboro kaj malsato, enŝarĝataj en kamionoj. Kien ili treniĝas? *Ili iras pliagrabligi sian sorton!,* venis respondo, eble senvole, ironia. Ĉar neniu el la malsanuloj iam ajn revenis al la lagero, embriis la suspekto pri sekrete planita eliminado. Pro tio naskiĝis komuna fakta engaĝo kaŝi ĝiseble la malsanulojn, ne ĉiam sukcese tamen.

Inter ĉiuj jam fariĝis konscio definitiva ke, kune kun la hebreoj, nazioj al-

[4] En septembro 1943, en la koncentrejo-gasejo de Dachau nombriĝis registrataj 2644 katolikaj sacerdotoj de 24 landoj (el tiuj 868 ne plu revenis), por kiuj nenion povis Pio la XII. (Laŭ historiaj esploroj de historiistino Evghenjia Tokareva). Entute oni kalkulis mortigitaj 2579 katolikajn pastrojn, 109 evangeliajn pastorojn kaj 22 ortodoksajn popojn. Aliaj fontoj trovis, ke ĉe la ”blokoj” 26 kaj 28 estis ”gastigitaj” 2644 germanaj kaj 2044 polaj pastroj.

strebas neniigi eĉ ĉion devenantan de tiuj: nazia antisemitismo signifas ekstermon de hebreoj kaj kristanoj: la unua kaj la dua etapoj jam ekmarŝis kune!

La forportitoj sin lasis treni, kuraĝigante unu la aliajn kaj esprimante, pervorte aŭ perkondute, sentojn de pardono al la perfortuloj, el kies vizaĝoj nur malofte pulsis io malkvieteca.

Amuzis nin la epizodo, el lia rakontado, pri pastro kiu, ricevinte akran frapon pro sia flegado de rilatoj kun diversaj realaĵoj, kaj, precipe, pro donaco de fromaĝpeco al alia pastro kaŝe vizitata en pungardejo, vorte, kaj geste, aludis la viran priseksan potencon de la lin batanta ĝendarmo, ĝin deklarante manka kaj jam loziĝinta. “Tiu ĉi, eble latindevena kaj, spicigite de pugninvitoj de la germana pastro, demetis la fusilon kaj, tute apud la lima pikildrato, nevidate de werhmachtaj soldatoj kaj iom malantaŭe de la porprizonula barakego, ekakceptis sin reciproke defii per pugnoj: ili interboksis stare tere piede mane kubute ĝis la pastro, kunstreĉante sian lastajn fortojn, per kelkaj luktartaj movoj sukcesis disbati la soldaton kiu, fine, malproksimiĝis kontuzita ĉe la nazo kaj brakoj. Ni ne aplaŭdis nur por ne plireagigi la ĝendarmon kaj restis atendantaj la punreagon por ĉiuj barakanoj. Nenio reage mornis; ni vidis, male, postajn tagojn, tiun ĝendarmon enorde en sia vica taska posteno. Dume la boksanto famiĝis kiel *la pastro pugnisto.* Mi memoras pri li la prizorgan atenton al ĉiuj bezonuloj; sed, bedaŭrinde nenion mi ĝis nun scias pri lia fina sorto, same kiel cetere pri tiu de aliaj multaj, kiujn mi certe vidos en la resurekta tago”.

Pri gasĉambroj por gasadi vivajn homojn, li nemulte sciis kaj malpli vidis, sed post la liberigo fare de aliancanoj kaj dum la reveno al Italujo klare eksciiis pri tio. Supozinde lia suspekto estis dampita el la fakto, ke ĝuste en diversaj deĵoradoj, ĉe aliaj koncentrejoj, ŝajnis (sed longatempe tio taksiĝis kalumnio) tiam prizorgantaj judaj prizonuloj mem, laŭ onidiroj: ankaŭ tiuj lastaj onidiroj nun havas pli ol versimilecon. Veras, ke pluraj malaperadis ĉiutage, sed pro morto aŭ alia destinado, kvankam obskura. Nun en li reziduas nur unu havindaĵo: ke estu memorigitaj ankaŭ tiuj suferoj kaj ke li sukcesu reiri al tiuj koncentrejoj por *”spiri almenaŭ la polvon de tiuj kunfratulaj korpoj bruligitaj certe, eble mortigitaj per gasado, kaj tio antaŭ ol mi perdas rajton fidi mian memoron”.*

Male, li transloĝiĝos ĉe sian Sinjoron post malpli ol tri monatoj.

Mi malkovris en mi esplorindan fenomenon. Ju pli en mi nestas la ŝanceliĝoj rilate mian definitivan adheron al tio kion oni nomas vokiĝo, des pli mi fariĝas ortodoksema kaj fidelema al la doktrino, tio estas preta akcepti kaj defendi la tradiciajn dogmojn de katolikismo: tia sinteno surakviĝis dum disku-

toj kaj interamikaj kaj lernejaj, kaj dum interparoladoj kun laikuloj aŭ politikistoj aŭ kun familianoj. Pri tia paralelismo mi konsciiĝis pograde. Ĉar mia atento al freŭdismo min pelis favori mian inklinon al memanalizoj por eventuale malkovri ĉu unu generis la alian, mi faris rezonadojn por esplori kiom koheras la valoroj de miaj tezoj kaj de mia argumentaro kun la kristana doktrino, kaj kontroli vekiĝantan novan dubon, nome ĉu mi la samon asertus se mi estus sekulara samkvante klerigita; fakte ion da dubo, eĉ se surfaciĝanta precipe en postaj repripensoj pri mia sinteno, tiu enketo de mi pri mi ŝprucigetis.

Mi supozas, ke mi timis, ke aplikeblas al mi la leĝo de la interkomunikiĝantaj vazoj: se likvon el tiuj unu perdas, tiu ĉi tuj je ĝi ricevas de aliaj, tial ke la nivelo de la likvo en la malsamplenaj vazoj ĉiam egalniveliĝu: se la nivelo de la vazo de l' honesteco malleviĝas, aŭtomate helpas la vazo de la sendiskuta akceptemo pri la dogmoj eĉ de tiuj senfundamente enkrustiĝintaj laŭjarcente pro devotecaj ekscesoj kaj ne instruataj oficiale. Tial pli obsede en mi adas jena demando: ĉu honestas plialkroĉiĝi al la kredo kaj sin teni al ĝi kupleme nur por mildigi la senton de kulpoĝemo devenantan el la propra malseriozeco? Elĵetiĝis, kun silenta krio, demando subintencanta negativan respondon. Kompreneble, ĉi tie mi uzas la terminon *dogmo* miksante la dogmojn oficiale difinitajn kun nedifinitaj, do la konstituantojn de la kredo mem kun tiuj ankoraŭ diskutataj aŭ enkondukitaj de la pieco de fideluloj aŭ spekulativado de filozofoj kaj teologoj de la kristanara medio, pri kiuj neniam la eklezio sin prononcis. Ne envicigendas, tamen, en tiu listo la moroj kaj ordenaj kaj fratulaj kutimoj aŭ liturgiaj gestoj ktp. Mi ilustros, okaze, kaj ekzempligos tion en eventuala diskutado pri doktrino.

Ĉe la lerneja jarfino oni sin engaĝas demonstri kiom kaj kiel oni *spilis* la profesoraran instruadon, per *akademio*, pumpa vorto por iuspeca, foje plurtaga, plurprelega turnirado en kiu la diskutado kaj prezentado koncernas specifan temon. Volonte la studentoj elektas po unu priparolendan temon, kiu poste estos ilustrita se la juĝa komisiono ĝin aprobis, kio okazas ĉiam. La akademioj, oni diris, taksiĝas talentorivelaj kaj foje eĉ talentonaskaj, almenaŭ interesnivele. Kaj ankaŭ okazo de mispaŝoj ĉar oni permesis prelegi eĉ sen la ŝirmado de profesoroj.

Tiujare (junio 1947), mia adlibitume elektita temo - taksata kvazaŭ oficiala finlerneja prelego - koncernis Nominalismon. Kiel sciate, tiu pensokonceptado, influinta la filozofion de la dekkvara kaj sekvantaj jarcentoj, subtenas, ke ne eĥas en nia menso ideoj pri objektoj ĉar niaj konceptoj estas nur vortoj, nur voĉaj sonoj (latine *flatus vocis = son' kaj fum',* laŭ tiuepoka goliarda difino) ne difinantaj do la realon ekzistantan. Se tiel estus, ĉu eblas ankoraŭ

ekkoni ion pri Dio, pri ties esteco kaj esencaj specifoj? El prifilozofia kaj priteologia historio oni plagiĝis per grandaj bataloj ankaŭ rilate tiun penssistemon kun politikaj kaj militaj sekvaĵoj ĉar iuj el tiuskolaj teologoj partianiĝis kun imperiestro kontraŭ la papo okaze de politike seriozaj kaj milite perfortaj kontraŭaĵoj.

Tia elstariĝis la demando, pri kiu la kultura verviganto devis katedre respondi per siaj rezonadoj kaj refaroj, eventuale kun kritikoj, de la argumentadaro de granduloj pri filozofiscienco, kaj eventuale oportune rezisti obĵetojn de la kontraŭuloj realaj aŭ rolludantaj.

Se pravus ekstremaj nominalistoj, nia koncepto pri ekzisto estus nerajta kaj se ĝin ni aplikus al Dio, neprave tio estus farata, do ni ne povas diri ĉu Dio reale ekzistas, reale kreas, reale amas, reale generas filon ktp. Vere, eĉ la tuta homa sciaro kriziĝus.

Ĉar la bazo de nia kristana kredo establiĝas sur la kapablo de la homa racio koni ion precizan kaj sendubecan pri Dio, kaj homare komunan, ni devas rifuzi tiun pensmanieron, kaj defendi la kognokapablon de la homa inteligento. Tia mia konkludo. Sed el la partero tuj kelkaj kontraŭsentencis, ke la konkludo larĝiĝas neglektante, ke renomaj nominalistoj, en filozofio aŭ teologio, ĝuis estimon de sinceraj kristanoj persiste engaĝiĝantaj en la anonco de la Bonscigo. "*Se nominalismo enfosiĝas en tiun vian konkludon, ni bezonas konkludadi, ke multaj kristanaj filozofoj vivis aŭ vivas kontraŭdire*", iu obĵetis.

Ĉi tie mia respondo ne fluktuis: *"jes, tiuj kristanaj filozofoj pensadis sen alveni al la konsekvencoj de sia pensado. Ni povas paroli pri feliĉa nekonsekvencaĵo, se ne diri, ke ilia nominalismo sonis pli vorte ol pense. Eble mankis eĉ tiuepoke la kuraĝo eltiri la logikajn konsekvencojn de tiuj premisoj".*

Ĉar la rezistanto al mia tezumado insistis uzante, laŭ mi, argumentojn insidajn kaj artifikajn, mi ne limiĝis al la asertoj de mia tezo sed ankaŭ ironiis pri la kontraŭulaj enŝovante kaj uzante, eble preterportata de trofaremo konfuziĝinta pro la neceso rezisti al rezisto, la romajn kongregaciajn dokumentojn rilate kredismon aŭ fideismon, ilin amplekse traktante. Tiujn nefilozofiajn apogajn alvokojn oni kritikis pro tio ke mi provis savi la koneblecon pri Dio nur baziĝante sur la trajarcenta aŭtoritata tradicio, kaj pro ne sufiĉe konvinka perracia argumentado en la refuto de la certe erara nominalisma eble senvola konsekvenco laŭ kiu la homa intelekto nenion povas koni pri Dio.

La diskutado pliakriĝis kiam la lernejestro, bilancante ĉion, intervenis aljuĝante malavaran poentaron al mia prelego, malgrandan poentaron al la res-

pondoj al la objĵetoj, nulpoentaron al la aŭtoritataj finaj ilustradoj ne *malkiel al malutila redundeco*. Svarmis laŭdoj por ĉiuj. Por mi, krome, oni rekonfirmis la famon de *konsekvenculo*, rigida konsekvenculo, kaj eble de petolemulo en la sindefendo. Ankaŭ pri tio ardis kaj pasiis la diskuto, se ne podie kaj konferenceje, certe koridore. Eble mia prezentado konfuzis senĝenon kun manko de flekseblo kaj kun trointelektumeco.

Ankaŭ alia emo kerne de mi mem ekburĝis pli klare ol antaŭe, ofte bonŝance akompanata de oportuna memjuĝo, iu nedifinita sento de ĝojo kiam miaj kolegoj ŝrumpas aŭ estas perdantaj estimon ĉe eminentuloj. Mi devis min elnestigi elinter memplaĉoj pro miaj supozitaj sukcesoj, kaj pridiskuti kun tia sento multe natura sed ne multe kristana. Ĝi, kaj pri ĝi kontroloj, min akompanos por ĉiam, mi opiniis. Ne malofte, fakte, tiu sento rivalecas kun la kristana devontiĝo al senrezerva amo por homo kiu ajn, almenaŭ dezirante ĉion bonan por li. Pro tio naskiĝos bataletoj kontraŭ mi mem.

Intertempe oni estis alproksimiĝantaj al la balotoj de la solida plifirmiĝo de la demokratia politika kunvivado, kun la samspeca sed pli intensa akreco ol kiam disvolviĝis la politikaj balotoj selektantaj urbajn kaj provincajn estrarojn kaj precipe la delegitojn de la konstitucianta asembleo. Nun oni devas aprobi aŭ malaprobi la preparitan konstitucion. La tuta klerika studentaro estis invitita malestimigi la katolikan partion, kiu ĵus renaskiĝis kaj energie gajnadis grundon tiujn tagojn, kaj male voĉdoni por la partio de katolikoj, eble pliĝustadire, por la partio en kiu, sente kaj agade, kuniĝas la plejmulto de ne nur katolikoj kaj kiu samtempe garantias observi kaj realigi la doktrinon de la Socialaj Enciklikoj proponantaj la socian ordon laŭ la homa racio prilumita de la revelacio. Nu tia partio kampanjas por la nova konstitucio same kiel la plejparto de la partioj.

Mi konstatis, tiukaze, kiom altiras kaj fascinas la kompartia programo: pene apenaŭ konvinkiĝintaj, eble nur fideisme konsentemaj, eĉ miaj parencoj akceptis voĉdoni laŭ miaj sugestoj.

Komunistoj akuzis la klerikularon partianiĝi por la riĉuloj kaj precipe propagandi pagante kaj afiŝante surmurajn manifestojn. Rilate la pagon por la manifestoj, mi ne kredis, rilate tamen la afiŝadon ĉio veras ĉar ĝuste ankaŭ mi estis protagoniste paperfarbanto de placoj kaj domfasadoj kaj arboj kaj palacaj balustradoj, laŭ komuna kutimo tiutempe. Komunistoj pretekste akuzis eklezion alstrebante, ĉefe, al forigo de katolikoj el la politika areno same kiel jam faris, alicele, la *Non expedit* (= Ne licas), la malrajtigo, starigita en 1868 de Pio la IX por la katolikoj, partopreni en la politika agono kaj, do, kandidatiĝi en politikaj

balotoj. Tempon kaj perdojn kaj penojn kostis la malefikiĝo de tiu dekreto!

Mi kun aliaj klerikoj, civilveste maskitaj, superkovris noktatempe vastajn ĉirkaŭaĵojn de la konvento, kaj aliloke, per manifestoj invitantaj voĉdoni por la DC (= Kristana Demokratio): en unu el ili homa figuro enpensiĝanta kvatas skribaĵon: *"en balotejo min vidas Dio, ne Stalino".* Ĝuste tiu ĉi elvokis plej akrajn protestojn ĉar Dio aspektis *hoko por naivuloj.* Al la eventualaj anatemuloj ni digne sinpraviĝis, ke la eklezio ne enmiksiĝas en tiujn aferojn kaj ke ĝi partianiĝas senpartie (!) kaj ke neniu partio prioritatas ĉe ni. Se tiaj asertoj lasis dubojn, bonŝance, jen pli korekta refuĝa defendo: ekleziuloj, kiaj civitanoj, estas rajtigitaj de sia civitaneco esprimi sian penson kaj por ĝi kampanji. El tiu ĉi sperto restis en mia animo precipe la ĝuo esti vestita je civilaj vestoj kaj spiri per la tuta sensaro spontanan liberigan etoson, preskaŭ emancipiĝon el klaŭstra opresado. Partopreni en antaŭbalotaj mitingoj aŭ politikaj konvenoj ne estis permesite sen speciala superula konsento, sed mia protagonistemo, oratora kaj publikdebata, intense rafiniĝis tra, ene de mi mem, fantaziaĵaj diskutoj, kaj babiladoj inter ni ĝis venis la permeso, eĉ la sprono tion fari publike. Oni rimarkis, tiam, ke en tiu akvo mi padelis kun feliĉo. Kun feliĉo ja, escepte kiam mi devis, en mitingoj, superkrii mian kontraŭulon obstinkape necedantan parolspacon al miaj laŭakordaj intervenoj, kaj klakantoj el la placo min epitetis per "reakciulo!".

Ĉe apogeo de la balota kampanjo ni ekpratikis ankaŭ ekscite profiti la faman individuismon de la italoj kaj morteris sloganon: *"Kun komunistoj ĉio al la ŝtato kaj al vi la senutiliĝo de viaj virtoj".* Ĉi-tiun mi uzis antaŭ areto da studentoj kiuj, preskaŭ amuzige, komentis inter si: *"Tiu fratvestito krom teologion komprenas nenion".* Tiufojon ridis ankaŭ mi.

La balotan rezulton, kiu akirigis al la DC absolutan majoritaton kaj registaran potencon, lasis kreski, iom naivece eble, en mi la konvinko pri mia nemalgrava kontribuo por la loka venko. Sendube naiveca estis la malkaŝa vanto pri tia konvinko.

Dum svarmiĝo de tiu propagando, fratina morto venis varbadi kunstudenton, fratulon Kosma. Okazaĵo antaŭvidita sed same suferita. Frato Kosma jam afekciiĝis je grava malsano jam de kvar jaroj: lia malsano lin devigis nutriĝi, laŭ kuracistaj aŭ tradiciaj konsiloj, preskaŭ nure per kaprina lakto; ĉar dummilite ne ĉiam facilis akiri freŝan kaprinan lakton, la konventa ekonomo proponis kaj aĉetis kaprinon pretan melkiĝi. Juna kleriko Kosma, transloĝiĝante de unu al alia konvento-studentejo, rendevuis ĉiam ankaŭ kun kaprino kiun, ĵusakuŝinta, oni senigis je la naskaĵo por ke la lakto restu tute al li.

En la Verona konvento la kaprino estis provizore (provizore por la tuta korta brutaro, destinita forlasi la urbon freŝordone de la urbestro) enstaligita apud la porkejo, jam evakuita de kiam la aviada bombado igis liberaj promenantoj tra la urbaj stratoj la porkojn. El tie venis de tempo al tempo amuzaj beadoj. Foje, ni iris kun li kooperi al la melkado kiun mem faris: kaj ne estu preteratentitaj la ŝercoj kaj amuzaĵoj ŝprucantaj el buŝoj de klerikoj! La kaprino laŭ niaj amuziĝdiroj enpersoniĝis je rolo de edzino: *kiel fartas via edzino, nigra kaj ĉarma? Ĝiaj bleketoj... ĉu per ili ĝi ne ĝeme protestas, ke vi ne fidelas? dum ŝi fidelas ĝis la donado de sia lakto, de sia vivo?*

Okazis, ke marĝene de melkado ĝi foje elmetis fekaĵboletojn kun furzetoj. Senlace la ŝablona fenomeno ekscitis la fantazion de ĉeestantaj klerikoj: ili metaforigis ĝin al la ĉasteco: *Ho ve, via edzino pudorofendas! Ĉu via edzino daŭrigas publike malĉasti? Ĉu vi konscias, ke via edzino ne kontentas je vi? Vetu, ke via senidigita kaprino igos vin patro. Kial vi ne ekloĝas kun ŝi?*

Li montris la simplanimecon de homo kiu vivas kun Dio, kaj sin sentas akceptata kaj amata de Jesuo Kristo kaj de la kunfratuloj ĉiam zorgantaj pri li. Morto lin surprizis partoprenanta al la porfratia Meso: sidiĝinte en sia ĥoreja seĝo, de la revenantoj el komuniiĝo li estis trovita senspira, kvazaŭ dormanta.

Nia doloro estis pli ceremonia ol kora: nia senrezerva estimo al li etosigis nin en plicertecon, ke li estas nia kristale pura kaj senpeka stafeto al la ĉielo ĉe Jesuo Kristo.

Ĝisĉiloka leganto, se ne jam tedeĝinta, certe rimarkis la abundon da repetiĝantaj metaforoj je seksaj aŭ geedzaj realaĵoj ekflorantaj el la buŝoj de klerikoj. Ĉu tiu lingvaĵo travidebligas bedaŭron aŭ nekonscian deziron? aŭ altruditan rezignon pri la seksa kuniĝo? Demandoj konstante rekonceptitaj sed kiuj tiam postulis pli taŭgan respondon.

Tiu lingvaĵo oftiĝis nur ĉe eta parto de ni, sed ne rifuzitis de aliaj kiuj konsente partoprenis per aproba ridado samkiel en komunaj goliardaĵoj. Ĉu tio devus alarmi la edukantojn? Ĉu nur mia inklino al psikanalizo vidis iun translokiĝon de ankoraŭ pli esprimita ol konsentita deteno el edziĝa perspektivo kaj amoraj rilatoj, kaj nereteneble kaŝitan deziron en tiu lingvaĵo malpli surprizanta ol ĝenanta? Eblas, certe. Sed eĉ tion edukantoj kuraĝis suspektigi al ni kaj... maltrikadi, senmetafore, en la kaŝitaĵoj de la metaforoj.

*"Viaj metaforoj, foje belaj eĉ poeziaj, reliefas la potencon kaj neelimineblecon de la emo kaj bezono ĝui je la tenereco de kompanulino... barakti por nuligi ĝin kreus psikan tordaĵon: tiu de la anstataŭiĝo per malpli rompanta objekto kovranta la unuan...*

*“Kvankam ne ekskluzive, tiu via provizo de figuroj-imagaĵoj amaj-nuptaj-geedzaj povus riveli tiun ĉi nekonscian virtuozon. Tiu emo natura ĉar kunnaska, ŝajne nevenkebla, povas esti superita nur per nova emo, per alia memkreita amo, ne trudita elekstere, sed libere elektita: en nia kazo, la persona rilato kun Jesuo kaj ties idealoj.*

*“El si mem, tiu via elana metaforigemo povas funkcii kiel spiontruo por ĝuste observi ene de vi mem kaj transiri la baraĵojn inter konscio kaj nekonscio. La preĝo al la Sankta Spirito kaj la animmalfermiĝo kun la spiritgvidanto dotigas je plej efikaj sondiloj por riveligi ĉu vi anstataŭas per tiaj figurplenaj kreaĵoj kaŝitan preferon. Oni vidu ĉu tia seksa metaforigemo estas anstataŭiĝo”.*

Se la pastro majstro sciintus, ke tiuj vortoj estos originantaj la reciprokeblan esprimon inter ni: *“Per kio vi anstataŭas?... Ve! vi estas anstataŭanto!... Ĉu vi malimplike traktas la sekretaĵojn de via psika eno per vi mem aŭ ĉu vi bezonas anstataŭoarton?”*, eble li hezitintus paroli tiom senvuale. Ekstere li rivelis nur kelke da kontraŭeco fronte al nia ada kaj ada nova lingvaĵo, sed ne provis ĝin bridi. Pograde, ĉiukaze, el tiaj metaforoj restis preskaŭ nenio; restis, male, la emo ĉion ŝajne spritindigi por fine ĉion, aŭ preskaŭ ĉion, kribre kaj ekvilibre juĝi. Kun la morto de frato Kosma ĉesis, aŭ ĉu ĝi transigis sian urĝon aliloken?, ankaŭ tia metaforigemo.

Por iom savi nian ameman kaj seksan esprimaron, krom kaj paralele kun la tiklaĵoj kaj admonoj, oni prikonsideru la lingvaĵon de mistikuloj, kiuj, rezignante al ama unuiĝo kun unika persono, inventis la lingvaĵon de la geedzeca amo kun Dio mem, kie la sekseco estas certe forto kaj motoro kaj puŝo al kreado de nova lingvaĵo, sed ne celo: la biologia-psika energio agadis, senkamufle, kiel spirita inklino al Dio, al Kristo por energiiĝi kiel amo al ĉiuj. Nia lingvaĵo, deveninta el farĉo el ŝercemo aŭ kaŝita sopiro, fariĝas fonto de komprenado de la scioplena lingvaĵo de mistikuloj, en kiu brilas pli ol detenoj la tenoj, tenoj de amikeco kaj familiareco kaj sindoneco al Dio.

La pliaĝaj klerikoj, tiuj de la tria liceo kaj teologiejo, junie lernojarfine, promeseldiris siajn definitivajn votojn, per kiuj ili sin ligis por ĉiam al la franciskana vivstilo. Al tiu paŝo ili sin preparis per plurtaga preĝado kaj meditado, per *spiritaj ekzercoj,* laŭ religiula lingvaĵo. Al mi estas rezervita la honoro permane teni la liturgiajn librojn dum ĉiu kandidato, tenante siajn manojn en tiuj de la celebranto, laŭtvoĉe igas sia la formulon en la ĝenerala silento. Tra religia silento la voĉo trakuras la preĝejajn volbojn por finiĝi sur la atentaj oreloj de la parencaro kaj fidelularo admire ĉeestaj. Mi bone konis la votkon-

fesantojn kaj pretis veti, je mia inteligento, pri ilia fideleco al la votoj, tio estas al Jesuo Kristo laŭ la franciskana stilo. Per tiu sendubeco, inundanta je sankta fiero mian animon, mi stompis kaj konfuzis mian tiufojan senton de eksterlokeco, el kiu mi ĵus eksupreniris, kun penso: mi havas bonŝance ankoraŭ unu jaron antaŭ mi! Kaj tial povas veni al mi la volo vokiĝi!

Tri el tiuj solene pervote promesintoj, kelkajn tagojn poste, ellandiĝis al Palestino, al Jerusalemo, en kies *Bìblicum* ili specialiĝu, elektante iun el la diversaj fakoj, pri la Biblio krom lerneje frekventi la aliajn kvarjarajn normalajn teologiajn fakojn, kaj sin ekpreparu al la instruadarto kie ajn. Ĉar unu el ili jam famiĝis pro la menciita emo al geedza metaforado, mi lin ĝisis per klarvide freŝa aludo: *"Vi nun kunvivos nur kun via amata edzino!"*. La sankta Biblio.

Ili, trapasinte al Sud-Italio, ŝipe forveturis kaj mi ne plu ilin renkontos.

Finiĝis la licea periodo kaj finiĝis ankaŭ la trijara periodo de *simplaj* votoj *(simplaj* = leĝerligaj, portempligaj, *solenaj* = porĉiamligaj). Nun ĉiu decidiĝu aŭ por la solenaj votoj, tio estas por ĉiam, aŭ por la forlaso de la ordeno. Ke mi estas dubema, momente favora momente malfavora, mi kredis scii nur mi kaj, kvankam ne sufiĉe klarigite, mia spiritgvidanto. Prie neŝanceleble mi evitis akurate travidigi al li ion suspektigan. Nu, malgraŭ tio, superuloj kaj iuj profesoroj voĉdonis por ke al mi estu prokrastita la momento de la solena ligiĝo antaŭ Dio kaj antaŭ homoj. Ankoraŭ unu jaron mi restu senvota, atendanta pli senhezitecan komprenon pri mi fare de la edukantoj. Se temus nur pri tio mi devus dankĝoji, en mi mem, pro la tempo koncedita, kvankam mi jam konas tre bone min mem. Sed ĉe la aliaj kandidatigitoj, kio? Kia ilia juĝo pri mi? Ĉu eblos plusinteniĝi kun ili spontane kaj estimate? Ĉu vere mi lasus enpaŝi en min la okuloj de la edukantoj kaj mi povus estonte traaperigi pli vokitecan kadron pri mi?

La surprizo ĉe miaj kunuloj egalis mian psikan vundon. Eble ili imagis, ke la juĝistoj misjuĝis aŭ ke mi mem kapablas dresi la vundon, kaj plutenis al mi la antaŭan estimon; sed estis ĉe mi, ke ilia estimo pri mi estis juĝata jam stompita, pliklare jam laŭjuste modifiĝanta. Ek de tiam miaj agoj komencis manki je spontaneco kaj memfido kvazaŭ nun jam neeblus forskui el mi la trasenton de malpufiĝanta estimo pri mi ĉe ilia ekruziĝanta juĝo. La inklino al deprimiĝo trovis komplicon en mia konscienco flustranta, ke finfine ili pravus se vere ili ekdubus pri mia morala kohereco. Ekzakte sur tiun juĝon kroĉiĝis mia grumbla protesto ĉar mi ankoraŭ al la religiula vivo ne eldiris la definitivan neon.

Dume kiel lama anaso mi restis ekstere de la konversacioj de miaj kunuloj

jam elĵetiĝantaj alien. Vere ankaŭ fratulo Saturnino, mia samaĝulo, ricevis la saman malfavoran voĉdonadon pri sia taŭgeco, de mi iam tute liafavore vetita, al la religiula vivo, sed li montris ne suferi pli ol ordinare konsentite pro tia negativa juĝo pri si mem. Post kelkaj tagoj li spritgestis salutojn mansvingante el fenestro al ni trakorte distre rondirantaj kaj forlasis kaj studentejon kaj vokitecon kun vokiĝemo. La majstro diros poste, ke fratulo Saturnino sentragike akceptis la inviton elekti alian starejon en la mondo. Mi perdis amikon je plaĉa babilado pri la tuta mondo kaj pli precipe pri filozofio kaj teologio, kiu en diskutadoj, veraj aŭ *akademiaj*, fidele lobiadis por mia partio, foje "elprove blankigante" miajn ŝajne tronovigajn opiniojn, kaj neniam regresis el la streĉo plifajnigi mian aŭ sian penson. Prie, tamen, li ne plu memoros aŭ tute tion senvalorigos kiam mi lin revidos ses jarojn poste; tiam li estos jam doktoriĝinta ĉe la padova universitato kaj, malkiel ol li, mi baraktos jam definitive implikiĝinta inter la spiraloj de vivvojo ne tute response elektita. Ne suspektante mian ŝanceliĝadon, li rakontis, ke mem daŭre sin kredis vokita al la sacerdoteca estado ĝis preskaŭ sia eksiĝo, kiam liaj spiritgvidanto kaj la klerikmajstro konvinkis lin rezigni. "*La motivoj restas ne jam malkovritaj*", li suplementis kun vola senpripenso kvazaŭ por sufoki mian ekscivolemon.

Informiĝinte pri li, cele helppeti dum miaj unuaj sekularigitaj paŝoj en la mondo, mi scios, ke li jam profesoras habilititan doktoron de historio ĉe universitato kie jam magistriĝis pri historiaj sciencoj. Ne povi helpopeti al sensskrape taksita amiko, pro ties indiferento, kreskigos mian dubemon rilate nian konstantecon en amikiĝsentoj, kiujn mi iam kredis sinceraj malgraŭ mia konstanta enviemo kaj malĝojo pro lia sukcesoj. Mia kaŝa superegoo reflektiĝis nun ankaŭ el lia sinteno: pro tio mi lasos ke li perdiĝu el mia vido.

Dume miaj kunuloj votpromesontoj ensorbiĝis en la preparojn, kaj retiriĝis en spiritajn fonojn, el kiuj min mi sentis ekskludata. Ili enkadriĝis ĉe mi entuziasmaj, senartifikemaj, senkompleksaj, korriĉaj, tute sindonitaj al Dio, kvankam malpli persistemaj en la kribrado de problemoj aŭ enproblemiĝo en eventualaĵoj, kaj malpli inklinaj al filozofiado ol mi.

Mi pri mia sorto pritraktis en konfidenca konversacio kun la disciplinomajstro kiu ne timis senrezerve informi: *"Iuj responsuloj, se verdire, ankoraŭ ne vidas en vi unusencajn signojn de taŭgeco al la franciskana vivo: vi havas el unu flanko ion tre rigida, el alia ion tre mola; io grincetas en via agoj taŭgiĝantaj al via intenco resti kun ni... Pasos tiu momento, kaj per tiuj provo kaj humiliĝo ni vidos pli klare en vi. Por savi la propran vokiĝon, se veran vokiĝon, neniam prokrasto estas humiliĝo. Prefere provu pliscii kio altiras vin al*

*servado en la eklezio. Kaj lasu, ke ni helpu al vi la sinkomprenadon".*

Mi min detenis el montrado de miaj hezitoj ĉar entute pri tio estas ankoraŭ tempo. Kiom da tempo? *"Eble ses monatojn, eble unu jaron. Finfine tio nenion ŝanĝas ĉar vi dume elpaŝas tra la studkursoj kun la aliaj".* Lia senkaŝa opinio pri mi min certigis, ke li inter la voĉdonanta konsilantaro subtenis mian definitivan forigon, kiun nun prudente apenaŭ vualas

Mi min detenis ankaŭ pro la motivo, ke en tiuj tagoj mi decidis deziri la vokiĝon kaj ĝin peti de Dio kaj de Sankta Francisko.

Sed tra tia deziro mia animo ruliĝis tute sola. Mi ne pridubis mian sincerecon en ĉi peto, sed pro kio tiu silento kun konsilantoj? Certe pro tio ke helpopeti egalvalorus malfermi mian animon kaj krei novajn interhomajn problemojn. La deziro, cetere, pri la religia vokiĝo orbitas ĉirkaŭ signo de vokiĝo, kiel oni intuicias. Sed deziro kun perioda ŝanceliĝo, kiel en mi, alarmus la responsulojn kaj malkonverĝigus la probabligajn faktorojn de vokiĝo. Mi tamen memoris la kliŝon: *"Bonaĵo kiun elprenis de vi ŝtelisto estas optimuma bonaĵo".* Eksterproverbe, la bonaĵoj, ne multe aprecitaj antaŭe, se minacataj je perdiĝo, fariĝas eĉ pasiigaj kaj vivesencaj. Efektive nun mi min efikigis por ke oni ne forŝiru de mi kion mi antaŭe rigardis disece.

Ĉar de kelke da tempo edukantoj ekkonjektis, ke kontaktoj kun eksterkonventanoj, cele al rafinado kaj pritraktado de religiaj aŭ kulturaj problemoj, povus prudente trovi aprobon se *mastrumataj* sub sincera sinrego, mi sukcesis konvinki, ke mia *mastrumado* estas kontroleble prudenta, kaj ekpasigis vesperajn babiladojn en porrenkontaj lokaloj kun gejunuloj de diversaj asocioj. Tiuj kontaktoj facile randis kulturo aŭ religio kaj fokusis politiko kaj precipe temoj de "koro"aŭ aludoj al "sentimento": kion antaŭvidis kaj timis la edukantoj.

Oportunas priparoli tiajn temojn, eble pro iu nova konstato en mia menso, cetere jam duonevidentigita: babilante, certe pro konvinko, kaj argumentante kiel eble plej favore, kaj efike, pri religiaĵoj, mi observis, ke la disvolviĝo de tiu plaĉa tasko pliigas la forton de miaj religiaj konvinkoj. Statas simile pri la atleto kiu ju pli ekzercadas des pli alproksimiĝas al la bona formo. Tamen, mia emo al memstudado kaj memkritikado lasis en mi spurojn de duboj: ĉu vera pliiĝo de konvinko aŭ bezono sin konvinki por konvinki aliajn? Temas pri ekspluatecaj konvinkiĝoj, kies kaŭzo kaj valoro bezonis daŭran ekzameniĝon.

Ĉi-koncerne, al mi okazadis, periode, vekiĝo de reziduaĵoj de duboj pri Dio mem, tiel enplektitaj: la unuaj studoj pri la harmonio de la universo, en fiziko kaj astronomio, kunhelpis konfirmi mian kredon. Ekzemple, min mirigis pri Dio la konstato ke la transviveblo mem de la homa raso ligiĝas nemaligeble

ĉe akumuliĝo de eventoserioj pravigataj de neniu interna neceso: homo eksaltis en la ekziston kaj daŭrigas vivi malgraŭ ĉirkaŭe de li ĉio aspektas hazarda: la distanco de la tero al la suno (kiu povus esti nek pli granda nek pli malgranda, alie la vivo nek enŝaltus nek rezistus), la teraksa kliniĝo kun siaj rivoluoj (kiu ebligas la sezonalternon kaj pluan loĝeblan spacon de tera areo), la ĉeesto de atmosfero ktp. Ĉu tio, tial, ne postulas ordiganton?

Sed enirante, plibone perdiĝante en la kompleksecon de la astronomio kaj de la fizikaj leĝoj, ĝuste tia komplekseco ekŝajnis al mi troa, nereguleblа eĉ por Dio mem! Nun por la harmonio de la universo ŝajnas sufiĉi la nuraj naturaj fortoj! Ia obstina rezisto, eble kaŭzita de la malfacileco ĉe iuj scienculoj vidi la ĝeneralan celismon en naturo, kontraŭmetis antaŭjuĝajn raci-sciencajn konkludojn rilate la universan harmonion.

Ironie pri mi kelkfoje mi konkludis:ĝis la harmoniigo koncernis etajn(!) aferojn la harmoniiganto estis postulita, nun kiam la fenomenoj malsimpliĝas ĉe la homa menso, Dio ne plu bezonatus!

Kelkiom da peno, instigante mian menson per la principo, ke se kaŭzo estas bezonata en minimumaĵoj, eĉ pli tio estas postulata en maksimumaĵoj, mi elspezis por kvietigi ankaŭ mian animon. Je studa kontakto kun kelkaj filozofoj engaĝiĝintaj kontraŭ la ekzisto de Dio, mi provis repuŝon miksitan kun io da fascino: la ateismemuloj kuraĝaj kaj subtilaj disertaciantoj!

Subtile rongêtis el angulo de la memkonscio ironieca demando: ĉu vi montrus tiun intereson kaj mordemon koncerne la ekziston kaj ĉeeston de Dio, se vi ne renkontus personojn dubemajn aŭ fascinitajn de nekredantoj aŭ profesie envicigantajn por la demonstro, ke Dio ne ekzistas?

Entute: ĉu mia sindoniĝo al Dio vera konkludo de mia racio aŭ nura partopreniĝo en profesia memkontenta tasko? La respondo ne lasis dubojn pri mia konvinko kaj pri la prezentebleco de la motivoj altirantaj al la kredo, sed, fortikigita de persona postulo ke, en la kredo-afero, la volo kredi postvenas la raciajn konkludojn de la racio, mi devis plurfoje retrakuri la argumentajn trairojn pravigantajn kaj postulantajn ke Dio ekzistas.

Alia subtileco ne malpli insida konsistis el tio: sendepende de lia ekzisto, ĉu vin intervenigas, en la defendo de la Dia afero, via porreligia profesio aŭ iu vera amo al li kaj al la homoj laŭ lia ordono?

La prikonsciencaj kaj prianimaj ekzameniĝoj neniam feriis!

La lasta tasko de tiu periodo rilatis al gvidata esplora serĉo pri la plej aspekte kontentiga kaj, do, plej facila inter la antikvaj kaj vivaj religioj. Post longa analizo, la klerikoj estis taskitaj esprimi sian opinion pri la origino kaj

kaŭzo de la ekdisvastiĝo de orientaj religioj kiel hinduismo kaj budhismo kaj naturismo kun iliaj buntaj franĝaĵoj ktp, kaj kiom pravas aŭ malpravas ilia pretendo sin prezenti akordiĝeblaj, intime kaj esence, kun kristanismo. Kiel interpreti tiun socian kaj kulturan fenomenon? Kiujn spiritajn postulojn ili kontentigas aŭ kiuj kulturaj vakuoj per ili saturiĝas?

Jen sinteze la ekaj interpretoj de la studentaro malmultelinee kompendiita:

a) Tiuj religioj punktumas la novan modan memfaremon: ankaŭ religion oni sin rajtigas krei laŭ siaj gusto kaj aspiroj: proprauze eltrovita religio!

b) Kutime oni konfekcias al si religion kontentigantan la supraĵe perceptitajn aspirojn kaj la dezirojn de l' koro. Pro tio, Dio perdas la karakterizon de absoluteco kaj sendependo aŭ transcendo kaj de unika konanto de tio kio kuŝas en la homo. Dio tia pleje adaptiĝas al la homa, plej pufigita ĉe postmodernuloj, aŭtonomiiĝemo.

c) Estas preferata pli Dio konfluiĝejo de beleco kaj harmonio de la naturaj fortoj ol Dio-persono: pli Dio juĝata ol Dio juĝanta!

ĉ) Homoj kutime alproksimiĝas al la religio pere de la koro anstataŭ pere de intelekto. La koraj aspiroj kontentigitaj tiklas eĉ la intelekton kaj inteligenton, kiu tiam sencele riskas distanciĝi el la vero.

*Kristanismo antaŭe respondas al ĉiuj postuloj de la racio, poste alstrebas al Dio kun la tuta koro. La aspiroj de l' koro povas ekstartigi la ekserĉadon pri Dio, sed tuj ili devas flankemetiĝi por ne influi la rigore sendependan itineron de la racio.*

Vero estas apanaĝo de la racio, ne de inundo de deziroj aŭ koraj bezonoj.

Ne kredendas tamen. ke la etoso de intelektaj problemoj absorbis ene de mi mem la tutan partoprenvolon en komunaj aferoj. Komunaj sed foje ŝarĝitaj je eluzitaj antaŭjuĝoj. Jen unu.

Antaŭ kelkaj monatoj eniris, provcele, ordenon liceano de urba klerigejo: li vivis kun ni laŭ preskaŭ ses monatojn tuj post sia diplomitiĝo. Kiam li decidis resti inter la religiularo kaj eniri en la longan ĉenon de studoj kaj novicejo, impete sin ofertiĝis kverelo, momente prokrastita: ĉu konvenas akcepti junulon trafitan korpe, kvankam anime kaj intelekte brilan? Fakte, tiu kandidatiĝanto provizore akceptita nur provcele, okultire lamas je la dekstra kruro dum la samdekstre la mano sin montris mallerta en la movoj kun la fingroj apenaŭ nedistingeblaj unu de la alia. Tiam, dum la unuaj postmilitaj jaroj, bedaŭrinde oni apenaŭ aŭdis pri tekniko aplikata al protezarto.

Laŭ la kanonjuro, pastro devas esti ankaŭ korpe... sendifekta!

La junulo estis invitita loĝi ĉe konvento en sia urbo nur kiel kunlaboranta gasto. Lia sorto ĉe la ordeno foriris el miaj atentoj, restis tamen memoro pri

tuja, preskaŭ instinkta, protesto de la klerikoj fronte al la perspektivo ke junulo estus forigita pro tia kaŭzo: la normon oni taksis antikva kaj diskriminacia kaj iom raseca.

Hodiaŭ, ne sen influo de la malplimultiĝo de pastroj kaj religiuloj, tiaj leĝoj malenŝteliĝis kaj jam ekfariĝas alia kutimo.

### Ĉapitro naŭa
# Luktoj por sin mem damaĝi

Iom post iom mia spirito sereniĝis kaj akceptis la novan situacion. Kontribuis al tio ankaŭ la nova etoso de la unua kurso pri teologio, tute absorbanta en la ĝojigan okupon de studado kaj diskutadoj pri teologiaj temoj antaŭe ne eĉ aŭditaj kvankam ekdisipiĝantaj en la batalo de la baldaŭaj politikaj balotoj, startigita per la ega moto *"komunismo forbalaas religion"*. Jam la *katolika partio*, sub influo de malsukcesoj en lokaj kaj regionaj balotoj kaj pro malkonsento de altprofilaj ekleziuloj, ekfendiĝis kaj baldaŭ preskaŭ malaperis el la politika areno, lasante la civilan ampleksan spacon al la *partio de katolikoj,* en kiu nome prefere asociiĝas katolikoj kaj nekatolikoj kaj alireligianoj, jam organizita kaj plenpove batalema, dum la religiaj aŭtoritatoj ĝin apogas kaj lasas travideti, ke Marksismo jam kondamnita kiel doktrino en la Enciklikoj de papo Pio la XI en *Mit brennender Sorge* kaj *Redemptoris Divini*, nun eĉ ĝiaj kompartiaj adeptoj estos ekskomunikitaj fare de la Romaj Sanktaj Kongregacioj. Efektive tia kondamno okazos, sed post la balotaj rezultoj. Al multaj el ni ŝajnis, ke tiu kondamno devintus esti enkanonigita antaŭ la balotoj, kvankam ĝi, laŭ nia opinio, ne multe efikintus por deteni la nemalgrandan parton de la kristana popolo el la voĉdonemo favora al la komunistoj aŭ al iliaj aliancanoj. Ĉiel ajn, ĝi aplikeblis, memevidente, nur al katolikaj kompartiaj dirigentoj kaj propagandistoj, neniel al nekredantoj komunistoj.

La nova etoso portis min mobiliziĝi en publikaj konkurdueloj kun studentoj de urbaj liceoj. La venko, se uzi tiun bataleman vorton, laŭ onidiroj, estis ĉiam mia, nivele de oratora argumentado kaj en prezenta artifikado de la bildigo pri la promesoj de la kristanaj partiaj idealoj kaj pri la danĝeroj de la perspektivoj de la kompartio-reĝimo, sed mia konvinkigarto kelkfoje ne sukcesis elirigi nemalvastan studentan frakcion el ĝiaj vidanguloj kaj ŝanceliĝo akrigante, eble, ilian ekoponadon, eble pro dialektika eksceso kaj io tro sinmontrema aŭ tribuneska. Mia malatuto, laŭ posta analizo, estis ĝuste verveco kun kultureca parado, kiu foje semis impreson de aroganteco pli konsona al la dekstrulaj partioj ol al demokratio de la frateco.

Kial la itala katolika eklezio batalis politike kontraŭ komunismo? - *Por savogardi siajn ekonomiajn profitfontojn en koterio kun kapitalismo* - aplombe saĝultonis ĉefkomunistoj. *Por defendi la rajton al estiĝo de la religio* - redo-

nis ekleziemuloj. Kaj se ankoraŭ oni bezonus elspertan juĝiston, mi el la lukto-kampo povas atesti, ke preskaŭ nur tiu lasta celo movis krede kaj politike katolikojn.

Kun klerikoj kaj junaj laikuloj mi pasigadis noktojn muralgluante afiŝojn. La rezultojn oni vidis, semajnojn pliposte (la 18an de aprilo 1948), en la urnaj respondoj: tute favoraj al la partio de katolikoj; sed ankaŭ en mi atentaj okuloj povintus enrigardi flankajn efikojn: iun specon de malfortiĝo de miaj internaj tensioj, de miaj ekzistencialaj problemoj. Paralele, fakte, burĝonis, ke la lukto ĉirkaŭe de mi kovris aŭ modifis la luktojn ene de mi mem. Tiel ke okazoj de intensiĝoj en politikaj kaj humanitaraj kontaktoj subtile fariĝis spontanaj, sed konscie nekontraŭataj, devojiĝoj de miaj internaj konfliktoj.

Intertempe religiuloj ekspertaj pri juna animo min senvuale admonis, ke mi ne lasu kredi, eĉ senintence, ke la eklezio pretiĝas engaĝiĝi en praktikaj ekonomiaj planoj aŭ en la rekta estreco de politiko, kaj samtempe ke mi plivivigu, ene de mi, la religiajn antaŭenpelilojn por ne finiĝi en *ĉarlatanan reklamon*. Neniu, eble, suspektis, ke tia mia febra kirliĝo estis ankaŭ ŝirmo kontraŭ miaj dukapaj reciproke ekskludaj vokiĝoj.

Tiuj ĉi tamen latentadis en mi plektitaj kun la suspekto, ke la edukantaj juĝoj pri mia taŭgeco al la religiula vivo ankoraŭ restas en la duboj. Mi, certe, jam fariĝis problemo ĉe kelka el la plej proksimaj observantoj. Miaj pensoj, post la ebriiĝo pro la balota venko, ekvagadis sencelaj kaj dum la enĥorejaj brevieraj preĝoj kelkafoje mi preĝvoĉadis eksterunisone, voĉante en paŭzoj kaj paŭzante dum deklamado aŭ neatendite trotrenante voĉon dumkante: tio, krom revoki min al la estanteco, montradis al ĉiuj, ke mi estas mense aliloke *"ensorbata kaj aliportata de figuroj skulptitaj en la ĥorejaj frontaj lignoj emanantaj la historion de la jarcentoj",* ŝerce rekantis kunuloj, sen tamen aliĝi, rilate tiujn eksterĥoraĵojn kaj unisono-rompaĵojn, al la superulaj juĝoj, malpli foraj el la situacio. Preskaŭ senpripense, preskaŭ liberiĝe mi nuligis jen la riskojn de voĉrompiĝoj jen la timon de sekvaj superulaj malfavoraj juĝoj, movante senvoĉajn lipojn, do reakirante mian malnovan arton de la kolegiaj tempoj. Kaj mi trovis ankaŭ momentojn de nemalironia miro pri simpatia manko, en miaj kunuloj, de miro antaŭ tiuj miaj voĉaj misakordoj.

Konkretiĝis ankaŭ aliaĵoj, kiujn mi volus mencii. Mia amiko, kun kiu mi malprudente treniĝintis al fuĝo tra Karnio, glite kaj glate koheriĝis kun sia idealo por sin ligi definitive per solenaj votoj al la ordeno kaj procedis regulare laŭ la studotereno. La profunda amikeco, kvankam longe senvorta, suferigis lin okaze de mia ŝajnmaljuste altrudita prokrasto de votpromeso. Kelkajn mo-

natojn post, iun tagon mi vidis lin senmova sur portebla liteto kaj impresanta per ŝaŭmaĵoj el la buŝo kaj la okuloj fiksitaj je io ne videble fora: evidentis, ke la suspektata epilepsio kun signoj pri mensa perturbo tiun fojon manifestiĝis imprese, pro kio la superuloj taksis plejprudente lin enhospitaligi en aparta malsanulejo. El kiu li revenis post kelkaj semajnoj; sed de tiam li ne plu kondukis firme: lia psika ekvilibro ŝanceliĝis malgraŭ kuraciloj kaj multespecaj prizorgoj. Lia pormomenta kaj ne komplete de li konsciiĝinta, por tion diri, konduto ekmanifestis trajtojn de obstina sinceleco. Kaj li restis ĉiam tia, duone memsufiĉa kaj duone asistbezona. Kaj mi, malplaĉe kvankam kun la klariĝanta sento de tiu kiu fine trovis eksplikon, devis taksi homo deliranta, do senkulpa, kiun mi iam taksis homo obstina kaj kulpa.

Ankaŭ tiujare, lernojaro finiĝis per *akademio* (eseetoj intermetitaj per beletraj recitaĵoj), kvankam prokrastita ĝis septembro, kies temo ĉifoje devis esti rigore priteologia. Gravuloj de la klerikaro enplektis mian nomon kiel preleganton aŭ referanton de la deviga temo. Eble ili tiel lanĉis por provi min fordeteni de la nigraj pensoj enŝtelitaj de la plua prokrasto de allasa votligo, aŭ eble pro mia jam montrata inklino al psikologiaj memesploroj, ĉar la temo estas ĝuste el tiuj kiuj kunpelas trasulki la meandrojn de la homa psiko: *la religiaj kaj psikaj facetoj de la kristana pento.* Je konfirmo de ilia intenco, kaj kontraŭstare al miaj pendoladoj inter jes kaj ne, el iu ŝerce eskapis: “Tio helpas vin *elmemiĝi*...”. Vere tio malhelpis, ke mi plireglitu al pesimismaj bildigoj pri mi.

Ĉu pro manko de pripenso ĉu pro manko de informoj pri la temo, mi akceptis je la kondiĉo tamen, ke mi povu kombini, kiel reĝisoro de sepmembra skipo, la objĵetojn kaj la objĵetantojn kiuj laŭkutime enscenigôs por eksciti la intereson de la publiko. Oni konsentis kaj koncedis al mi du monatojn por priserĉi, esplori, legi, interkonsultiĝi kun profesoroj. Iomete mensleĝere, mi, kiu foris centmilo da miloj el la versaĵoj, kiuj, pli ŝerce ol flatece kombinitaj de kunuloj zorgantaj pri akademiaj pretigoj, refrenas *“la aŭroraj radioj lin trovas inter la folioj kvatataj de okuloj sopirantaj al la sunlumo de ĉioscio*” (aludante al miaj fieriĝantaj frumatenaj ellitiĝoj por nazumi inter libroj en la biblioteko), lasis, ke tiuj ĉi vortoj vere fine leviĝu super miajn hezitojn, trans la timataj superulaj juĝoj, kaj vere bildigu mian konduton.

Tro malfrue mi komprenis, ke la akceptado de tiu ĉi tasko ekmetis min en penaĉan ĉefrolon kaj devigis ke mi laboru aferkerne. Kaj, malgraŭ tio, pro ne komprenebla bezono komplezi, finfine mi surprenis ankaŭ la taskon de alia kunlabora kunulo, rezigninta montriĝi sursceneje.

En septembro de 1949 mi eldiris mian enprogramitan prelegon, jam legitan sed ne tute aprobitan de la profesora paro. Estis permesite uzi la italan lingvon pro tio, ke *"jam ni devas ekuzi teĥnikan aŭ kompreneblan lingvaĵon ankaŭ en la itala lingvo ĉar igas pena kaj senefika pensi kaj akademii latine kaj paroli alilingve"*. La latinan jam oni uzis nur pri religiaj teknikaĵoj aŭ en transigo de la taŭga senco de la dogmoj.

Jen mia kvarŝtupa tezaro, netimide proklamita en la scivolema prelegejo, kaj kerne konservita.

La kristana pento estas

*a) nek sento de kulpo aŭ malagrabliĝo devenanta el konscio transgresinti la grupajn leĝojn al kiu la pentinto apartenas kaj suferas pro la rompo nun riparenda. Tio ĉi pli similas instigan tabuon ol moralan memkondamnon, similas pli honton pro la malbela impreso pri si travidigita ĉe la simiuloj, aŭ pli timon pro la dia venĝo ol la memkondamnon pro la vundo al la konfesita moralo;*

*b) nek sento de bedaŭro, per kiu oni taksas la pasintajn pekajn agojn nur kiel erarajn kaj damaĝajn agojn. Tia sento estas senefika kaj do senutila krom devia, kaj deturnas la atenton el la vera kvalito de la ago plenumita;*

*c) nek sento de rimorso. Tiu ĉi turnigas la atenton al la pasinto lasante en la animo konscion de neelaĉetebliĝo el la kulpo. Se konscio pri kulpo kuniĝas al sento de neelaĉetebliĝo el kulpo, la rezulto estas manko de espero en la pardonanta mizerikordo: la orgojlo ne pardoni sin mem kvazaŭ estus pli noble, pli grandioze, pli elstare sin turmenti ol zorgi por ripari la kulpon kaj havi la pardonon de la ofenditulo;*

*ĉ) je kio esencas la kristana pento? Ĝi estas bedaŭro pro ofendo farita al Dio, malplezuro pro kulpa rompo de la amikeco kun Dio; ĝi koincidas ne eĉ kun la rompo de la morala normo ĉar la konscienco direktiĝas trans la moralа normo, sed kun la malobeo aŭ malrespekto al Dio. Paradigma pri la tuta afero rezultas el la evangelia Luka parabolo pri la Erarinta Filo.*

Mi provis devenigi miajn tezojn el versegoj Skribaj aŭ el patristikaj aŭ mistikulaj citaĵoj: ankaŭ por eviti, ke oni juĝu la tuton tro skema aŭ aferece senfundamenta. Krome, inspiriĝinte al pripentaj kaj pentofaraj kriterioj de la Sankta Jaro ĵus proklamita de Pio la XII, mi ekzemplis konkludan legon de mia, iom cerebra verŝajne, kvazaŭnovelo temanta pri la spirita disvolviĝo kaj maturiĝo, inter la sortimento de similaĵoj, de la pentaj sentoj en la klasika pekulo Donĵuano, eklaŭiranta modernajn vojojn de konvertiĝo, dum imagita lia pilgrimado al Jubileaj Lokoj. Jen:

**La lasta aventuro de Donĵuano**

*El bedaŭro, el rimorso, el sento de kulpo kaj el similaĵoj, al la kristana pento*

"Spertinte ĉiujn plezurojn el la vivo kaj orgojle suĉinte ĉiujn aplaŭdojn de la publika opinio, same kiel tiun konsideriĝi la ĉampiono kaj simbolo de la libera, pli precize liberecana, penso, nun antaŭ la nenio en kiun estas lin forpelanta la morto-proksimiĝo, Donĵuano repripensas la aferon kaj forveturas al la Jubileaj Lokoj de la milnaŭcenkvindekjaro. Kaj provas malfermi al Dio kaj manifesti al la homoj sian koron ensorbitan en la morala sinpuriĝo; kaj miras, ke li longatempe povis sin pensi senbezona je pento kaj pardoniĝo.

"Trajno, aviadilo, taksio kaj multege da pensoj. Herolde pensoj. Li perceptas, ke li mem nun sopiras al la iama kredo por ke Dio pluekzistu kaj, ke estu vere, ke li mem estas amata de Li. Aferoj tro belaj kaj iam tro tretitaj de li. Tia deziro, kompreneble, kuntrenas siajn sekvojn, same kiel iun eknaŭzon pri propra pasinta vivkonduto, tiom ŝatata sed senfrukta kaj senvalora, kaj bedaŭron ne povi plimultigi la malgrandajn okaze plenumitajn moralagadojn iam taksitajn subnivelaj. Tamen unu fojon pluan li provas pravigi sian iaman konduton per ekskuzoj kulpigante eksterajn cirkonstancojn: *Se ne estintus tiel, se estintus tiel ĉi, se eventoj ne komplotintus...* Sed li eksuspektas, ke tio ne solvas la problemon de bezono de konscienca repaciĝo kun Dio kaj ne kontentigas liajn novajn psikajn kaj spiritajn bezonojn kaj perdigas tempon. Tempo ne revenas per bedaŭriĝo aŭ malbedaŭriĝo!

"Forlasinte tiun senkulpigan vojon, li nun preferas enprofundiĝi en naŭzon pro sia pasinto bedaŭrinde fama, aspekte, kaj laŭdata kaj fetiĉigata kaj imitata ĉe homarparto. La kolero invadas lin kaj samokaze ia reteniĝemo perceptata kiel neeblo esti akceptata ĉe Dio: kaj se ne eblas, kvazaŭ suĉite en definitivan forĵetindecon, akceptiĝi ĉe Dio, konvenas pluiri laŭ la naŭza pasinto. Sed li samtempe ekkonscias, ke tiu rimorssento similas al provo sufokiĝi en la kulpo, al konscio de neriparebleco de la kulpo kvazaŭ el ĝi ne estus elaĉeto: tial li intuicias, ke per tiu sento li ne akordiĝas kun Dio, kiu estas apenaŭ ekster li kaj jam atendanta eniri en lin.

"Superinte bonŝance tiun mornan naŭzon kaj spiton pri si, Donĵuano sin lasas okupi de nova sento, sento de kulpo, ia speca psikofizika ĝeno originanta el konscienco esti transgresinta la normojn de la saviga grupo, al kiu li devintus senti sin ligita. Kia la rolo de Dio en tiu sento de kulpo? Ĉu ĝi vere atingigas la kristanan penton? Kvankam tenajle kaptita de tiu tabuo en kiu ne aperas la dia vizaĝo, lin flugtuŝas diverssplita pentosento kojnanta kaj superanta kaj malaperiganta ĉiujn aliajn sentojn, li konsciiĝas ke mem estas baraktiganta Dion

mem kvazaŭ tiu ĉi estus la normo aŭ la socio ofendita kaj kondamnanta; kaj li samtempe ĝojas ke mem ekkomprenas ke ankaŭ tio ne estas kristana pento. Fakte li estas eniranta en la alian plikorektan vojon de la kristana pento, kie la dia vizaĝo estas ame atendanta.

"Se en ĉiuj antaŭaj animstatoj Dio ŝvebis fore, preskaŭ seneĥa, preskaŭ sen patrecaj trajtoj, nun fulme prezentiĝas ĝuste tiu vizaĝo, ĝuste kiel li jam eksentis. Pentosento, fakte, estas alia afero, pli simpla, pli liberiga, pli mildiga, pli proksima al Dio, kaj fora el la egoismo de aliaj sentoj de rimorso aŭ de kulpo aŭ de naŭzo pri si. Nun li vere sin allasas al kontricio kaj el lia intimo eksplodas: "Deŝiriĝu ĉiu vanto kaj foriĝu la nekristanaj senfruktaj bedaŭro, rimorso, kulposento: foriĝu kaj lasu lokon al la kristana pento. Mi kontricias kaj falgenuiĝas por rekompenci Dion kaj proksimulojn kaj siblas: "*Patro, pardonu al mi, mi faris antaŭ vi tion kio ne decas, kaj ne indas stari ĉe vi...".*

Pento do: bedaŭro pro ofendo al la Patro kun deziro esti pardonata por reakiri la filan konfidencon kun Li".

El tiu noveleto devus elstari la diversaj maskadoj aŭ trompaj similaĵoj al la kristana pekosento; sed el la publiko venis peto, ke mi pli ekspliku ĉar tio ne senpere klaras kaj la konturo de la problemo perdiĝas laŭvoje. Kion mi faris distingigante la diversajn animstatojn pere de respondoj al akorde preparitaj demandoj de miaj kunlaborantaj kunuloj. La komuna multbranĉeco de la koncepto "pento" fine iel lasis grundiĝi la unikeco de la kristana pento, kiu facile konfuziĝas, ne ĉiam malruze, kun kulposento kuracebla per rezonado aŭ page sur la sofo de psikologo, dum la pekosento rilatas rekte kaj ekskluzive al Dio, kvankam foje ambaŭ kunvivas.

La prelegon verkovoste markis la studdojeno erudite resumante kaj rekonvorte distingigante la diversajn falsajn, pro nekristanaj motivoj, pentojn, kaj aldonante iom misterece: *"Klasikaj distingoj inter kiuj iam necesis maljuniĝi por saĝiĝi, nun tiun saĝon oni heredas el la kromozonoj!".* Kaj fini paroladon per: "Ankaŭ por studdojeno estas "Non sine labore carmina" (*Ne sen peno la poemkantoj* el Catullo)

Ĉu laŭdo, ĉu aludo al mia pretenda, kaj iom snobisma, novemo? Ĉu oblikva maniero por ne ellasi takson rilate la prelegon kaj respondaron? Mi decidis analizi pli poste ĉu tiuj vortoj havas kaj kian sencon. Ĉiukaze la ĉeestantaro aplaŭdis longe kaj ne malmultaj profesoroj konsentis kun mi; kaj *famo* pri tiu *ĉioscianteto* ekeĥiĝos tra la konventoj, sed kiam tio ne povos min plu ĝojigi. Kaj ŝerccele iuj, tuj post la prelego, min epitetis "la nova Donĵuano".

Ne multajn horojn poste, la laŭdo subenglitis kaj estis de mi forgesita kaj nuligita ne pro la subtila akuzo de aplombeco, sed pro novaj drameroj ekfalantaj sur min. La klerikanmajstro, je la samvespera deknaŭa ĉirkaŭ, min kunvokas kaj delikate, laŭkaritate, laŭfratulece, preskaŭ balbutante klopodas komuniki, ke la juĝo de la responsuloj kontraŭas mian ĵusan manifestitan deziron, tio estas daŭrigi kaj spirite perfektiĝi en la franciskana vivo. Ili tion decidis kun bedaŭro kaj por mia persona feliĉo krom por la kvieto de la fratularo.

*"Tial,* li konkludis*, via vivo trovu alian taskon en la sekulara mondo: Dio nin alvokas el diferencaj vojoj al diferencaj taskoj... Vi montriĝas inteligenta kaj entreprenema, pozitivaj ecoj per kiuj vi fruktos al vi kaj al homoj... Ni restu ĉiam spirite kunigitaj... Leteru de tempo al tempo".*

Mi aŭskultis sen sukcesi orientigi la blokon de miaj pensoj, preskaŭ subjugita de tiu dolĉa/dolĉiganta parolo plenŝutita je karitata embarasiga ĝeno. Lia ĝeniĝo ekfariĝis ĉe mi inertiĝo, ŝoko, deziro neekzisti: kaj, page al tiu ne evitebla torturo, la majstro decide anoncis, ke mi morgaŭ matene foriru el la klerikejo kaj rikoltinte ĉion mian ekvartu, laŭ la nova vivperspektivo, zorgojn kaj aferojn en la konvento de Sankta Francisko de l' Dezerto, en la plej interna insulo de la venecia laguno, kiu funkciis kiel solecega retiriĝejo. Estis la deknaŭa kaj duono nokte: tio signalas, ke mi ne povas plu kontaktiĝi kun miaj kunuloj, priparoli pri mia kazo aŭ sorto kun iu ajn. Ĉe matena vekiĝa sonoro oni notos, ke mia ĥorseĝo kaj tiu ĉe manĝotablo vakas, oni pridemandos dum la superuloj trakurigas la novaĵon, ke frato Alfredo elektis reveni al la mondo: li elektis fulme, fulme senadiaŭe forveturis, fulme dehakis ĉiujn longedaŭrajn homecajn ligojn; kaj tiuj sentoj de miro kaj defraŭdo, multfoje suferitaj inter kunuloj rilate okazajn *malaperintojn*, nun koncernos ĝuste min.

Elirante el tiu fatala superula pordo min renkontis fratulo, mezaĝa kaj kutime deteniĝema, kiu en la koridora duonombro susuras: "Mi profitas por vin komplimenti pro la distingoj, kun alarmo kontraŭ eblaj psiktrompiĝoj, inter kamuflitaj similaĵoj de la kristana pento. Kvankam iom parademaj viaj distingoj min pensigis. Mi ne vin flatas, mi konvinkitas pri braveco en via estonta oportuna religia agado". Perdita en la akademiaj pensoj, li certe nur morgaŭ estos kompreninta kial el miaj lipoj venis senvorta rideto estingiĝanta dum miaj piedoj moviĝis aŭtome kaj nervoze.

Desur la bretoj mi elprenis senzorge iujn personaĵojn kaj la taglibron je fuŝitaj folioj, kaj atendis sendorman nokton. Sendorma vere, sed sensufera eble pro narkotsimilaj kaosaj enviciĝo kaj furioza sinsekvo de perspektivoj forruliĝantaj en mia stuporita menso sen, tamen, kritike delasi la apartaĵojn de la

problemo.

Mi ne aŭdis tiun matenon de oktobro 1949 la senkompateman sonorilan tintadon ĉar ekzakte tiun momenton mi aspekte sencele jam marŝadis, portante laŭokazan valizeton kun miaj personaj posedaĵoj, akompanata de la frato ekonomo kiu aĉetis fervojbileton por mi, donis poŝmonon laŭinstrue, sed aldonante ion da tio meminiciate, el la kajo, alidirekte la okulojn, min ĝise mangestis kaj sin dehakis el la ĝeniĝoj de malamata farendaĵo, kaŝitaj sub troigita elkoreco. La trajno moviĝis dum mi en la koridoro gapadis en la vakuo senresponde al la respektaj kaj riverencaj salutoj al la religia vesto plu kovranta mian korpon.

Mi sidiĝis apud interbabilantaj personoj al kiuj mi allasis silenton ŝirmatan per pensoj sendirektaj, konturante eksteren eble nur duran mienon en sinteno tro rigida por simili al tiu de fratulo preĝanta; mia froko ŝajnis al mi dummomente io nenatura, dummomente altvalora rebrilo, ĝi fantazie kaj dezire saltetadis el miaj ŝultroj al la surplanka tretado kaj inverse. Min liberigis el tiaj imagaĵoj kaj raciumaĵoj la haladza fumo de cigarstumpo (tiam, en trajnoj, ankoraŭ ne estis malpermesite fumi) kiun min samkupeane fruntanta dika sinjoro, de mi apenaŭ rigardata el okulangulo, senpudore pasadis el la lipoj al la fingroj kaj inverse dum de tempo al tempo transigadis siajn krurojn sur la spacojn de la miaj, min fine devigante, kaj tial samtempe min forigante el la okuloj de apuduloj kaj el ties babilado pri tro ŝablonaj negravaĵoj, eliri al la koridoron, de kie bonŝance trafenestre travideblis laŭstrate la seninteresvekaj palaj figuroj, arbaj kaj homaj. Ho, ke la trajno paŭziĝu kaj lasu al mi la tempon por kompreni kaj decidi! Ŝajnas, ke ĝuste la trajnrapido malebligas solvan koncentriĝon!

Kiam la trajno haltis en la venecia stacidomo, sub brila suno flirtanta el duonvitraj fenestroj de la surkajaj altaj tegmentoj, kelkiu informis siajn kunveturantojn, ke jam sonoras la dekunua. Je defio al ĉio, aŭ eble por momente min distri el angoro, surakviĝis el miaj sensacoj, dum haltis la laguna vaporŝipo, ke la sunlumo estas bela kaj bele faltiganta kaj senfaltiganta la akvojn sur kies krispigaj ondoj, sian formon briligante, speguliĝas la bordaj palacoj. Plueninte, la vaporŝipo flagigis novajn vidaĵajn allogaĵojn aperantajn post kanalanguloj kaj trans pontoj kaj pontetoj dum daŭris tiu impreso de beleco kaj de plenpulma ŝaŭmado, eĉ ĝi obliĝis laŭ la kanaloj trafluantaj la Venecian koron, nome la kruckanalo inter Canal Grande (Granda Kanalo) kaj Baseno de Sankta Marko kaj antaŭ la fasado de la baziliko de Sankta Marko kun la transkanala frontranda Sankta Ĝiorĝio Majora: ĉio tio min elmemigis kaj tenis en, se

tiel diri, lulanta vibro, kiun mi provis plu daŭrigi kiel plej eble, ĝis forgesigi al mi miajn afliktigajn kondiĉojn, ĝis min momente komike kredigi, ke funde valoris la penon elteni tiujn miajn animdisiĝojn se la kompensaĵo vidigas kaj gustumigas tiajn mirindaĵojn, spite ke, delikate kaj averte, io el interno ronĝetis tiujn sentojn kiel preskaŭcinikan pufaĵon.

Aliajn fojojn mi iam vizitis Venecion, sed nur nun mi, mirfrapita, plonĝas en ekstazon gapante ĉie kvazaŭ, ho ve, tio estus la vera vivo en kiu ne penseblas malperfektaĵo kaj deformaĵo. Ĉu vera kontemplado aŭ ĉu nekonscia sagaca aranĝo por eliri el mi mem? Tio estos dubo de la postaj memanalizoj, nun trapasate de nova lulanta vibrado mi forgesis, laŭ longaj momentoj, la afliktiĝon pretan ekŝoveliĝi el la psikmeandroj.

Kiam mi vekiĝis el tiu allogiĝo kaj plaĉa enpremiĝo inter la bunta laguna ondomodluranta ŝipanaro, la vaporŝipo jam navigis en la direkto de Burano. Dum elŝipiĝo, el kelka flanko al miaj oreloj alvenis informo, ke jam el preĝejturo estas batanta tagmezo, ĉar mi tion ne aŭdis estante gape admiranta. Kion signifas tiu malatento al la ĉirkaŭaj okazaĵoj? ke la plejmalbelo jam ekrevenas al la animo aŭ ke, bonŝance, la sensensiĝo plu daŭras? Nepovante forigi la demandon, ĝi flosetis duonkaŝite en mia animo allasante la timon ke ekrepululas la konscio pri mia vera stato. Elstariĝas tamen la mirdeziro.

Elire el vaporŝipo en Burano, jen mi piedmovas tra placeto: kvar striktaj vojoj kun domoj kaŭriĝantaj unu sur la aliajn, monumenta preĝejo, kampanilo maldika kaj alta kaj iom pendanta (tia al mi ĝi momente aperis), ĉehejmaj vendejoj de splendaj puntoj kaj broditaj vestoj, turistoj en admiraj ekkrioj. Trans malfermitaj fenestroj, puntistinoj kun fadenoj, kudriloj kaj ŝpinitiloj. Jen la fama Burano de “Merletti”, nome Burano de Puntoj! Stablistoj alvokas komunan atenton montrante siajn manlaboraĵojn aŭ kioskanoj ofertante broŝurojn pri lokaj historio kaj monumentoj. La mia atento, tamen, senindulge, konsciiĝinte denove pri reala situacio, nun ekforigas historion kaj poezion, kaj mi petas informojn preskaŭ sen rigardi la petaton:

*“Kie la enŝipiĝejo al la insuleto Sankta Francisko de l’ Dezer*to?”.

“Ducent metrojn antaŭen. Vi povas ankaŭ profiti de vaporŝipo kiu tamen plenumas tiun servon nur du fojojn semajne; sed, post telefona voko, la konventa deĵoranto remas ŝipeton ĝis tie ĉi por enboatigi la urĝiĝantojn. Unuhora remado sur senkrispa maro”. Ĝentilaj informantoj eble rimarkas miajn malspontanajn senvortajn dankagnoskajn gestojn.

Por min liberigi el la traangora stuporo, alproksimiĝinte al gazetbudo, mi senparole indikas libron pri veneciaj turismaĵoj. Eble la lasta iluziiĝo, ke mi

kondutas ordinara turisto nemalkiel multaj bruvoĉantaj je ĝojo inter laŭte reklamantoj de siaj varoj. La suvenirvendisto enkasigas la monon: la libro kostas tro por mia poŝo, sed mi trovas nur forton por reagi kun rezigno, kaj aĉetas kaj ĝin ektrafoliumas afektante scivolemon, eble nur por forigi aliulajn rigardojn el mia persono, kiun, male, eble neniu rimarkas.

Nervfranĝita de furiozaj emocioj kaj laciga inertigado de miaj pensoj, mi decidis manĝi ion por ke la malsato ne pligravigu mian laŭtiĝantan deiĝon el la realo kaj eniĝon pli tristan transrealon. Sidiĝanta sub rapidmanĝeja ombrelego, mi ne ĉesis rigardi ĉirkaŭe kvazaŭ tiuj ĉi estus la lastaj momentoj de mortkondamnito deziranta, malgraŭ urĝigita de viciĝantaj klientoj, ke la agoj malhaste sin sekvu kaj samtempe ke la tempo atingu la finon. Ĉe la finmanĝo, el la duonmemserva restoracio mi telefonis al konvento ricevante respondon, ke mi atendu almenaŭ unu horon. Paginte la konton, mi amuzafekte mokante min mem konstatis, ke en mia poŝo revenis la franciskana malriĉeco ĉar mia mono estas finiĝanta.

Ekmarŝante senzorge kaj flankelasante tipajn dometojn sur buntaj muroj kaj falantaj kalkaĵoj, kaj ĝardenetojn, mi paŝas tra la insuleto ĝisatingi la aliflankan marbordon, kie kvar palisetoj, elĉerpitaj de la akvomovoj kaj oblikvigitaj de la insistaj fluktuoj svenantaj sur strandsablo, signas la punkton kien la konventanoj de la Insulo Dezerto albordiĝas preskaŭ ĉiutage laŭ siaj bezonaj kontaktoj kun la ekstera mondo, kiujn ili emas maldensigi ĝis, se eblus, malaperiĝo. Preskaŭ meĥanike alflosas, pli por min deturni el obtuzeco ol por konsciiĝi, el mia eno demando scie sed ne tutkonscie jam respondita: *kial mi al Insulo Dezerto?*

Ja, kial al Dezerto? Kaj jen ekmoviĝas en mia memoro la tuta vero kaj la tuta fabelado pri tiu insulo: la kleriko eksklerikiĝonta aŭ eksklerikigota estas invitita, konvinkita, devigita, pelita translokiĝi en tiun insulan ermitejon el kiu la ajnloka komunikado maleblas kaj ankaŭ fuĝo restas nur fantazio; ĉiuspeca alvoko al eksterkonventuloj, kiel helppeta reago, senbrue rompiĝus sur malaltaj ondoj tajdantaj dolĉe sed senkompate. Oni atendas, en rezoluta silento, en la fama silento de ermitejo en kiu ĉiu kunfratulo remaĉas siajn pensojn nur kun Dio, la konsumiĝon de la burokrataj tempoj kaj tiuj de la tajloro aŭ vestovendisto.

Kaj en tiu soleco, ne plu amata, eĉ malamata, prizonulo triste impresigas sian menson je la lastaj memoroj de religiula kandidatiĝo. Iu frato reakompanos la revenigoton al la civila mondo ĝis Burano kun malmultaj adiaŭoj. Kaj en la malbonŝanculo restas nur frakasita inerta frenezumo de sentoj kaj pensoj. Ĉu sento de perdiĝo aŭ sento de malŝarĝiĝo? Aŭ ĉu liberiĝo post tro da

perdoj? Kaj kiel min sentos en tiuj momentoj?

Sed mi estas ankoraŭ iranta, ne irinta al Dezerto. Iom malproksimiĝinte el marbordo, mi irrevene promenas kaj fine sidiĝas sur eta terelsteraĵo kaj tuj leviĝas kvazaŭ inertigita de nekontrolitaj, tial misregataj, pensoj malorde surmetiĝantaj kiel ondoj puŝitaj de nebremseblaj fortoj, mi denove atingas la marbordon laŭ alia vojeto larĝa dupersone. La marondetoj, plaŭdas preskaŭ senrumoraj kaj apenaŭ irreire moviĝantaj, tuŝas la blankajn ŝtonetojn kaj konkopecetojn de la malmulta sablo; malantaŭe de miaj ŝultroj, malmultaj arboj kun maloftaj preskaŭ senfoliaj branĉoj rektalinie torditaj, kaj diafanaj kvazaŭ ili timus ekzisti; iliaj trunkoj en la brila suna lumo sugestiis pasivan atendon. La senmoveco de la aĵoj igas ankoraŭ pli sencele fiksa mian kvatadon al la morna insulo, trans kies foraj altaj pinoj travideblas blanka alta muraĵo, certe la konventmuro, la prizonomuraĵo, min atendanta kaj transgrimpebla nur por desperuloj. Nenia mistikema aero spiras en tiu vidaĵo. Kiel, fakte, ignori, ke en ĝi kaj ĉirkaŭ ĝi konsumiĝis dramoj kiel la mia?

Malantaŭe kaj ene de tiu muro mi atendos, nun tio elstariĝas eĉ pli plage kaj obsede ripetiĝas, la plenumon de iuj burokrataĵoj, unu civilveston, poŝmonon sufiĉan por la trajnbileto por esti forglitigita al la patra vilaĝa hejmo, kie mi ne estas atendata, male pensata feliĉa kaj jam liberigita de la penoj pro vivrimeda havigado, kiu male entenajlas la preskaŭ senhavajn miajn familianojn esperantajn, kvankam sendire, je mia estonta helpo. Hejme mi trovos solidaron senpotencan kaj amon senreviĝan kaj senrevigan en ŝuldoŝarĝita bieno, mi kaŭzos ilian ĝenon ĉe najbaroj kaj konatuloj, mi serĉos laborlokon kiu ne ekzistas por iu kiu havas neniajn profesion aŭ metipreparon, kaj postnemulte senindulge min englutos la rekrutordono.

La mensa trakuriĝo de la estontaj eventoj ŝajnas halti kiam defore sur la marsurfaco io travidiĝas, nigra punkto moviĝanta sur la marbranĉo el la insulo Dezerto, eble la boateto rempuŝita de la kvazaŭfamilia konventa servanto, kiu, konvinka servi fratulon ermitejan solecon serĉantan, reale kunportos senesperulon kiu ne scias kiel kaj kian helpon peti. Ne! bonŝance, ne estas la timata boateto, eble ĝi estas nur kunamasiĝo de ekbriliĝoj saltetantaj el la suna lumo sur la mara surfaco. Tiuj ĉi, modifiĝante, ekmovigas en mi, kiel sparkoj en nokto, nekontraŭatajn impresojn kaj penskirlajn lernitaĵojn inter kiuj, hazarde kaj kvazaŭ per komika ludo de mortkondamnito mokrikane ŝajniganta plu ĝui je la vivo, spontane saltas sur miajn lipojn, kvazaŭ inspiritaj el la etoso, versaĵoj el *"Meriggiare pallido e assorto"* (meriĝiare pàllido e asorto = sub meztaga suno pala kaj penspleniga) de itala poeto Nobel-premiito Eŭgeno Montale:

*E andando nel sole che abbaglia*
*sentire con triste meraviglia.*
*com' è tutta la vita e il suo travaglio*
*in questo seguitare una muraglia*
*che ha in cima cocci aguzzi di bottiglia.*

Kaj lantirante sub blindiga sun'
senti kun trista mir'
kiel statas la viv' kaj ĝia pen'
daŭrigante flankepaŝi laŭ mur'
kun vitraj botelsplitoj por tegment'.

Recititaj de lipoj apenaŭ movitaj, ili supraĵe surmetiĝas sur la etosan kaj psikan situacion, kaj alŝutas al la animo ion devojigan el ties tristeco. Sed tuj tia distriĝo ekaspektas nenature kaj fuĝo el la problemo. Fakte, mia terurita soleco repopoliĝas je la antaŭaj pensoj kaj imagaĵoj: jam en senmoveco de l' aĵoj, pigre skurĝataj de l' suno, kaj de la menso halucinata, rajtas ekzisti nur ili! Mi nun, pli realisme, ne scias ĉu la kreitaĵoj havas kolorojn aŭ ĉio griziĝas, ĉu regas la silento aŭ la bruo.

Tamen samtempe, la atendotempo ne malpaciencigas, ĝi male sentenblas, en amino kondamnita, kiel malfruigo kaj baraĵo kontraŭ la neeviteblo falanta sur min: bremso, malhasteco favorantaj al la ebleco alertiĝi kontraŭ la neevitebleco, ĝin observi, ĝin trakribri, preskaŭ pritrakti kun ĝi. Fakte mi ĝin ekpritraktas dum nova penso min retenas: mia sorto, unue malrapide, poste rapide, ekakiras ekesperon kiu invadas tutan mian animon kaj refalas sur miajn membrojn subite fariĝantajn, el plumbecaj leĝerajn, el senmoveblaj viglajn: fulmrapide gapis, ke mia destino povas reveni en miajn manojn!

Mi saltleviĝas dum vortoj novaj nerezisteble kaj inspire ekallogas miajn lipojn: "*For tiun muron kun botelsplitoj por tegmento malhelpanta transpasi al pli vasta horizonto*". Kaj: *"Nun vi peklu vin mem por viaj propraj dentoj!"* kaj: *"For eĉ tiun mian penspenadon kvazaŭ la absurdo mankus je eksplikoj! Mi trovis! Mi trovis!"*.

Mi ne scias ĉu mi reale kriis, sed la ardo kaj aplombo estis tiapotencaj. Preskaŭ fizike alkroĉita al mia ekpenso, mi elstariĝis dirante al mi: *"Mi ne enkarceriĝos en la dezerta insulo, mi revenos al Venecio ĉar mi inventis savan planon*". Kaj subita sento de senpeziĝo flagris en mia animo.

Miaj hororaj vartataj pensoj forfalas ĝis lasi lokon al perceptado, ke en la ĉielo, kontraŭ nuancaj nuboj similaj al strioj de malpurigita stofo rande orborderitaj, iuj birdoj flugas klakante. Trakurante hastece kaj leĝere la revenvojon,

inter la etaj puntofarejoj nun senfascinaj, al porvenecia vaporŝipejo kaj turnigante la okulojn al la evitata porprizona ermitejo, eniras en mian vidkampon, sur ondoj rebrile muarantaj, la nigra fora punkto de l' *Dezerta* boateto jam sentimige minacanta el la eta lazura mara etendiĝo. Samtempe antaŭ mi ridetas kaj feste alruliĝas vaporŝipo al Venecio-centro.

Kaj kio pri la mono, la enirbileto ĝis la fervoja kapstacio? La malmultaj apuntoj poŝperdiĝantaj ne sufiĉas. Kuraĝe, kun la fiereco de tiu al kiu neniu rajtas rifuzi la retrovitan savilon, per altrudiĝantaj humilaj vortoj mi almozpetas moneron de enloĝanto sidanta antaŭ sia hejmpordo: *mi devas urĝe reveni al la fervoja stacidomo, morgaŭ aŭ postmorgaŭ mi redonos al vi egalvaloran monon*. La viro min rigardas skeptike sed donacas. Kure sur la vaporŝipon suririnte, nun mi povas kohere kun animstato rerigardi la urbajn mirindaĵojn kiuj tamen ne plu min enirigas en revon kiel antaŭe, eĉ ekperceptas. ke la odoro el la kanala akvo estas mucida: nun la mirindo direktiĝas al perspektivoj de nova vivo.

Kiun vivon? Tie, antaŭ la malgaja *Dezerta* maro, trafulmis, ĉu nur prohazarde?, mian memoron, ke en la ekstrema uesto de la pada ebeno, nome Piemonto, alia mia pliaĝa aliklasa studkunulo, jam je sojlo de ordinado, revenigita al la sekulareco, estis akceptita de la tieaj superuloj por ke li repripensu sian vokiĝon kaj reelprovu sian taŭgecon al la franciskana vivo, kaj nun eble jam obtenis la ordinadon kaj baldaŭ renkontiĝos kun siaj iamaj samklasanoj. Tia efektiviĝu ankaŭ mia nova vojo! Fulme mia menso elpripensis planon: per aŭtostopo mi plonĝos al la patreca hejmo kaj morgaŭ matene forveturos al Piemonto. Miaj familianoj facile konvinkiĝos, ke la *obeo (= obeenda ordono)* destinis min al nova enlandiĝo.

Nun mi elvaporŝipiĝas antaŭ la stacidomo, traponte transiras iujn kanalojn kaj iujn stratetojn, kaj jen la longa ponto al antaŭurbo Mestre; la unua aŭtomobilo estu petveture mia! Fakte, tio okazas: mia mano svingiĝas sekure kaj la stiristo haltas, ĝentile invitas, ke mi sidiĝu apud li. En Mestre alia aŭto ĵete min ŝoforas al Pàdova, sekve ŝarĝaŭto ĝis Monselice, fine alia en la direkton de mia setleteja forforejo. Jam eknoktas: la hejmvilaĝa centro montras nur la vivon de malmultaj lumoj filtriĝantaj tra riglitaj ŝutroj, mi piedtrakuras la finajn tri kilometrojn tanĝante senbruajn dometojn sur kampaj tervojaj stratoj kaj padoj apenaŭ piedtretitaj, kaj kiam la nokto jam identiĝas kun la kompleta kvieto mi senvole provokas hundbojadon: la hundo, senfende grumblanta kaj min sentimige prisnufanta, vekas kaj elhejmenigas miajn ĵusenlitiĝintajn familianojn. Mi fine estas kun ili, kun personoj kiuj min amas.

## Ĉapitro deka
# Ĉu fuĝo al saviĝo?

Ŝrikoj, babiladoj apud la petrola lumilo, refreŝiĝo, sobra vespermanĝo kaj plonĝo en trivita sofo por forigi la riskon de sveno pro ekelĉerpiĝo de la energioj. Mia patro promesas min bicikle konduki al tiu trajnohaltejo, tiom ligita al sia vivo, dum la aliaj familianoj ricevas porveraj miajn informojn pri la ordono daŭrigi la studojn en Piemonto; ne eĉ sparkas miro kiam ili komprenas, ke mi bezonas monon por la trajnbileto: *"Ne je viaj kostoj, ne timu, la mono revenos"*. Mi laŭmomente min eksentis monelvringanto... dum miaj fratinoj graŭletas pro tia "tuŝo-fuĝo gajiga nur duone" kaj "opiniinterŝanĝo neantaŭvidita kaj tuj perdita". Ĉu ili jam eksuspektis, ke mia sorto pasiiĝas por forendaĵoj ĉar hejme senperspektivas? La emocioj furioze sinsekvaj kaj la insistaj animŝanĝoj min faligas en la plej sensonĝan revatan kaj benatan dormon. Dum postvekaj salutoj mi, miakonsole, eksensis, ke la surprizo kaj ĝojo ĉe miaj familianoj bonŝance fakte baras pluan spacon al kromaj demandoj, tute cetere evitendaj.

Vekiĝinte, dum insista okulfrotado, mi preskaŭ duonkore akceptas esti atentigita pri hejmaj plibonigaĵoj tute ignoritaj hieraŭnokte pro la antaŭdorma morna kohorto de angoraj pensoj, kiuj tamen nun senpaŭze rekomencas maĉi frenezon, malkvietan urĝon kun agitiga timo preterlasi ĉeneron de plano ankoraŭ konfidita al hazardo.

Mi trovas mian patron, je la unuaj matenaj palaj aŭroraĵoj, kontrolanta kajerfoliojn kun fervoja horaro krajonsignita, ĉar, li pripensige diras, ke etaj duboj pri la ekzakteco de la informoj enŝteliĝis en liajn pensojn, dum zorgado pri la stala bredaro, kaj *ĉar fervoja veturado ĉi-tempe penigas ankaŭ paciencan fratulon*.

Rilate la familiecajn aferojn kun la kampara fruktado aŭ loĝejaj plibonigaĵoj, hejmrestado troflugas por ke ili kaptu atenton: tiom mi estas elĵetita antaŭen; nur unu novaĵo trafas miajn okulojn, sed pri ĝi mi konsciiĝos laŭvoje, nun la enhejma teretaĝa planko je batita grundo, kutima en ĉi-zonaj kampardomoj, pavimitas per ruĝaj brikaj kaheloj kaj la septo sur kiuj pendas prenprete obtuze senkoloraj uzoobjektoj nun rebrilas per ordo kaj blankeco malkiel la iama fumnigrigita plafono: miaj antaŭenfuĝoj tiel okupas kaj travagas mian menson, ke kutimaj observaj atentoj ne eĉ perceptas familianan deziron, ke mi

rimarku kaj akcentu gratulajn komplimentojn pro la novaĵoj. La volo atingi la savan celon ensorbas ĉiujn miajn pasiojn kaj transformiĝas al nepreco de fuĝo, eĉ al deziro, ke neniu plu alparolu al mi, ke mi evitu krei novajn scivolajn demandojn, perceptitajn kiel malamikan sieĝon. Vage retuŝas miajn orelojn bedaŭro de mia patrino, ke mem ne aŭdacis praktiki la postmilitan nigran merkaton same kiel multaj najbaraj terkultivistoj nun malpli malbonstataj: *"Ni taksiĝas riĉiĝintoj per kaŝmerkatigo de niaj kamparaj produktoj, dum al ni oni raziis preskaŭ ĉion. Provojn de nigra aŭ kontrabanda merkato de via frato ĉesigis polico kun monaj perdoj kaj enkarcerigaj minacoj".*

Kun mia patro lastamomente estis akordite, ke mi envagoniĝu, plibone mi forŝteliru, el la fervoja stacio de la najbara vilaĝo por eviti konatojn kaj komplimentulojn. Tiel okazas, dum mia animo multklopode provas subpremi signojn de pliiĝanta nepacienco pro la tempopasa malrapido. En la stacidomo la malmultaj personoj iom malas al mia espero inkognite forfuĝi ĉar iu konanto de mia patro volas min gratuli atentigante, senvole, scivolemon de aliaj geuloj. Mi, kun la animo diseca kaj celfiksa, apenaŭ plusukcesas reagi ridete kaj samtempe per silento provas digi la afablajn scivolemaĵojn de la pliiĝanta konataro. Ankaŭ tio bonŝance pasas.

Fine alvenis la trajno forveturigonta min al Verono, de Verono al Milano, de Milano al la akcelata piemonta urbo, tien albordiĝante je la unua nokthoro. Enirinte la stacidoman atendejon, mi min lasas fali en benkon kaj kapti de la dormo, kiun la bruegoj kaj fajfadoj kaj lokomotivaj malpurigaj fumblovaĵoj kapablas apenaŭ interrompi sed ne malebligi, ĝis la sepa matene. La sepa matena estas tro frua horo por renkontiĝi kun personoj kun kiuj pritrakti graviĝantajn problemojn, sed mi malpaciencas.

Lante paŝante tra sinkanta/malsinkanta nebuleto kaj apenaŭ intuiciigante la vastecon de la ĝardenaj aleoj, mi direktiĝas al la konvento sopirata. Je la unua pordtintilo venas juna domhelpanto kiu, pli geste ol vorte, indikas benkon sur kiu sidiĝinte mi atendu la alvenon de la regiona superulo, nun mescelebranta. Oni metas en miajn manojn tason da kafolakto, kiu trairas mian korpon kun reviviglanta dolĉeco. La restadĉambro tra larĝa pordo kondukas en dudekmetrojn longan koridoron, el kiu venas leĝera kaj insista bruo de ŝovadataj balailoj, akompanata de fajfata facila ario de la popolkanto, tiam vaste aŭdigata, "la cara zia Evelina" (kara onklino Evelìna), kaj jen la fajfado fariĝas samarie nedampita mezsoprana virineske simulita voĉo de unu koridora flanko kun baritona forta respondo de alia flanko, kies adaptitaj vortumoj sonas tiel:

“Kiam mi ekestis virineto
*lasis flirti la leĝera vesteto.*
Nun, ke mi estas pli grandeta
*liberiĝas je la stofo kalsoneta.*
Venu, venu min kisi
*Venu, venu min karesi”.*

Kaj post momenta paŭzo, la du reprenas sinkopatigante la arion.

Pormomente mi pridubas ĉu tiu loko vere estas konvento. Sed, ke mi tretas veran konventan ŝtonpavimon certigas miaj okuloj vidantaj la figuron de du junaj fratuloj en froko balaile antaŭenpuŝantaj segaĵerojn sur la koridora pavimo, kiuj gaje ripetas varistile la arion kvazaŭ ĝi pli enradikigus la emon al la vota ĉasteco. Mi, en tiu ĉi momento, ne persekutiĝas de neoportunaj seksamaj pensoj kaj ne bezonas specialan volan energion por ilin kvietigi: eĉ pro tio mi ne hastas juĝi translicaj tiujn ariitajn vortojn kaj mense praktiki iun ajn desupriĝon pri la kantantoj. Dume la du junaj fratuloj al mi apudiĝas demandante ĉu mi deziras alian tason da lakto kaj el kiu mondoparto mi venas tiuhore.

Mi povos koni tre funde tiujn du fratulojn ĉar mi kolegumos kun ili laŭlongo de tri jaroj spertante ilian seriozecon, ilian fidelecon, ilian ĝojan edziĝon al la idealoj de la franciskana vivo. Temas pri du ĝemeloj, solfiloj de bone dungita paro loĝanta ne malnajbare de la konvento.

Tiu epizodo naskis inter ni gajan amikiĝon kiun en sia pastreca funkcio ili ankoraŭ konservas al mi. Al mi vekiĝis ŝato de tempo al tempo ŝerce arii tiujn vortojn antaŭ ili, en kolektivaj distraj horoj aŭ promenadoj, kaj ĉiam renoviĝis la reciproka estimo; nur unu fojon la klerikmajstro skuis la kapon dirante *”nec nominetur in nobis sicut decet sanctos*” (esprimo de sankta Paŭlo, Ef. 5,3, tradukebla tiel: “Tiaĵoj... ne eĉ estu nomataj inter ni, kiel decas por sanktuloj”. Tiu originala unua kontakto faciligis la akceptadon de nekonata kleriko en grupo da tridek “teologoj” kandidatiĝintoj por siatempa sacerdota ordinado.

Min mi prezentis al la regiona superulo, titolulo pri pedagogio ĉe la roma franciskana universitato, kaj fama kiel valoriganto de talentaj vokiĝoj: de vokiĝoj foje forĵetitaj de aliregionaj klerikejoj. Li ne volis informiĝi pri la kaŭzoj de mia forĵeto: li volis nur certiĝi pri mia sincera intenco repreni la franciskanan stilvivon, kondiĉe ke mi min lasu juĝi laŭ la metro de la edukantoj; kanonecaj kaj juraj burokrataĵoj necesigitaj de la regionŝanĝo kombiniĝu mem pere de lia interveno; kaj li min prezentis al la bonveniga fratio.

Ĉu li tion faris spite sian komprenon, ke mi estas luktanta por savi la save-

blan kaj precipe por reakiri la psiksocian memfidon? Aŭ li kredis, ke el tia psika kaj morala malkombiniĝo sparkos, tra lia gvido, rezoluta unucela konscienco? Eble ambaŭ gvidlinioj lin konsilis. Se anticipi, iam kuros klaĉoj pri lia supraĵeco en la akceptado de aspirantoj.

La nova religiula komunumo tuj eknutris sentojn de simpatio al mi taksinte min plua velkinĝanta sproso de la venetia trodetaleme rigida disciplino kaj de la ekscesa fidmanko al la edukendaj kandidatoj, penstradicio kaj edukaj metodoj jam brue kritikitaj en religiulaj fakaj kunvenoj. Ne direndas, ke de tiu juĝo, tro severa laŭ mi, profitis mia lerteco kvankam perceptita kiel ne multe objektiva. Efektive, en tiu ĉi klerikejo oni rajtis kontakti kaj komuniki laŭvole kun eksterstudentejaj konventanoj kaj ankaŭ eksterkonventanoj, oni povis elekti kaj sekvi sian kulturan preferatan terenon partoprenante prelegojn, diskutojn, dramojn ludatajn ankaŭ en urbaj teatroj, eĉ se nur per supraĵa interesiĝo. La novaĵo min plenigis je korvibro kaj entreprenemo kaj de kulturriĉaj kontaktoj, kaj mi ne mankis eĉ sciigi, kun la triumfanta gajeco de prizonulo liberiĝinta spite siajn karcergardistojn, tion al la klerikoj de la venetiaj miaj, trudite forlasitaj, kunkovituloj. Sed tio kaŭzis plendojn ĉe la regiona superulo flanke de mia origina komunumo. Ties protestoj atingis la tegmentan generalan superulon en Romo, kiu rekomendis al miaj novaj edukantoj pli atentan observadon pri mi antaŭ ol mi enordeniĝu per la definitiva votpromeso, *pro la manifesta neeta kvanto da kaŝita ribelemo kaj venĝemo*. Sekve de tio, per oficiala kunvoko, la regiona superulo, iom "iritita" pro la rimarko el Romo, min admonis agi korekte kaj avertis, ke tiu malprudentaĵo kostos al mi ion. Pri kio li <ludis? Mi tiam ne suspektis, sed postnelonge sperte ekkonis.

Dume miaj simpatiaj kunstudantoj ekmontris siajn preferatajn majstrecojn... metiajn kaj manfarajn. Ĉiu praktikis metiistan arton, kiel radioriparanto aŭ muntisto, lignaĵisto, meĥanikisto aŭ ĉioriparanto. *Kiajn tempojn ili dediĉas al la studoj postulitaj de ilia onta profesio?* Estis mia nekonsenteca scivolo. Eĉ dumlecione kelkaj manlaboradis: mia proksimulo en dupersona benko, ekzemple, mane muntis/malmuntis komplikajn bobenojn por kondensiloj, funde de la klasĉambro, duone kovrita de la ŝutroj de antaŭaj kunuloj. Iu el studejanoj transformis sian ĉelon en farejon: instrumentoj kaj aparataĵoj embarasas ĉiel ajn pro ne nur aspekta malordo! En tiu etoso facilis por mi esti konsiderata, eĉ senvole, por la unika studemulo stimulanta la aliajn, kio tamen ne suferigis la plej altajn superulojn, ne tute kontentajn je tiu malengaĝiĝo kaj iele provantaj igi pli studema la klerikan grupon. El la maloftaj neakceptoj pri mia malengaĝiĝo en manservoj vorantaj studtempon ili poiomete kutimiĝis min

ŝirmi agnoskante al mi la rajton pli ŝati studojn ol manlaborojn kaj sekvi mian plej fortan inklinon en la realiĝo de vokiĝo eĉ en tiu kampo.

Preskaŭ ĉiuj alklamis la saman... filozofion: *ni ne rajtas disdegni la manlaborojn kaj krome por la misiista entreprenemo ege utilas ĉiofaremo*. Se mi emis bedaŭri kaj plendi pri la studhoroj deprenitaj pro ĉiutage urĝaj farendaĵoj, ĝenerale ili kontentis pri tio, kaj elkore min lasis al mi mem, al miaj *frenezigaj* studoj. Ilia nepreparîĝo, se komparata kun la mia konstanta engaĝo, konsekvence, elstariĝis, nemalofte, dum la enlernejaj verkotaskoj, aparte tiuj en klasĉambro; sed ili rapide ellernis superi ĉiun ĝenon. Kiamaniere?

Estis mia momento: fakte, multaj petadis helpon de mia "furioza atrakcio al la studoj" kaj mi sukcesis, foje, inspiri, fakte prepari, ankaŭ tri aŭ kvar komentojn pri la taskigitaj bibliaj tekstoj aŭ pri geneziĝo kaj signifo de moralaj principoj aŭ pri laŭjarcentaj ekleziaj dokumentoj. Krom estimo de suĉebla geniuleto kaj de nelaciĝa ĝisostulo en la serĉado *"ene malene"* de libroj kaj fakaj revuoj, mi lukris ankaŭ delikataĵojn, vestaĵojn, prifilozofiajn kaj priteologiajn librojn malfruantajn eniri, per la malalta buĝeta bazo, en la studentejan bibliotekon. Tiuj lastaj konstituis mian plej veran frandaĵon: miaj amikoj transformadis la malavarecon de siaj parencoj, proksimaj kaj malproksimaj havaĵe bonstataj, al mendoj pri indikitaj, neĉiam preze okulindulgaj, libroj, kiujn finfine legis preskaŭ nur mi montrante sekve, iom parade, al la profesoraro almenaŭ mian studpasion kun problem-sentemo. Entute, ene de mallonga tempo, mi estis gratulite taksata membro soleca de apenaŭ ekekzistanta kategorio de studemaj studentoj.

Ĉiuj manlaboristoj, do, miaj amikoj! Estis la ĝenerala rekantado: *Laboristoj de la tuta mondo, unuiĝu!* La sono de tiuj vortoj igis rabotantaj kaj plibonigantaj kaj ĉiofarantaj iliajn manojn por pruvi al si mem kaj al la aliaj, ke ne estas forpelitaj, ĉe religiuloj nerafinite akuzataj pri socidamaĝa mallaboremo (en mondo, bedaŭrinde, trafita de vasta procento de senlaboruloj), la laborpenado kaj la pano pene prilaborita. Al la obĵeto, ke en la mondo miloj da miloj scipovas realigi tiujn metiobjektojn, eĉ bedaŭrinde multaj senlaboras pro manko de laborfontoj mem, oni senafekte eĥis daŭrigante manlabori... kaj se mi aŭdacis enŝoveti, ke ni specife taskiĝas science koni la fundamentojn de Kristanismo por science ilin komuniki al homoj, ili supozigis, ke mem, kvankam etstude provizitaj aŭ eĉ preskaŭ pli efike ol *studsofaj kuŝintoj*, kapablos tiun faron. La ekscesa *sofa komparo* ekscitadis ridon sed bildigis preskaŭan priridon. Ankaŭ sekularaj amikoj, laŭokazaj babilantaj kun ni, kvitancis kaj admiris tiujn eksterstudajn pasiojn kiel laŭevangeliajn kondutojn por ekkontakti-

ĝi kun la laborista klaso pli kaj pli disiĝanta el la eklezio.

Estis la tempo de la kverelo: *ĉu pastro limiĝu disvastigi la kristanan anoncon aŭ vivu inter la laboristoj por spertkoni iliajn kondiĉojn kaj partopreni en iliaj suferoj?* Mi, iama kurbiĝinta en gravaj konfuzigaj penoj rilate religion pro manko de kompetentuloj por kune kribradi la validajn disde la nevalidaj fundamentoj, same raciaj kaj historiaj kaj humanismaj, de kristanismo, montris preferi la sacerdoton homo tute dediĉata al kompetenta transdono de religiaĵoj al socio, kiu jam abundas je laboristoj kaj sukcese strebas pliprodukti malgraŭ pliiĝanta maldungiĝo: la povrecon kaj solidarecon oni povas praktiki eĉ anoncante la *singularecon*[1] de la evangelio. Koncerne komprenadon pri la laboristara mensoteniĝo kaj ekonomiaj mallarĝaĵoj, neniom ni distanciĝas ĉar ni pastroj aŭ religiuloj devenas ĝuste preskaŭ ĉiuj de laboristaj familioj kaj foje eĉ de uzinoj mem.

El studsistemo la atento formoviĝis al la eduksistemo kaj instrumetodiko, tiujn jarojn postmilitajn ĉie diskutita kiel urĝa socia postulo: el diversaj sciencbranĉoj la premo por renovigo kreskis kaj ĉe junularo foje baŭmadis ĝis eksplicitaj postuloj. Ĝenerale tiu etoso estis spirata eĉ de la konventularo. Kaj ĉar la regiona elektita superulo kulte kaj fake flegas ekzakte psikologion cele al pedagogio, kial ne profiti por aŭdigi ankaŭ ni la nian en tiu ĉi kampo?

Grupo da klerikaj studejanoj permespetis krei monatan dekpaĝan broŝuran revueton de formato A4 kaj notigi per ĝi siajn diskutojn pri komunaj problemoj kiel la funkcio de la libero en la eduka sistemoj de la novaj tempoj. Pasinte, la diskutoj rilate tiujn ĉi temojn, tie kaj tie, estis sufokitaj ĉar alarmantaj la fratulan plejaĝaron kaj "alicelantaj la spiriton". Jen oportuno por aperte kaj konvinkige paroli, se ni kapablas profiti sendanĝere, des pli ĉar la revuo interŝanĝiĝas kun similaj aliregionaj, kvankam ne jam traktantaj pri tiuj temoj. Post malpli ol tri monatoj la akuratigado de la periodaĵo plene pasos en miajn manojn sukcesantajn akiri skribajn kontribuaĵojn de klerikoj de diversaj regionoj: ĉiuj kontribuaĵoj estis sume kontrolitaj de la respektivaj superuloj, krom tiu de la redaktoro aŭ de la stabo redakcia. Iu redaktora enkonduka noto, finfoje, subtenis idearon tiom aŭdacan, ke la novaĵo, je okuloj junaj kaj maljunaj, aspektis malreteneme revolucia riskiganta malfortigi, aŭ eĉ detrui laŭ iuj, la tradician komunuman kunvivadon, kaj senkriterie argumentanta per la nece-

[1] Singulareco: vorto prunteprenita de la prifizika scienco, kie ĝi aludas eventon unikan, tute novan, senantecedentan. Simile okazas pluraspekte en kristanismo, ekzemple en la unikeco de la universala, space kaj tempe, elaĉeto de Kristo, kaj en la mezuro de la senkondiĉa pardono al la ofendinto, eĉ kiam li persistas en la ofendo ktp.

so je preskaŭ individua sendependo en la eksterkonventa agado kaj je plia partoprenrajto en la elektoj koncernantaj la konventan vivon, duonkaŝe akuzitan tute nescii aŭ ignori la edukan forton de la libera opiniesprimo. *"Revuaj trojaj ĉevaletoj"* estis la malpli malfavora komento aŭ "*inimici hominis domestici ejus*", kiu el la latina evangelio tradukiĝas per *"la malamikoj de la homo kunloĝas kun li",* nome ĝuste en konvento, inter la fratuloj. Malamiko inter niaj muroj!

Se per tio oni aludis al la jam ĝuata libero de kontaktoj kaj informiĝo, oni respondis, ke kontrolanta okulo el si mem malpliigas la dignecon de la kontrolito!

La revuaj enŝtelaĵoj, fakte, je redaktoraj okuloj, proponis nur sobran malfermon kaj kontakton kun la ekstera mondo per aludoj al la rajto edukiĝi kaj instruiĝi laŭ novaj nedifinitaj sociaj postuloj kaj pri markita aserto, ke la personeco konstruiĝas ekzakte per tiaĵoj kaj, ke pri si mem la mastro *"estas mi, ne la regulnormoj, nek la superuloj, nek la tradicioj". "Nun tempas rigardi novajn sociajn postulojn kaj elveni de la arboj por marŝi tra la arbaro. Ne ŝajnu banale, ke klerikoj pretas poldere reokupi sian la tereno de la libero...".*

Ne ĉio fruktiĝis el konvinkoj; fakte ekscesoj, foje, estis serĉataj ankaŭ por pli reagige altigi la legantaran atenton. Sed en la artikoloj tio ne distingiĝis.

La revuo agitis la klerikojn de diversaj klerikejoj antaŭ ol altiri la atenton de superuloj, kiuj sin sentis devigataj impeti por la eksigo de la redaktoro kaj almenaŭ momenta repreno de la publikigo-permeso kaj sekvestro de la koncerna revua numero: sekvestro singarda, tamen, kaj duonkaŝa por ne pliekscititi la scivolemon de alizorganta konventularo; kaj sekvis la publikigsuspendo per la simpla monsubtena ĉesado.

Sekve de iu, kaj ankaŭ pro favoraj komentoj de klerikoj, artikolo mi eksensis ion fremdecan ĉirkaŭ mi, malgraŭ mia intenco franciskane fratuliĝi tiam klare jam manifestite, laŭ mi, per gravaj miaj agaderoj kaj per sentadoj tralikiĝantaj el miaj konversacioj kaj publikaj deklaroj kaj konduto. Sed tia spirata harmonio inter mi kaj la idealoj de la klerikado nun riskis frakasiĝi ankoraŭfoje. Jen kial.

Kristnaskon 1950. La regiona superulo, ĝuste kiam mi opiniis esti jam ĉesojle de la publika kaj definitiva pervota ligiĝo, min kunvokas por, ja jes, supozis mi, komuniki, ke mi baldaŭ... Male, li komunikas la malon. Kial?

Li, antaŭe per vortaj ĉirkaŭvolvaĵoj poste per unusignifaj esprimoj, provis konvinki min serene kaj senproteste akcepti sesmonatan prokraston de mia definitiva pervota ligiĝo. *"Nur sesmonata atendo en kompleza pripensado".*

Dum li ekparoladis mi mense ripetadis preskaŭ meĥanike: "kaj kio pri miaj studpasio kaj animluktoj por kandidatiĝi?". La vortoj *"sesmonata"* helpis, ke mi ne malesperu. Post momenta silento fine mi balbutas, la kapon tute klinita kaj la okulojn gapantaj al la liaj, la voĉon basa sed kun ironio sendecide bremsata: "Kiamaniere vi scios, ke mi post ses monatoj dignos franciskaniĝi?". Post alia paŭzamense nepasiva memretiriĝo: "Se vi tion scias jam nun, kial ne min akcepti tuj?". La respondo:

*"La kritikoj falintaj sur vin pro iuj spitemaj viaj nazbatoj kaj ankaŭ la nepreco montri al ĉiuj, ke mi ade agis kaj agas prudente en la kribrado de vokiĝoj, pliprudentigis min antaŭ la fratularo kaj fronte al la Generala Superulo. Do, cirkonstancoj konsilas, ke mi petu tiun prokraston fidante kaj antaŭfidante je via serena reago kaj via akceptemo almenaŭ pro respekto al mi kiu siatempe jam valorigis vin fuĝintan el Veneto".*

Tiu konkludo, vera premiso ne plu silenta, restigis min kiel balancoskuitan de du kontraŭaj impulsoj: ĉu akcepti por ne aflikti mian bonfaranton kaj samtempe konduti akorde por savi lian famon de prudenta kaj saĝa edukisto, aŭ lasi min enverŝi el sento de indigno pro la evidenta ekspluato pri mia persono por ke estu savata kaj bonfamigata la honoro de superulo kiu, jam taksita sperta en edukarto, nun timas kompromiti sian famon aŭ, eble, sian karieron? Mia komenca decido forĵeti ĉion laŭprefere ol submetiĝi al tiu trudaĵo, fine ekmoliĝis, preskaŭ pardonpetece pro la unua impulsa reaga rezisto.

Ĉar ankoraŭ mi hezitis plenkonsenti, li enscenejigis sian arton kiun la studentoj jam vortumis *"bruege fridkoleregi",* tio estas kalkule afektante bruegan incitiĝon kaj tujposte resobriĝante por plisolidigi la efikon de la efekto. Daŭris, kelke da momentetoj kaj haste vaporiĝis tia aspekte nebridebla koleriĝo enkasigante al li mian jeson, kiu al li tamen jam fariĝis implicita. Li jam sukcesis min persvadi, ke mi estus rifuzanta, *eble pro malutila sendankemo,* valoran konsilon tute konforman al "nia komuna avantaĝo".

La sinsekvajn tagojn, la dilemo, apenaŭ vorte superita, sed ene pluanta pro la tro kontrastaj efektoj, ekparalizis miajn spiriton kaj inteligenton kaj vivĝojon: mi akiris duran, kvankam nevolan, mienon, strabece rigardadis la grupon de la votiĝontoj, ĉiuj kelkjare pli junaj ol mi, kvazaŭ devenantajn el alia nescianta mondo, dum eĉ ili eble rigardadis min kiel ekzotikan estulon, embarasitaj pro mia aĉhumuro. Miaj pensoj spiralis en la vakuo ekscitiĝantaj nur pro iuj, maloftaj sed rimarkitaj, kontraŭdiraj miaj komentoj ŝprucigantaj ambiguecon: protesto kun pelmelo, akceptemo kun ribelemo, apartiĝo kun entreprenemo, senagemo kun mensa kirliĝado…

Tiuj superulaj vortoj sulkis en mi enpremaĵon tiom profundan, ke sufiĉis ilin rememori por maloftigi kaj estingi spitemon kaj grumblemon. Fakte post kelke da tempo mi rezignis treni miajn kunulojn al kritiko aŭ malaprobo en apogo al miaj supozigitaj surtretitaj rajtoj, arto al mi ne fremda; eĉ rezignis ŝajne malinstigi, ĉe ili, spontanajn ekmirojn kiuj, tial, rapide estingiĝis kun mia ŝajna grandanimeco.

Restis al mi nenio ol akcepti la kromajn vortojn, diratajn konsoligcele, de la superulo mem: *"Kontraŭ malkuraĝiĝo, sciu ke cetere, la tajdoj de l' rapida tempo forviŝas ĉion!"*.

Enposteniĝis por la klerikaro nova majstro (nome pastro kiu kunvivas ĉiutage kune kun la aspiranta grupo por orienti kaj precipe por akiri pravigintan juĝon pri ĉiu kandidato), kiun mi tuj taksis misaŭgura por mi. Post nelonge fakte estis forĝita de klerikoj, ne sen mia komplico, tute taŭga kaj piktrafa difino pri li. Li pruviĝis samtempe kiel majstro de la klerikoj kaj kapelano de la enkarcerigitoj ĉe la urba karcero: nia ŝajne malmalica vortoludo ekflamis iel inversigante la funkciojn: *edukanto de la enkarcerigitoj kaj reeduka enkarceriganto de la klerikoj.* Fakte, kiel ĉe enkarcerigitoj, li cerbere malpermesis al ĉiuj kontaktiĝi kun eksterklerikejanoj kaj eliri por komisioj tra la urbo sen lia eksplicita permeso kaj nur pro grava motivo kaj rigore akompanate, elzonigis la ofendilon de la poŝtkontrolo, ĉiam police sentinelante en moŝteca aŭtoritateco. Koncerne miajn aferojn, li tenis konduton aspekte indiferentan, reale aktivante, per subtilaj entrudiĝoj, kvazaŭ substrekante ĝenon pro trolonge senrajte gastiĝanta gasto, por konvinkiĝi kaj konvinkigi, ke mi rezignu aliri ordinon, kaj sin rajtigante humiligi kaj eĉ elvoki miajn kaŝitajn domaĝojn. Unu lia frazo, ĉerpita el lia lingvaĵo de skiisto kia li emis taksiĝi, eble ne hazarde postkriita miadorse dum grupa promeno, bildigas lian sintenon rilate mian aferon: *"zigzaganto eksterkureje skiu aliloke!"*. Mi lin reciprokis, konsentite inter la kunuloj, agordante liajn tagordaĵojn al *majstreskaĵoj kaj saĝulfrapaĵoj*.

Tiusomere ni pasigis tuttagon inter la memoraĵoj de la verkisto-dramisto Vittorio Alfieri (eld: Vittòrio Alfièri) en Torino kaj en urbo Asti, ties patruja loko. Mempreparîĝintaj, fine ni estis akompanataj de laika klera profesoro kiu nukleigis siajn ilustraĵojn komentante kaj deklamante selektitajn pecojn de Alfieraj grektemaj tragedioj tiklante por ke la klerikoj perceptu en ili spurojn de refleksoj de kristanismo. Heroldis mi, ne nure mi tamen, rimarkanta, ke Alfieraj personoj ne plu estas viktimoj de tiranaj dioj aŭ determinitaj propekaj kaproj, marionetoj movataj de obskuraj aŭ kruelaj superfortaj potencoj naturaj aŭ supernaturaj: la Alfieraj fakte agas libere serĉante en siaj animaj implikaĵoj

la veron pri si kaj konsciiĝante pri sia libere elektita, ne nur fatala, kulpo. Laŭ Alfiera tragedieco, Agamemno, se ekzempli, oferante sian filinon, kulpas pro antaŭmeto de ŝtata prestiĝo al sia patra sento aŭ pro venĝo kontraŭ la perfido de sia edzino, Klitemnestro, kiu siavice kulpas pro sia kompliceco kun Egisto, la uzurpanto. En ĉiuj dramoj oni angoras pri konscio de siaj kulpoj poluciantaj konsciencon.

Tiu konsciiĝo, aŭ korelativeco de peno kun kulpo, konstituas kristanan konsistaĵon: puno eventuale nur el kulpo! (Kvankam, laŭ kristanismo, oni konkrete ne scias kiel Dio intervenas en tiu ĉi nuna konkreta mondo). Sume la dramverkisto, konscie aŭ nekonscie, inokulis en siajn dramverkojn sian kristanan vivkonceptadon. Alfieri, konklude, ĉiukaze ne povintus sincere aŭtori la klasikajn grekajn dramojn.

Tamen iuj taksis ekscesa tiun konkludon aŭ bezona je plua esploro.

Sur la disondo de tiu konceptoj al ni plaĉis trovi analogiojn kaj similaĵojn inter klasikaĵoj la bibliaĵoj kaj protagonistoj de ambaŭ flankoj: Kaino kaj Abelo = Eteoklo kaj Poliniko; Abrahamo kaj Isaako = Ifigenia kaj Agamemno; Jiobo = Filoteto; Josuo = Odiseo; Judita kaj Holoferno = Klitemnestra kaj Agamemno; Davido kaj Jonatano = Oresto kaj Pilado; Jozefo kaj la edzino de Putifaro = Hipolito kaj Fedra; Ester = Antigona; Kristo = Prometeo… Kiam la listo finiĝis kun la konkludo, ke la arketipoj kuŝas samaj en la homa subkonscio, ni ekdubis, ke ni iom kaprice procedis.

Ni iris ankaŭ viziti, plifoje, la egiptan muzeon en Torino. Ankaŭ ĉi tie, se ĉiu objekto estis majstraĵo kun nekalkulebla valoro, la atento estis konkerita de la signifo de la sfinkso kiu troniĝas statue aŭ bilde tie kaj tie en skulptaĵoj: tiu ĉi, por ni, elĉerpantaj el la kristana kulturo, figuras la vivon demandantan pri ekzistoenigmoj kaj plaste tipigas la homan racion postulantan kaj atendantan esencajn respondojn: kaj jen Kristo respondas aŭ helpas trovi respondon! Sed ne mankis iuj opiniantaj ke tiu antropologia aŭ religia interpreto superŝaŭmantas kaj ne konvinkas: Kristo, jes, respondas, sed sfinkso kion pridemandas aŭ vere pridemandis laŭ figura mito de antikvaj egiptoj? Ĉu ne temas pri senrajta alproprigo?… Tamen en diversaj kristanaj liturgiaj objektoj kaj pentraĵoj lokiĝas sfinksoj apud Kristo. Tiukaze, laŭ fakkleristaro, sfinkso kune kun Kristo, mem invitantaj vidi la vivo-enigmon, tiun ĉi simbolas kaj, bonŝance, krom vidi, eĉ solve forviŝas.

Estetikaj kaj intelektaj kaj problemvekaj tempopasigoj kontentigantaj mian ĝisostan inklinon al intelektulaĵoj, eble iom vante ambiciaj, se oni volas. Juna sacerdoto malzorgete amike alertis min: *"Ĉio tio, nome tia via pasio, bonas*

*kaj belas, escepte ke vi rolu homon de penso nur por kompensi imagitan marĝeniĝon".* Se la fratulo scius, ke mi ne multe ŝatas intelektulon, tiun figuron kiu ekde la deksepa jarcento ĉiokompetentece furiozas en okcidento, ĉu li ne profitus je la de mi preferata esprimo *"homo ema al kulturo"?* Aŭ ĉu eble li vidis en mi latentaĵojn de kaŝita ambicio, baŭmantajn por kompensi memmalkontenton pro miaj vokiĝa fluktuado kaj publika subklasado? Konkrete, kaj bonŝance, tiu "malŝvelo" efikis enfuneligi min en pli kritikajn sinobservojn.

Kio ajn estus, apenaŭ ĉesis la spektaklo de la kulturaĵoj, mi faladis en la samajn psikajn lacige diskurantajn konfliktojn, kiujn enirunto mian enon juĝus dissplitiĝo de personeco.

Se unuavide tiu ordinprokrastado donis okazon pri lasta kaj definitiva pripenso pri mia elektota sorto, direndus ke, fakte, tio agis male. Mi elpensis, plimalfrue, tiun similaĵon ilustrantan pri mia situacio, elĉerpitan el sporteroj kaj rakontitaj spertoj de la majstro: oni imagu ĉene ligitan rokgrimpanton, en grupo ĉene ligitan, ektimantan kaj ekdubantan, grimpadmeze, pri sia kapablo pluiri. Se la sekvanta ŝnurkunulo, perceptinte tiun heziton kaj ĝin juĝinte danĝera por la tuta grupo, kaptus lian piedon provante, per malsupratiro, lin helpi en la malgrimpiĝo, ĉu la hezitanto sin sentus pli sekura aŭ pli riskiĝanta? Ĉu li reagus per forlaso de ŝnurapogiloj aŭ per pli tenaca alkroĉiĝo al rokdentoj? Tielsame estis mia situacio tiujn monatojn: nun la religiula vivo estas vidata kaj kiel vividealo kaj iela defendilo kontraŭ la malfacilaĵoj de la vivlukto. La minaco perdi tiun lastan mobilizis ĉiujn rezistajn kapablojn kiel en batalanto al kiu estas ordonite kuratingi kaj vivkoste teni la pozicion minacatan de obskuraj malamikoj. Tiom remaĉiĝis en mia menso, tiu zorga komparo ke per ĝi mi trovis momentajn fantaziripozojn.

Certe, tiu situacio, eble al neniu imputebla, pli difektis al serena pripensado ol pli iluminis pri mi la responsulojn. Fakte mi vidas miajn kunulojn pervotpromesintojn gajaj en ĉiuj cirkonstancoj dum mi min ekperceptis kiel homon tristan: la franciskana gajo sub la patra dia rigardo konturiĝis pli kiel fora seninflua beleco ol konstato trapasanta la animon! Ĉiu klopodo reakiri serenecon por normale kontaktiĝi kun kunuloj subtile konfliktis kun ilia evidenta stato de memakceptiĝo kaj do memkontentiĝo.

Laŭlonge de iuj monatoj mi moviĝis blindumite, kiel fantomo. Ne tiom, tamen, ke mi ne rezignu verki okazan artikolon. Eble por dolĉigi mian punon alvenis permeso kun invito, ke rekomenciĝu la publikigo de la jam ŝrumpigita interstudenteja revueto sendota al ĉiuj klerikejoj de Italujo. Okaze ĝi nobliĝis per la nova titolo "La Corda" (La Korda = La Ŝnuro, La Ligilo), sur

kies fronto bilde ĉirkaŭvolviĝis interplektitaj ŝnuraj nodoj simbolantaj unueciĝon de la animoj, dum mi savis mian funkcion de redaktoro, malgraŭ duonigitan ĉar ĉe mi estis oficiale starigita kunredaktoro, plej verŝajne fina respondeculo, kun stabo, tamen, tute sur miaj pensoj kun kiu eblis akuratigi kaj plivigligi la revuon. Malgraŭ tio mi pri ĝi revis, eĉ dum tajpado sur vaksa stencilo, prestiĝan kaj talentecan kaj kvazaŭan porintelektulan, (kiu mia fakulto tiam kapablus moderigi la humiligkompensajn revflugojn?), revuon en kiu ĉiuj ideoj sencenzure transdoniĝadu kaj impulsu renkontiĝojn; kaj tio altiris el proksimaj regionoj novajn kunlaborantojn intelekte motivitajn, kaj varbis konstantajn raportistojn; dume mi profitis, do, por verki frontartikolon, kies titolo sonis *"Kiam la animaj afekcioj malfranciskane inklinas al malbelo...",* kie malbelo anstataŭas malĝojon kaj afekcioj juĝojn; kaj denove mi riskis translimi la komunan prudenton.

Se mi rezistis la tenton aludi al la origino de tiuj, facile kondukeblaj al la aŭtoro, *afekcioj*, tamen oni emfazis, ke se tiuj animstatoj juĝiĝas celkaptaj ĉar sekvantaj el la spertoj de la aŭtoro, la parto priskribanta la motivojn kaj la sperton de ĝojo, la kristana kaj franciskana ĝojo, aspektis iom afekta kaj tordita. Tamen al mi ne mankis konvinko kaj honesteco traktante pri ili. Relegınte, plimalfrue, tiun artikolon, mi devis konsenti, ke miaj kritikantoj prave juĝis. Evidente, kiam la animo tristas, eĉ la plejbonaj intencoj koloriĝas je tiuj spiritaj kondiĉoj.

Ludis teme la franciskana distiko:

*"Tiom brilas la bon' kiun mi spektas*
*ke ĉiu malglataĵo bon' aspektas",*

versaĵoj kiujn, same kiel por ĉiuj siaj verkoj, la jam kavalirece aspiranta juna Francisko ĉerpis el amkanzonoj de la stilnova epoko, prefere temantaj pri idealigita virino (krom pri la *virtus* aŭ moralaj kaj politikaj aspiroj); ilin, kvankam plenigitajn per kristanaj sencoj, mi tiam konfrontigis kun la insida vivrealo, for de la literatura aŭ hagiografieca ekzaltado.

Ne mankis aliaj novaĵoj deturnantaj, almenaŭ pormomente, el mia kutima duonmorneca stato.

Venis, konventa gasto, fama maldekstrema elitulo, invitita, por publika tuttaga kunveno, de la *Franciskana Katedro*, kultura asocio kun porintelektulaj kaj altsociaj aspiroj, ĵus establita de fratula mensularo kune kun eruditaj laikoj. La kulturaj temoj, certe naskiĝantaj el aktualaj sociaj situacioj, devis esti trempitaj en la viv-interpreto de sankta Francisko kaj de li inspiritaj kulturaj kaj popolaj movadoj laŭjarcentaj. Ĉi-foje ĝia celo sidis en montrado, ke la

ekleziaj kondamnoj pri marksismo ne etendiĝas al ĉiuj sociaj kaj politikaj postulatoj de tiu doktrino kaj ke, ĉiel ajn, ili admone kaj kurace marĝenigas el eklezio nur kredantojn: nekredantoj jam siainiciate foriĝintaj el ĝi. Ekzakta legado! klerikoj komentis.

La Katedro emfazis kiel sian okazan moton: Francisko en la Eklezio kun la Eklezio!

*Kial socialismo necesus?* Estis la stimula ĵeto de la eminenta, kaj vaste dorlotita, publicisto al la publiko. La preleganto per nekutima vervo kaj virtuoza elokventeco dehiskigis jenon:

*Socialismo (ĉiuj socialismoj, aparte tiu inspirita de marksismo) estiĝas la nova respondo al la neplenumitaj promesoj de kristanismo. Kristanismo dekomence konsciiĝis pri la bezonoj de la popoloj sed fakte rapidiĝis ilin ignori.*

Kompreneble, tiu respondo generis en ni alian demandon: kiujn promesojn faris kristanismo? La religiula pastraro kaj profesoraro rondete diskutis, pli frue inter si, pli malfrue kun la preleganto, ĉiuj provante trovi kaj difini tiujn promesojn. Malgraŭ ke la priteologia studentaro estis nur spektanta aŭ eble klakfunkcianta, mi aŭdacis diri miajn opiniojn koncizigitajn en ĉi-subaj resumitaj principaj asertoj:

*1) Kristanismo postulas konsentan adaptiĝon al Dio tra Jesuo Kristo, kies predikita Dia Regno resumiĝas en la akcepto de la kredo je Jesuo mem kaj vivo laŭ li en la amo al la proksimuloj. La unua eksplicita tasko-celo de la Krista anonco koncernas la savon totalan, tio estas definitive transviva, de homo;*

*2) la esperoj, rilate sociorganizon kaj socialan justecon kaj ekonomian sistemon ktp, estas stimulitaj de la precepto de amo al proksimuloj, antaŭ kiu tamen homo libere kondutas, tio estas konservante ĉiam la eblon respondece akcepti aŭ repuŝi tiun amon, subnome eterna vivo;*

*3) konduti laŭ Jesuo Kristo favoras certe ankaŭ la emon al sociala justeco, produktado, respekto de homo al homo. Tiuj avantaĝoj iamaniere konturiĝas certe kristanaj promesoj. Sed ili evoluiĝas subkondiĉitaj de la libera akcepto fare de homoj kiu ne estas garantiata kaj kiu, laŭ historio, foje ĉesis;*

*4) krei socian kaj ekonomian justecon estas tasko de la homo, moviĝanta en la medio de la Jesuaj preceptoj. Spiti tiujn preceptojn egalas riski noci ĉiujn rilatojn inter la homoj. Sume, ĉio dependas de la liberaj elektoj de homo, kiuj povas koincidi aŭ malkoincidi kun la evangeliaj principoj.*

Se tiel marŝas la aferoj, kiu rajtas diri, ke la promesoj de Kristo ne realiĝis? Ili realiĝas nur kiam la homaro amase kaj diversnivele akceptas la evangeliajn

preceptojn, kion kristanismo tutepraktike aŭspicias sed ne antaŭvidas, eĉ se iuj kristanaj pensuloj inklinas antaŭvidi la malon. La Dia Regno koincidas precipe kun la individua kaj publika akcepto pri Kristo.

Ankaŭ mi vidis, kaj vidigis, malkorektan legadon pri la eknaskiĝanta kristana komunumo: ne veras ke ĝin komponis sklavaro kaj malriĉularo kaj ne veras ke kiel alloga forto funkciis promesoj kaj esperoj de liberiĝo el katenoj kaj malriĉeco.

La preleganto tamen daŭrigis akuzi, disrakontante, intermiksite kun pardonpetoj kaj afablemaj ĝentilecoj pliakrigantaj fakte la akuzojn, la kristanajn ekleziojn pro ilia neinfluo aŭ senefika kaj nure memflata influo, se ne kontraŭinfluo, rilate la socialan justecon, kaj en tio trovis nemalkonsenton inter la publiko. Kiel ajn estus, li sukcesis, ĉe profanaj okuloj, argumenti la neprecon kaj efikon de la marksismaj tezoj por liberigi la homaron de opresado; kaj plifortikigis, evidente kaj cele, la certecon de samkulturanoj kiuj samkvante de la antagonistoj partoprenis aplaŭdante.

La diskutoj daŭris ankaŭ postprelege, kiam, fore de maldiskretaj uloj, oni agnoskis, ke niaj respondoj, eĉ se doktrine ekzaktaj, mankis je sufiĉa spineco parte pro troakceptema koncedo de afablaj spacoj al la elokventeco de la preleganto nehezitanta tordi katolikajn doktrinojn, parte pro doktrineksceso en la subporto de niaj vidpunktoj. Eble la invitita preleganto venis pli por, eĉ koste de tiom da ruzaĵoj, venki en ĉeesto de sia publiko ol por komuna klerigo. La konkludo saĝe konciziĝis: “*La franciskana katedrestro trejnu ankaŭ al tiu ĉi risko, enkalkulante senreviĝojn... turneblajn espereble al fruktodono*”.

Kaj la klerika studentaro, eble ne senvenĝeme, spegulos la intelektulon intelekteca ludanto.

Kaj pasis ankaŭ tiu ĉagreno de la votoprokrasto.

Januare 1951 superuloj akceptis mian votpromeson de obeo, malriĉeco kaj ĉasteco. Miaj parencoj loĝis tre foraj kaj tre senmonaj, kaj ankaŭ ne multe stimulitaj de mi, por veturi de Padova ĝis la Piemonta urbo. Mi, kvankam sola votpromesanto, estis festita: miaj kunuloj, eble por min kompensi de la pasinta mia plurfoja maltrafo de la votpromesa rendevuo, montris grandan koron konstatigante, interalie kaj spontane, ke sur miaj lipoj ekrevenis la rido. Fakte mi min sentis feliĉa kaj sekura, eble pli sekura ol feliĉa. En tiu feliĉo efikis ankaŭ la memcerteco, ke mia sorto, nun, dependas ne plu de aliuloj, nur de mi. Aktualis erara juĝo, sed ĝi tiam kontribuis por ne malstabiligi la ĝojojn kaj min normale rilatigi al la aliaj.

Kelkajn tagojn poste oni solenis ankaŭ la eniron inter klerikoj de nova dis-

ciplino-majstro. Dio scias kiom ĝoje mi lin festis ĉar tio signifis repreni vivi sen la krabaj enmiksaĵoj de edukpretekstaj ruzecoj praktikitaj de la antaŭa provosa majstro. Ĉu li indignafekte min traktis pro sia inklino aŭ ĉu li opiniis sian devon tiu konduto por reprovi min senvuali? Kial mi ĝin interpretis nur kiel malamikaĵo? Post miaj venontaj peripetioj lin al mi repacigos lia susurata eldiro: *"ke vokiĝo honeste fariĝas ankaŭ el memvokiĝo!".* La morto, kiu jam semis vakuon ankaŭ inter la iama superularo, ankoraŭ lasas lin vivi naŭdekjarulo. La tempopaso mildigas memoraĵojn. Hodiaŭ ni estas amikoj!

Denove ni reŝutiĝis en la studobjektojn de la trijara priteologia lernado, kun kulturaj promenoj kaj diskutaj kolokvoj: tiuj lastaj, tiujn monatojn, koncernis la rilaton inter scienco kaj teologio, kio ne povas ne unuaviciĝi se la problemsentemuloj estas studentoj dediĉataj al plentempa studo. Foje mi pensis, ke niaj klerikstudentejoj kuiras, kiam la altiro al la studo ne anstataŭiĝas per altiro al praktikaĵoj aŭ manfaritaĵoj, estontajn homojn de penso... malgraŭ mia, iom pozeca, malestimo al la intelektularo!

Sed antaŭ ol paroli pri niaj enmerĝiĝoj en la studojn, atentendu pri du pensvekaj okazaĵoj: frato Antono, do laŭnoma heredanto de famkonata kaj sankta kaj franciskana imitenda persono, jam solene votpromesinta, petis de la papo la dispenson de la votpromesoj kaj forlasis la grupon por hejmeniri (pli religiule, *mondeniri)* por ĉiam. Kvankam babilema kun ekscespintaĵoj kiuj foje lin ridindigis, pri motivoj de tiu ĉi decido nenion li malkaŝis lasante malsata nian scivolemon. Pli grave kaj pli dolore suferigis la eksiĝo de alia iama kunteologiano, kiu jam akceptis la sacerdotan ordinon du jarojn antaŭe. Abrupte venis la nova, ke li senfrokiĝe forlasis la konventon eskapante la obeon kaj, fakte, regresante ĝis sekulariga laikiĝo.

Gregoro li religiule nomiĝis: pri siaj pasintaj personaj travivitaĵoj li multe rakontis pro tio ke mem jam estis, tuj post la armistico, en Greklando kaptita kaj, kiel oficiro prizonulo, sendita al Germanujo dum longaj 19 monatoj ĉiam kun unu piedo en la tombo pro malsan- kaj labor-penoj. Lia enkonventiĝo fierigis la superularon opiniantan trovinti personon taŭgan al la direktado de fratulaj komunumoj kaj eventuale de malglataj farendaĵoj, en kiu al la pastra saĝo oni devas aldoni la administran kaj mastruman majstrecon. Al li la superuloj ne malfruis fidkomisii delikatajn taskojn, koncedante ampleksan agadliberon. Kvankam serioze senprofitema kaj zorgema, li tamen elspezis monon ne je sia dispono; por kovri la deficiton, kaŭzitan de propradecida plua konstruaĵo kun kaŝitaj perdoj, li pruntepreņis monon ĉe bankoj kaj privatuloj kiun ne plu kapablis redoni; la pruntedonantoj petis intervenon de la centraj superuloj

kiuj "falis el la nuboj": fakte Gregoro iam sukcesis ilin kvietigi montrante ke la malavaraj bonfarantoj jam mondonacis.

Unuaaspekte li trajtiĝis akuzebla je maskita moneldevigo pro ruzaj artifikoj por havigi al si la necesan rimedojn por ambicia verko. Frato Gregoro certe riproĉendis pro la senpermesa enŝuldiĝo, kaj pro konstruaĵo senutila, pliposte subkoste disvendita, ne pro manko de kompetenteco, kvankam endanĝerigita de ambicio estariĝi sur la aliaj. Estu kio estu, li por eviti honton ĉe la kunularo forfuĝis neniam konigante siajn sorton aŭ volon. Jarojn poste zumis voĉo, certigita vera, ke li edziĝis kaj dungiĝis ĉe banko kaj, ke neniam akceptus viziton aŭ iun ajn kontakton kun iamaj samideanoj aŭ kun superuloj por laŭkanonike jure reordigi sian novan pozicion. Eble li treniĝis de konsekvencoj de malhomeca kaptiteco, eble la multaj problemoj, kunvivaj kaj sentaj, sedimentis sur lian menson samtempe, eble eble... Kiom da paroladetoj, kiom da scivolo pri dekliniĝo de siaj devoj kiu en la venontaj jaroj paŭsiĝos centoj da fojoj!

Multeposte, tamen, ni ion eksciis pri liaj novaj vivelektoj. Pri unu el tiuj ni trovis, ke li havis bonan palaton sin diferencigante de aliaj similaj kazoj de pastroj edziĝantaj: nia ne nur amuza observado maldelikate flustris, ke tiuj ĉi, kiam decidas sin allasi al amkuniĝoj, alrigardas kaj ŝtormas sur la unuan virinon disponeblan, senkonsidere pri belo aŭ estetiko same kiel endemia malsatanto manĝaĉas sendistinge tion kio aspektas nutraĵo. Por difini tiujn ĉi ni uzis la Dantan parolturnon "*Pli ol honor' povis la malsato*" (Dia Komedio, Infero 33, 75). Nu patro Gregoro, oni diradis, en tio esceptis pro tio ke li elektis respektante ankaŭ la postulojn de la okuloj kaj de la kanonoj pri ina beleco. En tiuj admiro kaj laŭdo al li certe miksiĝis ankaŭ moko al aliaj, sed ĉu vere nur admiro kaj moko aŭ tiuj senpudoraj enrigardoj filtriĝas el envio kaj bedaŭro pri io flagiĝanta en subkonscio? Tia estontos ironia demando, ne nur preterpasa, de iuj ekspastriĝintoj edze vivantaj, eble eta venĝo kontraŭ neaprezantoj pri fajnecoj de iliaj virinoj!

Ankaŭ alia simila fakto, sed jure malpli grava, trafis mian duonkvietan travivon. La kleriko okupanta la ĉelon najbarantan kun la mia, iuvespere frapis, subbrue, mian pordon kaj min salutis rapide kaj singarde anoncante, ke li ekforlasas la franciskanan vivon.

"Kial? Vi antaŭnelonge solene votpromesis...".

Li, per serioza ŝerco, jene malembarasiĝis el la neevitebla demando:

*"Mi transrulis tutan mian amon super Dio, sed mi malkovris, ke amon mi en mi ne trovas, do mi nenion promesis... Mi petis dispenson de la papo ĝin*

*obtenante. Salutu por mi ĉiujn*". Kaj demetante la ŝercan tonon aldonis forpermesante: *"Mi malsagace estis lasanta aŭkcii mian estontecon. Enludiĝas la destino de mia vivo".* Li montris serenecon kaj feliĉon kiujn mi ne sciis, ĉu eksplicite envii aŭ ĉu klopodi ilin taksi lardumitaj.

Ni eksciis, poste, ke lia amo tute transruliĝis super lia kuzino kiun li edzinigis kun la benanta partopreno de nia patro majstro. Kaj el la Valtellina valo la paro adresis, per la sama persono, al ni salutojn.

Antaŭ tiuj salutoj ni diskutis, eble sciencofone, pri la du ammanieroj: la afekcia-senta aŭ sentema amo kaj la vola aŭ sensentema amo: konkludante, ke al Dio prefereblas aliri per la vola amo: afekciaj amsentoj al Dio eblas kaj helpas sed ili emas svagiĝi laŭ la lunŝanĝiĝoj, do al Dio oni donu la volan amon, kvankam Dio kapablas plenplenigi eĉ la koron. Oni prie revua dokumente pri Sanktuloj kiuj pasigis la tutan vivon ne spertante amikiĝajn sentojn pri Dio. Ili lin amis nur volnivele!

Niaj afekciaj amsentoj, kiam ili venas, povas spontane kaj medite trempiĝi en la homaj travivaĵo de Jesuo, vera homo. Nia korsentemeco havas, tial, personan objekton, kies travivaĵoj povas allogi ankaŭ sentnivele.

La ŝerceca esprimaro kaj la sinsekva elekto de tiu kunulo kirlis ankaŭ alian diskuton, nemalhaveblan, inter klerikoj: *Ĉu eblas, ke, por ni, virino-edzino kaj Dio kolizius? Ĉu decas kaj morale licas preferi la virinan amon al la Dia amo? Kial la du amobjektoj kontraŭas? Ĉu kontraŭstaro nepra aŭ ĉu erara fantazia ŝaŭmaĵo? En la kazo de nia eksklerikiĝinta kunulo tio sin montris okazinta, ĉu ne? Ĉu komparo respektema pri Dio?*

Fine tamen la problemo riveliĝis pli abstrakta ol konkreta ĉar la kontrasto malaperas se apenaŭ oni konsideras ke du estas la vojoj por alveni al Dio: tra geedziĝa amo aŭ pere de rezigno je tiu natura pleniĝo por sin plenigi je alia supera amo: temas pri du vojoj en kiuj la konkurentoj estas du statbonaĵoj, kies kaŭzo kaj celo estas ĉiukaze Dio. Nia ekskunulo ne anstataŭigis Dion per virino, nur elektis unu el la du alternativoj por alveni tutkore al Dio, kiu restas, tial, amcelo nekomparebla kun la aliaj.

Tiuj eventoj ne ĝenis la normalan sinsekvon de la programitaj okazontaĵoj. La unua el tiuj estis la lernojara finiĝo. Ĝi finiĝis per grava nekutima tasko: montri al si kaj al aliaj kiel la lernejo nin grundigi por la evangelia anonco, krom per la studoj, ankaŭ profitante de paroladoj kaj kontaktoj kun diverssituaciaj personoj por plistudi jen iliajn reagojn jen nian psikologian adaptiĝon en kadro de la katolika ortodoksio. Estis kvazaŭ antaŭplonĝo en la estonta realo.

En urbeto najbara al la metropolo, kie loĝantoj lante pasadis el agrikulturo

al okupiĝo ĉe industrio, dek franciskanaj pastroj engaĝiĝis misie prediki al la popolo en preĝejoj, kie oni estis invitita viziti por aŭskulti iliajn meditaĵojn. Tasko de la klerikoj, nepovantaj laŭ la kanona leĝo prediki aŭ konfespreni aŭ mescelebri, konsistis el la vizito al familioj aŭ grupoj da familioj por dialogi kun ili por ke ni konu iliajn malfacilaĵojn rilate la kredon kaj provu pliriĉiĝi, per la praktiko, je konvinkigaj respondoj. La strukturo de la dialogoj, laŭ la planintencoj, devis eksciti la intervenon de la fideluloj por ke ili rakontu pri sia kredago kaj kion ili atendas kaj ricevas de kristanismo, aŭ kiel ili interpretas la ekleziajn pastoralajn agojn.

La kontakto kun homoj, post duonĝenaj komenciĝoj, tiom min kontentigis, ke refreŝiĝis kaj pufiĝis, en mia volo, la flanko inkliniĝanta al la religiula vokiĝo kaj akceptado de la evangeliaj konsiloj. Ion da kunpuŝiĝo kun la realo mi trovis kiam mi komparis la demandojn de la vizititoj kaj la temojn kaj pritraktmanieron de la enpreĝejaj predikantoj: mi kredis malkovri en tiuj ĉi ion refluan, ion eksterproblemajn. En postaj grupaj rondtable koordinaj raportoj kun la samaj predikantoj mi provis ekspliki tion resumante jene: jam ankaŭ popolanoj havas ekan novan kritikan emon rilate la instruojn ricevitajn de la predikoj: fidelulflanko nur aspekte amas emfazaĵojn aŭ baŭmaĵojn je kiuj ofte nutriĝas la ordinaraj predikoj, dum iuj hagiografiaĵoj indulgas al anedoktaroj ne pruvitaj aŭ malpli probablaj laŭ la onia sento: tiuj ĉi similas la mezepokajn *exemplaria* (ekzemplària = kolektaĵoj de ekzemplaj edifaĵoj, tro sendenpende de ilia historia okazinteco). Prediko pli ol movi la animojn devus plialtniveligi, en tiu epoko de distraĵoj kaj misinformoj, lajn pri la konsisto de la fundamentoj de kristanismo.

*"Kelkfoje,* mi kuraĝis balbute difini, *predikanto aspektas kiel figuro de sur afiŝo aŭ kiel heroo de antikvaj tempoj".* Kaj alia kleriko aldonis: *"Foje ŝajnas, ke, povra kaj en argumentoj kaj en argumentado, la prediko ĵongletas per krietoj kaj teatraj gestoj. Ili impresas apenaŭ rudimente, preskaŭ kriple. Mi antaŭvidas, ke inter la kaŭzoj de malĉeestemo al predikoj, ĉi tio pli kaj pli influos".* Sentencoj sennuancaj kaj iom arogantecaj kiuj tamen ne ŝokis la predikantojn jam, eble, pli mirigitaj ol ŝokitaj pro nearda popola partopreno.

Repreninte mian, sendube aplombecan, analizon, mi finis per jena konkludo: *"Foje la predikantoj preparas, senvole certe, la vojojn al la duboj pri la kredo, ĉar personoj etendas, per instinkta logiko, la nekredeblecon de viaj rakontaĵoj al la kredo mem. La dubo restas kaŝita por misevolui kaj strasige reaperi en oportuna tempo".*

Miaj observoj obtenis konsenton, almenaŭ ŝajnan, sed mi ne vidis, en tiuj

predikantoj, en la venontaj jaroj, aliiĝojn notindajn. Anstataŭe, de kelkaflanke mi estis klasita inter la "malkuraĝige senpardonaj logikuloj".

Plie, plejgrave, mi rimarkis, ke la argumentadoj de la prelegantoj, depruntitaj de la inerta tradicio, mankis je percepto pri la veraj kredaj malfacilaĵoj de fideluloj. Mi ankoraŭ havas nekaŝeblajn memoraĵojn pri la miaj de la kolegiaj jaroj, kiam la duboj defiladis sur unu strato kaj la respondoj sur alia, validaj, eble, por aliaj tempoj. Tiamaj predikoj pasadis de miraklo al miraklo en epoko kiu postulas pli da demonstro. Demonstro pri ebleco kaj historieco de la miraklo mem.

Min savis el la suspekto de aroganteco instrui naĝon al maristoj la, antaŭe duonaj, poste plenaj, konsentoj de miaj kunvizitantoj, kvankam pli prudentaj samjuĝemuloj.

Pri la afero rilate la miraklojn oni montris miron kaj intereson. Kaj pri tiuj oportunas nun paroli, sed post priskribo de mia embaraso antaŭ esprimoj kaj sintenoj de niaj vizitatoj. En hejmo, ĉe kiu kunvenis ankaŭ diversaj najbaroj, rimarkindas spleneca etoso: tuj ni kaptintis de la plej grava el familianoj, ke ili ĉiuj estas revenantaj el *"elĵeti homon. Ni ĵetis lin al malkomponiĝo, al la malhelo".*

Kial tia "elĵeti"?

"*Per terpugno kun senutila pieco, ni tute perdigis porĉiam homon, fraton!"*. Ĉu dubo pri la transtera pluvivo aŭ simplisma rifuzo transestiĝi en alian ekzistejon? Ĉu malplaĉo pri la perdo de frato aŭ malplaĉo pri la transtomba destino? Ĉu definitiva nuligo aŭ protesto pro transvivo atingata nur per la disiganta morto aŭ pro ne konvinkiga respondo de la eklezio? Necesus pli atenta esploro pri tia situacio de la homa animo**.** Se almenaŭ en la antikva Biblio estus sentita tiu problemo. Sed pri ĝi tute malestas spuroj: la biblia homo aspekte rezonadis kvazaŭ la transtempa vivo ne estas espero aŭ deziro aŭ traserĉado, eĉ la klasika obĵetanto al Dio, la edifa bibliromana Ijob, ŝajnas ne protesti kontraŭ la morto aŭ peti pravigojn pri ĝia furoro. Al li ŝajnas relative kontentige ke tiu ĉi vivo prosperu kaj ke la adversuloj estu punataj.

Kompreninte la krudan metaforon (elĵeti homon), la ĉeestantoj lasis, ke la konversacio ektemis pri la morto, pri la kristana mortokonceptado. Dum ĝi, kaj pli dum posta analizo, mi konstatis la nekapablon, malgraŭ klopodoj, trovi la oportunajn vortojn, la taŭgan tonon, la ĝustajn emocistatojn por komuniki al la grupo la primortan kristanan vidpunkton: io tro afekcia malhelpis, ke la vortoj alvenu al la fidelula menso sen perturbi kaj bremsi la spontanan naturecon de la komuniko. La escepteco de la komunikaĵo (la resurekto) igas iom

stranga la anoncanton. Poste mi konkludis, ke eĉ la certigaj kaj serenigaj Kristaj vortoj ne breĉas en la animon kiam tiu ĉi estas tro tratruata de, eĉ subkonsciigitaj, afekciaj distaŭzaĵoj: eĉ la kristana anonco postulas animon kaj menson liberaj!

Tiupunkte eliris el mi la kuraĝo kun la vervo nutrita je konsideroj farĉitaj per psikologiaĵoj. "Estas du manieroj reveni antaŭ la kreinto per morto: morti senkonscie kaj do sensufere, kaj morti konscie, eble sufere. Oni deziru la utilan laŭ la stato de sia animo, la plej taŭgan al plia alproksimiĝo al Dio". Kaj preterportata de mia emo enmemiĝi kvazaŭ por ekzempli pli efike, mi aldonis: *"Por mi, mi petas de Dio tiun pli taŭgan al mia repacigo kun Li, sendepende de sufero".* Fulme pasis tra mi ilia admiro kun mia momenta memkontentiĝo. Estus la piedestalo de vana gloro, se al tiu ĉi cedus mia inklino. Sed mi estis vere sincera kaj, subsube, petanta al Dio la forton por daŭre tion voli!

Preterlasigis tiun tonon de mistikulo la paralela sekva komunsenta finaĵo, spontane ellaborita de iu virina voĉo: *"oni povas ne murmuradi kontraŭ la doloroj kaŭzitaj de morto, sed ne povas preterforgesi la postmortan sorton de la forpasanto kiam li ne havis tempon nek mensajn fortojn por ĝin pripensi*". Klara eĥo de kristana prizorgo asisti ne nur korpe kaj psikologie la mortantojn, sed ĉefe spirite, tio estas meti ilin en eblon sin remeti en la ordon de siaj konvinkoj rilate Dion. Male ol tio, hodiaŭ per frape naiva humaneco oni elektas akompani al morto malkonsciigante la mortanton. Tiel fariĝas neperceptata la krista liberigo el timego de morto.

Kune, ni kun vizititoj kreis tiun rezonadkonkludon: se ne ekzistus transvivo kun resurekto, tio estas se la morto estus la lasta kaj fina stadio de la homa ekzistado, Dio estus nekomprenebla, surbaze ke li sin montrus senlime saĝa kreinte la homon, kaj samtempe senlime mallerta por savi ĉion, kion li kreis.

El taŭgeco de l' kristanismo respondi al iliaj postuloj, vizititoj foje glitis al esprimo de bedaŭroj rilate la eklezion nemalfoje taksatan pli agentejon por bonstatigo ol renkontiĝejon kun Dio. Nemalofte, krome, ekestis deziro, ke kristanismo estu diversa, malpli misterplena, kvazaŭ tio dependus de la homa volo. Ĝuste prie mi rimarkis, ke la kritiko venis pli intensa el personoj malpli partoprenantaj en la eklezia vivo.

Mi renkontis ankaŭ, en du nemalkleraj personoj, subkuŝantan volon aŭ deziron ke kristanismo, sendepende de ĝiaj vereco aŭ racia/historia konsisto, estu forigata aŭ humiligata kvazaŭ lukto kontraŭ ĝi nenion povus ol nobligi. El kio tiu sinteno kontraŭkristanisma? malgraŭ subokulaj senfinaj, el kristana medio, ekzemploj de senprofitcelemo kaj altruismo al la proksimuloj en la

tuta mondo? Restis mistero ĉe miaj konsideroj ĉar tiu fenomeno ŝajnas okazi nur ĉe la kristana medio. Laŭ iuj el ni, tiu kontraŭkristana tendenco fontas pli el malakcepto de la firmiteco kaj absoluteco de la kristanaj dogmoj ol el malaprobenda konduto de kristanoj.

Trafe maltrafe eliris ankaŭ jena eta rimarko: ĉar ni agis duope aŭ plurope, miaj kunvizitantoj flustris, eble sen kritika intenco, ke la parolo el miaj lipoj malofte spontane pasas al la lipoj de kunuloj. La aliaj, laŭ mia kritikata emo okupi la tutan scenon, nur ĉefhelpu!

La kutima akademio eventis ĉe la kvara priteologia finlernojaro. Prepare al tio ni povis dediĉi oportunan tempon. Kombiniĝis fakte kio alpaŝadis: la romaj superuloj dekretis, ke la teologia jarkvaro de nun fariĝu jarkvino kun novaj studotaj objektoj aŭ plilarĝiĝo de aliaj jam studitaj. Tio al mi ne malplaĉis.

Tiun ĉi fojon la *akademio* esprimu siajn enhavojn ne prelege sed dialoge aŭ surscenigante reciprokajn intervjuojn. Estis imagita rondtablo en montara konvento ĉirkaŭ brulanta kameneto kun ekstere vento kaj neĝo. La publiko konsistis el la studentaro kun profesoroj kaj laikaj eruditoj, persone invititaj kiuj alkuris multnombre.

La temo priparolenda estis tre tikla kaj atentokapta ene de la publiko: *miraklo*. Jen la vidpunktoj, aspekte tiam novigaj, pri kiuj mi estis la precipa, foje kaŝita, referanto, kiel tretanto de propra grundo, kun plena komuna akcepto pro tio ke mi jam estis taskita pretigi kaj koherigi la dialogojn laŭ drameca formo kaj trovi rolantojn de apartaj historiaj personuloj aŭ tiufakaj pensuloj, ĉi tie krokizitaj pli per konceptoj ol per kulisaj rolludoj.

*1) Malfacilas, verŝajne neeblas, unusenca difino pri miraklo. La malpli neperfekta, laŭ mi, limiĝas al tio: interveno de Dio favore al l' homo, jen en aferoj eblaj ankaŭ al la homaj aŭ naturaj potencivoj, jen en aferoj superaj al la naturaj fortoj. Kaj ĉio tio en kunteksto de tujeco kaj surmomenteco.*

*2) La kreiĝo kaj disvolviĝo de la prisciencaj teorioj jam alportas al la akcepto, ke jam ne eblas distingi kion kapablas aŭ ne kapablas plenumi la naturaj fortoj, nome ni ne povas pruvi ĉu iu ajn fenomeno estas laŭnatura aŭ eksternatura. Nune pliekzaktas la scienca metodo kaj la interpretoj pri la sciencaj malkovroj kiuj almetas scienculojn antaŭ novaj problemoj.*

*3) Nur la eklezio havas kriteriojn por dekreti ĉu iu okazintaĵo rajtas enkadriĝi en la kategorio de miraklo, sendepende de ĝia natureco aŭ supernatureco. Kaj tiu kiu havas la saman metron de la kredo povas konvinkiĝi, ke kon-*

*krete okazis miraklo.*

*4) La miraklo, tial, ne povas fariĝi argumento sufiĉa por alvenigi al la kredo. Ĝi povas esti maksimume indico, atentvekilo kaj orientilo al supernaturo kaj al Dio.*

Al tiuj miaj, sed partoprenataj de preskaŭ ĉiuj kunkunantoj, principoj fokusiĝis la kvazaŭteatreca dialogo, en kiu ĉiu dialoganto ludis, laŭvice, sian konkludon ĉi-sube krokizitan, respondante pri tikligitaj demandoj. Katolika principo sendiskute antaŭmetita estas, ke inter miraklo kaj sciencaj akiraĵoj ne povas ekzisti malakordo, kaj, ke se ĝuste tio ĉi konstatiĝas, unu el la du, aŭ ambaŭ, protagonistoj (scienculo aŭ teologo) devas sin kritiki kaj rekontrole relaŭis siajn sciajn trairojn.

Pliaj klarigoj ekestis el la laŭvica resuma respondaro de la rolula teamo al la plej diversa demandaro de la *akademianoj* rolantaj publikon. Intervenis ankaŭ ne oficialaj scivolemuloj, el kies, eventuale embarasigaj, demandoj oni sciis esti ŝirmata de la intervenoj de la taskitoj "stiri" la demandantojn kaj malhelpi, eĉ el postkuliso aŭ inter la publiko, ke diskutaj disfluiĝoj rompu la konsekvencan vicon laŭorde jam difinitan. Venos la tempo kiu ridigos nin ĉe ni pro tiaj malpli *akademiaj* antaŭgardoj, kiuj tamen nur aspekte malvalorigas niajn argumentadojn.

(Kursivoj demandas, malkursivoj respondas dum la numerado indikas la diversajn starigantojn de demandoj aŭ respondoj. Mankantaj numeroj indikas ke la demando elbuŝiĝis el invitita laiko).

*1. Ĉu eblas ilustri ĉion per ekzemplo? Ni konsideru la tujan vidakiron en persono kun la optika nervo atrofa. Se nur la eklezio posedas la kriteriojn por deklari laŭvera miraklon, tiu ĉi fariĝas nekonebla al iu ajn lokiĝanta ekster la kredo, eĉ al persono miraklita. Prefereblas, klare allasi, ke miraklo ne estas interveno de libera aganto, de libera kaŭzo, en la funkciado de naturaj leĝoj: miraklo estas en la natura leĝo mem!*

2a. Tiu homo, la bonfarito, povas nur esti frapita de la eksterordinareco de la okazintaĵo kaj de nebremsebla altiro al dankemo al Dio, akompanata de profunda konvinko pri la mirakleco de tio al li okazinta. Sed neniam li povos sciencece pruvi, ke Dio, preternature, intervenis en la afero, ĝuste surbaze de tio, ke ni penetras ĉiujn potencivojn de la naturaj fortoj nur vage.

*3. Tiam la miraklo iĝas senutila ĉar neniam ĝi liveros konvinkigpovan argumenton favoran al la religio.*

1a. Certe, ĝi povas nur favori kaj fortikigi eventualajn aliajn argumentojn. Ĝi povas helpi tiun kiu jam inklinas al la kredo. Al la kredo per aliaj vojoj kaj risortoj.

*4. Sed tio kontrastas kun la teologilernejaj tekstoj liverantaj, sendube, la koniĝeblecon de la miraklo.*

1a. Vere. Tiuj libroj estis kompilitaj kaj presitaj kiam la plej influaj apartenantoj de scienca aŭ kultura mondo, precipe la senkreduloj aŭ skeptikuloj, superŝutiĝis je la konvinko, ke la konataj fizikaj leĝoj estus la preskaŭdefinitiva priskriba informo pri la universo kaj konsekvencigantaj distingon de sfero de eblo disde sfero de neeblo. En tiu etoso, miraklo festis: se ĝi efektiviĝas, oni ĝin povas permane tuŝi! Sed hodiaŭ la etoso rilate la sciencon ŝanĝiĝis: la koncepto mem de naturscienca leĝo kriziĝis: la distanco inter eblo kaj neeblo restriktiĝis. Dum la periodo de la klasika fiziko, malakordo povis naskiĝi rilate la realiĝon aŭ nerealiĝon de la miraklaĵo, nun malpli interesas la ekzisto pri ĝi tial ke, ĉiukaze, ne eblas scii ion certan pri ĝia obskura kaŭzo ĉar la limoj, rilate iun ajn eventon, inter naturo kaj nenaturo restas ne konataj kaj eble nekoneblaj.

*5. Tiam, en tiu ĉi nova epoko, la Eklezio dekutimiĝas kaj seniĝas de apogilo je granda valoro ĉar la sciencaj kriterioj por certigi pri mirakleco jam perdas konvinkigan efikon. Eĉ sen emo al skeptiko, oni vidas la senutilecon de la miraklo. Kial do Dio ĝin farus kaj kial ni penus por certiĝi pri ĝia okaziĝo? Ni ekzerciĝas sur la nenio.*

3a. Scienco povas nur diri ĉu hodiaŭ por hodiaŭ oni jam senvualigis ĉiujn meĥanismojn per kiuj la naturo povus fasoni la fenomenon opiniatan miraklon. Eĉ, ekstreme pensite, la resurekton mem oni ne rajtas ekskludi el tio eblo. Scienco suspektigas, eklezio decidas.

*4. Kaj se la scienco, kun siaj ekkonoj kaj scioj, implicas, ke iu fenomeno, opiniata mirakla, ne estas science eksplikebla ĝis nun, la Eklezio devas resti necerta pri la mirakleco de tiu fenomeno ĉar morgaŭ oni povus malkovri naturan eksplikon kaj reprodukti la samnaturan fenomenon ĝis nun taksata miraklo.*

3a. Vere, tiel estas! La Eklezio tamen havas aliajn vojojn por koni la eventualan miraklecon de iu fenomeno, aldone de la aktuala, eble nur ŝajna, eksternatureco de tiu ĉi lasta. Miraklo, kiel jam dirite, estas ĉiu dia interveno kontekste de religio favore al homo kiu humile petegas de Dio pri io.

*2. Tiam ankaŭ evento, faro-ago, ŝajne iom translime de normaleco, sed sci-*

*ence eksplikebla, povas esti agnoskata de la Eklezio kiel miraklo.*

1a. Certe, sed nur se kunkretiĝus la cirkonstancoj *religiaj* kiujn nur Eklezio povas konkrete difini. Certe, en tiu ĉi kazo la miraklo povas servi kiel argumento pruvanta la fundamenton de la kredo nur ĉe la kredantoj je tiuj religiaj kriterioj.

*2. Konsekve, kiam la scienco inklinas al pormomenta neeksplikeco de la koncerna fenomeno, la miraklo fariĝas malpli utila por nekredanto.*

3a. El si mem, certe.

*6. Sed ĉi tio kontraŭas la tradician instruon. Mi diverskontakte kun ekleziuloj...*

7a. Estas krizigitaj nur kelkaj skolaj instruaĵoj, ne la kredo. Hodiaŭ frontas kontraŭ nin la teorio de la principo de nedeterminismo, de Heisemberg specimene, kun la duboj, pravaj aŭ nepravaj, rilate la dimension de la kognopovoj de nia homa inteligento. Se verus, ke Dio "ne ŝakludas", kiel rimarkigite de Albert Einstein, verus ankaŭ, ke la determinisma klasika fizikismo de Galilejo kaj Newton riskas nin senigi je libera arbitro. En la aktuala fizikscienco ŝajnas, ke vere Dio ŝakludas. Eĉ pri historiografio oni devas superi iun determinismon kiu transigas en socian determinismon. Ankaŭ en la interpretado de la psikaj influoj en la homaj liberelektoj.

*7. Tamen por ni katolikoj, racio havas sufiĉajn potencivojn. Ni pledas por la homa racio. Ni diras, ke la homa racio kapablas, ekzemple, racie ekkoni la ekziston de Dio.*

1a. Tute vere. Sed lastafine ni interrilatas kun homoj havantaj tian penskonceptadon. Por pruvi, ke Dio ekzistas tro redukte servas la sciencoj ĉar la taŭgaj pruvoj situas en la sfero de filozofiaj sciencoj; la neekzakteco de la sciencoj, same kiel la nuna tendenco malaltigi la sciencojn je nivelo de probableco, ne nocas la racian potencon. En la lastaj jardekoj alrigardiĝis stranga afero: hieraŭ el la plej granda fido je la scienco ĝis sciencismo, laŭ kiu la sciencaj ekkonoj estus ja ne nur funkciantaj priskriboj pri la realo ebligantaj prognozojn sed ankaŭ modeloj de la vero mem ĉar la scienco estus la unika kaj sufiĉa kaj neerariga vojo al la tuta vero, hodiaŭ oni dubas pri ekzakteco kaj legitimeco de ĉiuspeca scienca leĝo, eĉ en "malmolaj" sciencoj. Kaj en tian movon kelkaj pretendas treni eĉ la ĝeneralan kapablon de la homaj menso kaj racio.

Marĝene, tamen, mi volas konfidi ion multe personan ĉirilate. Pluraj serĉas

la kredon je Dio kaj racie ili serĉas antaŭ ĉio ĉiujn motivojn kaj pruvojn rajtigantajn tiun salton. Al mi, en la fazo de priserĉo, okazis observi, postevente, kiel en tia ago ŝanĝiĝas la rilato inter kaŭzo kaj rezulto, tio estas la salto en la kredon prezentiĝas, foje, investita antaŭ la eksplicita sinturno al la raciaj preamboloj kaj puŝas poste trovi la raciajn motivojn kiuj povus pravigi la salton; entute, ŝajnas ke okazas anticipe la efiko kaj poste la kaŭzo. Entute, se la kredago postulas sian pravigon, ĝi povas ekvivi sendepende de ĉiu motiviĝo.

*8. Tiu ĉi difino de miraklo kaj ĝia koniĝebleco akordiĝas kun la nova etoso inter sciencistoj, laŭ kiuj ne ĉiam la leĝoj de la fiziko estas aplikeblaj al la tuta universo, kie iuj fenomenoj okazas pli laŭ la ritmoj de probableco ol laŭ la determinismaj kanaloj.*

6a. Vere iuj scienculoj kaj sciencamantoj parolas pri malkongrueco, rilate la fizikajn leĝojn, inter la mondo de makrokosmo kaj tiu de mikrokosmo. Hodiaŭ matematikistoj kaj fizikistoj scias, ke la kompleksa naturo kaj ĝia subatoma porcio ne ebligas determinisman priskribon, eble pro ne sufiĉa homa esplorpovo aŭ eble pro “kapriceco” de la naturo. Kio ajn estu pri tiu teorio, vere nia koncepto pri la miraklo kaj ĝia koniĝebleco respektas la novan etoson spireblan inter scienculoj inter kiuj hodiaŭ multas la kredantoj malkiel en la du pasintaj jarcentoj.

*8. Sume, la nova scienca teoriumado endanĝerigas fundamentojn de la religio. Kiun juĝon, antaŭ tiu nova teoriumarto, havas scienculoj je kristana orientiĝo?*

1a. Ne endanĝerigas, sed helpas pliklare distingi. Rilate scienculojn je kristana pensmaniero iliaj juĝoj malsamas. Sed, sendepende de la objektiveco aŭ objektivecmanko de la aktualaj sciencteorimadoj, la Eklezio devas paroli tiun ĉi lingvaĵon kaj kapabliĝi respondi al novaj seriozaj ne senkonsekvencaj demandoj. Ne nepre divorcaj staru scienco kaj religio.

*6 Sume, ankaŭ pri miraklo oni devas sinteni same kiel pri Dio: oni blinde kredu je kio nevidebla.*

6a. Ankaŭ viaj pensoj ne videblas, sed laŭ vi ili ekzistas. Aŭ ĉu vi dubas pri ili pro la motivo, ke pri ilia esteco ni havas nur unu pruvon, t. e. via deklaro? Elstaras aliaj faktoj kaj argumentadoj inklinigantaj al la kredo: pri kiuj ne nun.

Se rezonadi pri *blinde kredi aŭ kredi eĉ kiam la racio ne komprenas,* tio referencas al iuj objektoj de la kredo aŭ de la revelacio; ne rilatas al la motivoj

aŭ pruvoj sur kiuj sin fondas la racio ĝuste por kredi. Unu afero estas pruvi ke Dio parolis, alia afero estas penetri ĝisfunde la enhavojn de lia mesaĝo!

*1. Marĝene de ĉio, kial niaj preĝoj restas neelaŭditaj se Dio servopretas agi miraklece je nia avantaĝo, laŭ ekleziecaj instruoj?*

1a. Nur Dio scias la bezonojn de la homo rilate ties finan savon. Cetere laŭ Sankta Paŭlo ni ne eĉ scias pri kio vere bona peti Dion. Ni devas peti precipe tion je kio laŭ Li ni bezonas.

*3. Kaj se la miraklo estus frukto de sugestiiĝo aŭ de deziro sperti ion diversan?*

2a. Tio kadras la plej antikvan suspekton. Apenaŭ tiu suspekto okulumas, la esplorendan fenomenon oni forbalaas: laŭ jarcentoj la Eklezio akumulis spertojn sufiĉajn por trakribi eĉ tion. Ĉiukaze la baraĵo devas esti superita ĉe scienculoj, se oni volas, ke la prikonsiderita, eble *mirakleca,* okazintaĵo fariĝu digna je publika rekono en eklezio.

El la postpodiaj diskutoj, kiam oni cedis la scenejon ankaŭ al pacience retenema publiko por preskaŭ pluaj prelegaj eksplikaĵoj, rezultis, ke la deirpunktoj de tiuj tezoj taksiĝis nenovaj ĉe iuj, novaĵvehiklantaj ĉe aliaj, danĝeraj aŭ priridindaj ĉe kelkaj; fine, laŭŝajne, la komentoj gradiĝis de la samopiniiĝo ĝis la nesilenta dubstato. Ĉiukaze ili, estontece, ĉionkonsidere prave tendencis pivoti ĉirkaŭ aliaj pensadoj pri miraklo. Se la akademio okazus niajn tagojn certe oni eluzus ankaŭ novajn konceptojn de novaj prifizikaj teorioj, kiel la *kaŝita* materio kaj *kaŝita* energio

Ie kaj tie oni petis bibliografiajn subtenojn, kiujn ni plenkomplete ne havis ĉar la tezoj estis, laŭ nia sento, frukto de nia, eble precipe mia, rezonado plejparte fundiĝinta sur derivaĵoj de antaŭaj studaj esploroj. Se rikolti laŭrojn estintus nia celo, ĉikaze mi konstatintus kiom da peno estas devigataj elspezi la ambiciuloj kaj eĉ la simplaj dialogantoj kiam temas pri plurtavolaj konceptaj aferoj.

La plej dezirata komento, tiu de la kapskuanta studdojeno, sibile retuŝis tiel: *"Vi prelegis kun la kandidanimeco de tiu kiu, enamiĝinte al siaj tezoj, ardas pro la deziro ilin anonci plej eble rapide kvazaŭ por patentigi sian inventaĵon"*. Ankaŭ jeno gravuriĝis en memoro: "*Vi artifikas problemojn por vin plezurigi per la solvo kaj sciencigas senutile"*.

Alia komento de mia spiritgvidanto: *"Ĉu vi certas, ke via kvazaŭa disertacio ne estis ruze muntita por ke vi eminentiĝu? Ĉu vi emas pli prestiĝi antaŭ*

*Dio ol antaŭ homoj?”.* Sed tio ne estis kritiko, sed asketa invito agi por Dio, ne por propra gloro. Ne mankis kiu reliefigis, ke eventuala dua prezentado de tiu *akademiaĵo* devos enteni ankaŭ sfereton de nuanco kaj senpersoneciĝa pliekvilibro. Sed la dua stagnis en la deziroj kaj tial mi neglektis okazon pli insisti pri niaj opinioj kaj *nuance* rezonadi.

Post iuj tagoj la atentoj kaj babilaĵoj ekpasiis pri alia novaĵo, pri kiu ĵus konfliktis opinioj en ĵurnaloj.

Iujn jarojn antaŭ la nun rakontenda evento, la Sanktaseĝaj aŭtoritatuloj alŝutis dekreton kondamnantan - tio estis jam dirita sed nun pli eksplikendas - kiel eksterekleziajn, do ekskomunikitajn, la katolikojn militantajn en marksistaj partioj. Oni emis puni, certe, nur la sciantajn aliĝantojn al la kontraŭreligiaj marksismaj tezoj. Multaj elinter ni juĝis tiun dekreton senutila, se ne malutila, ĉar la sciantoj certe jam rezignis la kredon dum la nesciantoj akceptis nur la priekonomiajn soci-justecajn promesojn de la kompartioj. Ĉiel ajn, tiu dekreto kontribuis, laŭ iuj, malprave plikredigi, ke la Eklezio kondamnas komunismajn sistemojn pro tio ke mem subtenus kaj apogus kapitalismon. Kreiĝis subsube etoso konfuza oscilanta inter entuziasma aprobo kaj aperta malaprobo ĉe iuj. Sed pri justeco de la kondamno neniu dubis inter ni. En tia opinia kunteksto okazis jeno:

Jen klera pastra fratulo, nesenfama ĵurnalisto kaj oratoreca prelegisto, ekpredikis el pupitroj kaj ekverkis en ĵurnaloj, kie li estis pale dorlotita, aŭ perintervjue, ke la eklezianoj devus lobiumi la kompartiajn politikajn programojn. Tuj superuloj senigis lin je rajtigilo prediki aŭ publice publikigi pri tiu temo. Li unuakomence obeis kaj akceptis retiriĝi en ermitan konventon por reprikonsideri sian doktrinan pozicion. Estis ĝuste en tiu lia rekonsidercela periodo, ke la tuta klerikaro fericele gastiĝis ĝuste en tiu ermitejo. Ne povis certe manki okazo paroli kaj aŭskulti, des pli ĉar mi ĉe table manĝis kubute kun li, lian penson malgraŭ ke dekomence nia edukresponsulo timis, ke nia, eĉ okaze renovigita, instruiteco inokuliĝus je lia pensorientiĝo.

En pluva tago, malebliganta la kutiman promenadon laŭmontetare, estis al la klerikaro permesite konversacii kun li ĝuste pri tiuj tezoj tiom diverĝantaj disde oniaj konvinkoj de la eklezianoj.

Per verva sed trankvila sinprezento, el kio senteblis liaj kutimaj agemo kaj decidemo, kaj samtempe spontane enirigante aŭskultantaron en empation kun li kaj elradiante memcertecon, kun maskla *brodkasteca* tono envoĉiĝanta en la cititajn personojn laŭ ties pensaj karakterizaĵoj, profunda kaj fidela al vortoj prononcataj, iom vualeciĝinta kaj malglatumiĝanta pro ne malmultaj cigare-

doj, kun la flankkapaj haroj disflugantaj *liberpensule* (laŭ ne plibone klarigita esprimo en la grupo) sub tonsuro natura pro ronde kapcentra kalveco, li sin montris asertanto de la ĉi sube registritaj tezoj, de ni jam konitaj kaj kontraŭargumentitaj kaj dumstude kaj okaze de interbabila rafinado de nia propaganda aktivado. Li el senimpeta komenco malrapide akceliĝis al vere ekscita pledo, bildige uzante freŝajn metaforojn kaptantajn admiron kaj konsenton, ĝuste laŭ nia nekaŝita prefero ke tuj en li malkovriĝu pli ol la sentencumanto la politika verdiktanto: vere, liaj sentencoj tiel ekkonturiĝis kiam lia incitiĝo fariĝis ekscitiĝo: ĝuste tiam li haltadis momentetojn por admiri kaj gustumi la konsentajn efektojn el la publiko. Kiam eblis, inter siaj jam torentaj vortaj elverŝadoj, bonvenigi paŭzojn, tiel evoluiĝis la konversacio:

1) *Mi estis, li reeĥis, dum pluraj jaroj ĉe la mizero de la popolanoj, kaj konvinkiĝis post longaj pripensadoj, ke tiu ekstrema malriĉeco estas altrudita de ĉioinvadanta kapitalismo, certe ne de komunismo. La eklezio bedaŭrinde tion ankoraŭ ne komprenis*.

Neniu obĵetis ĉar tio juĝiĝis opinio libera, kvankam la ekleziaj pensuloj neniam laŭdis aŭ aprobis tian kapitalismon: estas laŭdata nur la libera entreprenemo kaj la industria iniciatemo kun libera merkato enkadre, tamen, de reguloj strikte aplikataj ŝtate kaj interŝtate. Oni bezonas krei, laŭsugeste de la socialaj papaj enciklikoj, strukturojn kontrolantajn kaj devontigantajn kaj rigore obeigatajn.

2) *Ni povas facile, tre facile, spikumi inter komunismo kaj marksismo: oni povas forpuŝi tiun ĉi por akcepti tiun. Eĉ se la estroj de la kompartioj marksismus, ili neniam sukcesus elradikigi el la animo de la popolo la kredon je Dio kaj je Kristo laŭ kristana tradicio same kiel okazas en la komunistaj landoj.*

Iuj el ni, kun komuna aprobo, obĵetis, ke mankas pruvoj, ke la konstanta ateismiga plurforma instruado, insista en kulturaj kaj komunikilaj esprimoj kaj en la lernejoj kaj en la armeo kaj en centroj de penso kaj en universitatoj ktp, finfine ne sukcesos krei kontraŭreligian sistemon de pensado, kiu intertempe senigas eklezion je libero kaj je rimedoj por transdoni la evangelian mesaĝon. Male, historiaj spertoj, eĉ se en malsamaj kuntekstoj, persvadigas pri la kontraŭo. Komunismo reale detruas ankaŭ la sociajn strukturojn de la eklezio. Ĉiukaze ne licas meti en danĝeron la kredon de multaj pro iu distingo kies realiĝo eventuale ekefikos tromalfrue kiam la kredo mem estos, ĉe multaj, jam detruita pro ateismiga enkulturado. Pri tio ni bedaŭrinde havas terurajn kaj

instruajn ekzemplojn. Fine certas, ke, laŭ marksismo, religio, per ĝiaj transcendaj celoj kaj kor- kaj pens-orientiĝoj, el si mem obstaklas la evoluon al nova sociala homo: kaj do ĝi forigcele draŝendas ĉiumaniere kaj ĉiutaktike. Cetere, en la tuta mondo nur la katolika eklezio eksplicite oponas al kompartiaj reĝimoj pro religiaj motivoj.

3) *Por krei egalecon en la dispono de porvivaj bonaĵoj, certe bone funkcias la ŝtata koncentriĝo de la entreprenoj kun la prohibo, ke ili restu aŭ pasu en privatajn manojn. Senfinaj filozofoj kaj komentariistoj kaj spertaj konstatoj evidentige montras ke tiu estas la socia vojo trakurenda por eviti ekscesojn de riĉeco fronte al ekscesoj de malriĉeco.*

Ni, male, asertis, ke la eklezio ne kondamnas la sistemon de la privata proprieto, eĉ, ene de difinitaj limoj, ĝin kuraĝigas, kaj ke, laŭ ni, spertoj kaj travivaĵoj malkonsilas eksproprietigon pro la konsekvenca konstatata malinteresiĝo kaj malemiĝo pri la komunaj aĵoj. Necesus nova homo, kiun ni ankoraŭ ne scias ĉu eblas ekzistigi. Ĉiukaze, laŭ la kristana penso, proprietulo estas nur administranto de siaj propraĵoj: enfokusiĝas klara doktrino konstante asertita en la *Instruoj* de la Sanktaj Patroj.

4) *Komunismo venkos!* - li akcente stertoris -. *Ne bonas por la eklezio esti venkita malamike; konvenas, ke tiu ĉi kunvenkas kun tiu por forgliti el eventualaj persekutoj kontraŭ almetintoj bastonojn interrade. Ne malindas cedi kontraŭ pli favoraj prezoj. Kaj intertempe la eklezio helpu la popolojn liberiĝi el kapitalisma monstro kiu sin paŝtas je militoj provokitaj kaj dissemitaj ĝuste de ĝi. Ne partopreni tiun entreprenon egalvaloras memvole fortiriĝi el la historiscenejo ĉar la popola liberiĝo estos senmanka.*

Tiu lasta realpolitika argumento iom breĉis la animon ĉar al neniu plaĉas esti persekutata kaj ĉar la monda aŭ internacia venko de komunismo estis timige antaŭvidita de multaj. Ĝi impresis ankaŭ per la fizika kunteksto de tuja tikla oratora vortinundo, kies eldira stilo jam estis inter ni laŭdata kaj enviata kaj kiel eble plej imitata. La suba fina lia aserto estis subtila, kvankam laŭsistema kontraŭekleziula, sago kontraŭ la kredespero.

5) *Eklezio pli ol je Kristo prizorgu konigi la ideojn de Kristo, nun ĝi kondutas filistrece pro timo de la burĝaro!*

Ni ne konstatas tian filistrecon, estis nia komuna reago. Ne filistriĝas kiu, pro fideleco al siaj idealoj, alfrontas ĉie martiriĝon eĉ sciante, ke pri sia martiriĝo eĉ la memoro perdiĝos!…

La ribelema fratulo neniam perdis sian memkontrolon, kvankam enŝovante, ke eble ni, restantaj ĉe nia opinio, estus porokaze preparitaj aŭ antaŭjuĝe endoktrinigitaj, se ne karapace fipersvadigitaj. Preparitaj, certe jes; endoktrinigitaj, certe ne, ĉar en ni pligrandiĝis la konvinko, ke ni kapablas eviti, per jam akirita kutimo libere naĝi supren kaj malsupren tra la koncernaj kulturfontoj, pergurdadan endoktriniĝon por savi doktrinon. Kontraŭ tia konvinko saltis la argumentadoj de la kontestulo kiu, kun intelektula vesto ne sen ŝprucoj de ekkoleriĝo, ĉi-foje rekonas vanaj siajn strečojn persvadi. Je la fino, tamen, de sia interaktiva prelego - aŭ babilado -, li rezignis pluinviti lobii por siaj tezoj dum iuj el ni al li esprimis deziron, ke li demetu sian mesianisman arogantecon kaj *"revenu al la ordinara estado"*.

Tiu mensula sinteno kun laŭdata simpatikapta oratoreco trenis lin, kelkan jaron poste, forlasi kontraŭobee la ordenon. Sed je tiupaŝo ni pri tio ne plu miris, esperante tamen, ke en li ne forlasiĝu ankaŭ la kredo. Io de nia ironio tamen akompanis, jarojn poste, al famvelkiĝo tiun kiu je unua vido kondutis kiel nova revelacianto. Nia senvaloriĝo pri li, tamen, ne malpermesis, ke lia evidenta malprofitemo miksita kun asketaj teniĝoj, tiom pli admirataj kiom pli li tiaĵojn ne evidentigis spite sian stelulemiĝon en gravaj gazetoj, kunigitaj al spicoj de popolflateco, misorientigu tie kaj tie erojn de malaltaklasa popolo. Ankaŭ ni tion en li aprezis kaj esperigis faktoro de malakceliĝo el la obstino. Onidiraĵo kuris inter ni laŭ kiu lin precipe magiigis, akompane kun sincera konvinko, la subita simpatia populariĝo inter proletaraj klasoj lin taksantaj ĉampiono de religio sendependa de kapitalismo, de rezistanto al la eklezio kiu, laŭ gaja marksista moto, pivotus ĉirkaŭ kapitalismo. Oni cirkunligis ankaŭ, eble indulgeme, ke en li mise kunefikis emo, kvankam foje trahezitema, sin montrofenestri kaj aspiro al malkovro de vojo elirigi el mizero la popolon

La mildaj montetoj ĉirkaŭantaj la ermitan lokon kaj la trankvileco de la ferianta animo favoris nian sciemon pri la kvanto kaj kvalito de la sento-konvinkoj movantaj la pilgrimulojn. Preskaŭ ĉiutage, precipe dimanĉe kaj sabate, personoj, solece aŭ grupe, vizitis la Maria-sanktejon de Crea (Krea), montetara loko ĉe Alessandria (Alesandrja. piemonta urbo), en Norda Italujo; ĉiun dimanĉon la homoj fariĝas amaso de mateno ĝis vespero: la sanktejeton plenplenigas, eĉ dum eksteroficialaj ceremonioj, personoj je absorbita medito kaj preĝoj kun kantoj antaŭ la Maria nigra statuo, nigrigita el la vaksokandelaj fumoj jam de plurjarcentoj bruligitaj antaŭ ĝi. Ankaŭ turismocelaj grupoj antaŭ tiu statuo haltadas silente, se ne preĝe. Kaj post tiu vizito, en la placo kaj hotelaj enirkoridoroj kaj ĉe vendo-benkoj aŭ dumpiknikaj renkontiĝoj ronronas

granda gajeco. Kio movas tiujn personojn? Kiel enpenetri kaj pliesplori ilian animan fundon? Pri la religiemo de praktikantoj kutime etnologoj kaj sociologoj parolas per varispecaj, kaj iom spitemaj, interpretadoj, pravigitaj pli per impresoj originitaj el eksteraj aspektoj ol per sciencaj esploroj.

Ni kunaranĝis, por ebligi la kontentiĝon de tiu scivolemo, enketan rivelilon, parte parolan parte skriban, kaj por konstati ĉu la respondaĵoj rajtigus kaj konfirmas la ekirajn hipotezojn pri la korelativeco inter religiaj gestoj kaj intima religiemo. La konversaciojn kun unuopuloj kaj grupoj, zorgis duopoj de teologilernantoj nur laŭ jena linio, malgraŭ devojiĝantaj rezistoj de enketitoj:

*Kial vi alfluis al la sanktejo?*

*Kion vi venis por peti?*

*Ĉu alifoje vi venis? Kontentiĝe kaj elaŭdite aŭ ne?*

Dek kvar duopoj enketis ĉe preskaŭ cent personoj. Ĉar la demandantoj vestas franciskane ŝajnis, ke estas prave forigata la ĝeno elvojiga kaj malpuriganta la konkludaron. La unuopaj konversacioj ne devis superi po kvin minutojn. La ordigitaj respondaĵoj, skribe notitaj tujpost ĉiu unuopa enketado, liveris al ni la jenan kadron: 91% pilgrimas *por peti ion de Maria*: ion rilate la sanon aŭ/kaj familiajn aferojn aŭ/ kaj pri la stato en laboro ktp.

La konkludo envenas la ne novan tezon, ke la popola psikologio havas vere malmulte komplikan apercepton (klaran percepton pri siaĵoj): oni sindiras klarvorte. La peto pri io elstare konkreta tenas la unuan lokon. Oni atentu pri tiu punkto: la deziro ricevi favoron trenas la devotulon. Estas ĝuste tio kio apercepte trenas la impresojn de la komuna dokta opiniaro, aparte kritike alarmita pro la materialeco kaj utilecismo de la aspiroj de devotuloj: sanktuloj kiaj distribuantoj de favoroj kaj nenio plu, religio do almenaŭ supraĵa.

La sekvan dimanĉon, laŭ programo, ni disdonas al pli ol sescent personoj paperfolion kun la jena teksto, studita kaj taŭgigita por riveli ion sensimilan kaj konkretan pri la devota animo, kaj komparebla kun la rezultoj de la unua enketo:

*Kial vi vizitas la Marian Sanktejon?*

*1) Por peti ion materian?*

*2) Por danki pro difavoro jam ricevita?*

*3) Nur por kunesti kun io sankteca aŭ kun Maria kaj Jesuo?*

*4) Por aliaj motivoj?*

(Substreku la plej veran por vi).

Resendiĝis 432 responditaj enketiloj, trovitaj en du enteniloj manportataj de du infanoj.

Oni atendus konfirmon de la parola, surstrata kaj surplaca kaj laŭbutika, enketo. Male, la jesaj respondoj al tria enketilero estis 59%, kvankam 10% el ili same reliefis ankaŭ unu el la du antaŭaj; dum malmultaj substrekis la kvaran. La unua kaj la dua enketileroj honoriĝis kune je 40%. Do, se, oni pilgrimas *por danki aŭ kunesti kun io sankteca aŭ kun Maria kaj Jesuo*, ĉu pilgrimuloj, eĉ la turisme flugtuŝantaj, posedas pli profundajn endopsikajn tavolojn pri kiuj ili ne tute spontane parolas? Fakte el la unua, tiu parola, enketo pri tiu dimensio oni malmulte deduktis. Ŝajnis tiam, ke la motivo de la peto de io konkreta kaj sentebla estas la preskaŭ sola motivo de la pilgrimado. (La nombroj estas rondigitaj iom supre okaze de decimala frakcio).

Kiel interpreti tiun diverĝon de la buŝa enketo disde la skriba? Ĉu personoj sin detenas diri ion intiman kaj delikatan kaj ne senbare vorttradukeblan? La hipotezo, nur laŭvoja, apenaŭ skizita, valorus la penon esti plikonfirmita.

Ni decidas krei alian enketilon, kiel kontraŭpruvon, apenaŭ modifitan kompare kun la dua, sed strukturitan tiamaniere, ke la pridemandito rivelu sian intimon, kaj utiligotan la sekvan dimanĉon. Jen ĝi koncize:

*Se via preĝo al Maria aŭ al Dio maltrafas, ĉu vi konkludas, ke:*

*1) ne valoras la penon preĝi, kaj pilgrimi?*

*2) oni bezonas esperi, ke estonte okazos pli kontentiga atingo en sociala-ekonomia-laboraj aferoj?*

*3) aŭ vi petis, samtempe aŭ ekskluzive, spiritajn Difavorojn, kiel fidelecon en la kredo, helpon por superi la malfacilaĵojn en la morala konduto aŭ vi nur kunestas por ĝoji je la ĉeesto de Dio kaj Maria?*

*4) aŭ vi nenion pensis?*

(Substreku nur unu).

Respondon metis en du kestojn 401 enketitoj. La plejparto el ili substrekis samtempe la duan kaj la trian demandojn, nome: 2. *oni bezonas esperi, ke estonte marŝos pli kontentiga atingo en ama-ekonomia-laboraj aferoj? 3. aŭ vi petis, samtempe aŭ ekskluzive la spiritajn Difavorojn, kiel fidelecon en la kredo, por superi la malfacilaĵojn de la kredvivo, aŭ vi nur kunestas por ĝoji pri la ĉeesto de Dio kaj Maria?*

Nur 2% substrekis la unuan demandon, dum nure la trian substrekis pli ol 30%.

En niaj postenketaj analizoj prenis forton la tezo, ke personoj aspektas malpli religiemaj ol ili ene vivas, kaj revestas siajn profundajn simpatiajn sentojn al Dio kaj al Maria per io utila, per io ŝirmanta ilian intimon movitan, male, de vaga bezono doni, al aliaj, pli konkretan kaj materie tuŝeblan motiviĝon

de sia preĝo.

Ni tiel klasifikis religiemon: a) unua baza grado - peti ion de Dio aŭ Sanktuloj, b) dua pli supera grado - peti, sed samtempe esti preparita akcepti la Dian decidon, c) tria la plej alta grado - harmoniigi sian pensadon kun la Dia kaj ĝoji esti ĉe Li. El la skrib-respondoj oni rajtas konkludi, ke la aludoj, tuŝantaj la duan kaj la trian demandpunktojn, estas konstateblaj ene de la sekretaj respondoj multe pli evidente, ol el la respondoj parolaj, antaŭ publiko.

Plifacilus publike elmontri, en publikaj deklaroj, sian inklinon al Dio per la preteksto de petpreĝo ol per la preteksto de simpla laŭdpreĝo dum ekzakte tiu ĉi okupas ne malofte la unuan lokon funde de la koro, kvankam konfuze. Io pudora, do intima kaj delikata kaj identiĝanta kun la persono mem, reflekse sindefende kovras per io pli modesta kaj humila.

Tamen, aŭ fakte, 39% substrekis nur la trian.

Ĉu tute prave oni rajtus diri, ke inter la sanktejaj devotuloj aŭ ekzercantoj de prisanktula preĝa admiro oni snufas lezon al la unikeco kaj adorebleco de Dio? Kvankam ŝajne nomata pli ameme ol Dio, Maria aperas ĉiam tiu kiu kondukas al Dio! Ĉu oni rajtas insisti (kion faras etnologoj nepsikologaj aŭ hastemaj sociologoj), ke la amasa religiemo estas frukto de subalterneco kiu igas peti al Dio kio estas rifuzata de opresema socio? Rondcifere, almenaŭ 90% sukcesas pensigi al neprofita sinteno.

El postaj hazardaj konversacioj kun enketitoj, nemalprovizita je pruvkapabloj, trabriliĝis konvinko resumebla tiel: se homoj havas konstantan emon helpi siajn amatojn kaj tion faras en ĉi tiu vivo, kial tia homa impulso povas esti malfarigita en la tramonda vivo? Ĉio valora faras humanisman koniston tie kie jam Kristo kontinuas propeti por homoj. Kristo igas Sanktulojn paŭsantaj lin mem!

Ĉu daŭrigi enketi, per novaj demandiloj, kvaran dimanĉon? Superuloj ne permesis, ĉar por ni, laŭ ili, tiuj taskoj postulas teknikan preparon kiu ankoraŭ al ni fremdas, stimulante tamen ke ni dume daŭrigu perfektigi la enketilojn kaj teĥnike rafinu la kontaktojn kun la publiko, kaj precipe pliprofundigu la hipotezon, ke en neengaĝitaj paroladoj pri siaj religiaj sentoj, kredantoj liveras malpli da religiemo ol ili sentas aŭ religiecon malsaman ol tiun reale vivatan.

Kial ne transpasi al la profesiaj preparo kaj uzo de tiuspecaj enketiloj? La tasko, pro eble la neprofesia preparo, postulintus tro da tempo por eltiri el nia acerbeco la tutan rimedaron por igi malpli improvizita nian laboron kaj pli tonditaj ankaŭ laŭaĝe la mezumojn: tempo dediĉinda al aliaj pli urĝaj aŭ institucia taskoj. La postan jaron ni, en nia klerikejo, el tiuj enketaj materialoj sur-

scenigis plurvoĉan prelegon antaŭ multnombra publiko, kiu montris, ĉe kelkaj pli kleraj ĉeestantoj, deziron pri pli ampleksa, kun pli da variabloj, refaro kaj kun paralelaj pruvaj kontroliloj.

Ni sukcesis ankaŭ eksciti atenton de iom fakeca revuo, redaktata socia faka de religiisto, kiu akceptis publikigi tiujn provizorajn konkludojn, bedaŭrante, ke la enketo blokiĝis meze de traironta vojo, malgraŭ ke la studenta netiga komisiono jam ellaboris novan enketilaron pli taŭgan ol la antaŭan por eniri-gi la enketon en pli profesian studaĵon. Sed kvietiĝinte momenta eksplodemo, neniu el la enketistoj pluiris en la enketarton pro manko de profesia intereso. Ni fakte apenaŭ miris pro la perdiĝo de ĉiu resonanco de sociologiesploro eble mankanta, almenaŭ startmomente, de propra psikologia instrumento (necesa ĉar tie ĉi la esploro koncernas nemateriajn aferojn kaj ĉar sociologiaj faktoroj sociumas influataj de psikaj faktoroj) kaj de teoria konceptaro sur kiuj laŭirigi la empiriajn esplorojn, kaj certe de sperta validigo de la enketilo; sed rilate la samplon kaj datentraktadon ne malestis io kultinda kaj serioza laŭ juĝoj de malpli nespertaj uloj intertempe de ni interesitaj.

La okaza hipotezo kaj la pravigita konkludo ne malafable paralelas. Ĉu eblas, ke tio kion oni epitetas trafita pli de superstiĉo aŭ utilecismo ol de travi-debla sinallaso al Dio, reale kovras krudespriman tute kristanan religiemon? Tio, almenaŭ parte, kontraŭdirus ruze disvastiĝintan fantaziantan koncep-taron pri la popola religiemo precipe de aparta intelektula kategorio.

Ĉu la inspiro estos ĉerpita de aliaj, por serioze elirigi sentenculojn, aŭ eĉ seriozajn komentariistojn, el supraĵaj malestimoj pri la psikologia kaj spirita sinteno de vizitantoj de sanktejoj?

Reveninte al la studentejo, post la statistikema parentezo, pli sensurprize ol sensufere por la grupo, kandidato por la ordiniĝo salutis la grupon kaj haste kaj senbedaŭre reiris al la sekulara mondo. Ni provis diveni la motivon: fine, li sin juĝis ne taŭgiĝinta al la konventa vivo pro sia plua kaj plia emo al sam-sekseco. Ni jam sciis, ĝuste de li, ke pri lia kazo la superuloj, helpe de fakuloj, iam diskutadis: ne estas kulpo tiu emo, nek mem malebligas la akceptiĝon en pastrecaj aktivadoj ĉar por samseksemulo aplikeblas la sama religiula komuna idealo (doni sian vivon al Jesuo Kristo) kaj la sama orientiĝo, kaj superado, de la seksa inklino ĝin konscie kaj evangelie sublimigante avantaĝe de la fratoj en kredo ankaŭ en homeco. Tamen la timo, ke la tendenco tratranĉu la mora-lajn limojn, antaŭ fideluloj nefacile instrueblaj prie, do malpli konsciaj pri di-ferencaj psikaj interrilatoj, kaj iu dozo da neracia instinkta rifuzo de diversulo, kreanta foje etoson de antaŭjuĝo, ĝenis ankaŭ lin. Spuroj de antaŭjuĝoj inter

ni aŭ eksmodaj kritikoj aŭ ĝeno antaŭ li jam muldis distingon inter natura tendenco kaj libera konsento al tendenco. Lia ĉeesto inter ni jam faligis la fokusiĝon de la problemo kun relativaj solvoj de la kristana moralo. Fine klariĝis, ke ne pro tio li forlasis la klerikalan vojon, sed pro malsama situacia maniero vivi sian kristanismon. Ne tamen, espereble, geedziĝe, se ne post sufiĉa informo al la partnerino.

Alia ne minimuma evento. Ni estis engaĝiĝintaj en la lernojarfinaj taskoj kiam la profesoro de kompara religiscienco kaj sociaj novareligiaj movadoj montris gravan malgajan mienon akompanatan de silenta apartiĝo. Stimulita, fine li parolis kaj rakontis pri sia malsukceso rilate fore zorgigitan personon, pri kiu ni neniam antaŭe aŭdis.

Okaze de hazarda malsaneto, lia eksterobee sekularigita patrina onklo, iam franciskana pastro, preskaŭ abrupte formigris el ĉi tiu mondo. Nemalkutima sufero, oni pensis; sed tiufoje, por li kaj por ni, la okazintaĵo konturiĝas per aparta cirkonstanco ĉar la mortinto *"ne akceptis konsiliĝi kaj repaciĝi nek kun superuloj nek per sakramentoj".* Popece la historio riveliĝis renovigante kaj samtempe mildigante la doloron de la amika profesoro.

Lia onklo iam funkciis pastre inter konventanoj, eĉ profesore pri komparaj religioj, sed pro malgraŭoj de ne klarigita sed prikonjektebla naturo certamomente eskapis el la konvento kaj neniam akceptis konfrontiĝe klariĝi kun la superuloj, eĉ li montris, ke la katolika kredo ne multe valoras por li. La nevo konservis silentan esperon, dum la memoro pri li kadukiĝis ĉe la fratuloj, ke li revenu al la kredo kaj al la konvento. Male, li mortis ekstere de ĉiuj religiaj kontaktoj. Morto senpenta, oni dirus. Kia lia eterna sorto ĉe Dio?

*"Eble en la lastaj momentoj, kiam ĉiuj vivsignoj retiriĝas, eble li sin remetis en la manojn de Dio".* Estis komuna esprimo, akompanata certe de propeto por li.

Necesas scii, ke nia konstanta preĝo propetas al Dio morton konscian por havi la tempon revidi siajn eventualajn misagojn kaj pentofari. Tia morto, konscia, estis opiniata dezirebla dia donaco. Impresis skandale, fakte kiel jam aludite, la nova ekmodo morti senscie: la mortanto eniĝas en sian finan lukton sen scii, ke tio estas la finfara vivevento, kaj por eviti al li suferon oni lin plenplenigas je drogokuraciloj: li mortas sendolora kaj senkonscia aŭ malklariĝinte konscia, tio estas sen reinspekti sian vivon sub la dia lumo.

La konsidero ne finiĝis tie ĉi, ĉar la pastro profesoro pruntis okazon, el siaj fakaj esploroj, por diri, ke *"de nun morti sen percepti la morton fariĝos modo, kaj okazos, ke ĉiu malaperos kvazaŭabrupte pro memkonsciomanko",* kaj rafinis: *"Aŭ Dio scenejiĝas sur la horizonto de la tuta vivo aŭ homo riskas*

*Lin perdi por ĉiam ĉar la morto, perdanta sian sakralajn specifecojn, forĵetas ankaŭ la okazon konscie estri la eternan futuron".* Tiam liaj vortoj taksiĝis troaĵoj.

Dum, krome, sekvaj lecionoj, la konsidero plivastiĝis sur la *historio de la homo* kaj sur la *historio de la civilizo*, kie la morto evidentigas, samtempe, la malsamecon de la du: *"Civilizo elpaŝas pograde kaj ĝiaj malvenkoj estas juĝataj nur paŭzoj; homo, male, atingas sian kulminan personan civilizon, nome ĉio koncerne siajn tempan celon kaj transan sorton, en la unika ekzisto: per la libervola decido li response elektas aŭ kunloĝi kun Dio aŭ resti ekstere, se ne kontraŭ, de la transcenda sfero, ekde tuj li rajdas sian sorton ĉar la morto nur malkaŝos tiun neŝanĝeblan elekton. La homa civilizo, tio estas la spuroj de la mortintoj, daŭrigas, sendepende de la individua sorto, pli aŭ malpli sin plibonigi. Moralvidpunkte, male, la homo ne povas ne atingi, pro la nepra libera decido, sian kulminon".*

Dume lerneje oni permesis, foje eĉ invitis, uzi la italan anstataŭ la latinan lingvon por ke la estontaj predikantoj kaj konversaciantoj pri religio inter la popolo sin provizu je la lingvaĵo reale uzota inter la landaj homoj. La transpaso al la nova sistemo montris ja jes, kiom oni gajnas je lerteco kaj komunikarto en la prezentado de sia penso kaj al la popoloj kaj en la fakagado sed samtempe oni evidentigis kiom da precizeco kaj sinteziteco kaj kerneco perdis la prezentado, aparte tiu de la fako pri oficialaj trajarcentaj ekleziaj instruaĵoj. Dum nemallonga tempo la du lingvoj paralele kunestadis.

## Ĉapitro dekunua

# Posedi la veron kaj ribele ŝanceliĝi tra ĝi

Je la komenco de la kvina priteologia lernojaro oni serioze ekpreparis sian animon al la dezirata celo: suriri per la eskalo de la subdiakona kaj diakona ordinoj la sacerdot-dignecon. Tiupunkte de l' eskalado duboj pri sia vokiĝa elekto ne devus plu persisti, sed foje en mi pluokazas da tiaj: tiom pli, ke nun mi certas, ke, forlasante tiun vojon, mi ne restus senlabora, ĉar jam eniris la fratularestrojn, kvankam ne pale kaj ne konstante, la konvinko, ke oni devas helpi la forlasanton krei al si akceptindan salajritan pozicion, kvankam oni el la minaca fono ne malaperigas la dujaran soldatservon. Sufiĉus riveli dubojn pri sia vokiĝo, por esti blokita en prokrastiga pripensindejo aŭ akompanata al la sekulara mondo. Duboj foje en mia konscienco okulumas ĉar la sekulara vivo, ĉiam taksigita de la edukantoj valoro, foje akiras, kvankam blinkan, brilon, precipe rilate la priaman ne senadmirige ofte aludatan en oficialaj rezonadoj.

Ne necesis, ke tio malkaŝiĝu al la klerikedukaj respondeculoj rekte de mi ĉar kelkan semajnon antaŭ la ordinaddato malsekretiĝis, ke ĉe la superuloj ankoraŭ diskutatas mia taŭgeco por la sacerdotstato kaj tial mi atendu, ke iliaj ideoj klariĝu forvenante de la paraliza necerteco aŭ, ke mi donu pli senduoblaspektajn signojn. Oni oficiale invitis min peti mem prokraston kaj pripensadtempon, aspektigante al la kunkandidatoj mian momentan hezitstaton; mi elektis tiun solvon, montrante tamen ĝenon kaj doloron. Tiuj estis sinceraj, kvankam senŝancele mia eno trovis konscienca kaj prudenta la superulan decidon pri mi. Eble la kunuloj kredis ĝisfunde al mia ŝajnigo aŭ ili siavice pro kamaradeco elmontris kredi; sed jam estis akceptita la situacio kiun eble ankaŭ ili antaŭvidis.

Rilate tion notindas, ke min ne hantumis tiukaze, malkiel antaŭfojon, sento de humiliĝo kaj senvaloriĝo kiu tiom min sentigis malsupera kaj kompate rigardata, kaj plie mi certis, ke ne ekzistis humiligantoj: la sperto de la pasinta humiliĝo, pro ĝia manko de motivo, postlasis en mi spuron de maldeco aŭ neindeco neforstrekeblan, kaŭzitan sendube de reala aŭ imagita paliĝo de prikonsidero pri mi ĉe la kunularo. Eble, male, nun probable ŝvebis sur mia kapo duonaŭreolo el la sinteno de fiero pro mia iniciato peti prokraston de io tiom ŝatata, kvazaŭ la ordinotoj mankus je tiu kuraĝo. Sento de supera emancipado, foje ekperceptita senmotiva, travidiĝis el mi, kiu pludraŝadis studobjektojn dum miaj

kunuloj spirite prepariĝis al la diversaj ordinadoj kiujn mi sekvis kun alternado de sentoj, unuj kontraŭ la aliaj; sed neniam min decidigis la ĝusta solvo: spontane sekulariĝi!

Por ke la tempo estu trezorata, aŭ eble por ke mi plifirmiĝu je serena mieno, oni permesis, ke mi enskribiĝu kaj vizitu, ĉe PAS (Pontifika Ateneo Salesa) de Torino, la fakon pri pedagogio kaj eksperimenta psikologio, laŭ mia peto de monatoj antaŭe. Ankaŭ tia permeso estis taksata de la fratula komunumo kiel signo de konsiderindaj valoro kaj estimiteco; sed mi, malicete, dankis tiun flatecan juĝon al la konveneco enplekti en la paketon de la malglataĵoj ankaŭ ion agrablan.

Ĉe tiu fako novaj kunstudentoj, de diversaj religiulaj ordenoj kaj laikoj, inter kiuj magistriĝintoj pri fiziko kaj filozofio kaj ankaŭ juna virino, svelta kaj elegantmova en la korpo tiel kiel gratulita pro ŝia unikeco inter viroj kaj desplie en medio ĝistiam rigide destinita por solaj virreligiuloj, okazigis novajn interrilatojn.

Nur unu fojon al mi bonsortis sidi ĉe la juna studentino kaj interŝanĝi sensignifajn vortojn. Sensignifaj, certe por ŝi, ne por mi kiu postkelke da tempo maĉadis la rekonstruon de la mallonga konversacio: ĉio en ŝi aspektis alloga sambone kiel cetere en aliaj junulinoj. El angulo de la aventureca instinkto, inkognita voĉo duonflustranta, ne nur mokete: *"Kaj jen! Kion eble vi nekonscie deziris, tio estas alportita ĝis viaj tuŝantaj okuloj",* forsvagiĝis pro nova momenta reakiro de deviga memkontrolo. Nur momenta tamen.

La insista imagemo pri ŝia ĉeesto reeĥis, preskaŭ kiel gaja eltrovo, per noviga ne tute senmalica kompreno, en miaj pensoj kaj fantazio, iun frazon de la Alta Kanto (2, 6), en oportuna liturgia tempo preĝigita en breviera legado kaj meditado. La hemistika frazo recitigas al la amatino, en la dampita realismo de la latina: *Leva ejus sub capite meo et dextra illius amplexabitur me* (= Lia maldekstra mano sub mia kapo dum lia dekstra min brakumos). La hemistikon mi plurfoje recitadis al miaj oreloj kaj ju pli mi ĝin recitadis des pli ĝi koviĝis fantazia Galeoto[1], por parolturnigi Dante/n (Infero, 5).

Plimalfrue la studentinoj fariĝis du, poste tri; tiam la aventuro de ilia kubuta proksimeco, de mi serĉata, ripetiĝis ne mallasante en mi la impreson ke ili ne estas senkorpaj, sed fine, post kelkaj monatoj, eĉ tio ŝabloniĝis, miabon-

[1] Galeoto, *Galehault*, persono de la bretona kavalirpoema ciklo de la Ronda Tablo, aranĝanta la amrendevuojn de sia amiko kaj kunulo Lancelot. Laŭ Dante (Inf. V, 137) galeoto estas la libro kiun Paŭlo kaj Franciska estis legantaj ĵus antaŭ estis, amorantaj, surprizitaj de la edzo de la virino ilin mortigonta. Jen la versoj de Dante laŭ la esperantigo de Peterlongo: Paŭlo "... *Buŝon kisis al mi tute tremanta./ Galeot' estis la libro kaj verkinto".*

ŝance. La kora krizeto ŝajnis rezigni sian tenon kaj tamen indulgis spacon por alia krizo: pliakutiĝis, kurtvoje, ankoraŭ unufojon la ĉiam pululanta problemo. Pri kio temas?

Jene. Kiu gustumis la belecon de la proksimeco kun Kristo Jesuo en la anoncado de lia Evangelio, tiu ne povas forgesi la allogon kaj animplenecon kaj, malgraŭ ke la amo al Kristo ne koincidas kun sindediĉo al li en la sacerdota senedzina vivo, malproksimiĝi el tiu idealo sen esti trapasata de sento de malfido aŭ regresiĝo el io vitala. El tio la ŝanceliĝo antaŭ la ne malpliforta emo unuigi sian vivon al tiu de iu virino. Al kiu flanko gravitos la decido? Des pli ĉar ne pretervidebla averto alvenis al mi, per la konfesprenanto: *"Se ne vokita, faru, ke vi vokiĝu!"*.

Esti kutime turnite al la kontemplado de vero kaj de bono trenas al la senkondiĉa elposedo pri ili ĝis kulpiĝo kiam necesas pliprecizigi kaj reinterpreti kaj akordigi tiujn veron kaj bonon kun aliaj veroj kaj bonoj de la travivita vivo.

Tiuj aposterioraj rezonadoj pledas por komprenigi kial etpaŝe kaj preskaŭ sensurprize mi decidos ensalti definitive en la ordenon por ordiniĝi porĉiam sacerdoto.

Nur vage, kaj maltuj, mi min ĝene perceptis menestrelo kiu sukcesas gitare kanti kaj ŝajnigi gajulo por distri la aliulojn kaj forĝi siajn penojn, kvazaŭ devigata forĵongli la realon; menestrelo kiu devas inventi kaj rebriligi amon al io konsista jes, sed devigata kapti la animon kune kun aliaj sampotencaj sed nesamdirektaj aspiroj. Menestrelo, mastrata de du kontraŭaj fortoj akorde/mise kunefikantaj: la belo de la sacerdoteco kaj la alloga vivo en la mondo

Marĝennote ne malmenciendas ke ekzakte en tiu tempo oni permesis ankaŭ, ke mi enskribiĝu ĉe Supera Instituto por Studoj pri la Psikologio de la Grafologio, unuatempe nur koresponde fine ankaŭ ĉeeste: du tagojn semajne, al Milano. La psikopedagogio ĉe *Pas* kongruis, ne sen faka riĉigo, kun la provo ekkoni la karakteron kaj individuan psikan identecon de unuopa homo per esploro de liaj ne afektaj aŭ intence modifitaj, do spontanaj, personaj skribsigneroj kaj skriboprocezoj. Se dekomence la nova studobjekto altiris nur mian scivolemon kiel io onidire kurioza, poste laŭ la sinsekvaj jaroj ĝi fariĝis ankaŭ pasio pro la konstato de ĝiaj ne malsciencaj konkludoj. Rilate tion mi anticipas epizodon kiu kontribuis por malkaŝi, por mi, eĉ plie, la kompleksecon de la homa animo.

El la bezono flegi miajn kaŝitajn konfliktojn per io ajn nova, iam portis ion belan, nome amikeco vera, naskita hazarde dum trajna veturado. Temas pri sinjoro, tiam mezaĝa, vidva kun filino bazlernejana, loĝanta najbare de la urbo

en modesta sed komfortdona domo ĉirkaŭata de lia kamparo, kiun tamen li ne kultivis persone. Li vivis tute dediĉata al sia filino. Ni faris intensajn konversaciojn trempiĝante en diversajn temojn laŭ lia neokaza scivolemo, eĉ kun liaj amikoj, foje laŭcele invititaj por interparoli kun *"speciala viro tute sindediĉa al Dio kaj al homoj",* ĉe lia hejmo, vintre ĉirkaŭ kameno je flamoj dancetantaj. Li ĝojegis min vidante kaj kutime altabligis altkvalitajn vinojn.

Post iuj jaroj, kiam lia filino jam frekventis universitaton, la prifizikan fakon, mi ekrimarkis humurŝanĝojn en la homo: silentema kun ĉiuj, iomete li ekscitiĝis nur kiam renkontiĝis ni du. Mi kredis kompreni la kaŭzon de tio: la konduto de la filino, kiu traktas aplombe kaj malestime la patron. Malgraŭ sia kutima malmilda eksplodeco kontraŭ la patro, ŝi sukcesas iom moderiĝi ĉeeste de eksterdomanoj kaj eĉ foje esprimas amon al li per tenerecaj gestoj, sed samokaze ŝi abrupte lasas flui nekontrolita kaj do ne regata agresemo tiom akra kiom la patro sin montras delikata kaj konsternita. Jen la kaŭzo de la anima kaj miena malĝojo de mia amiko, laŭ mi kaj laŭ komunaj amikoj, dum senutilis la komunaj klopodoj lin helpi.

Kaj, male, mia amiko neis ĉiam: ne estas tia la kaŭzo! Li ne sin sentas bagateligita aŭ ofendita aŭ malpliigita de la maldankemo de la filino. Se respekti liajn vortojn, "*kiam ŝi eksplodas, mi preskaŭ eniras ŝian aminon kaj enmemiĝas en ŝiaj suferoj, pri kiuj ŝi nur vage konscias. Se ŝi reagas tiel, tio okazas pro ŝia bezono trovi ion distraĵan, ion malordinaran, ion kiu fordraŝu ŝian mempercepton pri ĝenerala psikorgana dolora misfunkcio. Min malĝojigas ne ŝiaj reagoj, sed ŝiaj suferoj, kiuj ekspansias pli kaj pli, pro stranga eble nedifinebla malsano".* Ne ofendita, do, sed impregnita de la suferoj de la ofendantino. Ne necesas diri, ke tiu popece iom deŝire eltirita konfeso ŝajnis al mi provo pravigi la filinon antaŭ li kaj precipe antaŭ la amikaj gastoj jam inkliniĝantaj ŝin klare malaprobi.

Kaj ankaŭ tie ĉi mi mistrafis. Kiel jam dirite, mi frekventis ekde kelkaj jaroj la "Istituto di Indagini Piscologiche"/n, internacia studejo en Milano, kie oni specialistiĝas pri esploro de la rilatoj inter la psikaj nekonsciaj inklinoj kaj manskribitaj signeroj, kaj klopodas ĉion traduki al "sciencaj" leĝoj. Nun ĉiu lernanto devis finstudjare analizi manskribaĵon de persono profunde konata, per asidueco en kunvivado aŭ profesia intereso, por ekstrakti la hipotezan kunrilatigon de la manskribaĵaj signeroj kun la elstaraĵoj psikokarakteraj aŭ sanstataj, konataj aŭ nekonataj, de la neinformita manskribinto sur analizcela blanka paperfolio. Mi profitis por analizi skribitaĵon de la jam doktoriĝanta filino de mia mientrista amiko. Preterlasante la rezultojn de mia analizo, la

korektanta profesoro, Marco Marchezan (Marko Markezàn) iniciatinto de la *Istituto,* trovis en ĝi spurojn de kaŝtrompa, por li tiam sennoma, denaska malsano, debiliganta, ilin suferigante, la muskolojn aparte je nivelo de la brakoj kaj kruroj, kaj perturbanta la humurstaton de la malsanulino.

Ankaŭ pri la konkludaro de la profesoro mi havis hezitojn, tiujn tenante tamen sekrete en mi. Fine la doktoriĝintino decidiĝis pliserioze sin klinike kontroligi ĉe kuracistoj: tiam ŝi, kaj ni, iĝis informitaj, ke ŝia sanstato estas plagata per nekuracebla gena anomalio, kies negativaĵoj povas nur kreski, neniam, laŭ la tiamaj sciencaj, malflusi. Skemoforme dirite, la tre rara malsano nomiĝas, per vortoj multe ĝenerala, imunologia sistemo en ribelstato kontraŭ sia organismo en progresinta fazo. Post kelkaj jaroj, ilin renkontante, mi kun mia kunulino konstatos, ke la patro foje devas enbuŝigi la filinon ĉar ŝiaj manoj ne plu kapablas kapti aŭ reteni la plej simplan manĝilaron, dum ŝi konservas tamen viglaj la intelektajn energiojn.

Miaj spontanaj konkludoj: la psikologio de la grafologio kreskigis en mi unubate la scion pri de la kompleksеco de la homa animo, la estimon pri la intuiciaj kapabloj de mia amiko kaj pri lia sindediĉa adaptiĝo al la bezonoj de la filino, kaj miajn komprenon kaj ekskuzemon rilate la konduton de la filino de mia amiko... kaj la neprecon de plia mia singardemiĝo. Senvole, tiu ĉi sciencbranĉo fariĝis, eĉ sen profesiaj celoj, mia nova esplortereno. Kaj enmetiĝis, senintence sed tute prave, inter miaj konvinkoj, ke la evangelia proverbo "*Ne juĝu kaj ne juĝatos*" nun praktike apogiĝas ankaŭ sur sperto kaj konturiĝas sciencmorala sentenco: atendu scii antaŭ ol juĝi por ne esti taksata, almenaŭ ĉe vi, ne nur malprudenta kaj duonstulta, sed ankaŭ kulpa!

Tujpost mi decidis min ligi al la religiula vivo. En la jaro kaj duono de prokrasto la pastra idealo akiris novan allogan perspektivon transverŝante la konvinkon, ke ĝi eblas ankaŭ al la nesolidaj vokiĝoj kiel la mia. Mi preĝis intense kaj fine mi petis aŭ akceptis transdoni mian vivon definitive al la senprofita idealo kiu sin nutras nur je fido kaj amikiĝo kun Jesuo Kristo kaj amo al la homoj. Firme decidinta, mi komunikis mian elekton.

*Dependas nur de vi*, remetis la superuloj tiun ĉi fojon. Min oni ordinis pere de la mansurmeto de la urba episkopo, ĉirkaŭatan de la familianoj kaj parencoj fieraj pri tiu evento kiun mi vivis tre fervore kontaĝe allasante al ĉiuj impreson de plenĝojo. Tuj post oni destinis min por prizorgi ĉe paroĥo permesante, ke mi frekventu, jam diplomiĝinta pri esperimenta psikologio, la Superan Teologian Lernejon ĉe la klerika seminario de Venegono (Varese, Norditalujo) por akiri la licencion kaj magistriĝon pri teologio.

Postordiniĝon, ankaŭ por mi oni kreis solenaĵon en mia origina paroĥo, en kvinmilanima vilaĝo de la padova provinco (NordItalujo, sepdek kilometrojn okcidente de Venecio). La unuan dimanĉon de oktobro, proksimume dumil personoj, kun unuavice la municipestro, min ricevis antaŭ la preĝeja enirejo manbatante kaj kantante, helpe de amplifikiloj elmetantaj muzikajn akompanojn el la preĝeja orgeno ĝuste nune, per mia festo kaj sen mia scio, inaŭgurata, okazajn himnojn kaj recitante poeziaĵojn montrantajn pri mi orgojlecan kontentiĝon. Mi predikis la unuan fojon oficiale post la oficiala prezentado al la fidelularo kaj porokaza ekzaltiga gratulado fare de la tiama paroĥestro, posteulo de tiu kiu iam tiom originale ne kontraŭstaris mian membriĝon en la seminaria fratuleta internulejo. Ĉio disvolviĝis tute kiel programite por la tuta longa tago. Sed post la tago venis la nokto kun neantaŭvita... aĉa destino.

La nova paroĥestro estis profitinta de la solenaĵo por konvinki la paroĥanojn almoze financi la novan orgenon, kiun ĝuste kun la kantado kaj dummisa koncerto dum mia Unua Meso oni inaŭguris per la manoj de fama orgenisto, kies nomo legeblis sur muraj manifestoj kaj porfamiliaj prospektoj. Tio fierigis ankaŭ min, kiu ne antaŭvidis, bonŝance, la konkludon igantan la feston malplaĉa memoraĵo.

La konkludo aĉe impetis kontraŭ mi la sekvan matenon. Frumatene, je la kvina kaj duono, do kiam eĉ la plej vaga taglumo ankoraŭ ne alkroĉiĝas sur aĵoj el la milda aŭtuna suno, mi alproksimiĝis bicikle al la preĝejo kie oni min atendas por la dua mia meso kvazaŭ kontinua daŭrigo de la hieraŭa festo kaj kiam, laŭkutime, la respondeculoj omaĝas per konkretaj donacoj, simbola materia doto, la novan ekleziedzon. Subite al miaj okuloj ĉio tragediiĝas: se la placaj lumoj reflektiĝas sur la malseketa surplaca asfalto, el preĝejaj vitraloj ne videblas la kutima gajigeca brilado; mi pliapudiĝas al la flanka pordo, frapas kaj refrapas kaj senpacience puŝas la pordoklapon, kiu reziste malobeas; mi turnas la okulojn al la placo lumita tie kaj tie, neniu moviĝas neniu vidiĝas. Tiam mi kuras antaŭ la centran pordon: tiu ĉi kruele sin montras barita per dikaj sanktandree krucigitaj tabloj; kvatante ĉirkaŭe, miaj okuloj ĵetiĝas al la granda alta centra fenestro kiu sin montras, malkiel kutime, senigita je siaj brilaj vitramozaikoj; je dek metroj dista, kamioneto ruĝa parkas aludante al fajrobrigado. Kaj jen el la centra strato apudiĝas figureto, la sakristiano, kiu krude informas:

*"Ĉi matene oni mescelebras en la apuda vicpreĝeja sanktejo, ne en la paroĥa preĝejo, kaj de nun tiel ĉiam".*

Kial?

*“Ĉu vi ne scias? Nur vi ne scias, ĉu? Ĉu vi ne aŭdis la sonorilojn en la nokto senespere helppetantajn?”.*

Kion?

*“Ke la preĝejo bruliĝis. Ni luktis la tutan nokton por limigi la damaĝojn. De malmulte oni iris momente ripozi...”.*

Kaj mi pli malfiere ol scivoleme:

Kio misordiĝis? La kaŭzo de la incendio? Kio kaj kiom pereis el la enpreĝeja inventaro? la paroĥestro, la popolo...

*“Kurtcirkvito, oni konjektas, apud aŭ ene de la nova orgeno, tro haste pretigita por digne festi vian Unuan Meson. Naŭdeka procento de la orgeno kaj pentraj artaĵoj kun la preĝeja meblaro estas perdita”.*

Kaj nun?...

Ne klariĝas al mi ĉu la sakristiano rakontas nur ion tristan aŭ ankaŭ ion imputeblan al kelka el la festantintoj kaj festitoj, kvankam jam de mi eksuspektata.

Mantrenante la biciklon, mi ekpaŝas ĝis la sanktejo de Maria Ĉielirinta kien jam kunvenis el la ĉirkaŭo paroĥestroj kaj aliaj sacerdotoj haste alvenintaj el siaj paroĥoj por montri sian suferon kaj solidarecon al la elprovita ilia najbarulo.

La “unuamesisto”, certe, ne plu ekzistas por ili kaj por la ĉeestantaro: celebrante mian duan publikan meson mi ne kapablas forpeli el la kapo la senton de humiliĝo kaj la senefikan penon detrui la antaŭvideblan impreson de misaŭguro ĉe la publika onidiro, kiu ne disdegnas provi eviti misfortunportistojn. Dum la matenmanĝo, ĉe apuda monaĥinejo, pastroj moroze parolas pri la novaj problemoj. Balbutas ankaŭ mi kelkajn frazojn, eble sensencaĵojn, iom ŝprucigitajn je vaga sento de kulpeco kaj pardonpeteco eble nur esprimata el mia vizaĝo, kiujn tamen neniu montras konsidere percepti.

En mia animo enŝoviĝas la dubo, ke oni ekpensas, ke kulpas mi, ke mi deturnis la komunan prudenton, ke mi okazigis malatenton kaj buntan kaoson, el kio la incendio: tiom pli bedaŭrinde, ke, laŭ mi, meze de tiel emociaj frapvortoj, neniu vidas mian embarason kaj eluzas okazon por adresi vorton aŭ komplimenti pro la “*nova meso”.* Fratulinoj, per kies iniciato oni estis longatempe aranĝanta posttagmezan infanan spektakleton honorigan al la *nova ordenito*, alvenas kun humilmienaj esprimoj por komuniki la forstrekon de la vespera surscenigo sen ekkonscii mian ĉeeston en la hazarda grupo. Kio tegmentas la kapon de ĉiuj? Kiam mi foriras, malmultaj montras reagi al miaj salutoj.

Se hieraŭ mi konsente lasis, ke la festado min trenu al videbleco kaj al ver-

vigado, nun mi min sentas trenata al silento kaj malaperiĝo.

Trapasante la vilaĝon por rehejmeniri eble mi apenaŭ travidetas kelkajn salutemulojn, eble oni deziras min ne rimarki, eble mi ekfariĝas celtabulo de mirrigardoj, eble oni taksas mian figuron malbonŝanciga. Hejme mi silente ploras dum miaj familianoj akuzas la paroĥestron pro la ambigua solenaĵo: ĉu festado pro la *Unua Meso* aŭ inaŭguro de la nova orgeno je tri klavaro kaj dekses oktavoj? ĉu monkontribuaĵoj por lia novpastra ekipaĵo aŭ por pagigi la novan orgenon? La Sinjoro punis tiun senskrupulan profitemon!

Ekdezirante forgeson kun forgesiĝo kaj hastigante, plikorekte ignorante, la sinsekvojn de la planitaj festaj kontaktoj, mi, kun truda delikateco, ŝarĝis la miajn per la tasko saluti kaj danki al ĉiuj, kaj ŝtelforiras al miaj parencoj je distanco de dudek kilometroj. Sed mia humiliĝo min sekvas, eĉ renoviĝas ĉiufoje kiam mi ne povas eskapi el la invito por rerakonti la ĵusajn okazintaĵon. Observante, malgraŭ la klopodo ĉion malekzistigi, pli atente la fluon de miaj pensoj, mi trovas inter ili, retropuŝitan sed iom influantan, la timon esti imagita mavaŭgura persono signita per dia reĵeto, kaj ke tia penso subsube estrus ĉe aliulaj mensoj: eble tiu timo agitas ankaŭ miajn parencojn, eble tia estas la privataj konfidencaj komentoj de kelkaj. Mi certe ne kredas je tiu superstiĉo, sed ĝi plu vivas travilaĝe kaj viktimigas. Rapide pasante tra vilaĝaj vojoj mi devas peni por ke miaj duboj ne vidigas klaĉantojn ĉe ĉiu stratangulo ĉe kiuj jam ne plu eblas refari deca la misaŭspician bildon pri mi!

Impresiĝinta pri mia paŭto miena kaj vorta, mia patra onklo, ĉe kiu ĉiu mia gesto haloas je digneco kaj sakraleco, sugestas:

*"Mi ne ŝatus, ke vi suferu ian penkaŝintan grandan humiliĝon... Eventuale komparu ĝin tutunue kun tiu de Jesuo en kruco ol kun viaj elreviĝintaj atendoj. Misfortunon al la siaj portis ankaŭ li!".* Mi, tamen, en mia animo ne sukcesas malteni ion paŭtan, kun subtila kaj, eble, malfieca deziro izoliĝi kaj forgesiĝi, eĉ kun la Sinjoro-Dio min eksponanta al tia humiliĝo: al mia menso ekbriletas ideo eskapi alies okulojn, eble duonkompatemajn, duonmokemajn. Ĉu la katastrofo, apud mi, estu signo de dia neakcepto pro mia dubvokiĝa pastriĝo? Ĉu minaco, admono, puno, antaŭpriskribo de mia estonteco?

Kaj mi ekas ne insisti min konsideri eterne destinita kiel pastro, kaj do ial revanta regi la okazaĵojn en la mondo. Ja, ankaŭ en la inaŭgura prediko-prelego mi pufvange anoncis la nedifekteblecon kaj kadukiĝon de ĉio kristana, en kio mi, laŭvere enviciĝis nur por pli min senti anigita al io neniam senvaloriĝanta.

Reveninte al mia konvento, kvarcent kilometrojn fore, mi el konversacioj

deduktis kun plezuro, ke la novaĵo de la fora preĝeja incendio aŭ ne flareblis aŭ ne kunligiĝis kun mia *unua meso* kaj certe el mi ne eskapis aludo pri la evento; ree frekventis la superan lernejon ĉe PAS. Konkludinte la unuajn gradojn de tiuj studoj kaj gajninte la titolon, per tezo je hasta supraĵa plektaĵo de eroj el diversaj verkoj kaj parencaj tezoj, de spertulo pri eksperimenta psikologio kaj esperante destiniĝi ĉe eduka strukturo por kontribui en pedagogiaj kaj edukaj kaj instruaj roloj; male mi min trovis ĉe paroĥo kiel unu el la vicparoĥestroj. Grava elreviĝo ekespansiis en mian animon jam kutimiĝintan kredi, pro studkariera prepariĝo kaj manifestitaj inklinoj, ke por ĉiu eduka posteno la persono ĝusta estis mi, eĉ mi pli ol aliaj. Pro montro de malkontento kaj disiĝo de la nova ŝarĝo, la taskoj snobe subtaksataj aŭ malakurate plenumitaj formetis min marĝene, se ne kontraŭ, de la fratulara kunvivado.

Tamen, dum kelka tempo, la kontakto kun personoj serĉantaj, ĉe sacerdoto ion nekomunan kaj malfermitan al la superaĵoj, ekliveris al mi travidon pri mi kontentan kaj utilan al la homoj kaj al la eklezio, kvankam miaj inklinoj/aspiroj orientiĝis al la esploraj studoj aŭ instruado kaj edukado. Tamen la desaponto degeneris pojome al mishumuro, la mishumuro en disiĝon el la fratula komunumo kaj rapide disipiĝis la restaĵo de entuziasmo de la ĵusa ordinado: tiu spirita kaj psika ekvilibro kiu min konsilis akcepti ordinadon, senaverte, aŭ trairita de ignoritaj avertoj, ekŝanceliĝis. Kaj ree leviĝis la malnova demando:

*Ĉu vere tiu estas la vojo por mi?* Kaj kio min, kaj aliajn, pli surprizis estas, ke la demando transaltis la limojn de mia persono komunikiĝante, senhonte kaj senrezerve, al aliaj kunvivantoj.

Tial tutan jaron mi pasigis tra tiuj demandoj. La mezuro de miaj necertecoj montriĝis baldaŭ laŭ la suba neantaŭviditaĵo.

En granda urbo malfacilas hazarde interkruciĝi kun la sama persono, des pli kun loĝanta for kvindek stratojn. Tio, male, okazis ĉe mi kun la fraŭlino, jam kuracistino, iam mia okaza kaj serĉata benkkunulino jarojn antaŭe ĉe la pripsikologia fako, kaj kiu jam volis festi sian abiturientiĝon ankaŭ kun mia ĉeesto. Mi renkontiĝis kun ŝi kvar fojojn, fine ŝi akceptis min viziti ĉe mia konvento. Simpatio al ŝi mi havis tiom kiom oni havas por virino nemalbela kaj festema kaj kiu ridas sur via vizaĝo montrante tute malavare la blankajn dentojn malantaŭ karnoriĉaj lipoj. Ŝi venis la karnavalan vesperon, neantaŭanoncite. Mi facile komprenis kion la konversacio laŭtanime konfirmis, ke la ĝentilulino kun siaj tridek du jaroj en tiu momento estis travaganta en vakueco. Ŝia rakontado pri elreviĝoj amaj kaj simpatiaj fariĝis galeoto ĝis ankaŭ ni nin ekbrakumis dum lipoj kunpuŝiĝis kun lipoj en freneza kisado kaj scivolemaj

manoj karese ektuŝis kaj unu sin forlasis je dispono de la alia, anime kaj korpe. Nek programite, nek antaŭvidite, amafero plonĝe konkretiĝis sur la naivecoj de mia unuafojo entute kaj havos neantaŭvidite suferigajn sekvojn.

Okazis. Kiam ŝi foriris, kaj mi restis tute sola kun mia surprizita pasio kontentigita, iu dubo ekenŝoviĝis inter miaj pensoj: tiu korpa intimeco kaj kompliceco, ĉu ankaŭ en ŝi naskiĝis el profundaj, eĉ se okazaj, sentoj? Ia dubo ekhumiligas min: eble, pli ol ŝia ekamo ludis iomgrandan rolon la kompato pro mia abstino el seksumado kiun mi, kun kreskanta pudormanko, estis aludanta, kaj al mi ne malplaĉis, ke ŝi ekdonus signojn je ŝia disponebleco akcepti, ke miaj aludoj fariĝu karesoj kaj vizaĝvizaĝaj kontaktoj. La parola dialogo tuj ĉesis kaj ni estis unu. Kaj jen ke, malmulte poste, la dubo, ke la ŝia estus pli fordoniĝo al bezono forgesi elreviĝojn ol amsento, ĝenetas mian spiriton. Analizante la unuopajn kunigajn momentojn mi kredas malkovri en ŝi partopreniĝon naskiĝantan pli ol el deziro komplezi ol el deziro sin amfordoni. Tio reziduas en mi, ankoraŭ nesperta pri la nuancoj de la ama koro, io humiliga kaj seniluzia kvazaŭ stratangulaj senamaj amoroj. Neniam mi povis klarigi tion ĉar mi ne plu ŝin revidis aŭ ial renkontis, kvankam foje, fantaziante ŝin rekontakti kaj repreni paroladon interrompitan, la humiliĝsento kredis resperti ion por sin malaperigi.

Tiu implikaĵo de sentoj, la postan tagon, tute perdis signifon kaj eĉ intereson kaj fariĝis malvarma duŝo, kiam la centra superulo min kunvenigas por urĝa komunikaĵo, oni al mi opiniigis. Mi aliris ĉe lin penante maski mienon vage espereca. Li, male, post kutimaj konvenaĵaj vortumoj, ne demande, sed aserte stiras la atenton al la hieraŭa vespera aferaĉo, parolante pri nia devo resti fidela ankaŭ al la ĉastecvoto. Mi deziris kunŝovi mian eston en neniejon kaj provis trovi ŝirmon en afektaj raŭkecaj, se ne gargaraj, raspaĵoj kiuj finfine devis ĉesi.

Kiel flareblis al li pri la malpudoraj fifaroj de tiu hazarda renkontiĝo? Konfuzigita de humiliĝo kaj urĝo aperte agnoski mian malordaĵon, kaj malpaciencigita de retenataj atendoj por enveni baldaŭ la timatajn konkludojn, mi eklucidis pri tio kio senvole enŝteliĝis en mian amelverŝiĝon. La fratula pordisto, rozariante promenanta irrevene laŭ la klostro al kiu kondukas la koridoro antaŭ la vizitsaloneto de ni okupita, certamomenton, altirite de la silento pro la ĉesita babilado, eniris malŝalti la lumon, sed, malferminte la pordon, li sin trovis fronte de la amora spektaklo: fakte, mi nun memoras, ke neoportunaj pordaj ŝrikoj tiam min avertis, ke la pordo neŝlosita povus meti min sub alies okuloj sed tiam *"ol dolor' pli povis la malsato",* dirus Dante, nome la pasio

estis pli forta ol la singardeco, kiu en tia momento ne povis akcepti disduigon. Se tiaj la faktoj, kompreneblas kial la superulo parolis ankaŭ pri skandalo al aliaj fratuloj. Oni prave povis, ne eĉ sen ironiaj ridetoj, imagi, ke mi estis kaptita ĉe plena humado. Tial ruzaj verokasiĝoj kaj neadoj ne eĉ provis dubigi pri evidenta okazinteco.

Neniam mi miaene brulstampis tiun kunfratulon aŭ juĝis lin entrudulo; lin hazarde renkontinte, mi kondutis kvazaŭ nenio okazintus. Fakte, laŭ mia konscienco, li korekte agis raportante ĉe la distrikta superulo pri kio proprаokule vidita kaj nur ĉe la superulo, kiu la postan tagon min kunvokos.

Nun mi estas atendanta la superulan verdikton, stare sed kapkline: *"konvenas, ke vi elektu alskribiĝi al alia fratula komunumo... por forpeli de vi pluajn okazojn kaj la tenton karamboli kaj ankaŭ por eviti viajn malprudentajn reagojn pro la implicita humiliĝo. Memevidente, la efiko de tia preventilo dependas nur de vi*", li elĵetas min alstrebante kun miena bonuleco. *Elektu alskribiĝi*, en la superulecaj nuancdiraĵoj inklinaj al semantikaj transferoj, signifas esti dekrete alskribata kaj devigata. Tiu invito-ordono rilate alian, eble foran, konventon alarmis min pro la timo perdi, ne la virinan amikecon, sed la eblon daŭrigi miajn studajn kontaktojn ĉe la du universitataj studentejoj, neniam vere interrompitajn kaj intertempe pliintensigitajn; kaj pro la aĉa perspektivo ĉesigi la rilatojn al mondo jam enirinta en mian mondon. Kaj pormomente mi ekenviis sukcesantojn formeti sekson ekster moralajn normojn kvazaŭ temus pri instinkta senregulinda afero: se tio solidiĝus vera, kiun malbonon mi agus? Oh, se ankaŭ mi konvinkiĝe kapablus tion enmensigi!

Kia veo se mi suspektigis, ke tiun virinon mi amikigis ĝuste en tiuj lernejaj lokoj!

Dum mi estis perdiĝanta en la penso pri la katastrofo, mi aŭdis, ke la sankcia ekzilo limiĝos al la distancigo de tridek kilometroj disde la loko de miaj interesoj. Malgraŭ mia naiva malobservo de la malnova goliardeca devizo *"se ne caste, caute*" (= *se ne kaste, kaŭte* = se ne ĉaste, almenaŭ singarde), bonŝance mi eltiriĝis el la embarasa situacio per malmulte da elspezoj kaj precipe malŝarĝiĝis pri la risko esti devigata prokrasti aŭ suspendi miajn studprojektojn. Tial fine mi min konsolis, se licas ignori kaj sufoki riproĉojn de la konscienco serĉanta kulpajn dekalkulojn, kaj eltenis la superulan finan esprimon: *"ke ankaŭ la nova konvento ne fariĝu aferaĉa okazejo!"*.

Sed amara surprizo atendis min, naive neantaŭvidita! Pri tio estu okazo paroli iomete.

Ke ĉiuj estis informitaj, en la nova konvento, pri mia punstato, kvankam en

obskuro pri la motivo, kreis al mi kroman okazon de humiliĝo ĉar, laŭ komuna opinio, subita eksigo kun formovo el loko okazas nur pro koramaj mismarŝoj. Marĝenigita pro miaj pensoj kaj pro la senoficiĝo, kaj certigita ke la aferaĉo jam ĉesis esti nur konfidenca, mi komencis sendependiĝi el la devo "engaĝe kaj kunlaboreme" konduti; eĉ rimede aŭtonomiiĝis, kaj por tion fari ekserĉis kaj interkaptis monon destinitan al la fratularo, elĉerpante ĝin el leteroj de bonfarantoj aŭ tiujn ĉi mem kontaktante per diversaj pretekstoj kun la fina celo peti monon. Malgraŭ suspektata pri tia monkvestado (interpretata ĉe mi kiel ruzaĵo por min subteni en la alstrebataj studoj), mi sukcesis obteni, ne sen suspektigi gravajn danĝerojn por ĉiuj, denove la eksplicitan permeson, kun relativa financado, frekventi studlokojn, kiujn unuamomente strikta klaŭzurpuno malhelpis aliri.

En tiu nova konvento miaj pastraj restartiĝoj preskaŭ senrezulte provis peni por reakiri la originan staton, tiun de la ordina cirkonstanco kiam ili fontis el la konvinko, ke en tiu stato oni povas kaj devas agadi por kaj kun Kristo. Ankaŭ miaj tiamaj entuziasmiĝoj estis de mi taksataj impregnitaj per tiu prerogativo. Nun, male, povis okazi, ke ili, de hodiaŭ al morgaŭ kaj senrimorse, min forlasadis ne pro laciĝo aŭ bezono ŝanĝi objekton travagantan la menson: ili malaperadis, almenaŭ laŭŝajne, senkiale.

Unu el tiaj animaj vakuiĝoj min tute okupis en tragika, kvankam ne malkutima, cirkonstanco. Cirkonstanco kiu, eĥiĝante en la memoro, faligas min en refleksan tikon aŭ subitan nebremseblan strangaĵon kaj duonvolitan gestaĵon aŭ esprimaĉaĵon insulte al io aŭ al sanktaĵoj: kaj tio ĉio por forigi la kulpigan memoraĵon de antaŭ mi kaj por min elturni el la embaraso kaj forfuĝigi el nevinkeblaj enaj persekutantoj. Alifoje por min liberigi mi laŭtvoĉe disŝprucigas sensencajn frazojn, mirigantajn eventualan ĉeestantaron, kiujn tamen mi ĉiam sukcesas senmirigi per akcepteble mirŝtopaj kromaj vortaj aldonoj: reputacisavaj aposterioraĵoj pri kiuj mi lertas. Nur post pacigaj rezonadoj kun mi mem, dum la enveno en tiajn memoraĵojn, mi sukcesas ne plu bezoni komplikajn taktikojn por reteni emon al tikaj movoj.

La komplican fonon okazigis la popola patronfesto en la kvinmilanima urbeto de miaj patraj geavoj, kie onkloj kun onklinoj kaj kuzoj kun kuzinoj atendas, ke mi, la plej honora parencmembro, pasigu ĉe ili iujn tagojn, dum kiuj ili povu min honorfesti kaj, eble, publike fieriĝi pri mi antaŭ si kaj la urbanoj. Mi atingis ilin kun la animo envolviĝinta en la antaŭvido kaj deziro je ĉiu kosto distriĝi, eble por forgesi konventanecon. Sed jen ne antaŭviditaĵo: mia patra avo enlitiĝis, kelkajn tagojn antaŭe pro grave pliakriĝinta malsano kaj ĉiuj restis

kondiĉitaj de tiu ĉi ĝenanta evento.

Mi trovis lin pene spiranta kaj alvokanta mian alvenon kaj postulanta mian kontinuan ĉeeston apud si. Apenaŭ malapudiĝante el li, mi devis aŭskulti petegojn kaj plorojn kun ekduonaludoj al mia travidebla seniluzia, por mi kaj por li, rezigno pri la partopreniĝo en la vilaĝeca patrona festo pro lia alproksimiĝo al morto. *"Post tiuj ĉi suferoj,* li kompatopete pen- kaj plen-spire singultas*, mi mortos kaj vi liberiĝos je malhelpo festi kun la aliaj".* Kaj tiupunkte sparkis evidentiĝe, sed senhorore, mia egoismo: mi akceptis, mi aprobis, al mi plaĉis, ke la anoncita okazontaĵo realiĝu baldaŭ por ke ne misiĝu miaj tempo kaj libero: lia postmorta alproksimiĝo aŭ malproksimiĝo al Dio min interesis neniom! Postkelkhore al la homo, jam ekstertoranta kaj vizaĝe ekspasmiĝanta, vere forfuĝis la vivo kun penaj spiroj kaj miaj *supraĵe* partoprenaj *sanktaj* vortoj, kiujn li kun delikata konsterno montris percepti senpartoprenaj, eble malpaciencaj.

La patronfestaĵoj, intense flegitaj ankaŭ de mia parencoj, absorbis min, fone kaj publike, kun miaj gekuzoj, ĉar ĉiuj absorbis, el mia ne sufiĉe kaŝita mondumeca festemo, neantaŭvideblan sintenon. Kreiĝis stranga etoso: mi tuj eksnobliĝis je ilia fiero prezentanta min esceptaĵo honorpleniganta la familian nomon, kaj samtempe enmiksiĝis en iliajn cirkonstancajn pens- kaj agadmondumecaĵojn; mi estis orgojle prezentata fratulo al amikoj de parencoj kaj samtempe laŭdata ĉar "*li ne estas tute pie animvarbanta",* kaj puŝita, ne sen mia komplico, de ili engolfiĝi en senkompatajn festaĵojn. Ni do, malgraŭ la protestoj de la avino, ĉe amuziĝejo kaj allogiĝejo, la kadavra avo forgesita en lito, kie, laŭ mia posta fulma matena konstato, liaj vizaĝaj trajtoj jam perdis la malmolan troecon de la lastaj antaŭmortaj momentoj, kiujn mi eĉ nun vidas kvazaŭ ĉeeste; pormomente mi restis mirigita, ke liaj okuloj ne malfermiĝu por min gvati suferplene.

Inertiga silento ĉiujn invadis la sekvan tagon, eble pro ekremaĉiĝa kulposento.

Se eblus forskrapi la memoron pri mia tiama devojiĝo, kaj se eblus certiĝi, ke la min adoranta avo ne kaptis la etoson de mi intensigitan, se el mia homa kaj tiam pastra maldignosento ankoraŭ ne tralikiĝus honto, mi pretus pagi per ĉiu ajn sufero. Pagi ja, kondiĉe tamen ke tiu memoro kaj abomena bildo kaj la honto mem ne forgesiĝu pro neniigo de kulpo. Eble, la punpago konsistas ĝuste el la hontiga memoro pri tiu morala kraŝo per la fia konduto.

Bonŝance tiuj momentoj de blindeco, blindigaj ankaŭ por la ĉeestantoj, estis raraj, sendube tiu ĉi estis la plej translima, taksebla ja kiel struktura velkaĵo

el la idealoj konstituantaj kristanan personecon.

Jen malgrandaj jen grandaj, tiuj sentoŝanĝiĝoj invade dispartiĝis al multaj aktivadaj kaj pensadaj branĉoj. Ankaŭ la rilatoj kun la kunfratuloj, ne povintaj ne bridi tiujn seneksplikajn velkaĵojn, baraktis en la malfacila serĉado de la taŭga maniero min trakti. Eĉ oni persvadiĝis, ke mi uzas mian plejeblon por ne eviti miskomprenojn, nome mia intenco naski kunvivadajn disiĝojn.

Etaj opiniecaj diverĝoj konturiĝis kiel konfliktoj gravaj kaj rankornutraj. Miaj sentoj kaj juĝoj estis tiom ŝanĝemaj, ke la konventularo ne plu sciis kiel al mi alproksimiĝi. Se post kontraŭfratulaj eksplodoj mi sen rankoraj spuroj facile emis pardonpeti, fine ne maloftis, ke al la pardonpete etendiĝanta mano la ofendita fratulo refutis per gesto de forpuŝo kaj rifuzo, min kun ŝultrolevo regardante aŭ kun aspekta impono, montrante juĝon de senespera perspektivo. Klara signo de ne plu eltenebla malaprobo pri mia konduto. Ankaŭ el etaj fidkomisiaj taskoj oni min komencis ekskludi aŭ distanciĝi el tiuj de mi entreprenitaj.

Mia dialektika vervo fariĝis kermeso de la *"ĉio iom vera kaj iom falsa"*. Fakte, ĉiu juĝo aŭ opinio aŭ sentenco estis de mi dekonstruata kaj samtempe advokatata. La pacienco de fratuloj ekĉerpiĝis kaj ekpensis, ke por mi estas bone ke, por ke ne kontuziĝu la komuna fratula kunvivado, mi ekvivu eksterkonvente, ke mi provu vivi solece. Tia ilia, hazarde aŭdita, juĝo pri mi: *"li certe ne fobias jen perdi ligon kun la franciskana stilvivo jen ĝin respekti, kaj samtempe freneze blufas pri volo foren eskapi dum, reale, li pretendas, ke ni solvu liajn personajn kontraŭdirajn problemojn!"*.

Nun ekcertis, ke kio ravis iam min al ekstazo kaj al sindoneco jam senreve ekfariĝas indiferento kaj enuo.

La devon travivi povrece, por signifi al si kaj al la aliaj, ke la propra bezono poziciiĝas nur ĉe Dio, konkretiĝanta en la rezigno posedi kaj teni ĉe si kaj preterpermese uzadi monon kian ajn bezonatan, diverspretekste mi, malgraŭ konscienca riproĉo, ignoradis; kaj kiam oni, prave, suspektis, ke mi sekrete akumulas monon, la reagoj miaflanke estis aspekte akraj, kvazaŭ la suspekto turpigus mian personon, sed ruze mastrataj por havigi pli da ŝancoj daŭrigi en mia profitcela arto. Iom post iom al mi ŝajnis logike, ke la perspektivo de sekulara vivo sugestu kaj rajtigu la akumulan apartigon de mono: estis momentoj dum kiuj por mi viviĝis nur kio tintis mone: preni kaj ruze pensigi al la bonfarantoj mian disiĝon de la mono! Kien fine finiĝos tiu sekrete akumulita, se ne elvringita, mono?

Ofte mi helpis, en iliaj gravaj aferoj, miajn gefratojn: parte provizis je doto

miajn fratinojn okaze de ilia geedziĝo. Malegoisma nepotismo per mono tute ne propra, oni dirus; sed sekreta penso laboris en mi: la bonfaritoj certe pretos min helpi kiam mi decidos enveni la sekularan vivon. Se anticipi ion pri tio, diratu tuj, ke ili rapidege forgesis helpaĵojn ricevitajn aŭ tiujn ĉi minimumigis ĝis ilin preskaŭ nuligi; kaj preskaŭ neniu redonis, kaj se iu redonis ion tiu ne rezignis akre grumbli kaj malintensigis rilatojn kun mi: enveriĝis la proverbo "*amikeco pro profito kiel akvo en kribrilo"*. Kiam venos la momento de la konsciiĝo pri la redondevo, tion ĉi nur mi devis prizorgi ĉar eĉ la mono pergajnita pere mia laboro (predikado, verkado, instruado, liberaj donacoj, kaj eĉ monavidaj sintrudoj...), funde jam apartenis al la religiula komunumo. Kiamaniere reakiri kaj redoni? Ĉu redoni informinte aŭ sekrete? Estos morala problemo estonta, kiu certe min ne agitis dum tiaj alicelaj furoraĵoj.

Ne malkaŝendu, je mia ne tute perdita honoro, ke plurfoje rimorso kun deziro reprovi la votobservadon kunpelis min honeste liberigi el tiu ŝtelita mono kaj ĝin kaŝe aŭ malkaŝe redoni al la komuna kaso.

Ankaŭ mia eksterkonventa vagado, pro neniam klarigitaj motivoj se ignori tiun de la ofendige deklarita psika sufokiĝo, malkvietigis. Iuj miaj kunfratoj, ne volante trapensi pri konsciaj devioj el votaj devoj, limiĝis alskribi tian konduton kiel mian karakteran strangecon; aliaj ne nur ironie konsilis al mi psikiatran viziton nur pro tio ke mi ekmontris taksi iliajn objektivisme motivitajn kritikojn artifikaj psikmaĥinaĵoj, kiuj certe ne ekzistis.

Ĉio tio provokis, tamen, post kelka tempo, la intervenon de la centra superulo, kiu dispoziciis, por ke ne estu minata ĉe eksterkonventanoj *la estiman trezoron,* ke mi transloĝiĝu ĉe alian konventon, poste ĉe alian, poste plue ĉe alian: ene de tri jaroj oni min devontigis adapti vivadon ĉe dek diversaj sinsekvaj kunvivadoj kaj por malebligi, ke instaliĝu per ligaj suspektindaj kontaktoj pluaj malordoj, kaj por kvietigi konventulojn kolerajn pro mia malpaciganta ĉeesto: tial, kie ajn mi gastus, ĉe la novaj kunfratuloj mi flaris, kiel vetite, jam superŝvebiĝanta mian fiecan famon kaj do jam vaporiĝintaj for la fidon kaj konfidon bezonajn por ekkunvivi. Pri tiu ĉi etoso mi havis trejnitan orelon ĉar la longa trakonventa vagado fatale trejnis min por distingi la plej etajn klaĉajn flustrojn. Estis dum tiu vagado, ke mi perdis la zorgon elpurigi je ĉiu ŝoka spico mian lingvaĵon, jam ne nur miaene konformiĝinta al la prudaĉo de la studentoj kaj kontestuloj aŭ al apudvulgarejaj lingvaĵoj; kaj tio kreskigis la komunuman malplaĉon koncerne min, rajtigitan de la nova publika etoso pliŝrumpanta kun provokaĵoj. Kaj pro mia nemalofta plendo pri malfida traktado aŭ gurdado de miajuĝe senmotivaj malvalorigaj malamikaj resentoj, konven-

tanoj ellasis, ke la “renverŝulo” afektas grandecmanion kaj viktimecan persekutiĝemon pro tio ke li ne kuraĝas eniri la vivon kiun mem montras tiom admiri. Tiu tensio ŝvebigis min inter kaŝita timo kaj malprudentaj reagoj. Kelkaj konsilis, ke mi, sendifina nebonfartulo aŭ, plivere, psika deviemulo, psikoterapiiĝu *“eventuale ĉe samfakaj viaj amikoj”*.

Sume mi akiris novan eksterigitan memkonscion, kies efikoj tamen min malmulte helpis en la plenumenda entrepreno kiun mi ne kuraĝis plenumi: ju pli kreskas tiu kondamna juĝo pri mi inter la fratularo des pli haste mi ricevos la puŝon por eksfratuliĝi, oni antaŭvidus! Male, tio provokis en mi reagan reziston ŝtopantan ekajn provojn al ekskonventiĝo. Ankoraŭ mi ne suspektis, ke ne eta fratularparto, tedita pro mia ne plu eltenebla kunvivado, mem estas ekpensanta sin definitive liberigi je mi.

Eble mi jam aludis pri mia inklino al detrua envio, tio estas al la sufero pro alies altkvalitoj kaj ecoj moralaj, kaj al la deziro, ke ili estu perdataj, inklino kiun mi preskaŭ ĉiam klopodas kontroli kaj konvertigi en ĝian kontraŭon *(instinkta* enviado transformita al *vola* kontentiĝo pri alies ecoj kaj virtoj taksitaj konkurantaj kaj konkurencaj kun mia prestiĝo). Rilate tiun temon oni scias, ke, ĉe la katolika instruitaĵaro atingas moralan egalkulpecon la konsci-vola detrua deziro kaj la respektiva plenumiĝo: malbeni, antaŭ Dio, koincidas kun efektiva damaĝo al la malbenito, kaj inverse: la fakta plenumo malmulte pli gravas ol la simpla volo plenumi. Kiom, do, da mortigantoj en la mondo? Ne nur la plenumantoj de mortigo! Bonŝance validas ankaŭ, tia distingo, rilate la bonon: la sincera emo beni kaj bonfari samvaloras bonfaraĵojn!

Se profiti de tia mia nuna inklino malkovri mian envio-inklinon, kompletigu ties gamon jeno: foje ekburĝonis al mia menso admiron por la nekredantoj je Dio. Abrupte ili revestiĝis je inteligento pli granda ol la mia kun bezonoj pli profundaj ol la miaj; ilia duboj - kun okazaj deklaroj pri sia nekredo - kroniĝis je nobleco ĉe si kaj estimo ĉe aliaj. Estimo je kiu mi ne povis disponi. Ŝajnis, ke mia dikredemo perdigus al mi ion legitime envieblan. Por forpasi trans tiun senton, mi devis, foje ne nur superrigarde, rekonsidere reiri al la fundamentoj de mia dikredemo.

Mia enviemo nun ne plu direktiĝas al moralaj virtoj aŭ religiulaj reputaciaj sukcesoj; nun mi envias mondumajn sukcesojn kaj materiajn komfortojn. Ofte la envisento direktiĝas al konatoj edziĝintaj, sed tiu envio ne intencis rabi ilian feliĉon kiun mi imagis kaj bondeziris granda: nur ĝi trapenetrigis en min haloon en kiu la seksemo pli kaj pli apudigis mian fantazian scivolemon al ilia kruda kuniĝa forto.

La centra kaj loka superuloj akordiĝis demeti la sintenon de truda devigo por lasi min agi libere, provante, eble, eltrovi la fontojn de miaj malkontentiĝoj; sed miaj kontentiĝoj jam estis foraj, aleksteraj, en revata familivivo, en imagitaj tenerecoj, kaj tradraŝitaj de la sociaj renversaj skuadoj. Dume kreiĝis, krome, ne sen ŝajnaj fundamentoj, interkonventana konvinko, ke mi havas ne senamajn amikecojn aŭ eĉ kaŝan kunulinon. Estis suspekto ankoraŭ ekscesa, sed mia konduto pravigis tiujn konkludojn, kiuj fakte similis al miaj revataj perspektivoj.

Superuloj tial inventis, strebante por akordiĝema miksaĵo inter miaj flagre revolucionta idearo kaj la severaj juĝoj pri mi de la kunfratoj, por mi novan taskon, pli laŭan al mia temperamento, oni persvadige provis novan strategion, kun la intenco, min denove enplekti en la religiulan kunvivadon: oni min igis akompananto de pilgrimuloj al la sanktejo de Lourdes. La novaĵo, pormomente, min logis ĉar perspektive multobliĝus la kontaktoj kaj la opiniŝanĝoj utilaj ankaŭ rilate la oficialan evangelizadon kiun mi ankoraŭ ne intencis tute preterflui. Tiel taskite, paŝpostpaŝe mi larĝigis la sferon de miaj movoj kreante por mi, krom malproksimiĝo el la "pensokosmo de seniniciataj kaj sataj konventanoj", sennombrajn okazojn kapreoli tra tuta Eŭropo tanĝante aliajn kontinentojn kaj kontaktante plej diversspecajn homojn. Kaj naskiĝis intensaj rilatoj kiuj liveris ŝajnan vivplenecon.

*"Kaj ankaŭ via instrua emo,* amsprite diros plimalfrue simpatia persono*, povis sin ellasi...".*

Vere, eĉ tia emo, kontentigita, ŝajnis malekzistigi aŭ ignorigi miajn nesolvitajn problemojn. Aspekte sed ne reale.

Mi pri Lourdes kaj tieaj Aperoj kaj miraklecaj eventoj, jam nesupraĵe kaj detale mi informiĝis pro la neceso distingi kion historie kaj teologie certigitan de la eklezio disde kio emfazita de pieco kaj de onia deziro renkontiĝi kun supernaturaĵoj; pro tio mi min provizis per bona literaturo kaj jam dum antaŭa persona pilgrimo haltadis en la loko plurajn tagojn. Pli ol pilgrimo oni dirus feriado, kvazaŭ anstataŭo de montara aŭ marborda pasado de libertempo. Mia certeco pri la objektiveco de la mariala evento, nome Mariaj Aperoj, fundiĝis precipe sur la kohereco inter la deklaroj de la absolute nekulturita viziulino Bernardette (la elvida informantino pri la Aperoj de Maria kaj ties mesaĝoj), kaj la evangelio: laŭ mi, oni povas diri, ke ŝi plastikigis, unue priskribante la cirkonstancaron de la mesaĝanta Apero kaj poste pervive, alian evangelion kvankam sciante preskaŭ nenion pri la singularecoj de la skriba evangelio.

Se mi entuziasme akceptis la novan proponon kaj ekakompanis grupojn

vagonare, aŭtobuse kaj aviadile, pli turisme ol pilgrime, mi ne antaŭvidis novajn psikajn problemojn. Ĉio bela dum mi estis kune kun pilgrimuloj aŭ peris eksplikojn pri la fundamentoj de la kristana kredo kaj ĝia respekto pri la intelektaj postuloj de la homa racio; la afero komplikiĝis kiam mi devis haltadi aŭ surgenuiĝi antaŭ la Groto de l' Aperoj, kie la pleja zorgo mia estis eviti, ke rekta preĝo fariĝu turmento. Mi devas konfesi, ke plurfoje mi restadis kun la okuloj mallevitaj kvazaŭ mi atendus de la sankta statuo riproĉojn aŭ malaprobajn signojn. La kontraŭstaron inter mia nova vivdirektiĝo kaj la alvoko de mia konscienco, kiun mi fortenis ĉe la Apera Groto, mi kurbiĝadis por sufoki per doktaj konversacioj kun pilgrimuloj aŭ per detala rekonstruo de la historio de la Aperoj, kaj per respondoj al ĉiuspecaj objĵetoj aŭ klarigpetoj, spontanaj aŭ arte inspiritaj. Pri tio mi akiris kompetenton kaj vervon tiajn ke mi kreu al mi ankaŭ maskon silentigantan la konsciencajn bruegojn.

La longajn preĝmomentojn mi ruze kaj ĉiupretekste evitadis por ŝpari al la pilgrimantoj seniluziiĝojn pro mia velkanta pieco. Tio minimume suferigis min ĉar la arton de simulado, ne nur instinktan, mi bone praktikadis jam de la kolegia vivo.

Kablamte en tiu mia tordita konduto, iun posttagmezon, sidante kun aliaj viroj por trinki kafon ĉe la baro de monaĥineja gastejo, mi vidis tri junajn virinojn kiuj, certe ne suspektante, ke, sub miaj pli civilaspektaj ol ekleziecaj vestoj sin kaŝas sacerdoto, gaje sed malŝerce provis varbi pordancajn partnerojn inter uloj revenantaj el lokoj de la pilgrimaj devotaĵoj, kiujn devote partoprenis ankaŭ mem. "La fratulinoj de la apuda monaĥinejo-gastejo estis preparantaj dancfeston, kiun rajtas partopreni nur gefianĉaj, fianĉeskaj, paroj".

Ravite mi aŭskultadis iliajn vortojn kaj observadis ilian entreprenemon ĉe okazaj kafejo-klientoj, ankaŭ akompanataj de propraj familianoj, kiam junulinoj adresiĝis, iom impete, al mi:

*"Ĉu vi povas konduki min?",* elbobelis unu konfidence. *"Se vi havas amikojn, ili por miaj kunulinoj. Ni dancos: la monaĥinoj neniam scios, ke ni neniam intervidiĝis antaŭe kaj eble ni intervidiĝos estonte, ĉu ne?",* pliekspliskas alia. *"Dancado, nur dancado... sen preĝoj",* aldonas malicete/dolĉige la tria.

Ĉu tio ne estas la okazo tiom dezirita kaj, eble, longe subpremata? Kial malplaĉi al ŝi kaj malhelpi al mi la ĝojon kiun mi tiom revis? Des pli ĉar el ŝia hispaneca prononco eliras tiom da sereneco kaj pureco dum el ŝiaj okuloj travideblas nekonata palpebla alloga mondo. Ignorante la disponeblecon de aliaj kunestadantoj, mi min montris pretiĝanta al harmoniemo.

Ŝajnigante heziton, plivere dubante pri mia taŭgeco al kavalira partnereco,

mi varbiĝis kaj post la vespera torĉa procesio, movite de ĝojo kaj timo konfliktantaj, rendevuis ĉe la sama loko. Ŝi, min vidinte, feste mansvingetis kaj poste disetendis larĝe la brakojn ilin ekdisĵetante al mi, kaj, hispane parolante, kisis mian vandon kaj ŝia tuta disvolvita staturo apoge flugtuŝis kun hasteca plaĉeco plurpartojn de mia persono. Ĉu ŝi provas kredigi rutina nian interpartnerecon aŭ ŝi ĝuste tion celas? Ŝi ne montris tute malĝenon kiam mi reanticipis, ke la danco ne estas mia arto.

Tiupunkte mi intime certiĝis, ke mia timo je ridindigo estis superita dum ŝi glite/ŝove min trenis ĉe la pordon, kie alta fratulino nin ridete salutis, kaj ni, brakenbrake, eniris tuj la dancsalonegon. Neelpeteble, kun altira bruskeco, ŝi min trenis centren, inter la dancantoj kaj, ĉar mi moviĝis rigideen la ritmo de malrapida valso, ŝi gracie skuetis mian figuron iom anticipante la sinkronajn movojn. Post ĉiu skueto, dum kiu ŝia vesto el ŝia korpo susuris al la mia, ŝi impetetis al mi kompense apogante sian vangon sur la mian: momentaj fordoniĝoj, eble, kiujn mi tamen ne povis elĝui ĉar tro absorbita de la zorgo ne surtreti ŝiajn piedojn. Malgraŭ tio, mi estis altire trarigardanta ŝiajn nigrajn okulojn, la leĝeran kolieron kies ornampendaĵo saltetis tie kie alloge imponas la mama disdividiĝo: pri mamoj, tiuj ĉi estis tiel rigide, malgraŭ en maldikeco, elstaraj, ke ŝajnis rostretoj protekte pintitaj kontraŭ miaj imageblaj ripoj aŭ kontraŭ miaj okuloj al kiuj ili sen ĝena pudoro sin paradis. Ŝiaj surŝultre ondiĝantaj haroj tuŝetis mian vizaĝon, dum ŝia dekstra mano obeigis mian korpon, rigidan el si mem kaj foje malrapidiĝantan pro abrupta apero de nova alloga ŝia graciero.

La aspekte iom freneza danco estis de tempo el tempo, miabonŝance, interrompata de alta fratulino, preskaŭ juna, mangeste rondiriganta la parojn laŭ facila, sed intensa, skemo. Tiupunkte ŝi, eble pro manko de la senpera strikta kontakto kun la partnero, decidis elviciĝi trenante min al apudaj sidiloj; tiam mi profitis por konversacii kun ŝi, por elsuĉi pli da informoj pri ŝi; intuiciinte mian deziron, ŝi kun aspekta malzorgo elbuŝigis, momentpaŭze, sian nomon ne multe atenta al miaj reagoj, kiuj estis:

*"Via nomo komunas sed ĝi akiras splendon de vi".* Kaj ŝi ne inundiĝis je la deziro aŭdi la sonon de la mia, preta apenaŭ elbuŝiĝi.

Haltigante la rigardon sur min, ŝi ekridetis kvazaŭ antaŭ surpriza novaĵo; sed post cezura momento, malmulte zorgante babilaĵojn aŭ mian nomon ĵus fine miainiciate komunikitan, ŝi jam glitis centren de la salono min movigante, je nova muzika ritmo, kiel solidan apudaĵon, kaj, malgraŭ la apudaĵo, ekplektis dancajn movojn ĉe ĉiu ekmelodio. Tiom altiris ŝin la dancado ke eĉ sen peti

mian konsenton neniam regresis antaŭ invitoj de aliaj partneroj, kun kiuj gracie impetante ĉe siaj kruroj kaj ŝajnfragilaj koksoj, kion ŝi eble ne okazigis dum kontakto kun miaj rigidaj manoj kaj brakoj de ŝi malmolete direktitaj. Certe nur por danci ŝi trenis min ĉi tien. Inter tiuj ne tute al mi plaĉaj sinkoncedoj al dancpartneroj kaj revenoj al la seĝo, mi observadis ŝian vizaĝon apenaŭ faltitan de la buŝangulaj komisuroj ĝis la nazbazo, kies angulecaĵoj tamen estis plaĉige preskaŭ malaperigitaj kaj pufigitaj de ŝia senreteneme renoviĝanta rido; rido, kiun ŝi disdonis sendiference al ĉiu partnero kvazaŭ ĉiu estus la kavaliro kiu ŝin rikoltis el la danĝera vojo kaj kiun ŝi longe atendadis. Ĉiun el tiuj disradiataj ridoj, malpliigantaj la miajn, certamomente mi perceptis ŝtelita de mi tiom, ke mi deziris, ke la danco finiĝu. Finiĝis meznokte kaj post mallonga kaj dispecigita konversacio ĉe bufedo kaj, interŝanĝinte la adresojn, ni reciproke kisis survande. Kaj ŝi estis jam fore kun sia ŝveba rideto. Se ŝi serĉadis partneron kun kiu fianĉinaspire rilati, kaj eble lin trovis inter la danculoj, certe tiu ĉi ne estis mi.

Neniam mi ricevis aŭ sendis leterajn aŭ alispecajn mesaĝojn. La tuta ĝojo kiun mi provis kun ŝi malkombiniĝis, en mia memoro, pro la sensa dubo, ke ŝi eble mallogiĝis pri mia danca partnereco; en ŝi mi neniam sukcesis imagi kelkajn el tiuj onidiraj koketaĵoj de la delogema virina arsenalo, krom eble la energia fragileco kun kiu ŝi movigis min. Sed de tiu momento, laŭlongatempe, kiam mi imagis virinon ĉe mia vivo, tiu ĉi devis havi la vizaĝon kaj ridon de ŝi, ĉar ŝia silueto nostalgiekscite ŝvebis en mia fiksiĝanta fantazio kiel la plej viziebla el la atenditaĵoj.

Tra tiuj oscilantaj ĝojoj, ellogis min ne malgrava incidento kuspe trakaresanta miajn suferantajn sentimentalajn aventurojn. El du interbabilantaj pilgrimulinoj mi kredis kapti tiun esprimon: *"kia danda fratulo!"*. Ĉu ili aludis min, ĉagreniĝante pro mia konduto? Ĉu ili legis en mia animo kion mi ekmalkaŝis nur al mi mem? Se ili min penetrus funde, ili malkaŝus, ke temas nur pri duonvolo ĉar la mia estis ankoraŭ platona amo al ĉiuj virinoj, ne jam al iu aparta. Se eble eĉ tion ili kredis, prave ili juĝis min *dando* ĉar tiu figuro, ankoraŭ nure idealigita, al mia fantazio profiliĝas kiel ulo tute ema allogi kaj allogiĝi. Senhorore mi ekkonsciis, ke jam ne plu eblas kaŝi al mi mem, ke la mia fariĝis afektece ŝajna ĉasto kaj, ke ĝi ne plu sukcesas malhelpi al si eksteriĝi skandalante kredantajn personojn. Ankaŭ tio ĉi kontribuis kreskigi en mi iun nerifuzitan sentumon de akceptita frivoleco kvankam kun la samtempa percepto, ke la antaŭa aventureca sorĉiĝo estas jam forviŝiĝanta.

Enkadre de tiuj duonseniluziĝoj, kio restis stabila estis la plia pereiĝo de la

spirita orientiĝo de la idealoj de la fruaj pastrecaj tempoj, kaj kiam tiujn ĉi mi travidis pluvivantaj en aliaj pastraj fratuloj, tuj mi hastis tiujn ĉi taksi konformismemaj kaj liberrezignaj, kaj akuzi je juga formaleco. Min ekregis nur la penso ekflugi al la ĝardeno de l' mondumo. En tiu ĉi malkombiniĝo de idealoj, oni pensus plani avancan strategion antaŭvide al realigado de la jam maturiĝintaj sopiratendoj; male mi daŭrigis resti inerta en la mano de tajdantaj sentumoj kaj timumoj kvazaŭ tiuj ĉi estus mem la revita senliga vivo. Akumuliĝo de sentoj kaj pensoj, kontraŭantaj unuj la aliajn, senlogike daŭrigis bloki min.

Kompense, mia aktivado fariĝis tiel intensa, ke ĝi povus aspekti la moviĝado de la planedoj, laŭ difino de konventanoj.

Estis fatale, ke la pilgrima akompananto alvenu ankaŭ ĉe la sanktejon de San Giovanni Rotondo (Centra Italio, Foggia) kie aktivadis tiu persono de Dio leganta en la koroj eĉ eksterkonfesprenejo, laŭ komune konataj diroj kiujn mia suspektema atento juĝis laŭveraj ankaŭ se raportitaj ne sen troecoj.

Jen kiel okazis. Kvardek samfirmaaj okupitoj estis farantaj rondvojaĝon tra Italujo kaj unu el la vojaĝceloj estis ĝuste ankaŭ preterkura, kaj sen eksplicitaj devotecaj taskoj, vizito al Patro Pio[2]; sed tiu celo pravigis, ĉe iliaj okuloj, mian ĉeeston inter ili. La turisma gvidisto obtenis, ke Patro Pio ricevu niajn salutojn per manpremo en la sakristio tuj post sia malhaste intense elparolata meso. Mi estis samtempe indiferenta kaj agitita, senĝena kaj nesentima.

Mi nutris pri la afero "Patro Pio" miajn personajn juĝojn. Ofte oni estis parolinta al mi pri la mirindaĵoj aŭ eble mirakloj koncerne tiun personon, kiujn mi emis eĉ kredi veraj, kvankam ne multe bezonataj. Pli klare, al mi malmulte interesis ĉu ili estas veraj, ili forstaris ekstere de miaj dezireblaj konstatoj: eble tiu ĉi sinteno iel defluis, krom el timo esti honte trafoliumata, el mia katolika edukiteco kiu nemulte aprecigas tiajn fenomenojn kaj eĉ ilin subtaksas kiel la plej malaltajn signojn de sankteco, kvankam ĝin foje rimarkanta.

Alia samtempa afero min malkvietigis. Mi jam aŭdis kaj konvinkiĝis, ke tiu ĉi homo kondutas kiel vera kredanto, homo kiu malkovris, ke la konsista ĝojo de homo koincidas kun ligiĝo al sindoninta Kristo, en kies amo li senrezerve servas la homojn por ke ili atingu la totalan saviĝon. Homo je supernatura kaj

[2] Patro Pio, naskita ĉe Pietrelcina (Benevento, Suda Italio), en 1887, pastre kapuceniĝis en la konvento de San Giovanni Rotondo (Foggia, Suda Italio), kie animzorgis ĝis la morto en 1968. Ĉar la *miraklecaj* signoj priparolataj fariĝis fonto de polemikaj disputoj kaj konfuzegoj, Sanktaŝegaj aŭtoritatoj enketis pri li iom tro severe; sed ĉio finiĝis sen obstakli la kreskantan kunkuron de milionoj da personoj, el la tuta mondo, dezirantaj preĝi apud li aŭ sin sakramente konfesi ĉe li. La papo Johano Paŭlo la 2a lin beatulo deklaris en 1999, kaj sanktulo la 16 de junio 2002.

mistika vivo, kiel oni dirus en kristana lingvaĵo.

Mi timis tiun homon ĉar mi, kvankam kredanto kaj zorganto por solidigi aliulan kredon, nun aperte deziris, ke Dio iel forestu de mi por ke miaj revitaj komfortaĵoj, malgraŭ ilia ĉiam prokrastita plenumiĝo, ne risku perdiĝi. Dum la atendaj paŭzoj mi obskure ektimis, ke tiu ulo povu min breĉi kaj treni al kelka stranga direkto.

Kaj jen ni antaŭ Patro Pio tuj post lia mescelebro. Ĉiu el ni povis, laŭdezire, kisi lian manon, kvankam li nur pro obeo al siaj superuloj kaj rezignacie tion akceptadis. Ĉiu el ni iom ĝenite estis gratulita je lia parolo, nemalofte gaje ŝerca.

Jen mia vico ĉe la Patro, en la sakristio. Mi klopodis anticipi, ridete mienante, ke mi ne havas komplikajn spiritajn problemojn subigendajn al lia analizo, kaj intense esperis, ke lia atento rapide pasu sur la sekvantan vizitanton. La Patro haste apenaŭ tuŝis per la dekstra, okulrande min rigardante en la okuloj, mian hezitantan dekstran manon dum samtempe frapetis per sia maldekstra mano mian dekstran tempion dirante duonŝerce/duonserioze: *"Ha! vi venis nur por ŝanĝi aeron!",* kaj tuj adresis siajn manon kaj parolon al la sekvanto.

Mi min sentis feliĉa pro la evitita lia entrudiĝo en min: certe mi bonŝancis min teni for de miaj ĉiam pli komplikiĝantaj psik-spiritaj problemoj!

Sed iom post iom min ekokupis dubo kiu fariĝis preskaŭ certeco: *"Tiu ĉi homo komprenis ĉion pri mi... Li kaptis, ke mi kultas aliajn idealojn!... Ja,* ŝanĝi aeron*, ne vivon!".*

Mi lin ne plu renkontis. Sed tiu vangofrapeto kaj tiuj vortoj, se dekomence mi sukcese deturnis el memoro, jarojn poste surmetiĝis al mia preskaŭ nostalgia analizo kun la espero trovi en ili ion pozitivan. Ĉu juĝo definitive negativa pri mi?

Inter la personoj renkontitaj, iuj restas malplej longe en la memoro dum aliaj eble neniam forgesiĝos samkiel la juna paro, brila laŭ diversaj starpunktoj aparte *en ĝia iremado tramonda* kaj kvazaŭ aktoraj en la afabloplena rakontadarto. Precizaj en konversacioj kaj preskaŭ naivaj en fidemo al la proksimuloj, ili simpatiiĝis al mi ĝis min viziti ĉiusemajne kaj eĉ pli, kiam ni ripoze gastis en mia konvento. Mi opinias, ke funkciis kiel altirilo ĉe ili miaj interesoj pri la psikologio kaj psikanalizo, ŝprucigitaj de teologiaj ŝuteroj, kaj la de mi emfazitaj intuicioj-malkovroj de la psikologio de la grafologio, kiujn mi rakontadis verve kaj pasie. Certamomente ili decidis manifesti al mi sian familian amrilatan situacion: ĝuste tion mi provis eviti preferante esplori kaj pridiskuti

facetaĵojn de vero rilate religion, pri kiuj mi nutris kvazaŭan voluptemon, ol problemojn de konduta kohero kun la kredo kaj de praktikaj komplikaĵoj.

Estis li kiu insiste petegis, ke mi aŭskultu lian dramon: li neniam havis kaj havas seksajn rilatojn kun sia edzino ĉar por ŝi li ne sentas iun ajn seksallogon, sammaniere cetere rilate ĉiujn virinojn kiujn li rigardas kvazaŭ sensensigite kaj sensentigite, malgraŭ vola klopodo cedi al iliaj graciecoj. Altirforto al li nure el viraj korpaj, kvankam al tio li ne indulgas, eĉ ĝin volas kontrasti.

Senvole, mi min gardis el naivaĵoj aŭ malprudentaĵoj: iam alia samseksulo unue parolis al mi pri sia ŝajne malakcepta kondiĉo kaj ne multeposte ekpretendis, ke mi fariĝu lia partnero, eventuale eĉ kun rekompenso. Ne estis tia ĉi-kazo ĉar la viro manifestis rimarkindan, neniel afektan, religian sintenon kun kohera morala konduto. La problemo lin kirlanta estis lia edzino kiun li, iam, estis esperinta, kun nesufiĉe fundamenta bazo, edze feliĉigi, dum nun male konstateblas ŝia malfeliĉo sub ridmieno kaj tramondaj vojaĝoj. Iujn semajnojn poste, ankaŭ ŝi venis konfirmi kion konfiditan de la edzo kaj plori. Ili jam estis traktitaj kuracile kaj psikologie de fakuloj; sed kun neniu rezulto, ankaŭ de sacerdotoj ili ricevis nur kuraĝigojn kaj invitojn al pacienco kun klarigoj, ke samseksema impulso el si mem ne estas peko, male estus sensenca decido indulgi al ĝia inklinforto, kaj ke estiĝis grava peko esti krediginta al la edzinigota partnero normalan atenton pri ŝiaj seksaj ĉarmaĵoj. "Sed, li plipreciziĝis, tiam mi kredis, ke kunhejmiĝo kun virino kapablas modifi miajn inklinojn".

Ŝi ankaŭ jam aŭdis, ĉe pastro pri kanonika juro instruisto, ke se vere kaj demonstreble la edzo ne antaŭinformis pri sia samseksemo la edzinigotan partnerinon, la geedziĝo konkretiĝis nur ceremonie do nevalide. Sed kiel pruvi tion? Niaj konversacioj daŭris tra monatoj. Kun neniu rezulto, se ne ekskludante tiun de la ripetado de la propono kaj enkadrigo de la kristana moralo: samseksemo ne estas malbono, malbono estas nur sekvi ĝian impulson. Aplikeblas ĉiam la sama principo: seksa plenumado eksteredziĝa kontraŭas la dian volon: samseksemo estas eksteredziĝa vira/virina kuniĝo, tial... Cetere samseksemo ne malebligas la voton de virgeco kaj ankaŭ, en ĉeesto de apartaj psikvolaj cirkonstancoj, la senedzinan sacerdotan vokiĝon samkiel historio demonstras: dependas ĉiam de la orientiĝo kiun iu volas doni al sia vivo. En sekvanto de la sacerdota vokiteco, la seksa inklino se ne direktiĝas al unu sekso emas al la alia. Ambaŭkaze la sama rezigno ne tro malsimilas unu al la alia, aŭ, plibone, ambaŭkaze persiste agadas la sama kroma sindoniĝo al Dio kaj al homoj anstataŭ al partnero ankaŭ rilate la sentajn kaj familiajn plezurojn kaj zorgojn. Tiam mi ne konis centrojn de reorientado de la samseksemo, kiuj per

plurpsikologiaj metodoj sukcesas, kun ne neglekteblaj rezultoj, redoni interseksajn rilatojn en la paro.

Preskaŭ abrupte niaj rilatoj ruiniĝe fuŝiĝis. Eble pro tio ke trediĝis ankaŭ alia fadeno, eble nur perturbe, tiu de miaj problemoj. Fakte, la virino komencis manifesti al mi tiajn simpation kaj raviĝon ĝis aliigi min en sian idolon, kion mi maltuj reage komprenis, ĝuste al mi inspirante pli ol elkorajn renkontiĝojn kaj krome ne kaŝante tion al la okuloj kaj oreloj de sia edzo, eble por eksciti ĵaluzon de la „fridiĝinto", mi ĉekomence opiniis. Por ŝi, vere, li nutris nekaŝitan ĵaluzon, kiu en tiuj ĉi okazoj akiris ion fascinece pasian. Surprizis tiu ĵaluzo ĉar koncernanta virinon unuavide ne lian, de li neniam sekse serĉatan; duavide vidiĝis psika monstraĵo: ŝin sekse eviti por ŝin alinivele posedi aŭ ŝin posedi alinivele por obstakli al ŝi seksajn rilatojn alipartnerajn.

Necesas aldoni, ke tiu virino estis ĉarme subtila sed energia, modesta sed kutimiĝinta al moviĝoj kiajn edzino elpensas por formovi edzon ŝtoniĝintan; tamen ŝiaj graciesprimaj moviĝoj, jam faritaj eĉ kutima konduto, neniam taŭzis la belan ekvilibron de proporcioj. La malakordo unue eksplodis en ilia kunvivado, poste ankaŭ antaŭ mi en konventaj renkontiĝejaj lokaloj, tiom brue kaj krie, ke la konventa superulo, post vanaj provoj ilin kvietigi, sendis ĉiujn eksteren.

Bonŝance mi ne mankis je invitoj pledantaj memori kion la psikologio, moderna kaj humanisma, jam delonge malkovris: la konfidenculo emas enamiĝi je sia konfidito kaj kelkfoje tiu ĉi emas cedi al tiu emo. Tiu situacio kostas en la konfidito, krom la peno por ne dispeli la moralan sintenon, prudenton kaj memkontrolon por ne plagi sin mem kune kun la konfidenculo per facila sed abomeninda kulpo. La malpaciĝaĵo inter ili kaj kun mi sensolve daŭris ĝis devigi min ilin forlasi al ilia destino, tiom pli, ke iliaj konfidencoj ankaŭ al mi ekperdigis serenecon.

Postkelkjare mi estis invitita de la dioceza tribunalo de la geedzaj aferoj atesti, laŭ iliaj antaŭaj konfidencaj konigoj ĉe mi, pri kies sekreteco la geedzoj estis lasinta allasigan dokumenton, pri ilia stato de seksuma geedza plenumo: mi rakontis kion ili iam, eksterkonfese, plurfoje kune kaj unuope konfidis al mi kaj kion ili nun deziras, nome ke mi manifestu al la tribunalo: ke ili unuopule kaj kune rakontis, ke ili mem neniam sekse sin konis!

Neniam plu pri ilia situacio mi interesiĝis; mi scios poste, multposte kaj hazarde, ke ŝi instruistiniĝis kaj feliĉe reedziniĝis kaj naskis filon; pri li, male, nenion, ĝis nun, mi scias malgraŭ serĉadoj kaj informpetoj ĉe liaj tiamaj kundungitoj kaj jamaj kunemeritiĝintoj.

Sociaj eventoj kaj lakmusaj cirkonstancoj jam estis vere tradraŝantaj mian menson, mian tutan eston. La ses- kaj sep-dekjaraj studentaj kontestadoj, eĉ se dekomence suspekte taksitaj unuanime ĉe la frataro, fintralikigis ion ankaŭ en konventojn. La religiula obeo, tiom haloita je sankteco, ekinvestiĝis je kritikoj ĝis juĝiĝi rezigno pri memstareco kaj rifuĝo de nematuriĝintaj persono kaj socia apartiĝemoj: en mondo jam leviĝinta al la adolta staturo, religiuloj persistas resti bezonaj je patroneca ŝirmiĝo, kies ekstremoj horore evidentiĝus en la proceso kontraŭ nazioj de Nurenbergo, gurdaĵe citita laŭ tiutempa pasema modo, nome ne rimarkinta la ne senrimarkeblajn diferencojn, kie torturintoj kaj mortigintoj sin senkulpigis dirante, ke “ili obeis superajn ordonojn”. Je preteksto de obeo, iuj despotintoj de aliaj perdis sian respondecsenton.

Ĉiukaze, ankaŭ kiam la sloganoj restis en la fono, la obeo tratrempiĝis per senutileco kaj eĉ malutileco. Superuloj, kies aŭtoritateco estis ĉiam pli sapeita, kaj timigita inter duboj kaj tentoj al unuavide malpli damaĝaj cedoj, foje rezignis ordoni dum regatoj interpretis laŭkaprice regulajn preskribojn. En tiu etoso la superulstato mem aspektis pli kaj pli nesentiva rilate al la konsciiĝo pri homaj rajtoj. Kiam oni aludis distingojn inter rajtoj kaj orelfrapaj rajtoj, eksaltis akuzo de senrespondeciga direktismo.

*“Danĝeraj sed nur pasemaj blovoj de moderna konsumada kulturo kaj momente kriantaj filozofioj flagflirtigantaj la novmodajn sloganojn”*, esperiĝe vortigis pri mi la pacienculoj optimistaj; *“jam estas atingita la apostatlimo”*, refrenis senespere la ĝenatoj pesimistaj. Mia mondumiĝo, ekdatiĝinta delonge antaŭ, nun fakte pliintensiĝis kaj esprimiĝis per novaj sendiskutaj teoriumaĵoj, taŭgaj por revoluciulo plentempa, aŭ, laŭ iuj, revulo ekstertempa. Kondiĉe ke *“li jam mense ne ekdifektiĝis”,* sampensis ambaŭ flankoj.

Ankaŭ la malriĉecvoto, kies aparteco signas “sinallasi nur al Dio” kaj zorge uzadi rimedojn, malŝparis pecojn laŭvoje, ĉar la kontestadaj rotoj kredis malkovri, ke en mondo de ekspansianta riĉeco perspektive liveranta bonstaton al ĉiuj, la religiuloj per siaj rezignoj konvinkus la proletojn akcepti ekspluatiĝon kaj pravigus, subtile kaj per emociaj influoj, la ekspluaton fare de la labordonantoj. Sin senigi je komfortoj signifus ekpasi de virto al malvirto, el seniĝo al kunkulpiĝo. Kaj tial la serĉata malstabileco, en konstanta laborado kun homoj por homoj, por manifeste meti sian stabilecon nur en la Sinjoro kaj en la fiduloj por kiuj oni apostole laboras, jam manifestus sian fraŭdecan ruzecon. Kaj, krome, kial ne peni perlabori sian panon per produktiva laboro en uzinoj kaj oficejoj aŭ inter kamparanoj? Kunfrataj pastroj jam elektis manla-

boron facile trafante la novajn modojn kaj laŭdojn en ĵurnaloj kaj publikan konsenton eĉ ĉe engaĝitaj laikaj katolikoj kaj kelkaj ekleziaj moŝtuloj.

La ĉastecvoton, kiu, laŭ evangelio, anticipas figure kaj reale la estontan kondiĉon de la resurektontoj ĉe Dio, oni ekvidigis kiel danĝeran separatecon el la mondo, kiel kontaktomankan izoliĝon malebligantan kompreni kaj kunsenti apud la realaj homoj. Plie, ĝi nun konsiderendus subtila ilo por, malŝarĝite je familiaj penoj, pli efike agi por ligi fidulojn al la ekleziaj strukturoj. Kaj pro tio ke ĉasteco, perdante sian motiviĝon, tuj serĉas sian kontraŭan objekton, malfacilis por la novmoliĝintoj malhelpi al si fantazii pri inecaj tenerecoj aŭ ne cedi al la tento kontakti, kiel limfo en osmozo, la inajn formojn de la plej apuda, se tion rimarki per ŝajnekscesaj vortoj, edziniĝebla virino, kaj fakte ĉiutage gazetoj informadis pri pastroj aŭ religiuloj, ajne malajne, dispense aŭ sendispense, edziĝantaj.

Certamomente oni aŭdis, ke la ribela nova interpreto de la religiula kristanismo eketendis, favoratajn de la inismaj ventoj, odorojn eĉ en virinaj komunumoj. Laŭ ondoj eĉ religiulinoj ekmalkovris, ke la antaŭa vivstilo nur litere respektus la evangelion kaj, ke nun oni ekkapablas rekuperi ties veran profundan signifon liberigan dum la ĉastecvoto estingus trezorojn de tenereco kaj altruismo. Malpeneme, kvazaŭ per elflua kompetenteco, oni strebis malkombini kaj apartigi, ankaŭ kulturnivele, la kristanan inismon disde evangelia ĉasteco, bildigita kiel eklezia ruzilo por krei al si senkostajn varbistojn.

Kiam la ideara ŝtormo silentiĝos kaj la homoj ree penetriĝos per la kvieto necesa por rekuperi la kritikajn distingkapablojn, ambaŭseksaj religiulejoj estos perdintaj pli ol triono de sia homa konsisto.

Se la forto de tiuj konkludoj plu kaj pli modladis mian konduton, ĝi ankaŭ lasadis, en mi, necertecon ĝuste pro sia tro unuflanka favoro al la instinktaj inklinoj. Ne malfacilas kompreni, ke en jam franciskaniĝinto kaj aginto pastre, sed nun ĉesanta pensi franciskane aŭ pastre, ne tuj komplete eliminiĝas interna disiĝo. La distanco kuŝanta inter agi kaj esti dilatiĝis pli kaj pli ĝis fariĝi mem argumento kontraŭ la persisto en religiula vivo: ĉu honestas daŭrigi en tiu personecduiĝo? esti aspekte por Dio kaj fideluloj, reale nur por si mem? Ĉu ne estas devo sin forpeli el okazoj agi tiel duiĝe, forlasi la medion okazigantan tiajn disiĝojn? La medio, la religiula vivo, do, kaŭzus psikan danĝeron per duiĝo de la personeco. Estis nova akuzo kontraŭ la religiula stato!

Kaj la nova abomeno helpis analizi tiun disiĝon: *fari* resendas simple al amasoj da taskoj kaj roloj laŭvole disigeblaj disde sia propra intima difino pri si; *esti* antaŭpostulas volan adheron, identiĝon kun la farado. La analizo fari-

ĝis fonto el kiu ĉerpi forton kaj justigon por plunutri la deziron liberigi la tutan socion el la koncepto mem de religiula stato, tion igante devontiĝo kaj porhoma celo. Nome koincidigi la *esti* al *fari.* Multaj atendis eĉ deziris tian koincidon. Sed la furioza kontestulo malaŭdacis fari la lastan liberigan paŝon!

Dum la maloftaj, ĉiam pli maloftaj, komunumaj meditadoj en ĥorejo, la sinsekvoj de tiaj pensoj akiris novan procedon, ĉe kies fundo kuŝis la priutilisma demando: “Al kiu servas tio? Eĉ koncerne tiun demandon, kian utilon ĝi produktas?“. De mi poiome forfadis la emo kontempladi la bonon kaj la belon kaj la juston pro ties valoro, ĝoji pro ili mem kaj enmergiĝi en la viglan kaj estatikan stuporon naskiĝantan el ili, kvazaŭ fluo el la dia persono; kaj finjuĝis tiun emon tempoperdaĉo aŭ ankaŭ dolĉa/trompa alieneciĝo. Utilismemo jam okupis ĉiujn miajn konsiderojn: ŝajnis logike, ke religio devus laŭutilece pravigi sian ekziston. Kaj Dio? Por kio servas Dio mem? La utilisma pensmaniero estis relativiganta Dion mem!

Tamen stranga forto preventas, ke mi foriru el la religiula stato.

Se la neperdita prudento min bremsas lime de la kaskado, en ĝi provis min faligi miaj studentoj (intertempe oni renomumis min, laŭ mia insista peto kaj eble por min reallogi al la ordinara konventa disciplino, eĉ se provizore sed laŭ ŝtata leĝo, instruanto de la malnovgreka kaj latina lingvoj en urba liceo), pli kaj pli ekstremismaj, kaj miaj rakontadoj pri ilia ekstremeco al la kunfratoj. La rakontado mem fariĝis fonto de konvinkiĝo.

Sur mia tablo, foje ankaŭ en mia sako, bele figuris “L’uomo a una dimensione (= la homo je unu dimensio)” de H. Marcuse, kiu sin engaĝas enmensigi, ke tiu de la plej evoluinta niatempa kapitalisma estas socio nur ŝajne tolerema; konkrete, male, ĝi plenumas funkcion komplete subpreman rilate individuecon kaj personan kreivon, tute nuligitajn de “majstra servutigo per trankviliga teknologia instrumentaro”. Kaj kiamaniere tio koncernas la eklezion? Ja jes, tio koncernas precipe ĝin, estante la katolika eklezio la cemento antikomunisma, antiproleta, do kapitalisma, tial la precipa responsulo! El tiu libro inspiriĝis miaj sloganoj. Eĉ la malordo hipia, videbla en televido kaj laŭstrate kaj superŝarĝe priparolata en gazetoj, stimulis ion admiran kaj foje aspektis sparkoj de la nova liberiĝo.

Ankaŭ mia emo al serioza scienca esploro ekflankelasiĝis kiel afero jam gajninta sian celon, kaj tiuspecaj sloganoj lasis indiferenton, kaj potencialaj eltroveblaĵoj gustas kvazaŭ jam trivialiĝintaj.

En oftaj predikoj al fideluloj mi plukonservadis singarde prudentan sintenadon: kun iom da fulgo kaj sango, neniam mankantaj en miaj oratoraĵoj, mi

prizorgadis enmiksi la ĝustajn dozojn da katolika ortodokseco en mian pliiĝantan ne latentan kontestadon. Preskaŭ interna forto devigis min distingi kredan ortodoksecon disde argumentoj por kontesti, igante min tial ne deĉifrebla ĉe konventanoj. La nekredeblo sidis en tio: ke mi en ĉio tio estis sincera kaj samtempe nekredebla ĉe amikoj kaj malsimpatiantoj.

Tamen mi ne aŭdacis spontane eliri el religiula stato**.** Kial? Eble tiu kontestata vivstilo tiom ennaturiĝis en mi, ke mi ne sukcesis min vidi kia mi alstrebis esti. La sekulariĝo, por mi jam kutima nivele de rezonadoj kaj nivele de rilatoj kun la komunumo eble aŭspicie atendanta tiun solvon, ne trovis okazon aŭ forton aŭ puŝon aŭ altiron sufiĉan. Stranga praktika nedecidemo kontraŭis la stentorecon de la ideo-proklamoj. Mi min vidis pli kontenta kiel kontestulo ol kiel liberiĝinta homo. Milfoje mi desegnis ene de mia menso la liberigan trairon, sed la plurrefojaj rezigno aŭ prokrasto ŝajnis min liberigi el sento de frakasiĝo aŭ de kulpo dum samtempe eventuala nova pasia okupo absorbis energiojn kaj tiklis atenton, kiel partopreni en publikaj manifestacioj ekzemple: ankaŭ tiu ĉi kontribuis vuali la horizonton**.**

Dume necesis plu daŭrigi en la agado. Kie, do, trovi la motiviĝojn, kaj ties fundamentojn, por aspiri, elekti, projekti, agi home? Sed eĉ tiu ĉi demando, iam opiniata esenca, nun duarangas al akcidenca valoro, eĉ seniĝas je senco pro tio ke ĝi mankus je konkreteco aŭ praktikaj rezultoj. Sed la vivelano nun postulas antaŭeniri.

Dume eliradis el mi pli kaj pli aŭ, se pli korekte esprimi, obstine formiĝadis en mi reagoj jam taksigantaj mian karakteron kiel tamenan kaj sedeman kaj spiteman ankaŭ kontraŭ si mem en ruza supleco. Ĉikanante ĉion, la fakta motoprincipo difinanta mian konduton fariĝis: *"ne tiel aŭ tiel ĉi, sed aliel".* Kiel? *La problemo estas alia!".* La nekontento transformiĝis al senklara ribelemo kontraŭ ĉio konventeca kaj sankteca kun grajno da io bohemieca, kvazaŭ turnante la dorson kun defia pozo kontraŭ desdegnita realo, sed la desdegnita realo estis ankaŭ mi mem. La alio alvokata neniam troviĝis. Ekis en mi duboj ke, eble, jam por mi la sola maniero eliri el izoleco estis rilati kontraŭdire.

Elstaris kiel nova alstrebo la prestiĝigita devizo: *la rajto mastri sian liberon*. Sed mi ĝin mastradis sen strategia celo. Iu, malicete kaj kun la sinteno de nekaprica travaganto en la homa animo, pri mi emfazis*: li baraktas inter aspiroj al viringracioj kaj volus, ke ni legitimu kaj kuraĝigu lin elreligiuliĝi.* Kiom da vero entenus tiu kruda esprimo eble li komplete ne komprenis, sed ĝi trafis la situacion. Funde ankaŭ veris, ke, sed prie mi certiĝis plimalfrue, al mi ne malplaĉus aprobo kaj eĉ kuraĝigo al elklostriĝo. Estis, komplemente, iuj ek-

pensantaj, ke mi daŭrigas restadi inter ili por detrui la religiulan vivsistemon mem.

Por eviti al mi plian absorbon kaj al aliaj asimilon de revoluciaj ideoj, la superuloj aludi konvenecon, eĉ neprecon, ke mi devu ekdispensiĝi, eŭfemismo por forpeliĝi, el la tasko de la instruo ĉe liceanoj, pli kaj pli, laŭ iliaj opinioj, inspirantaj mian konduton (kvazaŭ ilia markoto) aŭ inspirataj de ĝi. Fakte, postnelonge, oni min eksigis el la profesora posteno.

Preskaŭ kunlime al tiu averto eksentiĝis tra mi nova psika stato, kiel sentodevo konformigi vivelektojn al la novaj pensoj, kaj aperte mi ekpuŝis por ke superuloj prenu iniciaton de mia eksreligiuliĝo.

La lasta pastreca elpaŝo estis tiu kiun mi plenumis babilante apud kapkuseno de nekonata persono baraktanta kun la morto, pri kiu li tamen ne konsciiĝis ĉar sisteme impregnita de esperigaj prognozoj pri sia onta saniĝo. De mi petis tiun sakramentan servon mia laika amiko, multe ĉagreniĝinta pro la religia indiferento de sia amiko mortmalsana, kiu tamen iam ne disdegnis neopozicie ĉeesti prireligiajn prelegojn kaj diskutrondojn. Kiam tiu ĉi min vidis (porokaze mi remetis frokan vestaĵon) li stuporiĝis pro la aŭdaco de la amiko kiu venis lin viziti kun tia ulo. Mi provis babili, sed ne trovis vojon por ŝteliri en lian animon: je miaj aludoj al komuna reveno al la domo de la Patro, li reagis kolerete *"ĉar tiuj aludoj taŭgas por mortantoj. Mi ankoraŭ ne bezonas mistikiĝon".* Miaj vortoj, sekve al lia rifuzo, ne riskis patosiĝi, male ili senvestiĝis el pseŭdotono de doloro kaj daŭrigis la konversacion pri aliaj aferoj kvazaŭ nenio mismarŝis sur lin. Ne estis ankoraŭ necesaj, por mi, cerbumigaj fortostreĉoj por vidi en li nur unu vizaĝon, tiun de Kristo suferanta pro ĉiu homa iluzio. Rimorsoplena, eble senkulpa, mi retiriĝis. Kiam, la postan tagon li forpasis sen la lastaj religiaj helpoj; mia rimorso plilaŭtiĝis ĝis mi devis rakonti la okazintaĵon al aliaj pastraj religiuloj, kiuj tamen, surprizite de tia lingvaĵo, min konsolis dirante, ke *funde ne temas pri morto ateista ĉar la ekmortonto ne sciis, ke mem estas vivĉesanta. Li plejprobable ribelis kontraŭ sia mortiĝo, ne rifuzis la repaciĝon kun Dio, aŭ li estis nur kristanisto kun duondormanta nostalgio pri persona kontakto kun la ulo Kristo… ".* Estis mia lasta, iom kontraŭdira, publika enmetiĝo en alies konscienca intimo ĉar la superuloj prenis decidon interveni rekte inter miaj sendecidaj zigzagadoj.

Fakte la situacio abrupte, sed ne tro, fine supliĝis por mi. Mian ŝanceliĝemon oni ekinterpretis oportunismo aŭ firuzeco, je kiuj la fratularo devas sin liberigi por pluekzisti. Iuj ekmurmuradis, ke mia fino, tio estas ilia liberiĝo je mi, akceliĝas tro malrapide. La superuloj min kunvokis por propono: *ĉu vi volas*

*sekulariĝi portempe, unu aŭ du aŭ tri jarojn, por sentonde vidi tion kio nun igas vian kaj nian vivon tiel malrekta kaj malfeliĉa? Kaj post tio vi revenos por alfronti per nova energio la plenumon de la surprenitaj votoj? Kiu ajn konvento, de vi enirita ĝis nun, vin forpelas kaj ne eĉ provas alkutimiĝi al vi.*

Tia surpriza duonsolvo rajtiĝis, oni pliposte diradis, pro miaj kontraŭdiraj sintenoj.

Dirite farite! Mi senfrokiĝis kaj dungiĝis kiel komercagento pri varo je larĝa konsumo. Nek amikoj, nek parencoj, nek kundungitoj informiĝis pri mia situacio, ne eĉ la pensiono ĉe kiu mi unuatempe loĝis. Samtempe por okupi la liberan tempon mi entreprenis ion aldonan: sendependa organizanto de spektakloj por infanoj pri kiuj mi jam akiris sperton. Profitante je mia, eĉ se eta, kapablo ludeti facilajn muzikaĵojn, kaj je miaj antaŭaj aliroj ĉe ĝustaj personoj, mi sukcesis malkovri kaj preskaŭ impresarie ludigi infanajn aktorojn kaj kantantojn kaj trovi spektaklejojn kaj ne disdegnis ankaŭ gajnojn: ne multe, tamen, pro la motivo speguligata en la jenaj vortoj de persono ekkonita en tiuj monatoj kies nomo plurfoje ekaperos en kelkaj el tiuj ĉi romaneroj: "*vi havas tro emon al kompato... kiel funde apartenas al via persona historio".*

Tiu persono estis unu el la kelkaj informitaj pri mia efektiva situacio. Adresiĝante al tiu persono prizorganta inter infanoj de mia spektakloj, opiniiganta, ke mia dumtempa tramonda feriado jam sojlas ĉe definitiva sekulariĝo, mi lasis eliri el miaj lipoj tiun ĉi esprimon: *"Se mi devus edzinigi virinon mi devus trovi tiun kiu vin similas".*

*"Kial ne min?",* ŝi rebatis min embarasante kaj ĉesigante sur miaj lipoj ĉiutipan sonon.

Ni ridis, ŝercante per vortbataletoj, ĉion ruzete enmiksante inter la teatrumaj spritaĵoj. Male, tio ne malvekiĝis kaj fariĝis deirpunkto de belaj estontaĵoj, neantaŭviditaj sed arde deziritaj.

Temas pri virino sufiĉe religiema kvankam ne envolviĝinta en katolikaj movadoj. La memoro pri ŝi peris al mi, de tempo al tempo, kreadon de ŝanco eltrovi kompanulinon atendantan, ke la duondorma viro vekiĝu… kiu, en la faktoj, nepaseme preskaŭ sekularigita, daŭrigas odori je religiuleco unu mejlon for. Estis ŝia juĝo.

Mi vivis preskaŭ inkognite kun malmultaj vivŝanĝoj, kvazaŭ la pasintaj vivspertoj estus definitive stampitaj en mi. Kiam mi, post ne malplaĉaj spertoj kies eĥoj intensiĝos pliposte en mia animo, revenis al la konvento, kiel akordite, nenio el miaj sentoj kaj pensoj estis ŝanĝita kaj rekomenciĝis la vivo malkontentiĝa por mi kaj por aliaj. Io stranga, tamen, paralizadis min: deziri

ŝanĝi kaj ne kuraĝi ŝanĝi! Vorte mi montradis grandan decidemon, fakte mi restis eterne sopiranta.

Tiuj ekkonfliktoj kun ĉiuj tiom multiĝis, ke la situacio postulis definitivan solvon. Kaj jen la providenca decida turno, avidata kaj samtempe timata. La superuloj min kiel akuzitulon procesigis antaŭ porokaza puntribunalo koncedante la beneficon de la advokata defendo kun aliro al la pruvoj, tratalpe enketis kaj pridemandis atestantojn pri miaj deklaroj kaj konduto, kaj konvinkiĝinte pri la negativa reputacio pri la Ordeno de mi "transmisiita" al eksteruloj kaj al fratuloj per disklaĉaĵoj aŭ publikaj misreputaciigoj kaj senkreditigoj (en gazetoj ktp) emantaj fakte al ĝia dissolvo kaj, ke jam min tute gratulas nur deeksteraj kaj mondumaj aproboj, deklaris elĉerpitaj ĉiujn provojn por breĉi mian kontraŭvokiĝan rifuzon kaj fine sentencis definitiva mian elpelon el la franciskana ordeno kaj min senigis je rajto mescelebri kaj administri sakramentojn kaj vesti franciskane; kaj antaŭ al miaj dialektikaj enŝovaĵoj la tribunalo min taksis *"plorinda kunestaĵo de kontraŭdiraĵoj el kiuj eliras minaco de la ordena dissolvo"*. Sed ĝi ne mankis ankaŭ substreki, ke seneble tiuj kondutaj bizaraĵoj kaj kontraŭdiroj eruptas nur de vivstato neakceptita, kunfluanta kaj riveliĝanta en avangardemo senkonkluda.

Kaj kvankam la ekzamenintoj de miaj ideoj pri katolika kredo juĝis, ke en tiuj ĉi nur ŝajne estas sammulte "hereza" ol en tiuj de la samnaturaj laikaj kontestuloj, iom akre plu aldonis la prokuroro, ke *"tiu sinjoro ĵetas sur nin siajn malkontentiĝojn ĝis roli klaŭne siajn vokiĝajn taskojn. Ne aŭdacante kulpe forlasi la ordenon, li kontraŭdire laboras, age kaj vorte, por ĝin detrui"*.

En la dekreta verdikto estis dirate: *li arde revas kaj vivas kiel jam liberiĝinto el votoj, sed timas pasi al vivo ekskonventana kaj aŭtonoma. Li atendas, ke ni forpuŝu lin pro skandala konduto"*. En la fina verdiktita dispozicio oni sin rajtigis prognozi la atingojn de mia sekulara vivo kvazaŭ aposteriora konfirmo pri forkonventigo: *"Bedaŭrinde, li estos priklanta en sia ĉiuspeca kunigejo sian malkontentiĝon kun malteno de vorto"*. Ili ĉiuj estis gratulitaj de la konventoj pro la kuraĝo min demeti.

Vane, kaj sendube kontraŭdire, mi apelaciis, kvazaŭ por prioritatigi ĉioelaĉetan dignon, al la rajto statŝanĝi dum dramaj vivmomentoj aŭ al la rajto disponi je si ĉiumomente: mi volis liberiĝon ne forpuŝon. Ili neis la ekziston de tiu rajto ĉe religiulo kaj plenmane ekskludis min de la religiula vivo, dum mi ektimis albordiĝon al nekonata lando, kvankam jam spertita. Estis ordonite, ke ene de tri tagoj mi lasu la konventon. Kaj tiel mi min trovis laikigita sur la mondaj stratoj.

Samtempe la ordenestraro adresis min ĉe luiganton kiu pretigis por mi en

urbo domicilon, kies luon mi pagis per la unuaelspeza mono ricevita de la konvento, kaj de tie ekis mia nova, post tridekjaro kaj aĝe pli proksima al la kvindeka ol al la kvardeka, sekulariĝo, kaj vere ekspertiĝis, de kiam mi ekvolegis reveni al la mondo, pri kompleta mondumiĝo, pli aspekta tamen ol reala.

Eta sed ĝena kverelo eksplodis kiam inter miaj personaĵoj mi inkluzivis tridek kontinuajn metrojn de mia vasta persona, pri filozofia/antropologia kaj teologia intertuŝiĝantaj kun diversbranĉaj sciencoj, libraro ĉar oni juĝis tiun mian pretendon pri longa vico da klerkulturaj libroj *akiritaj per almozoj de bonfarantoj al la ordeno*, maljusta kaj ŝteleca. Oportuna decido de pli alta instanco koncedis, ke mi ne perdu, almenaŭ parte, miajn intelektajn apogilojn, entute ĉirkaŭ mil, de mi ne nur ŝerce amatajn pli ol ĉion ajn. Sed kien ilin lokigi? Nova kompromiso permesis, ke ili restu provizore en la konventa ĉelo.

Puŝite sur la deziratajn kaj timatajn stratojn, anstataŭ bremsi la ĝojon mi devis elspezi energiojn por ne lasi, ke tristeco kresku aŭ greftiĝu sur mia vizaĝo kiu jam tro ekseveriĝis. Sento de malŝarĝiĝo kaj timo kunvagadis en mia spirito: la serĉata sendependo emas pluresti ankoraŭ vorta: kutimiĝinta ekzalti la imagitan liberon, nun antaŭ la reala ekmergiĝo en ĝin mi ĝin sentas fremdeca, eble pro tio ke la pasinta dumtempa laikiga sekulariĝo plu tenis umbilikan protektan ligon kun la konvento.

Ĝuste en tiuj tagoj, ironio de la sorto, eliris el la presejo mia enketo-eseeto, per kiu mi iam diplomiĝis ĉe la Istituto de Psikologio kaj Grafologio, pri la psikaj kaj karakteraj trajtoj, evidentigitaj de la spontana kaj nekontrolita manskribo, de vokiĝantoj al la pastreco. La verketo ĝuis je momenteto de atento ĉar la *Istituto di Indagini Psicologiche* siaelspeze eldonis la transponon al diversaj lingvoj.

Pasante laŭvoje, facile min invadis momentaj blovoj de soleco. Fakte nun neniu min salutas, neniu min rigardas respekteme: iam la franciskana vesto min faris ne malplaĉa videbla kaj observebla, malgraŭ ke foje tio min senigis je spontaneco; nun mi survojas tute sole en neserĉata soleco. Direndus, ke tiuj solecaj paŝadoj inter sennombraj personoj inicis min al la laike sekulara vivo sed samtempe min plenplenigis je ridinda timo blokante ĉiun iniciatemon.

Estus facile eliri el soleco, almenaŭ el tiu kruda: sufiĉus, ke mi ekfrekventu parencojn, el kiuj pluraj delonge enurbiĝis ne diste de mi, aŭ al la nemalmultaj amikoj kaj konatoj; sed kiel ilin konigi kaj konvinki pri la seriozeco, kaj rajteco de mia nova socia elekto? Krom inter kontestuloj, malofte mi manifestiĝis tia al laikoj engaĝitaj ĝuste en la religia kontesto kaj foraj el miaj problemoj, al kiuj mi ĝis nun aperis homo serioze memengaĝita en aferoj de eklezio kaj religie kaj konscie konvinka. Kiel komprenigi, ke la elekto, kvan-

kam ŝajne altrudita, laikiĝi ne nepre kompromitas la kredon? Kiel konservi ilian estimon, kiun mi bezonas? Kaj kun la parencoj, kies plejmulto iam ĝoje festis mian ordinan geedziĝon kun la eklezio? Tiuj pensoj, anstataŭ min eltiris de la soleco, entiris en novajn angorojn. Perdiĝsenton pliigis ankaŭ ekkonstato, ke mi nun vivas malcentre de la fidelularo.

Pri parencoj, al kiuj mi devis fine prezentiĝi, ili hezitis aŭ sin detenis, ĉekomence, el ĉiu aproba signo pro timo agadi favore al la senmoraliĝo de ordena religiulo kaj duonorganizis, dumkelke da tempo, kunsidojn por kune plekti ĉiun fortan argumentadon kiu min revenigu konventon; vidinte, ke ĉe mi ankoraŭ ne kunloĝas virino, ili konvinkiĝis, ke tiu reveno eblas kaj reemfazis admonecajn kaj plorecajn invitojn eluzante eĉ ekonomie depreciajn aŭ senlaborajn prognozojn; kiam ili vidis miaflanke virinon, unuapuŝe ili ne kaŝis malaprobon dum eĉ iu el ili iom timige minacis aŭgurante sur nin la *"martirecon de la malsaĝo",* poste ili enfermiĝis en konfuza silento. El tio nova, eĉ eble kuriozeta, neantaŭvidita timo okupis miajn sensojn blokante aŭ malordigante ĉiujn miajn planojn, ŝpinitajn iel dum konventa vivo. La rimorso aŭ kulposento malfortigis miajn iniciatojn aŭ ilin bildigis riskoplenaj.

Ke la soleco, pri kiu estontece mi multe meditos, ne povis ne eksuperŝvebi sur mi, aperos preskaŭ dedukta logikaĵo, ĉar tiam, malkiel iam, al mi neniu petadis konsilon kaj rakontadis siajn penojn kaj malfacilaĵojn, kaj neniu reiradis de mi homo konsolita, senpezigita kaj iel-tiel liberigita, lasante en mi haloojn de sia nova sereniĝo.

Ĝuste pro tia soleco, pliprecize solsento, kaj pro kreskanta bezono komuniki kaj paroli senĝene kaj eksterfantazie pri mia nova realo, post kelkaj semajnoj, mi decidiĝis iri entrepreni kion en miaj pensoj ĉiam repuŝis kvazaŭ putran aferon: eniri kaj enklubaniĝi en asocion kaj frekventi klubejon de ekspastriĝintoj. Tiam tia klubo al mi jam karakteriziĝis kiel evidentigilo de klerikeca pastra pasinto kies spuroj ne foriĝas nure per ribelaj proklamoj kontraŭ la katolika eklezio kaj per snobantaj marksismecaĵoj, aŭ konturiĝis kiel grupo da kulpigantoj, se ne nuligantoj, de la eklezio por ne aperigi propran senton de kulpiĝo.

Nemalproksime de mia strato, tri domblokojn iom transe, sidejas la ĉefa nacia sekcio de tiu transnacia klubo, pri kiu ofte interesiĝis, emfaze kaj mirige, gazetoj, kiun tamen mi juĝis sekteca kaj geteca kaj iel pludaŭriganta, senvole elspirante eklezieskajn etosojn, nian antaŭan kontestadan kondiĉon, kvankam ankoraŭ ne sufiĉe informita pri ĝiaj ideologiaj bazoj kaj idealoj. Oni bonvenigis min kun granda simpatio kvazaŭ mi estis delonge atendata, donacis al mi

socian helpon kaj pripensindajn konsilojn. Iuj el tiuj fariĝos miaj plej karaj amikoj. Dum kelkaj monatoj mi vespermanĝis ĉe tiu kluba sidejo, altirita krom de la malalta kosto ankaŭ de la bunteco de okazaj konversacioj kaj afablaĵoj, kie preskaŭ ĉiuvespere kolektiĝis dek/dek-kvin ekspastriĝintoj, foje kun la respektiva edzino. Ŝtupon post ŝtupo naskiĝis, je kontakto kun asidue ĉeestantaj klubanoj, sento de kunaparteno kiu min ligos longatempe eĉ kun suferoj kaj kun familiaj malakordoj. Eĉ oni proponis al mi enhejmiĝi krom en la movado ankaŭ en la sideja domo.

## Ĉapitro dekdua

# Peripetioj kaj spertoj por eniri novan vivon

En la nova klubejo konversacioj splendaj, konfidencoj senlimaj, amikiĝoj fidelaj. La volontulaj kuiristinoj, du ne tro nejunaj bazlernejaj instruistinoj, subtenis la grupon eĉ agrege, eĉ unu el ili, senedza, insiste min invitis tagmanĝi ĉe si kaj jam pretis prizorgi mian loĝejeton. Nova konato, estonta amiko, ŝajntroece svatis, ke tiu tridekkvara virino povus fariĝi la virino por mi.

*"Se via koro diras jes, ŝi portos ankaŭ salajron malimplikantan el pluraj penoj!".*

Ŝi certe meritis mian atenton ĉar ŝia animo ŝajnis simpla same kiel la formoj de ŝia korpo, el kiu elstariĝis iu, gracia nekoketece, balanciĝo nivele de koksoj, en iom elstara postaĵo. Sed tiu ŝercaĵo, se sencela tamen, tiam fordrivis preter miaj urĝaj zorgoj: tiuj rilate neprecon trovi salajratan okupon, ĉar la mona konventa regalo estis elĉerpiĝanta dum la klopodoj de la iamaj superuloj, serioze engaĝiĝintaj por trovi firmaon pretan salajrigi preskaŭ kvindekjariĝanton trafis en rifuzojn pro mia troaĝo aŭ profesimanko ĝuste kiam firmaoj ekrezignas tiom da jam dungitoj pro t.n. nova restrukturado de taskoj de la okupitoj; kaj tio malkiel mi foje imagis kiam mi fantaziis pri la socia influo de la franciskanaj superuloj.

Ĉar la sugesto de l' amiko, kun la duonsvateca kunlaboro de aliaj, ne havis sekvon, amikecaj komplimentoj enigis, ŝerce jes sed ne tro, ke mi estas nova kazo de pene dresebla ideologia ĉasto, ne povante paroli pri religiula ĉasteco: nome la ĉasteco de tiuj kiuj tiom enamiĝas je sia scienco (aŭ profesio, arto, karismo, aŭ eĉ postuloj de tagtaga vivo ktp), ke ili ne trovu rimedojn de tempo kaj intereso dediĉendajn al la seksa kaj senta kaj sentimentala vivo. Sed pri mi, pri kiu pasio temus? Amikoj flustris kuraĝige, ke mi ne jam digestis la inhibiciojn de la pastra ĉasto.

*"Tian timidecon vi venkis jam delonge, ĉu ne?".*

Sed ili ne timis montri, ke mem pretas min helpi transpasi tian psikan restrikton!

*"Ni, jam delonge sentoksiĝintaj, kuniĝas sen kulposento aŭ tradiciaj inhibicioj!".*

Iliaj virinoj traktis min kun la sentimide zorga ĝentileco de tiu kiu pretus okulfrape doni konsilojn se apenaŭ petatajn, kaj, opiniante, ke miaj supozitaj

psikaj paneoj originas ankaŭ el io moraleca, iuj el inter ili ne disdegnis rakonti pri la komencoj de siaj amrilatoj ĉiu kun aparta ekspastra partnero kaj pri la luktoj por ke li sukcesu preterlasi tordigaĵojn kaj skrupolaĵojn, “rebrilojn” de la pastreca edukiteco sed, laŭ la nova vidpunkto, kontraŭreligiajn; kaj unu el tiuj virinoj allasis, ke ankoraŭ hodiaŭ ŝia edzo ne komplete superas restaĵojn de tia eduko kaj ke nur ŝia arto, ŝi eskapigis eble nur por amuzi la ĉeestantaron, igas lin vira viro. Ŝi, ekscitante ŝrikajn konsentojn de aliaj, kun tranĉa aplombo rafinis: ”*Li inhibiciis al si, mi ne diras inspekti mian korpon, sed (oni min pardonu) eĉ ĝin nudan forkure rigardi”.* Ŝrikoj de ĉeestantaj virinoj, eble, provis nuanci kaj dampi la krudecon de la bildecaj esprimoj, eldirataj senruĝiĝe dum eble ekruĝiĝis mi. En mi, fakte, penis malestiĝi, pri ŝi, impreso de juna edzino preta detale montri siajn amaferumaĵojn, dum ŝi, pli amuzige ol koketeme, afektadis nur por *“senstreĉigi kaj malinhibicii vian ekviriĝon*”.

Kaj alia similsituacia edzino, eble ne volante pritaksiĝi tro malsupera kaj sensperta, sin enlasis, ene de ridbruegaĵoj, per nur aspekte vantecaj vortoj: *”Ankaŭ mi konkeradis mian viron, liverante al li miajn intimaĵojn popece”.*

*”Kaj fine kiel finiĝis?“,* ŝajnaplombe ensteliĝis klubanino min okulrande fiksante kvazaŭ ŝi volus kredigi, ke ŝi estas divenanta mian sekretan scivolemon.

*“Nun li raviĝas ĉiuhore!”,* estis ŝia ŝajne aplombe unusenca respondo. Kaj ĉiuj ridis min fiksante kvazaŭ ili dirus: *“jen via fina feliĉa sorto!”.*

Inaj ĉarmaĵoj sume estis aperte indikataj nova eduke liberiga celo por ekspastroj! Kiam la svateca “konspiro” de la grupo maturiĝis senrezulta, oni epitetis min *“ĉasteca muariĝanto inter virinoj”.*

Por eviti kromajn ŝercojn kaj mirigojn, mi devis rondigi la tuton intence suspektigante sekretan alforan simpation kun duonpromeso de geedza kunvivado. Estis vere, sed tiom emfazite de mia espero kaj de fragilaj konjunkturoj, ke ĉio povus malaperi senspure. Pri tio, tamen, pliposte, ne sen tuj informi, ke la elementlerneja instruistino al mi svate prezentita pasos al nuptoj kelkjaron poste kun alia ekspastriĝinto: ili nun plutenas kun mi kaj mia tiam naskiĝonta familio profundan amikecon kaj eĉ prizorgas disvastigi inter homoj la evangeliajn vidpunktojn pri la kristana para amo.

Ni havos okazon paroli pri tiuj ekspastriĝintoj, plejofte pro ilia geedzaj aferoj, kaj pri ilia ideologie kaj kondute buntaspekta spektro de tipuloj.

En tiaj improvizitaj etaj rondtabloj, dum kiuj la parolo estis rezervata pleje por la inaj partneroj, ankaŭ mi devis, kvankam etpaŝe, pro timo juĝiĝi ankoraŭ loĝanta inter *la plumpaj subpremitoj*, manifesti mian pasintaĵon kaj miajn es-

perojn. Mi ne povis montri mian estimon al virino lasante al ŝi parolvicon, komenton, finan juĝon, kaj kavalirecan sintenon, ĉar mi ankoraŭ solis. *"Vi ankoraŭ ne malkovris kiom virino meritas egaliĝi al viroj, eĉ en ekleziecaj medioj... ĝis nun la ekleziaj medioj neglektas la virinon... sen ŝi, eĉ en teologiaj aferoj, eklezio estas mankhava",* estis ĝisgurdaj sentencoj de ekspastraj edziĝintoj. Kiom da energio, kiom da fiero en tiuj ĉi virinoj, kaj kiom da fiero en iliaj edzoj pro ilia fiero. Ne estis malica la penso, ke en tiu ekzaltiĝo peris en eskpastroj io celanta pravigi kaj triumfe heroldi la logikan oportunon de ilia nova elekto: se ili elektis edziĝi, tion ili faris ankaŭ pro idealisma motivo, tio estas igi virinon plencivitana en la eklezio! "*Sed tiuj juĝoj alvenas nur kiam ĉio estas, eĉ kuniĝe, kundividita kun la virino sense sentita. Je tiu ĉi sperto de pastra edzstato iel povas profiti la eklezio por ke mem sperte eksciu pri virino ion novan kaj ĉesu limigi la pastrecan ordinadon al viroj".*

Apenaŭ estis menciita mia konvinko ke eĉ por viroj ne estas rajto sacerdotiĝi. Tia tasko *tanĝas* Kriston mem, tial nur li alvokas kaj laŭvole. Praktike, en la eklezio nur la episkopo alvokas laŭsiajuĝe: ĝuste tia alvoko rajtigas.

Al aliaj sciemaj laikoj, ekstere de la klubo, pri miaj opinioj pri la laika vivmaniero mi manifestis mian ĝenon kaj surprizon, ne antaŭimagitan, nome la foresto, ĉe laikuloj, de iu ajn konversacio aŭ aludo aŭ okupiĝo rilate Dion kaj la vivocelajn aferojn. Preskaŭ subite, kaj abrupte, mi ekkonsciis, ke homoj estas ĉiam enmergitaj en okupoj kaj distraĵoj, el kies horizonto Dio lampas pro sia foresto. Ankaŭ estontece tiu miro sinkigis en senrespondan demandon: kiel povas estiĝi hominda ekzisto preterpasanta kaj mallumiganta la eternajn ekzisto-problemojn? Ankaŭ miaj malnovaj laikaj amikoj, kun kiuj kiel kutime mi konversaciadis pri tiuj temoj, eĉ konservante al mi amikecon kaj familiarecon, pri tiuj problemoj nun ne sin lasas senpuŝiĝe breĉi. Ĉu opiniendaj tro intimaj, eble trakteblaj nur kun instituciaj aŭ tre oficiale fidindaj personoj? aŭ ĉu problemoj nur forigataj pro tio ke al homo sufiĉas la feliĉa stato de tiu ĉi vivo?

Ankaŭ inter la ekspastriĝintoj la temo "Dio" riskas fariĝi asepsa aŭ nur objekto de rezonadoj: la korinklino kaj ama parolaro perdadis ĉiam pli la stilajn vortojn kaj konfidencan esprimiĝon.

La klubaninoj min instruis kiel iri tramonde sen ke mi plu montru la signojn de la longedaŭra fratula kaj konventeca ŝablono. Certmomente mi min perceptis ilia vartito kaj agordito sendita debuti en la mondon inter homoj nur trasorbitaj de la volupto sin elegantigi. Ili zorgoplene konkuris aspekte reordinarigi tiun *netaŭgulon ekstertempan*: enpaŝi tramonde, eluzi la arton konvene nodi kra-

vaton, la piediradon kun la manoj enpoŝe, la staradon kun la dorso neklinita, kiel kaj kiam uzi la aromaĵojn kaj komunajn similaĵojn, kiel ŝampui la harojn kaj profiti je oportunaĵoj por travivi sen disverŝi ŝvitodoron, *ne malefikan nur ĉe ravitaj virinoj...,* mi ellernis el ili. Por iom pli konsenti kun iliaj gratuliĝantaj zorgoj, akceptataj kaj montre dankataj de mia ne tute spontana naiveco, mi ne malsekretigis miajn antaŭajn forfluajn sekularajn spertojn. Kaj fine ili fieris pri miaj nova portado de vestoj kaj memprezentado kaj memfido je kontakto kun la publiko. Ĉe unu afero ili limiĝis, ili rifuzis influi: kiel gladi ĉemizon, ŝarĝo de la venonta edzino kiun mem travidas jam feliĉe avancanta! Kaj fine dank'al ili mi sukcesis trovi pormomentan okupon duonsalajratan, kiu min serenigis ĝis meriti ilian jenan komenton *"la dungiĝo sveltigas vian figuron kaj vi eksociumas pli spontane!"*. Vere tio kvietigis la inertigan amasiĝon de miaj pensoj kaj ebligis, ke mi ekvidu farinda la viziton al la virino pri kiu mi ne aŭdacis aperte trapensi, ne eĉ en fidecaj momentoj, ke ŝi estas min atendanta de kiam mi revenis al konvento post mia portempa sekulariĝo.

Klariĝu ke pri mia sendunga dungo-serĉado mi ekmalsupris de ĝojo al deprimiĝo ĉar firmaoj, denove kaj pli intense persone pridemanditaj, ĝentile sed senkompate, hastas reliefi ekonomian nekonvenecon dungi transmezaĝulon aŭ delikate motivas pro buĝeta strikteco deviganta maldungi jam okupitojn: *maldungo jam atingas pli ol dek procente*. Ankaŭ ĉi rilate, miaj novaj amikoj helpis aranĝi serĉadplanon. Kio lasis min fali en tiom da malentuziasmiĝo? Estis la fakta rezigno de miaj ekssuperuloj pluserĉi por mi.

Dume mi havis la malagrablan surprizon esti salutata, laŭŝtupare de domegulo de mia luita loĝejo, per epiteto "pastro". Eble, tiu persono kredis per tio montri sian respekton al mi, sed ĝi kaŭzis al mi ne antaŭviditan suferon ĉar mi klare perceptis, ke mi malsukcese klopodas konservi anonimecon. Utilas precizigi, ke kvankam mia emo korelverŝe interagadi kun aliaj, unu el miaj plej tujaj decidoj, post la demisio, estis ĝuste eviti esti konata kaj salutata laŭvoje. Tia kondiĉo baldaŭ finiĝis por esti ŝatata kvazaŭ ŝirmo kontraŭ neoportunaj scivolemuloj. Tial tiu saluto, tiele tute abrupte, unue min restigis senreaga kaj konvencie respondanta, poste ekjuĝigis min kiel eksterakvan fiŝon kaj bezonantan novan identecon. Kiom belas nekonateco!… kiu tamen kontraŭstaras mian naturon!

Paŝ-post-paŝe miaj parencoj ekregresis el sia rezisto al mia nova elekto. Ne nur laikiĝon iuj el ili akceptis, sed ankaŭ miajn novajn juĝon kaj konduton rilate religion, kiujn ili iam imagis ribelaj kaj detruemaj. Penante ne malmulte, dum postaj jaroj, kaj kun postdiskuta sukceso, mi devis eksplikadi, ke ne la

religia kredo estas koncernata sed nur ĝiaj sekundaraj eksteraĵoj aspektaj.

Laŭ ili, devus okazi samkiel en lavango, *kie falintaj la unuaj aspekte religiecaj neĝeroj, tiuj ĉi devus faligi ankaŭ la tutan religion kaj vivkonceptadon*. Sed ne nuliĝis tiuj ĉi ĉar kio falis nur supraĵe rilatas al religio. Multaj el ili estis baptitaj de mi, multaj iam ricevis franciskanajn personajn nomojn, iuj volontule envolviĝas en katolikaj profesiece porsocialaj organizaĵoj; nur kelkaj konsentis kun mia laikiĝo, sed inter ili la konsento ekaŭdacis enŝovi, kun la ekscesoj de neofita naiveco, ke mi inteligente agis forigante la ekleziecajn troecaĵojn, ke ili jam antaŭe pri tiu neceso implice travidetis, ke ili jam suspektis pri io opresema en la eklezio.

Urĝe klopodante eviti, ke mi fariĝu ŝtono de falpuŝiĝo kaj penante ripari kaj moderigi troaĵojn de laŭmoda kontraŭeklezia kritiko, de mia ekspastriĝo rajtigita ĉe ili, pliakute mi konsciiĝis, ke la afero jam ne koncernas nur mian ekskategorion.

Pro subtilaj kaj insidaj similaj okazaĵoj, antaŭvideblaj aŭ eke apenaŭ antaŭviditaj, mia animo zigzage intensigis kaj malintensigis eĉ la iniciaton fantazie flugi kaj resti ĉe mia iam okulumita kaj vage menciita Albina, kies personecon mi ĝis nun, sed foje kun ekdubo ke eĉ por ŝi aplikeblas *"for de la vido, for de la penso",* imagis multaspekte konsista en la svelta figuro kaj animforta en kordisponebleco kaj precipe mia.

Se rediri ion pri ŝi, mi ŝin konis dum la porinfana kanta spektaklo de mi aranĝita ĉe paroĥa teatrejo, kien ŝi estis kondukinta siajn bazlernantojn instruotajn pri kantoj baldaŭ ludotaj el scenejo antaŭ publiko. Kiel jam notite, la vesperon de la fina spektaklo ŝi hazarde sidiĝis apud mi kaj, post frazoj de la teatraspektakleja etoso, sin sentis, dum ŝiaj zorgoj tutalien direktas, flustrata de jenaj vortoj kun aspekta aplombeco prononcataj:

*"Se mi devus edzinigi virinon mi devus trovi tiun kiu vin similas".*

*"Kial ne min?",* ŝi flagris, certe enkadrigante la espriman voĉtonon en la ŝerca etoso postteatra. Sed post kelkaj minutoj:

*"Fraŭlino, mi povus perdi tiun ĉi frokon se mi trovus virinon kiel vin".*

Ŝi, intuiciante ion seriozan kaj daŭrigante manaplaŭdi kaj observi sian gelernantaron, senhezite elbuŝigis: "sed vi ne konas min!"; kaj aldonis aliajn esprimojn markitajn je surprizo kaj retenemo.

*"Via paŝo kaj via voĉo, viaj teniĝoj implicas ĉion, manifestas ĉion",* mi ŝosigis hazarde. Post momenta repartopreniĝo en ŝrikridoj kaj komplimentoj kun la publiko, ŝi revenis al la temo jene:

"Du vivoj planas eventuale ligiĝi nur post sufiĉe da renkontiĝoj, da rezona-

doj, ĉu ne”.

*“Kaj precipe se vi kornivele nun senas je alia amo”.*

“Kaj se ni reciproke meritas la amon unu de la alia!”.

*“Ĉu ni interkomunikiĝu? Kiu via adreso?”.*

Ŝi devis malproksimiĝi por silentigi la trobrue babilantajn gelernantojn. Kaj mi, kvazaŭ min feliĉigante je mia propraĵo, algapis ŝian korpon moviĝantan konsiste kaj leĝere kaj aperantan simila al ina figuro kaj paŝmaniero de mi imagitaj. Iom antaŭ ol la fina publika saluto, ŝi, postkurata de miaj okuloj kaj de miaj paŝoj, transdonis al mi jam uzitan koverteton adresitan al la firmao de siaj familianoj el kiu eblas rekonstrui ŝian adreson; pri ŝia persona nomo, jam mi plukis el babiladoj de ŝiaj gelernantoj.

Al ŝi mi skribis, al ŝi telefonis ricevante nur kelkajn limakhastajn neallogajn poŝtkartojn, kiuj observataj el ĉiuj flankoj, eĉ el tiu de la skribsimboloj, duonvidigis esperajn fadenojn. Al ŝi, certe, ne povis forfuĝi la plensimpatio per kiu mi permesis al miaj okuloj trakuri, kvazaŭ posede ĝin envolvante, ŝian figuron, pli bone ŝian personon, ĝis fariĝi kun ŝi ideala ligo definitiva. Tia estis ankaŭ ŝia impreso, ŝi senstreĉe rakontos kiam oni certos, ke la sentoj ne fuŝiĝas per la rakontado.

Nun la unua duonsalajro mobilizis mian spiriton min metante ĝuste sur la vojon al Albina por nuligi la skeptikan parton de mia suspekto kaj konstati kion de mia revo ŝi reigas reala. Ŝi jesis je mia telefona kontakto, sed kun jeso je duonsurpriza kaj duonretenata kuraĝigo. Tial mi trajne veturis duhorojn ŝanceliĝante inter espero kaj certeco ŝin trovi ĉe la rendevuejo. Eble ŝi min ne plu rekonos, eble ŝi komunikos, ke ŝia koro alidirektas; aldone, se ŝi venos, ĉu revekiĝos la sentoj kiuj certe iam abrupte kaj potence ekscitiĝis en ŝi?

Vidinte la lastan pasaĝeron gape serĉantan antaŭ si el la vagonstuparo, ŝi, el stacidoma kajo, preterlasante la kutimajn aŭ cirkonstancajn ĝentilaĵojn, ekridas preskaŭ nereteneble, kiel antaŭ pajaca koboldo. Elveturigante per du saltoj mi elĵetis min apud ŝian ridplenan vizaĝon, tuj tamen konfuzite ĉesigante miajn, ektrankviliĝintajn apenaŭ retenitajn, simpatimontrojn. Kaj tia rido, tia vole redunda rido, pro kio?

*“Vi havas neatenditan aspekton, mi imagis iomnove ŝprucanta vian teniĝon en definitiva burĝa-civila vesto”,* ŝi komentas ankoraŭ amuziĝdezira, kaj profitante de momenta vojaĝanta malamasiĝo, kredas oportuna reguligon de mia kravato, eble iom elcentra.

*“Tro okulfrapaj la koloroj de tiu ĉifoneto.*

*“Vi okulfrate vestas iom tro loze. Tiaĵoj jam eksmodas.*

*“Vi kondutas kvazaŭ sepdekjaraĝulo, plie ĝenata. Mi volas promeni kun viro eĉ aspekte egala al sia inteligento kaj kulturo.*

*“Kaj tia rigida enkravatiĝo?*

*“Kia maljunuleto kun... juna virino!”.*

Kaj tie ĉi ŝi hezitas momente, eble atendante mian surpriziĝon antaŭ tiu *juna virino*, sed agrable reprenas la afablan skoldaĵon:

*“Vi ligatas en eleganteco… trampeca! Mi iam vidis homon svelta kaj rapidmova…”*

Ŝi evidente ne entuziasmiĝas pri mia ekstera figuro, kiun ŝi iam konis, aŭ imagis, verva kaj senĝena aŭ eble ŝi kredas, ke tio mankumanta estas certe rekuperebla. Kaj ekmoviĝis en mia memoro, ke mi eble jam telefonsciigis al ŝi kiel la klubaj virinoj estis min instruantaj pri stilo sin vestadi kaj prezenti al virinoj. Ĉu mi tiam ekĵaluzigis ŝin?

Kiam ŝi permesis, ke ankaŭ mi malpaku min, ni duhorojn promenis tra vojetoj nekonataj de ambaŭ. Ŝi ankoraŭ, sed serioze kaj senbombaste, trude invitis, ke mi rearanĝu la kravaton, moderu la hirtigon de kapharoj kaj aliajn krudaĵojn: “*Finfine, viaj eksteraĵoj similu al via intimaĵoj!”,* ŝi radiis kun ŝajne flatema akcento. Eble ankaŭ ŝi, precipe ŝi, volis influi en mian novastilan vivon, ne lasante spacon al aliaj virinoj diligentiĝantaj ĉe mi por mi, pri kies zorgoj, ŝi diras afable riproĉtone, estis fierete aludate en pertelefonaj kurtesprimoj kaj nun decide emas igi marĝenaj aliajn influojn; kaj mentoras kun la gaja grimaco de tiu kiu ne plu timas:

*“Ho, ne fuŝiĝu la ĉefverko de viaj enklubaj virinoj!... Kion diros viaj vartantinoj?...”.*

Nek kafejo, nek temperaturo, nek lokaj novaĵoj, nek pasantoj kaj similaĵoj, nur mia aventureca aspekte altrudita liberiĝo el votoj estas nia temo. Kaj ĉar ŝi ĝentile aprobas, ke necesas ke mi pli lertiĝu pri mia persona teniĝo, mi ekgustumas ŝian reagon al miaj vortoj:

“Tion mi ne bezonus se mi havus iun… malokazan vivkunulinon”, kaj mi ekŝpinas la nemalallogajn avancojn de tiu ĉeklubeja volontule mastrumanta instruistino. “Sed mi okulumas alian instruistinon”, mi aldonis ŝin ne tro kaŝe okulumante. Ŝi tamen aspektas sensente. Mi alitone ripetas la similajn frazojn, kiujn ŝi aŭskultas eble plezuriĝante pro la nepra redundo. Ankaŭ al mi plaĉas tia ŝia plezuriĝo kondiĉe, tamen, ke la respondo estu je la sama naturo.

Poste, en ŝia aŭto, mi reprenas jam pli klare: “Se mi havus pli profitigan okupon, mi pli konvinkige pretus ŝanĝi la dolĉan ĵus komencitan fraŭlan liberon en la pli dolĉan jugon... Mi min proponus kiel edza kunulo...”. Ŝi reagas:

*“La laborposteno gravas, sed aliaj aferoj plej gravas, kiel la sendubeca inklino de siaj sentoj, la korsento akompaniĝi, pare kaj porĉiame, kun persono ekspastriĝinta...”.*

“Ja, kuraĝo! Heroeca kuraĝo! Kuraĝo kiu trudas tro da sufero!… Tiam mi sensaviĝas”.

*“Ne, vi havas multe da savaj ŝancoj”.*

“Ĉe vi, ĉu? Ĉu vi havas tiun certecon, tiun kuraĝon?”.

Mi atendas respondon dum la tempo disdividiĝas en milojn da subsekunderoj dum kiuj la ĝojo kaj afliktiĝo infanece alternas. Ŝi interrompas la konversacion per silento apenaŭ klinante sian kapon sur mian ŝultron kaj flugtuŝante spire mian vangon. Kion silento ludas en ŝia koro?

*“Ni revenu! Mi venos baldaŭ vidi vian loĝejeton kaj disciplinigi viajn grandvalorajn fatrasaĵerojn... kaj refari homon el amaseto da intelektulaĵoj!”.*

Ni tagmanĝis en restoracio.

“Pagas mi”, mi malimplicas.

*“Jes, estas via tasko”.* Sed dume ŝi provas enmanigi al mi paperan monon, kiun mi unue ekrifuzas sed tuj taksas bonvena por min rajtigi al la jena komento:

“Justege, ĉar inter ni ĉio komunas de nun...”.

*“Ja, vi devas ŝpari por elfari nupta-reĝan loĝejon!”.*

Al la lastaj paŝoj flanke de la trajno ŝi mallaŭtigas la adiaŭan tension interplektante sian brakon kun la mia kaj ankoraŭ flustrante ion, eble decide eble timide: *“Pri dungiĝo, kial ne reveni al la antaŭa parenteza okupo, kiel komercagento, ĉe la iama firmao?”.*

Ne estas tempo por respondi, ke mi hontas prezentiĝi post abrupta preskaŭ cinika forlaso de la posteno kiam la firmaoestroj kredis, ke mem jam profite elspezis monon por la preparo de la ĝusta komercagento. Tiam ili akuzis min je maljusta maltaskiĝo kaj proteste rezistis antaŭ ol pagi la servofinan promesitan kuraĝigan sumeton.

Ni ĝisis sen elĵeti al la kolo unu de la alia la brakojn, kvankam la miaj kaj la ŝiaj sopiris sin allasi al tensio, eble pro timo ke ties intenso mirigus vojaĝantojn, eble pro tio ke unu jam certas pri la sentoj de la alia. El la pasaĝerkajo laŭmomente ŝi mansvingis larĝe kaj malĝenate kvazaŭ estus malfatala forveturo kaj poste, malleviĝinte la manojn, paŝetis flanke de la ekmoviĝanta trajno kvazaŭ ŝi provus kure kunvojaĝi kun mi; kaj ĉesante paŝi, kiel senmova statuo, fikse rigardis al mia direkto, eble okupita de penso kiun mi laŭ tuta revenvojaĝo centofoje provis, ĉiam pli glatigite, diveni.

Ĉio laŭprograme kaj laŭdezire; nur unu afereto restis ne plenumita: ni ne haltadis por vidi, almenaŭ elekstere, ŝian gepatran hejmon kun ĝia korta verda laŭbo kun tablo kaj benko ĉirkaŭata de arboj, laŭ ŝia priskribo, rande de rivereto kunliganta la du precipajn lagojn de la Varesa regiono. Estis ĝuste tiu ŝia priskribo kiu reemfazis mian deziron kaj ĝin miksis kun la espero esti prezentata al ŝiaj familianoj. Mi apenaŭ senvualis tiun deziratan interprezentiĝon sed ŝi ne igis invito la aluditaĵon: antaŭ ŝia domo, duonkaŝita funde de interna korto, ni aŭte pasos estontece sen viziti tamen ŝiajn familianojn.

Mi returne vojaĝis kun la certeco, ke ŝi min akceptas kaj pretas ame kunpartigi ĉion kun mi kaj en mia memoro mi trairis ŝiajn gestojn, kiujn mi interpretas pli esprimaj ol ŝiaj vortoj. En mia eno la ĵusaj okazintaĵoj certe aspektis seriozaj kaj laŭtege aplaŭdotaj, sed sur mi ekaperumetis la okuloj de eksteraj observantoj igantaj pliretenataj miajn pensojn ekesprimiĝantajn per vizaĝmovoj; ĉio ekkonturiĝis brila ene de mi mem kaj merita eĉ sursceniĝi eksteren: preskaŭ apenaŭ mi sukcesis eviti ridindigon kaj mokon! Kiom naiva tia enamiĝo!

Kaj rekonsciiĝis ankoraŭfoje, ke mi ne trovis okazon por elmeti la demandon, ĉiam marĝenigitan de io nova: *"Kial nun via hararo malligita al la ŝultroj? Ĉu por min pli allogi?"*.

Se tio estis forgesita, alio estis vole ignorita. Al ŝi mi ne malkaŝis pri mia unua gajncela okupiĝo, estiĝinta en la pord-al-porda vendado de libroj per kontanta mono (unuvolumaj enciklopedioj, kaj altkulturaj libroj de malvasta konsumo): mi devis kontakti personojn kaj ilin konvinki aĉeti; mi persvadis nur mian fraton kaj iun religiulan fratulinon, al kiuj tamen estis dekalkulita la duono de mia procentaĵo. Nun pri tiu silento mi provas praviĝi kaj dispeli eksentojn de senmotiva malfido ofenda.

En tiu afero, de la ofertado de pordo al pordo, al mi mankis io, eble devenanta el la duboj pri mia sukceskapablo: ĉiu instigo konsideri kaj ekuzi la teĥnikajn sugestojn de merkatiko frakasiĝis kontraŭ la muro de mia negajeco: fakte, hontosento ekvagis en mia spirito ĝis la spontana kaj nekonscia aspekto de tristmienulo. Kaj tio min lacigis ĝis igi min, per subtila deziro ĉion malfari, ne tute sennostalgianta, se ekstreme dirite, pri realbordiĝo al la malnova stato, operacio tamen neebla ĉar la religia ordeno ne rajtas reakcepti elpeliton pro kontraŭordena transleĝiĝo aŭ pro dispenso. Foje, fronte al la sama monotona konstanta rifuzo por la miaj ofertaĵoj, laŭmomente la deprimo fariĝis perdo de la kapablo montri intereson pri kio ajn.

Kelkajn semanojn poste, eĉ perdante iom da mono, kuraĝe mi akceptis la insistajn konsilojn de klubanaro kaj liberiĝis je tiu ĉi deprima laboro komen-

cante, pere de ĝia interesiĝo, aktivadon de provizora magazenisto kun iom pli da memfido. Tiun finan "provizoran" atingon mi ne kaŝis al Albina por eviti al mi la fendon de la dubo esti kompatata kaj juĝata tute nekapabla alfronti la vivon. Pliposte, okaze de nova salajritiĝo, mi ŝin informis per letero ankaŭ pri tiu elreviga okupo dirante, ke la lasta nevendita enciklopedio restos, kiel atestilo de miaj baraktaĵoj inter fonaj allogaj esperoj kaj malallogaj seniluziiĝoj, ĉe ni. Ĝuste "ĉe ni" mi substrekis por rekapti el ekreagoj de ŝia animo la deziratan persiston de aspiroj de mi, eble nevole, emfazitaj.

Ĵus reveninte, kaj havante ankoraŭ la tempon por renkontiĝi kun la klubaj amikoj, mi envenis klubejon por saluti aŭ, pliverŝajne, por ĝoje petoli, intencante tamen ne motivi la ĝojfonton. Sed post malpli ol minuto, klubano:

*"Kial fartas via instruistino? Via ridanta vizaĝo implicas "bonege!".*

Kaj alia: *"io sorĉiteca agas en viaj okuloj!".*

Mi eĉ ne balbutis dampante ankaŭ spiradon.

Instruistino! Ĉu jam ili scias?...

Ili male pensis al la kluba instruistino, nun pormomente forsideja; mi pensis al mia pli ol duonpromesitino. Tiom promesita, ke mi anoncis, bombaste kaj fanfarontone por igi min ne tute kredebla, ke baldaŭ finiĝos mia fraŭleco.

Mi ne volis plion aldoni al ilia scivolemo, kvankam prie mi havis ĉiumove pene retenitan emon. Mi dirintus, ke ŝi apenaŭ aĝe, sed ne aspekte, eksjunas, sveltas, maldikas, vestas (ja, kiel ŝi vestas?), hartuberas nigrajn buklitaĵojn, senŝminkas kaj apenaŭ lipruĝas, aliregionas kaj enurbiĝos kun mi... dume ŝi instruistas. Ne, tiun ĉi informan lastaĵon mi ne transdonintus por ne reaŭskulti ilian gurdaĵon: *"Bazlernejaj instruistinoj ludas por ekspastriĝintoj nemalrimarkeblan parton!".* Kial? Pro tio ke inter la virinaj dotoj ili kunportas ankaŭ salajritan dungiĝon kiu ne marĝene kuraĝigas stabiligi kaj pli solidigi la familion kaj efike muldas al la ekonomia indeco. Mi konstatos, poste, ke tio veras; sed pri mi, mi dirus, ke Albina (jes, ankaŭ ŝian nomon mi ne jam publike prononcas!) floris en mia horizonto kiam ankoraŭ la familiaj ekonomiaj problemoj ne estis sufoke pripensigaj.

*"Kiom aĝas?",* iu hazarde ĵetis, sed la respondo ŝajnis tro persona kiel tro aroga la demando kaj mi haste transpasis malsamaĵojn.

Kelkajn semajnojn poste, grupanoj kredis vidi en mi ion trovervan se ne ebriecan kaj, tial, tiom insistis, ke mia aspekta nesinĝeno, ekruĝiĝante ĉar mi estis konfesonta la plej intiman trezorejon, eklasis ŝprucigi erojn de mia plej gardata sekreto: al mi ŝajnis iom profani amon, kiu tamen samtempe premis por sin feliĉe rakonti, milde ekfloritan preskaŭ senkontakte, plenume disflo-

rantan precipe en mia fantazio, ankoraŭ timide flosantan nur en miaj intuaj certecoj; la glasoj plenpleniĝis el trinkaĵoj kaj la buŝoj el bondeziraj gratuloj. Tamen io fenda trakuris mian spiriton: inter la feliĉaj kuntostantoj distingiĝis la rido kaj aplaŭdoj de la kuiristino/instruistino sur kiu, por mi, metintis la okulojn klubanoj tiom publike svatece proklamantaj nian brilan parindecon. Tro viglaj ŝiaj bondeziroj por ke min ne trapasu la dubo: Ĉu ŝi nur ŝajne ne montras signojn de seniluziiĝo? Kiel malestigi ŝian suferon?

Ĉiukaze, se ŝi devis alfronti elrevigan ĝenon, nemulte post tiu ĉi tute svagiĝis kiam al ŝia amhorizonto leviĝis viro inda je ŝi. Nature ĵusdate ekspastriĝinta, rifuĝinta ĉe klubejo.

"Almenaŭ ŝia nomo!", iuj simpatie pretendis. Kaj, la unuafojon publike mi laŭtdiris *"Albina!"*. Kaj startis invito, tuj akceptita miahonore, al plua gemutiĝo kiu daŭris plurhore.

Albina fidelis al la promeso kaj iun sabaton mi vidis ŝin elvagoniĝanta kaj marŝanta senhezite kvazaŭ ŝi rendevuus al la longe sopirata kaj definitive kontentiga renkonto. Sur ŝia rondkombita kapo disradias io altira dum el frunto harereto, aspekte ribela, oscilas al nigraj okuloj trakaŝante kaj travidigante la aviditajn vizaĝajn formojn. Ridetante, ŝi min randas marŝaleske inspektante, kvazaŭ mi estus ŝia reordigota propraĵo, de la alto ĝis la subo, ĉar, laŭ ŝiaj postaj vortoj, oni devas prizorgi por ke mi civiliziĝu; dum mi provas ŝin rapide informi, ke la firmao ĉe kiu mi magazeniste deĵoras nun min "rangaltigas" per la tasko de vojaĝagento havigante al mi socialajn leĝajn asekurojn.

Mi komprenas, ke per tiu sinteno ŝi spertas kaŝi kaj regcele kontroli sian emocion same kiel mi kovras la mian min submetigante al ŝia inspekto. Ŝia decidmieno esprimiĝas per io inter energio kaj feeca gracio, kiuj el ŝi min alblovas. La unua ŝia elbuŝaĵo, preskaŭ depostulita de miaj demandantaj okuloj, agrablige ridetis: *"mi nun estas taskita instrui pri la maniero korpe sin teni kaj vesti, ĉu ne?"*.

Miaj reagoj, per tiuj vortoj, tiel agrablis, ke ŝi sin sentis solicitita daŭrigi: *"Jes, ja mi devos vin dekutimigi de ia gestado kaj eĉ ia parolado"*, kaj iom amuzironie, *"mi devos vin refari laŭ mia stilo!... Ke vi ne estu en povo de fremdulinoj!"*.

Ĵus enirinte mian loĝejeton, ni allasas eksplodiĝi la ĝisnunaj retenitaj ĉirkaŭprenoj kiuj daŭris senfine.

Ŝi restis ĉe mi ĝis dimanĉvespere. Kaj mi certiĝis, ke ŝi fine venkis hezitojn kaj, ke nun ŝi prepariĝas informi sian denaskan familion pri sia proksima nova stato. La forveturo de la trajno malfajrigis la vidan tension de unu al la alia kaj

ekflorigis en mi dolĉan eĥon de apenaŭ aluditaj farendaĵoj kaj farindaĵoj por prepari aferojn pri kiuj ŝi ellasis, senĝene:

*"Ni prizorgu kune. Ĉio enkadriĝu inter* niaj *aferoj!"*.

Ene de du monatoj ŝi sukcesis kombini sian instruistinan transposteniĝon al lernejo de mia urbo kaj geedziĝon ĉe samurba Komunumo. La ceremonio civila ne naskiĝis el repuŝo de religia geedziĝo, sed nur el la malfruo havigi al mi la sopiratan dispenson el voto de ĉasteco (la juĝsentenca demisio ne koncernas la rajton edziĝi), kiu venis post tri monatoj: kaj tiam ni kompletigis geedziĝon ankaŭ per religia ligo. La konkretiĝo de tiuj eventoj formiĝis jene.

Planinte tion kaj antaŭ ĝia realiĝo, ni decidis, ke fine venis la tempo oficiale prezentiĝi al miaj gepatroj, kiuj laŭ rakontado de miaj gefratoj, ankoraŭ ne superis la ŝokan staton pro mia forkonventiĝo. Miaj gefratoj lasis rondiri flustron, ke eble mi, frue aŭ malfrue, edziĝos. Kiam ni kune aperis antaŭ ili, mia patrino salutis kaj tenis longe la manon de Albina kaj tuj ili intense ekbabilis kvazaŭ delongatempaj amikinoj dum al mi estis rezervataj hastecaj kaj monosilabaj esprimoj: aspektis, ke ili du estis kunaranĝantaj gravan aferon min koncernantan, el kiu mi tamen meritus esti disigita kaj raspe traktita: ĉe Albina, mi pliposte opinios, ŝi serĉadis komplicon pretan rimarkigi miajn mankojn kaj malperfektaĵojn. Mi kaŝe komplicas kaj oblikve duonridetas al Albina, ke ŝi aprobu kaj favoru la konversaciaĵojn akceptante, ke mi estas homo konfuziganta kaj disrompanta kaj plenrajte juĝata malfidebla. Fine ŝi, forpermesante, salutas min kaj kisas Albinan, ripetas salutojn kun la okuloj alrigardantaj Albinan kaj min ignorantaj, dum mia patro forviŝetas larmetojn.

Krom la elreviĝo kaj neamike konsentserĉa rankoro rilate min, mi ekrimarkis en mia patrino, malantaŭ daŭre streĉita vizaĝo, fendojn de tempopaso kaj kutimiĝon al doloro tro pezigante eĉ la premojn de la komunaj ĉiutagaj vivdevoj. En tiu ĉi momento montriĝis, ke ŝi jam kutimiĝis aldoni tiun de mia laikiĝo al la elcentraĵoj kiuj deĉiam morale kaj psike pezas sur ŝin. Kulposento, subtile ĝenanta, min disfendis igante min sendefenda kaj senprava. Ĉiuj miaj diskutaj defendoj pretigitaj, kvankam ne antaŭvide al io ajn preciza, por min pravigi, spontane vanigis sian valoron. Ŝiaj vortoj, se laŭvere raportitaj, laŭ kiuj ŝi sin unufojon bedaŭris pro sia eraro ne esti, je mia naskiĝhoro, min forlasinta, aperis senkulpaj, kompatindaj ĉar fruktoj de seninterrompa ĉeno de suferoj.

Mi pri tia mia embaraso nenion aludis al Albina, kiu, tamen, montris ŝati mian konduton.

La sekvajn semajnojn renkontiĝoj kaj babiladoj kun mi kaj kun Albina pli agrabliĝis ĝis promeso, ke ŝi partoprenu nian geedziĝon, kiel okazos.

Se rakonti kelkajn el la cirkonstancoj de la geedziĝnupto, celebrata preskaŭ solece, sed tuj post la ceremonio festata de multaj amikoj, sekrete informitaj kaj kunvenigitaj ĉe la restoracio kie ili ordonis kromajn ĉetablajn lokojn aldonante dankovekajn kaj senkompare ĝojdonajn donacojn, jen la, ofte rememorita de amikoj, spontana, eble nun eksteretose sensprita, ĉebankeda dialogo inter mi kaj Albnjo dumdeserte. Ĉe la fino mi adresiĝis al Albnjo:

*"Mi vin amas!*
*Tion mi diras al vi hodiaŭ,*
*mi tion diris al vi hieraŭ.*
*Ĉu tion mi diros al vi morgaŭ?".*

Kaj risorte tuj grimacis ŝi
*"Ĉiukaze tion al vi trafe elingigos mi!".*

Je tiu rezoluta respondo, ŝajnpompa kaj ŝajnaplomba, oni rajtiĝis komenti: *"via Albnjo, eĉ vole, estas virino ĝisoste, de flanko al flanko!".*

Ni daŭrigis loĝi en mia luita apartamento, aspirante al alia kun pli da ĉambroj kaj komfortoj.

## Ĉapitro dektria
# Tra volontulaj engaĝoj kaj klubana vivo

Mi kaj Albina engaĝite partoprenadis en volontulaj grupoj socie orientitaj, kaj tio okazadis ankaŭ rilate la klubon de familioj de ekspastriĝintoj, kvankam dekomence malpli intense ol kiam mi vivis sole. Iom post iom la spontana ĉe-kluba vivo fariĝis eĉ deviga tasko pro motivoj dirotaj. Tamen des pli nestiĝis mia interkonsento kun Albina pri tiu ĉi devo, ju pli eksteriĝis la diverĝoj kun ekspastraro: kvankam en mia animo superregas ankoraŭ nun la motivoj inklinigantaj al granda dankemo al ili, ne preterfluu diverĝoj kaj kiel en tiuj ĉi brule interplektiĝis ankaŭ ideologiaj problemoj. Kvankam tiuj ĉi estus facile komprenigebla afero, tamen iom da teologio igus pli malplektebla ties ŝajnan kompleksecon.

La grupo orientiĝis, krom malvastaj esceptoj, kontesti ĉion religian. Fakte ĉio rivoluis ĉirkaŭ la akso de la kondamno de ĉio eklezia; nur kelkuloj de tiu ekstremula frakcio montris almenaŭ klopodon distingi inter religio kaj eklezieca/eklezieska disciplino aŭ jura kanona sistemo, dum io submetiga al la iniciatintoj kaj tiamaj postenuloj, aparte koleraj kontraŭ ĉio kristana, longe plu allogis. Jen la spektro de tipuloj, kolektitaj en frakcioj, kvante preskaŭ egalnombraj fine de la disiga kontrasto.

Elstariĝis frakcio, ĝuema en obstinoj kontraŭekleziaj, kiun en pli kaj pli brulemaj diskutadoj mi kvalifikis per la pragmateca slogano aŭtorita, laŭonidire, de mi: "*Erari grandigas la homon, penti ĝin malnobligas*". Aspekte ili ne metis antaŭ sin la problemon de sia malkohereco kun kristanismo aŭ kun sia forlasita pastreco, dum la pasinto estis tio el kio ilia homa kondiĉo devas sin liberigi. La eklezio senfideliĝis al la evangelio kaj nun, laŭ ili, ĝi status tute nerekuperebla pro tio ke jam religio mem sensencas. Ilia postpastreca nova tasko: kontribui liberigi pastrojn kaj laikojn el ĝia opresado. Malŝlose dirite, ili el sindefendo pasis al la sinŝarĝo de "sindonaj" gardantoj de aliesaj rajtoj, tio estas el kristana sangpureco al kontraŭkristana engaĝiĝo je nomo de la homaj rajtoj. Kaj tion ili efikis preskaŭ sporte, en gaja etoso.

Se la eklezio estas tiu de tiaj perceptoj, eksaltas en la konscienco la devo, dum kaj nobliĝas la taskiĝo, tion proklami. Nu, je tiu tasko iuj ekzaltiĝis kvazaŭ pri io granda, io heroeca: ilia dialektiko fariĝis piroteknika kaj pli kaj pli postulema pri konsekvencoj, kaj foje persvadige alloga. Kun dialektiko ŝpru-

ciganta konvinkigan energion, ili strebis demonstri, ke ili mem eltenis kontinuan ruze enŝovatan trudon kaj damaĝon ĝis malstrukturiĝo de siaj juĝlibero kaj valorskalo. Ĉiu ajn indulgo aŭ pardonpeto flanke de la eklezio estus kvitanco ne sufiĉe kompensa. Ilian sintenon rilate al la katolika eklezio, alproksimigitan, desupre esperebleble sed ne tro, observantoj vortumis en la moto: *"Vivu eĉ Jesuo Kristo, se tio utilus al la detruo de la katolika eklezio!".* Nature la politika orientiĝo, kun ofta publika engaĝo dum balotoj, estis al maldekstra kun emo al ekstrema kaj eksterparlamenta maldekstrismo.

Frakcio el tiuj, malpli konsekvenca, deklaris ja malsimpation al ĉio eklezia, sed tiu juĝo kunfandiĝis kun malsimpatio precipe, aŭ nure, al ĉio supozite fia en ĝi: ne la tuta kristanismo aŭ eklezioj rifuzendas, sed la ekscesoj de malbono kiuj ilin senvalorigus.

Ĉar tiu subfrakcio ne disdegnis konversacion pri la stato antaŭekspastriĝa kaj la stato postekspastriĝa (la unuaj preferadis rifuzi trapasi de la sfero de reagoj al tiu de rezonadoj), kun ili la kutime serenaj konfrontoj oftadis. Malofte tamen mi sukcesis ekspliki, ke tia ilia malinklino, kvankam mildigita, al la eklezio naskiĝas, plejparte, de la tro insista senkonvinka ilia permanenteco en ekleziaj oficoj kaj taskoj: taskoj kiuj postulas korkonsenton, dum tiam *"la koro adresiĝis al la kontraŭo".* Resti, mi pliekspliciti̇s "pastri", kun malsintonia partopreniĝo aŭ nur kun ekstera aniĝo al sociaj organizaĵoj, movataj nur de mondumaj idealoj, trenas al malamo, krom rilate al la pastraj idealoj, ankaŭ al la strukturoj subtenantaj kaj subtenataj de tiaj idealoj, kun projekcio sur ilin de sia malkontentiĝo. Realisma kaj pripsikologia literaturo taŭge pruvas kaj pentras tiun fenomenon de identiĝo-projekciiĝo-abomeniĝo: la senama deĵorado iom post iom ŝanĝiĝas al malŝato kaj al hanto.

Tiufranĝaj pensadoj kaj konduto, kiel imageblas, ellasis el ili ion grandanimecan kaj ekzaltigan, samtempe kovrante kaj forviŝante el ili ĉiun rimorson aŭ senton de kulpo aŭ, teologie kaj psikologie plikorekte, konscion de kulpo. Se juĝi tiun sintenon helpe de tiuj supraj kategorioj per kiuj mi provis ilin difini kaj psikologie enkadrigi, tia ilia mensoteniĝo sufiĉe substrekis la ĉeeston, eble nekonscian, de la problemo de memjuĝo pri sia konduto dum la travivada restado en la konsekrita stato kaj pri ĝia forlaso. Tiu problemo, neita vorte, karburis kaj movigis, laŭ mi, la motoron originantan ilian aktualan kontraŭreagan pensmanieron, ĉiam bezonantan je novaj dialektikaj ŝtonlaĉoj kontraŭekleziaj.

Tian interpretan hipotezon mi subtenis kaj igis ĉiam pli konsiderinda ĉar, alimaniere, malfacilus aŭ malhelpus ekspliki psikan fenomenon: amo transfor-

mita, post jaroj de malegoisma sindediĉo, en malamon nur pro tio ke la forlasita eklezio bride prohibas kaj ne asocias al sia pastorala agado pastrojn edziĝintajn!

Estis oportune forĝita, iom sciencece kaj iom malice, de bontempaj ŝercemuloj, la jena devizo: *"Pli da kulpo al la eklezio malpli da kulpo al mi!"*.

Kiuj el ili (temas pri alia frakcio) transdonis al la ekleziaj instancoj mocian peticion, atendante esti oficiale dispensitaj el la votaj pezoj sed samtempe ne rekonante, ke la vera motivo de la nova vivoelekto kuŝas en la forlaso de idealoj, tiuj ĉi klopodadis kredigi, ke dum seminariaj jaroj ili ne bone komprenis aŭ ke ili senlibere decidis ligiĝi. Kaj ĉar ne kredeblas, ke ili tiam elektis senscie kaj senlibere, ekleziaj aŭtoritatuloj pretigis por novaj peticiantoj analizan detalitan tekston kies premisoj estas: *se homoj alte kulturitaj pri tio kion ili mem estis decidintaj, elektis senscie kaj senlibere, tio povis okazi nur pro, almenaŭ momenta kaj eble kaŝita, psika perturbo: situacio kiu el si mem rajtigas ricevi liberiĝon el votaj ŝarĝo*j. Sed ĝuste tia teksto, kun sia subkuŝanta filozofio, provokis novan pliakran ribelon kontraŭ la ekleziaj regantoj. Spite la celojn de la dokumento, ekstreme malplaĉis la funda aludo al psika/intelekta malklariĝo alskribita al manko, certe ne malofenda, de posedo de siaj mensaj juĝkapabloj.

La dokumento bonŝance baldaŭ forpafiĝis el la dispensa proceduro aŭ almenaŭ ĝi trovis aplikon nur en nekonataj kazoj.

Kio malhelpis al tiuj evoluintaj personoj rekoni, ke ili decidis sin allasi al impulsoj de sia koro tenerecsentema kaj de la ampotenco? ke en ili ŝoviĝis kaj elstariĝis, etpaŝe sed nehaltigeble, inklinoj al virina komplemento kaj al familiaj amsentoj?

Laŭ mia analizo, ankaŭ ili hontadis allasi, ke ili sin fordonis al seksa kaj aminduma inklino (de la *karno*, kiel oni malkvalifike difinis). Por superi aŭ sufoki tiun, eble nekonscian sed kaŝe baŭmantan, *honton*, ili antaŭmetis la grandiozajn novajn geedziĝajn idealojn, abrupte aŭ per malrapida medito ŝosintajn en ilia koro: nur por elpaŭse akceptigi tiujn noblajn idealojn ili akceptis edziĝi kvazaŭ ili ĝis tiu momento restis en ĉasteco kaj en bridata frajiĝo. Ilia nova arda frajo stiliĝis al ekzaltado de la sakramenta edziĝo, kiun la eklezia instruus sed ne logike praktikus. Ili sume ekamis virinon nur por realigi la elspuritajn belecojn de la geedziĝo!

Kio ajn estus, mia rezisto ankaŭ al tiu frakcio konstante teniĝis totala, unufojon (bedaŭrinde) ĝis malĝentilaj ne sufiĉe regataj reagoj kaj ili, miaŝultre kaj ne senvenĝe, trovis por mi malloge alfikseblan nomon min epitetante, krom

zeloto, "pentinto", kiu certe agacis mian edzinon eksuspektantan esti klaĉe tamtamata edzino de viro pentanta pri sia ekspastriĝo-edziĝo. Miakomforte mi konstatis, ke, foje, iliaj edzinoj ne ĉiam sin solidaris kun tiuj edzaj ekstremaĵoj, eble pro tio, ke ili, preskaŭ ĉiuj devenantaj el katolika asociara medio, ankoraŭ konservis spurojn de la antaŭa edukiteco.

Estis eĉ forlasintoj de la katolika eklezio aŭ kristanismo pro ne celibataj motivoj; sed tiaj malkonsentantoj, ne petas dispenson, eĉ emas rimarkigi la nekoheron de tiu peto. Se kredo ĉesis, kia bezono de akordo kun la eklezio?

Iom post iom mi kredis preskaŭ permane konstati la ne senagan ĉeeston, en ni ĉiuj, de konata psika meĥanisno, kiun mi per biblieca metaforo komentariis tiel: *"Se la konscienco memorigas, ke ni devintus prizorgi la vitejon kaj male ni forfuĝis, hastu respondi, ke la vitejo estis infestita kaj putrinta, nefruktodona eĉ danĝera por ĉiuj"*. Cetere, konkrete, se eblus pruvi tion antaŭ Dio, ĉesus tiu grimaca konscienca petolado pro la votrompo kaj prosperus animtrankvileco kiu devas esti frukto pli de rezonado ol de sentado.

Jarojn poste, malimplikiĝinta de la eventoj, mi, preterportata de la infektiĝo arogi al mi la rajton analizi la aliulajn psikon kaj konsciencon, direktis tiun arton kontraŭ mi kaj, tiam, ekdubis pri kompleta malegoismo de miaj opinioj samkiam, alifoje, mi ekdubis pri totala sincereco de mia tiama ortodoksemo aŭ ekleziemo: eble tiaj juĝrajtiĝoj generiĝis ankaŭ, aŭ almenaŭ akompaniĝis, de iu volo rezisti ion kio ŝajnis persona nuligo kaj serĉi protekton per sinidentiĝo kun ekleziema ortodokseco, kontentiganta mian bezonon de apogiĝo kaj apartiĝo. La purigo de intencoj neniam finiĝas!

Alia frakcio konservis emon al kristanismo, sed akuzis la eklezion pro ties obstina insisto alkroĉi la ĉastecvoton al la pastrecstato malgraŭ ke, tio kontraŭus, laŭ ili, la homajn rajtojn kaj la bezonon je la geedzecaj tenerecoj: eklezio, alnajlante al tiu voto perdas adeptojn kaj riskas perforti la homan liberon! Nova pasia tasko de la pastroj eksoficiĝintaj pro geedziĝaj impulsoj estu: helpi la eklezion sin liberigi el tia eksceso, valore signifa nur por religiule aŭ monaĥe vokitoj, kaj ĝin helpi demokratiiĝi kaj eliri el aŭtoritatemo: kaj trovi la vojon por ordini ankaŭ virinojn. Ekzakte pri virinoj, la ekspastroj nutras tian admiron kiu el si mem depostulantas por ŝi egalkondiĉojn ĝuste en la rajto ordiniĝi kvazaŭ ekzistus tia rajto denaske en fideluloj kaj ne estus, la senrajta vira elekto, nur signo, ke neniu rajtas ordiniĝi: tiun rajton kunfande kun tiu de geedziĝo ili enkadrigas en la sferon de la homrajtoj de la UNa Deklaracio, kvankam iuj el ili ne postulas por si, eĉ rifuzus, se koncedite pastre roli malgraŭ edziĝ-

stato, en ekleziaj oficoj.

Ankaŭ pri tiu rajto - por ĉiuj - al ordiniĝo kaj sacerdotiĝo, grandaj dialektikaj bataloj. Preskaŭ nur mi provis vidigi, ke tia rajto, en la eklezio, ne povas ekzisti ĉar Krista komisio; kaj ke por pri tio konsciigi, la sacerdotiĝo estas rezervita por unu sola sekso, sendepende de egaldigneco de la seksoj. Bonŝance, ne ĉiuj edzinoj malaprobis mian tezon.

Iuj el tiuj ekspastroj edziĝintaj volonte, kaj ofte kaŝante sian pastran originon, jam memdispone kunlaboras, se cirkonstancoj ne ĝenas fidelularon, en paroĥoj kaj katolikaj establoj.

Se juĝi ankaŭ tiujn ĉi per la sama mezurilo de la klopodo sin liberigi de rimorso aŭ sento de kulpo pro sia konduto per formeto de kulpokonscio, ankaŭ ili ruze plifaciligas sian bezonon ignori ĉion pasintan rilate la forlasitan vokiĝon kaj, krome, akuzas pri opresforto la eklezianjn leĝojn: *se la kulpo estas ĝia, kia kulpo al ni? Ni povas vivi trankvilaj kaj ankaŭ kunlabori kun la eklezio*. Plurfoje mi aŭdacis priskribi tiun psikan, konscian aŭ nekonscian, ruzecon; sed mia provo, samfoje, koliziis kun la timata risko, ke agnoski sin kulpa alpaŝus malvalorigi sian geedziĝon kaj precipe sin montri bedaŭra pro la elekto kunvivi, kvankam rajtigite de la, foje eltrudita, papa dispenso, kun virino. Ribelaj, kontraŭ tiu mia interpreto, tiukaze protagonistis precipe la edzinoj. Fakte tiuj ĉi, foje, inter si, ne malkaŝis kompati mian edzinon ĉar, laŭ ili, ŝi suferus pro la pentaj repripensoj de sia edzo: *malbela sorto tia de iu virino jam akceptinta marĝeniĝi kaj devigata defendadi sian decidon sekvi viron kiu nun ŝin vidas kiel kaŭzon de sia ekspastriĝo kaj obstaklon al sia ofice reenpastriĝo!*

Tiaj, laŭ Albina, devis esti la juĝoj de aliaj paroj rilate ŝin. *"Vi*, ŝi urĝadis al mi*, pli konvinkige ekspliku vian pensaĵon laŭ kiu oni devas penti pri sia pasinta malmorala maltaskiĝo kaj samtempe moralpace frandi la geedzajn bonaĵojn. Tia via pensa pozicio ne povas ne krei, unuabate, misorientiĝon kaj impreson de filistreco".* La fideleco al la klubo en Albina ekŝanceliĝis.

Pro tiu fakto naskiĝis ankaŭ diskutoj inter mi kaj Albina, kiuj tamen solviĝis ĉiam per fina samopiniiĝemo.

Por pli konkrete kompreni la kvaliton de nia familio, ne malendas forvagade priskribi ion de Albina. En konversacio, kaj eĉ pli en diskutoj, ŝia voĉo restadas morbida kaj klara, eĉ kiam fervoriĝo ruĝigas ŝiajn vangojn. Se ŝi laŭtigas voĉon, por parole atesti gravan aserton, la vortoj plutenas la saman intensecon fluan kiel magmon en kiu ĉiu ero fluas distingita kaj senŝpruca. Ŝi tiel skribas kiel parolas: skribo aspekte rapida, horizontale rektan linion tenanta, kun iomaj maldikaj fadenoj, premleĝera kaj tiom legebla ĝis ne peli al peri-

odfino antaŭ ol ĝin deĉifri. Similas tion ankaŭ ŝiaj gestoj tiom sobraj ĝis spektiĝi senutilaj kaj nure beligaj, malgraŭ ke oni havas la impreson, ke ili konstituas ŝian personon, prezentiĝantan eksteren sen pezi aŭ embarasi. Male al miaj, ŝiaj vortoj ne forsolviĝas senefike, tial oni atentas al ŝiaj sobra parolado kaj deziroj kaj juĝoj.

Ĉu mi mitigas mian Albnjon ĝis pensi pri ŝi nur pri io senmalvirta? Mi neniam aŭdis kritikon kaj senrespektecan aludon pri ŝi. Ĉiuj interrilatas kun ŝi plenkontentiĝe. Se ŝi demandas pri io, tio okazas nur pro tio ke ŝi suspektas, ke la respondo povas esti nesimila al la ŝia. Tiu sobreco tamen ne malebligas pliriĉigi novige la konversacion.

Ankaŭ ĉi-cirkonstance, Albina efike prizorgis por ke la edzinoj paciĝu en si mem fronte al tiuj miaj tezoj kaj antaŭ ol ili ektimus esti kompatataj se ne malŝatataj.

Samtempe la ŝanceliĝon de Albina mi provis kaj sukcesis forsvenigi pro tio ke la klubon mi konstante juĝis altavalora ĉar, se por plimaturiĝi kaj ekvilibriĝi personeco bezonas komunikadon kun aliaj homoj, tie-ĉi ni trovas konstantan okazon de bezonata konfrontiĝo al homoj de la sama origina sentemo antaŭ komunaj problemoj.

Ni revenu al la frakcioj de la persistaj klubanoj, kies markiloj spegulas la psika/intelektan situacion de la lavango de ekspastriĝintoj.

Tiuj frakcioj diferencis, kompreneble, ankaŭ rilate la manieron kaj stilon prezentiĝi al la civila socio kaj precipe rilate kian imagon de eklezio transigi. La radikala frakcio, por ne resti socilime, kredis sian taskon bildigi eklezion kiel opresadon kaj opresadon sendistinge forigendan: kaj informiloj, dismontrante ilian figuron al la publiko, kontentiĝe kaj kontentige raportadis pri iliaj deklaroj ade kaj ade tamtamataj kaj manifestacioj dum ili profitis je tiu ĉi popolareco: iuj trovis aŭdacon pliemfazi sian distanciĝon el la eklezio por ne resti devancataj de novaj pliemfazantoj. La aliaj frakcioj, kiel tiu en kiu militis mi, ne povis similrimede rebati aŭ korekti ĉar tio ne interesis la gazetaron kaj la kurantan regantan amaskomunikan kulturilaron. Niajn skribajn reagojn oni apenaŭ akceptis aŭ publikigis etpublice, malkiel tiujn de tutkontestuloj. Ankaŭ tiu ĉi fakto kreskigis la grupan ekdispartiĝon ĉar, krom ĵaluzo pri ilia triumfo, tio nin aspektigas paseismemaj malkoheruloj.

Estis frakcio, eble la malplej evidenta, katolika en la kredo kaj aktivado kaj kunlaboranta kun episkopoj kaj engaĝiĝanta en katolikaj asocioj, eĉ defendanta pri la celibatleĝo, sed suferanta pro fidmanko je siaj ortodokseco kaj lojaleco ĉe la ekleziularo, kiu al ili ne konfidas publikajn kaj responsecajn tas-

kojn en la fidelulara komunumo. Ili energie profesias pri rajto ŝanĝi vokiĝon kaj eksiĝi el klerika stato, riproĉante la eklezion pro pretekstaj malfruaĵoj aŭ obstakloj en la koncedo de la edziĝpermeso al la pastroj ĝin postulantaj. Tiujn rajtojn proklamis precipe fraŭlinoj, okaze aliĝintaj al la grupo kaj eble malpacience atendantaj la intence *malfruigitan* dispenson por ilia estontaj edzoj.

(Akceptiĝu premiso, eble forgesita sed postulata: kial rezisti inter tiuj diferencaj opinioj komplikiĝantaj ĉiam pli? La respondo naivas: mi kaj mia edzino mallerte certis, ke la diferencoj finiĝos por senspure malaperi!).

Se pluteni la saman metron de mia hipotezo, ankaŭ tiu frakcio, preta kunlabori kun ekleziaj strukturoj, ne kuraĝas rekoni sian kulpon, opiniante, ke tio kunportus la kulpokomplekson ene de la para vivo stompigante la ĝojon de la tiom sopirata familivivo. Ekspliki, ke la du, nome la agnosko de kulpo kaj la legitima daŭrigo en familiecaj ĝojoj, estas aferoj absolute distingeblaj kaj nocioj reciproke neekskludaj, generis penon senfinan kaj ĉiam je risko miskomprenigi la edzinan kondiĉon de mia Albina, foje embarasita de la rezistemo, kvankam frate rozkolorita, de geklubanoj. Mia edzino plende replikis al mi: *"Viaj doktrinoj bildiĝas deficitaj je kredito ĉe aliaj, kaj aspektigas min edzino duonrepudiita. Mia ĝeniĝo inter ili pene elteneblas. Viaj pensaĵoj aspektas kiel disputaĉoj: ili pruviĝu klaraj kaj logikaformaj krom justaj".*

Tia komuna ĝeniĝo instigis imagi, kaj ellabori parabolon por komprenigi mian penson, kiun mi celis identigi kun kristana sinteno rilate la forlason de la pastra stato edziĝcele. Ĝi perfektigita kaj kompilita de mi kaj de mia edzino, fine tiel trajtiĝis:

"Apude de mia domo loĝas eksa prostituitino kun filo kiun ŝi, certamomente de sia neimitenda vivtrairo, sentis en siaj visceroj kaj akceptis kaj amis. Certamomente ŝi proponas al ŝi rekoni sian kulpon kaj reveni al Dio ŝanĝante vivcelojn. Je kio devontigas ŝin ŝia konscienco? ke ŝi, ve!, rifuzu kaj forpelu la filon? aŭ ke ŝi malpermesu al si la ĝojon prizorgi lian estontecon kaj esperi kaj tutenergie engaĝiĝi por lia traviva sukceso? Kiaj rilatoj inter biologia okazo kaj libervola ago transiganta al nova vivo?

*"Je kio estas devigita la konscienco de ekspastro edziĝinta, se li rekonas sian kulpon, sian altrudon ĉe ekleziaj aŭtoritatuloj por havigi al si la dispenson aŭ similajn alĝustigojn? Ĉu, eble, ke li forlasu la edzinon kaj gefilojn? Se edziĝinta ekspastro ne plu aprobas kaj distanciĝas el siaj kondutaj ekscesoj kaj bedaŭras seniluziiĝojn altruditajn al la eklezio, ĉu li devas ĉagreniĝi pro sia jam konstituita familio?".*

Tiu parabolo, ne nur parabola, kreita el eroj elpensitaj de diversaj babilantoj,

kaj fulme kaj lumige sparkinta, kvankam taksita ĉe iuj cerbumaĵo, randiranta la la eskpastran situacion, kontribuis al la eksplicite preciza komuniko pri mia penso kaj al ekserenigo de mensoj de ne malmultaj virinoj, kiuj, ĉekomence, vidis en mia doktrino minacon al la pluteno de sia geedza ligo.

Al tiu nova maniero sin rilati kun siaj pasintaĵoj kaj nunaĵoj aliĝis, iom post iom, grupo, duonmoke kaj duonsenvalorige nomota *frakcio de la distingantoj,* plitrafe de la *kunlaborantoj submetiĝantaj* al la marĝeniĝo en la oficialaj ekleziaj aktivaĵoj antaŭ la fidelularo. Estis ankaŭ kiuj difinis tiun frakcion *specialistoj en harfendo aŭ mistifikistoj.* Frazoj kaj difinoj tiaj ŝajndelikate diskoniĝis, sed malofte estis perceptitaj kiel ofendoj krom distingiloj. Tamen iom oni kompatis min, okaze de mia hazarda kontentiĝo esprimita kiam oni informiĝis el ĵurnaloj, ke dek junuloj estas ricevontaj la pastran ordinon, ĉar, mi aŭdacis sugesti:

*"Ne kontraŭas nian novan staton se ni deziras, ke homoj amu Dion kaj lin servu, eklezie deĵorante en ĉasteco, se ili plenlibere tion volas".*

Iuj vidis en tiu sinteno desubisman bedaŭron kaj rimorson pro la nova ekspastriĝa elekto, kaj aplikis al mi, ŝerce jes sed iom priridindige, miajn psikajn analizojn kiel *psikokonstruaĵojn aperigantajn mian nekonscion*. Tiel: *"Sub tiu konsenta kontentiĝo kaŝiĝas bezono de stabileco aŭ plia avanciĝo de ideoj kiuj celas muldi originalecon de via blazono ĉe ni: sen tiuj tute aplaŭdoserĉaj aproboj pri novaj enpastriĝoj, al vi mankus konfirmo, ke vi estas marŝanta tra originaleco kaj distingiĝo. Kaj ruze ili maskas vian kaŝitan deziron reveni, se eblus, al pastraj oficoj! Kaj tiuj deziroj generas turmentatan pentemulon penantan kunigi ekspastriĝon kun inklino al la eklezio. Rifuzante plenkonsciiĝi pri tiaj psikaj meĥanismoj, vi fatale altiriĝas al gratuliĝo pri novenpastriĝantaj".* Do, ili reage, sed sen amuziga mia aplaŭdo, repagis min per mia sama specifa *psikanalizeca* monero.

Kial mi havis tiom da senhezito en la diagnozo pri ilia senkonscie vartita kulpokonscio aliiĝanta en persekuton al la eklezio? Ilia obĵeto kutimis: *vi promenas rande de fantaziaĉoj farante el ili spekulacion, eĉ preskaŭ senfaktan bazon*. Sed mia konvinko naskiĝis el diversokazaj konfidencoj de pastroj eksaj kaj eksiĝontaj. Mia paseo de longatempa ŝanceliĝanto, en la ekleziecaj strukturoj, preskaŭ konsekvencigis, ke mi ricevu konfidencojn kaj penetru en la spiritojn. Nemalofte tiuj miaj psikaj kaj konsciencaj analizoj trovis konsentan akcepton ĉe similsortaj konfidenculoj.

Ne forgesendas alia frakcio de ekspastriĝintoj: frakcio, eble la plej multnombra: tiu de la totala kaŝiteco! Multaj, forlasinte la pastran staton, foriras kaj

engaĝiĝas eviti komunecon kun samspecaj eksuloj, kvazaŭ la iamaj vivo kaj kulturopremo povus plu influi aŭ minacus, okaze de renkontiĝo kun similuloj, emerĝi. Multe tiun fenomenon oni diskutis per diversaj interpretoj kaj provis al tiuj ekspastroj alproksimiĝi, ankaŭ, interalie, pro motivoj de solidareco, sed rare la sukceso kronis la penon. Oni konsentis, ke la fenomeno meritas esploriĝi per sciencaj metodoj ĉar la aprioraj intuiciecaj, kvankam pravigitaj per kontrolitaj observoj, interpretoj oscilas inter seriozaj obĵetoj. Ĉiukaze jenas la diversaj opinioj, de mi enprelegitaj: ili emas ne kontakti nian klubon aŭ similajn asociojn pro la jenaj probablaj motivoj:

a) ili konservas tiom da tedo pro la pasinta klerika regularo, sentita ĉiam pli opresema dum la, eble tempe longa, ŝrumpado kaj vakiĝado de la pastraj ideloj, ke eĉ la ombro de klerikaleco hirtigas ilian reagivon pro tio ke eĉ la apenaŭaj aspekte seminariaj memoraĵoj ĉe ili aliiĝas suferiga kromvaro;

b) timo refali en ion ekrevivigantan suferojn kaj disiĝojn;

c) timo perdi siajn privatecon kaj trankvilon kun publika estimdamaĝo por siaj gefiloj kiuj riskus esti fingre rimarkataj;

ĉ) intima baraktiĝo kun bezono forgesi transgreson aŭ mankon de fideleco, nun ripareblan nur per humila rekono, kaj, sekve, ili timas, ke tia rekono egalvalorus rezigni la moralajn kaj spiritajn bonaĵojn elfluintajn el la eklezia dispenso de la needziĝa voto aŭ el sendispensa foriĝo. *Ili kaŝiĝas pro tio ke ili sin sentus nudaj, t.e. personoj al kiuj la konscienco riproĉas, ke ili ne regis siajn pasiojn ktp: kaj tio grundas en deziro kaj provo distanciĝi kiel eble plej multe el ĉio kio memorigas pri tio;*

d) eble tiuj ĉi neniam sin sentis pastroj kaj vivis amorfece: do ili malbedaŭras sian memoron pri la pasinta sakraleco.

Ĉu tiom da opinivarieco povis kunekzisti kaj ne kaose milpeciĝi? des pli ĉar la *specialistoj* devis alfronti malfacilaĵon konvinkige distingi la penton rilate sian konduton disde la pento, ekster ĉiu dubo ne postulata, rilate la bonojn devenantajn el la geedziĝo kaj koncipado? Ĉi-rilate kiu ajn eksplika artifiko aranĝita lasis ĉiam spurojn de malkontento en iuj edzinoj montrantaj, ke mem korodiĝas pro la risko esti kompatataj kaj eventuale malantaŭŝultre primokataj: oni komencis maloftigi partoprenojn en klubanaj kunvenoj.

La radikaluloj de la unua ekstremista frakcio decidis kunveni ankaŭ ĉe alia propra sidejo kaj ekaliĝis al alia, ĵus naskita, nacia establo de ”Pastroj edziĝintaj”.

Tiel ekfalis ankaŭ la propono, ke ni “solidarige rolu” kreante kason por helpumi la eksiĝontojn. Vere la afero jam ekstartis, sed tuj malfajriĝis pro nesanebla opinio-kontrasto: iuj intencis helpi la jam ekspastriĝintojn, aliaj celis

kuraĝigi, per ĝi, pastrojn al depastriĝo kaj liberiĝo de la klerikaj ligoj.

La disiĝo sidis en la nomoj: ĝi fariĝos efektiva post eventoj plisube eble apenaŭ rakontindaj en tiu malpli esenca ĉapitro.

Meze de tiuj diskutadoj kaj disiĝoj aperis kroma ekspastriĝinto kun sia edzino: ili ne ĝenis sin meminiciate rakonti, laŭ klubana kutimo, sian historion, similan al centoj da aliaj, sed riĉan je apartaĵoj. Li iam insistis plu krozi en pastraj ŝarĝoj por ne malĝojigi sian patrinon kunloĝantan. La oldulino tiom restis en la vivo, ke li atingis sian sesdekjaron antaŭ ol realigi kaj ekigi sian novan staton, kiu tamen nur ekstere malkaŝiĝis ĉar la asidue kunlaboranta virino de longe fariĝis lia sekreta, se ne sendi al rubaĵejo la malnovan metaforon de pastro *edziĝinta* al la eklezio, kromedzino.

Distingiga novaĵo konsistis en tio, ke ŝi siavice eksmonaĥiniĝis konservante tamen sian postenon ĉe lernejo kie ŝi plu profesoras je filozofio. Novaĵo estis ankaŭ, ke ili ne formetis kristanismon, nek forpuŝis la konscion, laŭ kiu ilia tasko devis esti alia, simple: ili forlasis la staton al kiu ili ne sin sentis vokitaj. Nenio kontraŭ la leĝo de la pastra senedzineco, nenio kontraŭ la eklezio.

Interaliaj konfidencoj, aŭ kuriozaĵoj, la eksmonaĥina edzino ne sin detenis konfesi, ke ŝi ju pli similiĝu al la edza bopatrino, kun kiu la edzo kunvivis sesdek jarojn, des pli prosperas la geedza kunvivado. Se, post Freŭdo, eblas paroli pri komplekso de Edipo senvuale, en tio nun oni kredas ĝin konstati konscideklare. Tiaj la komentoj, kvankam ne tute koncernaj, nemalicaj, de amikaro.

Ili kunludis, per simpleco de ideoj kaj senĝeneco sin malkaŝi, al la distingo de konscio de kulpo kun pento (se pri kulpo temas) disde rifuzo de ĉio religia pro bezono senkulpigi sin kaj konsekve kulpigi la eklezion aŭ kristanismon.

Kulpo, se estas, ne similas ion kion oni sukcesas elimini per rezonado aŭ nuligvolo aŭ per ekskuzpreteksto, per kiu iu jam sukcesis eltordi dispenson el la ekleziaj aŭtoritatuloj: kulpo estas superebla nur per agnosko kaj pento. Pento pro la neserioza enŝarĝiĝo kaj entaskiĝo en votoj postulantaj moralan forton pli fortan ol tiu fakte posedata aŭ pro cedo al la nerege kontrolitaj koraj kaj sentaj impulsoj.

Tiaj iliaj pensoj, kiujn facile, sed ne tute glate, la klubanaro trovis similaj al la miaj, sed esprimitaj en kuniĝo de spertoj kaj doktrino.

*"Ni estis*, ili aldonis kun ŝajna masoĥista kontentiĝo dum diversaj oficialaj aŭ privataj renkontiĝoj, *vere ekstervoje irantaj: ni elektis agi unumaniere dum konscienco nin invitis elekti alimaniere*".

Kial tiom da sincera malkaŝemo? "*Pro tio ke pastroj edziĝintaj, por pli efike sukcesi ignori sian kulpon, ignoras sian devon evangelizadi aŭ koleras kon-*

*traŭ eklezio aŭ fiere emfazas pri ĝi malestimon aŭ kontraŭagas kristanismon: ju pli da malindecoj en la eklezio des malpli da kulpoj ĉe ni!”*. Iliaj tezoj, apogitaj eĉ sur ilia estimiteco ĉar ambaŭ profesoroj pri filozofio kaj psikologio, pliintensigis unue scivolon poste deziron vidi pli klare en si mem.

Oni vidu, ke mi estis bonŝance renkontanta homojn sur kiuj apogi miajn nemalsimilajn, rilate la samkoncernajn psikfenomenojn, interpretojn!

Ne malplaĉis al la klubanaro ekspluati ilian plursciencan kompetentecon kiel, ekzemplkaze, pri la lingva kaj koncepta komparo rilate la pluroblajn signifojn de la vorto “amo”, en la latina kaj neolatinaj, kies unika radiko ŝprucigas plurajn kaj maldistingajn animstatojn, dum en la klasika greka, kaj foje ankaŭ en la hebrea, ĉiu sento havas sian distingan radikon. Ekzemple, amo de amikeco (Φιλὶα), erotika amo (= eroto, greke: Ἔρως), amo inter gepatroj kaj gefiloj (= Στεργω), kaj tiu rilata al akcepto kaj amprefero kaj senkondiĉeco agapo (greke; Ἀγάπη). Agapo, kristana amo el Dio al homo, greke: agape). En la latina kaj latinidaj lingvoj ĝenerale ĉio estas homogenigita en unika radiko “am”.

Alian novan koncepton ili, kvankam preterfluge, tralasigis en la kluba medio: antaŭ la ofta rimarko-akuzo laŭ kiu la katolika eklezio kontraŭmoderne kaj kontraŭhomrajte, daŭrigas ekskludi virinojn el la rango de sacerdoto, ilia respondo surprizis la klubanojn kaj eble anoncis ion novan eĉ porteologie. Laŭ ili ne ekzistas rajto sacerdotiĝi: tio estas afero tiom granda kaj escepta, ke nur Dio indikas la personon, sendepende de la ties kapablo aŭ merito aŭ indeco aŭ sekso. Fakte estas la episkopo kiu alvokas al tiu tasko kaj li alvokas laŭvole, laŭ sia juĝo; kaj montris, ke temas ĝuste pri senmotiva elekto: la episkopo, laŭ la krista instruo, senmotive elektas nur virhomon por montri, ke neniu rajtas. Neniu rajtas: la rajto eventuale ekas en la momento de la episkopa elekto! Senmerita elektito ĉar la tuta digneco staras en Kristo. Feminismo ĉi-tie ludas batalon kontraŭ nenio!

Ne mankis ankaŭ al ili suferoj devenantaj el rifuzo de la ekleziaj aŭtoritatuloj akcepti ilian volontulan kunlaboradon en ekleziecaj funkcioj kaj pastoralaĵoj, plurfoje de ili pluŝtupe proponitan kaj diversmaniere konigitan. Estis tamen nekutime vidi tiujn homojn repacigitaj kun la eklezio kaj pretaj senkondiĉe kunlabori kun ĝi kvankam en marĝenaj cirkvitoj de la sferoj de la oficiala eklezia agadejo.

Nun fratino morto ripozigas ilin ĉe ilia Sinjoro je kies servo ili provis sin taŭgigi per la edziĝa stato.

### Ĉapitro dekkvara

# La familio, laboro, komunaj okazaĵoj en ĉiam novaj spertoj

Jam por mi komenciĝis la familia vivo, la familio de mi kreita kaj revita je ĉiuj animaj tavoloj. Ni enloĝas luitan apartamenton, la edzino instruas, mi nun laboras aŭtonome, ĉe la iama firmao ĉe kiu fine mi aŭdacis prezentiĝi, kiel komercagento je laŭprocenta provizio, kaj emas ankaŭ entrepreni volontulajn taskojn en religiaj kaj sociaj prizorgindaĵoj: mi ne malŝatas, eĉ inkliniĝas, evangelizi kaj kristane animi en ĉiuspecaj renkontiĝoj kun palaj kredantoj aŭ en medioj de la senfajriĝintaj indiferentuloj. La multan liberan tempon, ĉar la laboro fakte parttempas min absorbante nur lunde, marde kaj merkrede pro tio ke bonŝance mia klienta niĉo situas en dense loĝataj provincoj, mi pretas meti je dispono avantaĝe de kristanaj organizaĵoj, aparte paroĥaj. Rilate tiun lastan aferon, nepras tamen, por oficiala inicado en kunlaborada engaĝo, akiri estimon kaj fidon, kaj agadspacon ĉe la religiaj tenoroj. Estis de ĉiam rimarkite, ke la religiaj medioj ne aŭtomate ĝojas, ĉe la unuaj kontaktoj almenaŭ, je la ĉeesto de ekspastriĝintoj kunlaborantaj kaj emas ilin ignori aŭ, pliprecize, igi ilin ignoritaj.

Tio plonĝis ankaŭ sur min, pliaperte ankaŭ sur nian familion: ni renkontis afablecon sed samokaze la pordojn de la pastorala kaj grava kunlaborado ŝlositaj: *via agadkampo limiĝu,* oni ŝajnis sugesti*, ekster oficialaj medioj; se vi volas kiel engaĝiĝintaj laikoj evangelize agadi kaj koniĝi, vi havas aliajn senrestriktajn apostolecajn kampojn ene de katolikaj popoloj; kaj tio, por ke estu evitata skandala miro kaj ankaŭ imitekscito kaj poste, ne laste, pro tio ke eksiĝinta pastro funde dezerta forlasis la eklezion.* Tiun finan koncepton oni ne senpere prononcis sed ĝi elspiriĝis el ĉiuj laŭkazaj aŭ oficialaj kontaktoj.

En la klubo "pastroj edziĝintaj", la supra sinteno estis konstato plurfoje spertita kaj komentita kaj plende taksita, laŭ kritikaj ekzamenoj, kiel konfirmo de la opreseme ambigua patrineco de la eklezio. La plejmulto, tamen, montris miron pri nia miro kaj pri nia desuba intenco reakiri, *ŝtelume kaj pentistume,* kiel disdegne enigite de la radikalula frakcio, pastrecajn funkciojn, al kiuj ni rezignis same kiel oni rezignus postlasaĵojn trivivintajn la vivon. Ilia juĝo: *"Vi per tiu kunlaborademo kovras malkontetiĝon pri via novelektita stato!".*

Iuj, male, jam delonge, kvankam neevidente aŭ inkognite, vidis sian persiston kaj disponeblecon akceptitaj kaj premiitaj, kaj jam aktivas ĉe paroĥaj asocioj, aŭ aliaj ekleziecaj establoj, ankaŭ kun responsaj nesakramentaj taskoj. "*La klimato ŝanĝiĝemas*, kelkaj komentis*, sed ni devas prefere agi inkognite ĉe fiduloj kaj pli ol ĉio ne svingigi antaŭ paroĥestroj kaj paroĥanoj nian novan feliĉon",* susuris prudenta nesenironia devizo.

Ekzakte tian postulitan kaj akceptitan inkognitecon oni retropuŝis kiel "publikan" malkvaliton: funde ni transprenis senpere el la evangelio la rajtojn apostoli inter homoj! Tia trudata inkogniteco *ofendas nin kaj evangelion.*

Dume la diverĝoj inter la diversaj klubanaj ideuloj konkrete minacis displitiĝi laŭ tri fluoj. Niaj klopodoj repacigi la animojn estis destinitaj konsumiĝi eĉ inter ĝentilaĵoj pro tio ke la fordriviĝo radikis en obstinaj ideoj. Sed persistanta pluteno de amikado kaj komunaj spertoj tiom interligis ĉiujn ke aspektigus, je okuloj de nekuraceblaj optimistoj, tiun riskon minaco nur je nivelo de lipoj.

Male, la tuta klubanaro antaŭ ol konsumi la disiĝon pledis por lasta eksplikoprovo "je tuta kampo", sen personaj obsedaj obstinoj aŭ pikadoj, kvazaŭ adiaŭa festo, dum kelkaj vesperoj. Sed la longaj konversacioj elmontris kial la disiĝo jam ne eviteblis: la alo de la ekstremula fluo deklaris sian emon interpreti la fenomenon religian kaj eklezian laŭ la kategorioj de ortodoksa marksismo. Ĝia konsekvenceco taksiĝis iomete anakronisma ĉar ĝuste tiutempe inter la itala marksisma moŝtularo eklumetis antaŭsignaloj de kritika marksismo, nome de doktrino kiu allasas, ke iuj sektoroj de la socia vivo interpretiĝu per nemarksismaj kriterioj kaj mastrumiĝu kvazaŭ ili ne rompus la rigidecon de la tradicia doktrina sistemo. Tiuj ekstremuloj ŝajnis protagonistumi ĝuste por malhelpi tiujn unuajn *terfalojn*, obskure perceptitajn, en monolita penstradicio, kiel fatalajn ekdisruliĝojn. Tia interpreto, laŭ kiu oni povus vidi en ili ion de konscia aŭ nekonscia reago baraktanta por ŝtopi antaŭviditajn doktrinajn breĉojn, multe provokis pensvekan reciprokan, iom fideisman, aplikadon de psikanalizaj kategorioj kvazaŭ scienco klariga vivanalizisto!

Diversfacetaj spuroj de marksismo kaj freŭdismo apogis ilin en la subtenado pri nepra (nepra por ilia filozofia sistemo) genezîĝo de la religia kredo el sociaj kondiĉoj de la popoloj: Dio, ekzemple, kreskus sur la bezono de protekto: *donu al homo liberigon el bezonoj kaj por Dio estus la fino,* sonis neokaza maksimo. La kontraŭa partio opozicie rezistis, ne per diversa analizo de la samaj psikaj kaj sociaj faktoj rajtigantaj ankaŭ diversajn konkludojn, sed sin apogante sur la distingo inter la ideogenerado kaj ideovaloro. La cirkonstan-

caro de la malkovro pri Dio ne determinas la valoron de la ideo "Dio". Se serĉante Hindion oni trafas Amerikon, tiu ĉi kontinento ne perdas sian konsiston: estas tasko de la racio pruvi tian konsiston. Licas ĉi-foje paraleligi Dion kun gemo trabriletanta inter sterkaĵoj: se el ŝlimaĵoj ekokulumas juvelŝtono, ĉu ĝi malŝatendas? Se vere homo satigita ignorus Dion, ĉu Dio ĉesus ekzisti kaj esti la kaŭzo de ĉio? Ni nin forlasu al racio forigante ĉion emocian!

Mallongan tempon antaŭ la klubrompiĝo oni decidis, ĉiuj kune (ankaŭ la radikaluloj), peti vidalvidan interparolon kun la torina episkopo, kardinalo Michele Pellegrino en kies diocezo ne malmultaj iam pastre zorgis. La kardinalo fleksiĝis al niaj insistaj petoj, malgraŭ ke mem sciis, ke eĉ lian famon de apertmensa homo kaj ennoviga, apogitan sur tre klera kaj kultura kompetento, ni pretis rezisti se niajuĝe apenaŭ bezonate; kaj iun tagon, postvespermanĝe, afable li nin aŭdience ricevis en salono de sia kutima loĝejo. Kaj jen okazis naŭza spektaklo, la plej maljusta kaj ofenda, de mi ne antaŭvidita.

La pastroj edziĝintaj, kaj do elstrekigitaj el oficialaj ŝarĝoj, kun kelkaj simpatiantaj laikoj, kuniĝintaj en nia grupo, estis ĉirkaŭ 80, iuj kun la respektiva edzino. Konjekteble, rigidemuloj kaj akordiĝemuloj paŝtas malsamajn celojn depostulendajn ĉe la kardinalo. Tamen unuj kun la aliaj opinias, ke la episkopo pretas komuniki ion signifan. Sed pri kio signifa?

Kiu ekopinios, ke la sceno priskribota estis studita de iuj por malŝatigi kaj humiligi, kiel reprezentanton de forigenda institucio, la kardinalon, tiu ĉi plifortiĝos en tiu konvinko observante kiel la plej akraj vortoj, ne malprovizitaj je teologia nesupraĵa precizeco, estis eldiritaj de edzinoj per preskaŭ preciza klerigita lingvaĵo.

Ĝuste tiuj asertoj, miksitaj kun defiaĵoj kaj ironiaĵoj, fakte sonis iom fremde, se oni ilin trakaptus aŭ aŭdus en buŝo de virinoj ne kutimiĝintaj al tiu lingvaĵo. La kardinalo daŭrigis resti en sia loko, majeste kaj humile, antaŭ ni nur por respondi aperte, li sciigis, al la ŝatinda peto pri pli manifesta kaj publika akcepto de ekspastroj en nepastraj oficoj ĉe paroĥaj medioj. La embusko fare de la franĝanoj de la tute kontestularo pretendis, ke la kardinalo allasu, ke la eklezio ĝis nun opresis fidelulojn, ke la pastra celibatecstato estas la malnova ruzaĵo de la eklezio por havigi al si pli pretan roton da sindediĉaj propagandistaj galopantoj, ke li sugestu al la ekleziaj plejpovuloj la forlason de la kapitalismaj koluzioj kaj de la pretendo, ke nur eklezio posedas la veron ktp; kaj ju pli la ideoprezentado pluiris des pli iliaj vortoj ironie ĉantiĝis: sume ili, kredantoj kaj nekredantoj, volas, ke la eklezio revenu al la evangelio... Evangelio, tamen, interpretita laŭ marksismaj principoj kaj laŭ la nova *"prakso*

*ĉionenveranta",* prakso el kies sukceso devenas ĝia pravigo. (Do, laŭ miaj silentaj ekimpresoj, oni la prakson delire pufigu kaj ĝin ĉiukoste sukcesigu… por ke la vero *spontane* sin rivelu!).

Mi vidas kunpuŝiĝi sur la milda vizaĝo de la kardinalo la ombrojn de l' subpremita sufero, la paciencîĝon antaŭ la veadoj, la malpotencon enigi klarigojn inter tiom da impete akraj akuzoj. Mi estas pretiĝanta interveni por pardonpeti pro la neantaŭvidita insida sinteno ĉar li, invitita tosti kun ni super la plej bona maniero kunlabori en la plu kaj pli insidata kaj ŝajne nebuliĝanta dia regno, nun sin vidas altirita en senfruktan polemikon per misdialogaj malĝentilaĵoj; sed io min bremsis, eble la penso ke iam per la sama vortfuriozado mi vendaĉis similajn pensaĉojn!

Kvietiginte per pacienca kaj dignodisradia silento la vortan ŝtormon kaj apenaŭ kovrinte elverŝiĝantan amarecon, la kardinalo laŭdas la inklinojn de la petantoj kunlabori en specifaj gravaj oficoj en paroĥoj, same kiel jam okazas diversloke, instigas paciencon rilate la kriterion de la duonpretendata inkogniteco rilate la pastrecdevenon de la ekspastroj kunlaboremaj, kio laŭ li iom post iom ne plu postuliĝu; anoncas, ke mem plilarĝigos la eblon, ke ankaŭ aliaj ekspastriĝintoj, kiel jam okazas por iuj el ni, estu enoficigitaj en la instruado pri la katolika religio en publikaj lernejoj; fine esprimas deziron renkonti, eĉ konfronte, nin ankoraŭfoje. Pri la aspiro aktivumi sacerdotece inter fideluloj, li iom vagis per la sugesto, ke post la detruo de la antaŭa vokiĝo oni povas kaj devas nur agi laŭ nova vokiĝo, tio estas evangelie anonci tie kie la eklezia voĉo ne sukcesas efike… *siluetiĝi.*

Sin delasante de la grupo, li fine sin turnas al la ultrasaj kontestuloj aŭ alispecaj opoziciantoj, kies interdiraĵoj duonvoĉe flustradas inter la sidilvicoj, kaj manifestas serene sed kun sekura kaj memfida kaj firmiga trankvileco: *"Mia eklezio estas tiu de la Nova Testamento elfluita el la tradicio*".

Oportunis la frazo ĉar la tento trakti eklezion kiel ion flekseblan ekflugtuŝis multajn, kies plej akruloj, el pluaj kredantaj frakcioj, jam kontaktis protestantajn komunumojn kvazaŭ inter tiuj ĉi ne ekzistus kontestuloj.

Lia sekretario aldonis, laŭ la paŝoj de la kardinalo: "*Eventuala nebona konscienco pri pasinteco ne rajtigas, puŝite ĝuste de tio, modifi la eklezian konstitucion".*

En la salono pludaŭris nia interdiskuto ĉar, eble, iuj emis impresi la kardinalan ĉirkaŭularon per frazoj tiaj: *"Ĉe mi ne plu elitas religio... por mi religio estas fininta...jam ne plu naiva, mi plu cerbumas pri ĝia vereco aŭ malvereco!... kristanismo al mi ne plu interesas..."*

La konversacio, strange tute repacigita kvazaŭ sereno poststŝorma, encentriĝis ekzakte pri la rolo de la intelekto subkuŝinta en la supraj sentencoj: ĉu ĝi naskiĝas el sinteno de la volo, de la animo kaj de la preferinstinktejo aŭ el malkovro de la intelekto logike procedanta laŭgrade, preskaŭ firme skandante ĉiun kribrendaĵon? Tiu *"al mi ne interesas"* devenas pli el la animo, el la volo, ol el konkludo de la menso, kiu male laŭirus per la kriterioj de vero aŭ nevero. Ĉu tiu enmiksiĝo de la volo, aŭ *interesoj* de propraj preferoj, ne perturbetas difektige la logikan procezon de la racio? tio ne tendenculigas la ekesploranton? Ĉu kio *"ne interesas"* ne perdas eventualan konsiston ĝuste pro la motivo ke *ĝi elektas antaŭracie, nome sen strikte raciaj pruvoj*? La volo ne faras la veron, ĝi nur akceptas aŭ rifuzas!"

La interesa disputo, animita de mi, lasis ŝvebanta meze de la nuboj la respondon pro tio ke la hejmgardanto decidis forpermesi ĉiujn por fermi la pordojn.

Kaj la episkopo sendis sekretarion por la forpermesajn salutojn.

Se eblintus pli kompleksigi la tensiojn inter la diversaj frakcioj, jen taŭga evento pri kiu multe estis raportite en tiutempaj gazetoj ne nur bulvardaj. Mia kunfrato franciskana, tre juna tiam kaj tre karakterimpeta, misiistis en Latinameriko. Mi konis tre bone liajn politikajn preferojn: tute pordemokratiaj ja jes, sed orientitaj kontraŭ la tiamaj studentaj movadoj kaj iliaj Sesdekokecaj revoluciaj mesaĝoj, eĉ kontraŭ la partioj klaskonsciigaj, kaj la komencaj sinsekvaj terorismaj eksplodoj. Kiel fulmo, gazetoj kaj teleĵurnaloj raportis, ke li en Bolivio kaj en Ĉilio, eĉ en tuta Latinameriko, tiu aspekte etburĝeska mediokrulo, estas intense serĉata de diversaj policoj pro atencaj teroraĵoj: rilate tion oni brile pentris, ke el la alto de sonorilturo li rezistis mitralante kontraŭ policanoj kaj pro tio gajnis la galonojn de gvidanto de teroristoj *Tupamaros*, kaj nun, laŭ komunaj eldiroj, la krimulo estas serĉata ankaŭ en Italio. Kial miri pri tio? Pro tio ke la kvalitoj de la supozitaj agoj ne similas la konatan personon; sed inter la ekspastriĝintoj de la eksremula frakcio "frato mitraleto" estis tuj bildigita la heroo kiu fine konsciiĝis kaj, elspezante persone, nun plenforte laboras super la proletara, eĉ homara, memliberiĝo. Por iuj, jen nova mito; por multaj jen nova heroo kiu, unubate sin malembarasinte je religio kaj je eklezio kaj je kapitalisma opreso, nun gerilas duarangigante personajn avantaĝojn kaj komfortojn.

Kiel elkriptigi la veron disde la legendo? Kio vere faktiĝis? Post kelkaj monatoj ĉio klariĝis: en Italio oni komencis malkovri kovejojn de mortigintaj revoluciaj teroristoj kiujn ĝis tiam polico ne sukcesis identigi kaj aresti, malgraŭ iliaj mortigaj embuskoj. Kiam al la konsternita publiko oni elmontris la unuajn arestitojn, klariĝis ankaŭ la funkcio de tiu mia iama, nun "mitraleta",

kunfrato: por li estis programite, ke li ŝajnigu superrevoluciulon, aspektiĝu superfidinda je okuloj de ruĝaj samnaciaj teroristoj, por ke tiujn ĉi enŝoviĝe kontaktu kaj spionu kaj pri ili informu policon: kion li sukcesis pro la gerilera famo. Operaco de sekretaj servoj kun sukcesaj rezultoj.

La homo eklipsiĝis el cirkulado, certe ŝanĝinte fizionomion kaj regionon kaj aliajn siaĵojn, kaj la heroo lasis graviĝantajn elreviĝojn ĉe iuj el ni fariĝante fifamulo kaj simbolo de burĝece kaj ekleziece kontraŭlaborista ensteliĝinto, kies misfaroj nekompareblas kun la terorismaj perturboj, kiuj male estus plenumitaj por grandiozaj idealoj realigeblaj nur pere de perforto.

Sed ni revenu al la rilatoj kun la eklezia ĉefrolularo.

La ideoj kaj intencoj de la kardinalo tiom sugestiis la partoprenantojn, malgraŭ la vortaj akraĵoj direktitaj kontraŭ lia *subtila persvadiga ruzo*, ke por kelka tempo estis flankenlasitaj la diskurantaj opinioj originantaj la malsamajn kaj kontraŭajn kondutojn antaŭ li. Sed sekrete, en animoj, la disiĝo ekprepariĝis. Fakte, monaton poste, kiel dirite, konsumiĝis la definitiva disiĝo de la grupo, helpe ankaŭ de la neantaŭvidita komplico de la samtempa politika maldekstrulara partia disdividiĝo.

Intertempe efektiviĝis praktike la promeso de la kardinalo: ke eblas pli intensa kaj strikta kunlaborado kun la karitataj aŭ kulturaj aŭ pastoralaj strukturoj de la loka eklezio. Sekve de la komenciĝo de ĉi kunlaborado kun eklezaj strukturoj, aparte en la instruado pri katolika religio en publikaj lernejoj, ekestis ankaŭ iuj kiuj senpene ekimagis proksima la permeson ofici pastre ankaŭ por la pastroj edziĝintaj. Tia iluzio trasemis elreviĝintojn kiuj eble eĉ hodiaŭ ne plu atendas.

Rilate al mia situacio, ne tuj la sugesto de la kardinalo al siaj pastroj iĝis konfido aŭ tasko aŭ publika akcepto ĉe la paroĥestroj. Se konsideri pri mi, malantaŭ la ĝeneralaj konsentaj frazoj, el iuj el la kunlaboranta subularo breĉis deziro, ke mi ja jes kunlaboru, eĉ intense kunlaboru, restante tamen en marĝena *aktorado* aŭ longdistanca de la risko esti malkovrita de fideluloj eloficigita pastro, kvankam neniu, krom la paroĥestro, montris unuatempe sciemon pri origino de mia "kompetenteco". Pri tiu afero, fakte, mi neniam parolis kaj nenion lasis travideti, eble pro tio ke neniam mi sentis tiun urĝon ĉar, laŭ mi, homo devas valori, ne pro la manifestiĝo pri sia deveno el seminariaj kaj porpastrigaj studoj kaj rondoj kiuj pliestimigas, ĉe fideluloj, la kompetentecon sed samtempe mem ne rajtas krizigi ties konsciencon. Rilate tiun riskon, frata amo konsilas rezigni eĉ sian rajton por favori maturiĝon de la fidelularo.

Pri tio rakontindas okazintaĵo, impresanta iom ŝablone nur unuavide: mia ko-

lego en la komercagenta laborado, iam fariĝis mia kunulo dum kelkaj tagoj laŭ norditalaj provincoj. Dum ĉefmanĝo en restoracio, li, pro neniam klarigita motivo krom tiu de regurdanto de pensoj serĉantaj liberan eliron, min laŭtvoĉe antaŭ dekoj da kunmanĝantoj eskvize alparolis tiele:

*"Vi, kiu estas supersperta ekspastriĝinto, kion opinias pri... pastroj kiuj perdinte kapton kaj flirtademon kun alies edzinoj, nun limiĝas furori nur kun la propra?... Ĉu ekspastriĝintoj nun vere bridas sian en alies lito ĉasadon?".*

La homo ne finis la frazon, ke mi elaste kaj impete batis plenmane, el la fronta sidloko, lian maldekstran vangon tiom precize kaj forte, ke la frapito flankenfalis. Tuj leviĝinte, li min ekpostkuris tra la restoraciaj salonoj inter la klientaj tabloj, kaj sekve en la antaŭa placeto. Kvankam malpli aĝanta je dek kvin jaroj ol mi, li ne sukcesis min kapti. Kiam la galo ĉesis transversiĝi ĉe li, ni disigis la okazajn komunaĵojn kaj ĉiu plu laboris laŭ sia avantaĝo. Malbridis en mi tiun reagon tiom la vorto "supersperta" kiom la alia "ekspastriĝinto": la unua evidentas, la dua, krom la normala negativa implicita senco, voĉnuance ŝprucigis ion malŝatecan ĉe la ĉeestantoj per io privata. Pri tiu okazintaĵo, li neniam parolis en firmao, sed ĝi konjektigis, ke mi jam laŭiĝis objekto de almenaŭ ne nur malmalica mokpetolado; kaj tia malkovro ĝermigis, kvankam tre malrapide kaj malgraŭ mia supozo, ke tiaj aludoj jam perdis sian kapablon min vundi, sekvojn en mia sinteno al la firmaaj kunlaboristoj, spite ke, laŭ Albina, frazoj aspekte mokecaj similas pli goliardecajn amuziĝojn ol volon moki kaj agnoskigi dupon. Kaj tio blokis laŭ kelke da tempo mian gajan babilemon inter ili.

Ne malestis certe la okazo de publikaj paroladoj dum paroĥaj renkontiĝoj. Sed la paroĥanoj juĝis miajn intervenojn sintrotaksaj aŭ pretendecaj. Plurfoje mi konstatis, ke inter laikoj, eĉ en privataj kontaktoj, en kazoj similaj al la mia, ne taksiĝas sintrotakso la kompetento kaj iniciatoj nur kiam al ili iamaniere sciiĝas, ke la interparolanto estas revenanto el seminario kie eble restintis ĝis la antaŭtago de la ordiniĝo. La kredito je fidindeco kreskas proporcie al la informo, ke la parolanto aŭ iniciatanto iam atingis la sojlon de la pastreco kie li povis atingi altan kulturon. Mi vidis per miaj okuloj konkretiĝi la jam priparolata fenomeno: en religiaj kaj kulture apudaj aferoj nur la pastra figuro ricevas ŝatindecon, kvankam kaj samtempe la pastra karakterizo ricevas, ĉe nemalmultaj, kun varispeca apreco, ankaŭ kaj samtempe ion malŝatindecan. El tio facile oni glitis en la konkludon, ke ankaŭ tiu socia fenomeno devenus el ekscesoj de klerikaleco per kiu la traepokaj ekleziaj responsuloj misĉizis la tutan fidelularon senescepte de indiferentuloj.

Sed la mondo vastas dum la evangelian ordonon evangelizadi oni povas inde plenumi ĉie: ĉie por mi montriĝis diversaj el la senfinaj kazoj en kiujn katolikismo povas serioze kaj respekteme enkonduki sian mesaĝon. Tio permesis al mi, ĉe personoj dezirantaj je pli kompleta sed penantaj trovi vojon al pli dokumente pravigita kompreneblo pri kristanismo, kontribui al la reeltrovo pri ĝi per nova metoda esploro kiun ili kredis, prave aŭ malprave nun ne interesas, malhelpata kaj neŝatata de pastraro. Mia sekreta tasko kondensiĝas en la moto*: anoncu ĉiam la promeson kiu estas en vi,* laŭsugeste de la Sankta Petra leterero. La tero pli taŭga kaj ricevema el mia semado, oni al mi perspektivigis, la socia kulturita grundo. Kaj tio laŭis penon kaj kontentiĝon de miaj inklinoj, foje movitajn ankaŭ de, ne tute senambicia, klopodo agnoskiĝi nemallerta agulo.

Samtempe mi daŭrigis prospere labori, ne ĉiam tute trankvile tamen ĉar mian animon breĉetis novaj sentoj, kiuj komplete neniam malaperos el mi.

Mergiĝinta en la komercistan vivon de vojaĝagento, en daŭra kontakto kun tre diversaj personoj kaj situacioj, mi tiel profesiiĝis en vendadarto kaj konvinkigado pri la boneco kaj "nepreco" de mia ofertita varo, ke la liveradaj inventaĵoj memfluis el mi kiel drole allogaj inĝeniecaĵoj. La gajnoj prosperis al mi, same kiel cetere soris la nacia ekonomio, kaj jam Albina kaj mi ekprojektis aĉeton de loĝejo por ricevi digne niajn filojn, kiuj tamen daŭrigis resti nur revataj.

Ne floris, tamen, ĉiam rozoj. Unue vaga sento de kulpo komencis okulumi, de tempo al tempo, en mia konscienco: *tiu emfazo, kun relativaj persvadigaj artifikoj, por reklami la vendotan varon, ĉu, sincerdirende, ne kunlimas kun alloga maljustaĵo? Tiu ekzaltado, kun ekscesoj nemulte laŭveraj, ĉu vere ne devojigas personojn el la atento pri pli seriozaj kaj necesaj konsumadoj? Ĉu mi ne disvastigas, subtile ĝin nutrante trans la homecaj limoj, socian materialismon? Kaj kio ĉu se mia mono, almenaŭ parte, estus ŝtelfrukto?*

Tiuj pensoj min ronĝadis dum longhoraj aŭtoŝoseaj de unu regiono al la alia, kaj certe kontribuis min deteni, en la negocado ne ĉiam komplete ne malblufa, en la limoj malpliforaj de la vero kaj ne konkludi negocon kiam la cirkonstancoj de la *hokiga* reklama varofertado komprenigis al mi, ke la kliento estas tro persvadebla aŭ trompiĝanta rilate la taŭgecon de la aĉetota varo al sia klienta niĉo, aŭ estas aĉetanta tro senmarĉande.

Mi do prilaboras panon proponante varon de vasta konsumo de estimata kaj grandeta firmao. La gajnoj, malgraŭ miaj ekmalfidoj, ekfluis malavare tiom, ke naskiĝis deziro loĝi en propra hejmo, kiel jam pensigite. Iun belan tagon

mi fakte enhejmigis mian propran apartamenton. Kion pli komuna ol tiu ordinara fakto? Tamen tiuj ĉi cirkonstancoj vekis krizon: precizige kaj elstarige reenŝoviĝis, fuŝante la humuron, en min ne pasema malkvieto kaj iu speco de martelanta rimorso: *Ĉu, sincerdire, tiuj gajnoj honestas? Ĉu mi ne spilis la naivecon, kaj do la poŝojn, de iuj klientoj allogitaj ankaŭ de mia persvadiga vervo kaj de miaj muelaj psikkaptiloj*? Memoro prezentis al mi diversajn kazojn en kiuj honesteco ne avancis tute sola ĉar foj-foje mi min trovis en la neceso barakti por demontri al mi, ke mi tiam agis honeste. La dubo neniam kadukiĝis en mia memkritiko, kvankam mi engaĝiĝis pri pli atenta objektiveco en la rilatoj kun klientoj.

Ankaŭ el alia fonto la dubo trovis nutraĵon. La sacerdoto kiu konfesprene ricevis miajn konsciencajn konfidencojn dum pilgrimado, iam, abrupte min direktigis en la temon, preskaŭ neglektitan de la kutima religia edukado: pagi la impostojn.

*"En viaj baraktaĵoj kun la fisko, ĉu vi venkas per ŝteloj aŭ per impostpagoj? Ĉu vi korekte agas kun la ŝtato, nome kun la civitanaro? Ĉu eblas, ke la mono ŝparita koincidas kun mono ŝtelita (kaj fakte mono redonenda), ĉar ankaŭ ĉe ni foje traefikas la moto: kiu ne ŝtelas, tiu priŝtelas sian familion?".* Kiel sciate, en Italujo oni penas, pli retorike ol rezultige, antaŭenprogresi tiun sociecan senton, eble pro la motivo, ke la nacia unueca ŝtatiĝo naskiĝis preskaŭ perforte tretante kaj detruante la regionecon kun ties tradicioj kaj senposedigante aparte la sudajn gentojn el monaĥ(in)ejoj kaj diversaj popularaj asistadcelaj posedaĵoj; kaj ĉio por, interalie, vivteni la plej nombran armeon de Eŭropo kaj batali la sudan "brigantecon" (banditecon), nome la rezistantoj al "sampatrujana" okupo. Pro tio kaj eble pro enkarna memoro de fremdaj okupoj (franca kaj hispana kaj aŭstra), de ĉiam la itala popolo konsideras la ŝtaton kiel avidan spoliiston.

Tamen, sekvo de tiu konscienca ekzameno, facile la duboj ekspansias same kiel facile ili honeste forbloviĝas: sufiĉus agi laŭleĝe!

En alian plagon tiu nekonata ulo, inklina igi la pentinton senpiece ekzamenanto pri si mem, metigis miajn fingrojn: *"Ĉu vi kelkafoje ĝojis pro la misŝancoj de proksimuloj kiuj ajn? Aŭ al vi ne malplaĉis alies misfortuno?"*. Kaj mi devis konstati, ke enviemo, kvankam batalata, plu portas min malĝoji antaŭ alies prospero. *"Ĝoji kun ĝojantoj kaj suferi kun suferantoj"* estas normo preskribita de iu kiu priscias kio kuŝas en homo. Sankta Paŭlo per tia frazo bildigis kaj ĉerpis el la koro de kristanismo.

La konscienca ekzameniĝo plu daŭris kvazaŭ mem. Elstariĝas principo de

la moralo (ĉu nur katolika?) laŭ kiu ne licas riĉiĝi per alies mono kaj aĵoj se ŝtelitaj, eĉ kiam la priŝtelito ne plu troveblas aŭ determineblas redoncele. Nu iam, kiam mi decidis ne prizorgi la observadon de la votoj, la bonfara mono trapasanta sur miaj manoj ne finiĝis plifavore al religiaj aktivadoj de la konvento sed alhokiĝis en miaj ruzaj poŝoj kaj facile kaprice elspeziĝis: la konscienco min nun devontigas redoni tiujn ŝtelitaĵojn. Al kiuj, se mi ricevadis anonimajn monajn donacojn, aparte dum pilgrimoj? Kiamaniere nun almenaŭ sekrete avantaĝigi la perŝtele povrigitajn konventojn aŭ ekleziajn organizaĵojn sen kompromiti mian honoron? Kun konfesprenanto kaj kun mia edzino estis *artifikita* la maniero: redoni al la plej bezonuloj! Tiel mi taskis min, fakte, konstante subteni kelkajn el la ekpulullantaj asocioj aŭ volontulaj grupoj helpdonantaj en la tria mondo.

Trans tiu rifo kiu baraktigis mian spiriton intermite, lige al tiuj malkvietiĝoj kaj kvietiĝoj elsubfosiĝis ankaŭ alia sento: sento de perdiĝo, de malaltiĝo, de perfido: la komparo de la novaj pereiĝantaj varoj (teraĵoj) kun la antaŭaj nepereontaj varoj (ĉielaĵoj) senmezure ekŝvelis ĝis emigi min al parolado kun Albina, eble por superi angoron. La variemaj kaj eĝaj flankoj de tia komparo igos min paroli ofte en la sekvo de tiu rakonto. Mi sukcesadis, foje, superi tiun enan situacion, provizore akcelante la veturilon por rehejmeniri revidi kaj magiiĝi ĉe mia filino Elvira, pri kiu eble pliposte.

Alia, sed ne lasta, eble miksita kun orgojla mempercepto aŭ defluanta el edukado al *altaĵoj*, iu subtila timo ke ĉio, eĉ tiu mempercepto, disipiĝu al la ordinaro kaj al vivo senvalora kaj senreliefa: restaĵo, certe, de la iama pasio pri *ĉielaĵoj* kiuj tamen neniam pelas malŝati ordinaraĵojn se celigitajn al la fina morala perfektiĝo.

Kaj abrupte jen la trista novaĵo, same trista kaj neprognozita ĉar sensimptoma. Nia ekspastriĝinta amiko, el la ĉirkaŭejo de Saluzzo, nordokcidenta piemonta urbeto, elfenestriĝis, sin mortigante! Kiu estis? Kvindekkvinjara, jam tre estimita paroĥestro, kies ekspastriĝo estis bedaŭrita de lia fidelularo pli pro disiĝo de amata persono ol pro religia perdo; kun ĉiuj li plu elpensis reciprokitajn amikecaĵojn kaj kun kelkaj vizitajn kontaktojn. Senfila, li travivis kun la edzino, virino robusta kaj decidema kaj serĉanta en ĉio la amuzan flankon, ĉiam aniĝante al niaj klubaj rendevuoj tamen nepartianiĝante al iu el la diversaj frakcioj: kutime li aŭskultadis silente, oni nur penece elbuŝigis el li opinion iun ajn; nur malmulte da memoraĵoj pri tio li lasas, kiel “*vi prizorgas randozonajn problemetojn, eskapante el la esencaj!”,* ne pli aldonante ion alian. Post la disiĝo, pri kiu tuj sube, de la grupo, la geedza paro daŭrigis troviĝi kun ni,

sed ne disdegnis partopreni ankaŭ renkontiĝojn de la kontraŭekleziaj rigidaj depastriĝintoj. Kiam lian silenton oni ŝerceme interpretis kiel sintenon de homo de penso, li vortlude sin memmokece difinis: *homo de penso senpensa.*

Jen kiel ni vivis la fatalan eventon el komentoj en la postfunebra bedaŭro, iom vive esprimata.

*"Li bone rilatis kun la episkopo"*

*"Li neniam kaj neniel sopiris reveni, eĉ se tio eblus, en la pastrecan animzorgadon edziĝinta pastro"*

*"Li ne suferis pro mankoj de ekonomiaĵoj ĉar li denaske multe riĉis"*

*"Neniam li sin montris tediĝinta pri sia vivo, eĉ montris animserenecon"*

*"Amata de la edzino kiu pro li rezignis pri multe el siaj sociaj rilatoj"*

*"Ĉu lia kutima silento ne travidetigis problemon? Kial li ne vidis en ni helpon kaj subtenon?".*

*"Kio impliciĝis en liaj sentumoj por ke li forlasu sola sian edzinon? Ĉu ne plu amata aŭ ne plu amanta?".*

*"Lian silentemon ĉiam superŝutis spontana rideto. Sed estis rido pli anticipa ol postsekva kvazaŭ por malebligi enketon pri liaj intimaĵoj"*

*"Eble lin ne fuelas loĝadi en sia iama paroĥo. Tio provoke ĉiam ĉeestigas neceson reĝustigi kaj pravige plialtigi sian disiĝon el la pasintaj tasko kaj alvokiĝo. Je ĉiu paŝo, je ĉiu saluto eble li devis, ene de si mem, provi kaj reprovi motivi sian novan elekton... ".*

*"Eble lin, jam aktivan homon, rodis neaktivado, kvankam li neniam emis dungiĝi".*

Tamen mi aŭdis ankaŭ, fare de pastro lia seminaria kunulo, ironiaĵon, eble pli galimatie aŭ edifige ol malice diratan: *"De amo senfina al minimuma amo. Lia koro ne plu kapablis flugi en vakuo...".*

Ekestis iuj depastriĝintoj pretaj kontesti la lokan episkopon, ĉeffunebranton, kulpigitan je manko de kompreno al la iama kunlaboranto, evidente bezona je amikeco kaj homaj rilatoj. *Akuzo malprava kaj erariga*, aliaj ekspastroj korektis, ĉar tiu ĉi episkopo daŭre klopodis kontaktiĝi kun siaj eksiĝintoj.

Iom post iom la vidvino retiriĝis el klubaj vicoj.

Ne tie ĉi tamen fermiĝis la fulmotondraj diskutoj, tro akraj por enteni pli ol sfereton de vero. En niaj "fakaj" societaj revuoj, ekzemple, estis ankaŭ suspektigite, ke tiu sinmortiginto, funde, estis viktimo de la eklezio, kiu lin iam martirigis malebligante naturleĝan korelverŝon de la edza amo; kiam li trovos la forton repreni sian rajton, tion li atingis kun skue difektita personeco. Eklezio devus oficiale kaj solene pardonpeti...

*"Romo perdis la mizerikordan mienon kaj alprenis tiun de la dominado, vantema kaj malmola",* sonis ilia malpli akra devizo.

Tiu evento fariĝis abrupte la precipa stumbligilo ene de miaj certoj kaj kontentiĝoj, el kiuj diversaj homoj, kiel supre vidigite, estas trairataj ankaŭ de konsciencaj malkvietoj.

Rilate tiun komenton, pri la nekonveneco de posteksiĝa restado en teritorio de sia pastra prizorgado, mi traspertis, ke la plej akraj akuzantoj kontraŭ la eklezio poziciiĝas en tia kategorio: la ekspastroj restantaj, post edziĝo, travivi en la socia medio de sia antaŭa pastra deĵorado travivas ĉiam kontinue puŝataj al streboj por defendi kaj montri la rajtecon de la elekto, ĉiuflanke observata; kaj tia tensio akrigas orgojlon kaj sinsekvan enmergiĝon per novaj plipravigantaj motivoj serĉantaj kaj pliigantaj ekleziajn miskondutojn. Vetindus, ke inter la vilaĝanoj troviĝas kiuj pensas, por uzi popularĵargonaĵon, ke ekspastro difineblas iu "kiu ĵetis la sanktan vestaĵon al urtikejo" kaj tio povas daŭre ĝenigi kaj revigligi nekonscian reagajn pravigon kaj senkulpigon.

Ankoraŭ rilate la edziĝintajn sacerdotojn: fine mi ekkapablis ilin distingi per pli enkadrigaj kategorioj mirigantaj la profanulojn. Mi elĉerpas el mia sperto kaj de mi ellaborita enketo, praktike aranĝita de mia edzino kaj aliaj virinoj. La enketo kies skribajn demandojn responde plenplenigis kongresanoj el diversaj kurentoj, celis sondi disponeblecon reveni al la pastra agado kiel pastroj enfamiliiĝintaj, kaj pri tio mi, poste naciskala kongreso de ekspastroj edziĝintaj, verkis artikolon en katolika klerikulara revuo, rikoltintan, laŭ onia diraĵo, vastan konsideron far de kelkaj episkopoj. Nur triono, estu dirate por statistiko-ŝatantoj, akceptus tion fari, nome reenoficiĝi pastredziĝe!

Mia "kontraŭflua" irado rilate la regantan memteniĝon inter ekspastroj refajriĝis okaze de impresa serio da eventoj. Unu el tiuj, kaj estis la lasta tiutipa, jenas:

La ekspastro, iniciatinto de la klubo, plu restanta kun la modera grupo, do ŝatata de la plejparto, planis projekton precizan, kiun mi konsciis, kelkan tempon poste. Ĝi devus konstrui efikan respondon al tiu ĉi taska demando: *Kiel senvestigi la ekspastriĝintojn je pastrecaj aŭ religiaj spuroj, kuŝantaj en iliaj animoj, antaŭ ol tiuj ĉi frue/malfrue surfaciĝu nereteneble kaj elkreskigu religian reviviĝon?*

Por atingi tiun celon li inventis taŭgan strategion: antaŭe, laŭ kelka tempo, li nin kunsidigis por komunuma mescelebro, poste el la mescelebro li elstarigis, sinteze kunpremante vortajn formulojn kaj ignorigante fundamentajn ceremonion, la kunvivadan rilataron kunligantan animojn kaj diversulojn, pliposte ekspli-

cite reduktante ĉion al simpla komunio per pano kaj vino kun preĝoj dum ordinara vespermanĝo devestita je religiaj implicitaĵoj, plej laste la preĝoj fariĝis pripolitikaj konsideroj ĉiam kun kontraŭekleziaj fendoj. La transirojn de unu stadio al alia li sukcesadis igi preskaŭ nepercepteblaj kaj kvazaŭ postulitaj de la partoprenantaro mem. Li, aspektante paroli al jam konvinkitaj personoj, decide tiklis, por ke ni igu nia la doktrinon, laŭ kiu Jesuo propagandis por la homa memelaĉeto, ne alidirektante la homan alvokon al liberiĝo. *"Fakte, la doktrino de Jesuo kongruas kun la arketipo, je kiu formiĝis lia persona historio, de memliberiĝo. Ĉio tio harmonias kun la politika mesaĝo de la origina marksismo kiu emigas al memliberiĝo eĉ ene de la opresema burĝa socio".* Ekis tamenoj, obĵetoj, kritikoj. *"Se Jesuo Kristo estas nur tio, li ne havas valorflankojn: ni ne bezonas lin! Ni jam havas modelojn kaj flagojn pli proksimajn kaj vivindajn!".* Kreskis nemalvasta reago, el kiu la definitiva movadskuo.

El si mem pano kaj vino, materiaj ingrediencoj per kiuj komunie konfekciiĝas la katolika meso, taŭgas, certe, por simboli fratan kunvivadon kaj la kristaj vortoj povas certe koheri kun memoraĵo, interhoma amikigilo, solidarecdeklaro; sed *por sin firmigi ekskluzive sur tiaĵoj oni devas supozi mitigon de la bibliaj kaj tradiciaj tekstoj kaj kuntekstoj, forblovante la historiecon de Jesuo Kristo kiel mesaĝinto de Dio pri Dio.*

La reagoj al tiu, laŭgrade taksita fia, provo, trenis ankaŭ min en la tenton batali la grupon por ĝin dispecigi ignorante ĝian destinon; sed Albina altruisme persvadis samideanojn, kaj tiel ankaŭ min, ke kuna efika reago liveriĝu en la grupo, avantaĝe de la grupo. La reago, flanke de multaj, publike eksplodis, kvankam malfruigita de la fakto, ke la instiganto iam estis unu el la plej solidaj abutmentoj de la movadaj aktivadoj, kiam la penso de la elstarulo plastikiĝis en la redukto de Eŭkaristio al simpla amikada kolektiva liturgistila tosto, preterlasanta, ĉar takseble dependantajn de la tempospuroj, la koncernojn de la forofero kaj de la reala ĉeesto de Kristo. La lasta ceremonio preskaŭ tumulte interrompiĝis kaj kun tio oni plikonsciiĝis pri la jam suspektita strategio *"per kiu li provis pavimi la vojon al la nekredemo".* Verŝajne li opiniis, ke eblus plua sekularigo en mondo jam tute sekularigita kiu ne povas allasi gloron samkiam ĝi povis fari kun la pioniroj de sekularigo.

Baldaŭ post li eklipsiĝis el la grupo enirante plentempe kaj plenpage la organizajn, tiam tute kontraŭreligiajn, strukturojn de la kompartio.

Ne ĉiam ekspastriĝintoj havas tuj bonŝancon kaj sufiĉe liberan elektokapablon, eble pro manko de distanco inter la decido sin forlasi al deziro longatempe subpremita kaj ĝia kontentiĝo. Tion ĉi oni vidu el la sekva okazintaĵo.

Iun vesperon ni, mi kaj Albina, renkontis ĉe la kluba sidejo novan vizaĝon, novan kolegon al kiu ni pretis doni kuraĝon kaj helpon por la reordigo de liaj pensoj kaj sentoj. Jen lia historio rakontita de li senvuale.

Malkovrite de kelkaj paroĥanoj en kaŝitaj kunvivaj rilatoj kun fraŭlino, kun kiu jam pretigis sian geedzan destinon loka junulo, li devis forlasi la lokon kaj atendi, en Milano, la amatan edziniĝeblan, al li ĉi-foje, promesitinon kiu, tamen, ne venis kaj solicitita de li ne respondis ignorante promeson kaj novpromesiton. Jen homo, trideksepjara, senlabora, preskaŭ senmona, malorde vagante en la plej profundaj sentoj, malŝatata de sia origina familio kiu, el venetia kampara trimilanima vilaĝo, invitis lin ripare cikatrigi la malfacile sorbeblan honton.

Li akceptis gasti ĉe ni sukcesante post du monatoj trovi, helpe de ĵurnala anonco, dungiĝi kiel leterportisto ĉe privata firmao. El la solviĝintaj problemoj de laboro kaj de hejmo emerĝis impete la alia: tiu de la kreiĝo de propra familio. El la suferita seniluziiĝo, tamen, plu restis en li spuroj de malestimo pri si mem kun emo ekscesi ĉe kontaktoj kun aliseksaj personoj. Li sin turnis al svatanoncoj en gazetoj per nekomuna esprimo *(Ĉu troveblas fraŭlino inklina korespondi kun tridekokjarulo reveninta el gravaj superitaj elreviĝoj?),* ricevante plurajn pozitivajn respondojn kiuj sekve preskaŭ fatale interrompiĝis kun lia pli kaj pli granda reenfosiĝo en nesuperitajn blokantajn memsenvaloriĝojn.

Pasis du jaroj kiam ĝuste en mia hejmo kreiĝis la... svatiĝo: propre, li venis min viziti ĝuste kiam mia edzino estas konversacianta kun onklino, dudekokjara siavice elementlerneja instruistino, de bazlerneja infaneto de sia klaso. En la konversacion mi antaŭenigis ankaŭ la novan gaston, aludante, iom senmezure, kaj simplaĉe laŭ mia edzino, ke el ilia soluleco, eblas amikiĝo, kaj, pretekste, ni lasis la du en soleca konversacio. Samvesperon la du rapidis kune nesti, post unu semajno ili anoncis sian intencon pare kunligiĝi, post du monatoj ili, kunigante siajn malmultajn aĵojn, komencis kunan novan, klubane solenatan, vivon. Geedziĝo, filoj, kaj nunaj feliĉaj geavoj de tri nepinoj, kiuj min nomas onklo. Kiom da problemaj, koraj kaj ekonomiaj, baraĵoj forigas ŝajnfrivolaj instruistinoj!

De tempo al tempo kun Albina mi iris pasigi duontagon ĉe konventoj kie eblas renkonti iamajn kaj neniamajn kunulojn: la konversacio riĉigis niajn mensojn simpatie partoprenantajn en iliaj apostolaj verkoj.

Iuj el tiuj miaj kunuloj volis partopreni en ceremonio funebra pri miaj patro unue kaj patrino baldaŭ poste. Ili, vere, venis viziti plurfojojn la malsanulojn kaj levis min el nova stranga timideco aŭ psika bloko: por miaj gepatroj

mortantaj mi ne trovis la vojon por paroli al ili per la vortoj de la kristana espero. Iu bloko aŭ iu speca reteniĝemo forsvenigis el miaj lipoj la vortojn, kiujn mi tiom spontane diradis al aliaj.

Estis en tiu kazo, ke mi perceptis kiom belas anonimeco kaj senzorgeco eĉ rilate la kredon: certa ĝeno sinesprimi kaj montri sian kredadheron kovras aŭ devenas ankaŭ el deziro resti kaŝita. Neniam ni pensis, ke tia aspiro povis okupi, eĉ se laŭ malmulta tempo, min. Vere de ĉiam, kostis al mi penon montri piecon, nun tio foje ŝajnas kosti al mi sensacon ludi groteskaĵon. Se mi ĉiam devis spekulativi por nuligi ĝenon en prireligiaj sindeklaroj, nun mi devas lukti por rezisti akriĝon de la sama tento farita preskaŭ sensaĵo. Esti racie pelita al tia parolado kaj samtempe provi honton pro tiu parolo, jen nova strangeco de mia situacio, certe ne antaŭvidita.

Eĉ plej profunda konvinko povas suferi je la forto de onia pensmaniero kaj de konvenaĵoj.

Reliefis tiun paneon ekspastriĝinto, kiu iam el konvento sekvis mian eksiĝon, sin envicigante tamen inter la ekstremaj kredantaj kontestuloj, malgraŭ miaj kontraŭaj instigoj kaj kialigoj. Lia rimarko, kundividita de lia edzino, pri nia eble nekonscia deziro pri anonima deŝarĝiĝo en socio, male, multmaniere furore komunikiĝanta, montriĝis la sola akordopunkto de la ekspastraj renkontiĝuloj, aparte el la flanko de publikemaj batalantoj. Li sintezadis tiel: *"Senti devon evangelizi kun honto evangelizi!* Fakte malmultaj konigas, kun sia ekspastra stato, eventulan ĉeeston de volo anonci kristanismon, des malpli kun la fiereco de liberiganto de la mondo.

Tia amiko ekzaltis tian paneon rilate la tutan religamplekson, invitante kaj incitante, ke ni ne cedu al paneo kiam ekgrundiĝas batalo kontraŭ katolikaj malfruigantaj antaŭjuĝoj.

Mi decide, sed kun maksimumo de malmalico, rezistis lian inviton militi aperte kontraŭ la eklezio por ĝin, laŭ liaj enŝovoj, korekti kaj fari el ĝi reale la edzinon de Kristo priservanta la "popolon de Dio" aŭ, plejbone kaj plejsimple, la popolon ĉar nur tio estus nuna ekzistokialo de la eklezio. Li allasis, ke nun eĉ la vortoj eĥigantaj aŭ elvokantaj ion katolikan suferigas lin kaj agacas lian animon, eĉ spronas por ke li agu kontraŭ.

Por kontrasti kun tia argumento-psikostato ne sufiĉas inteligento kaj kulturo aŭ frata simpatio.

Mia rezisto impetis tiom energie, ke eĉ la forpermesa ŝajnflata frazo*: "katolikismo almenaŭ edukis vin igi feliĉa vian belan edzinon!"* ne havis ŝancon lin serenigi.

Ni nin revidis, kelkajn jarojn poste, ĝuste okaze de funebroj de komuna amiko. Ne bonsortis la teme dispecetegita konversacio, nur lia edzino elbuŝigis: *”Ni konservas memoron pri viaj ideoj kaj pri ili diskutas inter ni: vi estas ne malvalora rilatpunkto. Eble orientiga punkto”.*

Ĉu alvenas fine por mi la horo de memgratuliĝo kaj fieriĝo?

**Ĉapitro dekkvina**

# La familia vivo

Realiĝinte la revo pri familio, tiu ĉi postulas esti eĉ nutrita per laboro kaj gajno. Albina preskaŭ tuj ricevis mandaton instrui ĉe hejmapuda porknaba lernejo, dum mi komizvojaĝis tri tagojn semajne por prezenti en tri norditalaj regionoj la provvaron vendotan. Mi dekomence perlaboris nur la elspezitaĵojn, sed poste per pacienca investo je tempo kaj mono kaj ankaŭ je lukto kun oftaj malkuraĝiĝo kaj deprimiĝo, preskaŭ fulme, la mendoj multobliĝis kaj per ili mi kvitiĝis de la antaŭaj angoraj "minusoj" kaj ekis la gajnoj kaj ni kune ekprojektis karakterizojn de la akirota hejmo.

Ĉagreno samtempe enŝteliĝis en la animo de ambaŭ: ne vidinte anonciĝi infanoj el nia kunamo, ni decidis peti helpajn konsilojn de medicina specialisto, kies prognozoj, sekve de enketo kaj iuj testoj, tekstas frapfraze: *"Bedaŭrinde mi certas, ke via edzino neniam gravediĝos".* La vivo des pli obskuriĝis ju pli ni konsultadis aliajn fakulojn ĉar, kvankam delikate, ili elmetis la saman krudan prognozon.

Aŭtante tra urboj kaj vilaĝoj, foje la dura malĝojo de mia animo fandiĝadis en larmoj.

Sed bonŝance la aferoj foje kontraŭprognozite ŝanĝas direkton.

Iun matenon, ĉesojle de la firmaa komercraporta kontoro, je la oka kaj duono, oni urĝas ke mi respondu al telefonalvoko: ĉe la alia aŭdilo parolas mia edzino, kiun mi tute ĵus lasis ankoraŭ duondormanta en lito, diranta:

*Mi estas pozitiva!*

Kio? pri kia pozitiveco?

PREDICTOR[1] *(prediktor), kiun mi hieraŭ sekrete aĉetis kaj laŭpreskribe uzis surspure de konsiloj de amikinoj, montras, ke mi estas pozitiva.*

Predictor? Pozitiva?

*Predictor aŭ medicinilo montras ĉu virino eniris gravediĝon. Mi estas graveda.*

Mi hastece salutis la ĉefagenton kaj kuris hejmen, kie ni ne malhelpis ellasi la tutan ĝojon ekzistantan en la mondo. Tuj mi telefonis al la "kruda" ginekologo, kiu hastis barakte konfirmiĝi en sia antaŭa vidpunkto spicante, el sia *re-*

[1] *Predictor,* papera lakmusilo kiu, mergita en virinan urinon, reakcias per specifa koloro se la koncerna virino estas graveda.

*zerva* hipotezaro, per paralela diagnozo: *via edzino evidente koncipadis ja jes, sed tuj poste pro spontana aborto perdadis la mikran frukton. Por eviti tion, en tiu ĉi bona gravedstato, nepre necesas tuj liveri al ŝi la sekvan kuracilon".* Kaj li dikte silabumis la komercan nomon de la freŝe enkomercigita kuracilo. Kaj tuj mi travagas tra urbaj apotekoj, sen trovi tamen tiun urĝan, tre urĝan injektan infansavilon, kiun bedaŭrinde neniu havas, ĉiuj serĉas ĉe grocistoj kiuj tamen ankoraŭ nenion aŭdis pri ĝi. La specialisto, tiam, telefone plu kontaktita, instigas, ke mi plennokte rapidiru ĉe lin, ducent kilometrojn fore, proksime de la lombarda ĉelaga vilaĝo de miaj forpasintaj bogepatroj, por preni lian ĵus ricevitan provspecimenan kuracilon.

Kiam mi revenis, mia fleganta fratino jam pretis kun injektilo tramane.

Poste oni konfirmis la gravedon kaj la gravedosavilo ekvendiĝis ankaŭ en mia urbo. La tagoj, plenaj je potenciala ĝojo kiu tamen hezitis manifestiĝi pro timo, ke ĉio disipiĝu malgraŭ la novkuracilo, pasis malrapide, tromalrapide dum certe la bebo kreskadis en la patrina sino kaj mi forhejmadis pro agenta laboro nur kun la korpo ĉar menso restis ĉiam flanke de la du kunestiĝantoj. Fine naskiĝis filino kaj la mondo fariĝis senmakula, vivebla, ĝoje komunikiĝanta inter belaĵoj, levante min el la tagtaga ekzisto al la revata horizonto, kie ĉio brilas ĉar timo kaj sufero estas eĉ nuligataj, kaj mi finfine ekkomponis spontanajn ĉiuspecajn bondezirojn larĝkorajn por iu ajn homo, kies enmondiĝo povas nur esti bonfariga kaj kreskigi la ĝojon de interkomunikantoj.

Plezuro komunikiĝanta, ja jes. Tio demonstreblas per tiu ĉi sinsekvo de bonŝancaj eventoj. Mi pretigis karteton, 10 oble 8 cm, anoncantan la naskiĝon:

Nenion petas  
*ĉion volas*  
Nenion diras  
*ĉion esprimas*  
Nenio por ŝi sufiĉas  
*krom la gepatra amo*  
En la mondo ŝi senpotencas  
*ĉion tamen de ĝi ricevas.*  
Estas Elvira naskiĝinta  
El la kunnaŭdekjara paro.

Mi, ŝprucigante ĝojon, ne antaŭvidis, ke tiu bileto estus min simpatiigonta ĉe miaj klientoj kiuj ne ĉesis komplimenti pro la *naŭdeko* da jaroj de la du gepatroj kiuj fidoplene generas kaj fantazie komunikas sian eksplodigan ĝojon. Komplimentoj kaj ĝentilaj sintenoj preskaŭ nature ekĝermigas mendojn pri

mia varo: butikistoj volas konkretigi sian ameman partoprenon en mia ĝojo per mendoj, eĉ ilin duobl- kaj triobl- igante, eĉ foje ili konfidis la varkvanton al mia diskreteco. Kalkulinte laŭprofite, mi lukris en unu monato kiom mi gajnis dum la du antaŭaj jaroj kaj la trendo daŭris ankoraŭ unu jaron ĉirkaŭ. Min vidinte miaj klientoj antaŭ ĉio partoprene petadis: *”Kiel fartas la infaneto de la kunnaŭdekjara paro?”.*

Samfirmaaj kolegoj provis kredigi al mi, ke tio aranĝas la ĝustan okazon por transpasi el “makleristo al vendisto”, nome al firmaisto. Mi venkis la tenton kaj restis, male, atendanta tion kio ne… okazis. Tio ĉi:

Se neniu el la min gratulantoj tuŝis la temon de plua naskiĝo (eble ili timis aspekti maldelikataj aŭ okazigi sur min gravajn, laŭ ili, suferojn), mi kaj Albina, tamen, laŭ kelka tempo nutris tian esperon: ekigite la motoron, ni esperis, ke ĝi funkcios poreterne! Kial tia deziro? Ĉu pro egoismo? Eble nur pro tio ke la ĝojo estas korelverŝa kaj amkrea, eksplodiga! Sed por ni ĝi restis tute koncentrita sur Elvira ĉar la naturo krude sentencis: *sufiĉe!*

Ĉio fluis tiom bele, ke foje mi timis, ke la kristala vazo eksplode dispeciĝu laŭnombre de siaj briloj. Kaj jen la minacanta timo, fakte, pormomente ekfariĝas realo, tiele: la jam trijara infano ne respondas al niaj voĉinvitoj, ne plu reliefiĝas en domaj ĉambroj, ni kuras al la balkonoj (oka etaĝo) kaj terurite rigardas malsupren: personoj paŝas normale! Ni vidas, bonaŭgure, la hejman pordon ale al la ŝtuparplaceto malfermita; kaj ĉar la lifto ne obeas al mia fingrordonoj, mi decidas malsuprenire trakuri la tutan ŝtuparon. En la korto, en la proksimaj stratoj ĉio normala, sed la infano kie kaj kiel malaperis? Ĉu oni ĝin kaperis? La lifto daŭrigas ne obei al konvulsaj puŝoj; sed jen singulto, dampaj ploroj. Post momentoj ni brakumas, fine liberigitan, Elviran kiu apenaŭ sukcesas balbuti pri tio kio misiris. Ni rekonstruis jenon: la friponetino trovas malfermita la hejmpordon, eniras lifton kaj tiu ĉi, per ŝia aŭ alies butonpanela tuŝado, startas: la filino ploras sed neniu aŭdas, tiam ŝi fingrumas la ŝaltilaron: la lifto haltas meze de sia kuro kaj ne plu restartas, preskaŭ nivele de la dua subtera etaĝo. Helpe de la pordisto, la lifto fine obeas kaj reatingas teretaĝon kaj ni povas konsoli la infanon.

Eble ne pliiĝas la enuo de la leganto, se mi aldonas ĉi tie alian, ĉi foje simpatian nevolan amuzaĵon okazigitan de mia filineto. Elvira jam kreskis kaj de du jaroj bazlernejas. En amikiĝa renkontiĝo, kun hastece aranĝitaj manĝaĵoj, de la gepatraro kaj geinstruistaro, kelkaj komplimente miris, ke mi ”kontraŭ onia atendo ne trinkas tutan vinbotelegon”. Iutage ŝia instruistino, kiu kiel kolegino de mia edzino min traktas konfidence, min vidante komentas ŝercbruske

antaŭ aliaj instruistinoj: *"Nun ni informiĝas ankaŭ pri viaj malvirtoj. Estas disraportite, ke vi emas plezuriĝi per vino, ke foje vi ne disdegnas amuziĝi per ĝi kun amikoj ĝis gaja elmemiĝo"*. El ridetoj de ŝiaj koleginoj, mi komprenas, ke malantaŭ miaj ŝultroj je miaj elspezoj amuziĝas la tuta instruistaro.

"Mi preskaŭ neniam vinon trinkas, eble unu/du trikvaronan litran botelon semajne. El kio tiu via emfazita skandaliĝo?".

Jen la origino de la "klaĉado". Dum vespermanĝo, hejme kun samkondiĉiaj amikoj, post trinkado de kelkaj glasoj da vino, mi rifuzis pluan ĉar *"la trinkitaj jam turnigas mian kapon, jam mi vidas duoble, jam ŝanceliĝas miaj kruroj..."* Tion dirante mi ŝajnigis, por malŝatigi ebria kion oni ŝatas sobra, ne plu koheran kun mia parolado same kiel mi iam ripetadis por amuzi amiketojn de mia filino. Tiaj kaj similaj frazoj impresis Elviran kiu rakontos, aldonante el sia infana fantazio miksanta veron kun versimilo, la apartaĵon de mia ĉiutaga ebriiĝo malgraŭ precizigoj de mia edzino. La epizodon ŝi tiom verve kaj fiere rakontadis, ke enŝaltiĝis, ene kaj ekstere de sia klaso, kliŝo kiun mi, post ŝajnjubile reaga ridado, nur penante sukcesis korekti. La instruistinoj ŝanĝis opinion, sed en siaj kolegecaj flustradoj ili inertece daŭrigis min longatempe kromnomi laŭ tiu malvirto, malgraŭ sufiĉe dementita de la sinsekvaj precizigoj de la ĉiam pli maturiĝanta filino.

Ĉio tio (eĉ tion mi volas sciigi), okazis ene kaj kune de nova kaj aparta por mi sentado. Kiam, en la pasinto mi legis kaj aŭdis ke Dio estas Patro, ke tiu nocio precipas en la sugestioj evangeliaj, ĝuste tia difino perceptiĝis iomete abstrakta ĉar la amo de mia patro, malgraŭ ĝiaj ĉeestiĝo kaj konstatiĝo, aspektas io tro normala kaj tro komuna. Sed nun brakumante la filinon kiu bezonas ĉion kaj mi pretas koste de ĉiuspeca ofero min al ŝi dediĉis, la nocio de patreco ekriveliĝis tute nova kaj ekskluzive kaptanta. Mi spontane konkludis: Dio-Patro amas kiel mi-patro amas! Eble sen la sperto de patreco oni ne povas kompreni la tutan amon de Dio por ĉiu homo!

Ĝojoj forgesigas la malplaĉojn, sed tiuj ĉi povas pluresti en la memoro elirontaj el ĝi ne jam kvietigitaj. El tiuj foje inspektiĝas la plej subtilaj kaj insidaj, okazintaj kiam en la unuaj tempoj kun parada efikeco mi montradis la sortimenton de la varo vendota. Dum mi estis varmiĝanta emfazi la bonkvaliton kaj utilecon kaj la statsimbolecon de mia varo, iu diableto refoje trapasadis mian animon rimarkigante la kadukecon kaj la sensignifecon de miaj ofertoj al homoj kompare al la solideco kaj nepreco kaj humanigeco de la eternaj varoj kiujn mi devintus ekzalti laŭ ties veraj valoroj. Jam mi min perceptis tiam mergita en surteraĵoj obeante al la urĝeco gajni por min vivteni kaj ankaŭ por pliigi komfortojn;

jam uzurpis la unuan vicon tiuj surteraĵoj kiuj iam estis, pruvite kvankam kontrastite, viditaj nur kiel la startopunkto al la surĉielaĵoj!

Neniam mi kapablis, verŝajne ne eblis, superi tian komparon kiun fine mi juĝis natura kaj fundamenta. Nemalofte mi superis la ĝenadon de la mizero de mia surteraĵa varo per aludoj kun miaj klientoj al la ĉediaj valoroj, pri kiuj miaj interparolantoj, post ioma miro, plurfoje montris maldistanciĝon.

Pri tiu eta, aspekte senelireja, ne nur psika konfliktiĝo, kiam mi sciigi Albinan, tiu ĉi ĝin tiom precize priskribis kvazaŭ ĝin ŝi jam travivis persone taksante ĝian alkonscian aperiĝon ne kiĉa paradspriteco; kaj ankoraŭfoje mi devis konfirmiĝi pri altkvalito de la animo de Albina: ŝi kapablas, malkiel mi, intuicii kaj trasenti preter kaj trans la vorto. Kune kaj senskrupule analizinte la tutan animstaton, ni konkludis, ke funde la du aferoj povas kunstari, eĉ unu povu plivivigi kaj ekvilibrigi la alian. Ŝi sukcesis ankaŭ aŭskultigi al mi erojn de mia malnova, nome de la konventaj tempoj, taglibro kiun mi tamen evitadis eĉ simple tralegi kvazaŭ timante trafi en ion tro banalan aŭ malmodestan: ŝi, puŝite de mi al almenaŭ apenaŭ supraĵa trarigardo kaj eventuala detruado de senutilaj memoraĵoj, trovas ion belan kaj min rekontaktigas kun notitaj pensoj kaj sentoj kiuj al mi en la hodiaŭaj tagoj ŝajnas nure aktualaj miaj eltrovaĵoj aŭ rezonadoj. Koncerne tion, ŝi trovos jarojn poste multon indan esti rakontota, pli simpliĝe, diktota al la romane kompilisto de la supra etaĝo, ankoraŭ tiam nekonata same kiel ties posta Esperanto.

Ĝuste tiu lingvo, se iom anticipi okazontaĵojn, aŭskultita sonnivele dum la relegado de la ĉiutaga romana lingvoplibonigado, alloge svatiĝis ĝis ĝi estis, de la neeviteblaj lingvaj likegoj, orele/okule komprenata, kaj plej laste tia kompreno efikis, per lecionoj kaj libertempaj lingvumaĵoj, por ke mi de mia "sekretario" estu konsiderata, el nura scivolemulo kaj ŝatanto, esperantumisto kun bonnivela scio de Esperanto ĝis aŭdaco diktumi rekte en tiu lingvo, kvankam nedistingante modernan stilon de antikva aŭ alispeca. Restis tamen en mi io da envio al la sukcesantaj flue paroli en esperanto dum ŝajnis, ke mia prozo impresas "cerbumece", spite la oftecon de la simpligantaj verbformoj kiaj *estas kaj estis kaj estante ktp* (aljuĝendaj*,* laŭ la notiganto, *inter la lingvaj personecoj de esperantistoj),* kaj asiduan prizorgon eviti sencorenversojn kaj miskombinojn; kaj tia mia ligo al esperanto eĉ ne malfajriĝis kiam fama esperanta verkisto tiel fortretis: "esperantaj verkistoj? centa ularo da frenezege sinlaŭdantoj reciproke!".

Eĉ esperantismo min allogis, kvankam, aŭ ĝuste proe, ĝi unuavide impresis io kvazaŭreligia.

Rilate tian mian enamiĝon al Esperanto, Albina diradis, ke tiu ĉi ŝancas kiel Evangelio: por tiun ĉi efike agnoskigi, oni devas antaŭe eksciti pri ĝi deziron ĉar ĝi postulas regreson el pensmaniero kaj ŝanĝon de mensformo: penoj kies fruktoj ne tuje rimarkiĝas, kaj la veko de intereso fariĝas la unua tasko pro la ne evidenta bezono je ĝi. Analogaĵo statas rilate Esperanton: la bezono de ĝi nur post multe da eksplikoj impresas ege utila kaj eĉ bezona por la homoj[2].

Cirkonstanciĝis ĉirkaŭ tiutempo, kiam la bebo jam pasis la unuajariĝon, ke mi estis, senintence, necesigita agi sacerdotece.

Rilate tion antaŭmetendu, ke dum forumo de laikigitaj pastroj, praktike ekspastroj edziĝintaj, mi distribuis foliajn enketilojn celantajn testi iliajn aspirojn pli/malpli sekretajn rilate eventualajn sacerdotecajn sopirojn: *ĉu vi akceptus - kondiĉe koncedite - repreni la sacerdotecan aktivadon kiel pastro edziĝinta aŭ reinstaliĝi en similajn oficojn?*

Post kelka monato mi ricevis, kelkajn centojn da responditaj enketiloj, el kiuj rezultis, ke nur malpli ol 40% revenus al la antaŭaj stato kaj agado en la eklezio. Mi enviciĝis inter la 40%, maltrankviligita tamen pro la granda kvanto da rifuzantoj, kiuj eĉ plinombrus se miaj porenketaj folioj atingus kontestulojn pri la ekesto de la grupoj mem. Tamen tiujn rezultojn oni kritikis, dum tiugrupana renkontiĝo, pro, nefavora al sincereco, etoso dum enketado kaj plursencaj demandoj.

Ekzakte tiutempe komunaj amikoj, miaj kaj de la persona de ili taksata be-

[2] Pri Esperanto, kiel helpa lingvo, li subtenis apartan opinion. Laŭ li Esperanto funkcios kiel nun la angla, tio estas el si mem reduktos la etnajn lingvojn al dialektoj ĉar nenio garantias, ke la parolantaro ne superstarigu la komune konatan kaj uzatan sur tiun gepatran; krome, ne tute forigis el liaj duboj jenon: Esperanto, malgraŭ la proklamado de iuj bonasentaj civilkunvivadaj principoj de iu mistereca interna ideo, kontribuos al kroma nebuliĝo kaj forigo de elementoj de la kristana enkulturiĝo. Fakte, malgraŭ ke esperanto kaptis radikojn precipe en la eŭropaj lingvoj, kies subgrundo nehazarde odoras je kristanismo ĉar ilia origino estas impregnita je kristanaj kaj bibliaj kulturoj (ĉiuj ties literaturoj naskiĝis traktante kristanaĵojn kaj liturgiaĵojn ktp), ĝi ludas senvole malriĉiĝon aŭ forigon de la karakteroj de la okcidenta kulturo avantaĝe de skeptika aŭ agnostika neŭtraleco. Eble eklezioj, favorante ĉian disvastigon, riskas meti en sian sinon... sangomalpurigilon. Pruve videblas la historio de la esperantistaro kiu aperas plena je aplombeco kaj distanciĝo, ne nur programaj, el ĉio religia, aparte kristana .
Rilate plue la principon "esperanto savilo por la etnaj lingvoj", li antaŭvidis la plej efikan vojon al la malaperigo de la naciaj lingvoj, eĉ pli detruan ol la altrudita anglalingvo ĉar la viktimo konsentas kaj aplaŭdas!
Kial, tiam, subteni kaj uzi Esperanton? "Precipe pro tio ke mi ĝin praktikas kaj estas komunikantoj per ĝi kaj en ĝin jam elverŝiĝis la literaturo de la tuta mondo", li konfesis marĝene de prelego de eminenta esperantulo. Kaj aldonis paradokse: "Nepras, ke esperantistoj trovu kaj ofertu ilajn garantiaĵojn por la defendo de la etnaj lingvoj el Esperanto mem".

zona je mia helpo, solicitis min renkonti sian amikon, al mi tute nekonatan, por lin alproksimigi, se eble, al la religio, pri kiu ili konfesis ideojn similajn al la tiamaj miaj. Li fakte, jam kontestanto de la eklezio, fariĝis kontestulo de ĉiuspeca religio sendistinge taksata kaptilo por la homa libero sendepende de plimalplia probabla ekzisto de Dio. Liaj devizoj sonis: *"se Dio estas, li certe ne entrudiĝas en la mondajn aferojn; akcepti Dion signifus rezigni sian sendependecon, sian liberon, sian dignecon!; aŭ Dio aŭ homo!".* Nun, eĉ alproksime de la morto, li fiere ŝajnigis persiston en sia totala rifuzo je ĉio religia aŭ dia aludo. Mi akceptis, ĉar funde temis pri konatiĝo kun suferanta homo; sed mi tuj rivelis al li la "amikecan konspiron". La homo ne restis surprizita "ĉar vere ili amas min", eĉ li montris dum la dua vizito remalkovri, ke mem povus denove kongruigi siajn pensojn kun Dio kaj pekkonfesi, sed nur ĉe mi. *"Sin konfesi oni povas, ja, sed nur ŝvitante ĉar sin forlasi al Dio estis, foje, de mi sentita kiel fandiĝo de mi mem. Kiel eliri el iuj sentoj? Vere mi jam estas ĉion perdanta!",* li ripetadis gurde kaj sente. Ĝuste en tiu momento en mi idekunliĝiĝis, ke la homo iam estis apoge ekstera partoprenanto en la grupo de la laikigitaj pastroj kaj subtenanto de iliaj celoj kaj enviciĝanto, eble senaverte sed ĉiam kun duonklera afekteco, en la alon de la ekstremuloj. Ĉu li sinceris tiam kaj do la nuna reago blufecas? Aŭ sub blufeco kaŝiĝas vera deziro reveni al Dio? Aŭ ĉu la kaptilo por lin kapti nun alsorĉas min en naiveco?

Liaj juĝoj pri Dio kaj eklezio montris ion ekscesan, gviditan de speca bezono kulpigi kelkaĵon. Se mi ne sciis la kaŭzon, tamen perceptis, ke liaj ideoj havis nur supraĵajn radikojn: fakte dum la sama konversacio la homo kvietiĝis kaj ekŝanĝis tonon kaj invitis, ke mi revenu por lin repacigi kun Dio.

Ne eblis konvinki la homon, ke al mi estas malpermesite sacerdote sakramenti, je risko de puno pro aŭtomata ekskomuniko. Li elvokis, ĉar doktrine informita, la eklezian juron laŭ kiu ankaŭ pastro laikigita rajtas eĉ devas sakramenton kunekzistigi en ekstrema okazo: *kaj tiu ĉi estas tia!,* li rebatis omaĝe al mia sincereco pri la komisiantoj de la tasko kaj kontraste al mia rezisto. *"Neniu diru ke mi marŝas reen!"* li ripetis pli al mi ol al si. Mi aldonis: *"nia menso rondas: daŭrigante marŝi reen ĝi revenas al la starpunkto".*

Fine mi devis cedi kaj ricevi liajn konfidencojn, en kiuj la prireligia kritiko miksiĝis kun io simpatia al Dio: la sento de la Dia patreco ne estis tute forvaporiĝinta. Kaj estis la lasta fojo, en kiu mi agis sakramentece, kvankam spurojn de paŝtistaj zorgo aŭ sinteno oni estonte malkovros sub miaj sekularaj agadoj.

Ĉar la mono fluis ne malabunde el miaj prosperaj aferoj, mi kaj Albina de-

cidis ĝin elspezi por aĉeti, krom la loĝejo, aliajn luigeblajn etajn nemoveblaĵojn, tiam opiniatajn la plej sekurajn investojn, por krei kromajn rentumojn, kaj ekpensis ankaŭ obei al la ambicio de bonstataj familioj: sin provizi je la dua domo, kamparארestadejo por semajnfinoj. La loko el kiu originis Albina aranĝis okazon elaĉeti de ties gefratoj la malnovan domon de ŝiaj gepatroj: la dua rezidejo, pagita iom krompreze, min taksigis ĉe mi vera burĝeculo. Konsideroj pri ripozo kaj malŝarĝiĝo de tensio ne malhelpis, ke tiu kampara porferia domo ĝuste foje skrape aŭ subtile sentigis la malproksimiĝon de la franciskanaj idealoj. Kompense ni nin deklaris pretaj ĝin meti je dispono de delokitoj okaze de publika katastrofo: kio neniam okazos lasante ne tute malpezigita la konsciencan ronĝon.

Ankaŭ en tiu ordinara okupo, por gajni per la komerca agado, foje mia konscienco metis dubojn pri la honesteco: kiel oni scias, kaj pri tio estis antaŭe aludate, vojaĝagento devas prezenti kaj ŝvelvorte ekzalti la funkciadon kaj la vendeblecon de sia iomparadece elmontrata varo; sed ĉu licas kredigi al butikisto, se ankoraŭ nesperta, pri la taŭgeco de la varo priservi la klientajn bezonojn kiam sperta makleristo jam scias, ke tio ne povas okazi pro apartaj kondiĉoj de la tiuloka loĝantaro? kaj samtempe silentigi konsciencon?

Miaj kolegoj tion ne disdegnis, gajnante certe pli ol mi, sed allasante la komerciston, aparte se freŝan entrepreniston, en malfacilaĵoj pro stagnado en magazeno. Al tia tento, unu aŭ du foje, ankaŭ mi cedis. Kaj nun en la momento de la investo de la falke pergajnita mono, tiu penso sin metas oblikve ĝis igi min promesanta al mia grumbla konscienco, ke mi riparu, laŭpove, la damaĝojn estigitajn de tiaj misfaroj. Kaj tion mi poste klopodos fari per konsiloj aŭ dekalkuloj okaze de marĉando, foje kaŝe poluligita de mi, pri novaj mendoj de varoj vere konsumeblaj ĉar vere utiligeblaj de klientoj. Sume mi plikonsciiĝis, ke la batalo kontraŭ havemo neniel povas maliĝi kaj ke, ĉiukaze, restas ĉiam la devo de la ripara redono eventuale per *kamuflaj flikaĵoj*, kiel komentis Albina.

Ĉirkaŭumis ankaŭ alia penso potenciale taŭga por malgajigi aŭ, inverse, pligajigi la novan staton. Nun mia bezono ami estis kontentigita ĉar mi povis min fordoni kun pleneco kaj esti miavice amata. Nu ĝuste tiu mia koncentriĝo sur unuunuran personon, kvankam nefermita en si mem, foje konturiĝis, ĉe mia mueliĝanta ekjuĝemo, mallarĝa kaj malvasta aŭ forŝtelanta de aliaj, tro turniĝanta al si mem. Ĝi ekriveliĝis perdiganta la altiron al universaleco, al senkondiĉa disponebleco, al kiuj per impulso revenigis la iam kontestata fraŭlecvoto.

Foje ankaŭ elekstere, Albina legadis en mi tiun implikaĵon de sento-ideoj de malaltiĝa nova morala memestimo. Tiam ŝi citadis kaj komentadis, per no-

vaj argumentoj ne limiĝantaj al ŝerco, filman monologon de *Il Deserto Rosso*[3] (La Ruĝa Dezerto), en kiu la protagonistino estis taksata freneza nur pro tio ke kiam ŝi amas la hundon ne kapablas ami la edzon, kaj dum amas la edzon ne kapablas ami la hundon. "*Kial,* sin demandis la virino, *al mi ne estis koncedite ami ĉion samtempe, en ununura pli efika ekstazo kun la postulitaj pleneco kaj totaleco?".*

Albina vidis en la para amo la ekstarton de la ama sinteno al ĉiuj laŭ la Krista mesaĝo. Laŭ tiu mesaĝo, al universaleco iu transpreniĝas per konsekrita sengeedzeco, alia per geedza amo. Ni rafinis, ĉi-okaze, la emon kaj scipovon pliklare distingi ĉu pri la kristana invito al kunfandiĝo de sia amo al Dio kun tiu al la proksimuloj, unika vera fonto kaj rivelilo de humaneca perfektiĝo, ĉu pri la emaĉoj de nia persona psikologio; kaj ĉiam tio finiĝis per intensigita realĝustiĝo de la celoj de nia amo. Cetere nia intensa aktivado en volontula servo aŭ animado naskiĝis ankaŭ el deziro forturni la riskon egoisme solidiĝi en niaj komfortoj kaj ĝojoj, malgraŭ la nin ĉirkaŭantaj alies malfeliĉoj. Ke universalecemo aspektu eĉ ekstere, antaŭ la fizikaj propraj kaj aliulaj okuloj!

Nun mi havas edzinon, filinon, loĝejon, pangajnigan okupiĝon, estimitecon, sendependecon kaj la ceteraĵojn por senti min feliĉa, kvankam moderigita de la konscio ke feliĉo ne stabile kuŝas samloke por ĉiam ĉar malofte foriĝas el mi la impreso ke aliaj vane centras siajn energiojn por ĝin pluteni. Kaj la risko ĉion perdi, spite de kontrolo kaj ĉiama antaŭvidita, povas fariĝi ruiniĝo senaverte, abrupte, same kiel raportebla ĉi-sube.

Mi komisie vojaĝis en turismaj lokoj: kia pli ekspluatebla okazo por turisme aŭti kun edzino kaj filino? La stratoj alloge vetureblaj kun signaloj sufiĉe elmontriĝantaj, la vetero laŭdezira, dum mia ŝoforado prudentas kaj malrapidas. Neantaŭvidite ĉio estas elmetita al elprovo de fatala risko kiam kontraŭfronta aŭtomobilo abrupte angilas fine invadante mian koridoron ĝuste tie kie la post vojkurbiĝa dekliveca strato, kies asfalto molas pro varmego, kontraŭkurbiĝas: mi blokas kaj samtempe devias al maldekstra flanko, evitas milimetre la invadanton, preskaŭ kolizias kun dika flankstrata arbo, preskaŭ tuŝas duan arbon, glite revenas en la kajecan gruzon bordantan la straton antaŭ fosaĵo, sed mia aŭto ne plu interfrotiĝas kun la tereno, malkoneksa pro alia hieraŭa akcidento kaj konkludas sian kuron kun la okupantoj en la flankstratan dumetran profun-

[3] Filmo de reĝisoro Michelangelo Antonioni (1912 en Ferrara – Romo 2007). Laŭlonge de filmverkoj li rafinis sian stilon trairante el senpieca analizo de malfacile interkomunikiĝantaj paraj kaj amaj sentoj ĝis la prezentado de la hodiaŭa socio sub la signo de la senkomunikeco kaj soleco en la senfina abundo da komunikaĵoj. Estas temoj de Deserto Rosso (1964) .

dan fosaĵon. Neniu vundito, nur kelkaj kontuzoj al la aŭto, el kies eno neniu ploras neniu helpalvokas.

Kial elombrigi tiun epizodon kiun, reveninte al la ordinara estado kaj inundite de kliŝaj similaĵoj, oni emas forgesi aŭ preterpase aŭskulti? Nur pro tio, ke mi en tiuj sekundoj malkunmetis kaj rekunmetis pensojn sentojn terurojn kun finaj ĝojoj kvazaŭ la sekundoj fariĝus senfina disdividiĝo: ĉiu sento kaj penso deige akute distingiĝis unu de la alia, la kurta tempo dividiĝis en dekonoj, en centonoj, ĉiu el tiuj havis sian enhavon, sian juĝon, sian teruron, sian senton de obscena finiĝo: jen la fino de mia konstruaĵo, jen la mortigo de miaj karuloj, jen la juĝo antaŭ Dio, jen la arbo evitenda, jen la fino de mia pompeca sociekonomia sukceso, kie fine venkis sento de banaleco de ĉio. Ĉio finiĝantas tra ununura sekundero kaj komenciĝantas en alia vivo!

Tiuj furioze diskurantaj pensoj dissolviĝis, bonŝance, per unu simpla kaj tre utila krio skuanta el soporiga konfuziĝo la aŭtookupantojn, la krio de helpantoj, nin vidantaj aŭtofunde amasigitaj en senvunda kaj ridekscita ŝajnkompota pozicio: *"Estingu la motoron!"*.

Mi ekkonscias, ke ĝuste tiu ĉi daŭrigas bruligi benzinon kun la risko provoki kaj etendi incendion al la tuta aŭtomobilo. Oportunaj manoj ekturnas la konektilon kaj aliaj fortikaj rektigas la surflanke apogitan aŭton ĝin remetante senhelpe de iu ajn ilo sur radojn, kaj tuj min trapasas la glata konstato de nekredebla sendifektiĝo. Bonaj homoj eltiras la pasaĝerojn el la malantaŭaj sidlokoj kaj sekve strathelpilo survojen remetas la veturilon, preskaŭ sendifektan. Kaj la motoro je la unua impulso tuj startas.

Mi bone memoras la meditadon de tiuj tagoj kiam la pensa-senta amaso da pensoj reordiĝis. Ĉu mi rajtis do min pensi feliĉa? Eĉ je risko sufoki alispecajn sensacojn? Estis ne supraĵa demando antaŭ la konstato kaj de mia egoismo kaj de minaco esti senigata je ĉio.

Foje ŝajnis - estis mia komento kun la edzino - ke feliĉo ne povas gasti ene de mi sen aperi uzurpo kaj nejusta ĝuado; foje ĝi ŝajnas ĉirkaŭi min, iom ekstera kaj svaga, sed senrezista je mia dispono, alirebla kaj kaptebla. Foje mi certis, ĉu tro senpripense kaj malsaĝe?, ke mi ĝin reale jam posedas; sed post tiu minaco, kaj aliaj samefikaj, ĉar el tiuj unu sekvas senintervale alian, mia perceptado pri la realo ekŝanĝiĝis. Ja, kiu scias kial estis epoko kiam feliĉo plu aperadis io disponigita al mia laŭvola decido! Nun prudente mi ekdelasis la tro senpudoran diron de la unuaj miaj edzaj tempoj: "Ĉi tie oni ne sukcesas frandi unu ĝojon ke alia premas por sin gustumigi". Kiam tio sprosis el miaj lipoj, oni min gapadis kvazaŭ penante trovi pri ĝi signifon indan je aprobo. Nun tiun di-

ron, inventitan eble kiel stabiligan fiksilon de la aktualaj ĝojoj, eĉ mi ekvidas kiel stultaĵon.

Eble feliĉo gusteblas nur kiam la ĝuanto ankoraŭ ne konsciiĝas pri la mankantaj ingrediencoj ĝin stabiliguntaj, aŭ senteblas nur post superado de unu risko kaj antaŭ ol anonciĝas la nova. El tiuj jen nova.

Riskon de grava danĝero mi plu suferis en Sicilio, duonprizonulo de mafiuloj. Jen antaŭfaktoj. Mia firmao ne sukcesis enspezi konsiderindajn kreditojn akumuliĝintajn pro varoj liveritaj post regulaj mendoj, dum la loka agento deklaris sian nepovon kaj anstataŭ reprovadi enkasigi li pretis rezigni mandaton, malgraŭ la laŭleĝa duobla perdo de provizioj. Firmaaj estraranoj insiste spronis min, kaj fine ordonis, ke mi iru, el Alta Italio, vidi kaj pritaksi la situacion kaj enkasigi. Aviadilo kaj trajno, kaj poste personaj kontaktoj kaj rendevuoj plenaj je ĝentilaĵoj flanke de la pagimalfruantoj, aŭ pagirifuzantoj pro ruzaj kontestoj; sed kiam mi tuŝis la klavon de la ŝuldoj, ĉe kelkaj leviĝis rezisto kaj minacoj.

La lastan klienton mi vizitis en Gela (Ĝela = sesdekmilloĝa urbeto de sudorienta Sicilio). Kiam mi, je nomo de la firmao, aludis ties intencon aliri tribunalon, li, en sia luksa oficejo, alpaŝis kun propono tute mafieca: ke mi rekompensote kunplektiĝu kun lia aĉagado ŝajnigante konstati la nevendeblecon de la varoj pro teknika maltaŭgo kun la bezonoj de la eblaj klientoj.

*"Vi havos personajn sekretajn akcizojn el ĉiuj estontaj liveraĵoj el kiu ajn via zorgata nova firmao".* Nome: mi vendas kaj gajnas, ili aĉetas kaj ne pagas!

*"Per inteligentaj akordoj kiel konvenas inter vortoplenumantaj homoj, via merkata sukceso garantiate instaliĝos; se via firmao kristaliĝas en tiuj fiksideo kaj aĉaĵo, ĝi ne plu vendos en Sicilio pro viadamaĝe imagigotaj diversspecaj varaj difektoj. Komunaj avantaĝoj sugestus, ke ni reciproke nin helpu! Sicilianoj, honestaj homoj kaj obeemaj, senrestriktece aĉetos kaj regule pagos".*

Praktike li petis esti promociita deponprenanto por tuta Sicilio rekonante al mi, krom la salajro ĉe mia aktuala aŭ alia firmao, makleraĵan procenton el ĉiuj liaj vendotaj varoj jam aĉetitaj pere de mi kaj nepagitaj, kies sukceso estos garantiata surbaze de lia efika premo sur obeigitaj negocantoj. Tion mi kredis kompreni el lia tordita lingvaĵo.

Kaj por doni pli da efika konsisto al sia propono li venigis sian samaferan koterianon, ne tromaskitan lokan ĉefmafiulon: ili enfermis la oficejajn pordojn por permesi al mi *"senĝene kaj libere rezonadi kaj raciemiĝi".* Embarasiĝa, kaj sincera kvankam altrudita el perforto, mia aludo al reciproka konveneco

alie kompromisi, ricevis pikparolon kun pluaj minacoj.

Estis maja printempo, la dekseshoro de sabata posttagmezo kaj ili min entenis prizone ĝis la dudekunua, min delasante nur kiam mi duonpromesis mian efikan intervenon ĉe la firmao por ke la ŝuldoj estu konsiste reduktitaj aŭ transakciitaj "pro magazena stagnado". Elirinte kune kun mi, tiu je pufvanga vizaĝo indikis al mi restoracion kaj hotelon en kiu *"vi estos kiel princo senelspeze"*. La alia ulaĉo, tiu je vizaĝo scioplene duonmoka, elglitis tra la hotela pordo, por, evidente, dispozicii pri mia gastado, malgraŭ miaj insistaj klopodoj malakroĉiĝi el tiu ambigua protekto, kiu, krome, povus min envicigi inter la komplicoj de mafio.

Ĉio obeis al lia volo. Fakte kiam, la sekvan matenon, mi aludis, adiaŭante la deĵorantaron, elpagon, la hotela ĉefprizorganto montris surpriziĝi kaj pene malinciteti sian ofendiĝemon.

Mi ne scias kiel finiĝis la afero ĉar post nemulte mi forlasis la firmaon por nova okupiĝo.

Malgraŭ tiu malbela aventuro, mi decidis plu resti, por viziti la splendajn monumentojn kaj muzeajn antikvaĵojn, en la urbo ĝis la lasta trajno de la deka vespere: per ĝi mi alvenus al aviadilhaveno de Catania (Katanja) je la kvina de la sekva mateno por aviadile forflugi. En la loka fervoja stacidomo mi pagis la bileton sed oni maltrafigis al mi ĉiujn rendevuojn pro stranga, por mi, sed senekscita por lokanoj, evento.

La stacidomo kaj ties kajaj trotuaroj estas komplete sen vojaĝantoj, kompense el la ne malapuda restoracio tondras granda bruo de pordanca muziko kaj senzorgaj krioj, interrompata de rideksplodoj kaj ŝrikoj kaj tostoj, ondas sur homoj kaj aĵoj. Plaĉe alvenas la preskaŭ senpasaĝera trajno kaj kure alvenas, el tiu festenejo, ankaŭ kvin homoj kiuj okupas la nuran malfermitan pordon de la ununura vagono: ne eblas envagonariĝi! Ĉar mi insistas, ili min lasas pasi kaj suriri la vagonon, sed ili restas du sur la porda aperturo kaj du malantaŭe sur la senhoma pasaĝerkajo dum la kvina parolas ordonmiene kun la mastrece vokita trajnĉefo, aŭskultanta riverence. La trajno ne forveturu! Kial? Pro tio ke vojaĝantoj ne trovus sidlokon aŭ piedstaran spacon en la vagono, fakte iuj estas devigataj vicostare premi el la kajo dum aliaj haltas apogite sur la pordoklapoj pro evidenta amaso da premataj jam entrajniĝintoj! Estas leĝo, oni serpentume kaj pogute eksplikos al mi plendetanta dum la longa atendo, laŭ kiu *"trajno povas starti nur se ĉiuj vojaĝantoj trovas lokon en ĝi; se tio ne okazas, la trajno devas atendi, ke alia trajno helpe alkuru,* en tiu kazo el la urbo Sirakuzo*, por transporti ĉiujn samtempe.*

Ankaŭ la malmultaj vojaĝantoj malsupreniras sendemande, senreage, sensufere, male vizaĝe montrante feliĉan obeemon!

Pasas du horoj kaj jen alvenas la postulata dua unuvagona trajno. Subite ĉesas la muziko, la bruego fariĝas gaja babilado, multnombra aro preskaŭ silente defilas kaj amasiĝas sur la kajo kaj envagonariĝas en la dua trajno, dum mi vojaĝas tutesola en la unua. Tiam mi komprenas: por pludaŭrigi la festenegon kaj karavane reveni al Sirakuzo sen interrompi la kamparecan ĝojadon, oni inventis la trompon altrudante, mafistile, la ĉefstacidomestron telefone deklari, ke personoj el la pasaĝerkajo ne sukcesas envagonariĝi pro troa amaso da vojaĝantoj. En la Sirakuza stacidomo, ankaŭ por mi kaprico!, mi sukcesas vidi, supreniranta en luksan aŭton, la misteran ulon, ĉion movantan, eĉ la blokantojn de la trajno: ne alta, diketa, tute homsimila... sed riverencata de dekoj, pretaj je ĉio por lin servi kaj ŝirmi kontraŭ akuzoj kaj "entrudiĝoj" de la ŝtato subpremanta *bonfarajn* organizaĵojn! Dum li elfaŭkadis afablajn salutojn al ĉiuj, mi ekinstinkte lin abomenis kaj imagis esti traboranta lian ridmienon per sagaj sputoj kaj sarkasmoj!

Kaj kio pri la supozigita amaso da vojaĝantoj kiuj restintus ekstervagone pro troa homariĝo? "Ja jes… nenio devigas pacienci ĝis tiu nokta horo. Personoj rehejmeniras kaj prokrastas vojaĝon pro tia ŝtata aĉservo …". Estus la senkulpiĝo se moŝtuloj eventuale pretendus enketi!

Mi maltrafis aviadilkonekson, sed kompense konstatis per kiaj ruzaĵoj kaj trompoj, pli "fantaziplenaj" ol perfortaj ĉi-foje, mafio allogas kaj obeigas al si popolanojn; mi spertis ankaŭ alion kiu mirigus sociologojn kaj moresploristojn. Maltrafinte la rendevuon kun la aviadilo, mi decidis resti gasto de la urba franciskana konvento, profitante de antikva amikeco kun fratulo plurfoje mia kunulo en iamaj religi-kulturaj staĝoj kaj nun tie pastre animprizorganta, kiu min feste akceptis vere franciskane, kvankam plennokte. Mia nokta mafia aventuro, tamen, ne multe interesis lin, eble, mi pensis, ĉar ŝablonaĵo en tiaj lokoj. Sed la mia estis mempafa opinio!

Kiam al li kaj al la nemalmultenombra fratularo mi rerakontos, morgaŭ dum la tagmanĝo, la aventuron pri la nokta trajno, mi atendos, krom scivolema atento, reagajn kondamnojn pri la mafio; sed vane kaj naivece mi eraros!.

*Mafio? Kio estas? Mafio estas fenomeno preskaŭ neekzistanta en Sicilio, ĝi estas elturniĝema elpensaĵo de Norditalio, vera mafio estas la industrisistemo de Nordo kiu unue ekspluatas la laboristojn kaj poste ilin incitas al la konsumado de la produktitaj varoj... tiu akuzo funkcias kiel eskapilo de Nordo por subigi Sicilion.* Mia gastule afabla silenta embaraso, ne perturbata de paci-

enca sinteno esprimanta miron kaj ekprovojn rebati, plifervorigis ilin, kiuj disfaldis kaj faldis nekutiman dialektikon. Ĉiuj miaj ekfraziĝantaj sonoj kiaj *"tamen la temoj de kinarto, la romanaj temoj, la ĵurnalistaj enketoj kaj juĝistaj verdiktoj montras la kontraŭon; agnoskoj mem de pentintoj kaj la ekzekutoj per lupara (kurtakana fusilo ŝarĝita je plumbokugletoj)...",* fajrigis la diskuton kvazaŭ ili celus altrudi al mi perforte kaj timige, ke mi *kontinentulo* malfruas kompreni la malnaivajn nuancaĵojn de insulanoj kaj trompiĝe aŭ mise aŭ senfajnece interpretis juĝajn kaj raportajn konfesojn de nesenprofitemaj fiuloj, eble sekrete rekompensitaj. Kio frontas kontraŭ min? Mi ĝis tiam imagis fratulojn tute engaĝiĝintaj en la liberigo de sia popolo el la senkontrasta, kvazaŭ natura kaj fatala evento, nome subiĝo al mafiularo.

Kiam malaltiĝis la akreco, tio ensceniĝis per la konsidero, enŝtelita de mia staĝa amiko, ke al la gasto oni devas ankaŭ respekton kaj, eventuale, sugeston kun invito, ke li plu restu en Sicilio se li volas enpaŝi en la insulan etoson kaj pensmanieron, nekaŝeble pli virtuozan ol la kontinenta. Ĉu ironiaĵo aŭ eskapilo por senpintigi la tension?

Al mi malplaĉis pli tiu sinteno de nesenkulturitaj personoj ol la konduto de la perfortuloj de la fervojo kaj de la minacantaj pseŭdonegocistoj. Al kiu mi rakontadis, poste kaj aliloke, tio ŝajnis nekredebla: ne nur mi, evidente, ĝis tiam taksadis frivole mafion, kiel ludeca lukto inter gardistoj kaj ŝtelistoj. Ĉar ne eblas, ke tiuj fratuloj ne konus la situacion, mi iomete superis la frustraciantajn konsiderojn pere de la penso, ke ili certe moviĝis per la deziro savi la honoron de Sicilio: tiom ili ensamiĝas al ties popolo! Nur jarojn poste, oni diros, ekkonstateblis sintenŝanĝo; sed mia frustro ankoraŭ daŭras..

Ne tuta Sicilio, tamen, similas al la supre priskribita; mi jam antaŭe vizitis alian sicilian agenton, kies zono akirantaj komercistoj pagis respektante la kontrakton. "Kiel vi konvinkas viajn klientojn?" mi demandis; li min rigardis respondante: "Mi ilin vizitas ĉiam akompanate!", "akompanata de kiu?", pludemandis mi. La homo levis la kapon kaj serioze kalme fingrindikis objekton fiksitan al la parieto senemocie dirante: "jen mia akompananto". Estis fusilo!!

Sed tion dume flanken

Tiuj siciliaj lokoj memorigas al mi preskaŭ forgesitan sperton, ĝuste en tiuj lokoj, dum mia iama predikado en diversaj paroĥoj. Estas komuna opinio, ke la sudaj gentoj facile metas, en propra kredvivo, unualoke la Virgulinon Marian kaj Sanktulojn kvazaŭ ili estus Dio. Dio kaj Jesuo Kristo ŝajnas okupi duarangan konsideron en popolecaj devotaĵoj ktp. Mi volis enketi, en longaj pri-

vataj kaj publikaj konversacioj kiom da vero kuŝas en tiu opinio, foje lanĉigita kiel akuzo kontraŭ la kultado al la Sanktuloj praktikata en la katolika eklezio. Mia enketilaro laŭiris tiel:

*Kial vi pardonpetas al Maria?*

*Kial vi enirante preĝejon riverencas unue la statuojn aŭ pentraĵojn prezentantajn Sanktulojn?*

*Kial vi diras, vin kulpigante je peko: "mi malplaĉis al la Virgulino Maria?"*

Kaj samspecaj diversaj demandoj.

Mi trovis respondojn kiuj metas en la unuan lokon nur Dion kaj Jesuon Kriston.

Ili koketas instinkte la sanktulojn:

1) *ĉar tiuj ĉi povas digne prezenti al Dio, eĉ sugesti al ni niajn bezonataĵojn ne ĉiam laŭgravece preĝpetitajn. Ili krome vivis surtere kiel ni kaj do povas klerigi kiel digne servi al Dio;*

*2) pekante, ni ofendas eĉ ilin ĉar ni perfidas iliajn instruojn por ke ni vivu religie kaj honeste. Kaj ili certe igas pli efika nian penton ĉe Dio.*

Ĉio tio estis esprimata per teologie nekorektaj vortoj, foje aspekte herezaj. Sed sub tio legeblas la klara perfekta kristana kredo. La respondoj estis pli preterportataj de emocilingvaĵo ol de precizaj konceptoj: tio eble okazigas dubsencaĵojn ĉe lingve pli precizaj personoj fiksiĝantaj sur plej eksteraj aspektoj!

Se la subkuŝanta suspekto estis: la subuloj anstataŭas Kriston per Maria, la elsperta konkludo estis: la subuloj alvenas al Kristo per Maria!

Tamen dezireblas, ke la lingvaĵo eksterigu la internan pensadon kaj ke ankaŭ ekstere la idehierarkio enviciĝu laŭ la valora ordo, eĉ en unuopaj, gestaj kaj vortaj, agaderoj, en la devota konduto.

Aliajn fojojn mi enfalis en la riskojn perdi ĉion, eble la vivon mem. Dum alproksimiĝis la agenta mandatfino, mi vizitis lastafoje miajn klientojn, precipcele enkasigi ĉe pagmalfruantoj: mi enkasigis kaj kombinis ankoraŭ vendojn. Unu el tiuj ĉi estis akre alstrebata, pro sia kvanta vendograveco, de diversaj alifirmaaj vojaĝagentoj: venkis mia oferto pro la bonkvalito kaj la laŭfama fidela konformeco inter varo reklamita kaj varo liverita malgraŭ iom plikosta. Kiam mi, foririnte el la klienta akceptejo kaj startiginte la veturilon, ekvidante tri homojn en rapida aŭtomobilo, stirata de konkurenculo jam spertita de mi pro lia ruza mallojaleco, sekvantajn la mian, mi ektimis, ke jam ĉio estas finiĝanta por mi. La malkavaliroj abrupte preterveturas sed subite blokas sian aŭton antaŭ la mia, desaltis de sia maŝino, kaj tuj du alsturmas min, min elaŭtigante malglatege.

Mi prononcas, klopodante aspekti senĝene, la ŝablonajn senespere elbuŝigeblajn vortojn *Kion havas mi por fari kun vi?,* sen vorttordiĝoj ili bojeske ordonis, ke mi montru aŭ deŝiru la kopion de la papera mendilo kaj iu apudigas sian muzelaĉon al mia fronto dum liaj manoj ekstringas peze mian kolon kaj liaj piedoj tretas pintojn de la miaj provante min faligi dorsen. La tria homo dume trovas mian varspecimenaron kaj ĝin dismetas surstrate kaj traserĉas la kajeran mendilon subskribitan de la kliento (sen tiu subskribo takseblas sengarantia la mendo); ĝin ne trovante, ĉar mi tenas ĉiam brustopoŝe subskribitajn dokumentojn, ili fie min mokgestas dum unu komencas min piedbati. Bonŝance ili ne trovas la enkasitan monon, jam perbankserve senditan al la firmao. La malmultaj paŝantoj la aranĝaĉon ne notas, neniom helpas.

Forlasante la aŭton al necerta destino, mi per ektirego liberigas miajn brakojn kaj deiĝas el iliaj manoj kaj forhastas al proksima domegpordo kiun oni miabonŝance lasis malŝlosita: sed, enirinte, kure kaj minace postsekvata, mi ne sukcesas ĝin fermi miaŝultre, tial mi estas enpuŝata suprenkuri la ŝtuparon, unu du tri etaĝoj, pordoj rigide riglitaj, neniu aŭdas miajn helpalvokajn kriojn plenspire elgorĝiĝantajn; miabonŝance en la fina momento, ekzakte en la lasta ŝtuparplaceto, pordo malfermiĝas el kiu eliras sinjorino, kiun mi malagrable kaj senparole retropuŝas englitante kun ŝi en ŝian domon kaj puŝŝlosante malantaŭŝultre la pordon kaj ĝin kojnante per okazaj umaĵoj kaj blokante manilon. Ŝanca elsavo! La malvidiĝo, momente alvokata dumkure, nun vere efektiviĝas! Senspire mi ĉarpentas motivojn de mia konduto al la terurita, eble kvindekjara, loĝmastrino perforte enpelita en sian hejmon: la pordo fermiĝas retopuŝante el la embrazuro piedon de persekutanto. Mi laŭtvoĉe ŝin altrudece petas, ke ŝi telefonu al la karabenistoj: ŝi fakte tremante ekdiskas, laŭtvoĉe kuraĝigita de mi, sur la sonorilprovizita telefonklavaro; sed ne sukcesante kombini la ĝustajn klavojn, tiam ŝi ekŝajnigas interparoli. La du postkurantoj ekflamigante sian koleron elkraĉis venĝon kontraŭ la dommastrino kaj furioze batante, piede kaj mane kaj tutkorpe, kontraŭ la pordo, sur kies malantaŭo mi haste apogis la tutan pezon de mia korpo… Fine La bruigita telefonklikado, de miaj fingroj por timigi plurfoje refarita kun despera voko, konsilas al la persekutantoj retiriĝi el la interŝtuparo. El la rigardilo mi observas ilin ekmoviĝantaj rapide al la malsupraj ŝtupoj; kaj vidas ankaŭ la eksteran manilon, surpavime rompita.

Post longaj, neekskluzive fizikaj, enspiroj/elspiroj, trafenestre mi vidas mian aŭton okupanta la stratcentron kun la pordoj malfermitaj. Reakirinte kuraĝon kaj singarde desuprinte tra la ses etaĝoj, mi decidas koincidigi mian aperon sur la

strato kun la alveno de karabenistoj, kies intervenon ververe mi ĵus petis malgraŭ la kontraŭa opinio de la kontraŭvole gastema dommastrino. Poste mi scios, ke tiuj aĉuloj iam ĵuris, ĉe komunaj klientoj de nia varo, ke propramane mem min forigos el la zono per severa *draŝado*.

Por kompletigi la kadron pri la okazintaĵo, elvokendas la senkompata konkurenco karakterizanta, foje, eksterleĝan vendadstilon de komercagentoj de samspeca varo. Komunaj klientoj plurfoje informis, ke tiuj tipuloj kalumniis, senefike tamen, ke mi vendaĉas kiĉojn, nur ŝajne konsistajn tapetpaperon kaj ties akcesoraĵojn. Fine koleriĝinte pro sia negoca maltrafiteco imputita al mia konkurenca hipokrita kaj misiriga majstreco, ili sturme reagis por ke mi forlasu la merkatan zonon. Se mi povintus antaŭkonigi al ili, ke mi estas spontane forlasonta la placon!

Miaj entreprenemo aŭ malprudento kuntrenis al mi aliajn danĝerojn, kiel la sekvan. Ĉe Padovo, kliento kutimis forgesi elpagojn de fakturoj jam ŝimintajn malgraŭ instigoj personaj kaj leteraj. Mi aŭdace studis strategion: konigi al liaj klientoj lian malfidindan konduton. Mi eniris lian vendejon kaj post hastecaj salutoj, laŭtvoĉe ĵetis abrupte al la senhonta ŝuldanto deĵoranta, kun komizo ĉe la tablego, aĉetantojn ĉe kiuj li certe celas savi sian reputacion: *"Mi venis por enkasigi elpagojn kiujn vi de jaroj ne honoras".* La viro, forpuŝante vendejan tablon venis impete antaŭ min ŝveligante la kolon kaj, agitante la manojn, komencis pugni, furiozege sed senenergie, miajn vintre supervestitajn ŝultrojn kaj bruston forigante min el butiko. Reveninte al la firmao, post malpli ol unu semajno, mi malkovris, ke la kliento jam foriris el la listo da pagmalfruantoj.

"La celo ne pravigas la ilojn", cirkuliĝis el Albnjo, malkvietigita de tiuj neleĝaj sistemoj, kaj kontraŭdezire aŭgurante, ke iam aŭ tiam okazos, ke mi laŭmerite revenos kun la ripoj rompitaj.

Se nek la ripojn oni rompis kaj nek la aŭreoleton de monrekuperanto mi perdis ĉe la komisiintoj, min foje malkvietigis la penso ke funde mi ne respektis la homon!

Alia rakontindaĵo, sed amuziga ĉi foje, okazinta tiutempe en Valtellina (Norda Italujo).

Komerca reprezentanto kutime abundas je ĝentilecoj kaj splitecoj, precipe kiam tio kostas malmulte kaj kreskigas, pere de simpatio al la agrablemulo, ŝaton al vendotaj varoj!

Mia kliento, en urbeto de Valtellina, ricevadis mian viziton ĉiam gajecon esprimante, kaj inter unu klientservo kaj alia li konversaciis kun mi elkore, sen-

ĝene kunplektigante dialogon kun mi kaj servon al klientoj. Kaj ju pli babiladis des pli mendadis, formale trarigardante mian specimenkolekton. En estinteco, dum aliaj samelkoraj babiladoj, li profitis paroli memkontente pri siaj gefiloj, ĉiuj validaj komercistoj aŭ laboristoj en najbaraj vilaĝoj kaj en la ĉefurbo Sondrio (Sondrjo). Nun, eble same kiel pasintokaze, el lia geedza fingro frapis oroblanka ringo larĝa preskaŭ duonfalango, sed ĉi-foje ĝi ekscitis mian scivolemon, kiun mi lasis enketi per aludoj vagaj kaj varie interpreteblaj.

Ĝuste okule postkurante tiun ringon mi lasis sparkiĝi la kutima profitema malvirto de la ruzaj afablaĵoj kiujn mi akurate majstris en oportunaj momentoj. *"Kaj via edzino, ĉu ŝi ĉiam regalas vin per oportuna hejma prezentado?".*

Oni notu tiun malprecize ĉiodirantan *oportuna hejma prezentado*: mi fakte preskaŭ nenion jam konis aŭ nun memoras pri tiu virino, kiun li, al mi ŝajnas, estis nomanta "Cezarina", kvazaŭ ŝi estus persono de mia pensa rondo. Al la homo tiom agrablas mia, por mi asepsa, demando, ke li ĝojplene eksplodas en la proponon, pli akcente ol iam, per la amikeca altrudo: "Venu! Ni paŝu ĉe mia Cezarina... Poste kune tagmanĝu kie membalzamigitaj manoj surtabligas Pizzoccheri (Picòkeri = nudeloj de fagopiro) specialajn kun vino de niaj sunumitaj montaj deklivoj". Ni iros, mi pensas, al restoracio ankaŭ por malŝpari penon al lia edzino Cezarina, kiu eble feliĉas liberiĝi el kuirejaj zorgoj.

Mi kutime tagmeze satigas mian, facile kaj profite neglektitan, nutraĵbezonon per hasteca sandviĉo kun kafo, preferante profiti de tiu ĉi tempo por kontakti pluajn komercantojn kies laborhorarajn rutinaĵojn mi jam profite konas; poste, vespere, mi kompensas mian stomakon per senmezura kvanto da lokaj frandaĵoj, ankaŭ por okupi, foje, la senfinan vesperajn longhorajn antaŭdormajn.

*"Jes, duobligu la kvanton de miaj menditaĵoj, kaj venu ĉe mian Cezarinan por sekve gustumi eksterordinarajn Pizzoccheri",* li insistas. Duobligi mendaĵojn estas granda gajno por mia provizio kaj valoras la penon de la elteno de konversacio dum kiu mia penso, malantaŭ aspekta afableco, insiste kuras al la sinsekvaj taskoj ĉar kutime mi fidelas al fiksitaj horoj de la kontaktoj kun klientoj.

Mia neantaŭvidebla gastanto forpermese retiriĝas en malantaŭvendejan ĉambron el kie tuj poste venas voĉo telefonparolanta. Certe, mi spontane pensas, li estas informanta Cezarinan pri sia decido, ke ili ambaŭ kune tagmanĝu en restoracio kun tiu gasto, do, ke ŝi ne prizorgu ion alian. Li hastas mallevi la rulkurtenon, okupas lertmove lokon en mia aŭto *("Tiel vi povas repreni senalizorge vian cirkuladon",* li altruiste ĵetas), ĝin parkigas post kvincent metroj, elpoŝigas ŝlosilon, malfermas la pordon de domo ĉirkaŭata de ambaŭ flankoj

de ĝardenetoj, kaj jen mi min trovas, kun la piedoj eniĝantaj en tapiŝojn, antaŭ vasta ŝtuparo luksega kaj grandioza kun fronte, je la unua duonetaĝo, granda spegulo, ĉio tiustila kutimiĝinta iam de nobelaj familioj kun la *"piano nobile"* (beletaĝo). Oni vidu, mi pensas, ke mia ĝentila gastiganto aŭ devenas aŭ inklinas al arta bona ĝuado kune kun aparta priarta gusto! Ĉio cetere en ordo kun liaj eferveskaj fantazio kaj entreprenemo.

Mia amiko eksupreniras ŝtuparon duŝtupe ĉiupaŝe, eĉ mi same faras sen kompreni tamen la motivon de tioma hasteco kaj de tia senreplika invito, kaj tuj transe de solena pordo aperas antaŭ mi ŝtupplaceto kun diversaj pordoj amfiteatre lokitaj, unu el tiuj, larĝe malfermita, montras kuirejon iom malordan. Memevidente! Oni estas iranta haste al restoracio! Kaj certe Cezarina ĉion forlasas al pli malfrua sistemado.

*Ni jam ĉeestas, Cezarina!,* anoncas kun sincera tenereco mia amiko puŝetante delikate maldekstran pordon, el kiu neniu respondo elvenas. Anticipante miajn paŝojn, miaj okuloj ekkomprenigas, ke temas pri dormoĉambro. "Vetu, ke Cezarina litkuŝas malsanule", mi al mi pluas riproĉe, "eble senmova dum mi senintuicia estas aranĝonta miskontaktaĵon". Iom agacite pro mia inklino aspekti kaj esti ĝentila okaze de invitoj, mi ekpreparas taŭgan mienon kaj ekserĉas inter konvenecaj esprimoj tiun malpli maltaŭge agordiĝantan kun la afablo pro la festena renkontiĝo kaj la bedaŭro pro la sanstato de Cezarina.

Ne estas tempo, tamen, por tiu zorgo, ĉar mia amiko altrudas al mi prioritaton: min kun decida afableco enpuŝas en la cezarinan ĉambron. Rapide kurigante plurfoje la okulojn de maldekstre al dekstre, mi vidas nur du litojn, el kiuj unu kun kovriloj senordaj, separitajn de mebleto murapogita. Tuj miaj pensoj formas hipotezon, eĉ certecon: "Evidentas, ke temas pri momenta aŭ muldebla malsano se la malsanulino povas forlasi la ĉambron! Jen la motivo de ŝia ĵusa nerespondo". Mia penso apenaŭ netiĝis ĉar la edzo de Cezarina min kun afabla altiro enirigas inter la du litoj kaj, kun riverenca sinteno ekkoncentras mian kaj sian atenton sur la noktotableton interlitan, kun retenata spirĝemo dirante, supozinde al mi sed ne nur al mi: "*Mi vivas ĉiam kun mia Cezarina! Mi sukcesas ekdormi nur kun ŝi miaflanke, por senti ŝian ĉeeston...".* Nun, fine mi ĉion vidas, ĉion maleme komprenas: sur la noktotableto gapas kestujo, en la kestujo vitrŝirmita rozkolora ĉiudenta kranio, la kranio de Cezarina.

Dum mi memtrudas reteni miriĝon kaj eksciti en mi partoprenan sintenon malebligante, ke vortoj manifestu miajn surprizon kaj balanciĝon inter ŝato al lia fideleco kaj partopreno al ŝia evento, li ekrakontas, miabonŝance, ŝian forpason... Ŝi estis mortinta dudekdu jarojn antaŭe, tujpost ol esti naskinta la

kvargeneriton. De sep jaroj, de la reeltombiga momento, la edzo obtenis el la aŭtoritatuloj la permeson preni kaj teni en sia hejmo tiun ostan restaĵon ankoraŭ integran.

Mi miratente observas la homon, kiu jam plurfoje senvole forlokis miajn menson kaj konduton, por ne perdi adheron al liaj gestoj kaj diroj: kelkaj sekundoj de medito, krucsigno, lia elkora forpermeso de Cezarina kaj du horoj en restoracio. La tagmanĝo, plaĉa por la sensoj, tikliĝas ankaŭ pro nebremsebla impulsiĝemo ĝoji je la imagitaj reagoj de amikoj kiam mi estos rakontanta la okazintaĵon: kio estontece fakte okazos plurfoje, ĉiam gajgante kaj pro ĝia strangeco kaj pro la edza fideleco de tiu homo. Antaŭ la forpermesa saluto li konfidis, eble suspektante pri mia miro, ke ankaŭ la filoj ne amas multe tiun ĉambron.

Jam certe kompreneblas, malgraŭ ke mi tion eksplicite ankoraŭ ne pritraktis, ke mia mandato ekis gajnigi al mi panon tro ŝvititan. De kelka tempo nemalmulte de mia gajno devenis en la rekta merkatumo pri varoj kolportataj senimposte enspezodonaj, kaŝitaj en la bagaĝujo. La kurantaj leĝoj tion malpermesis sed kontrolmanko lige al la malalteco de la monpunoj kuraĝigis la civilan socion transgresemiĝis novaj leĝoj kaj pli rigoraj kontroloj ekfunkciiĝis. La samtempa altigo de elspezoj kun la rezigno liveri kaŝvaron "aŭtokofrujan" ebligantan eskapi el akcizoj kaj portopagoj, konsilis al mi, ke jam alvenintis la horo rekoni sur mi la emajlon de la tempo kaj retiriĝi kaj antaŭtempe pensiuliĝi, en Italujo afero ĉiam facile kombinebla tiam, aŭ ŝanĝi metion kaj dungite okupiĝi alie, eventuale pli taŭge al mia kultura preparo, fore de la strata ĝangalo. Tio okazis neantaŭvidite kaj senzorgite, ekzakte kiam mi tion estis devigata deziri.

La demisiiĝo estis regule komunikita al la firmaa estraro, sed tiu enscenigis bedaŭrindaĵojn pretekste, ke mi estus nocanta, pro manko de preparitaj varofertantoj ĝuste en la momento de plia aŭtonomiiĝo de la firmao, la komunan salajron en "avancanta" kriza situacio. Akordiĝinte pri mallonga prokrastiĝo, mi rekomencis viziti klientaron tra la diversaj regionoj. Min akompanis kvardekjaraĝa sinjorino dezirema "staĝi kun tia vendoĉampiono" por lertiĝi en la arto de la varofertado ĉe revendistoj, kiujn ŝi poste pretos viziti tute sola. Ni travagis dum unu semajno kiam nia malprudento finis la kuron: iun posttagmezon, dum somnola posttagmanĝo en la restoracia salono, mia anstataŭontino vidis ŝteliston ekforkuranta kun nia (propriete ŝia) aŭtomobilo, momente parkita senalarma, kaj specimenoj kaj la tuta laborbezonaĵo... Ni revenis trajne al la centra oficejo. Mi definitive demisiis dankegata kaj gratulata per nemalŝatin-

daj kompenso kaj omaĝo kiuj fariĝis komplicoj por ke mi iru realĝustigi Siciliajn aferojn, kiel jam priskribite.

Koncerne aŭtojn: mi je tiaĵoj ferrubigis entute nur tri laŭ okjara laboro de naŭcentmilo da kilometroj, dum miaj samfirmaaj kolegoj kun samnombra kilometraro je tiaĵoj eluzis almenaŭ ses kaj krome pli luksaj ol la miaj. Kaj tio estis motivo de ŝercado, plibone de vualita mokado pri mi pro sobreco *iluzie ŝparanta monon reale malŝparanta prestiĝon ĉe klientoj,* laŭ ilia rekantado. La rezultojn oni vidis ĉe la fino kiam pro egallaboro mi ekĝojis pri la akumulitaj ŝparaĵoj, ili male, regate de impulso paradi pli prosperaj ol vero sian financan kaj socian pozicion, akumulis ankaŭ premisojn kaj ekzercojn por afekti pli prospera sian estontan malpli konsistan ekonomian staton. Tion elcerbigante, mi faras venĝon kontraŭ kolegoj... kiuj, kune kun mi, hodiaŭ, amikece vojaĝas tra la tempo de la rememorigantaj renkontiĝoj.

Lasta diskuteto, dum la adiaŭa vespermanĝo, sed pli pri opinio ol pri nova okazo de konflikto. Ankaŭ ĉe ni facilis blasfemoj, foje vorte fantaziaj sed ĉiam naŭzaj. Por malpli malnobligi tiun konduton oni alkroĉiĝas al neceso sin liberigi el tensio akumulita pro subitaj misfunkcioj aŭ elreviĝoj aŭ damaĝoj. Pri liberiĝo el tensio, blasfemo eble funkcias, mi subtenis, sed kio pri la malhonesteco de la ilo uzata?

Aliaj sin defendis alkroĉiĝante al la ideo, ke funde estas Dio kiu ne forigas, eĉ kombinas, la suferigajn eventojn: blasfemanto indikas la veran kaŭzon ankaŭ de la premitecoj ne dependantaj de la homa volo, funde la ribelaj pervoĉaj ofendoj rekonas la absolutan superregon de Dio, kiun ni kristanoj nesenmotive konfesas “Patro”.

Kiel ne akordiĝi kun tiuj opinioj? Sed ili forgesas, mi flustris, ke la dia kaŭzeco naskiĝas el amo, ke Dio kondukas al la savo per, misteraj ja jes, sed savdonaj vojoj. La akcepto pri Dio far la blasfemanto estas malama kredo je Li; *“ni foje preferus Dion subigitan al niaj deziroj anstataŭ Dion sinjoron de la eventoj kaj mistere sed ame prizorgantan pri la fina destino de la homo”.*

Tra tiuj pensoj ni nin definitive salutis. Nur jam eksterporde mi, jam kvita kaj senkredita, momente konsciiĝis, kun surprizo pri miaj antaŭaj malatento kaj indiferento, ke tie mi estas lasanta gravan eron de mia vivo.

La saldiĝantaj kontoj, antaŭe nur nespecife kontrolitaj, plus la spontana mongratifiko de la firmao, akumuligis al mi neantaŭviditan monsumon per kiu estis akirata akcia paketo, kiu, laŭ spertula juĝo, neniam suferus minusojn; male ĝi ĉe bilovaloro rapide duoniĝis agitante mian koron tra altiĝoj kaj faloj; sed fine mi ne domaĝis la investon.

## Ĉapitro deksesa
# Inter lernantoj kaj profesoroj

La gajnoj el la okupiĝo kiel vojaĝagento ekelĉerpiĝis. En mondo de adorantoj al junuleco kaj de gejunuloj celantaj trovi vivo-spacojn, miaj konkurencaj energioj kaj, sekve, miaj fakturitaj vendoj, ekperdis la pasintajn lertaĵojn: merkato sin ekmontris jam tro satigita je miaj varoj aŭ klientajn gustojn la reklamo ŝanĝis. Des pli, novaj leĝoj, jam pli frue aluditaj, obstrukce, kvankam oportune, malhelpis la senperan senfakturan vendadon se ne je risko de gravaj monpunoj, dum ĝi de kelka tempo fariĝis mia precipa enspezo apenaŭ kovranta la krudajn rekte elpoŝeblajn elspezojn. Fine konspiris la deziro restadi ĉe la familio apud la filino: pro ĉio tio mi ekvolis antaŭvidi por mi lernejo-tempon kaj agi por ĝin okazigi, neŝanceleble vigle deziritan. Akompanis tiujn malhezitojn kaj, fine rezignon pri la komercagenta mandato, la promeso de la torina episkopo, Kardinalo Pellegrino, laŭ kiu ankaŭ la edziĝintaj ekspastroj laŭeble, sed laŭbezone, trovos estimon sufiĉan por ricevi mandaton de instruado pri la katolika religio en publikaj lernejoj.

Intertempe, tamen, la aĝo kaj farto de la kardinalo lin devigis rezigni estradon kaj ĉiun alian influon en la direktorado de la diocezo; nun paŝtistas alia episkopo. Ĉu tiu ĉi sekvos la saman linion? Mi sendis serĉan leteron al la Kurio min proponante kiel plenpostenan instruiston, kaj pretis atendi. Sed ne necesis. Mia sesjara filino, iun matenon, dekroĉis la trilantan aŭdilon kaj, turniĝante al sia patrino, kvitas per la novaĵo: *"Paĉjo profesoro, oni serĉas la profesoron...!"*.

Jes, ĉe aliflanka ricevilo nekonata voĉo prononcis la trankviligan inviton:

*"Ĉu vi akceptas mandaton de instruado?"*.

"Jes. Kie, kiam, kio farendas tuj?".

*"Venu kunporti dokumentojn kaj preni rajtigilon"*.

Kaj de tiu tago, je sojlo de kvindeksepjariĝo, mi ekaventuris en la deĉiam deziritan instruistan okupiĝon en duagradaj lernejoj kaj tiel mia subkuŝanta unua kompetento fariĝis ankaŭ profesio. Estis la dua fojo, fakte iam, kvankam nur plurjara anstataŭanto, mi lecionis pri la helena kaj latina lingvoj; sed jam pasis tiom da jaroj, ke la instruado estis apenaŭa memoro, kiu tamen viriĝis kaj sin montris spertdona pro la ĵus akceptita mandato.

Kaj estis, efektive, gaja plonĝo inter geadoleskantoj kaj gejunuloj: malfacila-

ĵon mi ne renkontis tiam kaj nun ne antaŭvidas. Mi ne fremdas pri pedagogio kaj psikologio kaj pri kapablo trakti lernobjekte kristanismon laŭ vidpunkto de katolikismo, kiu impregnas la kulturon kaj arton kaj literaturon kaj la lingvaĵon de Italujo kiuj siavice justigas la ĉeeston de la katolika religio en publikaj, ŝtataj kaj neŝtataj, lernejoj.

Tamen mi devis superi iun nepre pridiskuteblan antaŭkondiĉon. Kiu estis tiu maljunuleto plonĝanta en lernejon? Ĉu la kutima truŝtopilo senkompetenta, forfluigita sur la lernantojn por havigi al li facilan rekompencan salajron? aŭ sakristio-deĵoranto bonkonduta kaj merita je fina premio?

Tiaj la rekantaĵaj demandoj plurfoje spertitaj kies origino ŝuldiĝas al tio ĉi: se vi ne radias elmontrante, ke vi devenas el pastraj vicoj, vi ne povas taksiĝi doktrine kompetenta kaj des malpli konvinki je via pedagogia kaj disciplina preparo al instruado, kun la rezervo tamen, ke subsube pastro instruas iom antaŭjuĝe! Neniu tamen al mi petis kredittitolojn, nur lernantoj vortumis sibilajn demandojn kiujn mi imagis inspiritaj de ne ankoraŭ amikaj kunprofesoroj, eble dubemaj pri mia profesia trejnado aŭ eble malfavoraj al la prireligia lerneja instruado: komunaj, kutime nur scivolemaj demandoj impresis kaj fariĝis ironiaj aludoj al mia ne oportuna, malgraŭ laŭleĝa, ĉeesto en... erara loko!

*“En kiu paroĥo, erudante infanojn pri katekismo, vi vin preparis al la instruado pri teologio?”.*

*“Ĉu pri tio vi vere fakfrekventis... Ja, ĉe kia fakultato vi vin fakuligis?”.*

“En mia paroĥo, estis mia timida respondo, en libertempaj postlecionaj pri la helena kaj la latina horoj aŭ post plurjaraj vizitoj al teologia fakultato”.

*“Por instrui ĉu ne necesas pruvoj de taŭgeco?”.*

*“Sed teologion kaj sciencojn apudajn kiel vi postkuris?”.*

“Mi havis tempon, pasion kaj monon por instruiĝi ĉe PAS kaj ĉe Istituto di Indagini Psicologiche kaj ĉe Pontifika Universitato...”.

*“La profesoroj estas multe pli junaj ol vi. Ĉu vi ne timas vin senti fiŝo eksterakva, ĉu vi ne hontas...?”.*

“*Al ni finfine ne malplaĉas amuziĝi… kun napokapaĵo!”.*

Vere tiu lasta vorto estis pli intuiciigita ol eldirita ĉar kunsona kun la proverbo: difekton, kiun oni admiras en moŝtulo, oni ne pardonas al novulo.

Tion kion iam mi konstatis, eĉ ĉe normale kleraj personoj, nun mi spertas surhaŭte ankaŭ ĉe mezlernantoj: vi estas laiko, do ne pastro, do sena de kompetentoj kaj atutoj por klerigi religion, kvankam religio estas *“scienco instruenda,* kelka susuris, *senbezone je preparitaj komisiitoj”.*

Ĉe la antaŭadoleskantoj kuris reciproka incitigo por ke iu aŭdacus havigi

de mi informon ĉu miaj genepoj jam geedziĝis. Ne tuj mi komprenis la aludon al mia ne juna aĝo; tion fine kompreninte kaj hastante informi, ke mi havas nur unu filinon "ĵus naskiĝintan" kaj memorante noveleton antaŭ du tagoj legitan, tiun ĉi ekrakontis kaj, konstantinte ilian atenton, transformis la porinfanan noveleton en mian spertiĝon. "Ja, se paroli pri filino, miaj manoj ankoraŭ ĝojas pri la feliĉa iama sukceso de la kutima operacio ĉe ŝia nazo. Por tion fari mi min ekzercis laŭ plurtagoj sur grandaj molaj fromaĝpecoj.

*"Diru, kian operacion vi faris kaj kial enŝteliĝis fromaĝo en tia afero?".*

"Al! Do vi ne scias, ke la patro devas antaŭe sin ekzerci kun tranĉileto sur molaj senvivaj korpoj por ne mutili aŭ kontaĝi per siaj malsanigaj mikroboj al la infano?! Mi ekzerce multfoje fosis per tranĉilo en fromaĝo por tuŝosente alpreni la taŭgan direkton kun la ĝusta puŝo kaj por atingi la nedamaĝan profundecon favorantan la spiron de la infano…".

*"Por kion fari? Por kion fari, por kion fari? Ĉu vi estas kirurgo?…"*

"Ah! Vi ankoraŭ ne scias, ke kiam infano naskiĝas ĝi tuj bezonas spiri veran aeron! Per la pulmoj. La buŝo spontane adaptiĝas al tiu nova kaj necesa funkcio, sed la nazo devas esti tru-pridonacita verke de la gepatroj. Ĉu vi neniam vidis…?".

Ne kredeble! La antaŭadoleskantoj, kaj eĉ kelkaj el la adoleskantoj, sin manifestis serioze scivolemaj. "Unu el la gepatroj, mi ne malfruis aldoni, tiukaze mi, jam lertiĝinta sur la fromaĝo, delikate enprofundigas la tranĉileton dufoje en la nazeton de la infano kreante tial la du truetojn, tra kiuj la ĵusnaskiĝinto ekspiras kaj sin provizas je aero por elmeti la unuajn kriojn". Dume miaj manoj konsentige moviĝas por imite ripeti tian sukcesan operacion!.

Ne kredeble! Miaj diversaĝaj lernantoj tiom alsorĉis al mi, ke nur post horoj malkovris la ŝercan envulteton, eble ĉar multaj estis solfiloj kaj ĉar ili estis atingantaj la aĝan staton kiu mismemoras kaj neglektas, kaj ne plu observas, la infanan vivon. Fine iliaj hezitoj fariĝis gratulantaj komentoj kaj eksimpatio al mi dum la novelo svarmis laŭ la lernantaro.

La prudento kaj sperto sugestis, ke la mastranto de la konversacio ĉiukaze estu mi…

*"Ĉu vi provu prepari instruajn promenadojn ĉiusemajne, tio estas instruadon kaj lernigadon per nova facila senpena metodo?".* Mi ĵetis hazarde por tratranĉi celatan rezulton.

Ŝanĝante paroladtemon kaj montrante, ke mi estas je dispono de kiu ajn spite duondiraĵojn de kiu ajn, kaj interalie proponante ion lernecan alloge

eksterlernejan, mi komencis akceptiĝi kaj simpatiiĝi ĉe la lernantaro dum kolegoj eksentis sin vere kolegoj. Resumante per simplaj vortoj taktikon kaj allogaĵojn, jen la alispecaj lernejaj kromaktivaĵoj: eliri el la lernejo por studi koncernajn objektojn ĉe monumentoj. Tiu didaktiko ne estis nova, nova estis ĝia ĉi-loke aplikado kun elspezo de persona libera tempo kaj rezigno al komfortoj flanke de aliaj altiritaj instruistoj. La lernobjektoj de mia instruado facile kaj avantaĝe adaptiĝas al tiu metodo.

Kaj tiel, preskaŭ pretere, inter la lernejo kaj la ĉirkaŭa kulturaĵriĉa medio mi ekigis novan rilaton, kies devizo estis: deiri el la medio por realigi la didaktikan "unuon", eĉ ĝin konstrui kun la lernantoj el tio kion ili vidis kaj je tio kio interesis. Tasko de instruanto: eksciti tian interesiĝon.

Bonŝancaj cirkonstancoj min enigis en senkondiĉan estimon ĉe la gelernantoj, kaj antaŭe mezlernejanoj, kaj poste liceaj gejunuloj.

Same kiel la aliaj instruistoj mi laŭkutime disponis je ĉiusemajna libera tago krom la dimanĉo. Ĝuste tiun tagon mi metis je senpaga dispono de la lernejo. Facilis la akordiĝoj kun la instruistaro, kiuj ekakceptis miajn kunlaboradon kaj iniciativon kaj ankaŭ permesis, ke mi antaŭpreparu, dum iliaj leciontempoj, la lernantojn pri la didaktikaj vizitobjektoj selektitaj miasugeste de la profesoraj klaskonsilioj, vizitotaj objektoj ĉiam kulturfontaj sed neniam preterlasantaj la religiajn aspektojn impregnantajn la trajektorion de la historio kaj ofte la originon mem de la monumentoj. Kvankam senkompense pri la laboro investita en tiu ripoztago, al mi prosperis organizi eĉ tuttagajn aŭ plurtagajn tridek vizitojn jare: du klasoj kun kvindeko da lernantoj, dum tri/kvar instruistoj kunlabore helpadis la disvolviĝon de miaj programeroj jam kolektive aprobitaj. La mezlernantoj estis tute miaj kaj la instruistoj ne plu fluktuis publike redoni, eĉ antaŭ la lernantoj, la estimon necesan por esti efika kaj influa instruisto.

Nemalproksime de la lernejo, sur apika klifo rande de la rivero Dora Riparia (Dora Ripàrja) bananta valojn kaj ebenaĵojn descendantajn de piemontaj Alpoj *Koziaj* (limiĝantaj kun Savojo-Francio) ĝis la rivero Paduso, solece situas trinava preĝejo kiun dikulto jam delasis, taksita kultura regiona havaĵo, sed brila pro forlasiteco. Ĝia fasado el ruĝaj brikoj diversforme modluritaj, kaj ĝiaj flankaj muroj konsistantaj el ŝtonoj senpintigitaj de la riverakvaj fluoj kaj nude disfenditaj en ŝimodora muro, foje infestitaj de multegaj *porketoj de Sankta Antono*, tiel difinitaj de la popolanoj, nome science Oniscus (rondaj rapidaj insektoj emerĝantaj el grundo mola sub humidaj muskkovertaj ŝtonoj), montras la malhavon kaj pasion de la konstruinta popolo. Kolegoj akceptis,

ke preskaŭ ĉiusemajne, post taŭga preparo, klasoj laŭvice vizitu ĝin kaj aŭskultu miajn eksplikojn: rezultis alloga kavalkado tra la mezepoko. Miaj lernantoj akurate kaj diligente skizis surpapere la surmurajn desegnaĵojn de la senmorteraj eksteraj ŝtonoj, certe iam forŝiritaj de la rivera tavolo kaj formantaj kaj jam iom malkompatigitaj pro terenaj dismovoj, paŭsis ankoraŭ brilajn enajn religiajn pentraĵajn simbolojn, naive esprimitajn de kampara popolo marĝene de dudekmetra kruto, kiuj poste fariĝos studobjektoj de ne nur pri religia disciplino. Okazos jarojn poste ke, ĉe plej dotitaj lernantoj, el tiuj historiaj freskoj kaj stilizitaj sed vivigitaj simboloj kreiĝos priskribo pri la travivo de la mezepoka kampara vilaĝo dum la vivstilo kaj pensmaniero de tiutempuloj fariĝos vojo por abiturientekzameno.

Kaj el la lernejo informoj kaj bildigoj de *malkovroj* ene kaj ekstere de la *Pieve* (Piève, laŭ popola antikva nomo el la latina "plebs = plebo": preĝejo de glebservutula kampara populaciero administre sendependa de urbaj aŭ najbaraj civilaj kaj religiaj administracioj, paroĥa ĉefpreĝejo), florigis ankaŭ malkovrojn de ne nur amatora serĉado fare de preskaŭ oficiala skipo de universitataj priarkeologiaj studentoj emigitaj de la municipaj instancoj. Se la *Pieve* unikas pro la pozicio kaj mezepokeco, ne malpli unikas la fervoro per kiu ankaŭ la familiaj medioj sekvas la lernitaĵojn de siaj filoj. Samfakaj instruistoj de lernejaj najbaraj distriktoj sin montris interesataj pri la nova didaktika sperto.

Oni admiris la didaktikajn trajektoriojn el pentraĵaj freskaj kristanaj simboloj al la realo simbolata, ĉiam enkadre de ministeriaj programoj, kiuj dekretas kulturaĵojn el katolikismo, ne katolikismon el kulturaĵoj. Tiu admiro baldaŭ moniĝis en estimon kaj kunlaboradon flanke de la instruistoj, kiuj ne malmulte gajnis el novaj vidpunktoj pri la katolika religio, kies penstradicio jam originigis tiun kaj similajn monumentojn. Ĝuste ankaŭ tio estis mia celo, pli intensa certe ol la konkero de ilia estimo. Estimo vekis scivolemon, scivolemo konversaciojn kaj konscion pri fruktodoneco, kiam ne nepreco, de pli ekzakta envido en la "religian sferon" antaŭ ol pri ĝi juĝi.

Ĉiujare ĉio finiĝis per ekspozicioj de la desegnaĵoj reproduktantaj la "pievajn" freskojn fantazie revigigantaj tiuepokajn vivscenojn en la antaŭpreĝeja placo porokaze imagita merkato en kiu iam vendistoj kaj ŝakrantoj vere ofertadis varojn al kamparanoj vestitaj laŭ tiuepokaj moroj...

Marĝene diratu ke la alternativa oferto, la tieldifinita "mondkoncepteca instruado" anstataŭanta, por lernantoj ĝin elektintaj, la prireligian informadon, tute perdis aliĝintojn kiuj premis por transpasi al "religihoro". Iom ŝerce

iom vere, sed pli vere ol ŝerce, eliris rekantaĵo ke la Pieve refariĝis lulilo de klereco, iam por la popolo nur por la kleriĝantoj.

Ĉu memflata vanteco rimarkigi tion kio kapteblis el komentoj de instruistoj per tiu ĉi sintezo: "Li krom veki ilian simpation ilin konkeras al kultura intereso"?

Kelkjarojn poste mi komencis samdisciplinan lernadon ĉe porpliaĝa lernejo, en kiu la adoleskuloj jam ekjunulas. La nova sperto perceptigis, ke la nova generacio ĉiam malpli similas tiun postmilitan, aŭ tiun de la ĵus famigitaj sesdekokjaroj, jaroj de la revoluciecaj junularaj ribeloj en la tuta Okcidento. Perceptinte tion, mi samtempe sentis, ke mi devas trataŭgigi lingvaĵon kaj edukajn konceptojn kaj kondutojn ĉe lernantoj kaj pliintensigi miajn adaptiĝojn. Ĉu eblis en mia aĝo?

Kvazaŭ por dementi tiujn miajn eksentojn pri mi, (aŭ por ilin senvole substreki), oni voĉdone elektis min lerneja vicestro, kio ĉiukaze altenmovigis, certe pli ol merite, je multaj pozicioj la konsiderojn pri mi ĉe la lerneja medio. Por ke la nova tasko ne min tiru en instruajn malingaĝiĝon, mi pliintensigis mian eksterlaboran restadon je dispono de la lernejo.

La lecionaj temoj, kiel ajn aspekte ŝablonaj kaj laŭprogramaj, ekinteresis, kiel notite, ankaŭ instruistojn kun kiuj naskiĝis agrablaj kaj, eble, fruktodonaj opiniaj interŝanĝoj.

Mi volus veki ion da atento pri kelkaj el tiuj niaj interŝanĝoj. Kiel sciate, religio enkalkuliĝas, kie oni mode trempiĝas, inter la objektoj pri kiuj kompetento naskiĝus sendanke kaj pri ĝi malfacilus ne jam posedi opinion definitivan, aparte se negativan; des pli pri ĝi, se serioze konsiderita, oni ne emas paroli, sentata aŭ juĝata eble tro intima aŭ tro senvalora.

Tamen profesorara frakcio ne disdegnis enŝteligi, en kvazaŭrajdado tra kristanismo, bolantajn demandojn por aŭdi ĝisdatigitajn aŭ ĉiutempajn respondojn pri la fundamentoj de la kristanismo. Kvankam tiu grundo estus mia preferata bedo, mi tamen strebis ne malestimi la riskon de troa enpersoniĝo en kolokvoj pri transcendaj aferoj: mi ne malmemoras admonon de fratulo vidinta en mi pli avidemon de polemikanto ol tension de komunikanto: tensio tia, ĉiukaze, lica kaj akceptebla nur se uzata en eksterlecionaj babiladoj kun instruistoj. Ĉu raporteblas, por defianto de eble neteda malkoncizo, eroj de tiuj konversacioj laŭokazada vicado vidbende registritaj?

*a) Kial interesigi lernantojn pri religio nun kiam jam la kleristoj de la klerisma epoko deplurjarcente pruvis la historian neekziston de Jesuo?*

Necesis respondi nee sen ŝajnaplombe elstarigi, ke ili postiĝas rilate al la tiukampe esplorstato ĉar facilece oni jam demonstris, ke kleristoj (iuj, ne ĉiuj) spuris pli siajn deziritaĵojn ol historiajn malkovrojn, kaj ke ili ricevis respondojn el sennombraj dokumentoj. Mi ne limiĝis al vortaj konversacioj, sed pruntedonis tiusciencajn seriozajn librojn el mia persona relative sufiĉe tiufaka provizita biblioteko de mi konsiderita mia trezorejo. El libroj al konversacio, el konversacioj al prezentado de duboj pri la konsisto aŭ motivita solideco de propraj apogiloj, la paŝo foje estis seninterspaca.

Leĝere plipromeniĝu lupeo super tiuj demandoj-respondoj:

*b) Eklezio inventis la miraklon de la sango de sanktulo Januaro. Kial la napola Kurio ne permesas partan aperturon (ne diskonfekciigon) de la ampoloj entenantaj la aspektan sangecaĵon kiu ekbolus nur en celebrantaj datoj?*

Estis profesorino jam eksmembriĝinta el katolikaj asocioj la liveranto de tiu plendo-akuzo. Sed ŝi ne sciis, ke la fakton (likviĝo de la sango) oni diversmaniere kaj plurŝtupe kontrolas sub ĉiuj spacaj flankoj, ĉiumomente antaŭ kaj dum kaj post la relikva ekspozicio, ke la fenomeno realiĝas en tute malsamaj ĉirkaŭaj fonoj en la samaj datoj, ke la kronikoj ĝin superfarbas el sepcentjaroj. Tamen neniam la eklezio instruis, ke tio nukleigas miraklon, kaj ke sia disciplinigo de la popola devoteco celas ne alpreni la formon de rekono pri mirakleco kaj ke ĝi ne kontrolas la resumajn aŭ detalitajn ĵurnalecajn raportaĵojn: ankaŭ la eklezio priserĉas, certe konscia tamen, ke la fenomeno okazas nur en religia medio, en esprima konteksto de katolika fido. Eklezio ne akceptas nek ekskludas la miraklecon, kiu duarangas en la religia pedagogio. Ĝuste pro tia duarangeco de la miraklo, oni ne emfazas eventualan miraklecon nek permesas malmunti la ampolojn. Miraklo aŭ natura fenomeno, en kulto okazigita en tia cirkonstanco estas rilatata nur Dio kaj Jesuo Kristo.

Aliaj substancoj fluidiĝantaj se movataj ne regas la komparon kun ampola sango ĉar tiu ĉi eĉ se skuata ne fluidiĝas.

*c) Kial la katolika eklezio bezonas miraklojn? preskaŭ nur ĝi, inter la kristanaj eklezioj, pri tio fieras? Ĉu por igi katolikojn ŝtipaj obeuloj?*

Pardonu, profesoro: se la miraklo okazas, nome se Dio intervenas, ni devas akcepti la verkon de Dio. La problemo estas ĉu la fakto reale okazas, ne la bezono aŭ malbezono je ĝi. Se ĝi okazas, la demando estas turnenda respekteme al Dio, ne al la eklezio. Ĉiukaze, el aliaj fontoj ni scias, ke Dio ordigas ĉion al la fina savo de homo. Miraklo, fine, eĉ se agnoskita de la eklezio, ne devigas al kredo pri ĝi.

*ĉ) Mirakloj kaj mirindaĵoj okazas ene aŭ najbare de katolika medio. Ĉu tio ne montras, ke katolikismo edukas al infaniĝo cedante al la deziraro senesplore instinkta de amasoj? Ĉu la eklezio procedas pli hazarde ol rigore?*

Ja, veras, en la medio de la katolika eklezio okazas eksterordinaraj faktoj, kaj ĉefe en ĝi kreiĝas la ebleco verifi, per ĉiuj sciencaj kriterioj, pri ili la aŭtentikecon. Estas kredinde, ke ĝuste tio karakterizas la katolikan medion. Cetere la eklezio kontrolas kaj rifuzas tiom serioze similaĵojn, ke ĝia kritikemo gravitas al debordo per troa seriozeco kaj en tiu kontrolo kiu ajn povas al ĝi flankenmetiĝi; sed antaŭ ol kontraŭdiri, eĉ ĝi devas profiti ĉiujn sciencojn por atingi, krom certeco pri la okazaĵo, probablan naturan eksplikon de la supozita supernatura fenomeno. Spite onidirojn, validas ankaŭ la kontraŭo: la ofteco de tiaj mirindaĵoj trejnas kaj taŭgigas la katolikan medion al kritika kribrado kaj ankaŭ al ilia eventuala subklasado.

*d) Mi, male, konjektas, ke la "supernaturaj" fenomenoj aŭ esceptaĵoj okazantaj en la katolika medio oftas ankaŭ ĉe alireligianoj kaj tial argumenteblas, ke tiaĵoj estas ennaturaj, kies kaŭzoj ankoraŭ nekonatas, aŭ, ke ĉiukaze ili ne povas plifirmigi katolikismon rilate ties reklamitan eldian originon. Komuna okazaĵo ekskludas originalaĵon. Hodiaŭ la informoj svarmas kaj tio malfavoras pretendon ke tiuj fenomenoj okazas nur en la katolika eklezio.*

Tiaj mirindaĵoj en etnaj religioj, similaj al mirakloj, postulas esti esplorataj malgraŭ iliaj duonvaporiĝaj priskriboj. Ĝuste tio okazas en la katolika, aŭ kristana, medio. Cetere, estas kristana principo, ke la Sinjoro peras la savon de ĉiuj homoj kaj, do, nenio malebligas, ke li manifestiĝu eĉ inter paganoj aŭ alireligianoj, inter kiuj enestas vera kaj sincera elserĉado pri Dio. La hipotezo de mirakloj ankaŭ en aliaj religioj ekŝprucis eĉ el la Biblio. Diversaj kristanaj teologioj, aparte tiuj de la *vorto ensemita*[1], nome dia vorto enplantita en ĉiu kreita homo tiun ĉi enlumante jam de la enmondiĝo, vidas postsignojn de la Difilo en ĉiuj religioj kaj kulturoj. La Krista elaĉeto fakte inkluzivas ĉiujn homojn. Kaj tio ne pro malavara donaco de la eklezio.

Ĉiukaze la celo de la miraklo povas esti: ke la homo sentu bezonon de iu transcenda amanto kaj rezignu je sia sinsufiĉecemo.

*e) Kial religio en lernejo? Religio estas privata afero, indas nur inter personaj intimaĵoj, ĉu ne? Oni suspektas, ke kreiĝis fikciaj postenoj por malfik-*

[1] Laŭ interpreto pri tiu paŝaĵo de Johano 1, 9: "Verbum quod (= lux vera quae) illuninat omnem hominem venientem in hunc mundum = "Difilo kiu (=lumo vera) lumas al ĉiu homo venanta en la mondon".

*cia mono…*

Tiu ĉi instruobjekto trovas sian pravigon en la volo de la familioj kiuj rajtas eduki gefilojn laŭ siaj principoj per specifaj lernobjektoj pere de personoj meritaj je gepatra estimo kaj fido. Familioj de ĉiu ajn religio, en la mezuro, ke tiu religio influis la historion kaj kulturon de la itala popolo. Oni esploru tiufacete kio okazas en eŭropaj ŝtatoj: preskaŭ ĉiuj sekvas la saman principon!

*f) Do la ŝtato devos enlernejigi diversajn religiojn ĉar jam ĉeestas en nia socio adeptoj de islamismo ktp.*

Katolika religio lerneje enestas ne pro tio ke la lernantoj estas katolikaj, sed pro tio ke la kristana religio, sub la katolika formo, enestas esence intima kaj samnatura al la kulturo de la italaj gentoj: sen tia kulturo ne eblas kompreni nian historion, nian arton, nian literaturon ktp. Certe, tiu ĉi instruo devas prezentiĝi kiel studobjekto laŭ la leĝa teksto, ne kiel kaptilo por la konsciencoj.

*g) La Biblio igas Dion mortiganto, rajtiganto de la subpremo de popoloj kaj ties genocido...*

Multefacete envolvas via demando. Simplige: la Biblio estas, laŭ la kristanaj eklezioj, verko krom de Dio ankaŭ de homo, kiu certe ne nur sian stilon enŝutas sed ankaŭ siajn pasiojn kaj cedas ankaŭ al la tento fleksi Dion al servo de homaj kaj rasaj profitoj. La tuta Biblio, ne reduktiĝe legata, similas lukton inter homaj ruzaj vidpunktoj kaj la seneraraj vizio kaj konceptado pri Dio, kiu komplete klariĝos en Kristo. La vorto, tio estas la penso kaj reprezentado pri Dio, semiĝas inter robusoj kaj dornoj. Nia tasko: rikolti la ĝustajn fruktojn. Bibliaj eventoj priskribitaj per la etnaj kategorioj de la dia perforto, ĉu de la dia venĝo ĉu de la viktima forofero ĉu de la propeka kapro, kaj de la sakraleco (nur en kristanismo, nenio estas natura sanktaĵo) ktp estas ekzakte de la Biblio detruitaj aŭ rektigitaj. Tio meritus esti serioze studita. La antikvuloj kutimis alskribi al la dia senpera interveno eventojn kaj siajn entreprenojn kaj reagojn: Dio pli komplico de sukcesoj ol garantianto de morala vivo. Tamen la Biblio ĉefe prezentas Dion garantianto de la morala vivo kaj observanto de la intimaj intencoj de la fidelulo. Nur el intencoj establiĝas adekvatiĝo aŭ maladekvatiĝo al la moralo, kaj tiuj ĉi lucidas nur al Dio.

*ĝ) Kristanismo baziĝas sur la atestoj de iu virino.*

Tiu virino ne ekzistas en kristanismo. La apostoloj renkontis, laŭ la palestinaj vojoj, Kriston la resurektontan, kaj poste la saman personon resurektintan.

Altiritaj de li, ili esploris lian homan originon kaj instruis, ke li naskiĝis el virino, kiu mem pri tio neniam registrigis laŭsciate. Parolas nur evangeliistoj, kies atestoj konfirmiĝas per la parola tradicio antaŭa kaj samtempa kaj posta.

Se io plua pri tia virino: ŝi, en absoluta sendependeco kaj en konscia libero, decidis patrine originigi la eventon "Kriston". Ŝiaj libero-plenumo kaj aŭtonomio legeblas en Magnifikato. Ĉu tiel ne enkadriĝas inter modernaj virinoj?

*h) Kiom da krimoj ennome de Dio!*

Vere! Ankaŭ Jesuon oni pilorie kondamnis je nomo de Dio. Laŭ evangelioj, fakte, la ĉefpastro en sinedria kunsido deŝiris siajn vestojn, eksklamanta: *"Li blasfemis. Por kio ni plu bezonas atestantojn?"*. Kiu ajn povas tentiĝi sin servi je Dio, sed la evangelio senmaskas kaj kondamnas tiaĵojn. Ankaŭ kristanoj, foje, tiun krimon plenumis, sed evangelio kondamnas eĉ ilin.

Eĉ kristanoj penadis por kompreni, ke mem devas respekti la alies konsciencon kaj ne altrudi sian kredon per perforto. La evangelio jam fariĝas la metro kiu mezuras, kribras ĉiumomente kaj pelas al la morala kresko antaŭ ĉio la kredantojn.

*ĥ) Kristanismo vehiklas al tristeco, tiu via Kristo senĝoja, severa kaj enĵetanta al sinpremo...*

Eble noce alloga oleografio, eĉ devoteca, tian impreson generis; kaj ne kompleta pri kristanismo prezentado liverita en iuj literaturaĵoj, ekzemple de itala poeto G. Carducci (Karduĉi), laŭ kiu la mezepoka kristanismo transformis la doktrinojn de la dolĉa mesio kaj altrudis, spite al la plenĝojo de liaj familiaj amoj kaj de la sankteco de la laboro kaj brilo de l'arto, humiliĝon kaj rezignacion kun mistrakto de la karno kaj doloramon, kaj tiu reduktiva interpreto disvastiĝis[2].

Sed kristanismo komenciĝas per anonco pri "granda ĝojo" (Luko 2, 10), ĝuste Johano la Baptisto proklamas, ke la alveno de Jesuo estas "ĝojo" (Johano

[2] La vizion pri kristanismo de tiu literaturartisto klare vidigas la jenaj versaĵoj:
..., poi che un galilejo
di rosse chiome il Campidoglio ascese,
gittolle in braccio una sua croce, e disse:
Portala e servi". (Odi Barbare, Alle fonti del Clitumno).
"…, *ĉar galileano*
*harblonda Kapitolon supreniris,*
*sur ĝiajn brakojn li ĵetis iun sian krucon altrudante:*
*ĝin portu kaj servutu".*

3, 29), kaj Jesuo mem plurfoje garantias ĝojon tiel: *“Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena”,* kiun li lasas al la siaj (Jo 15 kaj 16). Tion jam substrekis Nietzsche, kiu skoldante kristanojn pro ties, foje realaj, nepluaĵoj, ilin metis en kontraŭdiron kun si mem pro rezigno elradiadi la ĝojon de l’ savo, kiun ili pretendas ekposedi kaj anonci. Tiu via impreso devus, laŭ mi, riproĉe alarmi kristanojn.

Pri tiu tristeco mi havas memoran sperton. Laŭ longaj jaroj mi suferiĝe trenis tian bildon pri Kristo kaj Dio: el katekistino mi ricevis pri Dio nocion de kontrolisto kaj juĝisto tiel pli severa kiel pli mizerikorda. *Se li estus malpli mizerikorda kaj lasu min libere spiri!,* mi sekrete pensis. Nur pene, plimalfrue, mi sukcesis mallevi je nivelo de sentoj la kontraŭan finakiritan ĝustan konceptadon pri la dia patreco. Ankaŭ hodiaŭ mi devas antaŭe laŭkrede rezonadi por alveni poste al morale akceptebla ĝojsento koncerne miajn rilatojn kun Dio: edukado pezas, sed kritikisto iras al la oficialaj dokumentoj. Manko de informo enŝovas asertojn mankhavajn se ne kripligajn.

Ĉu tristis mezepoko? Rajtiĝas tion pensi kiu ne vidis la katedralojn kaj la fantasmagorion de koloroj en la pentraĵoj kiuj kovris ĉiujn preĝejajn parietojn!

*i) Kio ne povas reeksperimentiĝi en laboratorio ne rajtas konsideriĝi science pruvita. La resurekto de homo ne refareblas en laboratorio, do...*

Vi objĵetas per nescienca alpaŝo: se tio verus, neniu povus demonstri, ke vi naskiĝis ĉar via naskiĝo ne estas laboratorie ripetebla. Sed vi ekzistas kaj proponas tiun ĉi objĵeton. La sciencaj kriterioj ne ĉiuj laŭiras kun la samaj ebenaj senŝanĝeco kaj alfidindeco: ili kontraŭe adaptiĝas al la sciencobjektoj. Fakte senfinaj sciencaj certecoj ne baziĝas sur laboratoria plua refaro. Murdiĝo de certa persono ne povas ripetiĝi ĉar ĝi jam okazis: aŭ ĉu ĝi ne okazis?

*j) Kial konstantas la klopodo de la eklezio enŝoviĝi en naciajn registarajn aferojn kaj historiajn luktojn kun la ŝtatoj?*

La luktoj eblas nur pro tio ke la du instancoj devas esti distingeblaj kaj disigitaj laŭ la konstanta kristana tradicio: kristanismo de tuj pretendis la apartigon inter la du aŭtoritatoj. Tio ne signifas, ke iu el tiuj potencoj rajtas sendependiĝi de la morala denaska leĝo. La luktantoj povas lukti por justaj aŭ maljustaj motivoj. Ĉiam eblas trovi la oportunan kompromison kiu tamen respektu la moralan leĝon. La evangelia anonco povas postuli korektojn kaj de unu flanko kaj de la alia. La evangelia anonco de la eklezio foje kunfrapiĝas kun kontraŭevangelia soci-morala leĝaro aŭ kun tendencoj miskristanaj de la fidelula-

ro, kiujn la eklezio devas "paŝti" riskante foje, ke tio povus taksiĝi, kvankam en epoko de demokratio, entrudiĝo de episkopoj en ŝtatajn aferojn. "Temporalista" (el la itala temporalismo) tendenco estas tento de ĉiuj, tamen superebla.

*ĵ) Kristanismo dumiljaras, tamen neniel progresigis la homaron. Militoj, genocidoj, persekutoj, maljustaĵoj superrandiĝas en la nuna mondo samkiel en la epokoj antaŭintaj la kristanismon. Ĉu tio ne elmontras, ke kristanismo ne taŭgas por la progresigo de la homaro? Kristanismo mankas je persvadiga forto, alloganta homojn, pliprecize ĝi falis el sia iluzie pretendita tasko kaj, male, difektis civilizon.*

Progresoj kaj evoluoj havas du vizaĝojn: tiu atestanta la eksciojn kaj tiu rilata al la morala elekto de libera volo. La unua koncernas la inteligenton kaj teknikon kaj eksperimentojn kaj teorimadajn konceptaĵojn ktp: tiu ĉi povas kreski senmezureble, eĉ pri la arto regi la sociajn kaj politikajn aferojn. La dua koncernas la individuecon de unuopulo ĉar ĉiu individuo konservas, se posedanta siajn homajn esencaĵojn, konstante kaj ĉiumomente la liberan volon por kunsentadi kaj agadi laŭ morala bono aŭ malbono: en ĉiu dormas Abelo kaj Kaino. Fakte naskiĝas el la homa eno la moralaj bono kaj malbono kies elstariĝo kaj malklariĝo dependas nur de la homo mem! Kristanismo plie akcentas senton de responsiga libero konvinkantan ke ĉio ne estas fatalotorento ĉar io kombiniĝas kun la libero; kaj tial ĉiu scias, ke libero flosas inter du povoj: la bono kaj la malbono.

Io simila juĝeblas rilate estetikon en arto: ĝi povas kaj povis gajni la plenvaloran pinton en ĉiuj epokoj, eĉ kiam al artisto mankis modernaj teknikoj: en arto ne ekzistas evoluo, almenaŭ en la Darvina senco.

Krome, kaj laste, kiu disponas la neeraran kriterion por mezuri la influon de kristanismo sur la homaro? Ĉu eblas scii kio estus la homaro sen kristanismo?

*k) Kial eklezio kondamnas la teorion de evoluo de la specioj? Jam estas firma punkto, ke homo devenas el la sama linio el kiu formiĝis primatoj, kiel tiuj simiecaj!*

Eklezio kondamnas absolutan evoluciismon pretendeman, kiu provas konvinkiĝi, ke evoluo havu en si mem sian sufiĉan motoran eksplikon, nome, ke ĝi estu la kaŭzo de la origino de homo, ne la simpla vojo tra kiu la kaŭzo venigis homon al la ekzisto. Evoluciismo identas kun sciencismo, tio estas pli ideologia scienco ol sperta aŭ eksperimenta aŭ esplora scienco. Katolika eklezio neniam oficiale deklaris la doktrinon de la evoluo kontraŭkristana: evoluo de la specioj estas afero de scienculoj: se ĝi okazis kaj okazas, por la eklezio si-

gnifas, ke Dio kreis programante eĉ la evoluon. Darvin mem, plurloke en siaj verkoj, kredis, kontraste al alilokaj esprimoj, esti malkovrinta nur la leĝojn de la evoluo, ne la intrinsekan kaŭzon de la evoluo mem kiun li, plurfoje sed ne ĉiam, dankŝuldas al la programinta dia interveno. Ĉu, fine, tiuj leĝoj, ankaŭ je subvesto de neodarvinismo, fundiĝas sur koheraj teoria kaj objektivaj esploroj, vidu scienculoj. Natura selektado, kiun neniu negas, estas eventuale nura vojo al evoluo aŭ unu el tiaj, ne kaŭzo. Naivaj kompilistoj de lernotekstoj foje laŭiras sur la plej simplisma kaj pseŭdosciiga dilemo: aŭ specio-evoluo aŭ kreismo. Sed - oni obĵetu - eĉ evoluo de specioj, se ĝi tratempe agis, originas el la krea impulso: evoluo aŭ ne absoluta evoluo! For absoluta evoluismo, malfor evoluo!

Ne forgesendu ankaŭ, ke hodiaŭ nekaŝinda nombro de tiufakaj scienculoj, diverskredaj, kunhavas la opinion, ke ne estas pruvita la transiro de unu specio al la alia, des malpli pri la origino de la homa estaĵo el aliaj bestaj estaĵoj. Ili ŝatas teoriumi, ke en nova speciaĵo kreskas kio jam entenata en la origina. Iuj el ili, por pli akcentigi sian teorion, elpensis fabelon laŭ kiu Dio kreis sennombrajn embriojn, ĉiujn samdotitajn. Al ĉiu unuopulo estis demandite pri kiu estaĵo mem preferas estiĝi. “Mi volas fariĝi planto, mi evolui al hundo, mi al simio…”. Kaj ĉiuj esti kontentigitaj. Nur unu, la lasta, ĉirpis: ”Mi volas resti kia mi estas“. Kaj ekestis la homo!

*l) Vi ne povas nei, ke multaj seriozaj personoj, tute dediĉataj al pliagrabliĝo de la homa stato estas ateistoj aŭ nekreduloj konstante engaĝitaj por bono de la homaro. Ĉu tio ne signifas, ke oni povas labori por la bono ankaŭ neglektante Dion kaj religion?*

Mi ne malestimas ateistojn fontigitajn el la kompato al homoj, el malfacileco akcepti la ideon pri Dio, mem konstatantajn tro multe da maljustecoj kaj suferoj ĉe la homaj tratempiĝoj, eĉ ĉe nenocaj infanoj. Tiu ateismo naskiĝas el morala tensio, el amo al bono kaj justeco. “Ateismo naskiĝinta el morala postulo, el la amo al la bono kaj justeco”, same kiel tiu de romanaj protagonistoj de Dostojevskij, ne malhonoras Dion: ili kontribuas purigi kaj precizigi la nocion pri Dio. La definitivan respondon al siaj postuloj ili povus trovi en Jesuo... La Dio rifuzata de iuj ateistoj ne estas la Dio disanoncita de Jesuo kaj de kristanismo: tiuj ateismemuloj batalas kontraŭ iu dio ne ekzistanta aŭ iu dio kripligita.

Cetera ateismo povas naskiĝi el duboj kaj el seriozaj kriterioj serĉantaj la veron, aŭ de antaŭdecido de la libera volo. Tiu dua ateismo ne povas interesi la intelekton kaj menson kaj raciajn kriteriojn ĉar ĝi superpasas tiujn ĉi sinfordonante al la ŝataĵoj de libera decido aŭ de la modo. Ateismo de elekto nur rimas

kun ateismo de intelekto! Prefero elektas, inteligento pruvas!

*m) Se Dio ekzistas, kien li foriris dum la genocido de judoj en lageraj mortigejoj?*

Respondo ĉi foje venis el la enestantoj: *eble li estis kalkulanta la viktimojn de antaŭaj genocidoj kiuj ne interesis nin!...* Ironia aŭ ne, tia respondo risortigis diskuton kies fina suko volus perparadokse enŝovi, ke laŭ kristanismo homo gajnas sian finan destinon ankaŭ per sufero, parte devenanta el lia aĉa konduto parte el homa naturo. Se koncepteblas kaj konstateblas homo ĝuanta liberan volon, logikas ankaŭ lia disponebleco al la malbono ĝis genocido. Ĉu konceptebla homo senlibervola? Povas ankaŭ okazi, ke nin interesu nur iuj genocidoj kaj ne aliaj. Kial Dio kreis homon tian, elmetitan al eblo envulti kaj al risko esti envultita? Tio estas nedeĉifrebla! Li tion tamen rajtis fari ĉar al homoj li donacas sin mem, se ne forgesi la evangelion!

*n) Kial Dio al iuj donacas la kredon, al aliaj ne? Pro kio tiuj kapricaj malegaligaj preferoj?*

Tiu estas fantazio de predikantoj kaj teologiistoj. Veras, certe, ke kredo estas donaco de Dio, sed donaco por ĉiuj. Nur eksteraj, certe antaŭviditaj de Dio, cirkonstancoj malhelpas, ke iu senkulpe ne albordiĝu al la kredo. Ordinare senkulpe, foje eble pro kulpo de orgojlo kaj de disflagro de aliaj pasioj. Ankaŭ en la kredago homo ĝuas ĉiam sian libervolon kaj Dio ne ludas kaprice. Mi malkonsente reagis kontraŭ iun emfazantan, ke mem envias mian kredadheron. ”Amiko, mi rebatis, povas meriti envion kiu almenaŭ ne misas! Kiu, male, vagas traerare, kia mi estus laŭ vi, meritas kompaton, ne envion; meritas envion (eŭfemismo, ĉi-kase, por deziro posedi samaĵojn) la belo la justo la vero, bonaĵoj je komuna disponebleco”.

Kiu ekkredas, sentas dankemon al Dio; se, poste, li pli penetras en la komprenon de la kredago, li malkovras, ke vere la kredo estas libera donaco de Dio; kaj se ankoraŭ pli avancas en tiun terenon, li malkovras, ke la bonafido estas la fina fundamento de la amikeco kun Dio.

*o) La modernan okcidentan civilizon bonŝance influis protestantismo per la principo, ke la konscienco, individua konscienco, rangas tute supre sur la leĝo, sur la dogmoj kaj sur la ekstera aŭtoritato. Tiu antaŭeco de la konscienco gvidas rifuzi ĉiun formon de sugestio kaj de potenco. Kial tiu principo ne floris en la katolika eklezio?*

Estas ĉiam la konscienco kiu juĝas ĉu ekzistas aŭ ne la devo ricevi la ordo-

non aŭ la dogmojn. Tiu principo estas la bazo de la kristana moralo. Ĉu eblas, ke la katolika eklezio forgesis tion? Okazas, ke iu konfesia teologifluo pliinsistas sur la libero kaj alia sur la leĝo kaj ordonoj (kaj tio ĝermigis eksterkonfesiajn kaj superkonfesiajn kulturtendencojn kaj dirmodojn), sed neniu el la du sukcesas ignori la alian kunelementon. Tiu principo estas altvalora erco de ĉiuj kristanaj eklezioj.

*p) Malgraŭ tiaj viaj respondoj, kaj aliaj samspecaj, mi daŭrigas nutri malsimpation rilate Dion. La problemo pri la ĉieĉeesto de Dio en la historio ĝin mistere modlanta avantaĝe de la homa savo, laŭ mi, interesos la ularon malpli kaj malpli ĉar la modernaj homoj jam havas aliajn inklinojn, aliajn preferojn. Finfine homo rifuzas la problemon aŭ hipotezon "Dion" kaj rilatojn kaj referencojn al li por ne perdi sian sendependecon kaj memregon.*

Vi mikse apudigis tre malsamajn asertojn. Preterlasante aludojn pri la enhavoj aŭ karakterizoj de la moderneco aŭ postmoderneco, mi vidas en via parolado du aferojn, du problemojn, du sintenojn nepre distingendajn, kiujn tamen malofte oni engaĝiĝas precize distingi.

Oni ofte aŭdas aŭ legas esprimojn tiuspecajn: *al mi ne interesas Dio, mi preferas pensi, ke li ne ekzistas; tia problemo supereblas ĉar sensignifa; Dio misfunkciigas la homan harmonion; mi transas tiun neracian pseŭdopostulon ktp*. Estas tiaj diskurantaj pozicioj de ateistoj eĉ famaj. Mi vidas en tiuj esprimoj du malsamajn liniojn kiuj ĉesas paraleli por surmetiĝi inter si. Devus esti evidente, kiel jam antaŭe dirite, ke tiaj pozicioj koncernas sintenon de la animo, personajn inklinojn, liberajn elektojn de la libervolo. Male la problemo koncernata, ĉu Dio ekzistas aŭ ne, estas respondebla nur pere de la racio, de la arto de pura rezonado, ne pere de la libervolo aŭ preferoj.

La personaj preferoj aŭ deziroj kaj ĉio apartenanta al la sfero ama, allogiĝa, tima, admira, fida kaj similaj, ne rajtas elpeli la neprecon de la itinero de la racio aŭ inteligento aŭ de pura kaj nura, laŭplej eble, rezonado, sed bedaŭrinde ili povas misgvidi la korektan uzadon de la racio, ĉiukaze ili lasas nesolvita la demandon: Ĉu Dio ekzistas aŭ ne? Komparoj komprenigaj sin proponas: se mi fuĝas el klimato malvarma kaj kuras al tiu milda, ĉu la malvarma ne plu ekzistas? Aŭ pli klare: se mi suspektas, ke iu fenomeno estas kaŭzita de iu difinita kaŭzo kaj samtempe decidas ĉion ignori, ĉu la rilato de la fenomeno al ties kaŭzo ĉesas?

Ateismo povus doni du malsamajn kaj malsamvalorajn respondojn al du diferencaj demandoj: Ĉu ekzistas aŭ ne Dio? kaj: Ĉu en mi vekas ŝaton aŭ malŝaton tia ekzisto, plaĉon aŭ malplaĉon?

Povas okazi, ke la racio legitime atingas la konkludon laŭ kiu Dio ne ekzistas: ni senĝene konfesu tion, sendepende de la persona sintena prefero. Povas okazi, ke la individua racio konkludas, ke mem ne kapablas atingi rezultojn: ni pretu akcepti eĉ tion. Povas okazi, ke la racio konkludas por la ekzisto de Dio. Tiupunkte, nur tiupunkte, oni rajtas, eventuale, intervenigi siajn emojn, inklinojn, personajn preferojn, liberajn elektojn...

Eĉ la esprimo "mi ne sentas bezonon je ajna dio" subigendas al la sama kritiko: "senti bezonon pri io" estas psika stato, ne konstato de la racio pri la ekzisto de tio, tial ĝi ne rajtas transiri kaj invadi la kampojn de la racio.

Mi ne estas tiel naiva ĝis pensi, ke la problemo de la ekkono de Dio estas tute asepsa. Ĝi certe kuntrenas kaj insidas la ekesploranton ĉiunivele; mi ne tiel naivas ĝis pensi, ke la rezultoj lasas indiferentaj la homajn animinklinojn. Sed tiaĵoj ne rajtas fuŝige intermetiĝi aŭ forigi la problemon: la racia estaĵo kapablas distingi kio estas konkludo de personaj deziroj el tio kio estas konkludo de la raciaj esploroj! Certe, inverse la sfero ama, tima, dezira, admira, fida, vola povas false estigi la dezirataĵon. Tiuj ĉi, tial, distingeble disiĝu en la funkcio de la racio kaj silentu por repreni tujposte sian funkcion. Por eventuale fortigi la konkludojn kaj plieksplikі la malkovrojn de la racio.

Ateismo povas apogiĝi sur du fontiloj, se konsentite ripeti. Fakte, aŭ ĝi povas esti frukto de libera volo kaj tial ĝi facilas ĉar oni senpene kapablas elekti kion oni volas kaj tial, pro tia plaĉa kaj plezuriĝa elekto, ĝi ĉiam senkulpiĝe kaj senrespondece pravas kaj rajtas kaj rezistas al ĉia racia atako, ĉar ne kontestebla perpruve; aŭ ateismo povas esti konkludo de la rezonanta inteligento: tiukaze ĝi estas pli malfacila sed kun ĝi eblas dialogo kaj konfronto. Foje la du kunfandiĝas malfaciligante, sed ne malebligante, la distingon.

La du linioj povas ankaŭ surmetiĝi kaj interplektiĝi, sed nur post klara distingo de la du tavoloj, same kiel ni emas fari en ĉiuj ĉiutagaj enketoj kaj estas postulite en sciencaj esploroj. Tia surmetiĝo povas ankaŭ impresi, eble senmotive, ke iu ruze malvalorigas la problemon kvazaŭ por eviti, ke, en la virtuala partio inter ateistemuloj kaj teistemuloj, oni risku malkovri, ke Dio vere ekzistas, dum male oni devas senplende akcepti la konkludojn de la neobstaklita homa racio. Alilokiĝo de siaj spertaj interesoj ne nuligas la valoran konsiston de la preteratentaĵoj. La problemoj do estas du: tiu intelekta kaj tiu prefera. Tial nepras premi eĉ sur la lingvaĵon mem por ke pli senpuntilie, aŭ malpli sufere, oni distingu la du nivelojn. Ke pensulo pri Dio-afero kondutu kiel matematikisto, kiu ne elektas, sed demonstras per pruvoj, la solvon de la koncernaj problemoj.

Evidente, en tiu ĉi nia diskutado intelekto kaj racio preskaŭ same sencas. Se propre distingi, la unua rilatas al la unuaj postulatoj senpere evidentaj, kiujn sekve la racio ellaboras per la rezonadfakulto.

*r) Tamen diversmaniere vaĉante inter praktikantoj de kristanaj moralo kaj religio oni trovas tenace asertataj multajn neraciaĵojn kiuj finfine apogiĝas kaj montras la inklinon ne tro racirespekteman de kristanismo.*

Sed kristanismon oni devas alpreni el oficialaj dokumentoj. Bedaŭrinde plu prosperas, kvankam malpli intense ol iam, ĉe klerisma aŭ moda kulturoj, malfavoriganta antaŭjuĝo: trakti la religisferon nur je nivelo etnologia-antropologia aŭ socipolitika aspektoj neglektante la aŭtoritatecajn fontojn, el kiuj deiras la konstanta agado de la eklezio por instrui kaj malhelpi malraciaĵojn kaj devojiĝojn, malgraŭ kaj pro tio, ke tiuj ĉi daŭre okazadas.

*s) Kial Madono aperus ĉiam al infanetoj, aŭ virinetoj, kaj neniam al doktaj personoj, ekzemple al ni en tiu ĉi momento?*

Mi ne konas la tutan historion de la Aperoj kaj do ne certas, ke inter ili ne protagonistas ankaŭ doktaj personoj kaj viroj. Kvankam je minimuma graveco, pri tia cirkonstanco priokupiĝis teologoj kaj alisciencaj uloj. Eble humila konkludo povus esti: Ĉu ni, aŭ plej doktaj personoj, vere estus pli konvinkigaj ol infanoj aŭ humilaj personoj? Ĉu infano ne sin prezentas pli traktebla kaj observebla, pli esplorebla kaj pli fora de eventuala profita mensogemo ol ni... doktaj personoj? Ĉu vere la popolo pli fidus je ni ol je infanoj aŭ virinetoj? La problemo ĉu vere okazis apero, kaj kiom da aprobo ĝi meritas, devenas de la eklezio. Rilate tiun lastan aferon, eklezio rekonas la eventualan seriozecon de la cirkonstancaro "apero", neniam ĝian realan okazintaĵon.

*ŝ) Ĉu ankaŭ laŭ vi scienco procedas ateisme, ĉar la hipotezo-Dio tratordus esplorojn kaj esploristojn?*

Jes. Sed oni distingu: scienca metodo procedas sendie, ne ateisme. La scienculo-esploristo esploras sendie, nur la homo-esploranto interesiĝas pri Dio. Se *scienculo* akceptus Dion aganto en la fenomeno kies kaŭzon oni priserĉas, la scienco estus nescienca. Dion eventuale serĉas la *homo,* kiu eventuale povas esti scienculo aŭ poeto aŭ nur …instruisto.

*t) Mi revenigu la atenton al la apenaŭ aludata demando pri la krimoj de kristanoj laŭ jarecento. Ĉu tiuj ne malrajtigas kristanan religion? Kiel kristanoj sin liberigas el tiuj hontoj?*

Eble ili neniam sin liberigos el tiuj. Rilate rajtigon al ekzistado kaj sinpre-

zentado, ni konsideru kristanojn homoj: homoj kiuj, same kiel aliaj homoj (ni, ekzemple), ĝuas je la samaj niaj rajtoj, eĉ je la rajto preni, el kristanismo, kion mem volas, eĉ ĝin kontraŭi aŭ ĝin interpreti laŭvole aŭ ĝin ekspluati en aspekto de justo, inkluzive certe la rajton ĝin akcepti kaj vivi kristanstile. Ĉu ni ne havas tiun rajton, kun la respektiva interna libero? El la plurtipaj homoj, la plurtipaj kristanoj.

Vere, Jesuo garantiis, ke lia eklezio daŭre fruktodonos sanktecon kaj amon en senkondiĉa sindediĉo al Dio kaj al la homoj: pri tio oni konsideru la kristanan geniecon en la asistado al la proksimuloj… La bono superas, certe, la malbonon. Inter kristanoj, iuj provis fleksi kristanismon al siaj avantaĝoj aŭ sekreta egoismo, sed ni ne povas ilin riproĉi ĉar ili estis kaj estas liberaj kapti kaj vivi kristanismon laŭ propra bontrovo, kiel konceditas ankaŭ al ni (kaj al vi). *Venos la mastro de la rikolto kaj disigos la grenojn el la fruktoj de trudherboj,* diras la evangelio: laŭ tiu parabolo estas antaŭvidite la malsaman konduton de homoj en la eklezio. Ĉe tia libero nun svarmas ankaŭ libero inventi aŭ akcentegi "ekleziajn" krimojn por pli pruve batali eklezion. Kiel ne kaptiĝi en tiu facila arto?

*u) Inter kleruloj, kaj ne nur inter ili, oni ridindigas, aŭ rifuzas kiel plagon por la edukatoj, la principon laŭ kiu bonaganto tiel devas umi por konkeri la paradizon aŭ por havigi sekuran kompenson: ŝajnas, ke laŭ la kristana kredo homo bezonus profite prizorgi ĉiam kaj ĉie rericevojn kaj ke nur tio movus la homan reciprokan helpemon. Tio kontribuas malfortigi la naturan simpation kaj fortigi la naturan egoismon kaj la emon al la ekspluateco kaj al la sovaĝa kapitalismo, ĉu ne?*

Se vi aludas al kristanoj, tiuj ĉi alstrebas imiti Jesuon Kriston: Ĉu tiu ĉi bonagis por gajni ion? Ke li, ne amis ĝismorte senkompense ne estas instruata de ili mem?

Bonagi laŭ Kristo signifas pensi kaj konduti en harmonio kaj en amikeco kun Dio kiu igis amindaj la homojn ilin kreinte laŭ sia bildo: ĉio tio esprimiĝas evangelie kun "esti kun Kristo". Kompreneble, ĉio tio havas sekvojn en la estonta transtera vivo, en kiu la amikeco kun Dio sin liberigos el niaj aktualaj bariloj, kaj fariĝos *paradizo*. Pri la paradizo obliĝas fantaziaĵoj same kiel heroldas akuzo, ke kristano bonkondutas pro la espero de la paradizo, dum li reale estas instigata harmoniiĝi kun la pensoj kaj ekzemploj de Kristo, je kio konsistiĝas ankaŭ la paradizo kiel floro el ĝermo. Ankaŭ rilate la paradizon necesas plipenetri en la lingvaĵon, elmetitan el popolareskaj fantaziaĵoj, se ne foje fantaziaĉoj, pro konkretecbezono. Tiu lingvaĵo povas sin elmeti al risko de

miskompreno kaj ridindigo. Sed temas nur pri lingvaĵo. Krome, la interna memkontentiĝo ĉiam ne seninflua en la homa agado, kvankam humila kaj ne serĉata, nature kunestas en bonagado: ĉu tio inicas al la paradizo?

*ŭ) Galilejo! Ĉu ne hontas la eklezio kiu perforte, kaj pune, provis kredigi, ke la suno moviĝas ĉirkaŭ la senmova tero*?

Ke la eklezio hontas kaj juĝas tion krimo kaj ofendo al Galilejo evidentas; sed malpli evidentas, ke la kondamno eliris el la fakto ke Galilejo asertis, ke la tero, ne la suno, ĉirkaŭmoviĝas. Fakte historiistoj, tio estas fakuloj kiuj enprofundiĝas en esplorojn pri la historio de tiuj jarcentoj, ankoraŭ sin demandas pro kio la eklezia tribunalo kondamnis Galilejon: almenaŭ kvar diversaj opinioj tenas kampon, ĉiuj legitimaj ĉar la verdikta skribaĵo, prirabita, kun la grandparta fasciklo, de Napoleono, perdiĝis dum tiaj malordaĵoj.

Por subteni sian ekzaktan teorion, Galilejo presentiĝis kun tri argumentitaj pruvoj, pri kies valoro iuj ekleziuloj tiam dubis, dum Galilejo pretendis kredigi pri ilia absoluta valoro. Hodiaŭ neniu akceptas validaj tiujn pruvojn! Se la eklezio pretendis dekrete eniri en sciencaĵojn, Galilejo pretendis enmiksiĝi en religiajn kredojn.

Sed tamen nepras vere honti![3]

v)…

Diskutoj aŭ interparoloj pri tiaj temoj okupis horojn kaj specialajn vesperajn renkontiĝojn, kiuj foje finiĝis en picejo, por pludaŭri ankaŭ ĉi tie. Kreiĝis, fakte, por mi dispono de lerneja senŝarĝa diskutejo laŭ iuj sezonoj. El miaj interparolantoj, ne seninterese, iuj trovis ne senvera la devizan principon de Leonardo Sciascia, Sicilia verkisto, forpasinta tiujn jarojn kaj tiam multe priparolata, kiu trafis: "Mi ne kredas, mi serĉas; sed mi ne serĉus se mi scius, ke ĝi ne ekzistas". Li aludis Dion. Li emis konfesi, eble, kredon, certe ne kredeman naivecon.

Laŭ pluraj jaroj la instrua laborado efektiviĝis sametose kun avantaĝoj, efikaj al ĝenerala kulturo kaj al la reciprokeco, laŭ komuna opinio.

Ne ĉiam, tamen, ĉio iris glate. Laŭ jaroj kreiĝis fakte ankaŭ konfliktigaj nekomprenoj, bonŝance nur momentaj, kun la lerneja medio, kun ĝia plejparta personaro. Iam, preskaŭ abrupte kaj senmotive kvankam ne sen aspekta fundamento, oni ekkredis, ke mi endanĝerigas la lernantaron kaj la estimindan here-

[3] Hodiaŭ la rakontanto ne forgesus aldoni ke la papo Johano Paŭlo la dua publike pardonpetis ankaŭ pro tiu "peko". Vidu Vikipedion en la artikolo: *La papaj pardonpetoj*.

dan tradicion de la licea lernejo. Tio pro miaj asertoj antaŭ liceanoj, laŭ kiuj supraĵe evidentiĝus la malkvalito de mia instruado. Krokize dirote:

Inteligenta klaso de liceanoj, alproksimiĝantaj al la abiturienta diplomiĝo, preskaŭ unuanime ekprofesis primoralan relativismon. Iuj el iliaj profesoroj, uloj de la nova filozofio nomata *debolismo* (aŭ *feblismo* aŭ *malforta pensado* aŭ maltaŭgeco de la racio por la malkovro de la fundamentaj veroj, kaj tial neceso fidi nur partajn aŭ versimilajn verojn), konvinkis la lernantaron, ke oni jam ne rajtas pensi, ke ekzistas kunnaska kaj natura moralo, kia absoluta regularo deviganta ĉiujn homojn kaj ĉie, eĉ ĝi neniam ekzistis, kaj la postmoderna homo estas rajtigata de la novaj plursciencaj esploroj de sia racio krei al si novan moralon aŭ ĝin ŝanĝi laŭvole ktp. Tial iliaj juĝoj devas sin liberigi je moralaj, iom repuŝe difinitaj *moralecaj* aŭ *moralizaj* aŭ *moralistecaj* aŭ *moraligaj,* kriterioj, jam taksataj pulvo-precipitaĵo de la jarcentoj. Konceptuloj varispecaj, famaj verkistoj, filozofiaj centroj, la plej disvastigitaj ĵurnaloj ktp subtenas kaj jam delonge disvastigas tiun vidpunkton.

Tial (jen mia konkludo) pro normomanko senfundamentiĝas la distingo inter moralo kaj malmoralo, inter bono kaj malbono. Mi celis diskrevigi la novan miton, laŭ kiu ne ekzistas sendiskutebla moralo (enkadre, kompreneble, de la unuaj principoj, ne pri la derivaĵoj, facile kaj historie konstateble diverĝantaj kaj, foje, kontraŭdiraj): se ne ekzistas moralo, ĉio licas ĉar ĉiu moral- kaj malmoral- sistemo samvalorus! Laŭ mi, tia konkludo, eĉ se nekonscia, jam ekludas nivele de konduto, kvankam la socio daŭrigas kondamni "krimulojn" kvazaŭ moralo, dominanta fundamento de ĉiu jura normo, ne estus kontestata.

Vere lernantoj ne atingis tiun lastan logikaĵon, dum mi provis ilin treni ĝuste al tiu ĉi konkludo, rezonante laŭ la sinsekvoj jene resumitaj:

*"Vi imagu murdinton aŭ seksperfortinton kiu laŭlibere kaj laŭhumure volis kaj fakte murdis homon aŭ seksperfortis por plifeliĉigi sian vivon kaj plimultigi siajn komfortojn. Ĉu vi kondamnus lin?".*

Ĉiuj jesas. Ĉiuj lin kondamnas.

*"Kial?... Se ne ekzistas moralo? se ĉiu rajtas krei aŭ elekti sian moralon ĉar homo devas sendependigi de ĉio laŭ postmoderna koncepto de konscienca aŭtonomio? Tiu homo rajtas krei al si moralon koincidantan kun siaj deziroj kaj vidpunktoj kiuj ne ekskludas egoismojn ĉar eĉ tiuj ĉi rajtas esti aprobataj; kaj sekve jen la kirlado de ĉiuj etikaj terminoj".*

Post kelke da ŝanceliĝo iuj konvinkiĝis perpruve, ke tiu kondamno estas ne logika, pli instinkta ol racia, tial la principo *"ne estas morala leĝo"* senbaziĝas

pro la damaĝaj rezultoj; sed la plej granda parto reagis, preskaŭ tumulte, kuntrenante kaj alarmante la lernejan medion, per la rebato:

"Tiu via similas pli cinikan pozon ol racian dedukton. Ekzistas ĉiam, fakte, la civilaj leĝoj, emoj, alkutimiĝoj, moroj kiuj povas bremsi malbonfaremon! Ĉiuj gentoj havas kodon aŭ tradiciojn, instinktan reagosistemon kiel montras historio…".

*"Sed tiuj leĝoj malpermesantaj kaj punantaj mortigon ĉikaze estus mem altrudo kaj perforto ĉar la individua konscienco hipoteze ne havas tiun principon pro la neekzisto aŭ malĉeesto de denaska moralo, jam ŝrumpigita. Povas okazi, ke la civilaj leĝoj malfruus rilate la novan konsciencon pri la neekzisto de la morala leĝo. Oni devus lukti por forstreki el jurkodoj tion kio ne plu kongruas kun la supozitaj novaj eltrovoj, ĉu ne?".*

"Ni estas relativismemaj, ne nihilismemaj! Tio estas, ni ne neas la moralon, ni nur diras, ke ne ekzistas universalaj, eĉ tutuniversaj, normoj devige validaj por ĉiuj. Oni kreas al si utilajn normojn, utilajn al la socia prospero kaj konkordo".

*"Relativismo eble ne povas ne krei al si moralon, sed mankas je logika forto por devigi individuajn sociajn membrojn. Kiu rajtas altrudi moralon, propruze kreitan, al aliulaj eble pretaj krei al si la sian propruzan? Eĉ la ora regulo* 'Agu kun aliulaj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi' *ne havus racian fundamenton, ĝi servus nur praktike. Endaro naskiĝas el la interno, ne el la ekstera altrudo".*

"Tio skandalas! Vi katoliko, kaj des pli instruisto pri katolika religio, deduktas, ke oni rajtas elvivigi kaj des pli eventuala puno pro tia krimo estus kontraŭhoma perforto. Hororo kaj kontraŭdiro kun via publika funkcio!".

*"Mi spuras la konsekvencojn de via rezonado aŭ de tiu de iuj influaj viaj instruistoj kaj samspecaj libroj, bedaŭrinde pli laŭdataj ol kritikataj. Ŝajnas, ke neniu kuraĝas sin treni ĝis logikaj konkludoj. Filozofo ne rajtas halti meze de la rezonada trairo".*

"Relativismo fontas el la konstato de la malsameco de moraloj elfluantaj el popoloj kaj religioj, kaj trajarcente en la sama morala sistemo.

*"Laŭnatura moralo ĉiureference rilatas al la unuaj principoj, ne al ties aplikaĵoj aŭ praktikaĵoj aŭ derivaĵoj. Necesas vidi kia morala principo gvidas unuopan konkretan agadon; eĉ apogo sur la etiko elmergiĝanta el la kaŝitaj fontoj de la memo kaj de la socio postulas racian subtenon.*

*"Eĉ racia kaj rigida rezonado postulas iun superan leĝon. Fakte, pri evidenteco, kaj do nepreco, de la laŭnatura moralo dedukteblas ankaŭ el subskri-*

*bo kiun E. Kantio antaŭdiktis, kaj volis, por sia tombo:* La stelplena ĉielo super mi kaj la bona volo ene de mi! *Kio estas tiu ĉielo stelita se ne laŭnatura morala leĝo sendependa de la homa volo?".*

La supre aludata tensio taŭze eksplodigis mordantajn diskutojn inter la profesoroj, la lernejestraro, la familioj, kun malfavoraj al mi komentoj: la pozicioj ekstremiĝis kaj konfuziĝis kaj precipe neniu el la du frontoj (mi en tiu ĉi kazo havis malmultajn subtenantojn, nombre pliiĝantajn tamen) retiriĝas en kompromisajn rotojn. Mi devis milfoje ekspliki fronte al la klasaro kaj en privataj boliĝantaj interparoladoj antaŭ profesoroj aŭ familiaj reprezentantoj; kaj fine publike, anstataŭ malkonfesan sintenon, mi difinis iom ironie la tutan aferon: *"je la priserĉo de la kuraĝo por iri ĝisfunden!".*

Iuj, profitinte el mia kvazaŭslogana esprimo "moralo absolutas, relativismo senfundamentas", kvankam subveste de ŝerco, min ekdifinis la *absolutisto*.

Eraro plenumita de mi: mi tro enpersoniĝis en la aferon kvazaŭ engaĝiĝanto en la savo de sia honoro, kaj la instruaĵo estis sentigita pli kiel frukto de persona moralika aŭ moralisma tendenco, kun iom da bombasta galŝprucigo, ol kiel morala problemo. Eble mia troa insisto altiris, reage, la kritikon, ke tiu ideo, nome la postuliĝo de la natura moralo ĝuste el absurdaĵoj de morala relativismo, de tempo al tempo reelanis perturbante la kvieton.

Tiukaze, foje, inter profesoroj la diskuto plilarĝiĝis ĝis la "kategoria imperativo" de Kantio, nobla, granda, konvinkiga, oni insistis, kaj ekvivalenta, eĉ anstataŭanto de la jam ne plu trovebla racia-natura morala leĝo! Por sekvi la kantianan imperativon necesas, oni orgojle subtenis, kuraĝo kaj forta animo, evidente ne posedata de la forlasiĝantoj al la fantoma denaska moralo.

Ankaŭ rilate tion mi ne delasis la dialektikon por provi demonstri, ke inter la du moraloj (la denaska kaj tiu imperativa) abismas la diferenco: tiu kantiana havas, finfine, por leĝfaranto la individua konscienco aŭ la individua decido, dum tiu natura estas nur malkovrita de la konscienco kaj eventuale akceptata kaj sekvata de la malkovranto. Rilate la ĉi-kaze emfazitan kuraĝon por sekvi la kategorian imperativon "faru, ke via ago akiru universalan valoron", vere ĝi nepras ĉar oni sin engaĝus fidele sekvi sian decidon kiel devon senfundamentan dum la racio sencele vagadas pro la rezigno pri la neceso de tiu fundamento.

El la diskuto rezultis ankaŭ, ĉe kelkaj, ke la natura morala leĝo kaj kantiana imperativo havas multe da similo ĉar ambaŭ aspiras reguli la homan konsciencon kaj (sed tio aspektis ironio) ambaŭ staras sur la sojlo de forbalaĵujo!

Se la tuta diskuto ne fariĝis dissaltiga kverelo, ĝi certe ektaŭzis mian kvieton kaj, plejgrave, la rilatojn necesajn al mia entreprenema aktivado.

Ĉio tio, fakte, ekperceptigis, ke la aŭtoritatuloj komencis ne sin deteni de la penso limigi la amplekson de miaj aktivadoj inter la lernantoj. Oni provis alpaŝigi proponon, fare de iuj, min malrajtigi je instrutasko, eĉ mi ricevis, timide de la liceoestro, plidecide de la religiaj respondeculoj neprecize informitaj, admonon kun averto, ke mi estas sur startpunkto de la demisiiĝo el la tasko. Demisiiĝo pro pletoreco de logikemo kaj senfundamenta etikumado, motivis iuj profesoroj, pro la detruo de la moralsento, pliis la religiaj aŭtoritatuloj, pro incito al vivado kontraŭa al la gepatraj reguloj, susuris familioj. Lacige penante, mi sukcesis komprenigi, ke la mia estis spektenda kiel pruvo per absurdo, kiel provoko por ke el la implicitaj konsekvencoj oni deduktu la eraron en la postulaj premisoj kaj ke, do, mi ne instigas la studentojn al laŭmorala anarkio. Prefere ol min kontrasti oni vidu kiel el la diversaj *debolismoj aŭ malfortaj pensadoj* ŝprucas al la okuloj, kaj al la realo, la detruo de ĉiu moralo.

Jam okazis ankaŭ, jarojn antaŭe, ke oni suspektis min kovarde stucanta la ŝirmadon kontraŭ toksikaj drogoj, ekdisvastiĝantaj en lernejoj kaj najbaraj situoj. Mia eduka instruo sonis tiel: *"Ĉu toksikdrogo allogas? Se jes, ni devas havi motivojn por tian allogon rezisti kaj rifuzi. Ni vidu ĉu tiaj motivoj troviĝas"*. La lernantoj estis taskitaj trovi kaj komenti tiujn motivojn. Ĉar, kelkaj ekskludis, per sendiskuta premiso de evoluinta inteligento, kiel peston la *moralistecajn* (eŭfemisma esprimo por malŝatige aludi *moralajn*) motivojn, mi enkondukis miajn lernantojn konkludi, ke, se oni ekskludas tiujn moralajn, veraj motivoj ne troviĝas kaj ke tiu de la damaĝo de propra sanstato pri kiu ĉiu rajtus disponi laŭvole, se postkuri laŭmodajn konsumadajn gurdaĵojn, havas malmultan forton kaj konsentigan forton. Tiu konkludo, altrudita, oni plendis, tra vorto kaj perforto, tiom malplaĉis, ke iuj profesoroj, kutimiĝintaj elsavi lernantojn el drogaĉoj por ke ne estu nocata ilia sanstato, kredis sin senti perfiditaj de mi kaj deklaris min intenca fragiliganto, se ne detruanto, de iliaj edukaj mesaĝoj mem.

Trasvarmis entute akuzo - kulpa pri politike malkorekto - laŭ kiu el mia instruo spureblas ĉiam implica markita morala vidpunkto, ĝuste en epoko en kiu neniu rajtas, eĉ se neaktive, svati moralon kiun ajn.

La memoro, ankoraŭ varma, pri la atencaj misfaroj de teroristoj (*Biere* = Brigadoj Ruĝaj) kaj ties mempraviĝoj inter kiuj imponis rigida marksista moralo, ludis, certe ne objektive, nekalkuleblan influon.

Laŭlonge de dek jaroj mi povis elspezi miajn energiojn inter gejunuloj kun komuna kontentiĝo. Sed ĉio estas destinita al finiĝo. Kaj tio estas nun ekŝvebanta ankaŭ sur mia nuna aktivado.

Jam preskaŭ ĉiusemajne, kvazaŭ per konspiro de la aferoj aŭ de mia ne pli kaŝebla maljuniĝo, okazadis evento kiu povis dubigi lernejestrojn rilate miajn restantajn lertecojn en la majstrado de adoleskulaj klasoj. Ĝi klariĝu jene.

Tiufoje temas pri dekkvinjarulo kiu el fenestrosojlo lerte kaj rapidante iradis al la proksima fenestrosojlo, trapaŝante sur la ekstera kornico, kvardekcentimetra profunda kaj okmetra el la suba korta pavimo. Ankaŭ dum mia leciono li abrupte komencis fari la danĝerriskan manovron minacante sin faligi suben, en la vakuon, se mi estus alvokanta la lernejestron aŭ provanta lin bloki. Mi atendis, senmove kaj sengeste kaj senspire, ke la junuleto revenu ricevi la dozon da aplaŭdoj (do, la heroaĵo ne estis al sia unua manifestiĝo), antaŭ ol interveni; tiupunkte mi provis lin bloki barante realiron al la fenestro; sed li, alta kaj magra, ŝtelrevenis al la fenestrosojlo kaj rekomencis la manovron. Tiam mi retiriĝis kiel eble plej fore el fenestro, mornmiene invitis la kunklasanojn, ke ili ne kuraĝigu per aprobaj flustroj kaj admirgestoj. La teruro, kiam Dio volis, pasis. Ne eblis ne denunci la aferon, sed la teruro ne tute maldaŭris ĉar nun ĝi fariĝis timo pro eventuala negativa impreso, ĉe profesoraraj pedagogiaj konsiliĝoj, kiu sumite kun la pendanta juĝo rilate mian ideologion (pri la nesubtenebleco, laŭ hipotezaj antaŭpostuloj de *filozofia feblismo*, de moralo ĉiujn tenanta: se tiel, fio kaj pio, kulpo kaj senkulpo iel samus; kaj pri malfacileco trovi validajn motivojn por regresi el droguzo), povus plikompromiti miajn honoron kaj reputacion, al kiuj alkroĉiĝas ĉiam pli maljuniĝanta homo.

Kiam mi sciigis aliajn klasprofesorojn pri la okazintaĵo, ili falis el nuboj, nome ili neniam sciis kaj konstatis. Male, je atenta esploro rezultis, ke la akrobataĵo delonge amuzis la klason dumintervale inter unu leciono kaj la alia kaj, ke profesoroj ŝajnigis ne vidi aŭ, por forigi la junuleton el la danĝera manovro, permesis, ke li restu ekster la klasĉambro kaj vagu laŭ koridoroj.

Intensiĝis miaj maltrankviloj ne nur pri mia sorto, sed ankaŭ pri la kultura forĝado de la gejunuloj aparte en adoleska fazo.

Evidente, por tiu adoleskulo la aplaŭdoj de la samaĝuloj valoris la penon riski la vivon aŭ alfronti eventualajn lernejestrajn punojn. Ankaŭ el tio deduktеblis, ke ĉe la junularo la influa rolo pli efika estas ludata de samaĝuloj, de samsimpatiemuloj; malpli influas la juĝo de gepatroj kaj edukantoj. Por formi junulon, do, necesas formi la grupon en kiu li vivas. El tio la mallarĝaĵo: por modifi la grupon necesas modifi la ĉiun unuopulon, kaj por modifi la unuopu-

lon necesas modifi la grupon. Ĉu mi ankoraŭ kapablas agi samtempe en la du kunfluantaj direktoj? Kaj se miaj eduk- kaj instru-metodoj fine estas revizibezonaj, ĉu mi kapablas tion fari? Se insisti, ĉu eviteblas al mi kompato kun demisiiĝo kaj eble damaĝoj al la junularo?

Iam gejunulojn oni juĝis emaj prefere al idealismo ĉar, laŭ interpreta opinio, ankoraŭ eksteraj de la komplekseco kaj konkreteco de reala vivo; nun mi ne nur suspekte sed konstate trovas, ke la gejunuloj ne plu enkadriĝeblas laŭ tiu, eble abstrakta, kategorio: nun ili sin montras realemaj kaj konkretemaj. Pli ol problemojn ekzistencialajn ili vartas la problemojn de la ĉiutaga travivado. Aŭ ĉu eble jam mia generacio tiel kondutis? Mi nun pene rememoras kiel pensis kaj sentis mia generacio! La aktuala generacio jam duarangigas la antaŭan vantantan la konkeron de la luno: la nova jam vivas transe, en marso, sagacas spertuloj. Kaj fine, kial ne konsideri la senutilecon de mia sufero?

Rezulte, krom tio eble pro tio, enŝoviĝis en miajn pensojn varispecaj duboj. Tiun distancon inter mi kaj la nova junularo mi ekopiniis devenanta ankaŭ de mia maljuneco; certe mi tion ĉiam sciis sed nun evidentiĝis, ke ne plu sufiĉas vervo kaj argumentada dialektiko kaj pedagogiaj eskapiloj kaj konstanta enmergiĝo en la disciplinon instruotan. Mi ekvidis modifon en la sinteno pri mi far la junularo. En la rilatoj kun iuj elsaltis pli kaj pli pensmaniera diferenco, pli bone jam kreiĝis heĝo dividanta, ĉe kelkaj klasoj, mian instruaĵon disde ilia atento.

Mi min ekjuĝis jam postiĝinta en la perceptado de tio, kvankam foje al mi iliaj vivintencoj kaj reagoj ŝajnis komprenataj kaj edukcele valorigataj, kaj, kvankam hezitantaj inter klopodoj kaj provoj, miaj respondoj al la postuloj de la juna konscienco, plurfoje preterlasata aŭ snobe juĝata ĉe parto de la profesoraro, al mi ŝajnis eduke oportunaj kaj taŭgaj por la bezono.

Ankaŭ iom da orgojlo, eble, malpermesadis, ke mi kapabliĝu eniri en iliajn vidpunktojn, kaj kiam ili ne akceptis la miajn, tion mi ekjuĝis fore de problemsentoj.

La lecionoj mueliĝis per diskutoj, disputoj, kvereloj, dum kiuj mi perdis foje kvieton kaj povon interesi.

Restas ĉe miaj oreloj la lasta devizo flankenigante min kun mia disciplino: *“en tempo de demokratio viaj instruaĵoj tenas nin en aŭtoritatio”.*

Ĉu mi estas detruanta la edukan konstruaĵon de la laboro de la pasintaj jaroj? Iom post iom mi certiĝis, ke jam miaj vortoj sonas malakute ekstertempaj kaj mia figuro kiel nigrablanka foto el albumo. Ĉiam pli febliĝas mia kapablo kunteni la ekscesaĵojn de la lernantaro. Jam venis horo jen definitive reko-

ni, ke mi estas senhelpa antaŭ tia junularo kaj jen, post dek jaroj, lasi la postenon al malpli maljunulo! Kaj mi petis emeritiĝi.

Grandioza festo, grandaj omaĝoj, grandaj aplaŭdoj min akompanis eksterlernejen, kiun tamen mi daŭrigis viziti de tempo al tempo, ĉiam festata kaj aŭskultata, almenaŭ opininivele. Tosto kun poemeto en kiu estas laŭdataj miaj engaĝiĝo kaj sindonemo kaj altruismo kaj sendanka dispono de mia tempo por didaktikaj bezonoj ktp. Estis dum tiuj adiaŭaj tostoj ankaŭ, respektvorte kaj preterpase, ŝatige aludata mia iama pastreco. Kaj tio min ne multe plaĉis ĉar vidiĝis pliafoja postlasaĵo de neforstrekebla tabuemo, aŭ suspekto, ke min oni akceptis kaj taksis inda kaj fidinda pro mia pastreca deveno malgraŭ ke eĉ tio limige sonas en medioj nebonvolemaj al religio pro supozita dogmismo juĝata pli kiel deirpunkto ol kiel alvenpunkto.

Eĉ ekslernejanoj de antaŭaj jaroj ĝentile partoprenis, lasante tamen en miaj iom konfuzaj pensoj elstariĝi pli la aspekto de iu nedifinita ŝatorespekto, kiel kutimas la gejunuloj al la malnovaj generacioj (ne ĉiam tamen!), ol tiu de la skolaneco kaj solidareco aŭ dankemo. *Maljunuliĝo foje identas kun suspektemo:* eble nun estas okazanta pruvo ke tiu proverbo ne naskiĝis el nenio

Resubstrekiĝu, ke la lernejo ne tute elpelis min, male ĝi invitis min ne tute rezigni intertempan kunlaboron. La sekvan jaron liceanoj premis kaj obtenis, ke mi prelegu en lerneja simpozio pri la filozofiaj esploroj kaj taskoj en la nova scienckultura etoso. Mi klopodis konduki la partoprenan atenton sur ĉiam pli disvastiĝantan difinon pri esenco de filozofio: *ĉu ĝi estas esence priserĉo?* Tiu jam komuna opinio tiom tiklas, ke sugestas ne eliri la dubstaton: se oni iam trovus la serĉitaĵon, ĉesus filozofio kaj filozofiado ĉar ties esenco estus nur priserĉo. Plivere ĝin oni difinu *priserĉo por alveni al vero.* Pensulo, per la eltrovo de la vero, akiras la novan funkcion de pensulo pri ĝi. Eble iuj filozofoj timas perdi funkcion kaj gravecon ne konsiderante, ke la vero estas neelĉerpebla en siaj diverstavolaj faldoj do ĉiam plipostulanta pluan esploron pere de la racio.

La sekva konversacio tuŝis la rilatojn inter filozofio kaj revelacio: *ĉu tiu ĉi povas influi filozofion sen senigi ĉi lastan je aŭtonomio?* Mia jesa konvinko, okaze sen taŭga pruvo escepte de tiu historia, lasis en aero dubojn, por liberigi el kiuj necesus plia preparo en la preleganto kiel same en la aŭskultantaro. Estas tamen la racio kiu malkovras kaj juĝas okazinta, eventuale, la memrevelacion de Dio pri Dio, el kio poste la racio povas kaj rajtas ricevi kaj akcepti influon.

Por alia renkontiĝo oni ne firmigis min tra difinita temo. Tiuokaze mi ĝin

sonigis: *kristanismo antaŭ la ora regulo: 'Agu kun la aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi'.* Kvankam ĝi troviĝas en la Biblio (krom en aliaj religiaj tradicioj), eĉ en la Nova Testamento[4], ĝi ne enlistigeblas inter la karakterizaj moraleroj de kristanismo. Ties vera morala normo sonas: *amu kaj traktu la aliajn kiel Dio ilin traktas*. La ĝustagrado de la vera amo al la aliaj estas la konduto de Kristo, kiu amis kaj indulgis senkondiĉe. Kristanismo identiĝas kun Persono, adhero al Persono, konstruemo kun tiu Persono, kunagademo kun tiu Persono.

Estis puŝite ankaŭ tuŝi pli specifan demandon, nome antisemitismon. Iuj publikaj sintenoj, kaj eksterigoj de gejunuloj dum sportaj manifestacioj, timigis homojn pri renaskiĝo de tiu plago. Hazarde, mi pritraktis la temon en dumpromenada konversacio kun gejunuloj, ilin aŭskultante. Jen nia preterkura dialogo kiel resume ili poste priskribis en sia interna ĵurnalo kun la titolo:

Ĉu vere antisemitismo aŭ ĉu vere antihebreismo aŭ simple antiisraelismo?

*"Saluton, geliceanoj!... Denove kaj refoje vi refalas en antisemitismon kaj en...*

Ne miskomprenu nin, profesoro! Ni estas imunaj kontraŭ antisemitismo... eble eĉ hebreoj mem ne plu semitas, ni estas anticionistoj!...

*Tamen vi mokas holokaŭston kaj montras malsentemon...*

Ne! Ni ne mokas, ni estas mokataj! Cionistoj, kun siaj lokaj peristoj, provas igi nin eterne plorantaj pro holokaŭsto...

Kvazaŭ ne enscenejiĝis kaj ne enscenejiĝas nun similaj genocidoj, eĉ se ne procente aŭ nombre samgravaj. Ni volas pri ĉiuj plori: armenoj, kulakoj, antikvaj palestinanoj, kamboĝanoj, afrikanoj… La rusoj genociditaj dum la soveta revolucio havas patrojn kies nomojn oni hezitas prononci.

La juda ŝoaho estas vere apartaĵo en la senco ke ĝi trovas kulpulojn de kiuj daŭre peti monan reparacion dum la aliaj genocidoj trovas nek kulpulojn nek reparacion…

Dum ni ploras pro la ŝoaho, ili influas nian pensadon, kaj enŝtelas siajn ekonomiajn politikojn malfavorajn al ni...

Nin daŭre tenante en ploron, ne senkulpigitan, ili sukcese provas nin transigi en sian politik- ekonomi- soci-mueladon, laŭ skemoj, allogaj por ni, fruk-

[4] En la Nova Testamento la ora regulo: *agu kun aliuloj tiel kiel vi dezirus, ke aliaj agu kun vi,* troveblas ekzemple ĉe Mt 7, 12: "ĉion ajn do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili; ĉar tio estas la leĝo kaj la profetoj". Vidu ankaŭ "pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj". Por la Malnova Testamento, vidu Eliron kaj Readmonon. Kaj komparu kun tiu de Hilelo: "Kio ne estas agrabla al vi tion ne faru al alia, ceteraĵoj estas nur komentario. Ceteraĵoj estas komentario".

tivaj por ili. Tion denuncas hebreoj mem.

Per la holokaŭsto cionismo nin kolonias...

*Ĉu vi neflanke memoras la papan[5] eldiraĵon: "ni ĉiuj estas semitaj"?*

Ho, jes. Sed iuj sin sentas pli semitaj ol aliaj...

*Tio ĉio postulas pruvojn. Tamen nun min interesas viaj sentumoj kaj reagumoj. Mi ne kompetentas pri israela politiko kaj pri nunaj sintenoj de la diversaj interŝtataj judaj komunumoj: kristanismo ne kondamnas hebreismon, nur el ĝi distingiĝas... Bedaŭrinde sonorilo trudrompas kaj devigas vin reveni al la lecionoj. Saluton! Malgraŭ nenegleteblaj viaj distingoj, atentu ne fariĝi kliŝemaj kaj kliŝamaj!*

La lasta lerneja renkontiĝo enfokusiĝis al karakterizoj de la hodiaŭa junularo kompare kun tiu de la pasintaj generacioj. La precipa el tiuj karakterizoj estis teoriumita kiel emo sin allasi al ĝuado, al senpera kaj tuja posedo kaj ekspluato de ĉio, eĉ se tio kuntrenus postan damaĝon. Dionizeco, endioniziĝo kiun ne moderas limoj! Tamen emerĝas ankaŭ io propra en la nova junularo: tiu emo al ĝuado aglomeriĝas kun intensa sento de solidareco kaj partopreno, kiuj en la pasinteco malofte manifestiĝis aŭ eble etendiĝis malpli vaste. *Solidareco en tutmondiĝo*, kiu tamen ankoraŭ neklare komprenigas ĝis kia persona kosto ĝi disponeblas: foje ŝajnas, ke solidariĝo floras pli en la serĉado de kulpuloj aŭ en la haltado ĉe la kaŭzoj ol en senkondiĉa sindonado por la solvo de la problemoj.

La lernejo min plu invitis por reanimi la tradicion, kiun, ĝeneraldire, mi patronis longdaŭre, de la eksterlerneja lernado en apartaj vizitataj monumentoj lokaj aŭ foraj, iam objektoj kaj iloj de mia didaktiko. Mi ĉiĉeronis al mezlernejanoj ne preparitaj de mi penante obteni ilian interesiĝon dum profesoroj profitis por sin distri aliel. La lernejo jam kunpartigas tro malmulte kun mi! Min kaptis deziro elscenejiĝe malaperi definitive: emeritiga salto ekgravuriĝis tra apartiĝo kaj foriĝo kaj fremdiĝo.

Mia lasta sperto, pli volita ol sentita, venis el konvinko ke se mi, foje, semis ion aspekte senradikan, tio finfine malmultas se komparata kun la multo da validaĵoj kiuj nun ne povas ne kuŝi en la konscienco de milkvincent miaj lernintoj kvankam ĉiam *mutaciantaj*. Kaj al mi restas la konscienco, ke mi volis, eĉ penante, ĉiuforte plenumi mian devon.

[5] Temas pri papo Pio la 11a (1922-1939).

## Ĉapitro deksepa
# Ĝojoj kaj malĝojoj de la pensiula vivo

Kiel facile konjektite, kun la pensio kaj la ĉeso de devigaj okupiĝoj la tempo je propra dispono konsiderinde kreskis. De longa tempo sur la librobretoj kaj en la ĉioteneja, kiel mi difinis deponejo kun objektoj je nedifinita destino, skribotablo riproĉe setladis reeldonitaj libroj de mistikuloj kiel Johano de l' Kruco (La Supreniro al Karmela Monto; La Obskura Nokto de la Animo), de Sankta Tereza el Avila (La Libro de l' Vivo; La Interna Kastelo, kie la animo imagatas kiel interna kastelo aŭ multĉambra palaco), kaj de Majstro Ekarto. Jen, finfine, la momento frande kunestadi kun tiuj majstroverkaj ĝuindaĵoj kaj ekdissekci sub psikologia kaj psikanaliza lensoj tiujn literaturaĵojn por eventuale malkovri, kiel delonge hipotezite kaj dezirite, spurojn de *psikaj realaĵoj kaj meĥanismoj, foje nekonsciaj,* hodiaŭ enkonceptigitaj kaj ensciencigitaj, jam senvuale disvastigitaj de psikanalizoj, malgraŭ la pri ili interpretaj variantoj.

Sed antaŭ ol mi pene engaĝiĝu fikse rigardi sur aĵojn aŭ aferojn koncernantajn tiujn paĝojn, estu tute simple dirate ke al mi sparke afablis, kiel jam dezirite kaj proponite, io nova pri Dio: tiam mi ekkredis malkovri kaj senti, ke Dio kunloĝas en mi, la penso pri lia ekzisto feliĉe ŝanĝiĝis en la plenakcepton, ke li ekzistas kaj ĉeestas.

La tratagaj mediteroj fajrigis grandan ĝojon kaj alflorigis al Dio sur miaj lipoj preĝojn skanditajn pli spontane ol vole kiel: *"Vian kaŝejon mi jam ekscias. Vi ne plu kaŝiĝas al mi, vi ne plu povas forigi el ĉirkaŭaĵoj de mia eno. Vi estas tie, kaj tie ĉi, kaj en mi. Vi estas mia kunestadanto".* Dio fariĝis mia domano, mia trezoristo kaj trezoro, mia akompananto, mia gasto gastiganta. La konfidenco kun li min ekenvolvis kiel karesa venteto garantianta mian rajton tion pensi kaj fari je li. En miaj fantazio Dio disponebliĝis feliĉiganto kaj agento benanta homojn laŭ miaj deziroj: fakte konstanta, senkondiĉa benemo al ĉiuj akompanis min ĉiucirkonstance.

Estiĝis ke el mia plumo naive elirus, eble takseblaj senpoeziaj bagateloj, sed plenĝoje sentitaj, kvazaŭversoj per kiuj mi provis esprimi la gustumitecon de mia Dio en miaj pensoj kaj imagitaj dialogoj kun li eĉ dum malrapida vekiĝo:

Dum longa senĉesa vivvojaĝo,
en paŭza pensado,

subite malkovri,
kaj kun surprizo observi,
ke Vi estas ĉeporde atendanta
ke mi al vi ĝin malfermu.

*Aŭ*

Ĉi matene en la ripoziga silento
timide krevetas ĉie pluvgutoj
en vakuo nur ŝajne senemocia,
kiu senperturbe ekpleniĝas
je foraj bruoj kaj hejmaj zumoj.
Estas Vi frapetanta ĉe la pordo.

Ardas nevenkeblaj kaj nedifinaj
intermiksiĝoj de ag' kaj parol',
jam aŭdeblas antaŭmatena spiro
de tiuj kiuj ĝojigas mian vekiĝon.
Baldaŭ ĉio tumultos inter la homoj.
Ĉio signalas ke Vi trapasas mian sojlon.

Kaj nenio plu tedas mian koron
ne la nun' nek la pasint' nek la estont'
ĉar Vi estas tie kaj tie ĉi,
kaj se Vi kaŝiĝas de miaj okuloj
kaj de miaj manoj avide sataj,
mi scias kie kaj kiel Vin trovi.
Mi jam scias, ke vi ŝerce kaŝiĝas,
fakte vi ĉeestas kaj okulumas
tie kiel la birdoj inter la arbaj
folioj, sur kiuj mi Vin travidas
amuze kaj ame min alvokanta!
Mi scias kie kaj kiel Vin trovi.

Por mi plu funkciu viaj trompetoj!
Dolĉas trakurad' tra Viaj kaŝiĝoj.
Jen mi jam pretas tion diri al ĉiuj:
ke vi ŝajnigas, ĉie kaŝiĝas
por eksplodigi en homo la ĝojon
kiam li laca krias: jen Li ĉe mi.

*Aŭ*

Ĉimatene, tuj post la duondormo,
mi senvole komprenis
eĉ ekspertis, ke Vi ĉeestas!
Kaj eksentis ĝojojn, ke vi ekresaltu el la aĵoj.
*Mi ne strečis la manon por Vin tuŝi*
ĉar tio al mi eblas laŭvole.
*Mi al Vi ne parolis*
ĉar tio al mi eblas kiam mi volas.
*Mi vin ne salutis*
ĉar saluto fariĝas sebaldona.
Kaj nun Vi faru kion vi volas:
mi jam scias kiel kapti la apogilon
se niveldiferencoj ŝanceligas miajn paŝojn.

Kaŝiĝu kiom Vi volas:
mi scias, ke Vi estas tie, tie ĉi,
ĉirkaŭ mi, en mi!
Jen mi pordiĝas por via eniro en la mondon.
Lasu min krii:
mi vin kaptas, mi vin tenas!

Tia dolĉa spirita rifuĝo min akompanis eĉ dum gravaj taskoj, kvankam ke al mi ĉio ĉirkaŭe ridetis.

Okazis, ke oni min komisiis prelege komenti ion de la Sanktaj Skriboj.

”Aŭskultanto de via prelego riskas esti invadita de gratulopremo al vivo, al Dio, al la gepatroj, al ĉiuj homoj. Per viaj diroj oni sin sentas inundata de la Diaj rigardoj”, foje, postprelege, sonis reaga komento min ruĝiganta sed priskribanta la etoson kiun mi sencele ekscitis. Por bildigi la naturalizon de konceptoj konvenas ankaŭ ne kaŝi, ke mi neniel penis por ilin vortigi, eble pro iliaj ne malŝablona enhavo.

Ĉu mistika krizo, kun ne kontrolebla emfaziĝo, alinome malpersoniga elmemiĝo? Tiu ĉi dubo ekokulumis en mi. Sed miaj estis vere elanoj grundigitaj sur realo, la apudeco kaj ĉeesto de Dio. Je konfirmo de tio validu la fakto ke foje perdiĝis la kontakto kun Li kaj, Lin retrovinte, pene mi retrovis kontenton kaj ĝojon, kaj se mia ĝojostato konturiĝis eĉ travizaĝe, ĝi ne povis, almenaŭ eskape, aludi, se ne priskribi, la fontojn de tiu ĝojo: aludoj pli poste fariĝontaj pliaj enprofundiĝoj en verkojn de mistikuloj, kies pensoj kaj esprimoj ne ĉiam

prezenteblis senŝvite kompreneblaj.

Kutime la kontenton kaj ĝojon mi ekposedis el meditado, jam tro prokrastita, el certecoj vekiĝantaj kaj ekprodukantaj siajn konsekvencajn efikojn. La libroj de la mistikuloj, sur kiuj mi antaŭe nur libertempe krozis, kiaj majstro Eckhart kaj ankaŭ Katarina el Sieno (centritala urbo), kaj rezervitaj por pli bonportaj tempoj, kaj kun kiuj mi fine konatiĝis, ekscitis kaj samtempe gvidis tiajn korelanojn; Estis dum porokazaj rendevuoj kun amikoj, ke mi suspektis, ke je *mistika krizo* povus esti etikeditaj miaj jamaj sinteno kaj interesoj: el tiu suspekto naskiĝis esprimo pli akceptebla, kvankam ne tute vera kaj ne tute falsa: nome ke tiu mia religia sperto pliobjektive difineblus "religia fervoro aŭ renkontiĝo kaj plena mergiĝo aŭ kunlimiĝo kun la esenco de la religio".

Miaj okazaj interparolantoj pri tio, foje, supraĵe konfuzis religiecon kun bigoteco: dum la unua esprimas virton kaj do ne povas suferi je ekscesoj same kiel la sano (ĉu imageblas persono *tro sana?*), la dua reflektas religiemon eksterreligia kaj transreligia, tial kontraŭreligia ĉar limiĝas kun io blufa. Multe preĝi aŭ paroli pri Dio povas esti religieca aŭ bigoteca, ĉio dependas de la stilo kaj la celoj kaj konceptoj pri Dio kaj pri lia efekto en la mondo kaj lia imagita disponebleco al la homaj preĝadoj. Eventuale bigoteca povus esti la konvinko, ke tiu mia gustumado pri Dio esprimus la tutan religiecon eblan, ĉar, male, Dio ŝajnas foriĝi dum la suferstato kaj kora sensento, laŭ avertoj de mistikuloj kaj kiel spertos ankaŭ mi.

En tian mian fervoron aŭ dolĉan menslaboron pri Dio eĉ la kreaĵoj, la franciskanaj *kreitaĵoj,* laŭ la Kantiko de la Kreitaĵoj de la Asiza Sanktulo, enmiksiĝis per sia ampleksa beleco kaj harmonio. Eĉ naturo, kiu en la pasinto elstaris je miaj okuloj precipe per sia krueleco fagocitanta ĉion kion ĝi enekzistigas kvazaŭ ĝi estigu por havi kion forbalai en neniejon, nun akiras konsolitan aspekton. Ĉio ĉi naskis en mi senton kaj konduton en partopreno de komuneco de sensacioj kun ĉiuj kaj ĉiuj aĵoj dum la tempo ekdifiniĝis eterne senkomenciĝa kaj senfiniĝa.

Albina konsentadis sed samtempe prudentigadis tian ardon dirante, foje, ke mi tro kontentiĝe komisiiĝas speguli Dion kiel ombron de ĉiu persono!

Tia dolĉa fervoro, kiun mi iom superrigarde pritaksis enmemiĝo en Jesuon, iom post iom malintensiĝis kaj "malpufiĝis", kiel mi memdiris poste, lasante tamen pri ĝi daŭran dolĉan memoron. Eble necesus, ke tiaj novaj inklino kaj sperto estu flegataj per spiritgvidado; sed survenis aliaj novaj interesoj kiuj, kvankam el si mem ne tute disbranĉigantaj, tamen dislokis senloken, antaŭe momente kaj provizore poste preskaŭ definitive, tiun spiritualecstaton, el kiu plu restis

nur de tempo al tempo preskaŭ unuhora senmova starado solece kun la penso, ke Dio kunestadas kun mi, ene de mi kvankam ĉiam malsama ol mi; fine ankaŭ tiun horon ekbreĉis la postaj urĝaj farindaĵoj sorbantaj tempon kaj atenton...

Alia celo, kiel jam aludite, subintencite orbitas en tiu konzerno pri la mistikulaj verkoj. Plurfoje, en okazaj legaĵoj, mi kredis kapti konceptojn kaj situaciojn nun troveblajn gigantigitajn en pripsikanalizaj verkoj, kiel la malkovron de la nekonscio kia aktoro kaŝita en iuj homaj agoj kreditaj tute liberaj, la senton de kulpo, kiun mi ĉiam prizorgis distingi el konscio de kulpo kaj rimorso, la kolektivan subkonscion, la supozitan pruvon el neŭrobiologiaj sciencoj, ke la plena kompreneblo pri kio okazas ene de homo estas reale neebla, ktp. Mia revata tasko estu malkovri en mistikulaj verkoj palpilon kaj analizilon de la homa psiko je konfirmo kaj eventuala realĝustigo de psikaj meĥanismoj priskribitaj de la multaj psikanalizoj.

En tiu entrepreno ankaŭ familiaj kondiĉoj modlis al mi la laŭtaŭgan humuron; la preskaŭ senzorgita farta kaj ekonomia bonstato lasis min malŝarĝita je la penoj trovi rimedojn por havigi al mi tempon kaj financajn subtenojn por aliri bibliotekojn kaj aĉeti librojn kaj aboni revuojn, partopreni fakajn kongresojn foje kontribuante por ke kunvenu ankaŭ nepagipovuloj. “Homo perfekta!”, ĝentile ironiadis Albina.

El la pensoj de tiu feliĉa, sed ne definitiva, tempo registritaj en taglibro, jen iuj inke skribitaj.

La idealo kaj invito legebla en la fronto de la Delfa templo de dio Apolono, γνώθι σαυτόν, (ekkonu vin mem), kiu lasas subkomprenigi, ke homo tentiĝas rezigni la penon tion fari aŭ, ke tiu tasko strebas al tro arda, ricevas el kristanismo novan limfon: ĝi atribuas al la Sankta Spirito la taskon enlumi homon pri si mem, kvazaŭ tiu ĉi emus forviŝi sin el si mem: tendenco priskribita jam delonge de la humanismaj psikologiaj kolektaĵoj. Konfirme de tio, eĉ la mistikulo volis kaj serĉis spiritgvidanton kiel spegulon kiu reflektu lian internon dum la priasketismaj verkoj malkonsilas antaŭeniĝon en la kontemplan vivon sen psik- kaj spirit-sperta akompananto.

Se malfacilas koni sin mem, sammaniere, kaj eĉ pli, tio okazas rilate la alies konsciencon. Helpu la tradicia interpreto de la evangelia ordono “ne kondamnu” (Mt 7,1 kaj aliloke) proksimulojn ĉar, laŭ disvastigita interpreto, neniu kapablas eniri alies konsciencon.

Eta parentezo ne fuŝu la sinsekvojn de la rakonta procedo. Rilate la evange-

lian "ne juĝu kaj ne estu juĝata" nehazarde mi ĝin igis temo de prelego al eksaj kompanuloj de PAS subtenante tezon kiun mi kredis elĉerpebla aŭ deduktebla de verkoj kaj konduto de iuj mistikuloj: Jesuo ĵetas sian *ne juĝu* ne pro la malfacileco aŭ neebleco eniri la alies konsciencon kaj koni la respondecon de la juĝato (en tiu kazo Jesuo alproksimiĝus al eltrovoj de la modernaj psikologoj kaj estus reduktita al vilaĝosaĝulo, kaj povus similiĝi al la saĝuloj de Delfa templo!) sed pro alia motivo. Jesuo ne malhelpas la juĝon, eĉ tiu ĉi ne povas esti fortenata ĉar la homa racio ne povas rezigni kaj ne juĝi ĉion laŭ sia morala elaŭdita normaro, sed li ordonas: *post la pravigita malaproba juĝo, ne kondamnu, ne deziru la punon aŭ ne ĝuu pro la puno: male, deziru, ke la kulpulo revenu al Dio kaj havu de tiu ĉi la pardonon*.

La Jesua proverbo, fakte, reflektas la jurajn samtempajn morojn kie proceson oni enscenigis pli por kvantigi la punon ol por scii ĉu la akuzito estis leĝmalobeanto. Jen la iniciato de Jesuo: juĝu la pekulon (se vi havas sufiĉe da kapablo enpenetri la koncernatan konsciencon) kaj deziru kaj prizorgu, ke li konvertiĝu kaj estu pardonata!

Revenante al la malfacileco de memkompreno, preterpase diratu, ke aktivanto por klarvidi, ene de si mem, sian psik-spiritan internaĵon, povas ankaŭ eklezi la memestimitecon ĉe si kaj eksenti pri si eĉ hororon fronte al la dia lumo. Iuj el mistikuloj, fakte, ju pli sukcesis trapenetri sian enon des pli sentis impulson prohonte forfuĝigi siajn rigardojn el si kvazaŭ imitante, pro hororo, tiun kiu, laŭ ili, devus esti la sinteno de Dio rilate ilin. Ĉio ĉi pensigis, sub aliaj vortoj, pri la malkonscio kaj nekonscio ĵus malkovritaj aŭ pli evidentigitaj de la diversaj psikanalizoj kaj taksitaj kiel deponejo en kiu stagnus la plej egoismaj inklinoj kaj kaŝendaĵoj. Por ne subfali antaŭ tiaj sufokaj malbelaĵoj, en mistikuloj ne sufiĉis la simpla adaptiĝo kaj alkutimiĝo; krom per tiu sinakceptiĝo, ili disiriĝis el tiu hororo per sinmergiĝo en la diajn belojn, al kiuj ili emis altiriĝi kaj akceptiĝi ĉar je ties bildo, laŭ la biblio, estas knedita ankaŭ la homo. Funde temas pli pri tendencoj ol pri elektoj de la libera volo.

Pro tia intereso pri mistikulaj verkoj kaj nova pli intensa emo al la preĝo ne bedaŭrindis por Albina, konvinkita, ke la nova ŝatokupo malebligis al la nenifarada tempo invadi ŝian hejman sferon de domfarindaĵoj aŭ semi enuon trahejme. Por eviti tion, cetere, kaj precipe por socie kaj religie utili, ni ambaŭ elektis kontribui tempe kaj labore, kaj mone, en plurkampe volontulaj servoj, ŝi ĉe pormalavantaĝula vartejo de Cottolengo (Kotolengo) kiel instruistino de oligofrenezulinoj kie ŝi ĝermigis al si kvazaŭ novan familion rezervante, pluis mi amuziĝe kaj amuzige antaŭ geamikoj, iom da sia tempo por volontule agi

en la origina familio; mi krome dediĉis du tagojn semajne en profesia establo liveranta kulturajn deĵorojn, nome ĝisdatigantajn kursojn por instruistoj kaj profesoroj. Mia ĉefaĵo estis kontakti kaj engaĝi studulojn kaj fakistojn ĝisdatige lekciontajn; foje, por anstataŭi neantaŭviditajn neĉeestantojn, prelegis mi mem se la temo koncernis sciobjektojn de miaj studpasioj.

Marĝene de kelkaj fakulaĵoj, kiel cetere jam en amikaj rondetoj, foje ne estas rezignata plua eksplikо de miaj vidpunktoj pri interpretmaniero pri iuj poetoj kaj verkistoj, kiel Cesare Pavese kaj Umberto Saba kaj Eugenio Montale kaj Giuseppe Ungaretti kaj G. Bernard Shaw kaj Ernest Hemingway kaj la ĉiam fascina Leopardi, ktp. Tiu mia vidpunktaro ofte generis logikajn sekvojn ĉar la interparolantoj deziris pli precizajn, pri tiuj verkoj kaj aŭtoraj mond- kaj viv- kaj art-konceptaĵoj, analizojn.

Ĉu pli facilas esti vera poeto inter la ekzistencialaj duboj de nekredanto aŭ inter la sendubecoj de kredanto? Ĉu trovas pli da allogaj artismaj motivoj tiu kiu sentas sur sin la rigardon de Dio aŭ tiu kiu traserĉas en la universo de homo transcendan destinon?

Eĉ se mi havus ilian artismajn ecojn (estis mia batalkampo ĝuste tion ilustri kontraŭ ekskeptikismo pri religio), mi, kredanto, ne povus esti tiel poeta kiel la artistoj nekredantaj. Almenaŭ unuavide se iu mergiĝas kaj treniĝas tra la duboj aŭ tra la ekzistenciala soleco kun relativa suferostato aŭ defiostato ekprancanta kontraŭ Dio aŭ pri ties asertantoj, tiu ĉi spertas pli da prilaborebla argilo por sin movi kaj inspiriĝi kaj ensalti al poezikreado. Sed se tra tiuj duboj iu ne kirliĝus aŭ ilin jam dissolvus per rigoraj rezonadoj, kio okazas? Malestus certe ekzistenciala kaj mondkoncepta poezia fonto.

Kio okazas kiam iu konfidence konversacias kun Dio kaj kun li amikiĝas? Certe, kreiĝus la objekto de "senti poete" kaj poeto trovus novan inspiran fonton. Sed mi havas impreson, ke tia objekto kun sia eventuala nova inspira fonto surfaciĝus pli delikata, nome postulanta pli da precizeco, pli da kerneca difiniteco ol tiuj de la ekzistencialaj konsekvencoj de la nekredemo je Dio. Plie, kiel iu povus esti tragiksentema, koncedite, ke mem havas tian talenton, se lia animo ĝuas certecon kaj ŝlosilon por solvi ĉiuspecajn tragikajn malfacilaĵojn? Ĉu iu povas sin konsideri en tragika situacio se en sia intimo ne agitiĝas nesolveco de kontrastoj inter liaj aspiroj kaj la reala vivo? Nur unukaze mia religio, se preni el miaj spertoj, povas translimiĝi en tragikecon: nur kiam mi konsideras, en mi, la volon aŭ la eblon ribeli al Dio, ebleco reala kaj realiĝinta en la historio kaj en la laŭtaga vivo. Sed ankaŭ de tiu ĉi tragikeco oni povas eliri, finfine, sin allasante al Dio kun sincera koro: kaj do tuj ekĉesas tragike-

co kaj, do, ankaŭ tragidieco.

Eventuala poeziemo, tiukaze, certe enlirikigus aliajn objektojn kaj aliajn animstatojn, sed pli precizigpostulajn kaj pli reguligantajn pri imagivaj fantaziaĵoj kaj emociaĵoj. Entute, por kristano esti poeto, je egaleco de kondiĉoj talentaj kaj cirkonstancaj, signifas ne senti poete iujn situaciojn kaj samtempe vivi poete aliajn situaciojn pli delikatajn kaj respektpostulajn. Ĉu vi sukcesas imagi la nigran dolĉan tristecon kaj pesimismon, kiam li reale pesimismas, en iu Leopardi tute kristane pensanta kaj tia sinperceptanta eĉ en la poezikreaj momentoj?[1]

Justas tamen aldoni, ke ne malpluraj hezitis antaŭ mia vidpunkto.

Tiuj fervoraj engaĝiĝoj, kompreneble, ne kunpremas la familivivon, kiu jam gustumigas sian spacon ĉar ĝojstato reflektiĝas tra ĉiuj ĝiaj aspektoj. Ni, kaj foje ankaŭ Elvira, plezuriĝas dum gajaj vesperiĝoj komponi, tra eskcitiĝa bonhumuro, frazojn spritajn, kvazaŭ skeĉojn, vetante je la plej merita je... la familia aplaŭdo. Jen, se plu insisti enrigardi ordinaraĵojn, el mia taglibro, iuj el tiaj spicaĵoj elmontrantaj, pli ol distran spritecon, la eĉ eksteran ĝojon de la etosumantoj:

*Mi.* "Ĉu vi volas vidi, Albnjo, kion mi estis devigita aranĝi? Mi sonĝis, ke vi kuŝis morta, fiksita en nemoveco. Por ne malkombini vian aspekton mi ne kuraĝis vin apenaŭ tuŝi per la lasta supraĵa kiso. Por ne rezigni tiun plezuron kaj malembarasiĝi mi devis vin resurektigi".

*Albnjo.* "Se vi min ne damaĝas per mortigo, vi ne kontentigas vian malbremseblan bezonon de taŭmaturgeco. Kiel mi liberigos vin el la kaptiĝo en nigra komplekso deviganta transpasi ĉiun decan limon, kaj malpotencigos vian volon de supereco?".

Aŭ

*Albnjo al mi:* "Nur amo konsistigas kaj elstarigas en viro belon. Vi tro belas!".

*Elvira:* "Oj, oj! Vi ambaŭ ankoraŭ enamiĝantas!".

Aŭ

*Elvira.* "Mi malfrue konis gepatrojn sed plibonus se ilin mi ne ekkonis!".

"Kial?".

"Ĉar mi nun rimorsas pro tro malfrua agnosko pri ilia sindediĉo unu al la

[1] Tamen Eŭgeno Montale ŝajnas pensi nesammaniere: "Si vi vin taksas kiel Dion vi ne povas esti poeto. Se vi konvinkitas posedi la la Eston, la poezio ne povas por vi utili, nek vi al ĝi povas utili ". (A. Marchese. Montale, la ricerca dell'altro"

alia”.

Aŭ
*Mi:* “Mi nemulte estimas miajn estimantojn”.
“Kial?”.
“Ĉar mi konas sperte mian aĉecon”.

Aŭ
*Elvira:* “Vi kaŝas aŭ perdas ion ĉiutage”.
“Kial?”.
“Ĉar plibonigi sian porpublikan eksteraĵon signifas provon kaŝi aŭ forigi ion nure propran”.

Aŭ
*Mi.* “Ĉio ĝojas escepte de vi!”.
”Kial?”.
“Ĉar vi ambaŭ laciĝas por ĝojigi min”.

Aŭ
*Mi.* “Mi estas devigata, spite al mi, estimi min kaj min pliagrablige ekzalti”.
Kial?
“Por igi min, de vi tiom admiratan kaj ĉioŝatatan, inteligenta kaj virta kaj inda je vi kaj por ne igi vin trompataj”.

Aŭ
*Albina:* “Mi ne plu rezistas!”.
“Je kio kaj pro kio vi ne rezistas?”.
“Ni ne trovas sufiĉe da tempo por konsumi kun vi unu ĝojon ke jam ofertiĝas vorenda alia”.

Aŭ
*Mi:* “Kiom ajn frandindaj viaj pladoj, mi ilin ne sukcesas gustumi”.
“Kial?”.
“Ĉar dum gustumado de unu frandaĵo anonciĝas nova pli altira plado”.

Aŭ
*Elvira:* “Foje, de tempo al tempo, okazas miraklo”.
“Kia miraklo?”.
“Ke vi foje rezonas nuance, eksterimpone, esplorante. Kutime vi, male,

montriĝas homo sennuanca anstataŭ homo nuancstreba”.

Kaj sprite kaj distriĝe antaŭen laŭ vesperhoroj por skeĉe adapti niajn pensojn kaj sentojn ĝis unu aspektis al la alia tro streĉiĝanta.
Kaj se tio humuras pli intence ol vere, direndus ke tiu observo ne estas tiom vera kiom estis vera nia vivĝojo!

Preterpase diratu, ke la timo de Albina pri mia eventuala sento de finiĝo kun invada transiro sur ŝiajn hejmestrecajn ekskluzivajn kampojn, apogiĝis sur ŝia neniam tute venkata suspekto, ke la instruado estis ankaŭ ektransformiĝanta por mi en iun leĝan, kaj ne tute regatan, manieron vibrigi la volon de povo: eble pli tento ol pekfalo, aŭ konstanta risko al maskita kaj ŝvelparola allogemo, ne sufiĉe lerte kontrastata laŭ ŝi.
*“Duminstruade vi senelspeze rolas imperiestron, ŝvebigante super kelkaj vian superecon inteligentan kaj kulturan kaj... regvolan. Super kiuj, finfine? Sur akceptemaj adoleskantoj. Kiu scias ĉu vi nekonscie restarigas vian pasintan imperion?... kie tamen mankis la moderiga reĝino... serĉinda aliloke!”.*
Kaj la reĝino estis ŝi!
Laŭ ŝi, tiu mia nevirta emo ĉion majstri, moderige kontrolita sed neniam malfajrigita, estus frukto de la klerika edukiteco kaj de la pasinta pastorala agado, en kiu pastro okupas ĉiam la unuan postenon kaj deklamas la definitivan sentencan verdikton. Tiu emo jam fariĝus en mi karaktera, ŝi diradis tra vero kaj amuzo, tial senutilus batali kontraŭ ĝi! En malpli distriĝaj momentoj ŝi deklaris, ke en la rilato inter klerika edukiteco kaj karaktero misdistingiĝas kio estas la kaŭzo kaj kio la sekvo, malgraŭ ke tia eduksistemo mem celas trejni precipe al kontrolo pri superrego de sia naturaj tendencoj. *“Iuj viaj... ŝajne senfilistrecaj... virtoj estas postidoj ankaŭ de tiu edukiĝo!“.* Ŝajne senfilistrecaj por ŝi signifis “nur aspekte sencelaj kaj senmemkontentiĝaj”.
Ŝi konsentis plenkore kiam sciis, ke mi ekpensas rakonti, por eble helpi implikiĝintojn en similajn malfacilaĵojn kaj aventurojn, ekinte el amuzaj familia leksikonaĵo kaj kuriozaĵoj de miaj spertoj, miajn kaj ŝiajn travivaĵojn, kaj, ke la rakonto estas jam prenanta romanformon en la esperanta lingvo ĉe nia amiko de la supra etaĝo. Sed, ne nur ŝerce ŝi mentoris: *“Ne ĉifu niajn sentojn por paradkampigi mian kaj vian nomojn!…Nu vi povas pranci… esperante”.* “Pranci” ĉar ŝi ŝerce referencas ion pri mi de la konventaj tempoj kiam tedegitaj fratuloj min difinis “eterne prancanta”.
Kaj la timata, plibone eble opiniata, okupo de ŝiaj spacoj okazis nur, fakte, kiel interdivido de malpli malpenigaj faraĵoj.

Bonas ĝui estimon ĉe konatoj kaj najbaroj, kvankam, foje, tio rabas tempon kaj kuntrenas, alikaze, ekscesajn kaj, foje, strangajn konfidencojn. Jen unu el tiuj kaŭzita de mia najbarulo.

Mi renkontis lin sur la trotuaro, proksime de nia komuna domego kiam ekmalheliĝis kaj la publikaj elektraj lampoj komencis brili. Kiel kutime, la cigaredo en la lia buŝo iom pendis je la maldekstra flanko. Saluton rapidan miaflanke, sed li montris deziron konversacii: li, fakte, respondis al mia saluto iom senhaste kvazaŭ tempumante por serĉi la ĝustajn hokecajn vortojn.

Kvindekjara fraŭlo, alta kaj bele prosperaspekta kaj senĝene reganta pri ĉio lin koncernanta, ĉiam aspekte ĝentile rafinita, kutime malmultparola kun rideto de stabila memfido; oni cirkuligis pri li, ke li, kvankam sola, efektive ligiĝas al granda kaj fidela amo. Vera interŝanĝo de opinioj, inter mi kaj li, okazis nur hazarde, kutime en grupaj personoj. Tiam okaza, kvankam nekutima, malavara afableco konfidigis lin paroli pri si: li amas la multrilatan vivon sed emas ne sin ligi definitive al iu ajn, li vivas plenakceptiĝe sola, kaj *"ĉar la vivo preterpasas fluge, ni kaptu el ĉiuflanko kaj senskrupule la forglitemajn plezurerojn*"; li sin liberigis el ĉiu premo de *"alienaciigaj pensoj aŭ realaĵoj abstraktaj transcendaj aŭ transtombaj definitive kaj pruve senvalorigitaj de liberpensulo".* Pri tiuj lastaj aferoj, se li ne sin detenis esprimi sian opinion tio okazis nur pro mia ne hazarda, sed serĉata, enŝteliĝo en aferojn kutime ne priparolendajn en komunaj konversacioj. Kun mi, fakte, kvazaŭ pro konvencia rokdento, liaj okazaj salutaj esprimoj ofte entenis ion aludantan al tiuj flugaj konversacioj pri postvivaj personaj eblaj eventoj.

Kvazaŭ retenata de lia enviebla fizika figuro kaj eĉ pli multe de lia elmontro de sentimeco, mi ne havis ĉiam la forton aŭ kuraĝon por montri, ke mi ne havas la samajn pensojn. Foje, en la grupa brurido, mia silento, estinganta pormomente miajn admirajn konsentojn al liaj spritaj vervaĵoj, kaj senkonsenta kaj senaplaŭda, altiris liajn okulojn prefere en la direkton de mi; tiam li sin sentis devigata ripeti kelkajn, kvazaŭ por igi ilin pli efikaj, siajn brilvortojn de ironia skeptikulo. Fakte, lastfoje, fikse min rigardante, li pliigis la energion reasertantan la ĵus aplombe deklaritajn konceptojn, nemalsimilajn al tiuj de lia famo, laŭ kiu, krom konsenton al la materialismaj vivstiloj de nuntempuloj, li aperte konfesas la materiisman pensfluon.

Hodiaŭ lia responda saluto, malfruigita de hezita momento sed intense komunikiĝa, pelas min elbuŝigi, kiel mia kutimo, ion neatenditan, devigantan la interparolanton iom heziti por trovi respondon. Miaj salutaj ekscentraĵoj konsistas el jeno: mi ellipigas la unuan vorton hazarde dancantan sur miaj lipoj

kaj tuj poste profitas ĉiujn miajn intelektajn fortojn por ekkonversacii kohere kun tiu unua esprimo. Kutime la penso rezultanta ekstartas konversacion ne tute malŝatindan kaj, foje, malfermantan intimajn konfidencojn. Tiu ĉi fojon mi elĵetas: *"Plurfoje la aferoj grundiĝas kaprice. Ĉu vi nun sukcesas rege mastrumi la viajn?"*.

Eble estis tia la etoso dezirita de la homo, kiu, malproksimigante sin kaj, per maninvito, min de fremdaj oreloj, kaj paŝante en la direkto de la eta ĝardeno, iom singardeme montras, ke li havas ion dirindan al mi kiu, laŭ lia ŝajntimida esprimo, jam kutimas kunvivi kaj agiti, ene kaj malene, *"delikatajn kaj intimajn aferojn, nun ronĝetantajn ene de mi. Eble, ne komplikaj aferoj,* li aldonas demandante, sed nur pro afableco, ĉu mi malfruiĝu kaj pacienciĝu por lin aŭskulti, kaj montrante estimon al miaj, laŭ li, seriozeco kaj engaĝiĝo de homo en intensa esplorado pri nebagatelaj aferoj kaj *"ekster splenemo kaj kapricemo"*. Tion dirante, li ŝajnas akuŝigi la vortojn el sia konvinkostato ekskludanta emfazon aŭ ĝentilan flatemon. Kaj mi ne povis ne rimarki ke el liaj vizaĝaj movoj ne plu aperas tiu io ŝanceliĝanta inter kaŝiĝanta kaj malkaŝiĝanta.

Babilas la homo preskaŭ mediteme, fakte nun mi ne vidas en li la memfierecon kaj aplombecon kiujn mi iam preskaŭ enviis. La vortoj, kvankam iom emocie eldirataj, malrapide ellipiĝas kvazaŭ venantaj de profunda rezonado, el si mem ne suferantaj tamen je pedanteco. La cigaredo malaperas el lia buŝangulo dum mi montras akcepti kaj aprezi liajn konfidencojn.

*"Mi tute eleraris..."*, li malrapide sed seke elgorĝigas, kaj antaŭ ol mi provas malpliigi la vastecon kaj krudecon de lia esprimo, li ekrakontas tion kio al li okazis la pasintan nokton kaj tiun ĉi matenon, eĉ laŭ la tuta tago. *"Tago de malpraviĝoj"*. Jen, kondensita, lia rakontaĵo.

Ankaŭ la pasintan nokton li penis ekdormi, same kiel al li okazas de kelka tempo. La plej eta bruo lin vekas kaj igas tiom vigla ke ĉiu bezono dormi kaj ripozi estas forigata laŭlongatempe: la menstorporaj postsekvoj tamen lin suferigas la tutan sekvan tagon. Tiun ĉi nokton, krome, bruo pli ruinige forigis la dormon ĉar en lia animo la komenca malkvietiĝo sin transformis en koleron, kaj la kolero en deziron de senindulga protesto kaj venĝo kontraŭ la maloportunantoj: la distaŭzado de la pensoj eĉ malebligis, ke li koncentriĝu, almenaŭ surface, kaj rifuĝu en la ĉiam absorbantan legadon de ĉiam apudmanaj libroj aŭ ĵurnaloj.

La bruo, ne intensa, estis kadenca kvazaŭ iu promenus kun paŝo malrapida neniam perdante la ritmon. Ĝi faladis kiel inkubo el la supra etaĝo. Jam dum

la hieraŭa tago percepteblis movoj kaj voĉoj kvazaŭ de personoj troagititaj; jam en la pasinto el tiu loko aŭdiĝis infanploroj, sed nur laŭmomente, kaj ofte sekvitaj de abruptaj silentoj de la loĝejanoj, nun male ne temas pri infanploro aŭ voĉbruoj sed pri io kio pikas la kapon, kapo jam torporigita pro la maldormo de la antaŭa nokto. Je la unua tagiĝa lumo, balanciĝante el hezitoj al impetaj aŭdaciĝoj, je la koleroklimakso, li elsaltas el la lito, enpiĵame supreniras al la supra etaĝo, sonorigas kaj malpacience frapas mane kaj voĉe, preta fulme vipi per malĝentilaj kaj per tro retenataj koleraj vortoj. El interno, paŝo alproksimiĝas al la pordo, la pordo malhaste malfermiĝas kaj prezentiĝas la apenaŭ konata viro: vizaĝo malbeligita kaj lipoj iom pene retenantaj spirĝemojn, kaj trabrake infanforma envolvaĵo milde kunpremata al lia brusto: estis la bebeto mortinta, la malfruan antaŭan vesperon. La patro la tutan nokton paŝadis laŭ la loĝejo en la iluzio redoni ion da vivo al la infano lule portata trabrake!

*"Pri ĉio tio informas la gepatroj dankaj pri mia partoprena vizito!"*

Tre malmultaj vortoj, tre intensaj rigardoj, partopreno senrezerva, abrupta animkvietiĝo... La koleriĝinto revenis konfuzita al sia ĉambro. Nun ne plu la kolero forigis la dormon sed io rimorsa kaj humiliga. La dormo ne venis, en la somnolo, male, vekiĝis pensoj ie, en la animo, kuŝantaj: senaverte tiaj pensoj klariĝis akirigante pacigan kaj konsolan aspekton.

Neantaŭvidite kvietigita - li samtempe kategorieca kaj mole afabla plu rakontas promenante laŭĝardene, iom kliniĝanta al mia vizaĝo - kaj komplete fordonita al plihomamaj sentoj, la maldormanto decidis konsenti al sia duonkaŝita deziro kiu de tempo al tempo riproĉetis lian konsciencon: iri, almenaŭ unu fojon post pluraj jaroj, viziti la korprestaĵojn de siaj gepatroj. La cirkonstanco de abrupta sed sereniga senarmiĝo de lia furioza impeteco, antaŭ tiu patro lulanta la fileton mortintan, vekis, kun dolĉeco tamen, iun specon de riproĉo. De tempo al tempo reprezentiĝis al lia memoro iuj suferoj, kiujn li iam kaŭzis al la gepatroj per sia junula ribela konduto kaj per malestimaj vortoj: al li ŝajnis, ke sur iliaj imagitaj vizaĝoj plu kuŝas tiu bedaŭranta silento de seniluzio kiun lia konduto enfiksis en ilin. Vere estis io pli ol vizaĝo de ĉagreniĝo, ankaŭ la ploro de lia patrino ŝajnis resoni en liaj oreloj.

Trapenetrita de tiaj sentoj ĝuste ĉi matene, li, sidiĝinte en sia sporta aŭto, ekstiris kun la sinteno de tiu kiu pretas esti tolera kaj respektema kaj komprenema ĉar jam ne rajtas esti alimaniera la konduto: *"al kiu,* li miris inter si, *ŝuldi, ke mi ne ĉiam tiel pensis?".* Li rapidiĝis al la tombejo kaj gapis mute, kvazaŭ provante trovi la ĝustajn sentojn el la kirliĝo de tiuj kiuj restis en lia animo ankoraŭ senesprimaj, antaŭ la korprestaĵoj de siaj forgesitaj karuloj;

metis delikate, preskaŭ timante invadi propraĵojn jam al li iom fremdajn, la manojn sur la tomboŝtono kaj la fingrojn sur la ĉizelitaj polvokovritaj nomaj literoj; kaj, preskaŭ aŭtomate sed senĝene, li rekomencis surfacigi al si, por ilin traplugi kaj reanalizi, la cirkonstancojn de la maldelikatecoj suferigitaj al la gepatroj per siaj ribelaĵoj kaj insultoj.

Nun al mi li rivelas, kun la hezitoj de iu kiu miras pro tio kion estas faranta, ke mem ne plu sukcesas kovri siajn intimajn pensojn, ke la memoroj pri tiuj malafablaĵoj kaj ofendoj kaj defioj, de kelka tempo impete reflosas al lia konscio transformiĝantaj ĉiam pli en kulposenton kaj rimorson, kaj ke kiam li retrakuras la idajn farojn, kun la espero malkovri mildigojn ĉu rilate sian kulpon kaj precipe ĉu rilate la gepatrajn suferojn, ĉiam finiĝas per restado en la sama riproĉanta stato. Li pretus elspezi multe por ke la realo vere estu refarita malsama kaj kontraŭa. Li ne emas forgesi, ho ne! Prefere li volus trovi la vojon por tion forviŝi, se eblus, el la ekzisto mem. Dum li disetendas la intimajn kaŝitaĵojn de sia spirito, al mi ŝajnas, ke la kompleksеco de homa psiko sorĉe fariĝas simpla kaj facile introspektebla.

Eĉ antaŭ iliaj cindroj, li baraktis por igi sciaj la gepatrojn pri sia intima aliiĝo ĉar li nun havas pensojn novajn kaj kontraŭajn al la tiamaj, ĉar li fine komprenas ilian amon, ilian sindediĉon. Kaj senesprime, sente sciis, ke tiaj novaj juĝoj, pri la aĉaj okazintaĵoj, en li ne plu ŝanĝiĝos. En la interna agitiĝo por ilin certigi pri tiaĵoj, li ekperceptis, ke li mem estas deziranta ke ebliĝu transvivo kaj ke li mem estas eĉ ĝin postulanta kaj imaganta. La apenaŭa percepto, ke se la gepatroj ne daŭrigus pluekzisti nun ili nenion suferus kaj do ankaŭ la rememoro pri la malfeliĉoj truditaj de ilia filo ne kapablus revivigi suferon al kiu ajn, ĉio tio lin ne kontentigis, male lin tedis, kaj instinkte li ĝin repuŝis kvazaŭ perdon de io valora kaj tute propra ĉar nun al li ŝajnis, ke la transvivo estus necesa por igi vere riparantaj la riparajn gestojn kaj la pardonpetojn kun la pardondono, kaj eblaj la renoviĝon kun spiritrefariĝo. Kaj al la reala konsisto de la homa ekzisto plej konvenas, ke transvivo vere estiĝu kaj manifestiĝu; se ĉio dependus de li, li tiusence disponintus la aferojn. *Kaj se la aferoj ne tiel disvolviĝas, signifas, ke io logika mankas kaj ke daŭrigas okazi ofendoj al la homa digno,* li kun retenema emfazo konkludas.

Kaj pluse, li ripetas plurfoje la saman koncepton, kvazaŭ allogata de senvualiga slogano. En lin, foje pli ateismeman, foje pli indiferenteman pri supera estaĵo, ĉiukaze ĉiam agacanta, de kelke da tempo enŝteliĝis, ke estus juste, ke ĝi ekzistu por ke estiĝu la pardonpeto kun pardoniĝo kaj la rekonstruo de la vero kaj la interkomunikado kun tiu parto el li kiu jam estas transe.

Krome la deziro, ke tiu estaĵo ĉeestu, tiam, antaŭ la gepatraj korprestaĵoj, en li kolizie kunloĝis kun ekkolero kontraŭ iu inkognito kiu permesus al si sin konigi ekzistanta kaj neekzistanta aŭ ĉeesta kaj malĉeesta, tiel ke malfortiĝas la helpo por ke la konsola renkontiĝo kun la ofenditaj karuloj okazu almenaŭ je la sama spirita intenso laŭ kiu ĝi estis ĝuita kaj suferita en tiu ĉi vivo. Emo kaj desaponto al sama ebla estaĵo glitiĝis unu sur la alian kaj kuŝis kune, sed li ne eĉ ĝeniĝis pro la pikilo de la kontraŭdiro samtempe evidentiĝanta, male li lule plezuriĝis en la nova animstato kaj sentis vagan altiron al preĝo; kaj eble preĝis, aŭ deziris, ke ie, plejbele ĉi-tie, elstariĝu kaj imponu iu preĝebla. Abrupte tia animstato ŝajnis al li pruvo de la okazanta repaciĝo kun la gepatroj, kiuj nenion pli povis deziri ol sciiĝi, kaj gaji, pri tiu elŝanĝo en la menso de ilia filo.

Senpripense, ĉe la tombo li denove reordigis la florojn ĵus tiucele aĉetitaj, kaj ekpaŝis serene kaj sensufere kvazaŭ li efektive estus kontaktinta kaj klariginta kaj kontentige espriminta la novajn sentojn, kaj estus komprenita kaj indulgita kaj certigita, ke kun ili ĉio estas renovigita kaj similigita al la infaneca senkontrasta kaj plenfidema tempo. Laŭmomente al li ekmagiiĝis al belo esti atendata de ili por reciproka totala kompreniĝo kaj amo fine senrezerva.

Laŭ la revenvojo en lia animo daŭrigis sinsekvi, milde kaj glatiĝe, la samaj sentoj, eĉ, plezuriĝante pri ili, li emis treniĝi en ili kaj ilin senteble reviziti kaj reanalizi kaj rerakonti al si. Li eĉ dubis pri la fundateco de sia agnostikismo.

*"Ĉu mi estas agnostika pro manko de klaraj signoj rajtigantaj la dikredon aŭ pro miaj parado kaj komforto esti agnostika?*

*"Ĉu kontentiĝa elekto mia aŭ konkludo de logika kaj senemocia rezonado?... Mi devas tion analizi kviete kaj sentrompiĝe".*

Malhaste ni alproksimiĝas al lia aŭto, kiun li estis parkanta flanke de la eta ĝardeno ĉirkaŭanta nian ducenttridekloĝejan kunposedaĵon, kiam li min vidis kaj aŭdis mian nekutiman saluton kaj lasis eliri el siaj lipoj reagon serĉantan konversacion. Konversacio kiu ekis per la responda esprimo, kiu, eble por reesplori kaj plicertiĝi, en propra eno kaj fiksi definitive la nerifuzindajn malpraviĝojn de tiu ĉi tago, milde trudiĝis al li min ekvidanta: *"mi tute eleraris!"*.

Li, fine, kunpremis mian manon pardonpetante kaj, eble, mirigita pro la konfido kaj pli multe pro siaj novaj pensoj. Liaj lastaj vortoj monologis: *"Mi nun bezonas kondukilon. Ĉu vi..."*

Tamen inter tiuj bonetosoj kaj animekzaltiĝoj, se plu resti en la familiaj kaj eksterhejmaj rilatoj, ne ĉio dancis survelure. Inter la preskaŭ dumilo da lernantoj pasintaj sub miaj instruistaj okuloj kaj tra mia lerneja registro, kaj kiujn mi certe influis, multaj jam eniris la vivon, profesiiste aŭ manlaboriste. Movi-

ĝante tra la urbo kaj promenante trastrate aŭ en urbaj busoj, ofte mi estis frapata de tujaj salutoj kaj sinprezentadoj, ĉiam plaĉaj kaj ĝueblaj, de gejunuloj, kiujn mi rare unuavide rekonas sed ĉiam trovas ekvekiĝantaj el la memoraj anguloj.

Plifacilas rekoni la alportintojn de missorto aŭ kaŭzintojn de sufero, bubojn kaj defiintojn de la lerneja disciplino. En la unuaj tempoj de profesorado mi devis alfronti adoleskanton riproĉeblan pro anarĥiemo kaj defio al mi ĝis plurfoje sputi sur mian vizaĝon: ju pli abundis mia afableco al li des pli gaskonis lia absoluta kontraŭdisciplina memdispono kun insultoj, kiujn liaj kunuloj akceptis kaj admiris nur kiel amuzajn strangaĵojn kaj originalaĵojn. Por eviti esti taksata instruisto-edukanto malkapabla ĉe la profesoraro ankoraŭ ne fidoinklina je mi, tiom pli, ke tiu lernanto ĝuis tre konfidencajn rilatojn kun kelkaj el ili, mi senprudente ne raportis pri la afero en la monata konsilio. Miaj edukistaj dotoj suferis, ĉe mi kaj eble ĉe la lernantaro, malpliiĝon de konsidero, apenaŭ evitante protokolajn mallaŭdojn dum pedagogiaj konsiliĝoj. Nun, en mia ĝuebla pensiulstato, alvenas la nova, ke ĝuste tiu junulo pereis en aŭta akcidento, speciala akcidento: post pafado kontraŭ postkurantaj policanoj, li perdis stirkontrolon kaj finiĝis kun aŭtomobilo kontraŭ fatala arbo. Postfunebre, liaj ekskunuloj kaj miaj ekslernantoj memorigis, kompateme kaj jam senadmire, la *bubaĵojn, foje aplaŭditajn de la klaso,* kiuj poste, eĉ dum univeristato, fariĝis malsocialaĵoj kaj krimoj.

Ĉiam penige al mi riceviĝis la devo pardoni tiun homon, kies nomo jam levis en mi tujan deziron ĝin forgesi. Nun la kompato miksiĝas kun sentoj de revanĉo dum la pardondevo, se mi ne tuj ne hororas, kun eksentoj de nemalplaĉo pro lia mizera sorto. Kia hororo, en posta memekzameno, sufere peni por detrui ne suspektitan venĝemon kiun mi kredis por ĉiam malaperinta. La plena konsonanco kun kristanismo grincas por senŝanceliĝe harmonii kun mia animo. Bonŝance ĝuste tiu vola - kaj, do, nespontana - konsonanco estas la esenco kaj dignofonto mem de la kristana morala konduto.

Ankaŭ drogo kontribuis per siaj humiligataj viktimoj krizigi mian juĝo-bilancon pri mia pasinta edukada influo. Verŝajne kelkajn gejunulojn, iam miajn lernantojn, mi sukcesis malproksimigi el ekuzo de malutilaj drogoj kvankam svarmis propagando favoranta leĝproponon pri la libera merkato de drogoj. Verŝajne, ĉar la postlernejaj kontaktoj kun ili estis nur iom pli ol okazaj. Almenaŭ du fojojn mi perdis la partion, en rekta lukto kun ilia sindetruo, kun narkotaĵemuloj. Pri la unua, kiu estis trovita, jam kadavra, en aŭtomobilo kun la drogi-njektilo en braka vejno; pri la dua drogkonsumisto, krom pli ol okaza drogŝa-

krista, kiun mi plurfoje vizitis ĉe hospitalo por infektitoj kie li larve pasigadis siajn lastajn tagojn de aidosulo postvivanta. Finfine li faris je mi sian unikan helpanton sur kies manojn ŝprucigis larmojn.

Preskaŭ najbaranta kun mia domo funkcias kooperativo por la rekupero de drogodependuloj sentoksiĝantaj, kiuj foje vidiĝas laŭstrate porkomisie aŭ porpruve de korekta sinregado inter la toksikdrogŝakrantoj. Kia surprizo esti salutata de mia jama lernanto el grupeto de tri-kvar gejunuloj ĉe la sojlo de tiu strukturo.

Pere de li, jam liberiĝinta je la *simio* kaj nun dungite okupita en la strukturo kiel kondukanto de eta komunumo de provantoj libervole sin liberigi el la detrua sklaveco, mi ekiris volontule deĵori flanke de oficialaj stabilaj psik-profesiuloj. Kaj tiel instaliĝis en mia animo alia fonto de ĝojo kaj tristo: restado inter tiaj gastoj, gejunuloj kaj foje pli ol kvardekjaruloj, el kiuj iuj rezistantaj por venki definitive, aliaj, post refalo en droguzado, rekuperrekomencantoj aŭ malaperontoj en obskura destino!

Se prikonsideri profunde, tiuj doloroj devus fali, sur edukanton, kiel la plej korelŝiraj de la tuta vivo, necesigantaj pridemandi ĉu la kaŭzo originas el edukaj eraroj aŭ nur el la libera decido de misfortuloj kaj ĉu eblas krei helpajn rimedojn. Puŝite de tiuj urĝoj mi provis, kvankam kun modesta sukceso, elirigi iujn samdevenajn pensiulojn el la “sankta principo de senengaĝiteco” kaj engaĝigi en tia volontula asistado: nur tri homoj akceptis mian instigon kaj nun volontule kunlaboras laŭ sia profesia kompetento.

Se retrovagige pliatente diagnozi miajn lernantojn, *falintajn*, en ilia pasinta konduto mi nenian specialan “averton” en ili memoras krom, eble, nur iun emon esti je ĉiu prezo diversa por konsideriĝi supera eĉ, foje, en la respektemo al la komunaj disciplinaj normoj. Eble vere vagas en la homa animo deziro suvereni, havi admirantajn subulojn, unuauli, spasmi trans la komunaj moralaj sentoj; la tempokuro remodlas la objektozonon, ne la profundan aspiron se ne intervenas la libera volo por ĝin orientigi alidirekten. Sed verŝajne tiuj miaj ekdiagnozoj surmetiĝe limas apriorismojn, laŭnaturajn en iu kiu volus ĉion kompreni kiel mi.

Rilate mian konceptan kontribuon al la analizo de la fenomeno “drogo”, iam mi ekscitis reagojn ne tute koherigeblajn kun la lernejaj edukadprincipoj. Mia kritika tezo: Inundi gejunulojn per: *“Atentu, drogo malkombinas tutan vian vivon!”,* tro redukte efikas, ĉar impresas provo encerbigi psikan ekvilibron, moderiĝon de la aspiroj al la realo, kvazaŭ la vivideal o plej valora estus trankvila ekzistado akirita per la ĝusta adapto de la aspiroj al la realo. Fakte, ĝene-

rale junularo aspiras plien, heroldiĝi limrompante, defii la realon, iri trans kaj malgraŭ la normoj... Estas bezonataj aliaj idealoj. Se ni el tiuj ne proponas kaj pruve montras pravigitan per la vero, la partio estas perdita! Por akcepti la limojn de vivo necesas idealo pli alta ol la vivo mem: ĉu tio ekzistas? Similaj demandoj, kun didaktikaj ilustraĵoj, lasis pensemaj gejunulojn, parte ne kontentaj iujn edukantojn ĉar, laŭ ili, pli modestaj kaj *malfanfaronemaj* idealoj pli bone efikus. Tiu sugesto kostis, kiel jam vidite, ekkonfliktojn kun la lernejaj respondeculoj.

Jen alia grava, certe ne la plej grava el tiuj elreviĝoj: mi ekkonstatis kun surprizo, ke mia filino komencis facile preterlasi seninvite doni la bonnoktan kison limiĝante al saluto, kora jes sed senigita je koraj elmontroj. Albina interpretis, ke tiu sinteno estas signo de maturiĝo kaj sendependeco: *"ŝi jam universitatas kaj jam fianĉinas kaj ŝiaj amesprimoj estas alidirekte: ni ne kontraŭstaru ŝian sentuman aŭtonomiiĝon eĉ je nivelo de esprimoj... Eĉ vi povas tiel ĉesi el viaj maloportunaj refritaĵoj de rekomendoj*". La finajn vortojn ŝi akompanis per tia rideto ke mi rezignis respondi, ke eĉ tio estas refritaĵo. Mi devas konfesi, ke mi penis superi frustraciantan senton de perdo kvankam sukcesante akcepti la situacion ĉar la familiecaj amligoj feliĉe plu viglis, evidente.

Intertempe, kaj pli serioze, min ekperturbis, ke la filino foje ekeksterigis signojn de abrupta paleco kun ŝajne senkaŭza preskaŭ kompleta fortodifektiĝo ĉe brakaj kaj kruraj muskoloj pri kio kuracistoj unuanime certigis, ke senplue tio enkadriĝas en afero de adoleskula kondiĉo kvankam iom ekscesa. La zorgoj pliintensiĝis: foje laŭ longaj semajnoj, pro brakdoloroj, kun io neoportuna nivele de manfingroj, ŝin devigantaj ĉiam pli maloftigi la ĉiutagan ekzercadon pri piano ĝuste kiam ŝi, superinte la ekzercajn pure lernigajn studojn, jam ekludadis, unuope kaj ope kun sammuziklernantoj, agrablece famajn aŭtorajn muzikaĵojn.

## Ĉapitro dekoka
# La pasinto el si mem aktualiĝas

Nun jen la oportuno realigi deziron tro prokrastitan, parte pro ĝeno devenanta el mia depastriĝo parte pro tio ke la tempo jam forbalais la originan patravan familion de la granda vilaĝo de la pada delto, kie vivis kaj mortis miaj patraj kunsanguloj kaj mi pasigis erojn de infanaj jaroj kaj kien revenis, fakte aŭ kore, travivi kaj kunvivi gravajn personajn eventojn. Ni tri, do, kune iris elfosi niajn radikojn, kvankam ne sen signoj de malfacila adaptiĝo kun vejnoj de malpacienco de Elvira, kies kapo ne senpene sin lasas aventurigi en patrajn memoraĵojn, kaj kun nevolaj senentuziasmigaj komentoj de Albina ĉar ŝi min ekvidas jam tro absorbata el retrospektivo.

Mi sciis, ke jam neniun el la aktualaj vilaĝanoj mi persone konas kaj, ke jam stratoj kaj plantoj estis enprenitaj en novaj urbplanoj malkaresantaj memoraĵojn. Mi tion sciis certe. Sed nun, vagante laŭ vilaĝaj stratetoj, al mi plaĉas enspiri tiun ĉi aeron, aŭskulti voĉojn de babilantoj, la vortojn tutplenajn je animlevanta venetia gracio: tamen tiuj ĉi apenaŭ kaj malmulte similas mian antikvan lingvon: ĉiuj parolas dialekton miksiĝantan kun vortoj kaj esprimoj de la oficiala itala, kaj se oni deziras aŭskulti la lokan venetian dialekton oni devas serĉi kaj okazigi konversacion kun oldaj homoj. Kaj tamen ĝojigas la spiriton promeni inkognite tramerkate por sin lasi transporti de la gracia moleco de tonoj de virinaj voĉoj.

Enirinte la preĝejon, mi imagas vidi alvenantaj renkonten la tiamajn grandajn kripajn statuojn kiam mi ne sciis, ĉu preĝi al la etaj ŝafoj aŭ al la kolosa kamelo ĵus alveninta certe de Afriko ĉar hieraŭ mi ĝin ne rimarkis. Jen nemalsama virinvoĉa kanto kun tiu anĝela elvokado kaj plezuriĝa malfruiĝo sur la finaj notoj. Iam, kiam oni kantis, mi, antaŭ la kripo, kunfandigis tiujn ĉi voĉojn kaj tiujn de la anĝeloj jen nevideble flugantaj ĉirkaŭe jen statuaj: estis ĝuste tiuj lastaj la kantistoj, malgraŭ, ke iliaj lipoj restadis fermitaj. Eble, mi tiam obstine supozis, ili movas la lipojn kiam mi taŭzas kapon kaj brakojn kaj piedojn por defendi la lokon insidatan de aliaj infanoj premantaj je miaj ŝultroj kaj flankoj.

Ĉe la tombejo, apud kiu eĉ la soleca paŝado laŭkelkatempe tiel min invadis kaj plenplenigis je respektosento aŭ horora timo kiam mi provis eviti la venĝan animon de la porketo mortigita kaj salamigita, nun eĉ tiuj ĉi apenaŭ

sentiĝas: tiom la loka aspekto variis kaj buntiĝis, ke ĝi sin dekoracias kiel ĝardenon senkomunikan. Mi eniras, legas nomojn en ŝtonplatoj kaj sinkas en rememorojn furioze memaperantajn: jen la geavoj jen la onklino jen la kuzo laborfalinto. Elvira miras pro miaj memkoncentrado kaj emociado, kaj eble eksentas sekretajn ligojn kun la mondo el kiu eĉ ŝi devenas. La malmultaj silentaj vizitantoj havas vizaĝojn tro similajn al tiuj pri kiuj mi nostalgias por ke ebliĝu foriri el emociado.

Ĉiu parenca forpasinto havus ion riproĉi al mi: fakte, preskaŭ neniu el ili ricevis de mi tiom kiom li donis al mi. Ili vidis en mi sian honoron, sian socian superleviĝon kaj anticipon de sia, foje forgesita, transcenda destino. Iliajn ĝojon kaj certecojn eble mi ŝanceligis. Mi sentas impulson ilin trankviligi ĉar nun ni kune kun ili havas la saman fidon, la saman esperon, kaj ĉi tie kun ili rendevuas.

Veninte por ilin pietate rememorigi mi finiĝas humiligata antaŭ ili; nun evidentas, ke min trenis ĉi tien ne forto de subiranta vivo, sed bezono min liberigi el kulposento pardonpetante: al la avo kiun mi forlasis en ekstrema momento, al la kuzo komunistiĝanta sur kiun miaj bruskoj falis senpiecaj ŝtonoj; al la onklino kiu el siaj kultura senornameco kaj socia fremdeco eltiris elaĉetan admiron por mi kiu, malgratule, ŝin neglekte flankenlasadis; al onklino Anĝelina komprenema al ĉiuj kaj tiom kutime bonhumura ke per ŝia ŝajnĉantece milda voĉo kvietigadis disputemajn familianojn: ŝi por regali min, indan je ĉio laŭ sia senkondiĉa estimo por mi, per plado el diversaj viandoj, iun tagon forgesis kaj fastigis sian filon revenantan el lacigaj laboroj; al la avino kiu, intuiciinte miajn inklinojn, plurfoje min riproĉis pro mia nekaŝita indiferento al si; al praonklino Tereza kiu, kvankam al ĉiuj helpantema, tamen pri miaj sekulariĝo kaj edziĝo ne ĉesis akuze mueli kion lango elpelis. Jen la kompatindulo de la tuta parencaro kiu komunikiĝis nur geste aŭ grunte pro manko de parolkapablo; jen 80-plusjara onklo Aĥilo saĝa kaj spirite riĉa, amebla pro sentencoj kaj juĝoj, kutime ŝatataj postevente; kaj jen la tombo-niĉo ankoraŭ ne okupata, tiu de kuzino Maria, nun postvivanta en kadukulejo: estis ŝi kiu min ruĝigis antaŭ multaj dirante, ke al mi, religiulo, ne malplaĉas trarigardeti la jupojn movitajn de junulinaj formoj.

Jen mi traktas ilin kiel vivantojn. Sed tiu penso-imago tiom elkreskis ke certamemonte ŝajnis ke la tempo dediĉita al la mortintoj min forigos el la vivantoj ĉar ili vere vivas ĉe Dio. Je tiu sento-malkovro, mi min trovis festante kun ili!

En angulo, preskaŭ apartigita de la aliaj, jen la familia tombo, marmore me-

blita, de tiu riĉa forpasinto neniam vidita kaj renkontita, por kiu tamen, en la memortago de ĉiuj mortintoj, oni insiste petis, ke mi ploru antaŭ tombvizitantoj kaj centru streĉojn por subvenigi larmojn ŝajnigante afliktiĝon. Li estis la bienposedanta notindulo ĉe kies familio dungiĝis mia patro: liaj pluvivantaj familianoj enmanigadis al ses/sepjarulo florbukedon ordonante, ke mi preĝu kaj plore sintenu, antaŭ tiu tombo kaj antaŭ mirigitaj personoj, almenaŭ unu duonhoron. La rekompencaj kukaĵoj ebligis, ke mi, ruze/kaŝe, portu fingre salivon al la okuloj obstine rifuzantaj larmi.

Tra la vojoj kaj placetoj, jen la restaĵo de la panbutiko ĉe kiu mi tro sata de blanka polento (maizkaĉo), kredigante mendon je nomo de mia patro, ŝulde aĉetadis varman krakpanon (jen mia ripetita senresponda posta ena demando: kiu pagis post dekoj da ŝuldoj?); jen la loko, nun placo, kie el sia domo fulme eliradis olduletino Ĝeĝa furioze riproĉanta pro kriaĉadoj kaj batoj kontraŭ la fenestroj de sia hejmeto. Tie ĉi, apude, situis la lernejo kie la instruistino min benkkunuligis kun lernantinoj por ke ilia ĉarmo min instruu, ke la nazmuko ne forviŝendas per la mandorso aŭ per la jakmanikoj. Jen la stacidomo, kie haltadis la trajneto, nomata *nigra bovino* pro ĝiaj lignobruliga lokomotiva je blanka/nigra koloro kaj malrapideco ene de tiomaj movoj kaj hastecoj, nerekonebla jes, ebliganta tamen, ke mi revidu la instruistinojn malsuprenirantaj el trajneto tutnigrafuma kaj vaporblovanta. Ili el la stacidomo ĝis la lernejo defiladis flankflanke, triope aŭ kvarope, movante sinkronece la samflankajn gambojn, kiujn mi fikse observadis marŝante preskaŭ per samritma paŝo je ilia flanknivelo: ili miris, ke infaneto aŭdacus tiom manifeste prigapadi iliajn krurajn ĉarmaĵojn dum mi ensorĉiĝis nur pro sinkroneco de la gambaj movoj kaj de la ritma klakado sur la larĝa stratpavimo. Jen la domo de Simono, en kies korto ankoraŭ siluetiĝas la branĉoj de la jujubarbo, kiun mi skuis kaj mildigis, sed nur pro neeltenebla malsato, je la peno subteni integra la fruktan ŝarĝon. Pliposte plurestas la hejmeto de la pedelo, kiu tiretis, kun la permeso de mia patro, miajn orelojn, nemalofte interpretante tro malavare tian permeson. Personoj, paŝante kaj informante, helpas rememori erojn de la pasinto de miaj geavoj, eĉ priskribas eventojn.

Eĉ en kelkaj senpolviĝis, ke ilia nevo fariĝis fratula pastro kun la dua mescelebro en tiu ĉi preĝejo. Ne ĉio perdita do, flustris ĉe-orele Albina, respektante tamen mian silenton dum mia esto ensuĉiĝas en novajn nedifineblajn sentojn: se ĵusantaŭe mi ĝojis kvazaŭ revokita el ekzilo, nun mi estas denove ĝene elvokata kaj… memelpeliĝanta!

Elvira, ne retenante sian malpacientiĝon, duondormas en aŭtomobilo, fora

de tiu vivo ĉar ŝi ankoraŭ ne ensciiĝas, ke eĉ la ŝia emerĝas el tiuj iamoj.

Jen la busstacio, kie iam haltadis la fumanta trajneto.

Vagona restaĵo, sur apuda subĉiela parkotrako, de tiu unuvagona trajneto min superŝutas je memoraĵo kies spuroj jam perdiĝas kaj igas malfacila la rakontadon mem. Tiu trajneto kuris sur reloj flanke sed unukorpe kun la longa provinca senkurba strato, ĉiam trafikita precipe de ĉaroj je besttrakcio alruliĝantaj al aŭ el la kamparo, bicikloj kaj malmultaj bruecaj aŭtomobiloj kaj polvonubigantaj kamionoj: estis facile kaj distre promeni aŭ kuri tra tiuj reloj, tiom pli, ke la trajno vojaĝis je dekhorkilometra rapido kaj malavaris je fajfadoj imitantaj bovinmuĝojn.

Ankaŭ mia avino paŝadis inter tiuj reloj por eviti precipe ĉevalojn, facilajn al incitiĝo kaj pranciĝo pro la bruega aŭtotrafiko, kaj la malalloge hupantajn aŭtomobilojn. Je trajna fajfado ŝi revenadis surstraten. Sed unu fojon, je la unuaj sunaj radioj, ŝi ne plu kapablis puŝi la ĉarumon por superi la dudek centimetrojn de la rela niveldiferenco. Kial tiu ĉarumo inter la trakaj reloj en tiuj ektagiĝaj horoj?

Estis la unua tago de la jaro kiam mi, kvinjara infano, gasto ĉe la patraj geavoj, kreis grandan angoran agitiĝon. Same kiel okaze de ĵus pasinta kristnaska solenaĵo kulminanta por infano ankaŭ en festmanĝo, mi, nepacience alproksimiĝas al la ardaj kuirejaj kamenflamoj kaj, sidiĝinte sur apudan brakseĝon, min ekbalancas antaŭen/malantaŭen. Kiel prognozite de mia onklo, mia dekstra piedo glitas en la poton je bolanta buljono, el kiu oni ĵus deprenis la boligitaĵojn. Kriegoj, unuaj helpoj, verŝaĵoj de vino kaj oleo kaj alio likva hazarde ĉekaj man-apude. Vespere la piedo estis enorme ŝvela dum mia frunto, laŭsense de la avaj kaj onklaj manoj (tiam la febromezurilo ne jam disvastiĝis inter popolanoj) brulis pro la febro. Necesis, ke la infanon senprokraste vizitu kuracisto, sed kuracisto loĝforas kaj ĉiukaze pagendas.

La sekvan tagon la avino kuris frumatene al la najbara merkatejo por vendi ovojn, demetitajn hieraŭ kaj antaŭhieraŭ de la amataj kokinoj, por ke per ties enspezo ŝi pene kolektu la monerojn bezonatajn por pagi la kuracistan viziton. Sed kiel transporti la infanon ĝis la ambulatorio, se la malsanuleto ne povas paŝi? En la kapo de la avino sparkis ideo: manĉarumo! Ĝi, je unusola rado kaj du stangoj senpene leveblaj, puŝita permane, povas servi rulseĝile... Oni min ŝarĝas sur ĝian kavon kaj la avino komencas antaŭenpuŝi. Laŭ kiu flanko de la strato? Sur la plano, ruze!, glata kaj fora de la trafiko, inter la du reloj. Kiam alvenos la trajno, ŝi kondutos same kiel en sennombraj samaj fojoj: elreliĝos al la strato!

Jen, vere, la trajno. Avinjo senurĝe provas suprenirigi el la relnivelo la puŝĉarumon; sed la rado ne superas la obstaklon de la dudekcentimetra nivel-diferenco; ŝi reprovas alvokante *Marian kaj Sanktulojn*. La tria, la kvara mal-sukcesoj urĝas mian avinon peti helpon per vokoj kaj krioj ĉiuflanke adresitaj; sed neniu aŭdas ŝian voĉon, oni povas aŭdi male la insistan eltrajnan skrapan fajfadon. Ŝi reprovas ankoraŭ per pli energiita puŝo: nenio! Ŝi tiam forlasas la ĉarumon al la neevitebla destino, ŝiaj brakoj provas min elĉarumigi por min brake forporti; sed mi, senvole frapita ĉe la vundita piedo de ŝia senspira hasto, ekploras plenvoĉe: ŝi instinkte min rekuŝigas en la ĉarumon kaj ĵetas la okulojn lastespere manlevante al lokomotivo... ankoraŭ fajfanta sed jam haltiĝanta ĉe niaj ŝultroj.

El la trajno eliras la lokomotivestro kaj biletkontrolisto por helpi kaj kvietigi la korkrevon, kiu lasos longatempe senvoĉa kaj senkolora mian avinon.

Alia sufero impregnis mian animon. De longe mi persvadis Albinan, ke ni vizitu virinon kiun iam mi eble pormomente konjektis igi mia edzino kaj ĝuste ĉi tion tutanime la ulino esperis, eĉ tio plenĝoje efektiviĝis por ŝi unika vivcelo; sed kiam ŝi ekkomprenis, ke miaj okuloj kaj koro ekdirektiĝas al alia destino, ŝi kaŝis sian elreviĝon perdante la forton plu komuniki kun mi kaj kun siaj proksimuloj.

Ni konatiĝis hazarde, mi haltiĝante ĉe benzinstacio, ŝi manpuŝante biciklon je la dekstra stratmarĝeno, eble por eviti la riskojn de aŭtotrafiko, en tiu ĉi punkto vere kaosa. Startigante la motoron, mi devis ŝtopi la aŭton ĝuste sur la blanka linio antaŭ ol oni enmetiĝas en la straton en tiu momento trafikstopita ĝuste ĉe mia maldekstra flanko: ŝi, je malmultaj metroj de la aŭtomobilo, devis haltigi siajn paŝojn preskaŭ kontaktante la maldekstran flankon de la impertinenta abrupta baraĵo, ĝuste je du metroj de mi. Mi tuj profitis por rigardi la virinon, eble fraŭlinon, sporte vestitan kun helbruna hararo, iom ondumita: tiom sendelikate estis la gapado de miaj okuloj, ke ŝi mallevis la siajn serĉante objektojn sur kiujn ilin defende deturni. Ŝia embaraso tamen daŭris malmulte ĉar, fikse ŝin rigardante mi el mi lasis fluti la kontaktigajn vortojn: *"Ho feliĉa maldelikateco! Mi profitas por kontempli ion plaĉan. Espereble, la trafiko haltigos nin ĉi tie longatempe!"*.

Ŝi duonridetis apenaŭ vangruĝiĝante kaj softe mallevante la okulojn, sen elmeti la vortojn kiuj certe premis por eliri. Ankoraŭ reciproka rideto, kaj mi-aŝultre hupetas aŭtomobilo postulanta liberan vojon.

Tujpost la unua trafikcirklo, je ducent metroj, mi volis atendi la biciklantinon por ŝin revidi kaj repreni la ŝercan paroladon. Ni konversaciis ĝisvespere.

Ni nin revidos ankoraŭ centfoje pro tio ke mi, laŭkelktempe, kaj ŝi, ĝisfine, plividis oportunecojn por realigi nesekretan, kvankam ne pale diritan, revon: vivi kune por ĉiam.

Katarina estis la nomo kiun mi prononcis kun vera allogo dum ŝi kateniĝis el mia allogo. Ni fariĝis ne plu kapablaj vivi unu sen la alia. Ŝi estis dolĉa, pasia, forgesema pri si mem, el ŝia eno displitiĝis sentoj tute por mi, miavice fascinita.

Sed neniam ni plenumis la komunan revon, ĝermitan malgraŭ niaj komunaj ekproponoj, vorte sed ne fideme diritaj, ekskludi definitivajn sentimentalecajn implicojn: miaj ne junaj sed senspertaj jaroj ankoraŭ konfuzis amon kun fascino, plezuriĝa pariĝo kun sento de amo: ĉio je mia flanko fariĝis vice kaj vice nur pli sensema ol senthava kaj sopiranta pli al ŝia korpo ol al ŝia animo; kaj kiam ankaŭ la kontentiĝo de la deziro kvietigis superregon, la rilatoj malintensiĝis. Ekkonsciiĝinte pri tio, ŝi malpleniĝis je ĉio bela ekperdante vivecon en la gestoj kaj parolado kvazaŭ stuporita en definitiva apatio; el ŝia silento antaŭ mia nepotenco konsoli travideblis iu sufero el kiu speguliĝis ĉiu doloro de l' mondo, kies impreso neniam malaperos. Ŝiaj, tiom admiritaj de mi, svelteco kaj velkeco fariĝis flegmo kaj senmieneco. Ŝi ne eĉ provis revivigi kion ŝi vidis en mi forperdiĝinta. Mi maltrafis la lastan interkonsentitan rendevuon: mi, etanime, ne kuraĝis refirmigi aŭ kompate falsi mian decidon, ene de mi, kaj observi ŝian suferan vizaĝon. Eble eĉ ŝi ne kunportis sian seniluziiĝon ĝis tiu rendevuejo.

Nun mi pensiulas feliĉe, ŝajne senprobleme. Mia edzino ekde ĉiam informiĝis pri tiu mia ama parentezo kaj kiam mi parolis pri tiu virino, ŝi montris indulgi al miaj pensoj, tiom pli konsenteble, ke miaj aktualaj sentoj estis kneditaj nur el deziro scii ĉu ankaŭ ŝi alvenis fine al sia feliĉo aŭ ĉu ŝi restis ankoraŭ en tiu sufero, eĉ post dudek kvin jaroj, tioma fakte estas la tempo pasinta.

Fine mi kaj mia edzino, aspekte turisme, reale por kvietigi mian anksiecon kaj eble ankaŭ sentojn de kulpo, veturis ducent kilometrojn. Kelkajn tagojn pli frue mi jam kontrolis en la telefonlibro, sed ŝia antaŭnomo kun familia nomo mankis tie. Ĉu malbona aŭguro aŭ ĉu signo, ke ŝi nun havas alian familian nomon, laŭ mia espero?

Alveninte al la okmilanima urbeto, ni instaliĝis en la sola hotelo kaj tuj piediris al la direkto de ŝia domo: tiu devas esti izolita, ĉirkaŭata de ĝardeno sur kiu alrigardas la fenestro de la ĉambro destinita al mi ĉiun duan semajnon kiam laboro de komercagento envicigis tiun regionon en la listo da miaj taskoj. Tiu fenestro, kies sojlo, je ĉiu mia reveno, tegita je amsignifaj florvazoj iom post

iom efektiviĝis por mi evidentiĝo de la sopiro de ŝia korpanimo al la mia. Ŝiaj gepatroj min traktis kun kreskanta simpatio, certe vidante en mi la estontan edzon de sia unika dudeknaŭjara filino. Laŭ du jaroj mi pasigis en tiu ĉambro du vendredojn, du sabatojn kaj du dimanĉojn monate. Feriado kun ŝi, libertempo kun ŝi.

Mi nun volas revidi ĉion, precipe ŝin. La vojo nun plilarĝas, la konstruaĵoj plinombras, la malantaŭa spaco dominata de malaltaj tegmentoj. Ne! Kiel timite, ŝia domo ne plu estas: en ĝia loko granda multetaĝa kunposedaĵo, alta kun ĝardeno antaŭe. Timide, preskaŭ timanta esti riproĉata de ĉiuj pro tiu intuiciebla mia pasinto, mi enketis ĉe okazaj personoj pri ŝi: kie nun ŝi loĝas? Neniu aŭdis tiun nomon kun antaŭnomo: cetere la kunposedaĵo apenaŭ dudekjaroldas!

*"Vi provu ĉe tiuj kampardomoj"*. Alproksimiĝante al tiuj ĉi, neniu movo aŭ bruo el ili preludas respondon ne nescian. *"Ni novas ĉi tie, nur el dek jaroj, neniam ni aŭdis pri tiu persono. Eble ĉe la komunuma anagrafa oficejo"*.

Ja, certe la anagrafa oficejo, sed jam ekvesperiĝas, necesas atendi ĝis morgaŭ matene. La atendo kreskigas angoron de suspektata malbona novaĵo. Post vespermanĝo mi kaj mia edzino promene laŭiras la stratetojn kiujn mi kun Katarina iam trakuris manenmane ĉar tiam niaj vortoj enŝteligis unu al la alia allogajn certecojn kaj firme certis, ke niaj sentoj nin, sintonie kaj trans niaj vortoj, trenus nin kunvivi por ĉiam: jen la angulo de la gelatejo, ne plu rekonebla sed ankoraŭ glaciaĵejo, jen la ejo de ŝia amika merceristino ĉe kiu foje, gastigataj en petoleca saloneto, ni kune trinkis kafon sub amikinaj memkontentigaj rigardoj pro la envieca bonŝanco de Katarina: sed la ejeto, englutita de najbara pli granda ejo, nun estas ferbutiko. Se hazarde mi renkontus tiun merceristinon eblus ricevi informojn pri Katarina. Kaj ĉu se ŝi min rekonus? kaj memorus la elreviĝojn provokitajn de mi al sia amikino?

Pasis la nokto preskaŭ sendorme. Frumatene, tuj al la registra oficejo: honte, preskaŭ kulposente, malaltvoĉe mi petas la informon: *kie nun loĝas Katarina P.?*

*Tiu loĝantino ne plu registritas ĉe tiu ĉi komunumo. Se jam pasis dudek kvin jaroj, oportunas konsulti ankaŭ la registron de la forpasintoj, tie en la fronta ĉambro*. Jen la kruda vero: ŝi forpasis antaŭ dek sep jarojn, mortigita de kancero, enterigita en la vilaĝa tombejo, tombo n. 69 de la kampo C.

Reakirinte sinregon, mi prononcas vortojn kaj murmuras al mia edzino: *kaj tiel mi al ŝi neniam povos ensendi, ke mia aktuala feliĉo deiras parte ankaŭ de ŝi! Konstruita ankaŭ pere de ŝia ofero.*

Posttagmeze tuj al la tombejo kun en mane bukedo kombinita el floroj aĉetitaj de mia edzino. Ĝin portas mi, kvazaŭ tiu ĉi gesto povus esti vidata de Katarina kaj reliefigi pensojn kaj sentojn konsoldonajn por ŝi. Jen la tombo: nelegeblaj literoj en breĉetita tomboŝtono, sen floroj, eĉ nefreŝaj, sen apartaj signoj de ama prizorgo. Ĉi tie kuŝas io de ŝi, mi senteme pensas, kaj enflaras tutan ŝian amatan personon. Kiel manifesti al ŝi ion pri mi nun humile dankema, dezirema aŭskulti ŝin pri si? Kiel rerakonti denove al ŝi, ke neniam mi forgesis ŝian elreviĝon kaj suferon? Mia plenpleneco de sentoj estas eksplodanta. Al kiu konfidi mian koran transdonaĵon por ŝi? Ĉu tiu mia sentamplekso, konfuzita en kulposento kaj kontento pro mia lojala deziro ŝin renkonti, nenion signifas? ĉio perdiĝos? Se estus interparolanto kiu perus inter mi kaj ŝi!

Mi forte deziras, ke ekestiĝu tia peranto, ke li estu tie ĉi por rikolti de mi kaj raporti al ŝi; ke tiu ekzistu por konservi ĉion de ŝi, ĉion konsistigante por ke ŝi povu scii pri miaj pensoj kaj miaj sentoj kaj pri mia senlima partopreno en ĉio ŝia, kaj por ke ŝi sin sentu konsolata. Mi sentas tiel intense tiun deziron, ke ŝajnas neeble, ke tiu peranto aŭ interkomunikiganto aŭ kunigilo povu ne ekzisti. Mi bezonas lin, do li devas estiĝi!

Kaj tiu evidento sin transformas, preskaŭ alloge, en ĝojon pro tio ke mi nun fine eltrovas la manieron por alveni al ŝi. La dubo, ke tiu mia deziro estas donanta konsiston al bezonema fantazio, ŝajnas kontraŭlogika kaj kontraŭracia kun eĥoj de rankoro kontraŭ tiu ĉi kiu sin permesus neekzisti. Se li ne ekzistus, li mankus je respekto kaj amo al mi kaj precipe al Katarina. El miaj lipoj eliras sensencaj monosilaboj dum elinterne fontas la plej konvinka preĝo: preĝo por ŝi, por ke estu fine konsolo por ĉiuj, por ke Li daŭre ekzistu por ĉiamigi eĉ tiujn miajn sentojn!

Sen li, ĉio sensencas, kun nenio bona konservita. Kun li la monstro de la morto fariĝas nur pasado. *Kion vi balbutas, la rigardon adresita al io nevidebla?*, demandas mia edzino, provante min forvenigi de tia angorstato kiu en tiu ĉi momento jam fariĝas ĝoja certeco. *"Li, Li estas kaj savas ĉion bonan, ŝin kaj nin!"*.

Ni plurestis en tiu hotelo por reviziti ŝian tombon kaj akiri malpli partajn kaj malprecizajn informojn kaj partopreni en meso memore je ŝi. Ŝi perdis, laŭ spurmemoraĵoj, ne multe post nia disiĝo, la gepatrojn, kaj sekve de ĉio sin apartigis ankaŭ de amikecoj, kaj travivis la lastajn jarojn preskaŭ en kompleta soleco kaj senĝuo, eble humiligita kaj nuligita ĉe si mem de la enŝteliĝinta konscio ne esti amata, fore de sia patra hejmo intertempe transigita al aliaj manoj kaj tuj poste disfaligita. En la malsanulejo kie ŝi forpasis, neniu dokumento jam estis konsultebla: kelkaj kredis memori, ke ŝi travivis daŭre sinkanta el mute-

co sur siajn senesprimajn pensojn. Ĉiu informo remortigas kaj revivigas ŝin.

Nur ĉe la paroĥeja registro oni legas ŝiajn manskribitajn nomon kaj antaŭnomon sekvatajn de presita ordinara gloso, konsona kun finkvietigitaj miaj deziroj kaj bezonoj: *Katarina P. hodiaŭ, 19an de majo 1980, gastino ĉe la anĝeloj*.

Laŭ hejmenrevena vojo, en aŭtomobilo kun Albina, mia sentapensa kaosa tumulto rezistis al la tento distanciĝi el ĉiu sufero, kaj ŝuŝe ripetadis: kial ni homoj alkutimiĝis al morto kaj daŭrigas vivi dum aliularo, ĉe ni, estas elvivitaj? Kia egoismo nin adaptigas al tia malhumaneco?

Konfliktis en mi du kontraŭaj deziroj: kiel malĉizi en mia memoro tiujn memoraĵojn kvazaŭ ili neniam ekzistis? Kaj samtempe: ve al kiu provas malĉizi ilin el mia memoro!

Kiam la emocioj, nemastrate disfluantaj, iom reordiĝis, mi dumstirade enĵetis al mia edzino jenan liberversan kvazaŭan poemon, almenaŭ ne pervorte torditan, por ke la hodiaŭaj sentoj havu ĉiam ekscitilon je la sama nuna intenseco kaj konstante repagi neestingeblan ŝuldon. Ĝi restis, tamen, ĉiam nerelegata, do senreviziita, eble por ke ĝi ne paŝigu tra dolora klareco sentojn certe kviete hejmantajn en animaj profundecoj, sed ĉiam ŝirkapablajn. Se leganto ankoraŭ retenas la atenton…

***1***. Mi vin rigardas.
Kiel diluiĝis gajeco!
Kien kaŝiĝis la steloj?
Ĉu vere ekzistis harmonio
de sonoj, la ĉeesto de infanoj,
via konfidema rigardo?
Nun ĉion enverigas
via korpa restaĵo
puŝata koruptiĝi.

***2***. *Mi nun ne forlasas vin:*
*Unue mi vin plenkore rigardis*
*Due mi tuŝis delikate vian tombvangon*
*Trie mi fortege sopiris, ke la vivo revenu*
*Kvare mi rezolute volis, ke iu potenca*
*redonu al vi la vivon*
*Kvine mi scias, ke iu faros, ke mi vivu*
*kun vi kie al vi estos amo al ĉiuj.*
*Ho! Se mi sukcesus refari vian ridon.*

***3***. Miajn sencelajn vortojn
la vento similiĝas al via rigardo:
ĝi min envolvas
kaj sendetene forfuĝas.
Sed mi simile
al singarda abelo, insistas
palpi la momentan punkton
por suĉi el via animo
vian nektaron.

***4.*** *Sed mi vere nenion havas*
*se ne rimorsan senkulpon*
*kun senpotenca emo*
*ŝanĝi destinon kiun mi*
*ne povas ŝanĝi*
*kaj kiun mi kaŭzis.*

...

Mia Dio denove ŝanĝiĝas je aspektoj kaj trajtoj en mi. La Dio ĝojiga de miaj meditoj nun devas akordiĝi kun la Dio kiu nebonvoleme dispoziciis pri tiaj miaj kaj ŝiaj suferoj. Tia Dio kiun mi ĝis malmulte antaŭe difinis, ŝerce, malkaŝiĝebla al miaj rigardoj nun ne plu forlogiĝantaj ĉar neaprobe konstatantaj, riveliĝas kaŝanta siajn vojojn, senkompate rekonfirmanta, ke al li oni devige revenu per dolora morto. Same kiel ĉiu kredanto, ankaŭ mi remetu la celbuleton en la centron por rekomenci reordigon de la ideoj disiĝantaj; la miaj nun konfuze penas malkonfliktiĝi kaj malfacile trovas la liberigajn vojojn al komunikiĝo.

Albina delikate, eble puŝite ankaŭ de io sia, akute observis: *“Eĉ travadi la vivon en retrospektivo kostas! Animo balanciĝas inter sentoj de kulpa perdo kaj de malpleno...”.*

Alia sufero venis elrevigi nin, kiam la flustroj fariĝis certeco per nedeflanka komuniko de la koncernatoj: pioniraj anoj de la klubo de depastriĝintaj familioj kaj foje malavare stipendiintaj aktivadojn, Marta kaj Mario, paro kun tri gefiloj, ĵus decidis unu sin separi de la alia, kaj pri la okazaĵo ni informiĝis dum la finaj divorcaktoj. Kiel tio eblus post dek kvin jaroj? Eblis, laŭ komentoj, pro tio ke Mario delogis, aŭ delogiĝis, eĉ gravedigis, novan revivigantan amon, tute freŝjunecan.

Lasttempe ili renkontejumis malkune, malkune partoprenante aktivadojn: la cirkonstanco, postfakte, aperis simptomo siatempe nekomprenita. Ili sin separis tute amikece; sed la interkonsento faktoris por unu el la du kiel el neceso virto, por la edzino jam diketa kun ekstreĉiĝanta haŭto kaj la vizaĝo iom ŝvelinta. Ili ne plu vidiĝis en la klubejo kaj ankaŭ foriĝis de niaj interrilatoj, sed ne de niaj klubanaj komentoj: ke oni atentu pri la defroto de la tempo (kaj de la "aparatoj amoraj kaj de ties ekzaltiĝoj ĉe freŝa furaĝo!", oni amuzcele aldonis); ke amo, eĉ la para, devas esti flegata ankaŭ per volaj iniciativoj kiuj kapablas favori la revenon kaj revivigon de la kora amo. Amo hardiĝas ankaŭ helpe de intenco, antaŭvido kaj devo neprigantaj disciplinon kiu pere de farendaĵoj refariĝas sento. La insista volo rekreas eĉ la eksensekiĝintan amon ĉar ne veras, ke al la koro neniam oni ordonas! Se je nivelo de instinkto veras, kiel jesas konata popoldiro, ke la amo foje flugas, foje pasas, veras ankaŭ ke je nivelo de menso la amo ĝermigas devon, kaj la devo ĝermigas amon.

Tio instigis debaton pri la idealoj de nia grupo (la restanta grupo), la celoj de tiuj plurfoje proklamitaj aŭ skribitaj, laŭ kiuj edziĝintaj pastroj entreprenis la edzan aventuron ankaŭ por demonstri al la ekleziaj aŭtoritatuloj, ke geedziĝo kaj pastriĝo povas perfekte kunekzisti kaj, ke la amo al Kristo ne rivalas kun la amo al virino. Oni, tamen, konvinkiĝis, ke, spite niajn seriozecon kaj priteologian trempadon, finfine ni similas ĉiujn aliajn: disflagrantaj pasioj, ĉar evangelie ne senbridigitaj kaj "hakitaj", foje kapitulacigas eĉ niajn tre fieriĝintajn idealojn.

Oni maksimis tiel: cirkulas tramonde geularo, preta partnereciĝi, pli alloga ol la aktuala via partnero. Kial vi nun allogiĝas de io kio baldaŭ manifestiĝos malpli alloga kompare kun aliaj jam ekzistantaj altiraĵoj? Ĉu eble devas interagi kio transallogas? Kial rezigni plion pro malplio?

Kaj fine: ĉu divorci ne egalvalorus elegante reĵeti ĝuitan personon?

Jen incidento pli nekredenda ol rakontenda.

Mi bonŝance, sed tiufoje bedaŭrinde, estas taksata homo religia, preta paroli pri la ĉeesto de Dio en la komunaj eventoj, kvankam foje iom parade, laŭopinie de mia bofratino (edzino de frato de mia edzino), kiu ne mankis amuziĝi je tiu mia emo laŭ ŝi evidenta.

Ĉi ulino travivis kun la edzo kaj dekjara filino en izolita domo urboperiferie preskaŭ du kilometrojn diste de mi. Pri religio ŝi sintenis kiel eble malproksime ĉar al ŝi sufiĉas feliĉo vadebla en tiu ĉi vivo. *Se Dio kreis tiun ĉi vivon, li ĝin inventis tiom feliĉiga ke pri li ni ne plu bezonas!,* sugestadis konvinke kaj konvinkige ĉe siaj pedele samlaborantoj en lernejo. Tamen, iutage la feliĉo

montris la kontraŭan faceton: al ŝia edzo, homo je samaj pensoj, oni diagnozis pulman kanceron kun fatala prognozo.

Ŝiaj pensoj pri religio kaj Dio ne ŝanĝiĝis, sed ŝanĝiĝis ŝiaj rilatoj kun mi, homo religia kaj do kapabla, laŭ ŝi, obteni ĉe Dio la kontraŭturniĝon de la eventoj. Mi certe promesis preĝon por li kaj por ŝi; sed la malsaniĝo malsate avancis malgraŭ ŝiaj riproĉoj kaj defioj kun ofendoj al mi kaj ankaŭ al sanktaĵoj per gestoj, foje vidigitaj al aliaj, malestimigaj. Riproĉoj parte kontraŭ mi kaj parte kontraŭ Dio *kiu nun insidas, eĉ ekdetruas la kreitan feliĉon, se ĝin vere kreis kelka.*

Mi ne cedis al la tento forlasi ŝin al propra destino ĉar ŝiaj ekscesoj, kun perdo de privata kaj publika ekvilibroj, devigis helpi ŝin sendepende de reagoj malŝatigaj pri mi. Eĉ kiam ŝia edzo ŝajnis akcepti sian sorton kaj sin remeti en la diajn manojn, ŝi daŭrigis min insulti antaŭ flegistaro kaj kuracistaro, kiuj fine montris kompaton por ŝi kaj kuraĝigon al mia pacienco.

La lastajn semajnojn, antaŭ la forpaso de ŝia edzo, la ekscesoj gestaj kaj vortaj kaj... batemaj akiris plialtiĝon pro tio ke plievidentis, ke miaj preĝoj kaj influo ĉe Dio valorus malpli ol neniomo, eĉ ĉiukaze ĉio tio estus frukto de hipokrito. Se mi provis ekspliki, ke eĉ dum niaj preĝoj Dio konservas sian sendependon aŭ ke, fine li kooperas al nia fina bono, la vortojn ŝi sarkasme fuŝadis kaj ŝtopadis manblokante miajn lipojn. Fermi miajn lipojn kaj bati miajn vangojn kaj ĵeti piedojn kontraŭ la miaj estis unubate samafero.

Tamen ŝi bezonis mian paciencon laŭ komuna juĝo dum mi decidis, ke ŝiaj ofendaj vortoj vaporiĝu sen min tuŝi, kaj la man- kaj pied-batojn mi strebis eviti aŭ malefikigi: nur iujn fojojn ili trafis la celon.

Ĝuste pri tiuj, kaj vere pri la tuta afero, ŝi hodiaŭ al mi pardonpetadas rekonante siajn ekscesojn, kvankam mi pri ili memorigas, eĉ en mi mem, neniel kaj diras, ke ŝi ne mem tian sintenon decidis. Doloras ŝin, akompanate evidente de la provo malekzistigi ilin, la saga krudeco de vortoj kiuj el la ĉizita memoro nun daŭrigas gravuriĝi antaŭ ŝiaj okuloj kaj oreloj dum parencaj renkontiĝoj. Vortoj rikanaj: *"Vi hipokrita... Vi fiaskanta kiel mensoga anoncanto pri fantomaj Dio kaj religio, vi fiaskanta kiel edzo pro evidenta via opresado sur vian edzinon. Vi jam fiaskinta kiel religiulo...".*

La viro forpasis kiel prognozite. La pezoj de la funebroj falis sur min ĉar ŝi sin kaŝis fore de ĉio. Reveninte post kelke da tempo, ŝi montradis esti rekuperanta la psikan ekvilibron kaj, eble, pli klaran sintenon pri religio.

Ĉu tio povis ne startigi ekzamenon pri la intencoj, sekretaj aŭ nekonsciaj, de la proklamado de mia kredo kaj religia agado? En mondo de nekredantoj

finfine povas okazi, ke kredanto tentiĝus kontentigi per tia sinprezentado sian subfosan emon al originaleco aŭ al akirado de estimo ĉe si mem kiel surogato de la malvenko. Analizo de psika profundo eĉ tion scipovus senmaskigi!

Ĉar okazas konsidero ĉe seniluziiĝoj, jen tiutempe alia. Irinte viziti religiulon kiu restis al mi vere amika kaj kundividanta de miaj kulturaj kaj pasiaj celoj, mi trovis lin, kiel suspektite, blindigita pro akcidento jam de kelkaj monatoj kaj nun baraktanta por reordigi la vivon en tia nova stato. La dialogo provokis al mi fendon kaj okazon eniri pli profunde en mi mem. La tempon iam dediĉitan al la legado kaj konsultado kaj eseado nun li foroferas al fantaziado kaj memorado kaj forlasiĝo al Dio, aparte en noktaj horoj *"ĉar nun pensi al Dio, asistate certe de la sciencoj lin koncernantaj, fariĝis neceso, antaŭe ĝi estis ne multe pli ol hobio, eble profesieco. Nun mi min devas plenplenigi je Dio, se mi volas daŭrigi iel en aktiveco pluviviĝinta".* Jen seniluziiĝo: en tiu momento mi perceptis Dion reduktita al eskapilo, antaŭe hobio nun aranĝo por akiri celon kaj min alverŝi per pensoj validaj kaj veraj, sed funkciigitaj al tiu celo. La amon al Dio por Li mem, trans la avantaĝoj defluiĝantaj, kiun mi kelkfoje volis praktiki sed ofte vaporiĝis pro indiferento aŭ pro perdo de konfidenco, mi deziris almenaŭ konstati spertita en aliaj personoj taksataj pli persistantaj en la servado kaj proksimiĝo al Dio. Tiel mi ĝis tiam taksis mian amikon.

Pliposte tamen iom malenergiis la disreviĝo per la penso, ke eble mia amiko volis ŝirmi la intimecon de siaj sentoj per humilecaj kaj modestecaj esprimoj!

Intertempe la nacia establo de mez- kaj lice- lernejaj profesoroj, de mi volontule deĵorata, min engaĝis, aŭ favoris, ke mi speciale okupiĝu kaj provu plidisvolvi, en koncernaj kunvenoj, la sociologian koncepton de komplementeco aŭ subsidueco *(sussidiarietà* itale, *subsidarieté* france, latine *subsidiarietas, in subsidium),* laŭ kiu la ŝtato rajtas anstataŭiĝi al la malsuperaj naturaj socialaj korpoj libere sin formantaj nur kiam tiuj ĉi ne kapablas krei al si la necesajn servojn; tial tio efike esprimeblas ankaŭ per duararang *subsidiareco* de la ŝtato: la ŝtato ne estas *prius* (aprioraĵo), sed *posterius* (aposterioraĵo) rilate civitanojn: la ŝtato postvenas la hompersonon kaj familion kaj socion en kiu la civitano vivas kaj energias nutriĝante je ties kulturoj. El tio la rifuzo de la ŝtatsocia kompleta posedo de produktiloj kiel okazadis en ekssocialismaj ŝtatoj.

Pro tio ŝtato devas agadi funkcie al la personoj kaj interveni nur kiam malsupera grupo ne kapablas el si mem efike provizi kaj realigi komunajn aŭ leĝajn celojn. Ĝi, tial, evitu anstataŭiĝi al ili. Temas pri afero kultura kaj kulturo ne venas de la ŝtato nek apogiĝas sur ŝtato! Tiu ĉi devas ekzisti jes, sed avantaĝe

de civitanoj. En tiu prisocia konceptado estas enprenata ankaŭ la invito al demokratio kaj la rifuzo de subprema totalismo, pro trouzo infaniganta homojn ilin senigante je diversaj niveloj de aŭtonomio kiu altiras homojn al kreo.

Tiu principo, estis nur apenaŭ aludita de Leono la XIII *(Rerun Novarum,* 1891), trovis unuan klaran formuladon kun Pio la X *(Quadragesimo anno, 1931*), estis plievoluigita de Johano la XXIII *(Pacem en terris*, 1963) kaj lasttempe reformulita de Johano Paŭlo la II (*Centesimus anno*, 1991) kaj klare kuplita al la principo de solidareco. Temo, do, kiu karakterizis la eklezian doktrinon pri la socio, nun, ankaŭ diversamaniere formulita kaj el novaj doktrinaj fontoj devenigita, jam eniras en diversajn ŝtatajn konstituciojn kaj jam enhaviĝas en la dokumentoj de la eŭropunia traktado de Mastriĉo kaj la sinsekvaj[1]. Studuloj kaj fakuloj pri ekonomiko interesiĝas pri ĝi ĉiam pli.

Inter mia publiko la koncepto ne ĉiam ekscitis konsenton unuaniman ĉar, kelkaj rimarkigis, ke se ĝi embarasas diktaturojn aŭ *etikajn* ŝtatojn aŭ totalismojn pli/malpli strangajn, finfine ĝi kontraŭas kaj detruas ankaŭ la liberalan historian ŝtaton kiu, per superregado karakterizita per demokratio aŭ spite sian demokratian sistemon, ŝarĝiĝas je la supera tasko al ĉio tutgvidi la civitanojn por pli facile ilin regi. Aliaj rifuzis la principon, pli diskurse ol diskursive proponitan, krom pro ŝajna rompiĝemo de pruvtezaj argumentadoj, precipe pro tio ke tiom da libera entreprenemo de neŝtataj sociaj organismoj (familioj, komunumoj ktp), rilate publikajn servojn, lasas tro da spaco ankaŭ al la ekleziaj iniciativoj dum ĝuste tiuj ĉi grincigas ilin.

"*Tiu principo sonas la nova troja ĉevalo de la katolika eklezio kaj indas ties ne malruzaĉecajn atributojn*", tie kaj tie kelkaj ronĝetis.

Efektive ĝi agnoskas al la eklezio, same kiel al ĉiuj similaj civitecaj agregaĵoj, liberon kaj rajton krei siajn sociajn instituciojn kaj liberajn spacojn por anonci sian kredon. Sed tio, mi precizigis, respektas rajton de ĉiu ajn.

Ne forestis ankaŭ fuŝkonceptoj pri komplementeco aŭ pri ties neprudentaj ekspansioj, kiel tiu de la kontraŭo: subsidiarece (komplementece) engaĝiĝi signifus rajtigi civitanojn starigi danĝerajn sociajn strukturojn kiujn ne volas krei la ŝtataj instancoj.

Laŭ mi, la rezistemo al plia envolviĝo en tiu principo naskiĝis precipe el la fakto ke en tiu nova konceptaro estas malakceptata, eĉ eksplicite rifuzata, la teorio pri ŝtato suprema valoro kaj fonto de etiko, laŭ sekvoj de klerismaj tra-

[1] Je tiuj konceptoj efektive inspiriĝas la traktado de Mastriŝo kaj tiu sinsekva de Amsterdamo kaj multaj rezolucioj de la instancoj de Eŭropa Unio kaj la ie-tie repuŝita "Konstitucio". Oni antaŭvidas, ke ankaŭ refarenda Eŭropunia Konstitucio pivotos ĉirkaŭ la principo de komplementeco.

dicioj de la lastaj du jarcentoj. Alia motivo, pli kompleksiga, kuŝis en la timo ke katolikoj eĉ per tia konceptado enigu novan historivizion pri la itala *Risorgimento* (Rizorĝimento, epoko dum kiu realiĝis la unuiĝo de itala duoninsulo): kiel sciate, pluraj sektoroj de katolikaj medioj (ekz. novgelfismo, papo Pio la Naŭa, Antonio Rosmini, Cesare Balbo, Vincenzo Gioberti ktp) revis kaj luktis kaj disvastigis pri *Rizorĝimento aliajn vojojn por atingi* la samajn *celojn*, kvankam tra idealoj malsamaj ol tiuj ombritaj de la venkintaj fortoj, al kiuj katolikaj frakcioj nun, kaj pli insiste tiam, imputas krimojn kaj la konstantan kaj aktualan disiĝon, en Italujo, inter la civitanaro kaj la ŝtato. Ĉu, fine, tiuj "historiaj reviziismaĵoj" nun trovos disvastigon kaj pravigon inter popolanoj kaj kulturuloj? kaj la socialaj sendependiĝoj funkcios kiel troja ĉevalo por okupi la ŝtaton mem?

Eble, foje la negativaj reagoj naskiĝis el nocio prezentata tro "katolikisme individuiga". "Eble se ne pro ĝia plumpeco, ruzeco vidiĝas el la troa katolika salado!" ŝerce komentis amikoj.

Se ĉio tio okupis la liberan tempon kaj plenigis la animon per la kontentiĝo esti utila al la socia kulturo, intertempe ekkreskis antaŭsignoj de io minaca, kvankam dekomence perceptata kiel pasemaj simptomoj de neprecizigita apenaŭ suspektata, sed certe kuracebla, malsano: mia filino jam devis forlasi la etudojn ludigantajn muzikaĵojn sur fortepiano pro neantaŭvidita insista sufero ĉe antaŭbrakoj. Ŝi jam trapasis la kvinjaran ekzamenon kaj tiun de historio de la muziko ĉe konservatorio, ŝi estis entuziasmiĝe sin preparanta al la okjara ekzameno kiam tiu "stultaĵo" malakcelis kaj tute ŝtopis la kuron. Komuna konvinko bedaŭris nur, ke ŝi devas jaron perdi, dum imunologiistoj prognozis la definitivan neeblon daŭrigi. Mi kaj Albina rezignis esti gajece trainvadataj de ŝiaj muzikaj dezirataj ekzercoj jam akirantaj, foje, artan stilon, kaj samtempe ni engaĝiĝis dispeli, ne ĉiam sukcese, ŝian ekdekuraĝigon rilate la momentan, sed obskure eksuspektitan definitiva stato, handikapon.

Elvira mem, konsile de doktoroj, fine akceptis rezigni konservatorion por ne pli intensigi la konjektitan kaŭzon de ŝiaj misfartoj, nome doloraj blokiĝoj ĉe la antaŭbrakoj. Se dekomence oni hastis sciigi al ŝi, ke kio prokrastita tio ne perdita, sekve oni ekprofitis alian devizon: funde oni bezonas, ja jes, muzikon sed ne necese ludatan per propraj fingroj. La ŝajnigita spritaĵo senpripense kunlimiĝis kun la realo.

Malkvietigon, nian kaj ŝian, ne ĉiam ni sukcesis fortreni. La programita kaj jam realiĝanta pilgrimado al la Sanktaj Lokoj de Palestino, delonge prokrastita, nun sin vestis ankaŭ el la kromintenco petegi dian favoron por la filino.

La penso, tamen, pri la filino igis malkvieta ankaŭ la planadon, studan kaj spiritan, al la pilgrima vojaĝo.

Ĉe la kvara jaro de mia pensiula stato, kaj nun ankaŭ la dua de Albina, estis decidite prepariĝi spirite kaj kulture al la vizito al la Sanktaj Kristanaj Lokoj de Palestino, pri kiuj ni delonge jam interparolis kun amikoj, al kiuj mi rakontadis miajn spertojn kiel akompananto de pilgrimuloj. Dekkvino da tagoj, antaŭe grupe, poste sole. Ĉiodirante, unuatempe oni deziris, ke la turisme religiaj pilgrimantoj estu tri, inkluzivante Elviran, jam universitatan kaj jam fianĉiniĝintan; sed atakoj de kapdoloro, plioftiĝantaj malgraŭ kuraciloj kaj kuracistoj, konsilis restigi ŝin dome.

Ducent pilgrimantoj forveturis el la Torina aviadilhaveno. Post trihora flugo oni alglitis, sur la alteriĝa kurejo, tiom senskue, ke mi tion perceptis nur kiam tondris la aplaŭdaj manbatoj al la aviadisto de la israela boingo pro ĝuste tia manovro. *"Evidentas, ke temas pri veterano de la aviadilaj skipoj kiuj el alto per milimetre precizaj bombantaj plonĝoj blokis la arabajn tankkolonojn en la dezerta sablo dum la sestaga milito aŭ tiu de Yom Kippur",* kontentiĝe estis komentate. Tel-Avivo estis jam mergita en nokto, kiam ni trafis la vojon al Jesusalemo por gastiĝi en hotelo de palestinaj araboj islamfervoraj.

Ĉu vere tia la urbo tre sankta al la tri unudiaj religioj? Se juĝi el miaj emocioj, min ekscitis nenio; sed tio ne min mirigis ĉar delonge miaj emocioj postvenas, se okazas, plurajn konstatojn kaj analizojn kaj rezonadojn, limiĝantajn, se ne kun skeptikeco laŭ mia edzino, kun antaŭjuĝa malfido pri la tro evidentaj fremdaj aspektoj de la faktoj. Mia *racionalismemo* min igis tendence malvarma, eble por tio ke en kristanismo eniras la kategorion *"sacrum"* (sanktaĵo) nur tio pri kio decidas la homo, kaj *"sanctus"* (sanktulo) la libervola adhero al la dia volo.

Post kelke da tagoj, kiam oni alkutimiĝas al emocioj kiujn nur kristano je konvinkaj fido kaj kulturo povas kompreni, ni jam ekkapablis eniri en la misteran kaj nigran vidon de konstato, ke Palestino plenŝutita je monumentoj kaj memoraĵoj pri Jesuo Kristo, sed ĉirkaŭ ili mankas preskaŭ komplete loĝantaj kristanoj.

Tio povus influi la fidon mem de tiu kiu ne enkalkulas en siaj konsideroj la humilecon kaj kruchumiliĝon de Kristo: la lando, la tero duarangas en lia penso orientita al la Patro kaj al la libervolaj homaj konsentiĝo kaj religiiĝo; kaj ke tio devas inspiri la sintenon de kristanoj rilate la lokojn famigitajn per la tera vivo de Kristo kaj malpli suferi je ŝercoj de la historio.

Krom la ŝvebantaj memoraĵoj pri Kristo kaj devotecaj vizitoj kaj procesioj,

ni partoprenis renkontiĝon, en la malnova Jerusalemo, kun kristanaj araboj de la okupataj teritorioj, kies porcioj tiam ĝuis statuson de Memstaraj Teritorioj, kiuj kaptis la okazon nin informi pri sia kondiĉo de blokiĝo inter du fajroj; tiu de israelanoj celantaj, eĉ per allogaj kompensaĵoj, ilin elpeli el Israelo, kaj tiu de la islamanoj ilin reputaciantaj kaj taksantaj malpatriotaj perfiduloj kvazaŭ pretaj rezigne akordiĝi kun la invadistoj kaj okupantoj de la *"teritorioj okupataj"* rezignante ĝisekstreme defendi araban teritorion rabitan de hebreaj koloniistoj.

Ili aperte parolis pri subfosa, malvarme rasisme planita, tramonde nun apenaŭ perceptata, kvazaŭfizika, krom religia, genocido; kaj pri damaĝo por Israelo mem forfuĝiganta la plej moderan nejudan popolan parton kiu ne kontestas la ekziston de la juda ŝtato. Kaj se iu inter ni ekaludis, ke Israelo estas la sola demokrata ŝtato en la regiono, ili negaje rebatis, ke tia demokratio estas etno-demokratio ĉar la ŝtato konstitucie estas por la juda etno ne por la loĝanta civitanaro!

Same ni improvizis ankaŭ ĉe islamaj araboj, kiuj rakontis kiom da ili, dum la unua hebrea konkero, malaperis sub la buldozoj de hebreoj, poste koloniintaj kaj fine milite okupantaj. Ili elmontris fotografaĵojn, kiujn tamen ni kun aliaj okcidentanoj ne kapablis interpreti pro manko de pliaj informoj kaj teknikaj kompetentoj. La salono, kie ili nin ricevis, estis tapetita de desegnaĵoj kaj ciferoj: la kvazaŭ kria elnombro de mortigitoj dum kaj ekster militoj kaj ribelaĵoj. Miloj kaj miloj kiuj formas ilian "oferon" nemalsimilan al la "ŝoaho" pri kiu el la tuta mondo hebreoj ĝuste postulas ĉiamdaŭrajn kondolencojn. "*Sed la hebreoj ne sukcesos elimini ĉiujn palestinanojn: ni multobliĝas pli kaj pli, dum ili por plu ekzisti estas devigataj alvoki enmigradon de judaj kaj duonjudaj homoj el la tuta mondo por repopoligi la rabitan teritorion kaj koncedas hebreecon al ularo nur ŝajnhebrea".* Tio fanatikeca ne malhelpis ke ni alprenu ion ne forgesendan: ĉe la senfina opozicio al la hebreoj afiŝas ankaŭ disponebleco, fakte ne konstatita eĉ kontraŭata pro elimino de kristanoj suspektataj je kunlaboro kun la israela ŝtato, respekti kaj pace kunvivi kun kristanoj de ĉiu eklezio.*"Fine ili pretendas, ke interŝanĝe kontraŭ rezigno de niaj rajtoj sur Jerusalemo ni akceptu kaj danku pro starigo por ni de ŝtatogrujero en la Teritorioj".* Tiu "grujero", kiu provokis ridojn kaj eble konsentajn malaprobojn, efike ilustris la judajn koloniajn setlaĵoj tra la Teritorioj, kies eventuala estonta ŝtatiĝo suferus per truoj kaj vakuoj similaj al tiuj de la fromaĝogrujero dum "*ni,* ili finis sin adresante al la italoj, *rajtas frandi parmezanon, plumetafore, kompaktan ŝtaton".*

Ni renkontiĝis ankaŭ kun la eta komunumo de Armenoj, ĝuantaj respekton kaj bonan aliron ĉe la israelaj aŭtoritatuloj, sed ili ne senutiligis okazon paroli pri la unua genocido de la dudeka jarcento, kiam Turkujo dum la unua monda milito, sub influo de la partio de *Junaj Turkoj* decidis purigi la ŝtatan teritorion je kristanaj spuroj eliminante kristanan armenan popolon jam parte aneksitan al Turkujo aŭ loĝantan interne de turkujaj teritorioj: tiam ili spertis veran sciencan genocidon kun preskaŭ unu miliono kaj duono da mortigitoj (75% el la popolo dum la restanta 25% sin savis per fuĝo eksterlanden aŭ rapidiĝante fariĝi islama), *dum malmultaj faris ion por nin savi el kruelaĵoj, se escepti la intervenojn de papo Benedikto la XV kaj de iuj malpli influaj katolikaj instancoj. Tiu genocida buĉado* (kaj tie ĉi ili uzis armenan vorton *Metz Yeghern* signifantan ilian ŝoahon), *estis la unua de la deknaŭa jarcento pri kio tamen neniu internacie protestis kaj ploris publike, eĉ hebreoj, kies ĵurnaloj aŭ kulturmedioj nin ignoris, se escepti la malfruan romanon de hebredevena aŭstra Franz Ĵerfel* "La kvardek tagoj sur la Mosea Monto".

La oratoroj citis iujn historiistojn laŭ kiuj la ŝoaho de hebreoj estis kuraĝigita de la silento pri tio farita kontraŭ armenoj: *"kiu plu memoras pri armenoj?",* eksplodis iam Hitler por senskrupuligi siajn generalojn, jam lanĉitajn por la enmarŝo de Wermacht en Polion, por ke ili ne bremsu la premon sur judojn.

Ne povis manki vizito al la muzeo de la ŝoaho, Jad Vaŝem (unu monumento kaj unu nomo), kies videbleco tamen estis nur parta, kaj al la Aleo de la Justuloj, kie ne eblis reteni suferon kaj indignon, kie ni vidis la nomon de sacerdoto de nia regiono.

Por mi kaj Albina, Palestino estis la okazo por plukonstati, ke la krucigon de Kristo ni homoj daŭrigas apliki sur aliajn homojn!

La Sankta Tombo de Kristo akiris nian atenton kaj pliekscitis piecon. Kiam tamen ni povis kurbiĝi sub la malaltan pordan trabon por eniri tiun tombon, iu abisena aŭ alikonfesia monaĥo, eble ortodoksa, do ne katolika bonŝance, kunfrotis montrofingron kontraŭ polekso signifante senreplikan inviton elpoŝigi monon: ni, provante kovri nian, kaj lian espereble, honton, ridetis komentante en proksimuma angla kvazaŭ por motivi nian ĝenon pro lia malagrabla sinteno monpetanta: "*Via Abisenio, nun en plena interna milito, aŭ Moskva reĝimo ne plu povas aŭ volas vin vivteni ĉe Sankta Lando"*; kaj ni donacis dek kvin pundojn, pli ol kio jam decidite. En aliaj malsamaj horoj aŭ en tombĉirkaŭaj anguloj renkonteblas monaĥoj de aliaj kristanaj konfesioj, eble en la sama sinteno. Sendube, tiaj ekscesoj eliris el ilia certeco pri la justa kaŭzo. Fakte, tuj malantaŭ la Sankta Tombo, alia diketa kaj simpatimienema mo-

naĥo, eble kopta (memĉefa eklezio, precipe egiptuja), nin alvokinte voĉe kaj geste sur niajn kapojn verŝis benitan akvon agitante hisopajn tigojn: ni ricevis ankaŭ tiun benon kaj li enkasigis kontentiĝe kvin dolarojn kiuj ni donacis por la bezonoj de lia religia komunumo.

Poste oni priskribis la konfesian situacion rilate la rajton dominadi ĉe la Sankta Tombo: interne de la tombtempleto ortodoksuloj, ekstere koptoj kaj abisenoj, katolikoj iom pli foraj en aliaj templaj porcioj.

Ni volis ankaŭ ĉeesti la matenan ceremoniojn de la malfermo de la bazilika pordo de la Sankta Tombo. Jen la islama ŝlosisto alproksimiĝas al la pordo, salutrigardas la diverskonfesiajn kristanajn pedelantojn en la preĝejo, turnas la ŝlosilojn en la seruro, puŝe malfermas kaj retenas la ŝlosilojn. Ekzakte tiel statas ankoraŭ nun: la funkcio de la malŝlosanto restis de 1187 al la postheredanoj de la islama familio Nuseibeh, post la perforta uzurpo de la loko far de islamanoj, kiuj islamigis kristanajn preĝejojn same kiel antaŭe krucmilitantoj kristanigis moskeojn, iam jam islamigitajn; cetere la diversaj kristanaj konfesioj neniam akordiĝis por havigi al si tiun taskon; kaj nun la hebrea okupanto (la Sankta Tombo situas en la urba porcio okupita dum la sestaga milito), por ne aspekti spekulanta sur la afero, respektas la *status quo* (status kuò = antaŭa stato = antaŭaj kutimoj kaj moroj), laŭ dekreto de la Otomana imperio tempanta je 1852. Oni nun plu aludas je aperturo por alia pordo, kiel sekurecelirejo laŭ novaj urbestraj leĝoj, kies ŝlosilo ĉi foje restos, oni diras, ĉe kristanoj. Kiaj kristanoj? Ĉu eblos akordiĝo inter ili?

Belis, laste sed ne malpli embarase, kaj distris ankaŭ la unika fenomeno de portebla eskaleto, subaere staranta apogite al la muro de alta klostreto, preterlasita de laboristoj kaj malhelpanta la piedpaŝadon, kaj preskaŭ tutsubĉiele videbla al publika okulo: se iu ĝin fortenus, tiu ĉi pri la loko kie ĝi nun kuŝas akirus, laŭ islama jursistemo ankoraŭ valida, proprieton, kaj ĉar neniu kristana konfesio rekonas al kiu ajn alia tiun rajton, do la eskalo devas resti tie, tial ĝi restos tie ĝis… la misvetero ĝin detruos. Komikas kaj groteskas ĉio ĉi: kiel fakte forfuĝi el la impreso, ke ni homoj estas je etmenseco ĝuste en la plej gravaj aferoj?

Bonŝance interkuris onidiro, konfirmita de katolikaj reprezentantoj, ke la papo Paŭlo la Sesa sukcese urĝis por ke oni eltrovu specifan akordon inter la diversaj kristanaj konfesioj: ĉiuj posedantoj eĉ de la plej eta retangulo ene de la bazilika areo akceptu, ke iu sinjoro, aspekte sendepende de solicitoj de iu ajn konfesio, financu la refaron de la tegmento jam kaduke ruiniĝanta kaj minacanta, pro akva trafiltriĝo, la stabilecon de la plurjarcenta konstruaĵo. Laŭ la

islama jursistemo, aŭ juĝistaj dekretoj, paganto konsiderendas proprietulo: pro tio bonfaranto anonime bonfaru ĉe unuopa konfesio, tiel ke estu respektataj la rajtoj de ĉiu konfesio. Rilate mecenatan monon ĉu malfacilas diveni ĝian konfesian apartenon? Ĉu necesas helpeton?

Ankaŭ la templeton kovrantan, interne de la baziliko, la etan areon de la Sankta Tombo, oni estas redononta al la origina formo kaj la almozoj, ne plu ruze petataj, divideblos en partoj egalaj inter la konfesioj. Ni sciis, post kelkaj jaroj, ke tiu lasta modesta akordo ankoraŭ ne konkretiĝis praktike, kun granda nia elreviĝo; kaj dume jam fariĝis konata la bonfaranto kaj ankaŭ la perantoj de tiu mono: de la katolikaj medioj. Televidoj montris al la tuta mondo la verkojn kaj esperigis proksima totalan akordiĝon.

Ni vizitis ankaŭ la nazaretan bazilikon akompanataj ĉiam de kristanaj ĉiĉeronoj, nur ekster la baziliko nin laŭleĝe akompanis israela turisma gvidisto. Kun tiu naskiĝis subita kverelo kun protestoj kiam li, ilustrante la Bazilikon, aludis al la ulino al kiu ĝi estas titole dediĉita: tiu ulino, laŭ li, meritus la respekton kiun ni kutime havas por "laŭstrataj virinoj". Iuj protestis kaj tuj la grupo foriĝis el li kaj travizitis senĉiĉerone. Eble li ripetadis klisaĵojn de la antikva Talmuda insultado hebrea/kristana.

Kelkajn tagojn antaŭ la reflugo al Italujo, kiam de la tuta heterogena geografia spiriteco ni jam vizitis pli ol la pivotajn (laŭ kuranta difino inter la pilgrima grupo), al ni prosperis eniri salonon, en la Jerusalema hebrea porcio, kie mondfama verkisto-opinionisto-filozofo, hebrea germandevena nun naturalizita usona, eble nome Fritz Stern, kiu eĥigante vidpunktojn ne nur siajn, por popularigi siajn tezojn pri la ŝoaho, ĵus etapis tra diversaj okcidentaj kapitaloj. Ne povis certe esti de li forgesita Jerusalemo pro evidentaj motivoj, cetere jam konsiderata okcidentaleca urbo. La oratoro kun germana akĉento kaj kun klare prononcita angla lingvo prelegis, ne apenaŭ vernise kiel mem diris, pri siaj tezoj jam disvastiĝintaj: la kaŭzoj, li saĝis respektplene sed ankaŭ fortimigante, de la ŝoaho situas en la persekutoj kaj kontraŭjudaj antaŭjuĝoj de kristanoj kaj ne mankis pensigi la "katolikdevenon" de Hitler, kaj fine elsorĉis per la demando ĉu Dio ekzistas post Auschwitz, nome ĉu tiu ĉi rajtas pluekzisti aŭ esti konsiderita vere tutpotenca aŭ vere defendanto de homrajtoj. Similan tezon ni jam aŭdis, en Torino, el la deklaroj de la itala memoraĵverkisto, jam deportito al Auschwitz, Primo Levi, laŭ kiu:

*"Okazis Auschwitz, do ne povas esti Dio. Mi ne trovas solvon pri tiu dilemo. Mi ĝin serĉas, sed mi ĝin ne trovas".* Sed tiam malpli impresis la esprimo pro tiu *serĉas* ĉar serĉanto fine povas vere trovi, laŭ invitoj kaj esperoj de iuj

kritikistoj.

Bedaŭrinde, mia embarasita, nivele de parolado, angla lingvo malhelpis, ke pri tiu plejlastaĵo mi povu rebati per mia respondo dum lia dialogo kun la publiko. Pri tio, tamen, intervenis franco, eble pastro armendevena, kies asertoj surprizis min: *laŭ li, deklari, ke post Aŭsvico licas pridubi aŭ nei la ekziston, aŭ ĉeeston en la homa historio, de Dio sinonimas al granda nekaŝita egoismo: kial,* li pli afiŝis, *ne starigi tiun demandon jam en la tempo de la genocido de Armenoj? aŭ post la diversaj genocidoj de la moderna historio, tiu de kulakoj en sovetuniaj gulagoj ekzemple, ne malpli nombra ol tiu de judoj? Ĉu la demando furoras nur nun kiam la buĉitoj estas hebreoj? Kial silentiĝis la demandantoj en la tempo de la aliesaj ŝoahoj, niatempaj aŭ eĉ tiuj de la pratempa palestino? Cetere, la demando, kritika kaj defia, licus jam kiam Kaino mortigis Abelon. La nombro ne ŝanĝas la esencon de la afero*".

Li finiĝis citante la ekzergon de la Hemingway-a verko "FOR WHOM THE BELL TOLLS" (por kiu sonoras la sonorilo): "Neniam sendu demandi por kiu sonoras la sonorilo. Ĝi sonoras por vi".

El la intervalpaŭzaj babilaj komentoj elĉerpeblas tiu ĉi: *"La devo plori pro la genocido de judoj kalkuliĝu kun la devo plori pro la genocido de armenoj kaj kun tiu de la rusaj kulakoj kaj kun enlageritoj, kaj eliminado de cigangentanoj kaj samseksemuloj ktp. Povas esti, ke lerta reĝisorado persvadu aŭ nin vartu por plori ŝoahon kaj flankaferigi la aliajn eŭropajn genocidojn. Eŭropaj, ĉiuj niaj, ĉiuj spegulantaj Eŭropon, ĉiuj egalaj! Memore plori nur pri unu povas suspektigi popolojn kaj provoki kontraŭajn reagojn...".*

Alia, iom spriteska eble, respondo: *"Dio dum la ŝoahaj eventoj ankoraŭ trasorbiĝis en la kalkulo pri la viktimoj de la genocidoj ne interesintaj la mondon, ne interesintaj eĉ la judojn!... Eĉ tiun de la prajudoj kiuj ideologiis sian Dion lin farintaj murdanto de homoj".* La spritaĵo (eble subkuŝe konsentita) ridigis la publikon, sed ne estis klare kiom da konsento ĝi akiris ĉar la aludo al hebreoj, freŝaj holokaŭstaj viktimoj, ne kredite enŝovis, ke ankaŭ tiuj ĉi sin makulis je la sama perforto kontraŭ homoj. Kaj ne estis klare ĉu la spritaĵo afiŝiĝis por substreki malhomecan indiferenton antaŭ homaj suferoj aŭ por malspritaĵe bildigi hebreojn. Ĉiukaze penso ŝvebis en la aero pro tiutempaj deklaroj (ekzemple, fare de grava ministro socialista, S. Perez) laŭ kiuj la genocido de armenoj konturiĝas kiel *interna afero de Turkujo kaj rezulto de ordinara politika eksceso.*

Postpaŭze, la oratoro daŭrigis aludante, kun delikateco taŭga por enmeti pli da spino en sian suspektekscitaĵon, per nerektaj kaj iom foraj vortoj, en tono

jen duonaserta jen duondemanda, hipotezis kaj provoke ekscitis el la ĉeestantaro opiniojn pri la "silento" de Pio la Dekdua dum la hitlera ekstermo de judoj. Malgraŭe, nur susurado disfluis el la publiko, se ne kalkuli jesajn esprimojn de iuj judaj organizantoj kaj idepromociantoj.

Malgraŭ ilia retorikeco, la demandoj, krom la malice sugestita respondo, jam entenas, laŭ mi, solvon kiel tian: *kiu ne sukcesis savi milojn de katolikaj sacerdotoj kaj milionojn de katolikaj laikoj kaj urĝis katolikajn mediojn gastigi kaj kaŝi persekutatajn judojn (kaj nemalmultaj pagis per la vivo por tion realigi), nun estas akuzata pri kulpa silento rilate la krimojn de sia persekutanto*[2].

Tion esprimis nekonata persono, sed tiu juĝo provokis ankaŭ grumblojn el la salona publiko jam eble kutimigita pensi, ke Pio la XIIa vere kulpas. Kaj tion konfirmis la oratoro per, aspekte respektemaj, taŭgaj citaĵoj el aliaj eminentaj opinigvidantoj. Kaj ŝajnis al kelkaj ke la aludo al la "katolika origino" de Hitler estus postulata pli el malforteco de la ĝenerala tezo ol el manko de informo pri la absoluta "antikristaneco" de la fondinto de naziismo.

En la havena atendejo, ĉar la enveturiĝo prokrastiĝis je kelkaj horoj, kaj poste en la reveniga aviadilo, pludaŭris konversacioj tiufacete. Kunvojaĝanto citis, ĉerpante el sia memoro, kaj komentis, el la membiografia romano de Primo Levi "Se questo è un uomo" (Se tia konceptiĝas homo), ties juĝojn pri aliaj lageroj kaj aliaj mortigitoj. Laŭ Primo Levi, itala juda lagerito, "la sovetuniaj lageroj juĝendas rifuzinda incidento sur la strato kondukonta al socialismo. Nur momentaj suferoj…". Stranga, oni aldonis, tiu juĝo pri reĝimo mortiginta nur incidente plurajn milionojn, diverslande, da homoj; kaj plej stranga se aplombe eldirita de iu kiu vidis laŭ pluraj jaroj mortigi milojn da siaj samsanguloj! Ĉu meritas konsideron kaj memorrajton nur la hitleraj viktimoj?

Diversaj vojaĝantoj, plejparte nepilgrimantoj, grupetiĝis daŭrigante rezonadi pri tia aserto de Primo Levi. Se envicigi en logika konsekvo la diversajn konversaciajn erojn, jen gvidfadeno kaj konkludoj.

La diskutado falis, aŭ kelka el la konversaciantoj ĝin faligis, sur unu el la ĵus cititaj asertoj de Primo Levi. Estis evidentigata penso-juĝo, kiu jam svarmis laŭ la tuta mondo ĉar gurdita kaj foje laŭde aprobita de seriozaj verkistoj

[2] Rilate Pion la 12a aldonendas, ke eminentaj lideroj de la hebrea komunumo konsilis la papon ne deklaraci-proteste interveni pro timo de la tuja pli kruela reago de Hitler, kiel jam plurfoje spertite. Tiu informo estis ĵus rekomfermita en la detalita intervjuo de rabeno David Dalin ]e Weekly Standard, legebla ankaŭ en diversnaciaj publikaĵoj, ekzemple en *Pio la XII kaj Judoj* (Piemme) de prof. Andrea Tornielli .

(ekzemple, per ne malsimilaj demandoj, de Simon Wissenthal en “Sunfloro”) kaj informiloj. Subtenas tiu penso, ke post Auschwitz, la eksterminkampo emblemo de ĉiuj similaj kampoj kie la nazioj provis kaj preskaŭ sukcesis plenumi la totalan genocidon de la judgento, kiun poste oni epitetis ŝoaho, oni ne rajtas plu paroli pri Dio, aŭ tiu ĉi ne plu meritas mencion aŭ aludon ĉar jam evidentiĝis lia malĉeesto el la mondo de la suferantoj. Kelkaj opinias, ke tia kritiko kontraŭ Dio implicas, krom malaprobo pri lia nekomprenebla se ne cinika konduto, ankaŭ la neon pri la ekzisto mem de Dio.

La atenton do oni faligis sur tian aserton, pri kies logikeco kaj konsekvenceco sin trovis ĉiuj tiom aprobantaj ke unuavide ŝajnis, ke la temo povus fermiĝi ĝuste pro akute hanta evidento. Sed timide estis enŝtelite, ke, eble, Primo Levi, fama itala juddevena verkisto, jam postvivinta post plurjara restado en tiu tragika eksterminkampo, intencis obĵeti, ke Dio, ekzistanta aŭ ne, devintus interveni kaj malebligi tian masakron pro ĝia evidenta enormeco kaj science planiteco kaj pro ĝia escepteco en la tuta homa historio. Tuj, al unu el la ĉeestantoj, eble pli malkvieta en la ordo de siaj pensoj ol rebata, venis al la lipoj jena reago, sendepende de la vera penso de Primo Levi:

*“Tio pensigas, ke se la masakro estintus je dimensio malpli escepta kaj malpli vasta, eble Dio povintus legitime esti rajtigita, ĝuste de niaj rezonadoj, resti for, kun cinika indiferento. Ĉu ne estas ankaŭ ni nun cinikaj?”.*

Eĉ tiu komento iom skrapis la konsciencojn ĉar ĝi lasis konsente pensemaj grupanojn. Tamen, eble la aprobo estis pli ŝajna ol reala ĉar akompanata de retenataj ridetoj kaj de gestoj montrantaj, ke konversaciantoj atendis el sia menso la precizigon de urĝe ordiĝantaj pensoj. Fakte al kelkaj eleksteriĝis dubo: *“Kiam masakro ekkalkuliĝas eksterproporcie granda kaj escepta? Primo Levi (kaj aliaj) uzintus la saman valorjuĝon se li konsiderintus la masakron aŭ genocidon kontraŭ la armenoj (1915-1918), en kiu mortigite pereis, nur!, unu miliono kaj duono da homoj? Kien lokigi la diskriminpunkton?”.*

Ĉi tie la embaraso estis ĝenerala kaj la dialogo procedis dispecete kaj per mallongaj frapfrazoj, el kiuj jen la suko: sendenpende de la nemarĝena demando laŭ kiu la problemo ĉiukaze devintus esti evidentigita jam tiam por ke oni ne aspektu tiom egoisma ĝis alertiĝi opozicie al la surmonda malbono nur kiam ĝi vipe urtikis la diskutantojn mem, eĉ la menciita armena genocido sin montris sufiĉe “granda”, do taŭga por postulema pretendo pri la dia malebliganta interveno, almenaŭ por ke Dio daŭrigu ĝui la reputacion de kreinto kaj savanto.

Ĉi-punkte la observoj fariĝis subtilaj spitantaj per ŝerctonaj kaj duonsatirecaj

frazoj. Amuzigaj vortoj, entenantaj tamen seriozajn deflankajn intuiciojn, kiajn: se Dio malebligintus tiujn vole celatajn masakrojn, ili certe ne okazintus sed neniu scius ke ili estis malebligitaj kaj Dio kontinuus resti obskura! Aŭ oni povus pensi, ke Dio devintus interveni almenaŭ je la mezo de la masakro; kaj kiu povus scii, ke ĉe tiupunkto la masakro estis atinganta sian duonparton koncedite, ke ni neniam scios, ke estis okazonta alia dua parto? Kaj kiel scii ĉu Dio reale intervenis por malebligi pluan ekstermon? Aŭ eble endas pensi, ke serioza Dio devintus interveni ekde la komenco, eĉ riskante resti neperceptata kaj nekonsiderata. Tio ŝajnas pli kohera kun la postuloj kaj bezonoj de la homaro kaj kun la indeco de Dio mem.

Ankaŭ tiu konkludo, eltirita per nur ŝajna nescio pri la seriozeco de la dramo jen rilate la oferbuĉatojn, ĉiuspecajn, jen rilate la supozitan indecon de Dio, konsideriĝis tuj samopiniata de ĉiuj. Vojaĝantoj premis por aŭskulti: eble pro la etoso verve ŝerca, eble pro tio ke almenaŭ kelkfoje la engaĝita pensado ne disigas de la aliaj kaj ne devas bagateliĝi por repreni kontaktojn inter personaĵoj. Post senparola momenteto la sameco de opinioj komencis disfranĝiĝi ĉar iu volis reveni al la origina demando pri la "kvanto aŭ grandiozeco" de la maljustaĵoj kaj de la masakroj por ke estu pretendata la dia blokanta interveno aŭ por ke Dio aŭtonome sin sentu devigata intermetiĝi. Kaj eksvarmis, el pluraj flankoj, dubigaj kaj problemigaj ekzemploj. Oni konsideru: se la planita elimino de hebreoj celintus nur al cent miloj da ili, kiel, laŭ Primo Levi, Dio devintus sinteni kaj konduti? kaj se nur dek miloj? Ankaŭ la germana (kaj sovetunia) agreso kontraŭ Polio (kiom da mortigitoj?) meritas certe inkluziviĝi inter la "grandaj" ekscitantaj la dian enŝteliĝon, ĉu ne? Eĉ ĉiu milito disvolviĝas tra murdadoj kaj masakroj kaj kunpelas premisojn de estontaj maljustaĵoj kun estontaj militaj aŭ gerilaj reagoj k.s. Kial niaj filozofiaĵoj permesus, ke Dio restu ekstere kaj indiferente en tiuj "minoraj" kazoj, kaj male ne pretendi, ke li montru siajn estecon kaj ĉeeston malebligante eĉ la "minorajn" masakrojn?

Ĉiuj konsentis, ke oni ne rajtas distingi kazojn gravajn disde kazoj malpli gravaj, se la mortigitoj estas amasaj. Sed la "esceptaj" cititaj aŭ aluditaj multobliĝis kaj aspektis ĉiuj egalaj.

*Laŭ mi,* komencas la ekzempla serio, enviciĝas inter la "grandaj" ankaŭ la masakroj plenumitaj de la islamaj integristoj en iuj landoj ĉar oni ne sukcesas kredi, ke tio koncedas al Dio sin malenŝteligi. Laŭ komuna saĝo, oni daŭrigis, estas teruraj, tio estas subigendaj al la malebliganta dia blokado, eĉ la agresoj, malplikvante masakrantaj, okazigitaj de la mafio aŭ tiuj transverse venĝaj inter mafianoj aŭ gerilanoj k.s. *Mi*, aldonas kelka, *ne ekskludus la dian devon inter-*

*veni ankaŭ en la krimoj de teroristoj...*

Ne prezentiĝis objĵetoj antaŭ tiaj konkludoj laŭ kiuj Dio devus montri sian ekziston kaj defendon pri sia honoro ankaŭ en tiaj eventoj: se tio ne okazas, signifas, ke tro malplaĉe io disonancas en la universala kreaĵo aŭ ke Li estas ne sufiĉe potenca!

Kaj tiel la penso, ke "post Auschwitz" Dio estas procese persekutebla forvaporiĝis pro tio ke sur la benkaro de akuzitoj, certe kulpaj, oni devus lin kunpeli ofte, ĉiutage, eble ĉiumomente.

Kaj kial koncedi, en niaj juĝoj, ke Dio forestiĝu kiam ŝiroŝtelisto mortige frapas, kvankam eble nevole, la kapon de aĝulino kontraŭ la ŝtona trotuaro? Kaj kial Dio ne devus malhelpi, ke ruiniĝu la ponto ĝuste kiam dekoj da aŭtoj estas tra ĝi ruliĝantaj? Temas ĉiam pri homa sufero, ofte kaŭzata de homaj kulpoj, eĉ tiuj ĉi ĉion pliigas! Kial dispensi Dion el laŭdeva interveno en tiaj kazoj? Kaj kiam sur la aŭtoŝosea placeto misfortulo sin vidas inerta kaj senpotenca spektanto de aŭtomobilo plonĝanta kaj mortiganta lian edzinon kaj liajn gefiletojn?

Se profunde preni sub konsidero, tiukampe ne troviĝas okazoj "majoraj kaj minoraj" ĉar la homa sufero okupas ĉiam la tutan animon de tiu kiu estas senkulpe frapita kaj de tiuj kiuj restas por plori. Eble endas taksi ne sufiĉe humana aŭ senigita je homaj sentemoj la opinio dispensanta Dion el lia devo interveni eĉ en "minoraj" suferoj, minoraj nur por kontisto. Dio estas, de niaj plejprofundaj pensadoj, devigata interveni ĉiam kaj ĉie. Ĉu tio ne apartenas al la nocio mem de Dio?

Antaŭ tia laŭdiskuta aserto, eltirita el faktoj eble vivitaj en unua persono, neniu dubis, ke disopinio estintus kontraŭlogika: fariĝis fakte pli kaj pli evidentaj, el nia kaj dia flankoj, partianeco, diskriminacio, preskaŭ rasismo vestita je justeco, kiam oni emas savi iujn kaj malsavi aliajn kvazaŭ niaj similuloj ne estus ĉiuj egalaj.

Kaj la konsideroj denove, ĉe opetoj, pliampleksiĝis tiusence: se licas pretendi, ke Dio intervenu por malebligi kiam estas pereanta homa senkulpa kaj senmalprudenta vivo maljuste frapita, kial ne rajtigi niajn pensojn pretendi, ke Dio malhelpu aliajn maljustaĵojn, foje pli hororajn ol persekutado? Ni ekzemplu per senkulpulo mortokondamnita pro juĝa eraro aŭ, plej malplibone, pro falsa atesto, aŭ frapita en tenera aĝo de mortiga kancero aŭ akcidento mortiga aŭ debiliga... Ne justas kaj ne eblas diskriminacii la suferojn: iuj forigendaj helpe de Dio, aliaj ignoreblaj ĉe Li, laŭ niaj pensoj. Ĉu tiu distingo estas farata por ne enmiksi Dion tro ofte en niajn aferojn, aŭ pro tio ke ni estas interesataj

pli pri tio kio ŝmacas aŭ ekscitas evidentan problemon? Ke Dio intervenu ĉiam kiam la homo suferas, eĉ la unuopulo!

Antaŭenirante laŭ tiuj konkludoj, unuanimis la konversaciantoj, oni finiĝas al la postulo, se ne pretendo kaj defio, ke Dio ŝanĝu la okazantaĵojn je ĉiu movo de folio, ĉar la okazoj de sufero estas sennombraj. Se validas tiu indukta rezonado "el grandaj al malpli grandaj, kaj el perfortaj suferoj al ĉiuspeca sufero", necesas pli antaŭeniri ĝis atingi almenaŭ kelkajn el la kaŭzoj de la suferoj kaj maljustaĵoj. Se pluhelpiĝi per ekzemplo: oni scias, ke la fonto de maljustaĵoj (kun ĉio kiu sekvas) kuŝas en la interno de la homo kiu libervole (ĉi tie ne interesiĝas la penso-agoj ne libervolaj) ne kontraŭstaras aŭ sin fordonas al la altiro de la egoismo. Se la malbono naskiĝas tie-ĉi, kial ni ne suspiras kaj pretendas, ke Dio malhelpu la naskiĝon mem de la malbono? Kial pretendi, ke li malhelpige agu kiam la malbono jam produktas siajn efikojn videblajn, anstataŭ ol li bloku kaj nuligu la malbonon ĉe ĝia la fonto mem?

Ne facilis, antaŭ tiu argumentado, por la ĉeestantoj sin liberigi de la devo konsenti ĉar ne estas iu kiu ne dezirus, ke la malbono, se tio eblus, estu forigata ek de ĝia naskiĝo. Ŝajnis nelogike ne aprobi. Nur post kelke da hezitoj okulumis la dubo, ke tia konkludo povas redukti la homon al simpla manekeno, tio estas senigita je la kapablo de libera decido: al li restus nur la scipovo elekti inter simpla bono kaj pli granda bono ĉar en la momento de la eventuala ekelekto pri la malbono, jen la dia blokanta interveno. Tiu sorto, tamen, ne estus aĉa sorto, eĉ estus feliĉa sorto, se ĝi similas, laŭ Dikredantoj, al tiu de la beatuloj ĉe Dio, al kiuj eĉ ne prezentiĝas la tento pensi kaj deziri la malbonon. Tamen ĉi-tere homo senlibervola estus manekeno. Ĉu belas perdi liberon por eviti la tenton kaj la eblon fali en la malbonon?

"Ni estas (rekomenciĝas la konversacio en atendeja saloneto tuj post anonco de nova prokrasto de la forveturo) projektantaj novan tipon de homaro. Ja necesus, ke Dio konceptintus kaj volintus homon tute alian. Fine ekfajras tio kion ni devas peti al Dio: homo malpli libervola aŭ neniel libervola: libera nur en... en kio? en kio, se ne estas spaco por la libera decido malsama ol la spontana impulso?".

"Malfacilas, tamen, imagi agon en kiu ne videblas la devo respekti la aliajn... kie kerniĝas ankaŭ la risko tion vole neglekti. Kaj tiam bezonus ree ŝanĝi la homon!...".

Al la menso de kelkaj alvenis rememoraĵoj de lernejo, aŭ iom engaĝaj legaĵoj, kaj kelka atentigis, kvazaŭ malkovrante ion jam ensceniĝintan:

"Tio estas la klasika problemo de la ekzisto de la malbono en la mondo:

ĝia ĉeesto ŝajnas malrajtigi pensi, ke ĉe la origino staris (kaj staras) la kreiva ago de iu Dio ĉiopova kaj justa kaj bona, dum male se oni akceptas tian Dion, ŝajnas necesa la neado de la malbono en la mondo: kio absurdas ĉar kontraŭevidentas!”.

“Entute, tujas alia, tio ne estas la problemo malkovrita de Primo Levi (kaj de ni), sed la problemo de ĉiu homo de ĉiu epoko, la problemo kiu okupadis la menson de sennombraj filozofoj kaj ankaŭ, kvankam konfuze, la nian nun”. Ja, Primo Levi plisentis ĝin nur en tragika momento.

La diskuta dialogo kvietiĝis, sed restis ankoraŭ tempo, antaŭ ol ekdormeti sur aviadilseĝoj, por fina konsidero eksplicite lanĉita de mi: “se Dio ekzistas, Li ververe malsamas de ni kaj ne eblas dikti por li dekalogon de konduto. Iam la biblia salmisto sin sentis venkita kaj ĉirkaŭata de ĉiuspecaj malamikoj kaj limiĝoj, sed ne sin sentis embarasita vidi Dion sia liberanto kaj savanto. Eĉ pli: alia profeto enbuŝigas al Dio: *Ĉar miaj vojoj ne estas kiel viaj vojoj! Kaj miaj pensoj kiel viaj pensoj”.*

Min trafis ankaŭ, el la publiko, kaj finis la konversacion en la aviadilaj koridoretoj, serioze-amuze komentita, jena demando-respondo:

*“Kion vi scias pri la sukcesintaj krucmilitistoj?”.*

“Ke ili estas hebreoj, la konkerintoj kaj nunaj posedantoj de Palestino!”.

Unu plue spicis salon en la supon, sed ne tute simpatikapte: *”ja hebreoj estas la kukoloj en niaj socioj. Ili ovolasas en la nestoj de nia kulturo marĝenigante nin kaj okupante la plej produktivajn kombinaĵojn”.* Sed ne al ĉiuj tio plaĉis, samkiel ne obtenis konsenton alia propono: *havi por judoj kaj judecaj aferoj la samajn juĝojn kaj sintenojn kiujn ili nutras por kristanoj!* Ĝi ne plaĉis pro tio ke tiel la ĉeno de reciprokaj antaŭjuĝoj definitive ĉarniriĝus!

Alia kriis: “Tamen savo el hebreoj, do ke ili revenigu al si la tutan palestinon rabitan de islamanoj…”. Sed invito okupi sian seĝon kaj hoki la zonojn signifis, ke oni forveturos.

Fine la plurhora malfruo konsumiĝis kaj la aviadilo ekflugis.

Ni deteriĝis al Italujo kun la animo ĝoja pro la kontakto kun la historiaĵoj de Kristo, sed ankaŭ sintezante tiel: *“Ho Palestino, koncentrejo de krucoj!”.* Ankaŭ ni, samkiel multaj pilgrimantoj, ĵuris, ke ni revenu por pli longa kontakto kun sanktejoj kaj loĝantoj kaj historio.

Por unu evento mi ne sukcesis kombini tempojn kaj okupojn: partopreni kunvenon de lokaj esperantistoj, kvankam delonge informita kaj elkore invitita kaj persone premita de temo traktota kiu sonis aktuala: *tutmondiĝo, bonaĵoj kaj malbonaĵoj, kio komunas?* Mi min preparis vorte lobii katolikan tezon: ek

tutmondiĝo je kondiĉo ke ne estus venkitoj. Tutmondiĝo merkata ktp kun reguloj certaj kaj devige respektataj.

Urĝis nin reveni tuj hejmen la ĉiutaga telefona komuniko el Italujo: nia filino ne plu kapablas, ŝi informadis, elteni sian, al kiu jam kutimiĝis, suferan staton tiom, ke kuracistoj proponas enhospitaliĝon.

## Ĉapitro deknaŭa
# Ĉe la fino la tragedio

Por feliĉi sufiĉas sin senti posedanto je kio havinda. En la sako de miaj ĉasaĵoj kuŝas en propraj postenoj: edzino, urba loĝejo kun kampara dometo vilaĝcentraranda, ekonomia stato senmanka, socia grava alirebleco kun vasta akceptateco, mensulaj ambicioj, parte kontentigitaj per la estimo ĉe konatoj kaj per invitoj prelegi elĉerpe el miaj kulturaj esplorkampoj kaj traktemo pri ekzistismaj kaj ekzistencialaj problemoj. Kaj plue la neniam forgesita Elvira, kiu nun atingas la dudekunuan jaron kaj ekparolas pri geedziĝo kun juna inĝeniero: la projektoj jam ekfariĝas planoj.

Veras ke Elvira estas devigata rezigni pliprogresi ĉe la konservatorio jen pro manko de tempo, jam tute ensuĉita en la prifizikan fakultaton, jen pro ne eksplikebla ĝenerala febleco, kies kaŭzoj kuracistoj, kvankam nur hipoteze, benigne diagnozas; veras ke, aldona dekomence juĝata apenaŭ ekscesa spicaĵo, ŝi ĝemetas pro insista kaj abrupta kapdoloro. Sed, kvankam tio, ĉio enordas kaj ĝis antaŭnelonge ne deŝarĝis je prosperaj prognozoj.

Tamen iom post iom mi ekcerbumaĉis en miaj pensoj ankaŭ tian: feliĉon mi ekposedis iam, eble hieraŭ aŭ en ĝi mi mergiĝos morgaŭ. Iam ĝi staris antaŭ mi, kiu estis laŭvole ĝin kaptanta; iam foje mi min montris konvinkita, ke ĝi estas je mia dispono, ke kun ĝi mi vere povas amindumi kiam ajn mi volas, kvankam, foje, timanta ĝin tuŝi por ne riski ĝin forvaporigi. Nun, male, ĝi pentriĝas ĵus pasinta aŭ nebaldaŭ venonta: eble ĝi konsistas nur el espero pri ĝi aŭ en ĝia daŭre opiniata alproksimiĝo.

Tiuj estis la pensoj min gutete invadantaj el la novaj antaŭsignoj de obskura minaco kaj el senutila baraktiĝo por eliri el ties perspektivoj. Kiel ajn la nuna minaco detruas ankaŭ la memoraĵojn pri pasintaj feliĉoj.

Ankaŭ la memoro de aliaj suferoj aŭ malfacilaĵoj, devenintaj el konduto-evoluiĝoj ĝuste de Elvira, nun forgesiĝas, eĉ konturiĝas je haloo de allogeco. Kelkfojojn antaŭe mi konstatis, ke Elvira ĉiam pli kaj pli provis sendependiĝi el miaj familidirektado per elektoj malsamaj ol la miaj; samtempe rimarkis, ke en mi, pro tia ŝia pretendo, estas perdiĝanta io sur kio senaverte praktiki sendiskutan emon al regado kaj al memkontenta obeigo. Mi certe scie-sperte instruiĝis, ke tia sendenpendiĝemo estas palestro kaj enigmo en la homa juna psiko; sed, fakte, antaŭ tiu nova transiĝo mi sensis ke io frustracia malpliigas viv-

ĝojon. Kaj samtempe konstatis, ke, ĉi-foje la sufero pro ŝia volo sendependiĝi ne limis, en mi ĉiam en muelaj memanalizoj, obskuran deziron esti kontraŭata aŭ almenaŭ kritikata por havi okazon glatigi obstaklon kaj venki por atingi pli kontentiĝan memelstariĝon.

Mi devis elvokigi tutan mian sciaron pri adoleskula psikologio kaj pedagogio kaj spertaj lernitaĵoj jen por akcepti pliseniĝon de mi ĉe ŝi jen por inspiri al ŝi direktivojn sufiĉe rezistajn kaj senreziste asimileblajn jen por ne lasi ŝin sena je moralaj sorbadoj. Estis tempoj osciligantaj inter seniluziiĝo kaj persona realĝustiĝo, inter indulgemo kaj aŭtoritatemo, inter igi min neanstataŭebla fiksapunkto kaj min akcepti malaperema gvido. Eĉ kiam ŝia konduto kaj mia sinteno atingis faktan akordiĝon, en mi restis sento de io perdita.

Nun la malcertecojn enigitan de ŝia malsano forgesigas eĉ simpatiigas tian ĵusan duonkontestatan pasinton.

Reveninte el Palestino, ni trovis Elviran senforta kaj senkuraĝigita. Kompreneble, kiam la dekoj da akurataj ekzamenoj pri la simptomaj aspektaĵoj kaj la ordinaraj kuracadoj ne plu sufiĉis, ekdisvolviĝis ekzamenoj ĉe malsanulejoj, rafinitaj sango-testoj kun pli kaj pli profundigitaj analizoj: ĉio en ordo, ĉio laŭdezire! Tamen ellitiĝinte, ŝi montris la okulojn lacaj kaj trasulkataj pro sendormo, ŝia delikata buŝo akcentadis la du simetriajn ĉelipajn faltetojn kiuj iam al la gepatroj fizionomiiĝis graciaĵoj. Konstanta laceco ekokupis ĉiujn ŝiajn membrojn ĉiuhore. Ekprovo ŝin skui per aludo al malagemo aŭ similaĵoj ofendis la veron kaj ŝiajn surprizitajn okulojn. Dum la unuaj vekiĝaj momentoj ŝi bezonis subtenon por ebligi paŝadon; diversaj refortigiloj estis flankenlasataj pro evidentaj senutileco aŭ malutileco. Konsekvence de diagnoza malsameco nia malcerteco ektranslimiĝis al angoro.

Je kontakto kun amikoj ŝi rekuperadis iom da forto alprenante viglan sintenadon kaj sukcesante eĉ ludi, sendolore laŭ dekminutoj, orgenon en preĝejo. Estis, ĝuste ĉe la fino de liturgia ceremonio, ke ŝi svenetis sur la instrumenta klavaro. Ĉe malsanulejo ni ricevis la saman respondon: eble nerva ekelĉerpiĝo aŭ nekutima streĉiteco, kombinita kun io psika, bezonatas kromaj pli certigaj testoj; sed estis klare, ke kuracistoj de la tuta medicinosekcio iris palpe en mallumo. *“Neniu specifa signo rajtigas certiĝi pri io preciza, sed alia simila kazo poste sin pruvis leŭkemio mjeloblastika”.* Almenaŭ tiaj la nerondaj sciigoj pli uzitaj.

Ĉar la sanstato maviĝis okulfrape, ektrudiĝis urĝa tiufaka kuracista konsultado.

Petinte kolokvon kaj novajn testojn, ni aŭtomobile kaj per kurtaj etapoj kaj

lantaj marŝoj alvenis ĉe la hospitalo de Liono, fama pro akurateco kaj precizeco kaj rapideco. Post oktaga enhospitaliĝo, Elvira estis ellasita kun la invito reveni post du aŭ tri monatoj. Ankaŭ por tiuj kuracistoj, la malsano ne jam liveras signojn sufiĉajn por sia identiĝo, *sed la tute konfidenca hipotezo de viaj kuracantoj ne malŝatindas.*

Kaj religio? Kaj preĝoj? Post la preĝoj kaj la konfido je Dio, venis pensoj kaj dramoj. Iam, kiam la cirkonstancoj alŝutis oportunaĵojn al la spekulativaĵoj, mi kredis eltrovi (kiom scias tiom da pensemuloj tion jam malkovris!), ke en kristanismo ne povas flori tragedio ĉar la problemoj, je nivelo de la intelektaj postuloj, estas ĉiuj solvitaj, tiuj ĉi rekreiĝas nur se tiuj solvoj obskuriĝas aŭ estas rifuzitaj de la libervolo. Entrudiĝas fakte la tragedia etoso nur en homo prikonsideranta sian sorton sencela kaj blinde okazanta. Sed kio sciatas de kristano, nome liaj origino el Dio kaj destino ĉe Dio, kaj ties providenco transformanta ĉiun doloron, eĉ morton, en alproksimiĝon al Dia amo... Nu, ĉio ĉi akiras tiom da konsola aŭ malkonsola forto kiom da grado de vola akcepto aŭ malakcepto: vera dramo kuŝas nur en tiu ĉi ebleco aŭ povo: akcepti aŭ malakcepti. Sed tiu ĉi estas operacio de la homa libera volo, ne de la nesolviteco de destino-problemoj. Kompare al la greka tragedio, en kiu estis debatitaj kontraŭdiroj de la destino subiganta eĉ la diajn potencojn, aŭ kompare al la tragedio eksterkristana kies precipa objekto ludas interhomajn luktojn, la tragedia drameco de la kristana medio koncernas nur la rilaton inter la libera volo kaj ties elektoj, la riskon elekti, en allogiĝo pro kadukaj kaj forpasiĝontaj bonaĵoj, kontraŭ la dia volo, konsekvence kontraŭ si mem. En kristanismo ne tragikas doloro kaj morto kaj ŝajnblindaj destinoj, tragikas la homa ribelo el kiu tamen oni povas eliri unubate: sin forlasante al la Divolo kaj kunlabori kun ĝi por la savo propra kaj aliula.

Tiaj miaj iamaj pensoj. Sed nun, kiam la tristeventoj tuŝas min rekte kaj sendelikate, ĉu plu validas la samaj konceptoj? Ĉu vere ĉio solvita, kaj do neebleco de tragedia vivo? Ĉu mi kapablas eliri el tragedieco luktante kun malsano, kaj akceptante la dian volon?

Certamomente, senmire, mi tute konscie perceptis, ke jam ĉirkaŭ mi, en miaj subpensoj, pendas la ĉeesto de morto. Jen la nova vizaĝo de la plej akurate ordigita realo!

Remaĉaj novaj taskoj nun okupas miajn tagojn, miajn horojn: scii pri kazoj similaj al la malsano de Elvira, kaj kvietigi ŝiajn terurojn kaj konsoli la afliktiĝon de Albina. Ni gepatroj altrudis al ni mem la taskon de la gajeco en babiladoj kaj kutimaj sintenoj liverante konfidon kaj esperon; sed ĉiu, eĉ Elvi-

ra, konservis en sia animfundo angulon tra kiu travidiĝas io pesimisma. La filino komencis, eĉ je nivelo de vortoj, diri, ke por ŝi ne restas estonto. Eĉ respondante mildriproĉe, aŭ per esperigcele atente pensitaj argumentoj, familianoj kapablas kvietigi laŭlongatempe ŝiajn juĝojn pri si. Ektrafis samtempe ankaŭ la normaleca tono per kiu ŝi esprimis tiujn antaŭviditaĵojn pri si; eĉ kun siaj geamikoj Elvira ekuzis la saman tonon kun aspekte senemociaj vortoj.

Kiel abrupta ekzekutiĝo de ĉio patra, elstare eksaltis el jena ŝia ne antaŭvidita ensalto:

"*Paĉjo, paĉjo!*, aspekte serenmiene sed eble senespere alvokante savon, *mi devas adiaŭi senrevene".*

Kial mi ne antaŭvidis kaj ne hakis aŭ bridis la eknaskiĝon de tiuj vortoj?

*"Adiaŭi muzikludadon, eble; aŭ rezigni la mondrondiron, certe...",* hastis komenti mi.

Dume, fulme el profundaj miaj homaj kaŝejoj ekeltiriĝis klara kaj terura penso ĉesojle kuŝanta: ĉu al mi estos altrudite vidi ŝian morton? Kaj tiel la rondiranta timo korelŝire atingis konkretecon de eskpliciteco kaj, kvankam en sekretaj memdialogoj, eĉ pervorte!

Apenaŭa aludo al tiu maviĝo kontraŭreagigis Albinan kvazaŭ la vortoj kreu la eventon!

Fine la duboj ne plu rajtis ekzisti: la centa specifa sanganalizo, kun apendicaj DNA-ekzamenoj, rivelis la originon de ĉio: leŭkemio mjeloblastika en kombino kun la sindromo de Sjogren atakanta la imunan sistemon survoje al evidenta lupuso, sur kiu eksperimentitaj kuracoj konkludiĝis ĝis nun senefike!

De nun la ondo de miaj tristoj iĝis tajdo martelanta ĉiusekunde. Senspiriga, post turmenta pertrajna vojaĝo, reekzameno ĉe la Liona ĉiumalsana kuracejo, el kiu enfuneliĝis en la gepatran nekredemon la sama diagnozo. La kuracistaj klopodoj allasantaj ion da espero luktis kun ilia kontraŭa deklarita sperto kiu tratranĉis la esperigan dubon mem.

Nun el la tasko de la konsolo mi enfuneliĝas en sorton akompani al morto, al paŝoŝtela morto, mian solfilinon. Kaj la enormaĵo enirigis ĉion, jam ne plu laŭintervale, en la ombron de tristeco, en kiu oni mense vagas serĉante kion aŭ ĉe kio pledi aŭ kontraŭ reagi!

Nun konstantaj emocioj ekscititaj de literaturaĵoj kaj vivrakontaĵoj aktualas pri mi kaj ene de mi. Se la patra amo pretas por ĉio kaj por donadi ĉion posedatan kaj alfronti mizeron, eĉ pretas por oferi sian vivon, eĉ tia amo impertinente sin montras senutila! Same kiel besto kiu el prizoniga kaĝo vidas buĉi sian idaron, mi freneze turniĝadas al mi mem hantata de, ne eĉ laŭmomente ĉe-

santa, obscena vizio. Eĉ senpensa sendormo ne eblas ĉar okulo kaj orelo zorge atentas percepti kion ili ne volus, nome penaj movoj kaj lamentoj de la filino, aŭ rekrei kaj gardi la kvieton ebliganta la dormon de Albina, kiu tamen subfosas en senreago sian angoron por ne pliakrigi la mian.

Prizonulo en la amaso da senordigitaj psikaj renversaĵoj mi pasas de unu ekstremaĵo al alia: la devigo eksciti esperon ekkunvivas kun surda sinteno rilate Dion. En senregule regataj protestaj reagoj mi malkovras, ke mi pretas ŝanĝi, se eblus, la konsiston de Dio mem. Eĉ miaj vortaj aludoj ekesprimas neakcepton pri diaj tiukazaj decidoj. Albina komprenas mian osciladon inter espero kaj surda riproĉo al Dio.

*"Via Dio*, ŝi bedaŭras, *ŝanĝas vizaĝon. Lin vi balancas el beno al malbeno, el laŭdo al mallaŭdo!... Se Li intencas nin beni, via aktuala ribela sinteno forigas lian intencon. Ĉiukaze ni scias, ke la preĝo neniam vanas kaj vi, foje preĝas, kvankam duonpaŭte".* Evidentas, ke ŝiaj rimarkoj ne naskiĝas el korŝtoneco, kaj ankaŭ intuiciigas kaŝitan, nune renoviĝantan praktikan vivkoncepton, kiun mi, male, provas submeti al senelireja ĉantaĝo.

Reale, iom post iom, en miaj mensaj "kunsidoj" kun Li malfacile distingeblas la preĝo disde la ironiaj paroladoj aŭ ne vualitaj riproĉoj. Jen la pensoj plejofte okupantaj mian menson konfekciitaj de mia ribelemo kiel venĝa kompenso, foje furioze kaj sennuance, registritaj en taglibro: *"vi, ho Dio, kreis la doloron, vi satiĝas de la homa doloro, vi vin pravigas per la promeso de via amo dum vi enfosas homojn, ni al vi redonas integra la universan kreitaĵan ploron. Via amo tretas la adresitojn de tiu amo".*

Foje angoro igis min krii, ke li estas cinika. Kaj sfinkso ekfariĝis antaŭ mi la nedeĉifrebla nova vizaĝo de Dio.

Al perdiĝo la poezieco de la, bildige karesitaj, kaj preskaŭ kontaktaj, jamaj pensa-koraj renkontiĝoj kun Li!

Ĝuste tiuj ĉi tamen reelmergiĝas en la memoro.

Kaj en tiu valo de deprimo, estis daŭre, tragikkomike, pardonpeti tra intima ribelo, aŭ ribeli tra sinceraj pardonpetoj.

Tamen en anima angulo mi ne tute malfajrigis la kunekziston de la certeco, ke Dio en Kristo rivelis la venkon kontraŭ la morto, ke la mistereco de la doloro ne detruas la klarecon de la dia amo, ke la mistereco de la eksufero koncernas nur la kialojn de la diaj dispozicioj aŭ la homajn komprenojn pri Lia agado, ne la celon de la dia konduto, kvankam ĝuste tiu celo ne tute plaĉis al mia volo pretendanta havigi al si tujan feliĉon aŭ eksenmaskiĝon de la kriterioj de la diaj decidoj. Sume, tiuj disŝiritaj pensoj estis, mikse kun malinklinoj, kiel

lumspuroj en krepuska ŝtormo.

Stumpo de mia tiutempa taglibro, registrita certe kun la intenco min senkulpigi, troveblas*:"Eble mi malbenas la aferojn plej ameblajn por gajni pluan certecon pri ilia konsisto".*

Enŝoviĝis, kaj tio pliakrigis nian misorientiĝon, dum la momentaj ekscitaj cerbumaĵoj de Albina, ke tiu disfalo povus esti puno pro nia aplomba decido pri geedziĝo spite la perceptitan devon realigi *alian vokiĝon. "Nia vokiĝo,* ŝi elfosis el meandroj de siaj penskaŝejoj, *ĉar ankaŭ mia sorto estus alia, eble tiu de fraŭlino, se ni ne estintus indulgaj al nia inklino".* Ŝi pri tio jam elverŝis, mianescie, sian streĉitan koron al katolika konata presbitero. Tion mi pene toleris kvankam liaj respondoj estis identaj kun la miaj: neniu rajtas pruntedoni siajn interpretojn al Dio, ĉar tio estus malrangigi Dion je nia nivelo, do Lin malutile idoligi, ĉar funde eĉ morto de filino estas nur la peranto de la Dia Graco, kaj fine nia geedziĝo ne disdegnis, eĉ fine obtenis, la eklezian benon. Ĉio mensnivele klara, por mi kaj por ŝi, kornivele tamen en tensia serĉo de pli niamezura respondo. Eble liaj instigoj kaj Albinaj rekuperoj bridis, ke ŝi eksentis katarse, kvazaŭ kontentiĝa akordiĝo inter suferoj kaj peka stato kun konsola inkliniĝo al novaj afliktoj.

Kiel oni vidas, je nivele de juĝo mi konservis la ekzaktan kristanan pridian koncepton; miaj sentoj, male, laŭriris pli tra la ijobaj protestoj ol tra la Jesuaj ensciigoj pri nia ĉe Dio finiĝo.

Okazis ankaŭ la iluzio de ŝajna saniĝo, al kiu ni alkroĉiĝis, kun la suspekto tamen, ke nia tro kovita espero povus senkompate ruiniĝi per la probabla posta elreviĝo. Elvira ekaspektis freŝige babilema kaj iom interesata je libroj. Mi kaj Albina reciproke rigardadis kaj kun hezitema fervoro reciproke spronadis emigi nin kaj Elviran de nova konstato al espero, kaj ne forgesis, ke ni ĉiukaze estis ricevantaj grandan favoron: ni revivigu do nian dankemon kaj reakiru spurojn, jam forgesitajn, de la kutima ĉiutaga gajo. Por pli forte enŝteligi iluzion kunludas refloro de la vizaĝsanaj koloroj dum ŝiaj muskoloj aspekte streĉiĝas preskaŭ normale kaj sendolore kaj la endokrinaj glandoj iom pli refunkcias, tiuj salivaj iom kreskigas la kvanton da likvo kaj tiuj larmsekreciaj ekhumidigas iom pli la okulojn. Ankaŭ la streboj por venki malemon al parolo kaj por aspekti, eĉ ekstere, afabla kaj kontenta kun vizitantoj nun ŝin ne lacigas kaj foje ŝiaj fingroj provas ekaraneeti delasitajn melodiojn, kiujn mi ne sukcesis komplete ne suspekti kiel la lastajn ŝiajn alkroĉiĝojn al la vivo.

Kuracistoj diversmaniere eksplikis la fenomenon. Povus esti, almenaŭ pormomenta, spontana solviĝo de la kancero, allasis la malpli informitoj pri la na-

turo de tiu malsano, sed certe neeblas tiukaze liberiĝo de la gena misformaĵo. Aliaj, ne volinte nin esperigi je tiu ĉi solvo, nin nur delikate ekdubigis; ĉiuj unuanime konvenis en la prokrasto de la planita plia kuracado kvazaŭ-kemioterapia. Familia kuracisto vuale invitas, ke ni profitu la plurestadon de la filino por plugute ĝoji. Dume oni insistis per rekapabligaj kuraciloj. Ĉiuhore, ĉiuminute ni estis spionantaj la reagojn de ŝiaj korpo kaj psiko. La iluzio daŭris tra ok monatoj, kalkulitaj kaj ĝuitaj pogute: la potenco de espero, subtenata de favoraj signoj, kvankam ĝenata de, eble vole dampita, fone rekreiĝanta timo, igis tiujn tagojn dezireblaj, kaj min tenis sur la sojlo de espero tute preta invadi la universon per la himno al l' vivo.

Sed la vorto kiu valorus pli ol la tuta mondo ne eliris el niaj lipoj: iun nokton Elvira ekploris pro doloro ĉe la dorsa spino, dum la postaj tagoj ekdoloris ŝin ankaŭ la brakoj: estis decidite de kuracistoj pluinsisti laŭ la, momente prokrastita, kvazaŭ-kemiterapio, kiu certe faligos, oni nin avertis, harajn belaĵojn pro akompanaj malbonaj fenomenoj.

Nia antaŭa ĝojo, abrupte, aspektis ĝojo malŝparita kaj uzurpita, ĝojo senrajta, ĝojo mokeca kaj piloria, eĉ elradiita ĝuste por priridi naivulojn. La samaj pensoj ektrapikis mian animon: Dio reenloĝis denove inter la neagrablaj misterecoj!

Dume la intensa terapio estis subtile/trompe ĉifoniganta la belan vizaĝon kaj iomete seniganta je la jam maldensiĝinta hararo ŝian kapon kaj tratranĉigis al ŝi preskaŭ ĉiujn rilatojn kun konatoj kaj amikoj, kaj jen la soleco kiun mi kaj Albina devis repopoligi per inventaĵoj ĉiuspecaj por malhelpi, ke ŝia menso kristaliĝu laŭ unu penso, la senespera penso pri la hororeco de nova aspekto, forviŝante ceteraĵojn.

Tiu ekzerco, siamaniere, okupis nin kaj puŝis en duan vicon la disfalsenton, kiu tamen impetis sur nin kiam Elvira, jam alforĝita grandparte al la lito, sukcesis sin senti akceptita de la dormo, antaŭe alvokita kaj flegita sed fakte dissolviĝinta inter pensoj ĉiam pli akrapintaj. La bruojn el la strato aŭ la oftajn intervenojn de la flegista deĵorado, tiujn tagojn, ŝi ne perceptadis kiel ĝenon sed laŭprefere kiel invitojn eliri el siaj doloraj pensoj. Sed estis efikoj de kontraŭdolora medikamento.

Ankaŭ en la novaj alvenantaj tagoj de ŝajna sanplibonigo, preskaŭ ĉiutage, vespere, aperadis, ĉe hejmo aŭ malsanulejo, kun ridmieno, ŝia jam de longe preferato, kiun ni gepatroj pasintstile nomis "ŝian fianĉon", por ŝin distri petole ridante pri amuzigaj naivaĵoj aŭ geniaĵoj de komunaj amikoj, foje aludante la planojn de la estonta geedza kunvivado. Iun vesperon li, pli gaja ol normal-

kaze, pretendis, ke ŝi fermu la okulojn kaj prezentu la maldekstran manon: kun rapida gesto li surglitigis altvaloraĵojn en ŝian ringofingron. Mi kaj Albina, alvokitaj de iliaj ĝojaj ekkrioj, algapis la finan parton de la neantaŭvidita sceno, kaptitaj de sentotumultoj serĉantaj komplimentajn vortojn je logika senco dum ŝi montre disetendis la manon por admiri, kaj admirigi, la efekton de la gefianĉiĝa ringo.

Ĉu plori aŭ kaŝi senesperon? Albina ekeligis plorsingultojn dum mi restis muta mienante ridetsignojn por la gefianĉoj turnigantaj siajn okulojn al mi. Promeso senestonta, espero spite desperon. Ĉu ili konscias? aŭ la ĝojo mem jam konsistiĝas nur en la simpla ceremonio? Je kio kontentiĝas la homa koro en desperaj momentoj!

Amikoj venis komplimenti per floroj kaj kuraĝigi. Dum la improvizita, dekminuta, festo, la malsano kaŝis iomete sian hidan ĉeeston; tial Elvira sukcesis rideti kaj, eble, pensi ion alian kaj ĝoji kaj iom distancigi el sia menso la propran realan futuron.

La fianĉo scias, informiĝis pri ĉio. Kio motoras lin al tioma ammontro al mortonta virino? Krom sincera amo ĉu ankaŭ espero? espero pri kio? Certe, ankaŭ en li, edukiĝinta same kiel Elvira en katolikaj medioj, ĉion penetras la kristana karitato, la amo kiu descendas el alto.

La demandoj rektaj aŭ telefonaj, prizorgaj kaj partoprenaj, de konatoj kaj najbaroj, fontantaj certe el sincera kunsufero, ne stimulis en mi dankeman sintenon, male, stimulis deziron, ke neniu min devigu priskribi aŭ paroli aŭ aludi pri evento grandepaŝe falanta sur ĉion mian: pro tio miaj respondoj tiel ekrapidis ĝis travidigi latentan deziron fermi la konversaciojn. Ilia doloro ŝajnis, krom aperiĝo kaj agnosko de komuna nepovo, ankaŭ hasteca rezigno pri plua espero.

La brodaĵoj sur ŝiaj geedziĝaj tolaj dotaĵoj daŭrigis esti plipuntitaj zorge de Albina laŭ la sugestoj de la malsanulino kaj, okaze de fianĉaj vizitoj, montradis, momente subtenate de ŝiaj laciĝantaj muskoloj, desegnajn laboraĵojn, etenditajn kontraŭ okazaj tablaj kaj seĝaj tabuloj aŭ fenestroj aŭ murvandoj, spacoj similaj al tiuj delonge imagitaj en la domo de la kredita tuj baldaŭa geedza kunvivado. Ŝi esploradis opiniojn pri la plej agrabla efekta pozicio de pentraĵoj ornamontaj ŝian domon, jam antaŭe aĉetitan de la du familioj parenciĝontaj.

*"Ĉu lumo tro forta el tiu fenestro? Ĉu prefereblas duonombro? Ĉu ne konvenas al la harmonio de koloroj apudmeti tiujn ĉi anstataŭ tiujn?".*

Estis cent la demandoj, sensencaj por la aŭskultantoj sed allogkreaj por la

demandantino, kaj la agoj direktiĝantaj al iluzia feliĉa estonteco. Ĉu espero aŭ la forto de iluziiĝoj artifike subkonscie kreitaj por plurezistigi en la vivo? Ŝi provas ankoraŭ unufojon, ĉu aŭdaca reago?, kurigi fingrojn sur la fortepiano sed la klavarumado singulte missaltas pro subita muskoldoloro, dum ni ĉiuj hastas konsole vuali la veron: *"Tro frue! Tro frue! Revenos la fortoj".*

Mi opiniu, ke eĉ ŝi konsciis, ke la mensogo ne estas nura amara neceso, sed probabla vero ĉar mi elpuŝis tion kun tioma energia vigligo ke eĉ mi, laŭ-sekunde almenaŭ, konvinkiĝis. Sed kelkajn horojn poste ŝi aldonis kun rideto kompatema al ni kaj ironia al si:

*"Per tiu misludo mi ellogis vian delogiĝon. Mi nun suferigas ankaŭ aliajn. Jen per ŝajnfestado mi jam malarangâs ĉion bonan kaj belan!".*

Trafita de tiuj vortoj aŭ samhavaj esprimoj, protagonisme ĉion absorbantaj, mi denove penis teni sekreta eksentan ribelan impulson, kaj alvokis Dion ironie *"la granda rastanto de homoj!".* Se iam ajn mi provis trakti Dion kiel molaĵon taŭgan al ĉiokonturiĝo sur kies fono tamen brilis lia patreco, nun li transformiĝis al cinika malmolaĵo kontraŭ kiu frakasiĝas ĉiu espero. Sur min li volas fali kiel bloka ŝtono!

Tuj entimiĝante pri mia enormaĵo kaj dezirante esti pardonata, mi volis resenti kaj ripeti, karne kaj oste, ke konsenti kun Dio egalvalorus nur ŝajne sin senigi je ĉio sia. Tia subita certeco min akompanis, kelkahore kaj favoris etajn haloojn de momenta paco. Dio, sume, antaŭ mi estis ĉiam balanciĝanta inter destino kaj tristo: destino ĉar mi ne sukcesas, malgraŭ vola klopodo, ne vidi en Li la kreinton kaj la homan celon, tristo ĉar penoj disvastas en lia plej morna silento.

Tamen tiujn ducent tagojn, tagoj de la iluzio, estonte, mi rememoros pogute kvazaŭ mi provus haltigi la tempopason por pliprokrastigi ĝian nuliĝon.

Trian fojon abrupte, sed antaŭvidite, ŝi devis esti enhospitaligita por kromaj pluaj kuracoj kaj por bremsi negativajn reagojn de la kuracila kombinaĵo. Ĉu ŝi revenos hejmen? ĉu akcepti, ke ŝi forpasu hejme aŭ ke konsumiĝu ŝiaj lastaj horoj en hospitalo? Kio transdonu al ŝi ankoraŭ gutojn de espero, kvankam nur iluzia?

Ni pasigis tagnoktojn ĉe ŝi kaj, kiam ŝajnis, ke ŝia sufero iom kvietiĝis, ni gepatroj oficiale vizitis Mariasanktejon al kiu ni intencis pilgrime iri de kelka tempo, ne kaŝante al Elvira, ke ni volas plipetegi, ankaŭ per eksteraj agoj kaj kun ekstremaj animdisponeblecoj, en tiu ĉi momento en mi vere sincerigitaj pli de volo kaj rezonadoj ol de sentoj, ŝian saniĝon. Ŝia reago restigis min preskaŭ senvorta kaj amuzita ĉar ŝi, kun kalkulita gajeco, preskaŭ bonhumure

ellasis:

*"Se vi atendas ankoraŭ iomete, vi farus kiel la sinagogestro Jaros kiu obtenis pri sia filino ne sanon sed resurekton! [1]".*

Surprizite, defunde mi lasis burĝoni humila inklino al la Dia volo. "Liberigu min el doloro, sed fariĝu via volo". Ĉu cedo pro nepotenco aŭ kora allasiĝo? Mi ne volis tro analizi tiun dubon, por ke ne estu malkvietigita la nova eksinteniĝo kiu estis trapasanta mian enon, post nelonge tamen dementita, furioze dementita.

Ke reeĥas funde de ĉiu kredanto senkredulo aŭ klopodanto muldi Dion laŭmezure de sia deziro, kiel mi ĉiam opiniis, nun tion mi en mi konstatis: denove mi provis, per erupcioj de ironiaĵoj, fleksi Dion al mia deziraro: *ke li prirezignu siajn pretendojn, siajn planojn, sian nepenetreblan diecon, ke mem fariĝu pli homa inter homoj! Ke li ĉesu krei por malkrei.*

Ĉu estis tiuspeca la tento per kiu kribriĝis ankaŭ Kristo? En mia taglibro, malfermita eble por krei en mi iluzion de ordinareco kaj malgrundiĝi el aktualaĵoj, mi registris la subliniajn pensojn. Jam en la kolegiaj tempoj mi trejniĝis en la distanciĝado de tristaj eventoj per momenta kompleta pri ili vola ignorado.

*"Estas kiu venkas la tenton (nome kulpige entiri Dion kaŭzo de tristaj aferoj) tuj ĉe la komenco, kiel Jesuo; estas kiu faras el ĝi sian flagon kiel Satanistoj; estas kiu cedas al ĝi de tempo al tempo kiel Giacomo Leopardi (Ĝiàcomo Leopàrdi) kaj Eŭgeno Montale, estas kiu baraktas, eĉ dum mallongaj momentoj, inter jes kaj ne. Multo el tio kadras ateismon de nepovanto kohere kompreni kiu logiko gvidus la vivon kiam ĝuste ĝi efektas senracie destinita kaj sencela, aŭ ateismon de volanto, ke la vivo havu celon senombran, kaj de klopodanto krei al si novan brilan celpunkton ignorigante aŭ bataligante kontraŭ Dio, perceptita kaŭzo de sufero aŭ mensnebuliĝo. Se iu alvenas al tiuj deziro kaj klopodo, tiu ĉi povus eniri en senton de kontentiĝo kaj de sindediĉo kaj amo al la homaro kaj povus sin juĝi logikema kaj engaĝiĝanta pli ol la supozita Dio mem, kiu nepre ne plu necesus, eĉ perturbus la korektan ordon de la mondrigardo. Sed en tiaj impreso kaj agado oni miksas du problemojn kaj atribuas al unu la trajtojn de la alia. Kian celon Dio proponas al la unuopa homo? Problemo jam solvita: alveni, kiel al unika feliĉofonto, al la eterna vidalvido pri Dio mem. Treniĝante tra kiuj vojoj? Problemo neniam solvebla ĉar mistera punkto, kiu tamen ne detruas la klarecon pri la unua. Ne detruas*

[1] Sinagogestro (laŭ Marko kaj Luko), aŭ nur eminentulo (laŭ Mateo). Kutime estas legata la Luka evangelia raporto (Lk 8, 40-56). Dum la patro estas, for de sia hejmo, peteganta Jesuon, venas novaĵo, ke lia filino jam mortis. Tiam Jesuo, pliposte, ne sanigos malsanulinon, sed resurektigos mortintinon.

*ja jes, sed la dua povas enkotigi eĉ la unuan".*

Tia estis la konfuza kohorto de pensoj/sentoj, de koleraj rezonadoj tuj dementitaj, de ribelemo kun submetiĝo, de plurmomenta kvietiĝo ĉar la deĵorado ĉe la malsanulino disvolviĝas orde, kun ŝoko antaŭ tia mia kvietiĝo pro la suspekto, ke Elvira ekvalorus malpli ol ĝi.

Okazis ankaŭ momentoj de mutismo inter mi kaj Albina. Kvazaŭ riproĉo, kies sensenco kaj maljusto ne tuj eniĝas en indulgemajn konsiderojn, pro tio ke ankaŭ ŝi restis senpove kaj inerte falanta sub la dispreme muelaj eventoj. Unu el tiu momentoj tuj forsaltis de mi kiam preskaŭ kune ni konstatis ekaperon sur la korpo de Elvira krispaĵetoj kun flankflankaj pustuletoj kaj pufiĝoj. La malsano, kial dubi?, procedas sendepende de niaj reciprokaj animperturbiĝoj!

Dum ripoza hejmrestado, post longa deĵoro ĉe ŝi en hospitalo, la dolora disfalo iom distanciĝis, ke mi povis, antaŭ ŝiaj konfuze kunŝutitaj manbrodaĵoj pro ŝia jam forvaporiĝanta geedziĝo, ĉion iom fremdiĝe observi kaj kontemple enmiksigi inter la kutimaĵoj la imagitajn neprobablajn feliĉojn kaj tiel travadi kviete sendormajn noktojn. Dum tiuj ĉi malstreĉiĝoj mi eĉ skizis senriman kaj formetrikan poemeton, por mi allasantan iun disiĝon el doloro. Nun mi, ĝin, kvankam preskaŭ senpoluran, relegas nomante "***ploro senplora***" ĉar mi min imagas jam orfigita de ŝi, kaj do nur rememoranta pri ŝia iama ĉeesto kaj la ploro estas kvazaŭ pli konsola memkontemplado ol larma senespera esprimdoloro.

1. Ridetis ŝiaj okuloj
   je ĉiu kudrilpaŝaĵo,
   dum ŝia penso antaŭenflugis
   je ĉiu desegna kreskaĵo.

2. Nenio mistera en ŝiaj okuloj
   ĉar tuj ili informas
   kaj ĉiuj invititas
   rigardi kaj kontempli ŝian revon..

3. Al ŝia gaja rido
   ŝajnige respondis mia rideto
   kun la ama ŝajnigo de patro
   scianta, ke tiu rido,

4. ke tiu gajo, ke tiu monda novaĵo,
   ke tiu florbeleco, ke tiu filina amo
   lante fatale kaŝe senmaltrafe

drivas al avancanta morto.

5. Vi petegas sanon
dum mia nepovo liveras nur vortojn,
Vi filece akceptas mian nepovon
vin forlasantan al senpardona destino.

6. Vi kaŝas vian ĝemadon
por kaŝi mian senpovon,
vi montras esperon
por ke ne eksplodiĝu mia senespero.

7. La kruela destino, min ribeliganta,
fariĝas por vi ĉionsavanta renkonto,
mia deziregata ĉiopovo
montras ĉe vi sian neutilecon.

8. Nun mi havas nur bukedon
da doloroj kaj da ampensoj,,
baldaŭ vi havos la konsiston
kiu, savante vin, savos min!

9. Mi interkrucigos viajn manojn
sur via brusto por destino
transtera, kie vi tute viva
atendos min…

Kaj post la versfara kontempla fremdiĝo jen la revekiĝo al la krudeco de l' realo. Kondukite hejmen, nun ŝi ne plu metas manon sur siajn ornamindajn geedziĝajn littukojn por ilin finbrodi, evitas sin spekti fronte al spegulo, limiĝas sin supraĵe ornami, per malhastaj kombilaj tiroj, brosas la dentojn nur por la momenta fianĉa vizito dum kiu al la promesito kortenere susuras, klopodante aspekti serena, ŝercvortojn:

*"Vi min memoru kiel mi estis. Konservu fotografaĵojn!".*

Bonŝance li reagas per vortdeviaĵoj vole distrigaj:

*"Jes, mi metos vin kiel protektantan sanktulon en dormoĉambro!".*

El tiuj ŝiaj vortoj ni gepatroj vidas eliranta senrimedan sinkompaton danĝeran almenaŭ tiom kiom la sento de malplivaloro pro ŝiaj lastaj fizikaj ŝajnoj. Ni, same kiel ŝia fianĉo, ekkredis nian devon provi inventi distraĵon por ke ŝi ne tro enpensiĝu pri si kaj parolu pri si malgajatone, alie ŝi kapablas abrupte

ripeti asertojn kaj levi demandojn kiajn:

*“Vi restos tute solaj”*. Kaj:

*“Paĉjo, kial la Sinjoro min senigas je ĉio?”.*

Mi ne rajtas elmontri al ŝi la tutan malesperon en kiu enfosiĝas mia animo kaj des malpli la kaŝitan ribelemon kontraŭ Dio; sukcese mi nuligas tion, samtempe, tamen, penante altiri sur lipojn konsolan respondon. Ĝin trovinte aŭ kreinte, mi devas ĝin prononci en la cirkonstanca tono, kiu konsolige formiĝas nur se devenanta de la vero kaj se tia adekvatiĝo al la vero estas sincera. Haste miaj ribelaj sentoj/pensoj senkonturiĝas kaj realĝustiĝas sin reharmoniigante kun Dio kaj sincerece al li submetante:

“Ni ne certas, ke Li en tiu ĉi kazo estas deprenanta. Ĉiukaze, se li senigas nin je io, tio okazas pro tio ke li estas donacanta ion pli taŭgan kiel okazis kaj okazos al ĉiuj”.

*“Kial tiukaze ĝuste al mi, paĉjo?”.*

“Tio estas demando pli scivolema ol problema. Se Dio mastras la eventojn kaj se li agas por la bono de siaj kreitaĵoj, ne multe valoras malkovri la kriteriojn de lia agado. En preĝoj oni povus tion fari, senaroge kaj respektante tamen lian malsamecon. Ni lernu de Jesuo...”.

Dum mi, jen kun aspekta senzorgo jen kun nobla persona malaltiĝo, ellasas tiujn vortojn, preskaŭ bedaŭre percepteblas, eĉ en ilia nehipokriteco, io retorika kiun mi ne sukcesas malaperigi malgraŭ ke nun okazas, fakte, ke mi devas reŝarĝiĝi je la tasko malhelpi, ke ŝi fiksiĝu, en silentaj momentoj, pri sia mizero kaj deziru esti kompatata.

La tagoj pasas, sed oni volus, ke ili ne pasu ĉar ĉiu tago forprenas de ŝi ion vivrestaĵan ne plu revenontan. Se la tagoj ne pasas, ni restas senpove mergitaj en la horora kontemplado de nia senpovo. Sed ili kun senpieca kompato pasas dum memoraĵoj kovriĝas je neforigeblaj obsedaj imagoj kiuj finiĝas en hororajn konstatojn.

Estas maturiĝanta en ŝi sento de konscia rezignacio preskaŭ kvietiganta ŝian vizaĝon kiu pliviviĝas kiam, invitita preĝi kun ni, ŝi respondas la patronian, kvankam foje pro laciĝo duonkonscie ŝi susuras “*Daŭrigu vi, mi sekvas nur mense”* kaj mallaŭte: *”Mi nun eĉ por penseti suferas laciĝon*”. De nun por ne ŝin lacigi, oni kalkulu ankaŭ la vortojn kaj moderigu la deĵorajn esprimojn.

*“Gepaĉjoj, nun fine vi havas sufiĉajn motivojn por konsideri min harmonirompa...”.*

La floroj de la fianĉo ridetmovas ŝiajn lipojn nur momente; kiam li foriras, al ŝi, sur lito aŭ sur sofo, apenaŭ reziduas ankoraŭ fortoj por flustri: “*Mizera*

*Alberto! Ĉio estas en perdiĝo ankaŭ por li!”.* Kiel forsvenigi el ŝiaj pensoj tian novan konsciiĝon esprimitan aspekte senemocie?

Momente ŝajnas, ke ŝi reprovas trovi distran konsolon en la kontemplado de sia mizero, en la sinpercepto el la aliulaj kompatemaj sentoj, travigliĝantaj el la ardeco de la bondeziraj esprimoj. Kvazaŭ tiu estus kontentiga anstataŭo de l' vivo.

Jen, ankoraŭ unu fojon mi vidas ŝin retuŝi siajn brovojn, poste ŝvite ŝminki siajn lipojn sed baldaŭ ankaŭ ekrezigni movi kombilon inter falantaj aŭ apenaŭ reburĝonantaj siaj haroj, kaj lasi la manojn fali senfortaj. Venis, pli vere revekiĝis, fronte al ŝia ĉiam pli sensensiĝanta korpo, al mi la penso, ke jam ŝia beleco nenion povas krom pli malaperi aŭ aĉiĝi.

Nun ŝi komplete malzorgas sian personan aspekton, nun ĉiuspeca, iam amebla, beligado perdas intencan altiron kaj ŝi konscias ke eĉ tio devenas de sia malsano deviganta al forlaso de ameblaj ambicioj: tuta ŝia energio sedimentas ĉe la streĉo resti, pormomente, stare; sed tuj ŝia brusto moligas la krurojn kaj devas esti subtenata: ŝi jam ne plu sukcesas moviĝi manpremante la randon de mebloj. Kaj ni ne havas pluajn kompatajn mensogojn: ĉio senpotencas. Nun ŝi rezignas pri eĉ provoj retuŝi la ŝminkon kaj sin plibeligi okaze de la vizito de Alberto, ŝajnkonsolige tamen deklarante: *“eĉ tia mi ne jam tute malplaĉas al li”,* al la sopirata vivkunulo. Eĉ la remburita rulseĝo ne plu donas iluzian komforton.

“Morgaŭ, baldaŭ vi havos pli da fortoj!”, kaj ŝia pieco al ni sin montras cedanta al nia aspekta volo kredi dum evidente la fortoj estas haste falontaj.

Kiel paliĝis ĝis senkolora horizonto kompare kun la suferego, ke eble ne plu ili rajtas ekzisti, la prikulturaj diskutoj, politikaj engaĝiĝoj, religiaj klerigoj ktp: ĉio etiĝas ĝis nesuferiga malapero! La nura apenaŭa memoro pri ili ekribelas kaj ŝajnas mankigi amon al ŝi.

Daŭras la vizitoj de parencoj: tiuj ĉi estas ĝentilaj kaj komprenemaj ĝis oferi el siaĵoj tion kio, se eblus, utilus al la malsanulino kaj kvazaŭretore klopodas trovi esperigajn vortojn, dum mi lucidas pri horora konfirmo, nome ke mem estas vidantaj sfacelon kaj suferantaj pro maleblo trovi laŭveran kaj samtempe konsoligan sintenon. Ankaŭ mi pene apenaŭas enteni la dialogon en la tonoj de dankemo kaj de memkompato. Kaj fine mi arde deziras, ke ili foriru por lasi min turniĝadi en mia sensolva konscio de nepovo.

Kaj kiam revenas la silento, tia silento plonĝas en la domon senia, sencela kaj tuj pleniĝas je angoroj ĉar demandoj jam ne serĉas respondanton kaj la respondantoj jam ne havas respondon.

Ŝia universitata kunulo, fariĝinta Salesa kandidato por la pastreco, pro kies “elmondiĝo” estis multe da festo siatempe kun partopreno de diversaj liaj kompanuloj, venas ŝin viziti. Ili kune longe interbabilas (ŝi per ridetaj kaj konsentaj monosilaboj), eble pri spiritaj kaj religiaj vivaspektoj. Kelkan tagon poste, venas sacerdoto, amiko de ambaŭ kaj de Alberto, por lastaj religiaj komfortoj, kiujn ŝi ricevas aspekte kaj intime pacigita, aliĝante al la preĝaj konkludoj. Samtagon, vespere, kuracisto konsilas novan enhospitaliĝon por pli efika dolorkuraco kaj por eksciti esperon en ŝi: ŝi akceptas kaj, inter komunaj kaj precipe ŝiaj penoj, ambulanco veturas delikate. Ŝia vizaĝo, jam senkarna, nun muariĝas laŭ momentoj el intensa flaveco al roza blankeco. Tuj sur ŝi, en hospitala lito, komenciĝas novaj kuracoj, sendube nur paliativaj kaj dolorforigaj, dum mi kaj Albina antaŭvidas, ke nun finiĝas la evento “filino” kaj tra mi, kaj eble ankaŭ en Albina, enŝteliĝas apenaŭ nekontraŭata la perspektivo ke baldaŭ almenaŭ finiĝos ŝiaj suferoj. Sed ĝuste tia obskura penso, kvankam antaŭe vidita kiel malsanevoluado, devigas ke mi min pravigu kvazaŭ antaŭ ekperceptiĝo de senkora penliberiĝo.

La sekvan matenon ŝi montras ankoraŭ revivigon kaj monosilabas kvazaŭ vivo estus ankoraŭ rekuperebla: ekruĝetas, sur kaĥesieca fono, la centro de ŝiaj vangoj, ŝia harsena spaco malkaŝas krispajn senkolorajn ĝermetojn, alvenas al ŝiaj lipoj ridetsignojn, foje ŝi subparolas kun nevideblaj kunparolantoj kvazaŭ ŝi estas difinanta ne marĝenajn kaj ne superfluajn detalojn, sed la kontraŭdoloraj kuraciloj kun la doloroj malfajrigas ankaŭ ŝian reziduan konscion! De kio ŝin defendi? ĉu de doloro aŭ de memkonscio?

Tri tagoj de hospitalo kaj post, preskaŭ kiel antaŭvidite, ŝiaj vizaĝaj vivsignoj ne plu fadiĝas de palaj al vivecaj aspektoj en ŝiaj ekfiksiĝantaj trajtoj dum elstariĝas koloroj mortece palaj. Rapidaj interkonsiloj de la kuracistoj kun ni decidigas revenigi ŝiajn agoniantajn restaĵojn al la gepatra hejmo, kion certe ŝi ne eĉ suspektas.

La postan tagon, kun nedeklarita deziro, ke la uzo de oksigenanta spirigilo kaj ĉiu pia flegado ne prokrastigu la estingadon de ŝiaj doloroj, je la dekunua, post enspiroj longaj kaj brustlevantaj kaj gluglantaj, ŝi restas senspira, senmova, senparola, senresponda al vokoj, dum la miaj miksiĝas kun kontentsento pro la ĉesiĝo de ŝiaj suferoj kaj pro la elaŭdiĝo de miaj deziroj. Jen morto silentpaŝa kriiganta min por ĉiam. El apudaj ĉambroj singultoj allasas ploron longe retenatan por ne ĉeestigi tion kio kruele avancadis.

Mi kun ekstrema preĝpenso petas pacon ĉe Dio por mia Elvira, kaj foriras el la ĉambro kie restas Albina flegema kvazaŭ Elvira daŭrigus bezoni je ŝia

ĉeesto. Parencinoj piemaj akompaniĝas ne plu al persono sed al kadavro. Mi foriras eĉ el la domo, apenaŭ konsciante ke, eĉ la plenpulma spiro jam ne plu senangoras, kaj vagadas laŭ trotuaroj kvazaŭ liberigita el streĉitecoj de nepacienca atendo, subtile dankema, ke ŝin fine *kelkulo* indulgis per la favoro de liberigo je lukto ne plu eltenebla. Mi vagas somnambule, sed kun la ronĝanta penso ke mi ne povas eviti, eĉ mi krude jam ekkonstatas, la ekmalbeliĝon de ŝia vizaĝo, kiun mi nun unuafojon samtempe klopodas imagi laŭ tiu de la iama vivo.

Ĉe la suferokulmino, mi komike kondutas kiel promenanto senceluma kaj feliĉa meze de nehaltigeble moviĝantaj homoj, neniel mi aspektas kiel provanto, jam perdinte memsenton, sin deŝarĝi de la peno vidi morton kaj mortintinon. Momente tia konstato, nova ĝeno en konfuzita menso, ekaperigas pluan ofendon al Elvira, kvazaŭ forestiĝo el ŝia ekkadavriĝo estus malklara signo de patra amo: de tio tuja, apenaŭ regata, impulso reveni ĉe ŝi por ŝin tuŝi dormantan kaj ŝin paroli mortintan.

Mi promenas travidante duoblaĵon de mi mem: iri kaj reiri ĉe tiun fatalan ĉambron kun sentoj duonakceptemaj kaj duonikonoklastaj: preĝo kun kolero, protesto kun rezignacio.

Post duonhora senkiala kvietiĝo, mi denove stumblas de ekstrema akceptado pri la dia volo, nivelmense sekurigita, ke ĉio de Dio disponigita kontribuas por la bono, al ribelo defianta Dion per maldelikataj kvalifikoj aŭ ironiaj kromnomoj kiel *"vi estas la indiferenta kontemplanto de la universala sufero"* kaj *"via nuna nomo, ĉu vi scias?, senhontulo, ĉar vi ĉie sensufere rebrilas el la ruinaj rompaĵoj de vi provoke kaŭzitaj"* kaj *"vi donacas por enpafi al vi okazon kruele forpreni";* kaj *"vi prenas kion mi neniel oferis al vi"*, aŭ *"vi estas la konspiranto kontraŭ la homa feliĉo"* aŭ *"vi kiu atendadis min ie embuske por ensalti sur min, nun kontemplu kion vi faris", "se mi kapitulacos antaŭ vi, ke tio okazu ne pro amo".* Agnosko pri Dio eklimas, eĉ fariĝas aperta defio.

Mi min riproĉas, eble sarkasme: *"Kial mi iam ĝojis pripensante, ke Dio estas la gajganto de mia vivo? Ja, ĉu la ĝojiganto aŭ la stumbliganto? Fine aperas via vera vizaĝo..."*

Kaj se io de mi admonas. "Ne faru vin blasfemulo!", mi refute konsentis: *"Ĝuste! Dio ne meritas tiom da atento!".*

Mi volus ke tiuj akuzoj al Dio estus evidentige pravigitaj por koni fine la rikanan kaŭzon de miaj suferoj. Tamen tiu memtruda klopodo lin kulpigi ne tute kaŝas, ke mi scias, ke li tia ne estas. Fakte samtempe mia plej interna voĉo, samtempe kun la disfluo de grimacaj esprimoj kaj juĝoj, elaĉeteme diradis*: "mi tion ne pensas",* min revenigante al la deziro de senkondiĉa submetiĝo.

La bezono je Dio min altiras al Li, Lia neindulga treta marŝado sur mia Elvira lin forpelas de mi.

Nun eĉ la transvivo, pri kiu mi certas kaj kiun mi porĉiame feliĉa deziras kaj revas por Elvira, enscenejiĝas antaŭ mi kiel minaco-perdo al mi mem: por eniri en ĝin mi devus subigi juĝon, animo-malvestigon, publikan prezenton de miaj ribelaĵoj kaj insultoj al Dio. Vere tiu transviva renkonto kun Li, en tiuj ĉi momentoj, nenion montras konsoligan: mi aŭdacas eksenti, ke mi pretus rezigni pri tiu konsolo kondiĉe ke estu evitotaj al mi tiaj humiliĝoj.

Sed fulme, per diametre kontraŭa decido, mi ekdeziras, ke tiuj miaj ribelaj juĝoj estu forviŝitaj kaj ignoritaj. Tiu tago, male, nome tiu de la universala juĝo, estu laŭplaĉe la persvadiga sindefendo de Dio kaj la horo de mia konfuziĝa honto ĉar tiu tago estos ankaŭ la fina riveliĝo de la dia amo! Ekaperas en la nebremsebla surmetiĝo de pensoj, kaj min okupas pormomente, ankaŭ nesenca penso laŭ kiu mi, se ĉion konsideri, ne tute malbonŝancas pro tio ke mia Elvira mortas laŭ malpli malfeliĉa sorto: aliajn samaĝajn ŝiajn geamikojn, mortigis aŭtaj akcidentoj. Daŭrigas vivi ankaŭ tiuj iliaj gepatroj kiuj ne plu vidas la fruktojn de sia sino!

En la tagoj antaŭfunebraj mi restas ĉe la ĉerko en intensaj kaj senprecizaj pensoj, ne aŭdacante levi la okulojn sur ŝiajn mutajn konturojn urĝantajn, malantaŭ false belaspekta sereneco, senĉarmiĝon kaj plian totalan korpan ekdisfaliĝon. Ŝia senmova vizaĝo nun iomete ŝvelinta, ŝiaj fermitaj okuloj, ameble ne imputas al mia nepovo sian disfalon. Fronte al senmoveco, ankoraŭ ribelimpulso denove ekigas, trakurantajn mian eston, silentajn kriajn akuzojn kontraŭ Dio: ”*via patreco fias kaj malpurigas la ĝojojn!... Nur pro bezono de paco kaj por helpi mian Elviran mi finiĝos por akcepti vian volon”.* Sed tuj mi min denove dementas.

Kaj nun la funebro kun la entombigo kaj kun la vortoj sur la ŝildo. Ekvenas en min deziro rapide konkludi kaj ĉion fini kaj samtempe kun tio enmiksiĝas kulpo-sento kvazaŭ mi klopodus enarkivigi por min liberigi el psikaj kaj mensaj kontraŭdiroj, dum la tomba flegado pri ŝi krom bedaŭrigi kion mi perdis, celas memorigi ĉion kio ŝi estis.

Albina kaj mi, lasinte ĉion burokratecan en la helpemo de amikoj, koncentriĝas en mutan dialogon inter ni kaj kun ĉie ĉeesta ŝi; la brakumoj inter ni havas ĉiam fantazian apendicon en kiu plektiĝas brakumanta ankaŭ ŝi.

Trakurante la urbajn stratojn por la lasta konvojo kun ŝiaj jam ne plu videblaj restaĵoj, la mondo kaj ties movoj kaj streĉigaj zorgoj aspektas grince sensencaĵo kaj eksplicita nepartopreno en ŝia perdiĝo. Tiuj stratoj, tiom da fojoj

trakuritaj ankaŭ kun ŝi, nun injektas la bildon de akvokirliĝo movata de sencelaj altrudoj senkapaj kaj senvostaj. Kaj revenas pli pintigita la demando: kial Dio masonis tiom da sencele pasia kaj senorda surmetiĝo de doloroj kun tiaj ĝojoj forgesigantaj la unuajn dum ili mem konsistas nur pormomente? Kaj tuj naskiĝas alia demando: kiel igi sente vivita la certecon, kiu jam en la fundo de la animo travideblas en la kaŝita kaj rezerve kuŝanta respondo, ke nur amo altiras Dion al kreado de ĉiu unuopulo?

Sur tiuj vojoj kun samaj ŝarĝoj jam paŝis aliaj kun la samaj doloroj kaj kun la samaj demandoj. Kie mi estis tiam? Kial mi tiam apenaŭ konsciiĝis pri tiuj plorantoj aŭ ilin tute ne atentis? *"Vi tiam persistis multobligi viajn ĝojojn. Vi sename forgesis la aliajn, la aliaj nun forgesas vin!".*

"Ho ne! Mi ne restis sename indiferenta! Min blokadis nur konsidero pri mia senpovo", senutile susuras respondo ĉar plievidentiĝas objektiva la akuzo pri indiferento kaj nepartopreno en la aliulaj suferoj.

La lastaj vortoj de la funebra liturgio forĵetiĝas senvivecaj kaj nealestantaj kun prononco malsolena, iom malzorgata, el la lipoj de la pastro. Tamen el ili erupcias anonco egala al la surprizo: *"Mi estas la resurekto kaj la vivo".* Se ilin oni inventis, ilin oni inventis laŭ la deziro de tiustataj koroj. Kaj kio se en ili enestas science fundamentitaj harmoniiĝoj kun la racio kaj la historio? Kaj ĉar pri ili mi ne povas dubi, ho! okazu ke ili malvestiĝu je supraĵaj kaj rutinaj aspektaĵoj kaj akiru la vivecon de la vero!

La kamaradoj, paroĥaj kaj universitataj, ĉe la ekmovoj de la funebra ĉaro unue sufloras subvoĉe kaj fine krie: *"Elvira, vi estos ĉiam kun ni!".* Ĉu forto de iluziiĝemo aŭ konvinko de la mensoj? Ĉu plua persisto de bedaŭranta memoro pri ŝi aŭ proklamo de individua, kvankam nevidebla, persona persisto de si en si mem? Ja, kutime, pliprecize ĉiam, antaŭ amata forpasinto oni laŭde priskribas kiel tiu ĉi estis kaj kion tiu ĉi faris, neniam kiel tiu ĉi estas nun, kion tiu ĉi faras nun! Ĉu tiuj vortoj esceptas, ĉu nova stilo kun subkuŝanta atento al la nuna sorto de la forpasintino?

Mi ne volas akcepti konsoliĝi per ŝia persisto en mia kaj en ilia memoro, pro tio ke ĝuste tio lasus pereiĝi en nenion ŝian personan konsiston kaj fine eĉ la memoro ŝanĝiĝos laŭ la ŝanĝiĝo de la cerbaj celuloj. Tiu krio, sincera kiom oni volas, eble enprenas ion ekscesan, ion ne veran! Mi tamen ĝin kontente aŭskultas, ĉar mi respektas ĉiaspecan aliaĵon, eĉ ĝojas pri ĝi, sed kiel ne diri, almenaŭ al mi mem, ke se ĝi naskiĝus nur el la neracia premo de la homa fundo, por fariĝi racia mem bezonus transpason tra la racie validaj pruvoj sur kiuj apogiĝas la kredo mem kiu devas deiri el fundantaj konstatoj?

*"Mi scias, ke vi havas kredon kaj certecon, laŭ kiuj via filino ne estas perdita por ĉiam. Apogite sur tiu via certeco mi certas, ke miaj kondolenco kaj sufero akompanas vian komfortiĝon per la kredo",* susuras, kun voĉo ne kutimiĝinta al tiaj esprimoj, iama instrukolego kiu, nome de la lernejo, partoprenas tutkore. Jen, el tiuj vortoj montriĝas suspekto, ke mia kredo estas mia persona inklino, eble enviebla, kvazaŭ io nekapabla sin komuniki per racikonformaj argumentadoj.
Ĉu vere mi kredas per inklino? Ĉu vere havas nur kaprican fundamenton tiuj vortoj: *"jes, mi scias* (tiel sonas la evangelia diraĵo de Marta ĉe la tombo de propra frato Lazaro), *ke li resurektos en la lasta tago*?". Jes, jes Elvira jam vivas ĉe tiu kiu konfirmis per sia resurekto la frapfrazaĵon: *"Mi estas la resurekto kaj la vivo".*

Ripetante tiujn vortojn, kiuj el certeco ĝene penas refariĝi sereneco kaj konsolo, mi sentas, ke eblas eliro el mia doloro, el kiu mi ne volis antaŭe deiĝi; kaj samtempe konsciiĝas, ke mi estas prikonsideranta ion tro grandan kaj tro belan per animstato iom troagitita kaj okaza.

La salesa religiulo per kurtaj vortoj altiras onian atenton:

*"Kial tiom da doloroj sur min?"* pretende priserĉas ĉe Dio la biblia Ijobo: kaj Dio respondas: *"via menso ne povas kompreni la dian menson!"*

*"Kial tiom da suferoj kaj morto?"* ni kristanoj pie enketas ĉe Dio; kaj ricevas, krom la al-Ijob-respondo, novan absolute konsoligan: "*via eta menso ne povas kompreni la senliman dian menson*, *sed Dio surprenas ĉe sin ĉiun kreiton elaĉetitan de Kristo!*

Albina mutas, eble preĝas dum ni revenas solaj, kun enkore la eĥoj de tiuj vortoj kaj la bruo de la trulo cementanta la ŝtonon sur la tombo, al la soleco de la por ĉiam velkinta hejmo. Malŝlosinte la hejman pordon ni hezitas trairi la sojlon, plu hezitas eĉ pie gardi survandajn fotojn aŭ aliajn memorigaĵojn pri ŝi, ni nin rigardas en la okuloj kaj rekomenciĝas la ploro.

Jen Elvira liberas el la peno morti kaj kuŝas apude de miaj gepatroj kiujn ŝi apenaŭ konis. Enmensen revenas vortoj, iom rimorsvekaj, de mia patrino: "vi estas bonsintena kun ĉiuj, krom kun ni viaj gepatroj. Ĉu eblontus ke vi afabliĝu kiam vi havos filojn?". Vere mi nun komprenas, kaj denove mi klopodas rearanĝi por ili afablaĵojn neniam plenumitajn kaj nuligi malafablaĵojn nun pezajn kiel ŝtonojn! Ensteliĝas penso, eble por malpliigi la ĝenon de tiuj vortoj, ke nun Elvira estas konfidata al ilia senkondiĉa amo.

Sekvatage, ne trovinte hejme Albinan, mi iras ŝin serĉi en la preĝejo kaj ŝin trovas surgenua tute lumita de la sunradioj kiuj, trapasante la fenestrajn vi-

trojn, ŝajnas foliumi la psalmaro-libron tie supre survitre fajrdesegnitan.

Post kuna silenta preĝo, ni decidas kunlabori en la asocio en kiu volontulis Elvira. Ankaŭ tiel prezentiĝos okazoj kulturi pri kristanismo kaj samtempe kulturiĝi pli vivigante ĝin. De nun ni subtenu finance kaj ĉeeste kaj prizorge laikan karitatan asocion "San Vincenzo" (Sankta Vincento), kie ĉiusemajne Elvira renkontiĝis kaj inkognite almozdonis.

Ricevi kondolencojn postulas ĝentilecon kiun ni esprimas afable, pli vole tamen ol kunsente kvazaŭ halti por priparoli nian doloron egalvalorus detrui ion devigitan ekzisti por ĉiam kaj unike en ni.

Mi konservis agrablajn sentojn de dankemo pri la kondolenca letero de la episkopo, promesanta sian preĝon por ke Dio "konsolu la homverke nekonsoleblajn vunditojn". Tamen io rimorsa tion memorante okulumas en mia animo pro iu tuja ribela impulso antaŭ tiu vorto "konsoli", kiun mi malpurigis, ĝin taksante senpene prenita el la marĉo de sengustaj banalaĵoj kaj per la ironia komento "kutimstile kaj ŝajnpartoprena". En tiu momento la episkopa partopreno taksiĝis, ĉe mia ŝanceliĝo inter akcepto kaj rifuzo de la diaj decidoj, konturita laŭ malmola indiferento kovrita de konveneco. Alirinte, post tagoj de konfuza konsciiĝo, kun la tuta peno antaŭvidita, ĉe spiritkonfidulo, mi pri tio min akuzis kulpa kaj pardonpetis. Ĉion subtile akompanis apenaŭ neforigebla memoro pri antikva malfideleco al aliaj taskoj libere akceptitaj, kiujn la eklezia dispenso nuligis sed ne forgesigis.

La meso de la trideka tago kunigis dudek personojn. La sinsekvan jaron simila ceremonio vidis partoprenon de deko da personoj: evidente eĉ la memoro ekvelkis same kiel jam velkis ĉe ni la memoro de aliaj amataj forpasintoj, profunde priploritaj de iliaj familiaj rondoj. Restas nur ni por memorigi pri Elvira kaj porti freŝajn florojn ĉe ŝiaj restaĵoj.

Multaj tagoj alportas datrevenojn de io bela pri Elvira: revenigi ilin al la kunvivada memorstato estas nelasebla tasko de Albina, dolĉege fleganta kvazaŭ duan enkarniĝon de la filino ankoraŭ sine plektitan, kies persona historio estis elane kaj konsolige elvokata en mia fine senkontraŭece legata taglibro, kie jene mi registris kiam la doloro jam fariĝis familia kompano:

*Ni vin delonge sonĝis.*
*Fine vi venis mirige*
*kiel la fina frukto de la kreitaro.*
*Vi ne estas la neforgesita nenio*
*reemerĝanta al la memoro*
*de viaj gepatroj sopirantaj*

*vid-palpi la vizaĝon ĉiam*
*surirantan antaŭ iliaj okuloj.*
*Evidentigu, ke vi plu estas*
*ĉar ni volas, ke vi daŭrigu esti*
*kaj individue ĝoji kaj atendu,*
*dum nune plu fluas la diaj decidoj.*
*Ne timu kiam vi malaperos el nia*
*memoro samtempe kun viaj cindroj.*
*Ĝuste en tiu momento ni kuniĝos*
*ĉe la Savanto kiun vi volis kiun vi trovis*
*kiu metos en viajn manojn kion vi amis,*
*kion ni amis. Kaj forgesu*
*kaj forgesigu pri miaj ribeloj:*
*ili estis ankaŭ pretaj...*

Se la longaj silentaj paŭzoj okupiĝis je intensaj dialogoj kun Elvira, kompreneble ankaŭ kun Albina ili fariĝis ekstreme komunikiĝaj. Sed la mutaj solechoroj, kvankam malintensiĝante, foje malsupreniris kiel nebulo, kaj trenis kun si humurŝanĝojn laŭkvalite de la pensoj ĉar okazis tagoj dum kiuj la neesplorebla dia plano estis duarangigita aŭ aperte rifuzita kaj tiam plejoftiĝis kurtaj vortoj kaj longaj morozoj; kaj tagoj dum kiuj la allaso al diaj decidoj favoris paroladojn serenigantajn kaj, foje, intense serĉantajn komunikadon.

La tempo de la pensaj-psikaj kontraŭdiroj ankoraŭ ne feriis. La akcepto pri la dia volo daŭrigis alternadi kun malakcepto dum startis ĉeno de kontraŭdiraj reagoj preskaŭ malamoj al mi kaj miaĵoj en kuntesto de kaŝita sinprotektemo.

La tre amata kaj prilaŭdita de mi biblioteko nun perceptiĝas nur kiel spacokupo: kia ĝia sorto, nun kiam ĝi certe ne havos konsultantojn kaj heredojn? Je konsultantoj eble ĝuos se transdonita al iu publika institucio. Al kiu, kiam, kiel? Jam sensenciĝis la pasinta trairado inter vendobenkoj de brokantistoj por trafi elĉerpitan libran raraĵon. Brokantistoj, ja: kial ne transdoni ĉion al ili, sendepende de la enspezo?

Kaj rilatoj kun la diversaj personoj? Ĉu vere ili povus eksciti en mi ankoraŭ la kutiman pasintan allogon? Kaj kiel nun eviti la senvalorigon de ĉio, enuigantan la iam konstantan mian kuniĝon kun miaj ĉiam esploraj interesoj?

Ĉiu neevitebla kontakto kun personoj malfacile komplete kaŝis la malpaciencon kaj la urĝon ke ĝi ĉesu baldaŭ, tamen foje la objekto de la konversacio surfaciĝis el mia memoro spite de mia kovrita volo ĉion interrompi.

Resti dome, senpense ene de miaj dormantaj pensoj, elenuigas dum eliri travoje egalas renkonti, paroli, diri pri si, disperdiĝi ekster sin mem…

Kio nova estiĝos en mi el tia psikostato?

### Ĉapitro dudeka
## Ĉu pensiulo elseligita?[1]

Dum tiaj alternoj, kies animstatoj daŭris po unu tago aŭ semajno kaj poste malintensiĝis kaj, foje, subite pasis eĉ al sia kontraŭo; malrapide oni, en renkontiĝaj momentoj, komprenis ĉu venkas tristeco aŭ la ĝoja trankvilo. Tristeco venis mem, garnita je ĉiuj memoraĵoj, ĝojo male, eĉ et-ere, estis iom vole elvokita kaj postulita estiel konkludo de rezonadoj.

Dum la tristecondo Gino (= Ĝino, familia kromnomo de la mi-rakontanto. De nun Ĝino) estis nerekonebla: al li la tuta spertita vivo ŝajnis fiaskinta kaj devojiĝinta kun nuna neniotira bonŝanco, estante la atutoj jam ĉiuj vane se ne damaĝe elspezitaj. La bonaĵoj perditaj senkonturiĝis alkroĉante ĉion aktuale personan al vizio de ruiniĝo: Ĝino ŝajnis destinita al senema malgajo. Eĉ Dio paliĝis kaj obskuriĝis kaj, ne sen pliordiĝanta konsciiĝo, foje ekrepolulis en lia interno la vana impulso diskuti aŭ refari Dion mem, alĝustigi iun Dion pli apudan, pli helpantan, pli eman inkliniĝi al la homaj bezonoj. Sed tiaj ribele furiozaj pensoj ne estis allasitaj agadi senkontrole: fone de lia inteligento okulumadis ankaŭ la rezervata percepto pri finfina vaneco kaj la absurdeco de liaj deziro kaj fantazia provo. Tiam Ĝino haltadis marĝene de abismo, kie disvolviĝas freneza kartoludo inter Dio kaj lia konscienco.

La falo de la ateismiga ŝtatsistemo komunisma, okazinta en tagoj de lia morna melankolio en obstina endoma restado, eĉ tiu evento lasis lin indiferenta almenaŭ nivele de la eksteraj reagoj. Nur post kelka tempo li ekmontris konsciiĝi pri la eksterordinareco de la okazintaĵo.

Preskaŭ preterportata de inerto, li ekrezignis siajn ŝarĝojn en diversaj societoj, aŭ draste oponis al eĉ simpla kaj laŭtempa ekvarmiĝo de kunlaboradoj seniluziigante amikojn kaj kunlaborantojn. Kaj ĉio ĉirkaŭe ekbildiĝis je lia longa serio da mortoveka depresio kun senagemo: la du kreskige influadis unu sur la alia.

Kiam li eliros el tiu malĉeestiĝo el la mondo kaj ree ekpartoprenos sente kaj mense al sociaj kaj politikaj eventoj, li dirados metafore, kvazaŭ sin ekskuzante kaj iom pri si ridetigante, ke *"tiam ŝajnprave senreteneme tajdis por mi*

[1] Tiu ĉi ĉapitro konsistas el eroj parte aŭtoraj parte el lia taglibro parte el memoraĵoj de Albina ĉar la morto malhelpis, ke Gino (Ĝino, kromnomo de la protagonisto) finrakontu al la esperantiganta amiko, aŭ esperante diktu rekte li mem, kiel okazis dum la lastaj ĉapitroj.

*tristaj novtagiĝoj, kiuj iam aŭroris belaj kaj brilaj. Nun bonŝance kaj prave tajdas denove altiraj invitoj al la harmoniiĝo kun ĉirkaŭumo".*

En tiu blokanta stato enŝoviĝis, foje kontentiĝe elvokita, la memoro pri antikvaj kulpoj, pri lia deziro, ke la milito eksplodu, kaj pri liaj senkonsidera enpastriĝo kaj egoisma ekspastriĝo. Ĉu penseblas iu ligo inter lia aktuala senperspektiva soleco kaj lia pasinta furoro sin liberigi de klerika vivo? La racio inklinas al ekskludo, sed el liaj latentoj venis dubeca respondo. Tiam la konfuzego el senta fariĝis ankaŭ pensa.

El lia taglibro, el kies filozofi-karakteriza prozo iom maŝmaŝe elĉerpatas grandparto de ĉi ĉapitro verkita sugeste de lia edzino Albina, surmetiĝas du personecoj ĉiam pretaj je disdividiĝo, eble ne kapablaj trovi finan harmonian kuniĝon. "*Se la vivo senpie elpelis min, mi ne anstataŭas ĝin per eksterfluaj kirliĝoj",* pretis reage antaŭ la invito repreni iniciatojn gurdita de amikoj, kiuj tamen certis, ke li "deklikiĝos nature kaj pergrace el tiu senemo" kaj kliniĝos al antikva interesiĝemo kaj humaneca kontaktemo por reeksciti novan helpemon al kristanoj renkontiĝontaj kun li. Unu afero neniam tute vaniĝis kaj emis konservi erojn de la antikva allogo: resti kurbiĝinta, neatenditajn tagojn, sur libroj kaj glosi tekstojn por, eble, eblaj publikaĵoj kaj prelegoj

Oni ne povas ne rimarki, tamen, lian severan kritikon pri si, de jaroj antaŭe, sendube de la unuaj pensiulaj tempoj. "Kiel kribras pri mi Albina, mi funde emas kulti min mem eĉ kiam mi parolas pri Dio. "*Sen tiaj viaj debatoj kaj fortaj asertaĵoj,* delikate sed sagace enŝteliĝas mia Albnjo*, ĉu via persono havus, ĉe vi mem, la saman elstariĝon? La Sinjoro Dio, je kiu vi sincere kredas, ĉu plu restas via amata senkondiĉa celo aŭ vi reduktas Lin al funkciado de ĉevaleto por via gloriĝo? Ĉu Dio via kontentiga bataloĉaro aŭ Dio via tute senprofita amo*? *En konversacioj kaj prelegoj pri Li, ĉu pli gravas via sukceso ol tiu de Dio? Kiom pezas via stelulemo?".*

Albina tion diradis delikate, certe, sed foje eĉ skrape per aludoj aŭ per decidaj paroladoj. Samloke, fakte, legeblas: *"Eĉ mian impreson de ĝenerala vivfiaskado Albina sukcesas kredigi al mi okazo de servo al homaj bezonoj: ŝi sisteme kontribuas purigi miajn intencojn inkliniĝantajn pli al memkontentiĝo ol al servo al fratoj fidemaj je mia servopreteco".*

Lia suspektemo emis travidi en iamaj sacerdotaj kunuloj, dum okazaj renkontoj, partoprenon al lia doloro iom ekscesan kvazaŭ ili jene opinius: *"Vi bezonas iom pli da kompato ĉar vi ne povas pretendi tiun de Dio el kies oficiala servo vi foriĝis".* Aŭ eble tiuj bolis nur en liaj duboj, kies spurajn framojn Albina, kiu inspiras la enhavon de ĉi fina ĉapitro, jam senmalhele senvualiga-

dis. Kaj sufiĉis tia penso por lin enfermi tra tristo kaj envojigi en repuŝajn humuraĵojn. Bonŝance tia humurstato, plirimarkebla en persono siamalgraŭe profunde kredanta, ne daŭris pli ol unu aŭ du tagojn kun kurtatempaj halooj.

La sama dialektika suspektemo, rilate alian objekton, lin metis en urĝon skribi: *"Kia eraro se kelkaj taksus mian enfermiĝon en min mem ago de snobulo kaj preciozulo!"*. Eble tio entaglibriĝis kiam li eksentis la senmotivecon de siaj rezistoj al amikaj premoj.

En taglibra krajona noto legeblas pri lia konscio pri sia ĝenerala rilato al la aliaj: *"Mi suferas je nesuperebla insista sufero: mi vivas kiel forbarata de ĉiuj ĉar mi evitas kunuliĝi kun kontentigitoj de la vivo dum la malkontentigitoj ne eltenas min; same mi kontaktas maljunulojn dum junuloj evitas kunuliĝi kun mi! Ankoraŭ mi ne akceptas min!"*.

Kiam la ondo de silento ekaludis al sia ekfiniĝo per rekomenciĝo de kunestado kun aliaj homoj, Albina ne mankis ameble-serioze admoni:

*"Ĉu vi ne timas aŭkcii vian animon per tia pesimisma humuraĉo kaj per viaj surrealismaj diraĵoj kontraŭ via sorto? Nek spito nek vivlaciĝo vin subvivigas sed nur frustraciiĝo. Eble ni volus ke Dio obeu al ni!"*.

Tiu prizorga ĉeestado de Albina, evidentigas, ke la eventuala ĝojstato de Ĝino malfacile eruptas el denaska inklino. Fakte por ĝin atingi li devis peni per longaj rezonadoj, kies malrapidecoj hezitigis la konatojn kaj kunlaborantojn.

Analizante kun Albina siajn humurŝanĝojn, li sin priskribis tiel: *"Mi rekuperas la rezignacion kaj la ĝojstaton nur per longaj kaj intensaj rezonadoj apogitaj sur la kredo: sed tuj, kiam tiuj ĉi ekmalintensiĝas, miaj vizioj pri miaj perdoj, ne senkulpaj, traplektas impete mian tutan animon. Mi eĉ konstatas, ke tiaj humurvariaĵoj ellasas ion nedisigeble memkontentiĝan: kuŝas io egoisma ankaŭ en bedaŭrosento"*.

Post kelke da tempo, unu jaro almenaŭ, de la forpaso de la filino, iom post iom, la paŭtemo lasis lokon al sereneco, kaj la antikva ĝojstato ekvenis esperigante ke mem definitive venkos. Tiam Albina povis senvunde ŝerci ĉerpante el liaj pasintaj esprimoj aŭ laŭsence similaj:

"Hodiaŭ vi ridetas kaj pridemandas pri diversaĵoj kaj oni povas komuniki kun vi, ne kun via nigraĉa silento!".

*"La silenton provokas obstrukcaĵo de pensoj kaj sentoj malordigitaj, nun tiuj ĉi ordiĝis kaj mi trovas puŝon kaj plezuron paroli kun vi! Mia obstina silento ne timigis vin, mi kredas, ĉar ĝi dependas nur de la momenta stato de la bilancfara spirito"*.

"Ĉu viaj pensaĉoj ne riskis damaĝi, ĉe vi kaj ĉe aliaj, kion vi senlaciĝe po-

rigis elspezante nekalkulebrajn energiojn?”.

*“Ek al, ni pluplugu. Kie ni haltis? Ne timu: nenio perdiĝos se farita purintence kaj viakunlabore”.*

“Ho, jes! Mi neniam rajtis timi. Ĉu ni remeroros niajn babilaĵojn pri la gardanta anĝelo? ĉar ni havas anĝelon sur ni!”.

*“Mi certas pri tio, sed tiu ĉi anĝelo, havas sian metodon, sian konduton, siajn misteraĵojn mirigantajn kaj jam kutimiĝintajn al mia adaptiĝritmo... Min skuis liaj/viaj streboj min serenigi”.*

Ankaŭ Elvira, laŭ Albina, en tiu ĝoja stato, akiris la formon kaj vizaĝon de akompananta anĝelo en dialogo kies revida saluto konstante reviviĝas ĉe la tera patro, kaj certe tiu konvinko originis el la insista konsidero, ke inter Ĝino kaj Elvira daŭre ekzistas perilo laŭdezire interkomunikiga: same kiel la fadeno de kajto, li diradis per elsperta metaforo, laŭ kiu, kun la venteto favora, infanaĝe li iam sendis paperajn mesaĝojn al la kajta supre svinganta korpo mem. Tia perilo estis Dio, al kiu dum matena duondormo li (tio troveblas registrita en lia taglibro) intense ripetadis, per silento aŭ duonvoĉe kaj superante la honton pro la apenaŭ estingitaj ribelaj juĝoj kaj akuzoj kontraŭ la sama Dio, sian kontentiĝon pro ties ekzisto kaj ĉeesto.

En tiu stato la sepdekkvinjara maljunulo trovis okazon por ŝerceti kun amikoj. Ne tro tamen pro tio, ke en lia memoro ankoraŭ *ĉeestiĝas kiu multe suferis*. Tiam Ĝino ne retenis babilemon kaj simpatiemajn rilatajn signojn kun personoj kaj ree akceptis la kutimajn volontulajn taskojn, eĉ se nur de *anstataŭo*, por ĝisdatigantaj kvazaŭlekcioj: en propraj fakoj, literaturo greka-latina kies belaĵojn li kapablis kontentige kombini en siaj prireligiaj komunikeblaj scioj, kie la fluo ŝajnis neniam halti. El li ankaŭ reeliris la kapabla kaj senŝancela verviganto de renkontiĝoj kaj distraĵoj por la malplijunaro aŭ “avanaro”.

“Indas ke mi ripetu, preskaŭ laŭvorte diradis Albina, lian allogan improvizitan konversacian sintezadon kun kleraj homoj:

*“Kiu pli mistraktata ol Dio? La jarcento kiu antaŭ ni fuĝas estis jarcento kiu en multaj el siaj influaj kaj disvastiĝintaj filozofiaj movadoj, pretendis forstreki la spacon de la kredo, malpermesi precize la eniron de Dio en la menson kaj koron de la homoj. Fakte, laŭ la* materialistoj *la transcendo estas nenio pli ol iluzio, kaj laŭ la* pozitivistoj *Dio estas neutila hipotezo, laŭ la* idealistoj *la kredoveroj estas mitaj alproksimiĝoj el kiuj filozofio eltiradas la racian kernon, laŭ* marksistoj, *la aferoj pluiras trans tion ĉar, laŭ ili, Dio estas nek iluzio nek mito nek neutila hipotezo: Dio estas pliekzakte alienacieca opreso, kies kaŭzojn oni devas elradike eltranĉi ĉar, krome, religio estas la*

*rifuĝo de la opresa kreitaĵo, la koro de senkompata mondo kaj ĝi estas la opio por la popolo. "Obsedan tutmondan nevrozon" volas vidi* freŭdistoj *en la religio.* Kaj samtempe la ateista frakcio de ekzistencialistoj *faras el Dio dialektikan nesencaĵon dum iliaj kontraŭuloj, la* strukturalistoj, *puŝas Dion inter la fabelajn neniaĵojn. Kaj puraj kontraŭsencoj estas, laŭ* neopozitivistoj, *ĉiuj kredasertoj kaj metafizikaj propozicioj aŭ nur materialo por* psikanalizistoj. Por liberecemuloj, *eĉ la nocio pri Dio sklavigas la homaron*! Por postmodernismemuloj *Dio rompus la absolutan memstarecon de la homo*... Ni iru laŭdi Dion por ke Li estu ankaŭ la plej amata, krom la plej fantasmagorie neata".

En tiu reviviĝa psikostato evidentiĝis, ke la fandiĝo kun la animo de Albina rekreiĝis senrezerva ĝis la minimumaj etaĵoj kaj senteroj, tiom, ke li kutimis, reĥante versojn de Cesare Pavese[2], kun malsamaj tonoj sed kun la sama sentuma intenso, ripetadi adresante Albinan:

*"Pro amo viaj amoj*
*fariĝis miaj amoj!".*

Tiujn du sepsilabajn versojn, kiujn li taksis "mistikaj kvankam remaĉeblaj", estis preta prononci Albina kiam la humuro de Ĝino minacis ekakiri la krizan regresiĝon. Kvazaŭ estus ŝi la kaŭzo de tiu humurŝanĝo, ŝi apelaciis al tiuj versoj kaj karese ripetadis ĉar por ŝi tiun ĝojon, kiun la edzo elfosadis per rezonado, ŝi travivadis spontane, kaj eĉ sen paroli pri tio, dum siaj volontulaj servoj al ĉirkaŭuloj aŭ, pli ĝenerale, al proksimuloj, kaj ŝi havis la certecon, kaj, foje, la sensacon, esti ame servanta al sia Elvira kvazaŭpluvivanta. Ankaŭ ŝi tamen, foje, trovis impulson kaŝi kaj bridi la ĝojan fluon pro la abrupta prezentiĝo, al sia memoro, de la infano/junulino skuetiĝanta per doloro aŭ perdanta kontakton kun la vivo.

Tiuj versoj, kun siaj halooj sentaj kaj memoraj, rolis kiel lasta ilo por elnestigi Ĝinon el ondo de melankolio malebligante, ke ĝi refariĝu tristeco kaj muteco.

Albina jam sperte konstatis, ke kiam li komencis intensigi interparolojn kaj komuniĝojn signifis, ke li eliras el tia stato; tion oni komprenus ankaŭ el lia revenanta emo karesi aŭ ame komplimenti la nepojn de siaj amikoj kaj kunĝoji pri ili, kvazaŭ la konscio pri la samo al li neita fine jam definitive fariĝus, krom eltenebla senperspektivaĵo, ankaŭ fonto de pli homa sentemo; iam, foje, tiaj ĝojoj de amikoj suferigis lin ne pro envio, tio estas pro bedaŭro, ke ili ĝo-

[2] Piemonta verkisto kaj poeto (1908-1950), kies verkoj, aparte iuj poemoj foje originalaj pro formo kaj enhavo, multe influis la torinan kulturon.

jas, sed pro nebremsebla, el nekonsciaj profundecoj, elmerĝo, ke tiaj ĝojoj al li estas neataj. Albina atendadis kaj gvatadis kaj provadis anticipi tiun momenton. Kaj, reveninte, tio ĉarmiĝis kiel nova naskiĝo.

Albina enŝovadis okazon por memori pri la oka ĉefmalvirtema tendenco en la homa psiko. En kelkaj el la mezepokaj Sumoj estas aldonata al la sep ĉefaj malvirtoj ankaŭ la okan: la tristeco! Pro tio ke tristeco forgesas kaj nuligas la gajigantan ĉeeston de Dio.

En la taglibra paĝo, notite eble nur humursente, kie Ĝino plurfoje sin vizias *kavaliro deseligita,* rilate tiun strebon forigi tristecon kaj eksciti ĝojon, oni povas eltiri tiujn dialogojn, kie Albina iniciate rolas:

"Mi iom agnostikas".

*"Pri kio vi agnostikas?".*

"Ke vi estas kavaliro deseligita. Vi male ensaltis sur novan turnirulon, ni kune rajdas plifortan turnirulon!".

*"El kio tiu nova ĉevalo militema? Ĉu mi min ŝirmu per kiraso kaj helmo por batali kontraŭ mi mem?".*

"Tiuj viaj, kaj miaj, volo kaj provo transdoni kristanajn fundamentojn pri preamboloj de nia kredo; kaj tiu via nova kreskanta engaĝiĝo prelegi kaj alfronti penojn por utili al la proksimuloj... kaj devontiĝo kontribui finance. Ni de tiuj taskoj ne estas deseligitaj! Jen nia nova turnirulo!".

*"Fakte tial, laŭ vi, ni ĉiam povas firme rajdi".*

"Fakte nun vi ĉerpas el nova kunteksto, el nova sperto markantaj konvinkiĝe vian vervon, viajn malkovraĵojn de la vivsenco".

*"Tiam, laŭ vi, ni lanĉite marŝas sur la vojo de sanktiĝo...! Malestas nur la publika aplaŭdo! Male, mi de tempo al tempo deseliĝas de tiu turnirulo, la kapon konscia kaj la okulojn strečitaj, por reordigi ĝian selon kaj mian kirason".*

"Pli ekzakte, por vin disciplinigi en la servo al Jesuo Kristo kaj al ties fratoj... Mi haltas venkita de via dialektiko! Pro amo viaj amoj fariĝis miaj amoj!".

*"Pro amo viaj amoj*
*fariĝis miaj amoj!".*

**Ĉapitro dudekunua**

## Denove surseliĝinta kavaliro

Intensigante la volontulajn aktivadojn, sed senvole, Ĝino fariĝas rilatpunkto por la maljunularo de sia kaj najbaraj paroĥaj distriktoj lin invitantaj kiel iniciatinton de novaj aktivadoj naskiĝantaj el la religia grundo. Kune kun maljunuloj partoprenis en liaj renkontiĝoj ankaŭ ularo malpli maljunaĝa. Al ĉiuj ŝajnis, kaj eble ankaŭ al li mem, ke lia maljunaĝo jam estas trovanta novajn *okupiĝojn*, plibone ke ĝi povas kaj devas investi sian tempon avantaĝe de la socio, kontentigante same korpon kiel spiriton. Al tio li sukcesis altiri, ne rifuzante, foje, esprimi ĝojon pro la akceptiĝo ĉe la publiko, kaj pro tio, ke diversaj sferoj de sia humanisma sciaro preskaŭ spontane investiĝas. Al ĉio tio li aldonis, kvazaŭ por ne tro malbridi sian korvibriĝon kaj por sin ironie distancigi el sia intelektula emo al verserĉado, ke *"kristanismo ŝajnas esti inventita kaj tajlorita al miaj maljunulecaj bezonoj...";* kaj, ironie direktante la fingron kontraŭ la profitemulo, kaŝita en li mem, preta, laŭ li, ekspluati eĉ religiaĵojn kaj eĉ ilin fleksi laŭ sia mezuro *"kiu nun, por mi, estas provo fari el ĝi ilo por miaj kontentiĝoj kaj ambicio, malbonŝance. Kristanismo do je mia servo kun risko ĝin bastardigi!!!"*. Eĉ tiu sinanalizado estas frukto, komentos Albina, de la emo senindulge *spioni* ene de si mem, inokulita dum la seminariaj jaroj. Kvankam tiuj "spionadoj" ene de si mem fruktis travideblecon kaj sintonion kun postuloj de sincera konscienco, tamen Albina foje ne sin malpermesis tiujn suspektigi trooftaj, preskaŭ "obsedo".

*"Sed tiu kristanismo havas sencon kaj altiron nur se kunligita kun ĉieĉeestaj signoj motivantaj ĝojon pri Lia ekzisto, sendepende de nia pri ĝi frandado",* Ĝino recitis al si kaj al Albina kaj en meditaj diktaĵoj. Kaj tio estis kiel la lasta eta kaj kaŝita testamenta devizo.

Rilate volontuladon, ankaŭ lian animon ekronĝis, bonŝance nur por esti forigita, la komuna krizo tiel taglibrigita: *"Ĉu valoras la penon insisti en energikonsuma flegado kaj morallevigo de homoj kiuj, kvazaŭ spite al volontula konstanta engaĝo, daŭras esti mizeraj, perfortemaj kaj agitiĝemaj?* ".

Aldone al tiu foje okulumadis, jen el lia memironiemo jen el la stato de lia kreopovo, la maldelikata, sed sproncela, fendo ke volontulado okazigas la lastan rezistolinion de maljunulo perdinta esperon kaj kapablon rekte influi la mondon: forpermesiĝi el vivo ja, sed almenaŭ en kontakto kun hejmaj kaj eks-

terhejmaj malbedaŭraj komentoj! Sed por igi nur ŝajna tiu pesimisman vivvizion li tenis jam preta kaj rimarkita, eĉ en prelegaj dialogoj, korektigan realĝustigon: *"Bono valoras per si mem, sendepende de la motivaĵoj de la ĝin faranto".*

Iujn de la lastaj vivjaroj li volontule dediĉis al la asistado de narkotaĵemuloj ekaktivantaj por eliri el la sindetruo en rekupera komunumo, funkciante, krom ĉiohelpanto, kiel psikologia spertulo. Ĉiutage unu horo aŭ pli inter la gejunuloj, foje ankaŭ pli ol kvarjaraĝuloj!

Intereson ekscitas liaj impresoj pri si, plurfoje priskribitaj al la edzino kvazaŭ por reflektigi al si la ĝustan ordon de valoroj. Sentojn inter si kontraŭajn li notis en si mem rilate la "gastojn" en saniga kaj el narko-uzo-liberiga traktado: *"se mi uzas multe da kompato kaj amo traktante kun la liberiĝantoj el narkotaĵoj, se mi paciencas en la aŭskultado kaj esprimas sincerajn simpation kaj partoprenon,ilin fortigante en la submetiĝo al la " programaj" bridaĵoj de reeduka kunvivado, ja jes ĉio vera! Sed ĝuste tio, tamen, reage ekprovas transformiĝi al malsimpatio kaj al senmizerikorda juĝo kontraŭ la interrompantoj de la sentoksiga kuraca-reeduka "programo" aŭ kontraŭ rehokiĝantoj tra narkotaĵoj kaj krimoj: en min pli ol doloro foje ensaltiĝas punvolo!".* La elreviĝo de nereduktiĝo je drogouzo ekprovas translimiĝi al malsimpatio kaj eĉ ŝanĝi la amon en same tioman indignon. *"Mi devas daŭre min refari kaj konfronti kun Jesuo Kristo,* li lasos skribite, *kies faktema elvola kompato neniam ĉesas kaj ĉiam renoviĝas. Kiom da luktaj rezonadoj kun tiuj miaj impulsoj…".*

Li kutimis signi en la taglibro, kiu poste restadis ofte malfermita sur skribotablo: tiom lia animo estis konfidema al Albina, kiu tamen daŭre respektadis lian privatecon. En paĝo de tiuj lastaj tagoj registritas jenaj vortoj kiujn li en suferanta intimo envolvis je poeziemocio laŭ sia kutima stilo, eble aludantaj al Albina:

*"Jam ŝian vizaĝon brodas la pasintaj belaĵoj pluvivaj en mia memoro kun la virtoj de ŝia animo. Ĉu ĝuste la virtoj forfuĝigis, kvazaŭ senutilajn, la fizikajn belaĵojn de ŝia vizaĝo tiun ĉi trastrekante per faltoj? Aŭ ĉu mia neglektemo aŭ indiferento konsentis, ke tiuj ĉi instaliĝu ĉirkaŭ la ĉarmaĵoj de ŝia vizaĝo? Kulpas mi kiu ne antaŭvidis tion! Kial mi ne haltigis tian ekruiniĝon? Aŭ ĉu, eble, tio ne estas ruiniĝo sed nur envolvilo kaj gardilo de jam maturiĝintaj kaŝitaj belecoj? Jes, ili estas altiraĵoj iam nur apenaŭ traviditaj! Jen mi ilin kisas kaj kontemplas".*

Kiam Albina rekonis al si la rajton kaj devon legi tiujn liniojn, tiujn alu-

dojn ŝi ne hezitis atribui al si kun kontentiĝo, kaj nur kun pudorsento ilin poste allasis *inter la materialoj* al la finkompilisto de la romano. Rilate la taglibron ŝi feliĉis konstatigi, ke liaj registritaj rimarkoj kiam estas facile kaj komunikiĝante kompreneblaj ili ne estas leĝeraj, nome ne senaj je subtila enhavo, kaj kiam ili postulas pli da atento tio okazas pro densigo de pensaĵoj.

Iun tagon Ĝino, je la kutima horo, ne supreniris al la supra etaĝo. Laŭakorde, kiam neantaŭvidita malhelpo malebligas la ĉiutagan renkontiĝon, du telefontriloj avizas, ke la rakontada kunsido prokrastiĝas je unu tago, male unu telefontrilo signalas baldaŭan alvenon. Tiun merkredan matenon Ĝino ne signalis ion ajn okazotan. Tiam la *"notaria"* esperantista kunlaboranto, venkinte hezitojn, subenkuris, frapis. Neniu respondo. Oni sciis, ke Albina la matenon aktivadis en sia volontulejo ĉe siaj pormalavantaguloj de Cottolengo (Kotolengo).

Post dek minutoj la kundomano, superinte la kromajn hezitojn, provis telefonkontakton sed senrezulte, kaj refrapis ĉe la pordo, kaj rememoris, ke inter la ŝlosiloj de sia ŝlosilujo kuŝas ankaŭ tiu de la apartamento de sia amiko. Li kuris malfermi, timante ion gravan, puŝis la internajn pordojn, eĉ tiun dormoĉambran: la amiko surlite, littukstringanta la manon kaj sternitaj la brakojn kaj vitraj la okulojn, kuŝas en la malstimulita pozicio kvazaŭ poze. La alvokoj akompanas la mantuŝojn sur la frunto: la korpo ankoraŭ varmas. Tamen la alarmo kaj la rapidhelpo nenion povis. Albina, haste revenigita, apenaŭ travidis, inter flustritaj bedaŭro-komentoj, sian viron en ambulanco, eble jam mortan, eble mortantan; en malsanulejo lin trovis jam mortintan.

Ĝino mortis, subite, dumdorme aŭ unuavekiĝe, eble helppetis, eble ne konscis sian alvenantan sorton, eble eĉ la tempo adresigi sian spiriton al Dio mankis al li. La manoj stringis littukrandojn kvazaŭ serĉantaj helpan apogilon aŭ distrigilon el doloro. *Tiuj littukrandoj eble devus esti mi*, bedaŭros Albina.

Ĝino estis vojaĝanta kun enviebla bona farto kaj intelekta lucido tra la sepdeksepa jaro. Fulma infarkto fortranĉis eĉ liajn dolorajn rememorojn al kiuj li estis tiom alforĝita, kaj certe enmetis lin en la daŭre volitan ĝojon.

Restis, kaj restos eble kelkatempe, pri li etaj memoraĵoj, krom la jenaj (bonŝance!) skribitaj, intense amataj kaj mense pludaŭrigataj ĉe lia kunulino, kaj ŝatataj ĉe iuj aliaj, eble tro malfrue informitaj pri lia forpaso.

Albina, senaĝa maljunulino, intence dissemis al siaj kaj liaj intimuloj, ke li, post la foriĝo de Elvira, sukcesis venki deprimiĝon kaj ankoraŭ vivi plane kaj cele, sed intime tiu memoro jam fariĝis konstanta dolĉa borilo. Ĝino por ŝi estis prizorgebla sed ne bezona je prizorgoj: ŝi ideale vartis precipe sian kreaĵon! Ŝia vivo: semajnaj du florbukedoj kaj preĝejo kaj volontulejo.

*"Ligitaj en la vivo, apudaj en la tomboj, kunigitaj ĉe Dio",* ŝi diktis por la funebra bildeto aludanta la forpasintinon. Tiu moto atendas realiĝi ankaŭ por ŝi, dume ŝi vivas en sereneco, kvankam apogita sur doloraj memoraĵoj mildige malakrigitaj de la tempo kaj de la rakontado pri li en la ĉi romankompilado. Rilate ties enhavojn ŝi plezuriĝis pro tio, ke ili fidele kaj sincere reflektas liajn karakteron kaj realajn travivaĵojn.

Rilate tion, malmultajn tagojn antaŭe Ĝino ricevis respondojn al sia enketo ĉe amikoj ĉu tiu ĉi romano-biografaĵo povus trovi legantojn: venis neunufoja obĵeto ke legantoj malfacile rezistos ĝis la fino de rakonteroj kiuj ne obeas al modernaj "rekte enen, rekte alen", kaj, se la "entenoj" (pli gramatike ol stile sufiĉe prilaboritaj!) povas trafi la fantazion, bedaŭrinde el la diktanto ŝpruciĝas, krom sento de frustracio kaj intelekteca ludo, tro da solena asertada aplombo limiĝanta kun orgojlo kaj trotakso pri si. Pri tiu ĉi lasta punkto li ŝercis, ke la kontrolistoj intuicie aŭdis la graŭlaĵojn de Albina, kvankam li kaj ŝi alkalkulis la diktatan *"modestecon vestitan per orgojlo"* pli al aspektoj ol al realo, kaj la tendencon intelektule ludi pri ĉio kaj sur ĉio pli al dialektikemo ol al pretendo de supereco. Ankaŭ li foje allasadis, ke sen tiu *"asertemo"* la komunikado estus pli komunikiĝa kaj simpatiekscita kaj tio pruviĝis diversokaze; ielaj klopodoj sin moderigi foje sukcesis, plurfoje konstatis, ke la *malvirto* fenikse renaskiĝas.

Esperantistoj preserarojn kaj stilmallertaĵojn amatore ĉasantaj, kaj pli ol amatore ĉion trasarkantaj, ne sin detenis proponi plibonigaĵojn rilate lingvan precizecon por elimini, ekzemple, neapenaŭajn stumblojn, aŭ kredigi konceptan klarecon makulita per antikvlingveco kie diafaneco anstataŭas nuancecon: sume estis konsilite preskaŭ ĉion "amendi", ankaŭ pro la sencobskuranta kvanto da dubaj amikoj kaj por malhelpi, ke la komenca originaleco finiĝu en averaĝecon. Por sondi el faktoj tiun "klarecomankon", al ili li laŭtvoĉe legadis erojn kritikitajn: kaj al li ŝajnis, ke en la hezitigaj "kritikistoj" ne tute forestis iu, kvankam apenaŭ perceptebla, "klopodo por ne kompreni", laŭ konfidencaj liaj samtempaj reagoj. Ankaŭ pro tio, li insistis en la serĉado pri la plej malpli maltaŭga titolo kiu provizore sonis "materialoj por la romano *serĉanta titolon*". La definitiva, ne sen amikaj prijuĝoj, markiĝas per aludo al Dio kiu lin ĝojigis kaj suferigis. *Suferigi por fine ĝojigi.* Tial, laŭ lia, kaj de Albina, deziro: *Ĉu stumbliganto aŭ ĝojiganto.* Sed konsiloj de antaŭlegantoj preferigis *La homo kiu ne sukcesis trompi sin mem?*

Foje vizitante, aŭ revenante de vizito al iliaj entombaj restaĵoj, Albina sin metis antaŭ Ĝino ame riproĉante pro tio ke li ne plenumis la promeson: "Mi ko-

nigos al vi mian surseliĝon sur la nerevenanta turnirulo, kiu elseliĝas ĉe tiu kiu nova faras ĉion". Ja jes, li konigis nur sian sepultadon!

Albina nun restas sola konservi la restaĵojn de l' vivo kiu konsumiĝis tute por ŝi kaj de l' vivo kiu eliris el ŝi. Timeme ŝi pri ili parolas, kvazaŭ por ne disperdi sian trezoron, preta prefere aŭskulti por partoprene konsoli alies afliktaĵojn. Eĉ rilate liajn rememorajn rakontojn, celantajn romaniĝi, ŝi ne volis modifi kaj opiniis ne revizibezonaj la jam diktitajn preferante, ke ili restu elementoj prilaboritaj por la eventuala romano, kiu laŭ ŝi devus elmontri super la oficiala titolo la almenaŭ etlitere esprimon: „materialoj por la romano".

Preskaŭ ĉiutage ŝi supreniras al la supra etaĝo, sidiĝas apud la esperantiganto de la vivrakonto de sia edzo, precizigante kaj aldonante erojn, konsultante la edzan taglibron, nun sian viatikon. El ĝi ŝi elĉerpas erojn koncernantajn Elviran, kiel jenajn, de ŝi apenaŭ konatajn ĉar de Ĝino nur vage aluditajn:

VI ESTAS ĈI-TIE KUN MI

1. *Spasmanta ŝoso de l' kor',*
*ankaŭ post via disfandiĝ'*
*vi ne estas ter'*
*nek ŝovaĝa radik'*
*ebria je tero kaj akvo*
*disvastiĝanta tra ĉiuj nenioj.*
*Vi estas tie-ĉi kun mi!*

2. Nek koro nek ama fantazio
vian leĝeran momenton
vian bruon de hirunda flugo
viajn kriojn dolĉajn fendojn
rekreas aŭ belige tordas
kaj igas el morto vivaj:
vi estas tie-ĉi kun mi!

3. *Kiam elvokendas beleco*
*ĝi havas vizaĝon vian*
*kiam elvokendas disfalo*
*ĝi, ve! havas vizaĝon vian*
*kiam elvokendas primia bildo*
*ĝi havas doloran vizaĝon vian*
*sed vi estas tie-ĉi kun mi!*

4. Kio estis via malhela
tero kiun vi abele fendis
nun forgesas viajn spurojn,
konturoj viaj nun malŝaŭmas,
ankaŭ el priviaj memoraĵoj
ekemanas ŝanceliĝojn.
Sed vi estas tie-ĉi kun mi!

5. *Tie-ĉi ne pro obstina memoro*
*nek pro velkantaj memoraĵoj*
*ĉiuflanke vin elvokantaj*
*nek pro la promesoj foje*
*plu en iluziojn vekiĝantaj*
*sed pro promesoj eterne igantaj*
*vi estas tie-ĉi kun mi!*

6. Kial ploradon senutile ĉie
ploris sennombraj kunteranoj?
Kial enigmigi jam klarajn vortojn?
Aŭ ĉu mi hontas sciigi aliajn
kaj min, ke vi havas ĝojsperton?
Oni ne plu penu cedi antaŭ vero
ĉar vi estas tie-ĉi kun mi!

7. *Mi volas ne plu plori,*
*mi ne rajtas plori, ploro*
*miskomprenigas sorton*
*malpliigas vian ĝojon,*
*senutiligas certecojn,*
*resatigas vin de tero kaj akvo*
*dum male vi brilas ĉi-tie kun mi.*

8. Ĉio mia vias, ĉio via mias…

Tie-ĉi la poemeto eble atendis kroman favoran momenton por kompletiĝi per intuicieblaj versoj.

Ke li ne rezignis esplori kaj interpreti la aktualan socion, spite al sia dolora memoro tentita fariĝi disiga delektiĝo, koniĝas el longaj notoj verkitaj unuspire kaj parte esperante, kiel la jena, eble ŝablona sed pasia, el liaj ŝatataj

temoj: *"La nia estas mondo de intensa komunikado: telefono, telefakso, elektronika poŝto, porteblaj varifunkciaj telefonetoj, sintezaj alfabetoj... estigas senĉesan elmemiĝon. Tio diluas la intensecon de la emocioj igante ĉion ŝajnemocia kaj bagateligante la vizaĝvizaĝan rakontadon ĉar malofte emociado naskiĝas el profundo de sentoj, kaj ĉiukaze restas forflue; kiam la sentoj estas bezonataj kaj urĝataj, la homo trokomunikanta riskas ne plu trovi la ĝustajn lingvaĵojn kaj la oportunajn ulojn, tiujn ĉi jam aridiĝintajn kiel li. Komunikado sensentema sekigas la sentimentan fonton mem, same kiel la troa komunikado riskas afektiĝi".*

Kroma eltiraĵo el la sama paĝo:

"*Kiam sentoj, la geedzecaj kaj amaj sentoj ekvelkas, necesas ilin ekveki per eksteraj gestoj kaj signoj: la praktikado de simbolaj signoj foje reeĥigas kaj fajrigas la ekpaliĝantajn sentojn al veraj sentoj: la komunikado povas fariĝi signo aŭ postuli signojn ĝermantajn en veran amon".*

Kaj aliajn erojn de liaj konfidencoj Albina, kvazaŭ por ekkvitigi sian ŝuldon al la memoro pri li, legadis gustumante vortojn kiujn ŝi plezuriĝe eldiris laŭ lia infleksio.

*"Mi neniun instinkte kaj spontane amis krom Ŝin kaj Elviran. Sed se amo estas deziri bonon al aliaj, eĉ al fremduloj, kaj prizorgi nivele de intenco kaj volo, laŭeble, ilian sorton, mi amas ĉiujn pere de miaj amatoj engaĝiĝantaj por la aliaj".*

Per ĉi-suba noto eble li sin akuzas:

*"Se la eterneco konsistos, krom el esti, ankaŭ el fari, mi dum ĝi pardonpetados al sennombraj homoj. Mi malofte ĝojis antaŭ iliaj bonŝancoj kaj komfortoj ĉar tiuj ĉi ŝajnis al mia kora mallarĝeco malpliigi la miajn aŭ montre riveli kion, materian aŭ intiman, mi ne havas; ofte mia animo nur aspekte partoprenis, pense kaj kore, en iliaj suferoj, se ne kiam venke kroniĝis mia volo malkonsenti kaj kontraŭi indiferenton aŭ malkontenton tiujn ĉi envojigante al la akcepto kaj kontentiĝo. Tia listo neniam finiĝos! Foje mi ekĝojas antaŭ alies missortoj. Mi imputas tian spontanan, sed rege kontrolebran, psikmisaĵaĉon al la kategoria "amo por la katastrofo" kvazaŭ tiu ĉi pliprestiĝigus min kiel spektanton aŭ rakontanton. Ankaŭ pro tio mi devos pardonpeti al pluraj".*

Aldonaĵo de Albina: "Ofte li manifestis, ke mem estas luktanta kun tiaj supre priskribitaj nevolaj tendencoj. Tia lukto, kunfandita kun la vola amo, estigas, mi certas, lian punkton de merita nobleco. Foje li konsterne miris, protestante kontraŭ si mem, pri sia ofta unua instinkta impulso de envio antaŭ nova anonco feliĉiga por proksimuloj, kaj komentis: ĉu ne estas tio, en mi, la signo de

la origina peko? Ĉiel ajn mi preĝas, tio estas mi *volas* deziri el Dio ĉion bonan al tiuj, kiujn mi tuj unuaimpulse ne amis".

Ĉi-sube estas elmontrata lia kutima sinteno:

*"Matene, kiam mi atendas, ke Albina vekiĝos, mi preĝas por ĉiuj kiuj estis kreitaj, de la fora unua antaŭhistoria mortinta homo ĝis la nun vanuanta en la nenion de sia korpo. Por ĉiuj mi volas sperti kundestinon, eĉ por la mortigintoj. Por ĉiuj mi volas sperti kundestinsenton, eĉ por la perfortuloj kiuj pretendis ŝanĝi la alies destinon tiujn ĉi igante sklavoj aŭ servantoj aŭ ilin, fine, mortigante. Mi petegas kompaton por tiuj kiuj, sin iluziinte povi periferiigi Dion, mistrafis la ĝustan vojon kaj provis lin elimini aŭ lin igi sia servisto. Mi volus ilin ami kiel Li ilin amas. Mi volus ke ĉiu akceptu la Elaĉetinton por ĉiuj!".*

La jenaj obskuraj vortoj, eble el klara konscienco pri sia fino, pri kiuj Albina trovas similajn al liaj konfidencoj:

"*Mi forlasis al morto aliajn, justas nun, ke aliaj forlasu min al morto".* Ĉu kulposento pro imagita allaso de pluaj kuracoj rilate Elviran? Aŭ nur pro lia indiferento antaŭ la seninterrompa homara glitado al morto? Aŭ protesta snobo pro senutileco, okaze de morto, de la homa solidareco?

La jena certe naskiĝis el lia admiro pri la religia fido kaj allaso al Dio, kiun li vidis en Elvira: fido kaj allaso kiuj tro malofte estas perceptataj kaj konataj ĉe ordinaruloj, kiuj fuĝe preterpasas super la suferantaj animoj sen provi eniĝi en iliajn mensojn: "*Malfacilas hodiaŭ paroli per edifanta modelo de la individua vivo: eĉ la plej sankta vivstilo restas nekonata kaj neinflua: estas rezultoj de la moderna nova mortostilo. Virtulo iam influe videbliĝis, hodiaŭ li restas aŭ ne vidata aŭ ne konsiderata: estas la nova maniero eklipsigi Dion kaj eklezion kaj sanktaĵojn ĉiuspecajn".*

La suspekto pri proksimiĝanta morto elrampas ankaŭ el la sekva laŭsenca citaĵo el verko de Casanova (Kazanova), krajone substrekita:

*"Kiam la monstra morto forportas el partero spektanton, tiu ĉi estas ekscitiĝanta pli ol antaŭe pri la spektaklo... Casanova tamen plene sin konfidis al Disinjoro kiel volas mi nun".*

Post lia forpaso revenis ĉe lian domon libroj pruntitaj. Kaj oni memoris pri alia lia merito, tiu de fervora pruntedonanto de libroj eĉ al personoj malpli fidindaj por la redono; ankaŭ tial oni kelkfoje konsideris lin naiva bonemulo, kaj Albina memorigas, ke por li libro estas varo cirkuligenda, malgraŭ riskoj perdi ĉion, por plifluigi kulturon per rekta parola opiniinterŝanĝo, en kiu lia vidpunkto fariĝis ekaliro al Dio, ĉe ĉiu redonado, kaj, ke foje libro reale fari-

ĝas vehiklo de idekonatiĝo. De tio, lia konduta devizo: *Libro ne pruntita libro funebrita!*

El lia komputilo dedukteblas, ke li estis prilaboranta, eble ne nur kiel kabinetan provaĵon, verkon, kies ĉapitroj estas apenaŭ skizitaj, nur tiu fina konturiĝas finfarite pritraktita eble publikigcele; ĝi pritaktas aktualan problemon: la kulpoj de la eklezio, tiom tiuj flagosvingitaj en klerikaj babiladoj kiom tiuj serioze ŝvebigitaj en laikistiĝantaj medioj. Prie li skribas:

"Kiel oni scias, kristanoj batas al si la bruston kaj praktikas la specifan riton de la pardonpeto al Dio kaj estas ordonitaj senkondiĉe reciproke pardonpeti, eĉ pardoni la persekutantajn malamikojn: oni povas vidi el tio, ke neniam ekleziemuloj ne priatentis kiom vastas la pekemo kaj pekeco de la eklezia membraro.

"Hodiaŭ, en la renovigita esplorlibero, oni ofte frapas kontraŭ kazoj en kiuj kristanaj komunumoj aŭ la tuta kristanaro aŭ kaj eĉ la mem superaj aŭtoritatuloj de la eklezioj ŝajnas kompromititaj en maljustaĵoj aparte koncerne la homajn rajtojn. Jen la problemo: *Ĉu vere la eklezio pekis?*

"Por laikisto, al kiu neniel interesas la sorto de la eklezio, la historio montras nereteneble kaj nekontesteble, ke la eklezio ofendis la homon, nome pekis; kristano male recitas en sia kredo: *mi kredas je unu eklezio... sankta* ktp, dume la historiaĵojn vidas ankaŭ mem. Se por laikisto, kaj ne nur por li, la du konceptoj kontraŭdiras unu la alian, por kristano la peno ilin akordigi ne fendas la certecon, ke ili vere jam akordiĝas ĉe la dia vero.. *Kiel? Kiel evidentigi kaj alproksimigi al racio tian akordigon?*

"Tiu problemo reflektiĝas ankaŭ en onidiraĵoj, kaj mobilizas foje kolerecajn sindefendojn aŭ neadojn de kulpo foje neglektante kiom da vero kuŝas en tiu afero, dum la evangelio ordonas, ke ni konu la veron ankaŭ en ĉi tiu kampo, ke ni purigu la memoron laŭ ĵusa fama diro.

"Jen sinteze ĉi-koncerne mia penso kun elprovo ĝin pravigi per ĉeno de rezonadoj. La eklezio - mi parolas tiukaze pri katolika eklezio - estas *sankta* pro tio ke ĝi estas konstituata kaj loĝata de Kristo, de la sanktuloj kaj de tiuj kiuj nun vivas en la dia graco, tio estas en la amikeco kun Dio. Ĝi ne povas esti ankaŭ en peka aŭ pekema stato ĉar tio estus kontraŭdira kaj orientita kontraŭ Dio mem.

"Kaj eĉ ĝiaj membroj ne povas esti pekantaj ĉar ne imageblas organismo tute senkulpa en kiu tamen ĉiu ĝia membro povas esti en kulpostato. Se iu solidaras kun tia vidpunkto, certe tiu penus eviti skizofrenion. Kiel do kombini respondon respekteman pri kaj historio, kaj kredo, kaj teologio? Kaj respekte-

ma ankaŭ pri la postuloj de la racio, kvankam la kredo transsaltas la racion. Problemo nesolvita infektas ankaŭ la jam solvitajn...”.

Jen lia provosolvo:

“En la eklezio oni loĝas laŭjure *(videble*, samkiel en ĉiuj socioj) kaj intime *(en sankteco*, tio estas en plena harmonio kun Kristo). Ambaŭ manieroj povas esti damaĝataj kaj detruataj nur konscie kaj libervole.

“Se iu, vole, disiĝas de la eklezio pro damaĝo aŭ vundo kontraŭ ĝia aspekta *videbleco* (herezulo, kiu ne akceptas aŭ batalas unu aŭ kelkajn dogmojn), ĉiuj vidas kaj povas informiĝi kaj konjekti kiu membras kaj kiu ne membras en la eklezio. Esceptokaze de eraro, la problemo proponiĝas jam solvita: nome oni vidas la *pekanton* (sendepende ĉu li vere tias antaŭ Dio, kiu vidas la koron dum ekleziulo ne kapablas eniri la profundaĵojn de alies konscienco). Kaj do oni vidas, ke tiu ulo ne plu membras en la eklezio.

“Se iu disiĝas intime, nome se iu rifuzas Dion per libere vola sinteno dezirante Lin elimini, kristane vortite, per mortinda peko, tia ulo ne plu membras en la eklezio ĉar en tiu kazo estus kulpe implikita Jesuo Kristo. Tio estas, tiu ulo ekstereklezias pro tio ke en li ne plu ekzistas la karitato (aŭ dienverŝita graco) kaj la espero kaj la kredo. *Aspekte* li apartenas al la eklezio, *reale* li vivas ekstere, jen scianta pri tiu memekskludiĝo jen nescianta pri ĝi: tiamaniere li ne makulas je pekeco la eklezion.

“Nu: kiel rilatas unu al la aliaj tiaj specoj de kristanoj, *aspekta-intima* kaj *intima-senaspekta?* Tio nun ne interesas, interesas nur kiom kaj kiel estas kuntrenita kaj implikita la eklezio.

“Tiupunkte, tamen, antaŭeniĝas du problemoj, pli teologiaj ol kredaj. Por eliri el la malglataĵo jen mia rezonado.

“1) Kial aserti, ke pekulo grave pekanta ne plu posedas la kredon? Ĉiuj katekismoj instruas, ke la peko detruas la karitaton (aŭ dienverŝitan kaj sanktigan gracon), ne necese la kredon. Mi respondas pripensante la demonojn. Ĉu tiuj ĉi posedas la kredon? Certe ne! Tamen ili scias tre bone, ke Dio ekzistas kaj, ke tiu ĉi sin rivelis al homoj ktp: ili scias tre bone per kiuj argumentoj oni demonstras, ke Dio ekzistas. Tamen ili ne havas la kredon! La kredo fakte sin fundas sur kredago kaj do sur fido je la komunikanto, kaj do sur amreago. Oni provu, eĉ strebu, imagi kredagon bazitan sur malinklino al la anoncanto aŭ revelacianto! Rifuzanto de Dio neniamaniere partoprenas intime al la vivo de la eklezio, ankaŭ se ekstere li tiel aspektas. Tial ĝuste la eklezio daŭrigas ne esti implikita en la peko, do konservas sian originan *sanktecan staton* ĝuste kiel proklamite en la kredkonfeso!

"2) Dua problemo: tiam ĉu la eklezio povas sin proklami fremda antaŭ la misfaroj, plenumitaj de kristanoj laŭ la jarcentoj, kaj hodiaŭ disraportitaj de la historiistoj kaj ĵurnalistoj de la multkultura medio, aŭ senplende, se ne senhonte, fingre indikitaj eĉ de ĝiaj paŝtistoj?

"Ne! La eklezio ne fremdiĝas el tiuj misfaroj pro tio ke ili ĉeestas kaj estis estigitaj kaj plenumitaj aŭ plenumigitaj de kristanoj aŭ kunkulpece de eroj de la kristana medio, ofte rajtigitaj per justigoj deduktitaj el la armilaro de la kristana teologio, pro tio ke la lavango de la misfarantoj, aŭ antaŭe aŭ poste, *videble* aniĝis al la eklezio, pro tio ke estas karakterizo de la eklezio pardonpeti pro la peko de la tuta homaro ktp. La eklezio pentofaras ankaŭ pro la kulpoj de kristanoj (dekomence ili tiaj edukiĝis) perfidaj kiaj Stalino kaj Hitlero, kiujn ĝi baptis sed ne sukcesis konfirmi en la kredo kaj en la laŭkrista konduto. Eklezio kondamnas la pekulon sed samtempe amas la malaprobiton kiel Kristo faris.

"Tial daŭras validi la principo: la eklezio ne kulpas kaj ne povas pardonpeti pri si! Kaj juste kaj devige la papo pardonpetis antaŭ la tuta homaro pro la ĉiuepokaj homrajtaj ofendoj plenumitaj de kristanoj.

"Tial daŭras valide la alia principo: la eklezio pardonpetas pro la pekoj de siaj ĉiuspecaj membroj, tio estas pro la misfaroj kaj pekoj de la membroj aspekte/intime kunligitaj al ĝi, kaj por membroj intime/neaspekte disiĝintaj.

"Kion dirus pri tia rezonado la profesiaj teologoj?". (Januaro 2002).

Plie li substrekis tiujn lastajn notojn:

"En elstara punkto mi ne penas min ne konflikti kun kleristoj kaj laikistoj: tio okazas kiam ili asertas la unuarangecon de la konscienco antaŭ la kredo. Ili ne scias, ke eĉ tiu principo fontas de la revelacio kaj de la kristana tradicio: estas ekzakte Sankta Paŭlo *(Rom 15 kaj disloke)* kiu tekstas, ke la konscienco rajtas ĉion juĝi kaj intelekte kribri kaj, ke homo devas obei al sia honesta konscienco. La Dua Vatikana Koncilio akcentis, ne malkiel la moderneco, tiun rajton emfazante, ke la homo devas sekvi la veron opiniatan tia de sia konscienco aŭ intelekto aŭ racio. Se intelekto konkludas, ekstremdeduktite, ke Kristo eraris, la konscienco devas lin forlasi, kaj inverse. Tio, cetere, koincidas kun la klasika helenisma kulturo, kie la racio kliniĝas nur antaŭ al la vero

"Kaj kio se laikistoj (kiuj batalas la eklezion je defendo de sia libera konscienco) kaj laikistoj (kiuj volas sekvi sian konsciencon kaj tion proklamas riproĉante la eklezion pro ties supozita manko de tiu prioritata principo) kaj ĝenerale nekredantoj scius, ke mem… estas pensantaj kristane? Kiom malpli da miskomprenoj se oni forigus la supozon de antikristaneco de tiu principo! Ku-

time miaj interparolantoj malĝoje penas agnoski, ke tiu principo deiras el kristanismo mem: ili ŝajnas suferi pro tio. Eble ili volus esti ĝiaj iniciatintoj. Prie, ĉiukaze, ili iom pravas ĉar ili revekis la principon ĝuste kiam kristanoj kondutis ĝin neglektante: ili nun elfosas perlon el kristana grundo foje tretumita de kredantoj mem pro la timo, ke praktika akcepto de tiu principo laŭleĝigu la kredforlason! Kredantoj rekonu tion kaj danku publike pro ĝia nova reenkarniĝo!...". (januaro 1997)".

Jen notoj pri prelego, eble skizo de artikolo, (marto 1999) el kiu atentigatas, ke la moderna kulturo igas preskaŭ neperceptebla grandparton de la religia simbolaro, notoj resumitaj ankaŭ en krajonumaĵoj sur paĝoj de liaj legitaĵoj.

Kaj, fine, la sekvaj, ŝajne sendependaj unu de la alia, skribitaj nervoze kaj malprecize:

"Ve! Ĉu ne okazas, ke *la temo kaj argumentado pri Dio* kontentigas pli mian volon imponi inter homoj ol veran sentatan bezonon pri Dio? Inter pledadoj kaj plendadoj pri Dio ĉu mi misuzas Dion por venki sur aliaj homoj?

"Al mi plaĉis, funde, pensi kaj konsoliĝi per la ekzisto kaj ĉeesto de Dio. Sed tiu plezuriĝo, akompaniĝanta kun rezonadoj pri la ekzisto de Dio, foje entrudiĝas malprave en verkon kiu, kvankam ampleksanta la tutan homon, devas resti nur senpasia esploro de la inteligento. Tio okazas, foje inverse, ĉe miaj interparolantoj kun mi, kiuj unue decidas ĉu la eventuala konkludo (pri la ekzisto kaj providenco de Dio) koincidas aŭ ne kun iliaj preferoj kaj deziroj, poste ekesploras riskante fuŝe fleksi la intelektan agadon laŭ tiuj preferoj. Oni klopodu, ke la procedo de la intelekto procedu senpasie!".

Ĉu humila konstato pri si aŭ ŝerca aludo al sia troa aplombeco en juĝoj pri proksimuloj, li skribis jenan, solecan en blanka paĝo, frazeron?

*"Ju pli mi pluiras en la vivon des pli ŝrumpiĝas la nombro de kretenoj kaj mi finiĝos por tiutipan koni nur unu!".*

Lasta frazo, skribita iom pli grande kaj substrekite, estas sintezo de lia juĝo pri si: *"Mi estadis apenaŭ flosanta inter la vero kaj la amo kaj iliaj maloj: kun la vero min altiranta foje mi luktis por fine min remeti al ĝi; kun la amo ĉar mi devis korekti mian emon esti pli amata ol amanta".*

La taglibro obskure konkludiĝas per: *"Nun vere estas finita kio devis esti finfine finita!"*

La du, Albina kaj la romane esperantiganto, kune proponas kaj engaĝiĝas relegi kaj finkompili kaj doni definitivan libran formon al liaj rakontaĵoj kaj taglibreroj. Kaj nun, disiĝante el sopirata aŭ fikcia leganto kaj konfidante tiujn paĝojn ĝuste al li, ili esperas, ke tiu ĉi, ferminte la libron, ne perdu la simpatiajn

kontaktojn kun personoj kies celado al idealoj trapasis, kvankam en pulsado de, plejparte ordinaraj, eventoj, moralaltecojn kaj moralmankojn inter kontrastigitaj mem-elektoj kaj travivaĵoj, kiuj eble spegulas la vivvojon de multaj...

Kaj nun la libro, post la definitiva kontrollegado, por detekti varispecajn malperfektaĵojn, de geedzoj Madella-Oberrauch kaj de multaj amikoj, konvinkiĝintaj dumlege ke Ĝino posedis ankaŭ la econ de vera verkisto, atendas eldoniston taksantan ke tiuj ĉi "romaniĝintaj vivtranĉaĵoj" meritas sperti ĉu kaj kiom ili samsonas kun la homa animo. Ĉi-okaze oni ne decidu preterlasi, en la titolo "La homo kiu ne sukcesis trompi sin mem", la vortojn "materialoj por romano", konjektigitaj certe de la modesteco de la diktanto-protagonisto kaj de la esperantiganto... Kaj fine tio estas realiĝanta!

# Indekso

ANTAŬLEGE....5

Ĉapitro unua
La kolegia vivo....1

Ĉapitro dua
Krudaj adaptiĝoj kaj pli krudaj aspiroj al milito....17

Ĉapitro tria
Necertecoj inter certecoj....31

Ĉapitro kvara
La novica vivo....41

Ĉapitro kvina
Novicado vera, sed interamuzaj distraĵoj....59

Ĉapitro sesa
Eraroj kaj peripetioj....81

Ĉapitro sepa
Al la konvento inter aventuroj....111

Ĉapitro oka
Konventa kaj klerikeca travivado....131

Ĉapitro naŭa
Luktoj por sin mem damaĝi....173

Ĉapitro deka
Ĉu fuĝo al saviĝo?....187

Ĉapitro dekunua
Posedi la veron kaj ribele ŝanceliĝi tra ĝi....223

Ĉapitro dekdua
Peripetioj kaj spertoj por eniri novan vivon....257

Ĉapitro dektria
Tra volontulaj engaĝoj kaj klubana vivo....271

Ĉapitro dekkvara
La familio, laboro, komunaj okazaĵoj
en ĉiam novaj spertoj....283

Ĉapitro dekkvina
La familia vivo....299

Ĉapitro deksesa
Inter lernantoj kaj profesoroj....321

Ĉapitro deksepa
Ĝojoj kaj malĝojoj de la pensiula vivo....349

Ĉapitro dekoka
La pasinto el si mem aktualiĝas....367

Ĉapitro deknaŭa
Ĉe la fino la tragedio....395

Ĉapitro dudeka
Ĉu pensiulo elseligita?....417

Ĉapitro dudekunua
Denove surseliĝinta kavaliro....423

Signifo de apartaj vortoj....439

# Signifo de apartaj vortoj

**Celibato** (senedzineco). Ĉar en la eklezio katolika kaj ortodoksa pastro ne rajtas edziĝi, sekvas ke ilia civila stato estas la celibato (okaze de eventuala vidveco, inter ortodoksuloj).
**Hebreoj, Judoj** = la terminoj havas la saman signifon, kvankam *hebreoj* foje pli referencas al pratempuloj kaj *judoj* al nuntempuloj.
**Itemo** = (el la angla item) enketilero prilaborebla sendepende.
**Kleriko** = ĉi-tie studento de teologio, kandidato al sacerdotiĝo, klerikiĝanto. Kutime *kleriko/klerikulo* ĝenerale signifas ekleziulon.
**Konvento** = konstruaĵo kaj kunvivado de fratuloj por aktiva vivo, distingenda disde monaĥejo, domo kaj kunvivado de religiuloj por kontempla vivo.
**Laikeco:** principoj el kiuj rezultas ke la ŝtata socio sendependas el ĉiu ajn ekstera entruda influo, eĉ religia, sed rekonas religion kiel publikan liberan asocion.
**Laikismo:** speco de laikeco kiu emas ekskludi religion el ĉio publika. Por iuj pensuloj, laikismo estas degenero de laikeco.
**Laikisto** = ricevas noton de kontraŭeco al la eklezio aŭ al kristanismo; la samo esprimiĝas ankaŭ per *laikigisto*. Ĝi foje en la saman sencon trenas, ĉe ruzaj aŭ malruzaj uzantoj, ankaŭ *laikulon.*
**Laiko, laikulo** = laŭ la eklezieca katolika lingvaĵo, apartenanta al la popolo de la kristanaj kredantoj, do ankaŭ la papo estas laiko; kutime tamen, tiu vorto distingas la nepastron de pastro. Alia signifo ĉe religiulaj ordenoj: laiko indikas monaĥon neordinitan. Profane ĝi indikas personon kiu agas aŭ decidas pro motivoj nereligiaj; se tiuj estas kontraŭreligiaj rezultas *laikisto aŭ laikigisto aŭ laikismulo.*
**Rajto aliri pastrecon.** En katolikismo tiu rajto ekzistas por neniu, ĉu viro ĉu virino: nur la vokito de la episkopo *rajtas* ordiniĝi.
**Religiuloj =** ordenanoj, tio estas religiaj personoj ligitaj al ordeno per promesvotoj de obeo, malriĉeco kaj ĉasteco. Se ne fratie kunvivantaj sed ligitaj per votoj, nome vivantaj en la mondo (sekulo) ekster fratio, temas pri religiuloj sekularaj. Se ne estus pro la malsameca statuta origino, ili povas korekte ankaŭ nomiĝi *monaĥoj je interpopola apostola agado.*

**Sekulareco, sekularulo, sekulara** = de latina *saeculum* (= homa mondo). Fronte al *religiulo*, nome persono konsekrita kaj vivanta en komunumo, indikas personon

vivantan ekster tiu komunumo, eĉ se religiulece aŭ pastrece. Fronte al *religiemulo* temas pri sinteno kiu ignoras aŭ flankenigas religion. Fronte *al religia socipolitik-konceptado* aludas mondumadon de la religiaj valoroj ilin elradikigante el supernatura origino *(Sekularigo).* Sekulo (sekulareco) foje sinonimas al mondo. Plurfoje *sekulariĝo* kaj *sekularulo* identas al laikiĝo kaj laikulo.

**Singulareco** = trajto karakteriza ekskluziva kaj unika. Pruntedonaĵo el astronomia scienco.

**Tonsuro** = la cirkle razita zenito de la kapo. Se etdimensia, la tonsuro indikas sekularan klerikularon, se tutkapdimensia, ĝi signalas membron de religia ordeno. Malofte hodiaŭ vidiĝas tonsuro kaj eĉ malpli ĝiaj diversformoj. Ĝi ĉiukaze signifas, ke la tonsurito ambicias plaĉi al sia Sinjoro, ne al homoj.

**Vokiĝo** (vokiteco) = esti vokata. En iuj kristanaj medioj tiu vorto akiras apartan signifon: esti vokata, de Dio, al la diservo en la pastreco aŭ religiula stato, kvankam praktike la lasta juĝo pri la vokiĝaj signoj dependas de la episkopo aŭ religiula superulo. Al vokiĝo sinonimas vokiteco aŭ diserva inklino ktp.

La aŭtoro esperantiĝis nur dum sia sesdeksesjariĝo post tridek jaroj de instruado pri la lingvoj helena kaj latina, kaj pri katolika religio. Intense partoprenis en la torina kluba vivo redaktante la ties revuon "Dumonata Bulteno", kaj "Venu kaj Vidu" periodaĵon de la Torina UECI-sekcio; kaj artikolis por pluraj esperantaj revuoj; nun partoprenas en la redakta stabo de Literaturo Foiro. Ne interesas ĉi tie ceteraj liaj verkoj en la itala lingvo.

Aliaj verkoj de la sama aŭtoro:

Traduko Esperanten, el la itala, de LA FUNDAMENTOJ DE LA KRISTANISMO. 290 p.

Traduko italen, el la esperanta, de "LA MORTOTUKO DE TORINO *LA NEEBLA OBJEKTO*" de A. Cherpillod, "LA SINDONE DI TORINO *L' OGGETTO IMPOSSIBILE*", 190 p.

Traduko Esperanten, el la helena, de la LETERO AL LA KORINTANOJ, de Klemento el Romo. 48 paĝoj.

Traduko esperanten, el la itala, de CONTRO MAESTRO CILIEGIA di Giacomo Biffi = KONTRAŬ MAJSTRO ĈERIZO. 250 paĝoj.

Kompililado de COMPENDIO ITALIANO-ESPERANTO DI TERMINI RELIGIOSI.

Esperantigis, el la greka, la Platonan dialogon KRATILO kun komento. Ĵus aperis, el lia plumo, el la latina, LA LEGENDO MAJORA pri Sankta Francisko, kaj (kun Silvia Garnero), el la greka, LA RIĈULO kaj LA SAVO de Klemento el Aleksandrio; kaj plue, el la grekaj apokrifaĵoj, LA EVANGELIO LAŬ TOMASO, LA EVANGELIO LAŬ JUDASO, VIVO DE LA BEATA ANTONO (LA GRANDA)

Ĉiuj tiuj verkoj elŝutocele gastas ĉe http://www.ueci.it/